Ulrich Lins

LA DANĜERA LINGVO

Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto



Eldonejo "Progreso"

LA DANĜERA LINGVO

alyaksandr.koshal@gmail.com
Aleksandro Koŝal
Жыве Беларусь!!!
29.10.2020 Minsko, Belarusio.

Ulrich Lins

LA DANĜERA LINGVO

Studo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto

Eldonejo "Progreso"

© U. Lins 1988
© "Progreso", postparolo 1990

1-a eldono ĉe Bleicher-Eldonejo (D-7016 Gerlingen, FR Germanio) por Universala Esperanto-Asocio (Rotterdam, Nederlando).
2-a eldono laŭ aparta kontrakto inter Universala Esperanto-Asocio kaj eldonejo "Progreso".

Л $\frac{4703010400-198}{014(01)-90}$ без объявления

ISBN 5-01-003136-1

ANTAŬPAROLO

La unua eldono de *La danĝera lingvo* estis publikigita en 1973 de la eldonejo L'omnibuso en Kioto. La broŝuro aperis en tre malgranda eldonkvanto, sed unu jaron poste ĝia enhavo estis presita kiel ĉapitro 21 en la verko *Esperanto en perspektivo*. En 1975 ampleksigita versio de la unua eldono aperis en japana traduko, farita de Kurisu Kei, ĉe la eldonejo Iwanami en Tokio.

Tie ĉi estas nun publikigita nova, tute reverkita manuskripto – la rezulto de plurjara ekspluato de tre granda, parte tute nova fontmaterialo. Estis mia deziro fari originalan kontribuon al la esploroj de la centjara historio de Esperanto, donante la ĉefan atenton al specifa aspekto de la historio – tiu kiu estis longe neglektata, eĉ de esperantistoj mem ofte rigardata kiel tabuo. Nome, temas pri la kontraŭstaro kaj la persekutoj, kiujn renkontis Esperanto pro politikaj-ideologiaj motivoj. Mi volis priskribi la sorton de la adeptoj de lingvo, kiun tra la jardekoj cenzuristoj, policanoj, naciistaj ideologoj kaj diverstipaj diktatoroj kalumniis kiel „danĝeran".

Mi do ne traktas la „internan" historion de la Esperanto-movado, sed la malamikajn reagojn, kiujn Esperanto kaj ĝiaj parolantoj renkontis ĉe politikaj reĝimoj kaj ideologioj, precipe ĉe la naziismo kaj stalinismo. Aliflanke, ne estas eble limigi sin nur al priskribo de la formoj, en kiuj Esperanto estis atakata. Necesas prezenti la argumentojn de la kontraŭuloj kaj analizi la motivojn, kiuj igis politikajn reĝimojn kun tre malsama karaktero persekuti la Esperanto-movadon. Tiuj motivoj povis fonti kaj el fundamentaj ideologiaj pozicioj kaj el konkretaj politikaj interesoj. En ligo kun tio, mi klopodas prilumi ankaŭ la sintenon de la movado mem kaj de individuaj esperantistoj, ĉar se ni ne konsciigas al ni la estiĝo-fonon de la lingvo, la motivojn de Zamenhof, la varbmetodojn, la teorion kaj strukturon de la movado, ni apenaŭ povus atingi komprenon pri tio, kial Esperanto iĝis objekto de persekutoj.

Jen estu listigitaj kelkaj demandoj, al kiuj la studo celas doni respondon. Kio entute estis provoka ĉe Esperanto? Ĉu estis ĝia nura ekzisto kiel internacia lingvo aŭ pli multe la maniero de ĝia

praktika uzo? Kia estis la politika-socia medio, en kiu la Esperanto-movado varbis por sia celo: dua lingvo por ĉiu homo? Kian rolon ludis adaptiĝemo kaj memfido fronte al registaroj, pri kies subteno la movado esperis, de kiuj ĝi tamen ne volis dependigi sian ekziston? Kia estis la rilato inter la „neŭtrala" lingvo kaj la „idealismaj" lingvo-adeptoj? Kiel interrilatis la esperantistoj kaj la adeptoj de aliaj celoj, kiuj estis direktitaj al tutmonda solidareco, ekzemple la pacifistoj, socialistoj kaj komunistoj? Kaj kiel la esperantistoj reagis je la – ofte neatenditaj – konfliktoj kun siaj kontraŭuloj? Kiaŋ instruon ili tiris el la persekutoj por la propra difino de la Esperanto-movado?

Por komprenigi la malfacilan pozicion de Esperanto en la batalkampo de ideologioj kaj potenc-interesoj, mi opiniis necesa almenaŭ skize klarigi ankaŭ la politikan evoluon de la koncernaj landoj, precipe en la cara Ruslando, en Germanio, en la balkanaj landoj, en Ĉinio kaj Japanio kaj en Soveta Unio. Tiamaniere sur la historion de la lastaj cent jaroj estas ĵetita – mi esperas – iomo da lumo, laŭ ĝis nun neordinara perspektivo. Mia baza intenco estis ĝuste tiu: montri, kiom da suspektemo, malŝato kaj rezisto elvokis la strebado al sendiskriminacia interhoma komunikado – strebado, kiu ofte estis identigata kun difinitaj grupoj (judoj, komunistoj, etburĝoj), sed kiu fakte reprezentas memstaran, hom-proksimigan internaciismon kaj kiel tia rifuzas esti metita en kutimajn kategoriojn. La persekutoj kontraŭ Esperanto tial instigu al konkludoj, kiuj transiras la temon de Esperanto kaj cetere konservas validon ankaŭ por la nuntempo.

Mi ŝuldas dankon al multaj esperantistoj pro tio, ke ili per la disponigo de informoj kaj klarigoj helpis la pretiĝon de la nun publikigita teksto. La nomoj de kelkaj helpintoj aperas en la piednotoj. Al ili mi aldonas tie ĉi nur sinjorojn Norbert Barthelmess, Michel Duc Goninaz, David L. Gold, Itô Kanzi, Kurisu Kei, Simo Milojević kaj Gaston Waringhien, kiuj bonvolis legi la manuskripton parte aŭ tute. (Sed pri eraroj en la prezento de faktoj aŭ en interpretoj kompreneble estas respondeca nur mi.) Dum la esplora laboro mi multe profitis de la kolektoj en Biblioteko Hodler (UEA), en Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj en la bibliotekoj de Japana Esperanto-Instituto kaj de Esperanto-Asocio de Britujo. Tre bonvenaj estis la materialoj, kiujn

kelkajn jarojn antaŭ sia forpaso donacis al mi Teo Jung, precipe la jarkolektoj de revuoj el la 20aj kaj 30aj jaroj. Al SAT kaj sinjoro Eduard Borsboom mi dankas pro la ebligo konsulti nepublikigitajn leterojn skribitajn de kaj al E. Lanti. Helpon donis ankaŭ nemovadaj institucioj, inter kiuj la Universitataj Bibliotekoj en Kŏln, Bonn kaj Tokio, Federacia Arkivo en Koblenz, Instituto pri Nuntempa Historio en Londono, Regna Instituto pri Milit-Dokumentado en Amsterdamo kaj Instituto pri Germana kaj Eksterlanda Laborista Literaturo en Dortmund. Fine, mi dankas al ĉiuj, kiuj helpis en la teknika prizorgo de la libro.

Oktobro 1986 U.L.

Atentigo

En citaĵoj mi lasis la originalan lingvaĵon netuŝita, krom se temis pri evidentaj preseraroj.

Pri la transskribo de propraj nomoj el lingvoj kun nelatina alfabeto mi konscias, ke mankas unueco de opinioj. Por tiu ĉi libro mi solvis la problemon jene: Ĉinaj nomoj estas transskribitaj laŭ la sistemo nun uzata en la Popola Respubliko, japanaj laŭ tiu oficiala sistemo, kiun preferas plimulto de la esperantistoj en Japanio. Rilate aliajn, ekzemple rusajn, nomojn mi uzis transskribon tre proksiman al la scienca, tamen kun kelkaj cedoj favore al la Esperanta alfabeto. En referencoj kaj citaĵoj, nomoj aperas en sia originale uzita formo.

Por personoj el orientaziaj landoj validas la sinsekvo: familia nomo unue, persona nomo poste.

En la piednotoj la plena titolo de libro estas indikita nur ĉe la unua mencio interne de ĉapitro; ĉe postaj citoj la titolo aperas mallongigite. Pri kelkaj ofte cititaj verkoj (interalie EdE, EeP, PVZ) vidu la liston de mallongigoj. Kiam temas pri revu-artikoloj, la nomon de la periodaĵo kutime sekvas la numero de la jar-volumo, poste la jaro de apero. Se tra la jar-volumo estas kontinua nombrado de paĝoj, mi rezignis indiki la numeron de la (monata k.s.) kajero.

Listo de mallongigoj

ASE	Asocio de Sovetiaj Esperantistoj
BBC	British Broadcasting Corporation (Brita Radio)
BEA	Bulgara Esperantista Asocio
BIL	P.E. Stojan, *Bibliografio de internacia lingvo*, Genève 1929 (represo Hildesheim, New York 1973)
cit.	citita laŭ
CK	Centra Komitato
E	Esperanto
EAĈSR	Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko
EdE	L. Kökény, V. Bleier (red.), *Enciklopedio de Esperanto*, Budapest 1933-34 (represoj 1979 kaj 1986)
EeP	Ivo Lapenna, Ulrich Lins, Tazio Carlevaro, *Esperanto en perspektivo. Faktoj kaj analizoj pri la Internacia Lingvo*, London, Rotterdam 1974.
EKRELO	Eldon-Kooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo
GDR	Germana Demokratia Respubliko
GEA	Germana Esperanto-Asocio
GLEA	Germana Laborista Esperanto-Asocio
GPU	Gosudarstvennoe političiskoe upravlenie (Ŝtata Politika Administracio, nomo de la soveta sekreta polico 1922/23)
IAREV	Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj
ICK	Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado
IEL	Internacia Esperanto-Ligo
IEMW	Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno
IKUE	Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista
IPE	Internacio de Proleta Esperantistaro
ISA	International Federation of the National Standardizing Associations (Internacia Federacio de Naciaj Normig-Asocioj)
ISE	Internacio de Socialistaj Esperantistoj
JEI	Japana Esperanto-Instituto
JEL	Jugoslavia Esperanto-Ligo
JPEU	Japana Prolet-Esperantista Unio
k	kaj
k-do	kamarado
KELI	Kristana Esperantista Ligo Internacia
kol.	kolumno
kp.	komparu
KP	Komunista Partio
KPSU	Komunista Partio de Soveta Unio
k.s.	kaj simile
LEA	Laborista Esperanto-Asocio
LKK	Loka Kongresa Komitato
MEM	Mondpaca Esperantista Movado
MEW	Karl Marx, Friedrich Engels, *Werke*, 39 vol., Berlin 1957-68.
n.	noto
NDEB	Neue Deutsche Esperanto-Bewegung (Nova Germana Esperanto-Movado)
NKVD	Narodnyj komissariat vnutrennyĥ del (Popolkomisarejo pri Internaj Aferoj)
n.s.	nova serio

NSDAP	Nationalsozialistische Deutsche Arbeiterpartei (Nacisocialista Germana Laborista Partio)
NTS	Narodno-trudovoj sojuz (Popol-Laborista Unio)
OGPU	Ob'edinënnoe gosudarstvennoe politiĉeskoe upravlenie (Unuigita Ŝtata Politika Administracio, nomo de la soveta sekreta polico 1923-1934)
p.	paĝo(j)
PEK	Proleta Esperanto-Korespondanto
PIDE	Policia Internacional e de Defensa do Estado (Internacia kaj Ŝtat-Defenda Polico, nomo de la portugala sekreta polico)
PIV	*Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto*, Paris 1970
PVZ	Ludovikito (= Itô Kanzi, red.), *Plena verkaro de L.L. Zamenhof*, Kioto 1973 k.sekv.
red.	redaktoro (kutime en la senco de „editoro")
RSDLP	Rusa Socialdemokrata Laborista Partio
RSFSR	Rusa Socialisma Federativa Soveta Respubliko
SA	Sturmabteilung (nomo de la milicio de NSDAP)
SAT	Sennacieca Asocio Tutmonda
SD	Sicherheitsdienst (Sekureca Servo)
SEJM	Soveta Esperantista Junulara Movado
SEU	Sovetrespublikara Esperantista Unio
s.j.	sen jarindiko
SS	Schutzstaffel (nomo de la centra organizo de polico kaj sekureca servo de nazia Germanio)
SSR	Socialisma Soveta Respubliko
S-ulo	*Sennaciulo*
t.n.	tiel nomata
UEA	Universala Esperanto-Asocio
UK	Universala Kongreso
USSR	Unio de Socialismaj Sovetaj Respublikoj
vd.	vidu
YMCA	Young Men's Christian Association (Kristana Asocio de Junaj Viroj)

ENHAVO

Antaŭparolo		5
Listo de mallongigoj		8
1.	SUSPEKTO KONTRAŬ NOVA LINGVO	15
1.1.	Zamenhof kaj la origino de Esperanto	15
1.2.	Naskodoloroj sub la cara cenzuro	21
1.3.	Penetro en okcidenton	29
1.4.	La idea flanko de Esperanto	36
1.5.	Esperanto en la imperiestra Germanio	43
1.6.	„Ŝtelista lingvo"—„burĝa malsaĝaĵo"	51
1.7.	UEA kaj la internaciismo	57
1.8.	Lukto kontraŭ Esperanto en Ligo de Nacioj	61
1.9.	La burĝa movado en defensivo	70
1.10.	Persekutoj en la 1920aj jaroj	79
2.	„LINGVO DE JUDOJ KAJ KOMUNISTOJ"	91
2.1.	Esperanto en la Respubliko de Weimar	91
2.2.	La leviĝo de nova malamiko	96
2.3.	„Samdirektigo"	100
2.4.	Esperantistaj nazioj	108
2.5.	La vojo al malpermeso	111
2.6.	Esperanto—ĉu nura lingvo?	120
2.7.	En la okupitaj landoj	130
2.8.	Sekvante la nazian modelon	134
2.9.	Saniga leciono por la neŭtrala movado	145
3.	PERSEKUTOJ EN ORIENTA AZIO	157
3.1.	Ĉinio	157
3.2.	Japanio	165
3.3.	Koreio kaj Tajvano	182

4. „LINGVO DE ETBURĜOJ KAJ KOSMOPOLITOJ" 189

4.1. *Prospero de Esperanto en Soveta Unio* 190
4.1.1. Postrevoluciaj esperoj 190
4.1.2. Fondiĝo de SEU kaj SAT 200
4.1.3. Pluralismo kaj unueca fronto 207
4.1.4. Internaci-eduka laboro per Esperanto 217
4.1.5. Sukcesoj en la koresponda agado 224
4.1.6. Akriĝinta klasbatalo kaj la „misuzo" de Esperanto 233
4.1.7. Diskuto pri programo de SAT 241

4.2. *Skismo en SAT kaj pereo de la soveta movado* 247
4.2.1. La agado de SEU inter subteno kaj suspekto 247
4.2.2. SAT kaj la sennaciismo 257
4.2.3. Skismo en la laborista Esperanto-movado 263
4.2.4. IPE, ISE kaj SAT 273
4.2.5. Esperanto en la maturiĝ-procezo de stalinismo 278
4.2.6. Distanciĝo inter SEU kaj IPE 292
4.2.7. La sovetaj esperantistoj silentas 302
4.2.8. IPE en agonio 309

4.3. *Socialismo kaj lingvo internacia* 316
4.3.1. Frusocialistaj revoj pri universala lingvo 316
4.3.2. La problemo de antaŭrevolucia internaciismo ĉe Marx kaj Engels 319
4.3.3. Kautsky kaj la vojo al lingva unueco en socialismo 324
4.3.4. Unuaj reagoj al Esperanto kaj la opinio de Gramsci 328
4.3.5. Lenin kaj la nacia problemo 333
4.3.6. Stalin, Marr kaj la praktika agado de SEU 341
4.3.7. Por la konstruo de marksisma lingvistiko 347

4.3.8. Kultura revolucio kaj la dialektiko de Stalin 352
4.3.9. Skrypnyk kontraŭ esperantigo 356
4.3.10. La miskalkulo de Jazykfront 362
4.3.11. Diskuto pri la rusa lingvo 365
4.3.12. Letero de Stalin kaj „Tezoj pri internacia lingvo" 371
4.3.13. La vana teoriumado 377

4.4. *Kialoj de la pereo de Esperanto en Soveta Unio* 383
4.4.1. Kio okazis en 1937/38? 383
4.4.2. Esperantistoj en la Granda Purigo 396
4.4.3. La evoluo al soveta patriotismo 404
4.4.4. Sukcesoj kaj limoj de la internacia korespondado 410
4.4.5. La fino de korespondado 423

4.5. *Post la Dua Mondmilito* 433
4.5.1. La Granda Silento en orienta Eŭropo 433
4.5.2. Stalin kontraŭ Marr 449
4.5.3. La bezonoj de la nuntempo 459
4.5.4. Revivigo de la movado 469
4.5.5. Orienta Eŭropo: progreso kun problemoj 491
4.5.6. Soveta Unio: inter esperoj kaj duboj 503

Konkludoj 526

Kronologio 532

Indekso de personoj 537

1. SUSPEKTO KONTRAŬ NOVA LINGVO

1.1. *ZAMENHOF KAJ LA ORIGINO DE ESPERANTO*

La aŭtoro de Esperanto apartenis al persekutata gento. Lazaro Zamenhof, kiu en 1887 publikigis sian projekton de internacia lingvo, estis judo, kaj li vivis en la rusa regno, kies kvar milionoj da judaj loĝantoj konsistigis proksimume duonon de la tutmonda judaro[1], sed samtempe spertadis diskriminacion kaj subpremon en grado, kiun la plimulto de iliaj samgentanoj en okcidenta Eŭropo jam konsideris pasintaĵo. La naskiĝurbo de Zamenhof estis Bjalistoko, kie kunvivis judoj (pli ol du trionoj), poloj, rusoj, germanoj kaj belorusoj – ĉiuj kun sia aparta lingvo kaj la inklino suspekteme rilati al la alia. En tiu medio originis Esperanto, kiel klarigis Zamenhof en longa letero al la rusa esperantisto Nikolaj Borovko:

> En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj.

Pro tio, skribis Zamenhof, li decidiĝis, ke „kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos tiun ĉi malbonon".[2]

Kiam tiu ĉi letero estis publikigita en 1896, ĝi donis al la unuaj esperantistoj „grandan kortuŝon"[3]; ĝi poste estis ofte citata al la publiko kiel tre klara ekspliko de la motivoj de Zamenhof kaj kiel aparte konvinka klarigo pri la bezono de internacia lingvo. Ĝi prezentis la aŭtoron de Esperanto kiel altruisman batalanton por interkompreniĝo trans ĉiujn naciajn antagonismojn, kiel homon plenan de modesteco kaj idealismo, al kies celado malfacile eblis ne montri respekton.

Tute ne konata dum kvar jardeko estis, kontraŭe, alia letero de Zamenhof, skribita en 1905 al la franco Alfred Michaux. En

1. David Vital, *The origins of Zionism*, Oxford 1975, p. 30 (stato de 1880).
2. PVZ IV 28 (la letero al Borovko estis publikigia en 1896, sed Zamenhof eble verkis ĝin jam en 1894). – Pri Bjalistoko vd. N.Z. Maimon, *La kašita vivo de Zamenhof*, Tokio 1978, p. 17 k. sekv.
3. *Senlegenda biografio de L.L. Zamenhof*, Kioto 1982, p. 103.

tiu letero Zamenhof forte elstarigis sian judan devenon kaj la ligitecon de ĉiuj siaj idealoj kun sia aparteno „al tiu ĉi tiel antikva kaj tiom multe suferinta kaj batalinta popolo, kies tuta historia misio konsistas ... en la unuigo de la nacioj en la celado al *„unu dio"*. Zamenhof asertis, ke, se li ne estus „hebreo el la ghetto", „la ideo pri la unuigo de la homaro" ne okupus lin tiel obstine kaj ke neniu tiel forte kiel judo povas senti la neceson de „lingvo sennacia, neŭtrale homa".[1]

Oni ne bezonas tamen vidi kontraŭdiron inter tiuj du leteroj. Ili redonas pensojn, kiujn Zamenhof havis en malsamaj cirkonstancoj. Ne estas klare, ĉu li, laborante super sia projekto de internacia lingvo, jam en sia junaĝo pensis pri la specifa utilo, kiun donus la lingvo al la judoj. Lia familia fono ne tuj instigas nin paroli pri cirkonstancoj, kiuj lin nerezisteble pelis al misia fervoro. La familio, kiu ekde 1873 loĝis en Varsovio, estis asimiliĝema, fidante pri plua pliboniĝo de la jura situacio de judoj. La patro, instruisto en real-lernejo, estis adepto de la juda klerisma movado Haskala, kiu konsideris sin parto de la ĝenerala klerismo estiĝinta en okcidenta Eŭropo kaj havis la esperon, ke la ideoj de egalrajteco fine venkos ankaŭ en Ruslando. Zamenhof do ekkreskis ne en la tradiciema atmosfero kaj sufoka malriĉo de juda geto, sed en la medio de tiu malplimulto de burĝaj kaj intelektulaj judoj, kiuj vidis sian vojon al emancipo en kiel eble plena sinintegrigo en la ĉirkaŭan socion.

Marko Zamenhof, la patro, efektive ŝajnas tipa reprezentanto de la modernema urba judaro en Ruslando. Li celis esti lojala civitano de la rusa ŝtato, konsideris sin mem ruso, kies judeco reduktiĝis al la juda religio, kaj deziris, ke liaj infanoj socie avancu per utiligo de la disponeblaj eduk-ŝancoj. Karakterizas lian sintenon la konservita raporto pri la inaŭguro de nova sinagogo en Bjalistoko, en 1868. Marko faris je tiu okazo ruslingvan paroladon, en kiu li, menciinte antaŭajn persekutojn, esprimis sian dankon al caro Aleksandro II „pro liaj justaj leĝoj kaj bonaj ordonoj" kaj alvokis la judojn iri laŭ la spirito de la nova, liberala epoko: „ni ne plu apartiĝu de niaj fratoj, la rusoj, inter kiuj ni

1. Letero al Michaux, de 21-2-1905, PVZ VII 27-28.

vivas, sed partoprenu, egale kiel ili, en ĉiuj rajtoj de la lando, por niaj bono kaj feliĉo."[1]

La infanaĝo de Lazaro pasis sub la influo de tiu neapartiĝemo. Li mem memoris poste, ke li „amis tre pasie la lingvon rusan kaj la tutan rusan regnon" kaj ke li „revis iam fariĝi granda rusa poeto".[2] Lingvoj ĝenerale iĝis ŝatokupo lia. Portempe li esperis revivigi unu el la antikvaj lingvoj[3] kaj ankaŭ pensis pri la reenkonduko de la hebrea kiel parolata lingvo.[4] Fine, tamen, li „komencis malklare revi pri *nova*, arta lingvo".[5] Tre verŝajne lian fantazion jam frue stimulis la legendo pri la Babelturo; ĝi igis pensi pri tiu tempo, kiam la homoj ankoraŭ povis libere interkomunikiĝi, kaj sekve ankaŭ pri la demando kiel venki la staton estiĝintan en Babelo. Karakteriza estas la komento, kiun la maturaĝa Zamenhof faris pri la biblia rakonto en 1908: „Tio, kio iam estis sekvo de la babela turo, funkcias nun kiel kaŭzo; iam konfuziĝis la lingvo kiel puno pro la pekoj, sed nun la lingvokonfuzo kaŭzas la pekojn."[6]

En la fino de 1878, kiam Zamenhof estis ankoraŭ gimnaziano, la unua projekto de „lingwe uniwersala" estis preta. Ĝoje li kune kun kelkaj amikoj recitis, tute sub la influo de la ideoj de klerisma homfrateco, la unuajn versojn en la nova lingvo:

> Malamikete de las nacjes
> kadó, kadó, jam temp' está!
> La tot' homoze in familje
> konunigare so debá![7]

Sed je tiu tempo Zamenhof ankoraŭ hezitis publike elpaŝi kun sia projekto: „Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron."[8] Li finis la gimnazion meze de 1879 kaj foriris al Moskvo por ekstudi medicinon. Li troviĝis tie, kiam, en marto 1881, la caro Aleksandro II estis murdita de anarkiistoj, kaj ni ne troigas, se ni atribuas al tiu atenco gravajn

1. Maimon, p. 31.
2. PVZ VII 32.
3. PVZ IV 28.
4. „Esperanto and Jewish ideals", *The Jewish Chronicle*, 6-9-1907, p. 16; Esperanta traduko de tiu intervjuo kun Zamenhof: Maimon, p. 164.
5. PVZ IV 29.
6. Cit. Maimon, p. 66. – En 1889 Zamenhof nomis la mikson de la lingvoj „unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la homaro": PVZ II 46.
7. PVZ IV 31.
8. PVZ IV 32.

sekvojn ankaŭ por la plua agado de Zamenhof. Post la murdo, la politika atmosfero en Ruslando rapide malboniĝis, precipe por la judoj. En aprilo komenciĝis pogromoj. Ili disvastiĝis tra grandaj partoj de Ruslando kaj daŭris dum pli ol unu jaro, fine konsistigante la plej grandan persekutadon, kiun la judoj spertis en la moderna epoko. Kio faris tiujn pogromojn des pli signifaj, estis la fakto, ke temis ne nur pri plebaj kruelaĵoj, sed ke ilin akompanis la silenta aŭ eĉ rekta aprobo de la caraj aŭtoritatoj.

Inter la judoj de Ruslando la seniluziiĝo pri la nova eksplodo de antisemitismo estis aparte profunda pro tio, ke la politiko de la murdita caro estis alportinta al ili kelkajn ŝanĝojn al bono kaj precipe inter la pli asimiliĝemaj judoj estis nutrinta grandajn esperojn je iom-post-ioma akiro de egalrajteco. Sed nun, de 1881, la ruslandaj judoj estis dolore konsciigitaj, ke la antisemitismo ne estas ekstermita kaj ke iliaj provoj asimili sin al la ĉirkaŭo renkontas nesupereblajn barojn. Multajn el ili tio pelis al konsciiĝo pri la bezono, ke ili kiel judoj kolektive renaskiĝu – al la serĉado de solvo de la juda problemo ne plu per sinadapto al malamika ĉirkaŭaĵo, sed per nacia renesanco redononta al la judoj propran teritorion. Ekde la vintro de 1881/82 en multaj urboj de Ruslando kreiĝis grupoj, kiuj, nomante sin Hovevei Zion[1], propagandis la ideon revivigi judan ŝtaton en Palestino. Stimulon al tiu nova, pra-cionisma movado donis precipe la broŝuro *Autoemancipation!* de Leon Pinsker[2], juda kuracisto en Odessa, kiu antaŭe estis arda adepto de Haskala, sed en 1881, post la terura detruo de siaj esperoj pri daŭra progreso en la direkto de harmonia kunvivado de judoj kaj rusoj, radikale ŝanĝis sian opinion kaj nun komencis konvinki siajn samgentanojn pri tio, ke ilia saviĝo povas konsisti nur en memhelpo, nacia solidareco kaj reakiro de teritoria bazo.[3]

Ankaŭ Zamenhof, kiu aktuale travivis la novan leviĝon de kontraŭjudaj sentoj en Moskvo, estis edukita, kiel ni vidis, en la medio de kleristoj, kiuj plej multe ŝokiĝis pro la reveno de antisemitismo. Eblas vidi en tiu kunteksto la amaran konstaton faritan

1. Amikoj de Ciono. La movado estis ankaŭ nomata Hibbat Zion (Amo al Ciono).
2. La broŝuro aperis germanlingve en Berlino en septembro 1882.
3. Vital, p. 122-132.

de li en la letero al Michaux: „... mi konvinkiĝis, ke mian amon [al la rusa lingvo kaj la rusa regno] oni pagas per malamo." Li aldonis, ke homoj, kiuj pretendas monopolon pri la ĝusta difino de ruseco, vidas en li, la judo, „nur *senrajtan fremdulon*". Zamenhof tiamaniere estis repuŝita al sia judeco, kaj li per tio samtempe tuj sentis sin stimulita helpi unuavice tiujn, kiujn oni „malamas, malestimas kaj premegas": liajn judajn fratojn.[1] Ankoraŭ dum la restado en Moskvo li okupiĝis pri la ellaboro de gramatiko de la jida lingvo[2], kaj ankaŭ estis jam tie, ke lin kaptis la ideo pri la fondo de kolonio „en iu senhoma parto de la mondo", el kiu poste estiĝu sendependa juda ŝtato.[3]

En aŭgusto 1881 Zamenhof revenis al Varsovio por daŭrigi siajn studojn. Nelonge poste tie okazis, kion neniu atendis: Je Kristnasko ankaŭ la varsoviaj judoj spertis pogromon. Tio ĉi definitive kaŭzis, ke la atento de Zamenhof dum kelkaj jaroj koncentriĝis al la juda problemo.[4] Li enviciĝis inter la pioniroj de la koloniiga movado kaj fondis kun judaj studentoj la unuan cionistan societon de Varsovio.[5] En la sekvantaj jaroj, precipe ĝis 1884, Zamenhof vigle partoprenis en la debatoj pri rekonstruo de la malnova Israelo aŭ kreo de nova hejmlando por judoj, i.a. per artikoloj, kiujn li kontribuis al la ruslingva juda semajngazeto *Razsvet* (Tagiĝo) aperanta en Peterburgo.[6]

1. PVZ VII 32. – La konstato estis farita tamen en la kunteksto de priskribo de la infanaĝo en Bjalistoko.
2. La ruslingva manuskripto de la gramatiko estas publikigita, kun Esperanta traduko (de J. Kohen-Cedek), en Adolf Holzhaus, *L. Zamenhof, Provo de gramatiko de novjuda lingvo* kaj *Alvoko al la juda intelektularo*, Helsinki 1982, p. 9-36. – Vd. ankaŭ PVZ V 37-50; Maimon, p. 71-73; Adolf Holzhaus, *Doktoro kaj lingvo Esperanto*, Helsinki 1969, p. 19-34; Bernhard Golden, „La jida gramatiko de d-ro Zamenhof", *Heroldo de Esperanto* 57. 1981, n-ro 16 (1691), p. 1.
3. En sia intervjuo por *The Jewish Chronicle* Zamenhof rakontis, ke tian planon li proponis en kunveno de 15 kunstudantoj: Maimon, p. 168.
4. Laŭ Edmond Privat (*Vivo de Zamenhof.* Tria eldono, Heronsgate 1946, p. 42), tamen, Zamenhof jam en aŭgusto 1881 komencis reokupiĝi pri sia lingvo-projekto.
5. Maimon, p. 101, 169. – Tiu studenta grupo kunfandiĝis kun la en aŭgusto 1883 fondita ĝenerala societo de Hibbat Zion en Varsovio, kiu baldaŭ iĝis la plej aktiva el ĉiuj grupoj (Vital, *The origins*, p. 152).
6. Zamenhof komence pledis por setlado en Usono, sed poste konvertiĝis al la ideo de juda ŝtato en Palestino. Tri kontribuaĵoj al *Razsvet* de 1881/82 estas represitaj kaj tradukitaj en Holzhaus, *Doktoro kaj lingvo Esperanto*, p. 87-136; vd. ankaŭ PVZ V 58-95.

Sed la aktivado de Zamenhof, kiom ajn intensa, ne daŭris longe. Iom post iom, intertempe pretiĝinte por sia profesio kiel okulkuracisto, li komencis dubi, ĉu la cionismo alportos solvon de la juda demando. Li sentis skrupulojn pri tio, ĉu li entute rajtas tiom fordoni sin nur al sia propra gento kaj flankenlasi tuthomarajn konsiderojn. Kiel li skribis al Michaux, en li de plej frua infaneco fakte „ĉiam superregadis la *‚homo'*, tamen pro la malfeliĉega stato de mia popolo, en mia koro ofte vekiĝadis la *‚patrioto'*, kiu terure bataladis en mia koro kontraŭ la *‚homo'*".[1] En la jaro 1887 tiu ĉi konflikto estis decidita favore al la homo: Zamenhof komplete ĉesigis sian aktivadon por teritorio de judoj[2] kaj tute disponigis sin al la lingvo, kiun tiujare li prezentis sub la pseŭdonimo „Doktoro Esperanto". Dum la postaj du jardekoj, ĉe Zamenhof dominis la penso pri tuthomara, neŭtrala lingvo, per kiu malaperu ne nur malamo kaj persekuto al judoj, sed samtempe entute „ĉiuj naciaj malamoj".[3] Ne estis tiel, ke Zamenhof ĉesis pensi pri la judoj. Li konservis sian strebon helpi la subprematan judan genton, kaj estas evidente, ke tiu strebo multe akcelis la fervoron, kiun li dediĉis al Esperanto. Sed la deziro helpi la judojn estis de nun firme enkadrigita en la deziron kontribui al la interpacigo kaj unuigo de la tuta homaro.

Estas notinde, ke la internaj pensoj de Zamenhof apenaŭ respeguliĝas en la „Unua Libro". Ĝia antaŭparolo, nur modere evidentigante la idealismon de la aŭtoro, ĉefe elstarigas praktikajn argumentojn. Nome, ĝi atentigas pri la perdo de tempo kaj de materiaj rimedoj, kiun kaŭzas la neceso lerni plurajn fremdajn lingvojn, kaj sekve konstatas, kiom utile estus, se ĉiu homo bezonus dependi nur de la scio de du lingvoj – la gepatra kaj la nove proponata neŭtrala, internacia lingvo. En ligo kun tiu argumentado ne mankas formuloj, kiuj estas idealismaj. Ekzemple, Zamenhof asertas, ke la „diferenco de la lingvoj prezentas la esencon de la diferenco kaj reciproka malamikeco de la nacioj"[4], kaj li parolas pri la speciala utilo, kiun neŭtrala lingvo havus en

1. PVZ VII 31.
2. Zamenhof venis ankaŭ al la konkludo, ke reveno al Palestino estas nerealigebla revo. Al la granda cionisma movado de Theodor Herzl, fondita en 1897, li ne aliĝis.
3. PVZ VII 33.
4. PVZ I 10.

landoj kun diverslingva loĝantaro, tiel malkaŝante, ke lin instigis kaj plu okupas la penso pri la situacio en Ruslando. Idealismon montris kaj samtempe nutris ankaŭ la pseŭdonimo „Esperanto", baldaŭ uzota por la lingvo mem.[1]

Sed ke la lingvo-projekto entute povis ekvivi, ŝuldiĝas pli multe al tiu komponento ĉe Zamenhof, kiun ni nomu lia praktika sento. En sia unua lernolibro li deklaris: „Internacia lingvo, simile al ĉiu nacia, estas propraĵo socia, kaj la aŭtoro por ĉiam forcedas ĉiujn personajn rajtojn je ĝi."[2] En sia *Dua Libro* de 1888 li precizigis: „Mi ne volas esti *kreinto* de l' lingvo, mi volas nur esti *iniciatoro*."[3] Zamenhof opiniis, ke Esperanto „devas vivi, kreski kaj progresi laŭ la samaj leĝoj, laŭ kiaj estas ellaborataj ĉiuj vivaj lingvoj"[4]; li ne volis laŭ sia „persona plaĉo" krei „la tutan lingvon de l' kapo ĝis la piedoj".[5] Unuafoje esprimante la ideon pri evoluo de internacia lingvo surbaze de kolektiva uzado, sendepende de persona aŭtoritato, Zamenhof rezervis al la homa socio kaj al la ĉiutaga praktiko la taskon prijuĝi, vivteni kaj evoluigi Esperanton.

1.2. *NASKODOLOROJ SUB LA CARA CENZURO*

Kiom ajn neprovoka ŝajnis la ideo de Zamenhof pri lingvo, per kiu „la popoloj interproksimiĝus kiel unu familio"[6] – unue li devis venki la barojn de cenzuro. Ironie, la patro mem apartenis al la burokratio, kiu devis zorgi, ke la civitanoj estu ŝirmataj kontraŭ scioj nedeziratajn de la cara reĝimo. Marko Zamenhof, krom esti instruisto, laboris ekde 1878 ankaŭ kiel cenzuristo, estante kompetenta pri la eldonaĵoj en hebrea kaj jida lingvoj. Tiun taskon li plenumis kun la neskuebla rigoro de asimiliĝema judo;

1. Kp. Pierre Janton, *L'espéranto*. Dua eldono, Paris 1977, p. 33-34.
2. PVZ I 8.
3. PVZ I 52.
4. *Aldono al la „Dua Libro de l' Lingvo Internacia"* (1888); PVZ I 94-95.
5. Samloke, p. 93.
6. PVZ I 9.

de la judaj verkistoj kaj redaktoroj en Varsovio li estis timata pro sia akra pedanteco.[1]

Por la filo, tamen, la pozicio de la patro havis evidentan avantaĝon, kiam en 1887 li petis permeson eldoni broŝuron pri sia projekto de nova lingvo. Marko Zamenhof persvadis sian kolegon, kiu prizorgis la ruslingvajn eldonaĵojn, ke li donu aprobon al la verketo de lia filo, al tiu „nedanĝera sensencaĵo".[2] La permeso por presado estis donita la 2an de junio 1887, la krome bezonata permeso por disvendo la 26an de julio. Povis aperi 40-paĝa ruslingva libreto, per kiu la junaĝaj revoj de Lazaro Zamenhof por la unua fojo havis konkretan rezulton. Sekvis eldonoj de la Unua Libro en la pola, franca, germana, angla, hebrea kaj jida, baldaŭ ankaŭ pliaj instruiloj de la lingvo. Jam en la jaro 1891 oni nombris 33 lernolibrojn de Esperanto en 12 lingvoj.

La legantoj de la Unua Libro estis petitaj subskribi kaj resendi al la aŭtoro kuponojn kun la promeso, ke la subskribinto ellernos la lingvon, se montriĝos, ke la saman promeson publike donis dek milionoj da personoj. Sed anstataŭ nur promesi – la plej multaj interesiĝantoj jam tuj lernis Esperanton. En septembro 1889 Zamenhof povis eldoni la unuan adresaron de 1000 personoj, kiuj ĝis tiam estis lernintaj la lingvon; la granda plimulto vivis en la rusa regno. En tiu kompilaĵo oni samtempe povas vidi la ĝermon de organizo de la esperantistoj kaj sub la tiamaj cirkonstancoj en socio, kiu malfruiĝinte serĉis sian vojon al industriigo, ankaŭ politikan defion – almenaŭ laŭ la antaŭvidoj de la reĝimo, kiun ofte jam timigis libervolaj kunligiĝoj, eĉ se ties celado ŝajnis tute sendanĝera.[3]

En la historia arkivo de Leningrado troviĝas 130 dosieroj de la iama cara administracio pri Esperantaj eldonaĵoj de la jaroj 1887 ĝis 1917. Kiel montras studo de la leningrada esperantisto S.K.

1. Maimon, p. 143-149, 151-159; Holzhaus, *Doktoro kaj lingvo*, p. 7-18.
2. Z. Adam (Adam Zakrzewski), *Historio de Esperanto 1887-1912*, Varsovio 1913, p. 10.
3. Reinhard Bendix, *Könige oder Volk. Machtausübung und Herrschaftsmandat*. Dua parto, Frankfurt a.M. 1980, p. 464. – Pri la cara cenzuro ĝenerale: Charles A. Ruud, *Fighting words. Imperial censorship and the Russian press, 1804-1906*, Toronto 1982. Krome, vd. Heinz-Dietrich Löwe, *Antisemitismus und reaktionäre Utopie. Russischer Konservativismus im Kampf gegen den Wandel von Staat und Gesellschaft, 1890-1917*, Hamburg 1978.

Ĥvorostin, kiu bazis sin sur tiuj dokumentoj[1], la unuaj eldonaĵoj de Zamenhof glate trapasis la cenzuron, verŝajne ĉar ĝi ankoraŭ rigardis la aktivadon de la lingvo-kreinto kiel aferon neglektindan, sekve ne malpermesendan. Sed jam en aŭtuno 1888 Zamenhof renkontis la unuan gravan malhelpon, kiam li sensukcese submetis la peton eldoni semajnan gazeton por la iom post iom multiĝantaj lernantoj de Esperanto.[2] La estro de la Ĉefa Administracio por Gazetaraj Aferoj, E.M. Feoktistov, rekomendis al V.K. Pleve, tiutempe vicministro pri internaj aferoj, malakcepti la petskribon, ĉar „en cenzurejo mankas persono, kiu povas trarigardi eldonojn en nove inventitaj lingvoj"; Pleve konsentis.[3]

Zamenhof ĝuste tiam troviĝis en kriza situacio, ĉar lia patro estis senigita je sia cenzurista posteno kaj riskis perdi ankaŭ sian oficon kiel instruisto. Marko Zamenhof jam estis altirinta al si la malfavoron de sia superulo en Peterburgo, N.V. Zusmen, ĉefo de la hebreaj cenzuristoj, pro tio ke li permesis la publikigon de jidlingva eldonaĵo, en kiu aperis satira poemo protestanta kontraŭ la pogromoj. Kiam iom poste la hebrelingva gazeto *Ha-Zefira* (Matenruĝo) en Varsovio aperigis artikolon pri la malutilaj efikoj de troa vintrinkado je la intelekta kapablo de homo, Zusmen, konata pro sia drinkemo, nomis tion „ofendo al la caro", kaj Marko Zamenhof, respondecigita, perdis sian postenon.[4] Nur per la pago de granda monsumo li povis eviti pli drastajn sekvojn.

Por la filo, kiu finance subtenis la patron, nun komenciĝis pezaj jaroj. Kiel juna oftalmologo, li provis en diversaj lokoj atingi profesian stabiliĝon. Ĉar la sortobato de la patro ankaŭ ĉesigis la helpan kontakton kun la varsovia cenzura oficejo, lin de tiam pli ofte okupis la luĝto kun burokratoj. En letero de la 6a de junio 1891 Zamenhof skribis, ke la provincaj cenzuraj komitatoj rifuzas okupiĝi pri Esperanto-rilataj eldonaĵoj kaj postulas, ke petoj pri permeso estu sendataj al Peterburgo.[5] La politiko de la

1. S.K. Ĥvorostin, „Cara cenzuro kaj Esperanto", *Scienca Revuo* 23. 1972, p. 37-46, 79-88; vd. ankaŭ Holzhaus, *Doktoro kaj lingvo*, p. 274-317.
2. Faksimilo de la petskribo kaj Esperanta traduko estas en Holzhaus, p. 292-305, 310-312.
3. Ĥvorostin, p. 38; Holzhaus, p. 306-313.
4. Maimon, p. 152-156.
5. Letero al V.V. Majnov, PVZ II 197.

tiea Ĉefa Administracio karakteriziĝis per stranga ambivalenco: Dum 1891/92 Zamenhof ne sukcesis eldoni novan libron nek reeldoni malnovan, sed samtempe, dank' al la favora sinteno de la cenzuristo pri eksterlandaj aferoj, E. Gejspic, estis eble importi esperantlingvajn eldonaĵojn el aliaj landoj al Ruslando, i.a. la ĉefan organon de la ekĝermanta movado, *La Esperantisto*, kiu aperis en Nürnberg ekde la 1a de septembro 1889.

En aprilo 1892 la rusa ministro pri internaj aferoj oficialigis la unuan Esperanto-societon en Ruslando, la klubon "Espero" en Peterburgo. En la postaj du jaroj la ankoraŭ eta movado trapasis sian unuan internan krizon. Dezirante demeti personan respondecon, Zamenhof en januaro 1893 proponis, ke la abonantoj de *Esperantisto*[1] kunligiĝu al Internacia Ligo Esperantista; al ili li poste prezentis projekton de reformoj en la lingvo, parte sub premo de esperantistoj, kiuj estis malkontentaj pro la nerapida disvastiĝo de Esperanto kaj atribuis ĝin al strukturaj malfortoj de la lingvo. En voĉdono klara plimulto de la abonantoj esprimis sin kontraŭ iaj lingvaj ŝanĝoj. Tio mortigis la planon pri internacia organizo. Sed por la disvolvo de la movado la rezigno pri reformoj montriĝis stabiliga faktoro, kaj Zamenhof mem faris multon por montri, ke Esperanto taŭgas tia, kia ĝi estas, eĉ por literaturaj taskoj: Lia traduko de *Hamleto*, publikigita en 1894, „ĝuis senkomparan influon kaj pli efikis por la disvastigo de la lingvo, ol ĉiuj plej lertaj teoriaj admonoj".[2]

En la jaroj 1894 ĝis 1899, Esperantaj eldonaĵoj estis tralasataj el eksterlando al Ruslando, kaj se oni prezentis peton al la oficejo, kiu cenzuris eksterlandajn eldonaĵojn, tio ebligis ankaŭ la presadon de kelkaj verkoj en Ruslando mem.[3] Kiel resume juĝas Ĥvorostin, la cara cenzuro ne havis rilate al Esperanto difinitajn principojn: „Permeso aŭ malpermeso dependis de arbitro de cenzuristo."[4]

1. Tia (sen la artikolo) nomiĝis la gazeto ekde aprilo 1892.
2. Gaston Waringhien, *1887 kaj la sekvo... Eseoj IV*, Antverpeno, La Laguna 1980, p. 18.
3. Ĥvorostin, p.39.
4. Samloke, p.38. – Pri spertoj kun la cara cenzuro ni disponas ankaŭ memorojn de la rusaj pioniroj Gernet kaj Devjatnin: L. Ivn, „Ad fontes. Intervjuo kun k-do V. Gernet", *Sennacieca Revuo* 4 (8). 1926/27, p. 166-167 (pri neklaraĵoj en tiu intervjuo vidu Canko Murgin, „Lumo sur iom nebuli-

Eĉ se ne konsekvence, malhelpoj ĉiam ekzistis por la ruslanda movado. Sed suspektemo, ĉikanoj kaj malpermesoj ĉiuokaze ne povis malebligi, ke Esperanto trovis pli kaj pli da adeptoj en Ruslando. La frutempaj pioniroj estis ĉefe urbaj intelektuloj, inter ili multaj kuracistoj, instruistoj kaj verkistoj – homoj, kiujn oni povas kune karakterizi kiel la kleran eliton de reakcia lando. Ili aspiris trovi en la lingvo de Zamenhof – laŭ la klarigo de Drezen – „certan ripozon de la nube griza socia vivado en la cara despotio". Drezen skribas, ke „ĉiu esperantisto en tiu lando premegita, sen iu ajn elmontro de politika libero, estis certagrade idealisto, revanta pri iuj altaj idealoj, malsamaj al la ĉirkaŭa kruda realeco".[1] Kvankam Zamenhof estis disponiginta Esperanton al ĉiu senkonsidere al nacia aŭ socia deveno kaj ne eksplicite varbis por la subteno de nepotenculoj, estis ĝuste tiuj, nome diskriminaciatoj kaj subprematoj, kiuj sentis sin speciale alvokitaj. La fakton, ke Esperanto en Ruslando havis apartan allogon por la anoj de malplimultoj, nenio pli bone ilustras ol la alta procentaĵo, kiun judoj havis inter la unuaj esperantistoj.[2]

En sia malkontento pri la kondiĉoj ekzistantaj en Ruslando, kiu kreskis inter intelektuloj precipe, post kiam la atenco de 1881 abortigis la provojn de politikaj kaj sociaj reformoj, kaj samtempe en sia svaga espero pri nova ordo estigota per morala renaskiĝo de la homo, ne per revolucio, la ruslandaj esperantistoj multe similis al la disĉiploj de Lev Tolstoj – do, al homoj, kiuj pledis por senperforta rezistado kontraŭ la malbono fare de kreemaj individuoj ekipitaj per religia respondeco, sed forpuŝantaj la nur eksterajn formojn de religio.[3] Se radikaluloj riproĉis al Tolstoj, ke li subfosas inter gejunuloj la fidon je revolucio, same tiel la plej multaj esperantistoj kredeble estis rigardataj kiel homoj, kiuj tro naive esperis, ke per komuna lingvo ĉiuj homoj

tan epizodon", *Bulgara Esperantisto* 46. 1977, n-ro 3, p. 8-9); V.N. Devjatnin, "El rememoroj de malnova esperantisto", *La Nova Etapo* 1. 1932, p. 125-127.

1. E. Drezen, *Analiza historio de Esperanto-movado*, Leipzig 1931 (represo Kioto 1972), p. 85-86.
2. Kp. David L. Gold, "Towards a study of possible Yiddish and Hebrew influence on Esperanto", en: Szerdahelyi István (red.), *Miscellanea Interlinguistica*, Budapest 1980, p. 311-312.
3. Erwin Oberländer, *Tolstoj und die revolutionäre Bewegung*, München, Salzburg 1965.

interfratiĝos, ke malaperos per Esperanto ankaŭ sociaj malbonoj. Laŭ Vladimir Gernet[1], eĉ troviĝis personoj, kiuj lernis Esperanton, ĉar ili konsideris ĝin donaco, kiun Dio donis al la kristanoj, por ke helpe de tiu ilo ili povu propagandi la kristanismon inter diverslingvaj paganoj.[2]

Tolstoj mem jam frue, en 1889, esprimis sian apogon al la verko de Zamenhof kaj poste plurfoje ripetis sian pozitivan starpunkton, permesante ankaŭ la senkompensan tradukadon de siaj verkoj en Esperanton. En 1894 du ĵurnaloj en Odessa publikigis ampleksan leteron de Tolstoj, kiu konkludas jene:

> Mi vidis multajn fojojn, kiel homoj tenadis sin malamike unuj kontraŭ la aliaj nur dank' al la meŝanika malhelpo por reciproka komprenado. Kaj tial la lernado de Esperanto kaj la vastigado de ĝi estas sendube kristana afero, kiu helpas al la kreado de la Regno de Dio, tiu afero, kiu estas la ĉefa kaj sola difino [= destino] de la homa vivo.[3]

Eble sekve de tiu letero proksimiĝis la rilatoj inter tolstojanoj kaj esperantistoj. La 15an de januaro 1895 la Polica Departemento de la Ministerio de Internaj Aferoj komunikis al la Ĉefa Administracio por Gazetaraj Aferoj, ke ĝi akiris informojn, ke iuj disĉiploj de Tolstoj planas transformi la gazeton *Esperantisto* en organon por la disvastigo de la ideoj de sia majstro.[4] Efektive, en februaro la redakcio de la eldonejo „Posrednik" (Peranto), kiu, sub la severaj okuloj de la cenzuro, klopodis popularigi la pensojn de Tolstoj, malfermis rubrikon en *Esperantisto*. Tiu rubriko estis dediĉota „la plej ĉefe al la ideo de paca spirita disvolviĝo kaj unuiĝo de la homoj kaj de ĉio vivanta en unu tutmondan frataron sur la principoj de Prudento kaj Amo, kiuj esceptas perfortecon kaj superstiĉecon".[5]

„Posrednik" komencis sian kunlaboron kun *Esperantisto* per la livero de kontribuaĵo de Tolstoj, „Prudento aŭ kredo?"[6], kiu

1. Gernet (1870-1929), pioniro de Esperanto en Odessa, en 1892 estis forpelita de la universitato kaj arestita pro kontraŭregistara agado.
2. L. Ivn, „Ad fontes", p. 167.
3. Letero de 9-5-1894, presita en *Esperantisto* 5. 1894, p. 99-100; PVZ III 182-183. – Kp. Boris Kolker, „Lev Tolstoj kaj la Internacia Lingvo", *esperanto* 71. 1978, p. 172-175.
4. Teksto de la (sekreta) skribaĵo en G. Demidjuk, „‚Esperanto – vovse ne jazyk!'" („Esperanto neniel estas lingvo!"), *Izvestija CK SÉSR* 6. 1928, p. 332.
5. *Esperantisto* 6. 1895, p. 27.
6. Temas pri letero de Tolstoj al Anna Germanovna Rozen, de 8-12-1894. Ĝi estas presita en L.N. Tolstoj, *Polnoe sobranie sočinenij*, vol. 67, p.

ESPERANTISTO.

Monata gazeto de la lingvo internacia «Esperanto».

Kosto por jaro: 2,50 frankoj (= 2,00 markoj = 1,00 rublo = 2,00 kronoj). | Anoncoj po 25 centimoj por danupaĝa linio da petito aŭ por ĝia spaco.

No. 5—6 (65—66). Nurnbergo, Majo-Junio 1895. Jaro VI.

De la redakcio.

Aŭgusto 1895.

En Aprilo de tiu ĉi jaro okazis fakto, kiu kontraŭ nia volo tute radikale ŝanĝis la cirkonstancojn, en kiuj nia gazeto ĝis nun eliradis. Unu lando, en kiu loĝas ⅔ de ĉiuj niaj ĝisnunaj abonantoj, subite ĉesis enlasadi al si nian gazeton. Dank' al la neatendita bato, ni devis en Aprile interrompi por kelke da monatoj la eldonadon de nia gazeto (pri kio ni siatempe sciigis per cirkuleroj [al la rusoj en fermitaj kovertoj] ĉiujn niajn abonantojn); ni ne povis agadi libere, ni ne povis alvarbi sufiĉan nombron da abonantoj; la elspezoj de nia gazeto nun pligrandiĝis, la enspezoj malpligrandiĝis. Nia afero kutimis jam al diversaj malfacilaĵoj kaj ne falos de la bato; pli aŭ malpli frue la cirkonstancoj plibonigos, nia vojo fariĝos denove pli facila; sed dume nun, dank' al la subite aliiĝintaj cirkonstancoj, ni ne havas la eblon eldonadi plu nian gazeton en la ĝisnunaj kondiĉoj de abonado kaj ni devas vole-ne-vole ŝanĝi la manieron de eldonado.

Malsupre ni parolas pri la novaj kondiĉoj, sub kiuj ni de nun eldonados nian gazeton. Sed por ne esti maljustaj kontraŭ tiuj personoj, kiuj ĝis nun jam abonis la gazeton por la tuta jaro sub la kondiĉoj ĝisnunaj kaj eble ne volus aboni sub kondiĉoj aliaj, ni sciigas per tio ĉi la jenon:

De la abona mono, kiun ni ricevis de la ĝisnunaj abonantoj por 12 16-paĝaj numeroj de tiu ĉi jaro, ni dekalkulas ⅓ por la 4 eldonitaj kaj dissenditaj numeroj; la restajn ⅔ (t. e. 1,67 fr.) ni lasas nun al la libera dispono de ĉiu abonanto: se li deziras, li povas

L.L. Zamenhof en la aĝo de 16 jaroj. La lasta numero de *Esperantisto*. *Sube:* Instrukcio de la sekreta polico en Peterburgo al la ĝendarmaro de Voroneĵ (septembro 1895): La aŭtoritatoj scivolis pri la legantoj de *Esperantisto*. En Krakovo aperis, okaze de la Oka Universala Kongreso, informilo pri la sorto de politikaj malliberuloj en Ruslando.

МИНИСТЕРСТВО ВНУТРЕННИХЪ ДѢЛЪ.

ДЕПАРТАМЕНТЪ ПОЛИЦІИ.

Совершенно секретно.

Господину Начальнику Воронежскаго Губернскаго Жандармскаго Управленія.

Сентября 1895.

Въ Департаментѣ Полиціи получены указанія, что послѣдователи лжеученія Графа Льва Толстого поручили воспитаннику Воронежской Духовной Семинаріи Марьину распространять среди его товарищей журналъ „Esperantisto" на международномъ языкѣ „Esperanto", служащій органомъ вышеозначеннаго лжеученія.

Сообщая объ изложенномъ, Департаментъ проситъ Ваше Высокоблагородіе отнюдь не доводя о немъ до свѣдѣнія Семинарскаго начальства, произвести негласнымъ путемъ ваше

AŬGUSTO 1912.

POLITIKA MALLIBERULO

UNUTAGAĴO DEDIĈITA AL LA AFERO DE POLITIKAJ MALLIBERULOJ EN RUSA REGNO KUN SPECIALA KONSIDERO LA „KATORGON".

ADRESO DE LA REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOVO, STR. WISLNA 8, II. E. TELEFONO N. 1161.

Ĉefa depoziĉo: Krakovo, str. Floryańska 35. Librejo de Sven Ebert.

Prezo de la kajero: 60 halerojn = 0·250 Sm.

KELKAJ VORTOJ DE LA REDAKCIO.

Tintado de armiloj aŭdiĝas sur la batalkampo inter Italujo kaj Turkujo. Falas oftaj salvoj. Diskrevas bomboj ĵetataj el aeroplanoj. Ĉiuj aliaj landoj velbatalas inter si rilate la armadon de siaj armeoj. En ĉiu ŝtato estas kvazaŭ arbaro da bajonetoj, direktitaj kontraŭ la najbaroj. Oni sotas ĉiam novajn remparojn por sindefendo. Oni konstruas ĉiam pli potencajn dreadnought'ojn por atakoj. Nacioj fortaj sufokas kaj premas la malpli fortajn kaj montras minace la dentojn al la sense fortaj...

— En tiu ĉi mondo, en la mondo, kie regas tutpotence la principo: nacio estas lupo por nacio, estas dissemitaj en ĉiuj landoj aretoj da revoloj, kiuj sekvas aliajn principojn. Al milito ili kontraŭstarigas verkon de paco. Al malamikeco — amon fotbomaran. Anstataŭ batalo, dividanta la nacioj, ili kreas lingvon, per kiu ili deziras ilin unuigi. — En granda batalo, kiun kondukas en la tuta mondo milionoj da laborantoj kontraŭ la milito, kontraŭ maljustaĵoj kaj maljusteco, la esperantistoj formas sian propran amaron, kiu volas siamaniere preparadi verkon de l'estonteco, volas aldoni sian brikon por la granda konstruaĵo. Ili volas doni komunan lingvon al la homaro, ke ĝi havu la povon interkompreniĝi, ke ĝi ellernu ami sin reciproke kaj estimi.

La nunjara Jubilea Kongreso Esperantista, okazas inter de nacio, kiu dolore eksentis kaj sentas ĝis nun la perforton de siaj najbaroj. Ĝi okazas tuj ĉe la limoj de la granda rusa ŝtato, kiu regnestraro estas ne nur konstanta minaco por la internacia paco kaj por la Eŭropa kulturo, sed ĝi estas ankaŭ la niej granda malamiko kaj premeganto de sia propra nacio kaj de ĉiuj popoloj de sia multegenta ŝtato.

Kun nekredebla kruelego ĝi drunigis en sango la popolan revolucion en la jaroj 1905—1906, kaj depost ses jaroj ĝi ne ĉesas venĝi sin krude je la venkita malamiko. — De nelonga tempo ĝi ĉesis, devige ĉesis, konstruigi

havis maltradicieman kaj kontraŭaŭtoritatan enhavon, kvankam verkita en trankvila, neprovoka stilo:

> ... la volo de Dio estas ekkonata ne per ia eksterordinara mirindaĵo, per skribado per Dia fingro la leĝon sur ŝtonaj tabuloj aŭ per verkado per helpo de sankta spirito senerara libro, aŭ per senerareco de ia sankta persono aŭ personaro, sed nur per la efikado de la prudento de ĉiuj homoj, kiuj transdonas unu al alia per faro kaj vorto la verojn, ĉiam pli kaj pli klariĝantajn al ilia konscio.[1]

En la sama numero troviĝis informo pri la fondiĝo de ligo en Amsterdam, „kies partianoj rifuzas la pagadon de regnaj depagoj"[2], kaj al la marta numero „Posrednik" kontribuis per longa artikolo pri la „Milito ĥino-japana", kiu, parolante pri budhanaj ekleziuloj en Japanio, kiuj „iras al la militistaro, por entuziasmigi ilin por la buĉado", atentigis, ke registaroj bezonas militojn, „por deturni kaj delogi la popolon".[3]

Sed la kunlaboro kun la tolstojanoj, apenaŭ komencita, donis al la esperantistoj fortan baton. Pro la kontribuaĵo „Prudento aŭ kredo?" la cenzuro en aprilo 1895 malpermesis la pluan eniron de la revuo *Esperantisto* en Ruslandon. La sekvo estis, ke la gazeto, subite perdinte tri kvaronojn de siaj preskaŭ 600 abonantoj, devis en aŭgusto de la sama jaro ĉesigi sian aperon.[4] Sentante kunrespondecon, Tolstoj tuj intervenis ĉe la aŭtoritatoj kaj efektive atingis, ke la malpermeso importi la gazeton estis nuligita. Sed tio jam ne plu povis haltigi la morton de *Esperantisto*.[5]

En tiu ĉi incidento ne temis pri ordinara ĉikano flanke de la cenzura administracio. Male, ĝi intervenis kontraŭ *Esperantisto* sekve de la menciita atentigo de la politika polico, kiu poste dissendis instrukciojn al la lokaj ĝendarmoj, ke ili esploru pri la personoj, kiuj kaŝe legas kaj de unu al alia transdonas la malpermesitan numeron.[6] La objekto de la ŝtata kontrolo klare ne plu estis

---

274-277; kp. Holzhaus, *Doktoro kaj lingvo*, p. 283-285.

1. *Esperantisto* 6. 1895, p. 30; novan tradukon donas Holzhaus, p. 284-285.
2. Samloke, p. 31.
3. Samloke, p. 44, 48.
4. PVZ III 215-220; Holzhaus, p. 285-286.
5. En decembro 1895 ekaperis en Uppsala nova revuo, *Lingvo Internacia*, kiu ĝis la Unua Mondmilito estis la ĉefa organo de la esperantistoj. – Pli malfrue, en 1912, „Posrednik" eldonis broŝurforme kelkajn verkojn de Tolstoj en Esperanta traduko.
6. Ivan Kulakov, „Leo Tolstoj, Esperanto kaj rusia ĝendarmaro", *Paco* 1983, GDR-eldono, p. 31-32 (kun reproduktaĵo de koncerna instrukcio al la ĝendarmaro de Voronej).

nur sendanĝera kuriozaĵo, hobio de malpraktikaj idealistoj, kiu apenaŭ meritis, ke cenzuristoj sin okupu pri ĝi, sed estis jam movado, kiu, kvankam ankoraŭ etnombra, ŝajnis alianciĝi kun pledantoj por perreligia reformado de la socio.

La esperantistoj, kiuj komence devis unuavice batali por rekono, ke Esperanto entute estas lingvo, ne „nur kondiĉa maniero por esprimo de pensoj"[1], de tiam devis aparte peni por pruvi al la aŭtoritatoj sian soci-politikan fidindecon aŭ por forigi suspektojn, ke la lingvo servas konspirajn celadojn. Ofte, la sindefendo ne helpis: La cenzuro rifuzis permesi la eldonon de Esperanta gazeto, eĉ kiam la petintoj promesis presi paralelan tekston en la rusa. Inter junio 1899 kaj oktobro 1904, Esperantaj eldonaĵoj aperis en Ruslando aŭ estis allasataj el eksterlando nur en tre malmultaj kazoj; estis la jaroj, kiam la cara registaro intensigis siajn persekutojn kontraŭ revoluciaj (aŭ supozate revoluciaj) movadoj. La litovoj, ekzemple, al kiuj ĝis 1904 estis malpermesite eldoni librojn kaj aliajn presaĵojn en sia gepatra lingvo, povis konatiĝi kun Esperanto nur per lernolibro, kiu estis en 1890 presita en Tilsit (Germanio) kaj kontrabande importita en Litovion.[2]

1.3. *PENETRO EN OKCIDENTON*

Dum la ruslandanoj ankoraŭ laboris en ekstreme malfacilaj kondiĉoj, en aliaj landoj la esperantistoj jam metis la fundamenton por movado, kies forto estis sufiĉe granda, ke ĉikanoj de la aŭtoritatoj en unu granda regno ne plu povis decide skui ĝin.

1. Ĥvorostin, p. 40; kp. Demidjuk, p. 333.
2. La aŭtoro estis la katolika pastro Aleksandras Dambrauskas (Dombrovski), kiu en 1889 estis por kvin jaroj ekzilita al norda Ruslando, ĉar li malpermesis al katolikaj lernantoj obei ordonon pri vizitado de rus-ortodoksa preĝejo. Ĝis sia morto en 1938 li ludis elstaran rolon en la Esperanto-movado kaj ĝenerala kultura vivo de Litovio. (J. Petrulis, „Unuaj esperantistoj en Litovio", *Horizonto de Soveta Litovio*, n-ro 2, 1971, p. 14; Kl. Naudzius, „Ĉu vere peripetioj?", *l'omnibuso* 9. 1972, n-ro 6 [52], p. 4; PVZ II 281.)

Tiu fundamento estis metita en la politike kaj ekonomie pli evoluintaj landoj de okcidenta Eŭropo – fare de homoj, kiuj ne sentis sin ĉiupaŝe observataj de aŭtokrata reĝimo, kies vivo pasis pli trankvile, sen la perspektivo de sangaj konfliktoj interne de la propra lando. Meze de la 1890aj jaroj komenciĝis nova periodo en la historio de Esperanto, la t.n. franca aŭ propaganda periodo. Ĝia plej elstara reprezentanto estis iom misterplena homo, Louis de Beaufront[1], kiu en 1898 fondis Societon por la Propagando de Esperanto kaj ekde 1901 publikigis ĉe la eldonejo Hachette la unuajn lernolibrojn atingeblajn por pli vasta publiko. De Beaufront fariĝis la unua celkonscia propagandisto de la lingvo, enkondukis la modernajn metodojn de sistema reklamado kaj iom post iom sukcesis altiri al la movado homojn, kiuj atendis de Esperanto praktikan utilon por la internaciaj rilatoj en la kapitalisma epoko. Ne malprave, oni nomis lin „la prapatro de ĉiuj francaj kaj novaj Esperantistoj".[2]

Dank' al la agado de de Beaufront, komence de la 20a jarcento la praktika aplikeblo de Esperanto jam tiom antaŭenŝoviĝis, ke la juna movado baldaŭ kalkulis en siaj vicoj kelkajn influajn personojn en la scienca vivo de Francio. Ili estis, interalie, la matematikisto Carlo Bourlet (li varbis por Esperanto Hachette kaj la gravan Touring-Club), la filozofo Emile Boirac, la lingvisto Théophile Cart, la generalo kaj balistika specialisto Hippolyte Sebert. La novaj varbitoj ne venis al Esperanto pro la deziro eskapi sufokan intelektan atmosferon aŭ kontribui al la mildigo de naciaj konfliktoj. Al ili estis fremda la speciala homfratiga retoriko, kiun uzis la rusaj esperantistoj sur la fono de la intergenta malamo en la cara regno. La ekstreme idealismaj, preskaŭ religiecaj trajtoj de la frutempa movado perdis sian superregon.

Fakte, la francaj intelektuloj estis tute aliaj tipoj, ol la ĉarmaj ideaj fratoj de Tolstoj. Ili havis malmulton komunan kun la kuracisto A.I. Asnes, kiu en 1906 amare nomis sin unu el la „mizeraj

1. Kiel oni eksciis nur post la Dua Mondmilito, lia vera nomo estis Louis Chevreux (1855-1935). Vd. Tazio Carlevaro, „La enigmo de Beaufront", *Literatura Foiro* 7. 1976, n-ro 37/38, p. 10-13; Marcel Delcourt, Jean Amouroux, „Grandeco kaj dekadenco. Fino de mito", *Literatura Foiro* 7. 1976, n-ro 40, p. 6-7; 8. 1977, n-ro 41, p. 12.
2. *Lingvo Internacia* 10. 1905, p. 372.

ruslandaj sklavoj"[1], kun la pola darvinisto Benedykt Dybowski iam kondamnita al morto pro sia partopreno en la kontraŭrusa ribelo de 1863-65[2], kun la plurfoje arestita juda advokato kaj verkisto Leo Belmont, populara Esperanto-oratoro[3], kun la juna ĉeha laboristo kaj Esperanta pioniro František Vladimír Lorenc, kiu en 1893 fuĝis de la aŭstria polica persekuto al Brazilo[4], aŭ kun la slovaka tolstojano Albert Škarvan, kontraŭ kies arestiĝo pro la rifuzo militservi en 1895 protestis eminentuloj en tuta Eŭropo.[5] Kontraŭe al slavoj kaj orienteŭropaj judoj, la francoj ne ŝatis sentimentalan paroladon pri homa frateco nek konsideris Esperanton helpilo en batalo por nacia aŭ socia emancipiĝo. Ili estis homoj, kiuj en Esperanto rekonis „la legitiman frukton de ilia komuna fido en la progreso de la civilizo k en la suvereneco de la racio".[6] Sur la bazo de tiu konvinko ili atingis, ke la lingvo iĝis respektinda ankaŭ inter anoj de la supra tavolo de okcidenta Eŭropo.

Historiistoj de Esperanto jam ofte emfazis la diferencon inter ruslandanoj kaj francoj – inter la idealisma pionira spirito kaj la posta disvastiĝo de pli praktikaj konsideroj. Kiom ajn ĝusta estas tiu ĝenerala observo, ne estus taŭge troige prezenti la kontraston inter orientaj kaj okcidentaj esperantistoj. Unue, necesas memorigi, ke Zamenhof metis ne nur la fundamenton por la idealisma kompreno, sed ankaŭ tiun por la praktika apliko. Ne restis nur ĉe la gvidlinioj formulitaj en 1887/88. En 1898, ĝuste kiam Esperanto komencis altiri la atenton de francoj kaj aliaj okcidenteŭropanoj, li verkis traktaĵon, kiun oni povas nomi provo teorie pravigi la unuavice servan rolon de Esperanto.

---

1. Letero al E. Boirac, de 18-12-1906, en *Israela Esperantisto* 1977, n-ro 60 (aprilo), p. 3. – Asnes, judo, estis redaktoro de *Ruslanda Esperantisto*.
2. Józef Toczyski, „Benedykt Dybowski", *Pola Esperantisto* 1970, n-ro 3, p. 3-4.
3. Vera nomo Leopold Blumenthal (1865-1940). Vidu EdE, p. 47; S. Wininger, *Große jüdische National-Biographie*. Vol. 6. Cernăuţi s.j., p. 448-449.
4. Stanislav Kamarýt, *Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio*. Praha 1983, p. 13-20.
5. Peter Brock, *Pacifism in Europe to 1914*, Princeton 1972, p. 466; Pavel Rosa, *Situacio de Esperanto en Slovaka Socialisma Respubliko*, Bratislava 1977, p. 2-5. – Škarvan, kune kun la ruso N.P. Evstifeev, eldonis la unuan lernolibron de Esperanto por slovakoj, t.e. slovakan tradukon de *Fundamento de Esperanto* (1907).
6. G. Waringhien, *Leteroj de L.-L. Zamenhof* I, Paris 1948, p. 3.

En la traktaĵo, titolita „Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia", Zamenhof trankvilige atentigas, ke Esperanto ne estu konfuzata kun tutmonda lingvo; li neas, ke ĝi celas detrui la naciajn lingvojn. Sonas kvazaŭ sindistancigo de la plej entuziasmaj esperantistoj, se Zamenhof ekskludas la eblecon, ke la homoj kunfluiĝos en unu popolon per Esperanto; tio, kontraŭe, okazus nur per „la aliiĝintaj konvinkoj kaj opinioj de la homoj". Tute akcentante la grandajn praktikajn avantaĝojn de neŭtrala komunikilo, Zamenhof eĉ diras, ke „celadon al internacia lingvo ne devas escepti eĉ la plej varmega blinda ŝovinismo".[1]

Parto de la traktaĵo estis komence de aŭgusto 1900 voĉlegita de de Beaufront en la kongreso de Franca Societo por la Progresigo de la Sciencoj, okazinta kadre de la Universala Ekspozicio. Dum kelka tempo oni kredis, ke li mem aŭtoris ĝin.[2] Ĉiuokaze, oni povas preni tiun tekston, kiu donis grandan influon al postaj lernontoj, kiel dokumenton pri la komuna opinio, kiun havis Zamenhof kaj de Beaufront rilate la plej taŭgan manieron pledi por Esperanto en Francio komence de la 20a jarcento.

Due, tamen, necesas konscii, ke la eblecoj praktike uzi Esperanton estis longtempe tiel limigitaj, ke la movado ankaŭ en okcidenta Eŭropo devis bazi sin sur la idealismo de siaj membroj. Fakte, inter la pioniroj de Esperanto en la okcidenteŭropaj landoj estis multaj, al kiuj neniel eblas atesti absorban zorgon pri la praktika profito de la lingvo. Felix Moscheles, la unua prezidanto de Londona Esperanto-Klubo, estis famulo en la pacifisma movado, prezidante la Internacian Asocion pri Arbitracio kaj Paco. En Germanio, la bankisto Georg Arnhold, unu el la ĉefaj mecenatoj de la germana pacifisma movado, donis materian helpon ankaŭ al la Esperanto-movado. Kaj la artileria oficiro Gaston Moch, kiu en 1894 eksiĝis el la armeo por dediĉi sin al la

1. PVZ IV 79. – En la traktaĵo Zamenhof ankaŭ verve pledas por konsidero de la principo de socia egaleco, kontraŭstarigante al la latina, la internacia lingvo de la pli altaj klasoj, Esperanton – lingvon, kiun post kelkaj monatoj povus posedi „eĉ la plej malriĉaj kaj senkleraj vilaĝanoj" (PVZ IV 105-106).
2. Kaj eble Zamenhof mem intence kredigis, ke estis tiel: *Senlegenda biografio*, p. 109. – La traktaĵo unuafoje aperis, sub la pseŭdonimo Unuel, en *Fundamenta Krestomatio* (1903); laste represita en PVZ IV 71-124.

batalo por paco, demokratio kaj homaj rajtoj, apartenis al la unuaj esperantistoj de Francio.

Ankaŭ de Beaufront, kutime konsiderata kiel prototipo de pure praktikcela esperantisto, deklaris sin „tre varma partiano de la pacaj ideoj". Sed lian tutan agadon ĝuste karakterizis la klopodo zorge eviti, ke Esperanto konfuziĝu kun pacifismo. Por pravigi tiun sintenon li uzis la argumenton, ke esperantistoj kaj pacifistoj ambaŭ estas ĝenerale rigardataj „kiel naivaj utopiistoj" kaj ke ili, marŝante kune, nur „duobligus ... la malfacilecon de l' venko".[1]

Serĉante kialojn por la singardemo, el kiu fontis la avertoj de de Beaufront, ni povas trovi ilin ne nur en la freŝe memorata (kaj menciita de li) sorto de *Esperantisto* en 1895, sed ankaŭ en la streĉita politika klimato, kiu regis en Francio dum la jaroj, kiam la Esperanto-movado faris tie siajn unuajn paŝojn. Nome, ekde 1894 la nacio estis akre dividita pro la demando, ĉu la kapitano Alfred Dreyfus estas perfidulo aŭ senkulpa viktimo de kontraŭjudaj fortoj. La afero Dreyfus splitis Francion en du tendarojn: jen la adeptoj de la armeo, aristokratio kaj katolikismo kaj la konservativa burĝaro, unuigitaj en sia opono al la principoj de la Franca Revolucio kaj la regopretendo de la racio – jen la neklerikaluloj, la socialistaj laboristoj kaj ĉiuj, kiuj kredis je demokratio kaj homaj rajtoj. Plie, la maljusta kondamno de Dreyfus markis turnopunkton en la historio de la judoj vivantaj en okcidenta Eŭropo: Ili ĝis tiam fidis, ke definitive venkis la ideo de emancipiĝo helpanta ilian integriĝon al la socio, sed nun devis ŝokite konstati, ke la asimiliĝon kontraŭbatalas nove leviĝinta antisemitismo, kiun ili kredis limigita al orienta Eŭropo. Tial por la ĵurnalisto Theodor Herzl ne plu povis esti alia solvo, ol la fondo de juda ŝtato, al kiu li vokis, sub rekta impreso de la afero Dreyfus, en 1896.[2]

De Beaufront lanĉis sian gazeton *L' Espérantiste* kaj fondis la propagandan societon en januaro 1898; en tiu sama monato, pro

1. L. de Beaufront, „El Francujo", *Lingvo Internacia* 2. 1897, p. 147. – Simile argumentis René Lemaire, „Le mouvement espérantiste et le mouvement pacifique", *L'Espérantiste* 1. 1898, p. 86-88, 111-113.
2. Lia fama verko aperis ankaŭ en Esperanta traduko: *La juda ŝtato. Provo de moderna solvo de la juda problemo*, Budapest 1934.

la fama „Akuzo" de Emile Zola, la pasioj pro Dreyfus komencis ĉiam pli kreskadi. Ĉar la disputo pri revizio de la verdikto ankaŭ dispolusigis la francajn esperantistojn[1], ili povis atingi komunan agad-bazon nur per la konsciiĝo pri tio, ke por progresigi Esperanton oni devas lasi la lingvon kaj movadon ekster la politika streĉiteco. Tiel pensis ne nur de Beaufront. Ankaŭ la judo Moch, kiu pro la kondamno de Dreyfus estis eksiĝinta el la armeo kaj aktivis en la Dreyfus-ana „Ligo por la Homaj Rajtoj", en 1905 klare pledis por la plena apartigo de pacifismo kaj Esperanto, ripetante argumentojn, kiujn pli frue uzis de Beaufront.[2]

Se oni do provas resume karakterizi la sintenon de la francaj esperantistoj, tiam necesas atentigi ne pri ia manko de idealismo[3], sed pri la unuiganta konvinko, ke la malforta movado mortus, se ĝi ne konservas sian „plenan neŭtralecon pri ĉiuj demandoj, pri kiuj homoj malkonsentas".[4] Bonan ilustron, kiom tiu sinteno kontrastis al la pli ŝpitema spirito reganta inter la orienteŭropaj esperantistoj, donis en 1905 la diskutoj pri Tutmonda Ligo Esperantista. Temis pri nova provo de Zamenhof senigi sin de la persona respondeco pri la plua evoluo de Esperanto. Kunpuŝiĝis du kontraŭaj starpunktoj, karakterize defendataj de franco unuflanke kaj de slavo aliflanke. De Beaufront oponis la proponon fondi internacian organizaĵon, atentigante pri la troa diverseco de naciaj tradicioj kaj pri la risko per tio provoki suspektojn de registaroj, ĉar jam oni „proklamis nin danĝeraj por niaj [naciaj] lingvoj aŭ la popola patriotismo".[5] La polo

1. Laŭ Waringhien (*Leteroj de L.-L. Zamenhof* I, p. 24), de Beaufront kaj Bourlet estis kontraŭ Dreyfus, dum Sebert, Moch kaj Emile Javal defendis lin.
2. „Ĝeneralaj observoj pri la regularo (de Societo Esperantista por la Paco)", *Espero Pacifista* 1. 1905, p. 26-27. – Laŭ Moch, estus danĝere „prezenti al la publiko duoblan ‚utopion'".
3. Utilas mencii, ke en la membraro de Societo Esperantista por la Paco, fondita en 1905, aperas la nomoj de la gvidaj francaj esperantistoj Boirac, Bourlet, Cart, Chavet, Fruictier, Grosjean-Maupin, Javal, Sebert kaj Michaux.
4. „Ĝeneralaj observoj...", p. 27.
5. L. de Beaufront, „Pri la Tutmonda Ligo Esperantista", *Lingvo Internacia* 10. 1905, p. 314 (el *L'Espérantiste*, n-ro 89). – Necesas atentigi tamen, ke la kialoj de la kontraŭstaro de de Beaufront estis pli kompleksaj; vd. *Leteroj de L.-L. Zamenhof* I, p. 143, 156, 166 k. sekv.

Kazimierz Bein[1], kontraŭe, ne opiniis, „ke registaroj de kelkaj landoj persekutos nin", se estos fondita internacia ligo de esperantistoj. Laŭ li, la registaroj kapablos distingi inter la koloroj verda kaj ruĝa. „Kiel la bovon sur la areno ilin timigas nur la ruĝa." Eĉ kiam „en iu lando oni persekutos la liganojn", tio ne detenu la esperantistojn fondi la Ligon, diris Bein, konklude demandante: „... ĉar ekzistas landoj-malliberejoj, ĉu ĉiuj devas porti katenojn?"[2]

En somero 1905, dum la unua kongreso de esperantistoj en Boulogne-sur-Mer, la projekto de Tutmonda Ligo estis malakceptita de plimulto. Malgraŭ la entuziasmo, kiu regis en tiu kongreso pro la unika travivaĵo, ke senĝene interparolis „homoj kun homoj", la ideo de internacia organizajo ankoraŭ ne sukcesis – parte pro personaj ĵaluzoj inter la gvidaj francaj esperantistoj, sed ankaŭ pro ilia komuna prefero asigni la unuan rangon al varbagado enlanda kaj ne superflue provoki la aŭtoritatojn per supernacia organizo de la esperantistoj. Aliflanke, por klare distingigi la lingvon disde ies personaj idealoj kaj por ŝirmi ĝin kontraŭ la entrudiĝo de fremdaj ideologioj, la kongreso akceptis la t.n. Deklaracion pri la esenco de Esperantismo[3], kiu por la organizita Esperanto-movado grandparte restas valida ĝis hodiaŭ. La Deklaracio nomis la esperantismon „penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrala" kaj atentigis firme: „Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero tute privata, por kiu la Esperantismo ne respondas." La Deklaracio ne aludis pri servoj de Esperanto al la monda paco.[4]

1. Bein (plumnomo Kabe, 1872-1959), unu el la plej grandaj stiliŝtoj de Esperanto, dum sia junaĝo estis por kelkaj jaroj ekzilita pro kontraŭrusa agado. (En 1911 li forlasis la movadon.)
2. „La Kongreso en Boulogne-sur-Mer", *Lingvo Internacia* 10. 1905, p. 377.
3. Teksto en EeP, p. 418-420.
4. Leo Belmont estis proponinta enmeti tian aludon. – La Deklaracio ja inkluzivis la sugeston, ke Esperanto „povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo" – formulo, kiu celis unuavice la situacion en la rusa regno.

1.4. *LA IDEA FLANKO DE ESPERANTO*

La strebado de la francoj sekvi rigore porlingvan strategion estis sendube saĝa sinteno – por elirigi la esperantistojn el la stato de nepotenca malplimulto de revemaj idealistoj, por ne limigi la allogon de Esperanto al subprematoj, por disvastigi la lingvon inter la praktikema etburĝaro de Eŭropo kaj por ne liveri al registaroj facilan pretekston je persekutado. Ilia raciismo aliflanke tute ne ekskludis, ke homoj kun plej malsamaj mondkonceptoj alproprigis al si Esperanton – homoj, kiuj ja ligis kun ĝi siajn preferojn kaj pli-malpli realecajn ideojn. Dum la francaj gvidantoj akcentis la utilon de Esperanto por komerco, turismo kaj scienco kaj trovis resonon en tiuj medioj, ekde 1905 aliĝis al la movado ankaŭ pli kaj pli da homoj, kiuj vidis en Esperanto konvenan helpilon en sia politika lukto, nome pacifistoj, socialistoj, anarkistoj.[1]

Tiuj homoj disponis ion, sur kio ili povis apogi sin por sia idealismo: Ili havis antaŭ si la modelon de Zamenhof. Tion necesas ĉi-sekve iom detaligi.

Kiel ni vidis, Zamenhof subtenis kiel strategion de la movado la strebadon konservi la taŭgecon de Esperanto por kiel eble plej multe da homoj, sendepende de ilia nacia deveno kaj politika aŭ religia konvinko. Li ne volis, ke nur minoritatoj subtenu ĝin, ĉar li deziris gajni ankaŭ la plimulton. Aliflanke, Zamenhof ne ĉesis pensi pri la juda problemo: Esperanto estis ofertita al ĉiuj homoj, sed ne estis forgesigebla ĝia origino: la protesto kontraŭ la diskriminacio de malplimulto. En unu el siaj klarigoj pri la lingvokrea motivo Zamenhof diris, ke li opiniis necesa lingvon, „kiu de unu flanko ne estus ekskluzive proprajo de iu aparta nacio, kaj de la dua flanko povus esti libere uzata de senlingvaj kaj subprematoj popoloj".[2] Per aliaj vortoj: Esperanto estu tute neŭtrala, sed samtempe havu specialan utilon por la judoj.

El la leteroj de Zamenhof ni scias, kiom lin ekde la komenco

1. Ankaŭ estis ĉiam multaj, kiuj „kompletigis per E(speranto) sian kolekton de manioj: spiritismo, kontraŭalkoholismo, seksabstinemo, kontraŭvivisekciismo": Gaston Waringhien, *Lingvo kaj vivo*, La Laguna 1959, p. 405.
2. Maimon, p. 164 (intervjuo kun *The Jewish Chronicle*).

de la jarcento denove okupis la penso pri solvo de la juda problemo. Al sia amiko Abram Kofman li skribis: „Tiel longe kiel la hebreoj ne havos *lingvon* kaj estos devigataj en la praktiko ludi la rolon de ‚rusoj', ‚poloj' ktp. – ili ĉiam estos malestimataj kaj la hebrea demando neniam estos solvita."[1] Sed zorgigis lin krome la religia izoliteco de la judoj, kaj en siaj leteroj li ankaŭ konfesis, ke fakte Esperanto nur konsistigas parton de lia idealo. Krom pri la neŭtraligo de konfliktoj pere de lingvo, li pensis kaj revis ankaŭ pri la „kreado de morala ponto, per kiu povus unuiĝi frate ĉiuj popoloj kaj religioj"; realigo de tiu plano – „neŭtrale-homa filozofie-pura religio" – estis por li samtempe kvazaŭ plenumo de tiu historia misio de la judaro, „pri kiu revis Mozeo kaj Kristo".[2] En 1901 Zamenhof provis publikigi sian kontribuon al solvo de la juda demando, ruslingvan broŝuron sub la titolo „Hilelismo"[3], en kiu estas proponite, ke por „neŭtraligi" la disigan efikon de la religioj (kaj por venki la religian naciismon de la judoj) oni interkonsentu pri obeo al la principoj de la „hilelisma kredo", al kiuj apartenas la agnosko, ke aŭskultante la voĉon de konscienco oni ekkonas la leĝojn de Dio.[4]

La broŝuro ne estis disvastigita, kaj pri la speciala graveco de Esperanto por la judoj Zamenhof neniam parolis en publiko, nur en personaj leteroj, kiuj iĝis konataj nur post la Dua Mondmilito.[5] Li ĉiam sentis ĝeniĝon troe emfazi sian idealon, sciante ke jam pro lia judeco la movado estas facile vundebla. Li ne volis endanĝerigi la disvastiĝon de Esperanto, kaj li timis ankaŭ, ke pri judo, kiu laboras por la homara unuiĝo, oni ne kredos, ke li agas altruisme.[6] La deziro helpi al siaj malfeliĉaj samgentanoj sendube estis konstantaĵo en la vivo de Zamenhof, sed pri la plej

1. Letero de 28-5-1901, PVZ VI 13.
2. Letero al Michaux, de 21-2-1905, PVZ VII 28, 30.
3. Gomo Sum, *Gillelizm. Proekt rešenija evrejskago voprosa*, S.-Petersburg 1901. Represo, kun Esperanta traduko de Adolf Holzhaus, Helsinki 1972; ankaŭ: PVZ V 357-442. – „Hilelismo" deriviĝas de Hillel, juda saĝulo en Jerusalemo (ĉ. 30 a.Kr. – 10 p.Kr.), kiu „klarigis la Biblion kun mildeco k spiritlarĝeco" (PIV); kp. Nahum N. Glatzer, *Hillel. Repräsentant des klassischen Judentums*, Frankfurt a.M. 1966.
4. Waringhien, *1887 kaj la sekvo*, p. 66.
5. La tre rivela letero al Michaux, ekzemple, estis en EdE (p. 579-582) nur kriple publikigita; kp. G. Waringhien, „Enkonduko", en: Maimon, p. 9.
6. PVZ VII 29.

bona rimedo helpi ilin li ŝanceliĝis, sentante sin ofte disŝirata inter sia solidareco kun la judoj kaj sia inklino al la tuta homaro.[1]

Aliflanke, meze de la unua jardeko de la nova jarcento ŝajnis, ke la movado en pluraj landoj estis jam sufiĉe stabiliĝinta kaj ne plu bezonis dependi de la persono de Zamenhof. La sukcesa unua kongreso en 1905, kiun ĉiuj esperantistoj konsideris entuziasmiga kulmino de siaj ĝistiamaj laboroj, igis lin mem opinii, ke jam plenumiĝis unu el liaj revoj kaj ke de nun li povos dediĉi sin ankaŭ al la interreligia proksimigo de la homoj. Al la kongresanoj li voĉlegis Preĝon sub la Verda Standardo, per kiu li volis esprimi la „naturan religion de la homa koro".[2] La ovacioj, kiujn renkontis Zamenhof post la prezento de sia Preĝo, surprizis la francajn gvidantojn. Ili nek antaŭvidis, ke Zamenhof parolos kvazaŭ „juda profeto"[3], nek ke en la kongreso regos preskaŭ religia atmosfero.

Ankaŭ juddevenaj francaj esperantistoj klopodis bremsi Zamenhof; ili sentis malmulton komunan kun la orientaj judoj kaj cetere post 1906, kiam Dreyfus fine estis rehonorita, fidis, ke oni ne plu kuraĝos pridubi ilian ligitecon al la franca nacio. Emile Javal amike atentigis Zamenhof, ke la hilelismo tute ne havas ŝancojn de akceptiĝo en Francio; se oni konsideras, ke plue necesas kaŝi la judan devenon de Zamenhof, „tiel longe kiel la granda batalo ne estos gajnita", des pli danĝere, eĉ pereige, estus paroli pri hilelismo.[4] Reage, Zamenhof certigis, ke li „agos tre singarde" kaj ke li ne publike varbos por hilelismo, ĝis li „havos plenan certecon, ke tiu paŝo ne malutilos al Esperanto".[5]

Sed nova pogroma ondo, kiu skuis multajn partojn de Ruslando en oktobro 1905, instigis Zamenhof ne plu atendi. En januaro 1906 aperis en *Ruslanda Esperantisto* anonime *Dogmoj de Hilelismo*[6]; sekvis tiun artikolon en marto reviziita teksto,

1. La disŝiriteco inter partikularisma kaj universalisma orientiĝo konsistigas bazan dilemon en la juda kulturo; kp. S.N. Eisenstadt, „Jüdische Identitätsmuster", *Schweizer Monatshefte* 57. 1977, p. 615.
2. Letero al Michaux, de 5-1-1905, PVZ VII 10.
3. Eldiro de Bourlet, laŭ *Leteroj* I, p. 175.
4. Letero de Javal, 15-10-1905, PVZ X 197. – Javal ankaŭ skribis: „Ni bezonis admirindan disciplinon por kaŝi al la publiko vian originon."
5. Letero al Javal, de 25-10-1905, PVZ VII 197.
6. PVZ VII 253-262.

broŝuro kun la titolo *Homaranismo.*[1] Se la nomo „hilelismo" ankoraŭ montris, kiom Zamenhof restis inspirita de la deziro unuavice forigi la diskriminacion de judoj, la poste adoptita termino „homaranismo" pli taŭgis por karakterizi la proponon, ke ĉiuj popoloj kaj religioj, ne rezignante siajn specifajn trajtojn, renkontiĝu „sur fundamento neŭtrale-homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco".[2]

Kvankam Zamenhof estis elimininta la tro evidente judajn ecojn de sia projekto kaj kvankam eblis vidi en homaranismo esence ion similan al la „homara religio" de Auguste Comte[3], la esperantistoj ĝenerale reagis je ĝi kun skeptiko aŭ eĉ malfavoro, ĉu ĉar ili ne konsideris ĝin akordigebla kun sia religia kredo, ĉu ĉar ili timis, ke la lingva movado alprenos mistikan karakteron.[4] Zamenhof defendis sin kontraŭ la kritikantoj, sed li baldaŭ konfesis, ke lia „neŭtrala religio" ne taŭgas por lingve homogenaj landoj kiel Francio, sed „estas destinita ... nur por landoj diversgentaj".[5] Li ankaŭ koncedis, ke la homaranismo, kvankam bazita sur Esperanto, ne povas esti deviga por la esperantistoj kaj ke la Esperanto-movado ne povas oficiale identiĝi kun lia doktrino.

Meze de 1906 Zamenhof troviĝis sub la impreso de nova terura pogromo en sia naskiĝurbo Bjalistoko. Sed eĉ tiam li rezignis, laŭ la insistaj petoj de Sebert kaj Javal, enmeti en sian kongresan paroladon kiun ajn aludon al la homaranismo. Sed ekde tiu jaro li publike pledis por ia minimuma interkonsento inter la esperantistoj pri tio, kio konsistigu la idean bazon de Esperanto. En la Dua Kongreso en Ĝenevo li unuafoje aludis al tio, kio de tiam estis komprenata, eĉ se neniam klare difinita, kiel la „interna

1. PVZ VII 275-285. – La broŝuro aperis dulingve en Peterburgo, denove anonime.
2. PVZ VII 275.
3. Waringhien, *Leteroj* I, p. 258; Peter G. Forster, *The Esperanto Movement*, The Hague, Paris, New York 1982, p. 95.
4. A. Dombrovski, "Kelkaj rimarkoj pri hilelismo", *Ruslanda Esperantisto* 2. 1906, p. 49-50; „Kio do estas la homaranismo", samloke, p. 133-135 (represo en *La neforgeseblaj kongresoj*, Kioto 1984, p. 134-136, 139-144); L. de Beaufront, en *L'Espérantiste* 9. 1906, p. 65-67, 86 (represo parta en *Leteroj* I, p. 257-258, 262, 277-278). – Respondoj de Zamenhof: PVZ VII 309-319, 347-350.
5. Letero al Javal, de 23-4-1906, PVZ VII 303. Simile, la letero al Javal, de 15-8-1906, PVZ VII 357.

ideo" de Esperanto: Zamenhof diris, ke en la nuna batal-epoko la esperantistojn instigas al agado „ne la penso pri praktika utileco, sed nur la penso pri ... *frateco kaj justeco inter ĉiuj popoloj*".[1]

Zamenhof ne nur rifuzis prisilenti verojn pro konsidero al zorgoj, ke oni povus riproĉi al la movado provokojn –

> ... senkolora oficiala parolo estus granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas pro libereco, pro la plej elementa homa libereco, pro la *rajtoj de homo* ...[2]

– sed ankaŭ insiste postulis, ke Esperanto ne servu nur al egoismaj interesoj, ĉar multe pli grava estas ĝia idea flanko:

> Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni neniigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno: „Kun *tia* Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan!"[3]

Eble neniu eldiro de Zamenhof estis poste tiel ofte citata kiel ĝuste tiu ĉi. Fakte, la parolado, en kiu ĝi troviĝas, celis esti ia kontraŭpezo al la Deklaracio pri la esenco de Esperantismo, kiu rekonis la legitimecon de la uzo de Esperanto por kiu ajn celo, kaj similan modifan karakteron oni povas atribui al la „Deklaracio pri neŭtraleco de la Kongresoj de Esperanto"[4], kiu per voĉdono estis akceptita en Ĝenevo. Tiu nova Deklaracio, kune kun la parolado de Zamenhof[5], difinis la neŭtralecon en maniero, kiu ne signifis inviton al silentado pri tiklaĵoj, sed kuraĝigon uzi la kongresojn kiel forumon por pridiskuti ĉion, kio helpos interproksimigi la popolojn.[6]

La klara postulo de Zamenhof, ke Esperanto ne estu nur helpilo en komercaj rilatoj, kaj lia nevualita kondamno de oportunismo servis al multaj esperantistoj kiel stimulilo – ne por iĝi adeptoj de homaranismo, sed ja por interpreti sian laboron por Esperanto kiel batalon samtempe por ideo. La formoj de tiu

1. PVZ VII 366.
2. PVZ VII 362. – Zamenhof menciis i.a. la buĉadojn de Bjalistoko kaj Kaŭkazo.
3. PVZ VII 366.
4. *Oficiala Gazeto Esperantista* 1. 1908/09, p. 216-217; *Leteroj* I, p. 287-288.
5. Li plie precizigis pri la rolo de la kongresoj dum sia parolado en Cambridge (1907): PVZ VIII 80-86.
6. Kp. Forster, p. 95-101.

idealismo variis. Oni povis esprimi la antaŭvidon, ke la interna ideo des pli facile disvastiĝos, „ju malpli ni parolos pri ĝi", kaj rekomendi, ke Esperanto estu propagandata nur kiel lingvo – kun la samtempa konscio pri tio, ke ĝia venko „estos pli ol nur venko de lingvo".[1] Aŭ oni tre emfazis sian ligitecon al la interna ideo, ĉerpante tiamaniere memfidon kiel la disĉiploj de Zamenhof aŭ eĉ „pli bonaj esperantistoj". Denove aliaj vidis sin alvokitaj meti Esperanton en la servon de „ekstera" ideologio, precipe de socialismo. Dank' al la nova Deklaracio tiuj povis senĝene aranĝi siajn kunsidojn en la kadro de la ĝeneralaj esperantistaj kongresoj. Jam en Ĝenevo okazis la unua kunveno de esperantistaj „ruĝuloj". En 1907, ekaperis la revoluci-tendenca *Internacia Socia Revuo,* internacia anarkiista kongreso rezoluciis favore por Esperanto[2], kaj en junio de la sama jaro ĉinaj progresemaj gejunuloj ekeldonis en Parizo la semajnan gazeton *Xinshiji* kun la Esperanta subtitolo *La Novaj Tempoj*, kiu apud anarkiismo prezentis al la postrestinta Ĉinio ankaŭ Esperanton kiel unu el la admirindaj akiraĵoj de okcidenta pensado.[3] En alia mondparto, en Chicago, aperis en 1908 la unua esperantlingva traduko de la Komunista Manifesto.[4]

Ĉirkaŭ la sama tempo, en la jaroj 1907/1908, Esperanto trairis sian ĝis tiam plej gravan krizon. Por ricevi internacian, aŭtoritatan apogon al Esperanto, Zamenhof konsentis lasi sian lingvon esti juĝata de komitato konsistanta el 12 elstaraj lingvistoj, kiu estis kunvokita de Louis Couturat nome de „Delegitaro por alpreno de lingvo helpa internacia". Kiel komisiito de Zamenhof, la kunsidojn de la komitato partoprenis de Beaufront. Sed, anstataŭ defendi Esperanton, li tie, tute neatendite, pledis por ŝanĝoj en la strukturo de la lingvo, rekomendante projekton de reformita Esperanto, nomata „Ido". Pro la ondo de indigno,

1. *Vortoj de profesoro Th. Cart*, Jaslo 1927, p. 103, 107-108.
2. *Internacia Socia Revuo* 1. 1907, n-ro 8/9, p. 24. Vidu ankaŭ la raporton prezentitan al la kongreso (en Amsterdam): Em. Chapelier, Gassy Marin, *Les anarchistes et la langue internationale „Esperanto"*, Paris 1908.
3. Robert A. Scalapino, George T. Yu, *The Chinese Anarchist movement*, Berkeley 1961, p. 25; eltirajo („Esperanto kaj la fina lingvo") el *Xinshiji* en *The British Esperantist* 4. 1908, p. 107.
4. *Manifesto de la Komunista Partio*, de Karolo Marks kaj Frederiko Engels, trad. Arturo Baker, Chicago 1908.

kiun en la movado kaŭzis tiu ĉi „perfido", Zamenhof rompis ĉiujn rilatojn kun la komitato. Aro da gvidaj esperantistoj transiris al Ido, sed la „esperantista popolo" en sia plimulto restis fidela al Esperanto, kaj jam post kelkaj jaroj montriĝis, ke Ido ne plu prezentas minacon por la lingvo de Zamenhof. La konscio pri la praktika utilo de Esperanto kaj pri la neceso de disciplino kiel antaŭkondiĉo por progresigo de la movado estis pli forta, ol la inklino akcepti la konsilojn de teoriuloj pri iuj reformoj en la lingvo. Esperanto pruvis dum tiu krizo, ke ĝi jam enradikiĝis en la socio, ke „el artefarita lingvo ĝi trapasis en la formon de viva lingvo".[1]

Infano de la Ido-krizo estis la unua tutmonda organizaĵo de esperantistoj: Universala Esperanto-Asocio (UEA). Ĝin fondis en 1908 la 21jara sviso Hector Hodler, kiu per tio respondis al la postkriza prefero de la esperantistoj ne plu paroli pri reformoj en la lingvo, sed tuj penetrigi ĝin en la praktikan vivon. Flankestarante de la diskutoj pri internacia organizo bazita sur la naciaj Esperanto-societoj, Hodler starigis asocion, kiu konsistis nur el individuaj membroj kaj kiu ofertis al tiuj diversajn servojn helpe de tutmonda reto de Delegitoj.

Per la fondo de UEA, Hodler celis inaŭguri novan periodon en la historio de Esperanto, tiun de efektiva uzado de la lingvo. La tempon, dum kiu oni zorgis ekskluzive pri propagando, li deklaris finita. Laŭ li, anakronisme sin tenas tiuj esperantistoj, „kiuj, ĉar ili opinias, ke la sukceso de Esperanto venos, neatendite, per ekstera aŭtoritato, zorge apartigas ĝin el sia vivo ĉiutaga kaj ĝin konsideras simple kiel distraĵon".[2]

Ne malpli signife estis, ke Hodler difinis por la movado ideologion – pli realecan ol la homaranismo de Zamenhof, malpli nedevigan ol la „interna ideo". Esperantismo estis por li – diference de pure lingva movado – „precipe socia, konstrua kaj progresema movado"[3], kaj li diferencigis inter esperantisto laŭ la Deklaracio

1. L. Ĵirkov, *Kial venkis Esperanto? Studo*, Leipzig 1931 (represo Oosaka 1974), p. 30. – Pri la Ido-skismo vd. Waringhien, *Leteroj* II, p. 3-152; Waringhien, *1887 kaj la sekvo*, p. 139-154; Forster, p. 110-141; F.S.L. Lyons, *Internationalism in Europe, 1815-1914*, Leyden 1963, p. 212-214.
2. H. Hodler, „Kompreni kaj apliki", *Esperanto* 5. 1909, n-ro 53 (20 apr), p. 1.
3. H. Hodler, *Der Esperantismus*, Genf 1913, p. 9.

de Boulogne-sur-Mer kaj „esperantiano", la membro de UEA, kiu en „Esperantio" vidu la modelon de estonta homaro internacie solidara kaj kunlaborema.[1] Por la plibonigo de la interpopolaj rilatoj, klarigis Hodler, la „praktika internaciismo" de UEA povus alporti pli konkretajn rezultojn, „ol tiuj homoj, kiuj konstante parolas pri frateco inter la popoloj, kaj neniam faras ian seriozan klopodon por eĉ parte efektivigi siajn ideojn en la reala vivo".[2] Kontraŭe al la tradiciaj internaciismo kaj pacifismo, kiuj „celas nur plifaciligi la rilatojn inter la *nacioj*", sed „nenion kreas *super* ili", la esperantismo devas esti avangardo en nova, pozitiva fazo de internaciismo, kunigante *homojn* kaj ignorante naciecon, lingvon kaj rason.[3]

La fakto, ke en UEA feliĉe kombiniĝis idealismaj impulsoj kaj praktikaj servoj, havis grandan influon je la sukcesa disvolviĝo de la Esperanto-movado antaŭ kaj post la Unua Mondmilito. Jam en 1914 UEA havis pli ol 7 000 pagantajn membrojn.

1.5. *ESPERANTO EN LA IMPERIESTRA GERMANIO*

Komence, la ĉefa obstaklo por la disvastiĝo de Esperanto estis simple duboj pri ĝiaj vivoŝancoj. Kion Zamenhof estis submetinta, estis nur unu el multaj proponoj de nova lingvo, kiuj aperis preskaŭ ĉiujare kaj kutime ne transpaŝis la stadion de unusola broŝuro. Ankaŭ necesas konsideri, ke fine de la 19a jarcento la ideo de internacia lingvo, kiun eble plimulto de la informitoj principe apogis, estis kompromitita pro la subita leviĝo de la lingvo-projekto Volapük en la 1880aj jaroj kaj ĝia same abrupta pereo. Sekve , seniluziiĝo en la publiko, skeptiko en komerco kaj

1. Edmond Privat, *Historio de la lingvo Esperanto. La movado 1900-1927*, Leipzig 1927, p. 72.
2. H. Hodler, „La agado de U.E.A.", *Esperanto* 8. 1912, p. 242.
3. H. Hodler, „La socia signifo de U.E.A.", *Esperanto* 6. 1910, n-ro 78 (20 majo), p. 1.

scienco, indiferenteco aŭ mokoj ĉe la establita lingvistiko[1] estis la ĉefaj malamikoj de la unuaj adeptoj de Esperanto.

Tiun ĉi grandparte pasivan sintenon akompanis aŭ anstataŭis opozicio kaj rekta kontraŭstaro, kiam la lingvo komencis montriĝi socia fakto, kiam ĝi efektive eniris pli vastajn tavolojn kaj, precipe, kiam ĝiaj uzantoj evidentigis la tendencon kunligiĝi kun emancipaj aŭ eĉ revoluciaj fluoj. Kiom da ĝermoj por konfliktoj kun la ekstera mondo kuŝis en la ŝajne iom naiva, senkulpa deziro de Zamenhof, tion frue spertis la esperantistoj en Ruslando.

Poste, la zorgo de la francaj pioniroj eviti ligitecon de Esperanto kun pacifismo kaj laŭeble prisilenti la judecon de ĝia aŭtoro montris, kiom necesis atenti por ne provoki naciismajn kaj antisemitajn antaŭjuĝojn, regantajn en la franca burĝaro sekve de la Dreyfus-afero. Aliflanke, diference de Ruslando, restis al la francaj esperantistoj sufiĉa tereno por aŭdigi siajn argumentojn kaj konsiderinde grandigi la movadon, tiel ke Boirac fine de 1906 povis konstati, ke la antaŭjuĝoj kontraŭ artefarita lingvo malfortiĝas kaj ke „en preskaŭ ĉiuj civilizitaj landoj la nomo de Esperanto estas konata kaj ne vokas plu mokemon".[2] Kaj Javal kontente notis en oktobro 1905, ke el pli ol 700 gazet-artikoloj pri Esperanto aperintaj post la Bulonja Kongreso nur unusola menciis, ke Zamenhof estas judo.[3]

Multe pli, tamen, naciismaj emocioj ĝenis la movadon en najbara lando, en Germanio. Tie Esperanto estis akceptata kun pli granda hezito, ol en Francio. Pro tio valoras iom ekzameni la situacion de la germana Esperanto-movado antaŭ la Unua Mondmilito.

La Germana Regno tiutempe faris energiajn klopodojn aliĝi al

1. Pri la tiutempaj debatoj de lingvistoj vd. i.a. la kontribuaĵojn de Hugo Schuchardt kaj Jan Baudouin de Courtenay, represitajn en Reinhard Haupenthal (red.), *Plansprache. Beiträge zur Interlingvistik,* Darmstadt 1976.
2. Letero al Zamenhof, de 9-12-1906, *Leteroj de L.-L. Zamenhof* I, p. 323. Sed li aldonas: „... ni ne forgesu, ke la kontraŭuloj de Esperanto estas ankoraŭ multaj kaj influaj, precipe en la altaj fakoj de la societo..."
3. Letero al Zamenhof, de 15-10-1905, PVZ X 197. – Aliflanke, en 1907 kontraŭesperanta broŝuro disvastigis la aserton, ke Esperanto „estas nova rimedo de *socia malintegrado* adoptita de la judoj": Ernest Gaubert, *La sottise esperantiste*, Paris 1907, p. 24.

la imperiistaj potencoj. La severajn sociajn kontraŭdirojn, kiujn sekvigis la rapida industriigo kaj kiujn nur pene kaŝis la brila fasado de la vilhelma epoko, la regantoj provis neŭtraligi per senhalta komerca ekspansio en la mondo. Tio ĉi, kune kun la latenta konscio, ke la germanoj realigis sian unuecon ne per desuba revolucio, sed per desupra premo, kaŭzis la karakterizan miksaĵon el aplomba memfido pri la nova rolo kiel mondpotenco kaj ne tute subpremeblaj sentoj de envio je la establitaj imperiismaj ŝtatoj, Anglio kaj Francio. Precipe la vaste reganta opinio, ke la germanoj posedas deficitan nacian fieron kaj tial kun aparta singardo devas protekti sin kontraŭ internaciismaj kaj kontraŭgermanaj maŝinacioj, ne restis sen influo je la evoluo de la Esperanto-movado en Germanio.

Kvankam ĝis 1895 aperis en Nürnberg la revuo *Esperantisto* kaj la unuaj gravaj literaturaĵoj, precipe de rusaj aŭtoroj, Esperanto nur tre malrapide penetris en Germanion. Kiam jam ekzistis fortaj naciaj societoj en aliaj landoj de Eŭropo, la germanaj esperantistoj ankoraŭ restis sen tutlanda organizaĵo. Nur en somero 1904 oni registris, ke „Germanujo, kiu tiel longe skeptike staris malantaŭe en la movado, komencas montri seriozan intereson por la afero".[1] Ŝajnas, ke antaŭenpuŝan efikon havis artikolo pri Esperanto aperinta meze de 1902 en populara revuo, *Die Woche*[2]; ĝia aŭtoro estis la konata aŭstra pacifisto Alfred Hermann Fried, kiu publikigis en la sekvanta jaro lernolibron de Esperanto por germanoj.[3] En majo 1906 fine, nur unu monaton antaŭ la fondiĝo de Japana Esperantista Asocio, estis starigita Germana Esperantista Societo, kiu ekde 1909 nomas sin Germana Esperanto-Asocio. Du jarojn poste en Dresden okazis la Kvara UK, dum kiu estis surscenigita *Ifigenio* de Goethe en la traduko de Zamenhof – evento, kiu konvinkis multajn skeptikulojn en Germanio pri la belsoneco kaj esprimkapablo de la lingvo.

1. *Esperantistische Mitteilungen* (Berlin) 1904, p.30.
2. *Lingvo Internacia* 7. 1902, p. 83; Karlo Steier, „La unua tempo de Esperanto en Germanlingvujo", *La Kroniko* 1. 1911/12, p. 76 (represita en A. Möbusz, *Dokumentoj de Esperanto. Informilo pri la historio kaj organizo de la Esperanta movado*, Berlin 1921, p. 35).
3. Alfred H. Fried, *Lehrbuch der Internationalen Hilfssprache „Esperanto"*, Berlin-Schöneberg 1903. – Fried (1864-1921) ricevis en 1911 la Nobel-Pacpremion.

La memoro pri la fiasko de Volapük povas esti unu el la kialoj, pro kiuj la germana publiko nur hezite interesiĝis pri Esperanto. Sed ne estis sole duboj pri la praktika eblo de internacia lingvo, kiuj klarigas la postrestadon de Germanio. Troviĝas ankaŭ pli seriozaj baroj. Jam en 1905 konata verkisto disvastigis la akuzon, ke Esperanto entenas politikan celadon kaj prezentas danĝeron por la germanaj interesoj.[1] Kaj kelkajn semajnojn post la fondo de la Societo, la redaktoro de ĝia organo *Germana Esperantisto* konfesis, ke rezisto, pli signifa ol nura nescio aŭ antaŭjuĝoj, malhelpas la progreson de la afero de Esperanto. Tiu rezisto ne venis „de la plejmulto, ne de la amaso", sed de „forta, potenca kaj influema" kategorio de homoj, nome de personoj, „kiuj konsideras ĉiun internaciemon, kiel danĝeran kaj kontraŭan je naciaj interesoj", juĝante internacian lingvon „eble ankoraŭ pli severe".[2] Kiel notis unu el la gvidantoj de la germana movado fine de 1912, Esperanto disvastiĝis sen ŝtata helpo kaj sen financaj subvencioj, „kontraŭ la grandega potenco de la ĉiutaga gazetaro, kiu ĝis la plej nova tempo kun malofta unuanimeco malakceptis la Esperanto-movadon aŭ plene silentis pri ĝi."[3]

Kalumniojn spertis la germanaj esperantistoj precipe de tiaj gazetoj, kiuj sin komprenis gardantoj de korekta patriotismo kaj ne malofte posedis bonajn kontaktojn kun registaraj rondoj. La enhavo de la atakoj montras tri ĉefajn trajtojn. Kutime ili komencis per pseŭdoscienca biologiigo de la fenomeno de lingvo, ekzemple admone atentigante la renoman kemiiston Wilhelm Ostwald, laŭ kiu la lingvo ne estis pli ol teknika interkomunikilo kaj naciaj lingvoj tro neperfektaj por servi internacian sciencan interŝanĝon, pri la altevoluinta, nuancoriĉa germana

1. J(ean) B(orel), „Esperanto kaj internaciismo", *Germana Esperantisto* 3. 1906, p. 89; Borel ne indikas la nomon de la verkisto. –De volapukista flanko venis atakoj, en kiuj la germanoj kaj slavoj favorantaj Esperanton estis nomataj „senpatrujaj uloj": *Obersteirische Volkszeitung*, 18-8-1900; cit. laŭ *Lingvo Internacia* 5. 1900, p. 125.
2. Borel, p. 88-89.
3. Ernst Kliemke, „Kulturmalsaĝaĵoj. Glosoj al la mondlingva movado", *Germana Esperantisto* 9. 1912, eldono A, p. 162 (trad. el *Der Vortrupp* 1912, septembro). – Pozitiva pritakso de la ĝenerala sinteno de la germana gazetaro al Esperanto troviĝas en *Das Esperanto ein Kulturfaktor. Festschrift anläßlich des 9. Deutschen Esperanto-Kongresses*, Leipzig 1914, p. 317.

lingvo kaj ĝia unika spirito.[1] Tia sinteno eble ankoraŭ apartenas al la kategorio de popularaj antaŭjuĝoj kontraŭ artefaritaj, nenaturaj lingvoj. Eĉ la krio, ke Esperanto efikus „kulturdetrue"[2], se ĝi estus enkondukita en lernejojn, estis iel atendebla reago flanke de anoj de la germana burĝaro, kiuj ĝuis la teknikan progreson, sed samtempe time klopodis savi sian sentimentalan alkroĉiĝon al la germana kulturo tra la rapida socia ŝanĝo.

Signo de histerio tamen estis, ke germana gazeto, nur iom pli ol 20 jarojn post la surmondiĝo de Esperanto, nomis ĝin „neniigilo de la germana lingvo".[3] Ostwald rikoltis severan riprocon, ĉar en Usono li varbis por Esperanto – anstataŭ tie sin dediĉi al la disvastigo de la germana lingvo.[4] Kaj militeman ŝovinismon, fine, predikis kvaronjara revuo en 1912, vokante „al batalo kontraŭ la esperantismo, tiu elkreskaĵo de ekzaltita internaciismo".[5]

La menciitaj tri ĉefaj specoj de kritiko – ke Esperanto ne estas vera lingvo; ke ĝi minacas la germanan lingvon; ke malantaŭ ĝi troviĝas okultaj fortoj de internaciismo – jam aperas en unu tuto en malgranda citaĵo el la berlina *Deutsche Tageszeitung* de 1907:

> Mankas ja eĉ al la naturscienciscistoj la sento por tio, ke nia gepatra lingvo estas naturkreskaĵo aparteca kaj tial estas komprenebla la nekredebla barbareco de S-ro ĥemiisto-profesoro Ostwald, kiu povas entuziasmiĝi pri tiel mokinda trompaĵo, kia estas la lingvo Esperanto, pri elpensaĵo de duonaziano direktita malamikege kontraŭ la germana lingvo.[6]

Sian obsediĝon per sentoj de malplivaloro kontraŭ la pli malnovaj mondpotencoj, la angla kaj franca, la naciismaj gazetoj manifestis precipe per tio, ke ili juĝis germanojn aparte nerezistemaj al la danĝeroj de Esperanto. *Alldeutsche Blätter* esprimis

1. Kurt Schubert, „Deutsche Sprache und Esperanto", *Das Deutschtum im Ausland* 1912, p. 652. Pri la opinio de Ostwald vd. ekz. Wilhelm Ostwald, *Die internationale Hilfssprache und das Esperanto*, Berlin 1907, p. 16-17. Pro sia komparo de gepatra lingvo kun „hejma pantoflo" kaj de artefarita lingvo kun „eleganta, laŭmezura boto" Ostwald renkontis kritikon ankaŭ de esperantistoj: G.H. Göhl, *Esperanto, eine Kulturforderung und ihre Erfüllung*, Leipzig 1914, p. 86.
2. *Ostholsteinische Zeitung*, 10-6-1911; laŭ *Germana Esperantisto* 8. 1911, p. 150.
3. *Berliner Beamten-Zeitschrift*, 5-5-1911; laŭ *Germana Esperantisto* 8. 1911, p. 151.
4. Schubert, „Deutsche Sprache", p. 651.
5. Samloke, p. 652.
6. 22-2-1907; laŭ *Germana Esperantisto* 4. 1907, p. 42.

la timon, ke en la limregionoj malaperos la germana lingvo, se la tieaj loĝantoj uzas Esperanton por siaj rilatoj kun eksterlando, ĉar la germanoj ne posedas la saman nacian fieron kiel aliaj popoloj.[1] Unu revuo precizigis, ke aliaj nacioj, parolante Esperanton, plue estimos sian propran lingvon, sed ke tio ne validas por la germanoj, ĉar ili ĉiam estas tro impreseblaj per ĉio fremda.[2] Esperanto estis timata kiel ruza helpilo por subpremi la germanojn, kiel granda internacia danĝero, kiu eble kapablos malsuprenpremi la germanan lingvon al la nivelo de sensignifa idiomo.[3]

Se la germanaj esperantistoj respondis, ke Esperanto estas neŭtrala komunikilo ne donante privilegiojn al kiu ajn nacio, tio restis sen efiko, ĉar la naciistoj ĝuste celis al pli da privilegioj por la germana lingvo akorde kun la kreskanta monda signifo de la germana industrio kaj komerco. De ili, sekve, ne eblis atendi komprenemon por la ideo malkonstrui lingvan diskriminacion per Esperanto. Male, ili postulis, ke pli malgrandaj ŝtatoj traktadu kun la grandpotencoj en ties lingvoj, ne en la propra, des malpli en Esperanto: la nacietoj entuziasmiĝas por Esperanto, ĉar per ĝia venko ili atingus egalrajtecon en sia negocado kun la reprezentantoj de la grandaj mondkomercaj lingvoj – kaj tio por la germanoj „estus ekonomia suicido".[4]

Ankaŭ la ŝovinistoj apelaciis al la ofte renkontata antaŭjuĝo kontraŭ la „kunflikiteco" de Esperanto. Ju pli tamen la lingvo disvastiĝis, des pli klare montriĝis, ke la antipatio de la kontraŭuloj koncernis malpli iujn strukturajn malfortojn de Esperanto kiel lingvo, sed ke ĝi havis ideologian fonon. Fine, estis eĉ eksplicite distingite inter la *verko* de Zamenhof, al kiu oni ne kontestis certan teknikan kvaliton, kaj la *celoj* de la esperantistoj, kiujn nepre necesas kontraŭbatali.

Tian distingon, ekzemple, faris Albert Zimmermann, estrarano de la influa Unuiĝo de German-naciecaj Komercaj Dungitoj, kiu per libro eldonita en 1915 lanĉis multjaran kampanjon kontraŭ Esperanto, vidata de li precipe kiel obstaklo al la eks-

1. 17-8-1912; laŭ *Germana Esperantisto* 9. 1912, eldono A, p. 152.
2. Sautter, „Noch einmal die deutsche Sprache und Esperanto", *Das Deutschtum im Ausland* 1913, p. 758.
3. *Wartburgstimmen* 1913, okt.; laŭ *Germana Esperantisto* 10. 1913, eldono A, p. 164.
4. Alfred Geiser, en *Das Deutschtum im Ausland* 1912, p. 653-654.

pansio de la germana komerco en la mondo.[1] Nomante Esperanton la plej danĝera el ĉiuj ĝistiamaj projektoj de „tutmonda lingvo" kaj konsiderante ĝin kiel ideon per si mem nesanan kaj plej profunde kontraŭnacian, Zimmermann konfesas, ke li „antaŭsupozas, ke Esperanto estas tiel perfekta, kiel oni povas rajte atendi", kaj ke li turnas sin nur kontraŭ la celo de Zamenhof, kiu estas, laŭ li, same kondamninda kiel la strebado de latinigistoj, pacifistoj kaj batalantoj por virina emancipiĝo.[2] Zimmermann juĝas Esperanton ekskluzive el la vidpunkto de ĝia utilo aŭ malutilo por la germanoj. Li konkludas, ke Esperanto ĝenas la klopodojn venkigi la germanan en la konkurenca batalo kun la angla kaj franca por la pozicio de *la* mondlingvo.[3]

Tiun grandpotencan pensmanieron en la agitado kontraŭ Esperanto akompanis jam antaŭ la Unua Mondmilito kontraŭjuda elemento. Komence de 1913, la pangermana *Staatsbürger-Zeitung* nomis „ĉiun tian strebadon, inventi novan internacian lingvon..., frenezo kaj krimo kontraŭ la homaro, intelekta ĥimero"; laŭ ĝi, Esperanto, estante la verko de judo, ne taŭgas por la kristanaj germanoj. La sama gazeto uzis tiun koncizan, detru-celan karakterizon, sur kiu dudek jarojn poste la nazioj bazos sian senindulgan batalon kontraŭ Esperanto: ĝi kondamnis „tiun judan mondlingvon".[4]

Kvankam tiaj insultoj eble jam elvokis ĉe larĝvidaj samtempuloj preman antaŭtimon pri estontaj katastrofaj sekvoj, la atakoj kontraŭ Esperanto, kontraŭ tiu lingvo kiel nova maltrankviliga simptomo de la abomenata internaciismo tiutempe restis limigitaj

1. A. Zimmermann, *Esperanto, ein Hindernis für die Ausbreitung des Deutschen Welthandels*, Hamburg 1915. Nova eldono: A. Zimmermann, Ernst Müller-Holm, *Esperanto, ein Hindernis für die Ausbreitung des deutschen Welthandels und der deutschen Sprache*, Hamburg 1923. Pri respondoj de esperantista flanko vidu i.a. Heinrich Nienkamp, *Kultur und Sprache*, Berlin-Charlottenburg 1916, p. 168, 253-254; *Germana Esperantisto* 12. 1915, p. 73-75, 82, 87-89; 18. 1921, p. 176-177, 256-257; 21. 1924, p. 224. – La menciita Unuiĝo, fondita en 1893, estis nete antisemita; kp. Iris Hamel, *Völkischer Verband und nationale Gewerkschaft. Die Politik des Deutschnationalen Handlungsgehilfenverbandes 1893-1933*, Frankfurt/M. 1967.
2. Zimmermann, 1915, p. 3.
3. Samloke, p. 26-27.
4. 4-1-1913 kaj 15-1-1913; laŭ *Germana Esperantisto* 10. 1913, eldono A, p. 19, 41.

al la kolumnoj de difinitaj gazetoj kaj ne sekvigis oficialajn paŝojn de la aŭtoritatoj kontraŭ la movado. Ili ankaŭ ne povis malhelpi, ke la organizitaj esperantistoj atingis taksatan nombron de 8 000 en la jaro 1914.[1]

Aliflanke, la adeptoj de Esperanto en Germanio estis devigitaj – multe pli, ol tiuj en Francio – zorge elimini el sia varbagado ĉion, kio povus ilian lingvon plie suspektigi ĉe la naciisma gazetaro.[2] Tio klarigas iliajn oftajn certigojn, ke Esperanto ne estas direktita kontraŭ germanaj interesoj, aŭ argumentojn kiel tiun, ke ne per Esperanto, sed per la lernado de fremdaj naciaj lingvoj la „germaneco" estas minacata.[3] Kelkaj germanaj esperantistoj kuraĝe protestis kontraŭ la predikata malamo al aliaj nacioj, manifestiĝanta en la atakoj, nomante sin mem homoj, kiuj trovas racian, ne tro entuziasman internaciismon plene akordigebla kun sia amo al la patrolando.[4] Sed aliaj praktikis strangan neŭtralismon, dirante ke en la movado „pacifistoj, ŝovinistoj aŭ socialistoj" estu egale bonvenaj[5], aŭ eĉ jam troe sin klinis antaŭ la naciisma febro, decide deklarante sian distanciĝon de pacifistoj kaj socialdemokratoj, kiuj utiligas Esperanton por „kontraŭgermanaj" celoj.[6] Karakterize estis, ke en 1913 la revuo *Germana Esperantisto* rimarkis Universalan Esperanto-Asocion sur „malĝusta vojo", ĉar ĝi okupiĝis pri politiko, pli precize, ĉar ĝia vicprezidanto pledis por eksigo de ŝovinistoj el la Esperantomovado kaj por aktiva batalo de la esperantistoj kontraŭ menso-

1. EdE, p. 191.
2. Ankaŭ la pacifistoj, mem kvazaŭ parioj en vilhelma Germanio, hezitis malkaŝi siajn simpatiojn por Esperanto, timante provoki protestojn flanke de naciistoj, ke la pacifistoj subfosas la germanan lingvon kaj kulturon: Roger Chickering, *Imperial Germany and a world without war. The Peace Movement and German society, 1892-1914*, Princeton 1975, p. 129-130.
3. „Deutschtum, Esperanto und die Volksschule", *Sächsische Schulzeitung* 82. 1915, n-ro 41, p. 607. – Pri Esperanto kiel „nacia protektilo" kontraŭ la emo de germanoj adori la eksterlandon skribas Emil Bausenwein, *Was geht den Deutschen das Esperanto an?*, Haida 1913, p. 10.
4. Friedrich Ellersiek, „Staatsbürger und Esperantisten", *Germana Esperantisto* 10. 1913, eldono A, p. 18-19.
5. Breiger, „Rückblick auf das Jahr 1913", *Germana Esperantisto* 11. 1914, eldono A, p. 2.
6. G.H. Göhl, *Esperanto. Eine Kulturforderung und ihre Erfüllung*, Leipzig 1914, p. 102.

goj kaj misprezentoj en la diverslanda ŝovinisma gazetaro.[1] Tiu ĉi kritiko kontraŭ UEA ne nur ilustras, kiajn obstaklojn trovis la germanaj esperantistoj en sia enlanda laboro, sed samtempe montras, kiom koliziis la strebado de Hector Hodler kaj aliaj gvidantoj de UEA kun la realaĵoj en mondo baldaŭ ekmilitonta.

1.6. *„ŜTELISTA LINGVO" – „BURĜA MALSAĜAĴO"*

La obstakloj, kiujn renkontis en sia agado la esperantistoj en Germanio, tamen preskaŭ malgraviĝas kompare kun tiuj, kiuj ekzistis en Ruslando. Tie la cenzuro en 1904, la jaron antaŭ la unua rusa revolucio, montris signojn de liberaliĝo. Iĝis eble eldoni Esperantajn gazetojn, inter kiuj elstaris *La Ondo de Esperanto*, aperanta de februaro 1909 ĝis majo 1917. Post la revolucio pliboniĝis la eblecoj varbi por la lingvo kaj plimultigi la membraron de Esperanto-grupoj.

Sed la ruslandaj esperantistoj plue restis malfide rigardataj. Kvankam ili, post siaj multaj malbonaj spertoj, evitis en siaj eldonaĵoj temojn sociajn kaj politikajn, kiuj povus liveri al la cenzuro pretekston por denove bremsi la movadon, ili ne allasis dubojn pri sia pozicio, ke „Esperanto estas ne celo, sed rimedo", kaj ke la movado devas esti bazita sur la strebado al demokratiĝo, la zorgo al „disvastiĝo de kleriĝo en vastaj popolamasoj" kaj la batalo kontraŭ „nacia ekskluziveco".[2] Interlinie ili kaptis la okazon, kiam ajn ĝi prezentiĝis, por kritiki aktualajn cirkonstancojn en Ruslando. En aŭtuno 1905 la cenzuro malpermesis, ke en *Ruslanda Esperantisto* aperu la kontribuaĵo „Raĥel kaj Lea" de la publicisto Aleksandr Jablonovskij[3]; la artikolo komparis la biblian rakonton pri Jakobo, kiu ricevis la edzinon Lea anstataŭ

1. Redakcia noto en *Germana Esperantisto* 10. 1913, eldono A, p. 171. Vd. ankaŭ Th. Rousseau, „UEA kaj ŝovinismo", *Esperanto* 9. 1913, p. 267-268; *Oficiala dokumentaro de la 4a Kongreso de Universala Esperanto-Asocio,* Genève 1913, 1a parto, p. 53-60; 2a parto, p. 9-12.
2. V. Bitner, „Al laboro!", *Espero* (Peterburgo) 1908, p. 51.
3. Vd. la avizon en *Ruslanda Esperantisto* 1. 1905, p. 102.

la amata Raĥel, kun la Ŝtata Dumo (parlamento), kiun la popolo ricevis anstataŭ demokrata konstitucio.[1] La cenzuron mem vipis alia satiro en la sama gazeto, kvin jarojn poste, kiu listigas temojn tabuajn por redakcio en cara Ruslando kaj konkludas, ke nedanĝera restas nur naiva poemo, kontraŭ kiu tamen ribelas la legantoj.[2] En alia okazo du rusaj esperantistoj faris alvokon al la Esperanta gazetaro en eksterlando, ke almenaŭ ĝi ne hezitu pritrakti la politikan evoluon en Ruslando.[3]

Tiutempe, la Esperanto-movado jam konsiderinde progresis en aliaj landoj, kiuj ne konis la severan penskontrolon praktikatan de la rusa burokratio. Sekve, la cenzuro en Peterburgo pli kaj pli ofte malpermesis eksterlandajn eldonaĵojn en Esperanto, kies enhavo estis konsiderata kiel danĝera. Importado de la originala romano *Paŭlo Debenham* de la germandevena anglo H.A. Luyken estis malpermesita en 1912, ĉar en ĝi estis parolo pri la „malfeliĉa lando" Rusujo kaj ĝiaj „malfeliĉaj popoloj".[4] Similan sorton havis pluraj verkoj de politika aŭ religia karaktero.

Se iom mildiĝis la cenzuro, aliflanke plioftiĝis incidentoj, kiuj montris, ke la regantaj klasoj kaj ilia polica helpantaro rigardis la agadon por Esperanto strikte sub la vidpunkto de interna sekureco. En 1908, la Esperanto-societo en Serpuĥov malfermis kursojn en domo, kiu apartenis al grafino; kiam ŝi eksciis pri tio, ŝi tuj postulis ĉesigi la kursojn, konsiderante Esperanton lingvo de „diablaj framasonoj".[5] Pli frue, en 1906, polica oficiro aperis en kunveno de esperantistoj en Vladivostok kaj malpermesis al ili publike paroli pri Esperanto.[6] En la sama urbo, cetere, en 1909 funkciis Esperanto-rondeto inter politikaj malliberuloj.[7] Precipe sur provinca nivelo ofte okazis ĉikanoj kontraŭ esperantistoj. En

1. Ĥvorostin, p. 84.
2. A. Kofman, „Ĥristina, prigotov'te postel'! Strašnyj razskaz", *Ruslanda Esperantisto* 4. 1910, p. 66-72; Esperanta traduko: „Kristino, pretigu la liton! Terura rakonto", en: Literatura aldono de *Lingvo Internacia* 1907, n-ro 1, p. 3-16. Kp. la resumon de Ĥvorostin, p. 83-84.
3. *Lingvo Internacia* 11. 1906, p. 398; kp. *Ruslanda Esperantisto* 2. 1906, p. 71.
4. H.A. Luyken, *Paŭlo Debenham*, London 1911, p. 8; Ĥvorostin, p. 85.
5. G.P. de Bruin, *Laborista Esperanta movado antaŭ la mondmilito*, Parizo 1936, p. 18.
6. *Ruslanda Esperantisto* 2. 1906, p. 157.
7. De Bruin, p. 19. – En la malliberejo de Tbilisi kaj sia norda ekzilejo longtempe instruis B. Gogeliani: EdE, p. 198.

1911, provincestro en Petrokov ordonis, ke oni detruu sur strataj elpendaĵoj la Esperantajn surskribojn, ĉar la loĝantoj ne komprenas ilin.[1] Kaj, ŝajne nur pro la propagando de Esperanto, estis arestita la delegito de UEA en Kronŝtadt; li restis en malliberejo dum pli ol unu monato kaj post tio ricevis malpermeson plue loĝi en la urbo.[2]

Ne estas klare, ĉu almenaŭ tiu lasta incidento devas esti rigardata en ligo kun afero ĉirkaŭ la prezidanto de Ruslanda Ligo Esperantista, Aleksandr Postnikov, kiu ne originis en poresperanta aktivado, sed havis evidente sekurec-politikan fonon. La kapitano Postnikov en aprilo 1911 estis arestita sub la akuzo esti transdoninta sekretajn dokumentojn de la armeo al germana, aŭstra kaj japana agentoj. Kvankam la aŭtoritatoj certigis, ke ili surbaze de la „spiona agado" de Postnikov ne konkludas pri danĝeraj celadoj de la rusaj esperantistoj, la Ligo kun siaj ĉ. 900 membroj devis dissolviĝi. La afero ne tuŝis aliajn Esperanto-organizaĵojn, kaj efektive ŝajnas, ke Postnikov estis dubinda persono.[3] Sed, eble ankoraŭ sub influo de tiu evento, komence de 1912 la moskvaj esperantistoj ne ricevis permeson organizi Esperanto-kongreson.[4]

Malgraŭ la konstantaj malhelpoj, daŭre venis novaj homoj, intelektuloj kaj ankaŭ laboristoj, kiuj estis allogitaj al Esperanto. Kun la plifortiĝo de la revolucia movado la polico pli kaj pli turnis sian atenton al radikalaj elementoj en la rusa Esperanto-movado. La Gubernia Ĝendarma Oficejo en Orel rimarkis, ke membroj de loka grupo de Rusa Socialdemokrata Laborista Partio zorgas pri kreo de Esperanto-rondeto.[5] En 1912 la cara Ofrana per speciala cirkulero proponis tre atentan observadon de personoj, kiuj havas rilaton al la organizaĵo „Liberiga Stelo" en Parizo, la ĝermo de internacia revolucia Esperanto-movado[6], kaj al la samcela *Internacia Socia Revuo*, kies eniro en Ruslando

1. *Esperanto* 7. 1911, p. 281.
2. Samloke, p. 285.
3. *La Ondo de Esperanto* 3. 1911, p. 86, 133-140, 179; vd. ankaŭ Ė. Drezen, „V bor'be za SESR" (En batalo por SEU), *Meĵdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 103-104.
4. Bruin, p. 19.
5. G. Demidjuk, „Ĉirkaŭ la interna ideo. Historia skizo", en: Sennacieca Asocio Tutmonda, *Jarlibro* 5. 1926, p. 193; Bruin, p. 19.
6. Vd. sube, p. 203.

jam de 1907 estis malpermesita. Por ricevi informojn pri tiuj rondoj la polica departemento eĉ havigis al si la servojn de rusaj diplomatoj: En dokumentoj el la jaro 1912 troviĝas raporto de speciale komisiita oficisto en Parizo pri la tie rezidanta „Liberiga Stelo", per kies programo ŝajne multaj rusoj entuziasmiĝis por Esperanto.[1]

Malpli ol dudek jarojn post kiam la aŭtoritatoj ekatentis pri la uzo de Esperanto fare de la tolstojanoj, la lingvo de Zamenhof komencis esti timata kiel vehiklo de plej danĝeraj pensoj: Kiam en 1913 esperantisto en Kaŭkazo petis permeson eldoni „Bultenon de internacia lingvo", la peto estis rifuzita, ĉar "Esperanto, aperinta en medio de socialistoj de ĉiuj landoj estos... ilo por disvastigi malutilajn ideojn inter la loĝantaro".[2]

Policaj agoj aŭ rektaj persekutoj trafis krom la ruslandajn nur esperantistojn en kelkaj ekonomie malpli evoluintaj landoj. Al la plej frue konataj incidentoj apartenas okazaĵo en la jaro 1907 sur la insulo Samos, tiutempe sendependa princlando en la greka insularo. Nelonge post la fondiĝo de Esperanto-klubo en la ĉefurbo iu vilaĝano estis, eble ŝerce, persvadita de du advokatoj, ke Esperanto estas formo de framasonismo kaj enhavas kontraŭreligian celon. La ekscitita homo sukcesis konvinki kelkajn konatojn en najbara vilaĝo, ke necesas puni la malpiajn esperantistojn. Ĉirkaŭ tridek kamparanoj armitaj per bastonegoj, forkegoj, kaprompiloj kaj hakiloj marŝis en la kunvenejon de la Esperanto-societo kaj, trovinte neniun tie, disrompis la kadron de Zamenhof-portreto, dispecigis librojn kaj difektis la meblojn. Kriante ili minacis mortigi la esperantistojn. Fine, cedante al la premo de l' plebo, la princo-reganto ordonis dissolvi la societon, ĉar „la publika ordo estas malhelpita".[3]

Pli seriozaj eventoj estis raportitaj en 1912 el Ĉinio, kie ŝajne la propagando de ĉinaj anarkiistoj en Parizo markis la esperantistojn kelkloke per la stigmato de kontraŭŝtata aktivado. En decembro 1911 la gvidanto de la Esperanto-grupo en Mukden,

1. Demidjuk, p. 192-193; Bruin, p. 20.
2. Ĥvorostin, p. 83.
3. A. Stamatiadis en EdE, p. 201; *La Ondo de Esperanto* 4. 1912, p. 145-146. En septembro 1907, tiu malpermeso estis nuligita, kaj tri jarojn poste la samosa parlamento unuanime voĉdonis por la deviga instruado de Esperanto en ĉiuj lernejoj de la insulo.

minacata per aresto, ĉar li estis kulpigita revoluciano, kiu adoras Tolstoj kaj Esperanton, nur per fuĝo povis elsaviĝi. Alia grupestro en Ĉinio estis mortigita de nekonato, post kiam la urbestro estis deklarinta: „Esperanto kaŭzos revolucion."[1] En oktobro 1913 multaj germanlingvaj gazetoj raportis pri malpermeso de varba kunveno de esperantistoj en la hungara urbo Székesfehérvár fare de la policestro – laŭdire sub la preteksto, ke ili uzas „ŝtelistan lingvon". Pri la afero okazis interpelacio en la hungara parlamento. Ne estas klare, ĉu la policestro malpermesis la kunvenon, ĉar ĝi temis pri Esperanto aŭ ĉar ĝi ne estis laŭorde anoncita. Sed li mem poste konfesis, ke li avertis la esperantistojn ne uzi Esperanton kiel sekretan lingvon, nekonatan de iliaj labordonantoj.[2]

La impreso, kiu povus altrudi sin pro tiuj ĉi ekzemploj kaj la antaŭe nomitaj el Ruslando, nome ke jam tiutempe Esperanto nerevokeble ligis sin aŭ estis asociata kun „maldekstrismo", tamen nepre bezonus ĝustigon. Kontraŭ simpliga prezento, ke antaŭ la Unua Mondmilito estis klara divido-linio inter progresemaj esperantistoj, unuflanke, kaj reakciaj kontraŭuloj, aliflanke, parolas precipe du faktoj: Unue, la lingvon lernis unuavice homoj nepolitikemaj, kaj la movado en tiu tempo estis firme kontrolata de personoj, kiujn konscia socialisto kalkulus al la „klas-malamikoj". Due, la establitaj laboristaj partioj plejparte ignoris, nur escepte subtenis aŭ eĉ malfavoris la esperantistojn. Provo de la francaj socialistoj Jean Jaurès kaj Edouard Vaillant meti proponon, ke Esperanto estu uzata en la oficialaj sciigoj de la brusela Internacia Socialista Oficejo, en la tagordon de la Internacia Socialista Kongreso en Stuttgart (1907) fiaskis, ĉefe pro la kontraŭstaro de la germana socialdemokrato Paul Singer.[3]

1. *Esperanto* 8. 1912, p. 41; K. Ch. Shan, „Letero el Ĥinlando", *La Ondo de Esperanto* 4. 1912, p.57.
2. *Germana Esperantisto* 10. 1913, eldono A, p. 165-166, 184; *Internacia Socia Revuo* 7. 1913, p. 287-288.
3. *Internacia Socia Revuo* 1. 1907, n-ro 3, p. 15-16; n-ro 6, p. 16; n-ro 8/9, p. 24; n-ro 10/11, p. 15; 3. 1909, p. 63; *Internationaler Sozialisten-Kongreß zu Stuttgart, 18. bis 24. August 1907*, Berlin 1907, p. 23. – Indas noti tię ĉi, ke la samaj Jaurès kaj Vaillant submetis al la kongreso rezoluci-proponon, laŭ kiu en kazo de militeksplodo la proletaro amase striku kaj ribelu; la germano August Bebel akre kontraŭis tiun radikalan proponon, kiu fine ne trovis plimulton.

Dum kelka tempo la gvidantoj de la Socialdemokrata Partio de Germanio eĉ malpermesis al sia partia gazetaro, precipe al la centra organo *Vorwärts*, skribi kion ajn pri Esperanto[1], kaj kiam en 1914 okazis en Leipzig la 9a Germana Esperanto-Kongreso, lokaj burĝaj gazetoj raportis pri ĝi favore, dum la socialdemokrata *Leipziger Volkszeitung* ridindigis Esperanton.[2] Rusa laboristo plendis en 1913, ke liaj gvidantoj rigardas Esperanton „kiel superfluan aferon, ili timas ke laboristoj deflankiĝos de sia urĝa celo".[3] Kaj, simile, la nederlanda socialisto Willem van Ravesteyn nomis la Esperanto-movadon „burĝa malsaĝaĵo" kaj la propagandon por tiu lingvo inter laboristoj „danĝera ludeto".[4]

Oni povas mencii kontraŭajn ekzemplojn. La ĉeĥaj socialdemokratoj dum sia 10a kongreso en 1911 tre favore rezoluciis por Esperanto[5], la itala anarkiisto Errico Malatesta mem lernis ĝin[6], la japano Ôsugi Sakae en 1907/08 gvidis Esperanto-kursojn en Tokio interalie por ĉinaj studentoj[7], kaj lia ĉina samcelano Sifo (Liu Shifu) de 1913 ĝis 1915 eldonis ĝis korpa elĉerpiĝo la gravan ĉin- kaj esperantlingvan revuon *La Voĉo de la Popolo*.[8] Krome, okaze de la Oka Universala Kongreso de Esperanto en Krakovo

1. Gustave Gautherot, *La question de la langue auxiliaire internationale*, Paris 1910, p. 271. – Kiel notis *Germana Esperantisto* (5. 1908, p. 20), *Vorwärts* kaj *Leipziger Volkszeitung* „akre kontraŭbatalas" la propagandon de Esperanto inter laboristoj.
2. *Germana Esperantisto* 11. 1914, eldono A, p. 109.
3. *Internacia Socia Revuo* 7. 1913, p. 260. – Similan plendon pri rusaj laboristaj gvidantoj jam en 1907 faris la kasisto de Esperanto-grupo en Voroneĵ: A.N. Vasiljev, „El Rusujo", *Laboro* (Paris) 1907, n-ro 2 (sept.), p. 8-9.
4. *De Tribune* (Amsterdam), 20-6-1908; laŭ *Frateco* (Den Haag) 1908, n-ro 3 (sept.), p. 1, kaj *Internacia Socia Revuo* 2. 1908, p.111.
5. La germanaŭstraj socialdemokratoj kontraŭe akre malakceptis Esperanton. Kp. Wolfgang Bahr, *Geschichte der österreichischen Esperantobewegung von den Anfängen bis 1918*, Wien 1978 (doktora disertacio), p. 232 k. sekv.
6. Vd. la intervjuon de E. Lanti kun Malatesta en 1924: *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-ro 10 (51), p. 5. – En la unuaj numeroj de *Internacia Socia Revuo* (en 1907) Malatesta estas indikita kiel kunlaboranto.
7. Miyamoto Masao, *La morta suito. Oosugi Sakae, anarkiisto-esperantisto*, Kioto 1984, p. 31-36. – Du leteroj de Ôsugi estas publikigitaj en *Internacia Socia Revuo* 2. 1908, p. 20, 70-71.
8. Ĝia ĉinlingva titolo estas *Minsheng*. Post la morto de Sifo en 1915 ĝi plue aperis, kun interrompoj, ĝis 1921. Pri la signifo vd. Scalapino/Yu, *The Chinese Anarchist movement*, p. 39-44, kaj la artikolon de U. Lins en *Kontakto* 10. 1973, n-ro 2, p. 17-18.

en 1912, la loka filio de Pola Socialdemokrata Partio organizis grandan manifestacion de diverslandaj socialistoj.[1] Sed restas la fakto, ke antaŭ la Unua Mondmilito maldekstruloj ĝenerale ne povis stampi la movadon per sia koloro.[2] Eĉ la germana ŝovinisma gazetaro, avide serĉante pruvojn por la danĝero de Esperanto, apenaŭ malkovris la argumenton, ke de tiu lingvo povus minaci, apud subfosado de la germana kulturo kaj komerco, ankaŭ klasbatalaj ideologioj.

Se tamen en la cara regno kaj kelkaj aliaj landoj la aŭtoritatoj atribuis al tiu juna lingvo danĝeron kaj pro tio malhelpis ĝian disvastiĝon kaj ĉikanis ĝiajn adeptojn, tio kredeble por la plej multaj koncernatoj estis granda surprizo. Ili nur malfacile povis kompreni, kial la okupiĝo pri Esperanto renkontis tian malamikecon, kial al ĝi estis donita eĉ ŝtatrenversa karaktero. Kiu lernis Esperanton, tiu sekvis la alvokojn de Zamenhof por la interpacigo de ĉiuj homoj; li volis kontribui al tio, ke la homoj, ne deprenante ion de la alia, utiligu neŭtralan interkomunikilon. Estis la malnova revo pri unueca homaro en nova formo, kiu tute ne estis malproksima de la realaĵoj, ĉar la scienc-teknika evoluo komence de la jarcento ŝajnis kreskigi la konscion pri la bezono de internacia lingvo. Sed – kiel ajn modestaj provizore restis la sukcesoj de la laboro por realigo de tiu revo: Esperanto jam tuŝis tabuojn.

1.7. *UEA KAJ LA INTERNACIISMO*

Zamenhof mortis en aprilo 1917. Kvin jarojn antaŭe, dum la Oka Kongreso en Krakovo, li estis demetinta sian rolon kiel la „oficiala ĉefo" de la movado, konsiderante sin de tiam simpla

1. Raporto en *Internacia Socia Revuo* 6. 1912, p. 105-108. Samokaze aperis *Politika Malliberulo*, speciala esperantlingva numero de la pola revuo *Więzień Polityczny*, kiu celis atentigi la mondan publikon pri la teroro en cara Ruslando.
2. Tion siaflanke konfesis socialistaj esperantistoj. Vd. la citaĵon el *La Kulturo* (Praha) de 1912, en: G.P. de Bruin, *Laborista Esperanta movado*, p. 9.

esperantisto.[1] Li decidiĝis al tiu paŝo, ĉar li deziris havi liberecon por plue disvolvi siajn ideojn pri la interproksimigo de homoj ankaŭ per rimedoj aliaj ol tiu de neŭtrala lingvo.

Paralele kun la Deka Kongreso, kiu estis okazonta komence de aŭgusto 1914 en Parizo[2], Zamenhof volis organizi „Kongreson de neŭtrale-homa religio".[3] Lige kun tiu plano li publikigis en 1913, nun ne plu anonime, novan version de sia „politika-religia kredo", broŝuron sub la titolo *Deklaracio pri Homaranismo*[4], en kiu li pledis por tio, ke la „liberkredaj" anoj de malsamaj religiaj grupoj kolektiĝu en „sengenta kaj sendoktrina komunumo".[5] Li klarigis, ke por forigi la interreligian malamon „ni povas lasi al ĉiu plenan liberecon havi tian kredon aŭ tian etikon, kiujn li havas ĝis nun, sed ni devas unuigi ilin per komuna *eksterafo*".[6]

Sed pro la forta kontraŭstaro de la francaj gvidantoj Zamenhof devis rezigni pri sia plano. Plue, inter tiuj kaj li, la orienteŭropa judo, estis netranspontebla fendo. Tion ankaŭ ne ŝanĝis la fakto, ke en la lastaj vivojaroj de Zamenhof la universalisma komponento de lia pensado preskaŭ tute forpuŝis la cionisman heredaĵon. En 1914 li rifuzis aliĝi al fondota Hebrea Esperanto-Asocio, klarigante ke li ne volas ligi sin al naciismo, eĉ se temis, kiel en tiu okazo, pri la pli pardoninda naciismo de subpremata gento.[7]

Eble la hezita reeĥo, kiun trovis liaj religiaj konceptoj[8], kontribuis al tio, ke Zamenhof pli kaj pli koncentris sin al avertoj kontraŭ la danĝero de naciismo kaj al la elstarigo de moralaj kaj

1. Vd. la tekston de la „abdika" parolado en PVZ IX 297-305.
2. La kongreso ne okazis pro la militeksplodo.
3. PVZ IX 319-325.
4. PVZ IX 337-344.
5. PVZ IX 343. – Sub „liberkredano" (aliloke: „neŭtralisto") Zamenhof komprenis la tolereman, nedogmecan kredanton de religio.
6. Letero al Bourlet, de 24-2-1913, PVZ IX 326.
7. Letero al Wilhelm Heller, de 30-6-1914, PVZ X 163-166; vd. ankaŭ Maimon, p. 109-110, 207. Sed Zamenhof ripetas sian starpunkton, ke la judoj „plej multe bezonas neŭtralan lingvon", esprimas sian simpation al la fondo-plano kaj ofertas helpon per konsiloj. Estis antaŭvidite havi la unuan kunvenon de la asocio en Parizo; nova provo fondi „Tutmondan Esperantistan Hebrean Asocion" estis farita en 1922. – Preskaŭ samtempe Zamenhof akre reagis je kontraŭjuda artikolo aperinta en *Pola Esperantisto*: Letero de 16-7-1914, PVZ IX 407-410.
8. Partan plenumiĝon de la idealo de Zamenhof oni povas trovi en la moderna ekumena penso kaj praktiko.

politikaj principoj.[1] Tiu tendenco estis jam rimarkebla en memorando, „Gentoj kaj Lingvo Internacia", submetita en 1911 al la Kongreso de Rasoj[2], kaj poste, dum la milito, en „Alvoko al la diplomatoj" (1915) Zamenhof insiste pledis por la principo, ke ĉiu lando „morale kaj materiale plene egalrajte apartenas al ĉiuj siaj filoj", admonante ke pacon oni ne atendu de teritoriaj ŝanĝoj, sed de la detruo de la nacia ŝovinismo.[3] Zamenhof, kiu longe troe emfazis la religiajn kaŭzojn de la kontraŭjudaj persekutoj[4], fine komprenis, „ke la vera baro, kiu disigas la homojn nuntempajn, estas malpli la lingvo aŭ la religio, kiel en la pasintaj jarcentoj, ol la blinda kulto al la nacieco".[5]

Sed la alvokoj de Zamenhof kompreneble ne havis efikon. Je la fino de sia vivo li ne nur devis aŭskulti la riproĉon de rusofila gazeto en Varsovio, ke li estas „danĝera internaciulo"[6], sed ankaŭ havis la korŝiran sperton, ke eĉ esperantistoj infektiĝis de la ŝovinisma febro. Francoj, germanoj kaj italoj dissendis esperantlingvajn informilojn por defendi la starpunkton de la militantaj registaroj.

Universala Esperanto-Asocio tamen sukcesis rezisti la naciisman ondon. Utiligante la fakton, ke ĝi havis sian sidejon en neŭtrala Svislando, UEA pere de sia delegita reto organizis grandskalan helpagadon dum la milito, perante korespondaĵojn inter civitanoj de la malamikaj landoj kaj liverante nutraĵojn, vestaĵojn kaj medikamentojn.[7] Samtempe kun tiu praktika demonstro de internacia solidareco Hector Hodler, la fondinto kaj direktoro de UEA, daŭrigis siajn klopodojn formuli bazan principaron de la Esperanto-movado. Lia idealismo, diference de tiu de Zamenhof, estis libera de ĉia ŝajno de mistiko kaj apogis sin

1. Kp. Waringhien, *1887 kaj la sekvo*, p. 74.
2. PVZ X 169-181; angla traduko en G. Spiller (red.), *Inter-racial problems. Papers from the First Universal Races Congress held in London in 1911*, represo, New York 1970, p. 425-432.
3. „Post la Granda Milito. Alvoko al la Diplomatoj", PVZ IX 430-435 (citaĵo p. 432).
4. Kp. Waringhien, *Leteroj* I, p. 258. – Karakterize, Zamenhof parolis pri unika „religia naciismo" de la judoj, kiu malebligas al ili „ĉiun interkomunikiĝon kun la ĉirkaŭanta mondo": *Hilelismo* (1901), PVZ V 390.
5. Waringhien, *1887 kaj la sekvo*, p. 74-75.
6. Privat, *Vivo de Zamenhof*, p. 121.
7. EeP, p. 365-367.

sur la kono kaj analizo de evolutendencoj en la internacia politiko. De julio 1915 ĝis februaro 1917 Hodler aperigis en *Esperanto*, la monata organo de UEA, serion de artikoloj sub la titolo „La pacproblemo: Novaj vojoj". En ili li skizis siajn imagojn pri la reorganizo de la postmilita mondo. Ĉefe pro tiuj artikoloj, direktitaj kontraŭ la „interŝtata anarkio", la eniro de *Esperanto* en Francion estis de post 1916 malpermesita; la milita cenzuro atribuis al la revuo „malfavoran influon sur la batalantoj ĉe la fronto".[1]

Hodler antaŭvidis plian kreskon de la kolektivismaj tendencoj post la milito, pliakriĝon de la klasbatalo kaj pli grandan pretecon de la registaroj konsideri proponojn pri supernacia kunlaboro kaj la limigo de armado.[2] En la formiĝo de la estonta internacia ordo nova rolo estis apartenonta al Esperanto. Li konstatis la fiaskon de ĉiuj provoj aŭtokrate starigi Esperanto-instituciojn kaj la finon de ĉiuj iluzioj, ke la registaroj akceptos la lingvon pro iaj moralaj konsideroj. Klarvide li atentigis, ke la lingvo ne povas havi ŝancojn de ĝenerala akceptiĝo sen kelkaj bazaj antaŭkondiĉoj; bezonata estas ne nura armistico, sed forta internaciismo. La esperantistoj „estu la embrio de tiuj estontaj elitoj", kiuj super la naciaj ruinoj konstruu novan, internacian domon.[3] „Nacia libereco, demokratia regado, internacia ŝtatligo" estis, laŭ li, la postuloj de la nuntempo.[4]

Per tio Hodler kelkrilate anticipis tezojn, kiujn poste al pli vasta publiko prezentis la usona prezidanto Woodrow Wilson.[5]

1. Hans Jakob, *Universala Esperanto-Asocio 1908-1933. Historia skizo*, Genève 1933, p. 18.
2. H. Hodler, „La socio post la milito", *Esperanto* 13. 1917, p. 73-75; represita en *Hector Hodler. Lia vivo kaj lia verko*, Genève 1928, p. 146-157.
3. H. Hodler, „Super", *Esperanto* 11. 1915, p. 3; represita en *Hector Hodler*, p. 103.
4. H. Hodler, „Nova spirito", *Esperanto* 13. 1917, p. 113; represita en *Hector Hodler*, p. 162.
5. Edmond Privat, „La verko de H. Hodler", *Esperanto* 16. 1920, p. 102. – Hodler verkis en 1915-1916 ankaŭ ampleksan franclingvan traktaĵon pri la paca organizo de la popoloj, kiu restis neeldonita; vd. la biografian skizon de Ed. Stettler en *Hector Hodler*, p. 48-49. Unu ĉapitro de la studo, „La justice internationale et le problème de l'arbitrage", aperis en *Les Documents du Progrès. Revue internationale* (Lausanne) 10. 1916, jan., p. 280-296. Hodler kontribuis ankaŭ al la revuoj *La Voix de l'Humanité* (Lausanne) kaj *Demain. Pages et Documents* (Ĝenevo).

Kvankam al li ne plu restis tempo por ĝisvivi realiĝadon de siaj ideoj – li mortis, eĉ ne 33jara, en marto 1920 –, li estis atinginta, ke UEA establiĝis en la okuloj de la esperantistoj kiel *la* movada reprezentanto, kiu post la milito estis des pli bezonata, ĉar per la fondiĝo de Ligo de Nacioj la movado unuafoje ricevis respektatan partneron sur internacia kampo. Same, Hodler estis doninta la teoriajn gvidliniojn por la sinteno de la esperantistoj en la postmilita tempo, kiam ĉie kreskis la esperoj pri erao de pli sekura paco.

Kian gravecon havis la fondo de Ligo de Nacioj precipe el la vidpunkto de la Esperanto-movado, Hodler priskribis jene:

> Ni ĉiuj bone scias, ke vivpova estos tiu Ligo nur se ĝi kunigas ne sole registarojn per juraj aranĝoj, sed ankaŭ kaj ĉefe popolojn per spirito de reciproka kompreno. Sen internacia neŭtrala lingvo, la popoloj restas plene fremdaj unu al la alia, eĉ se teorie kunigas ilin interŝtataj konvencioj. De la Ligo de la Nacioj la Esperantistoj esperas do, ke ĝi frue rekonos la necesecon de komuna interkomprenilo...[1]

Ni sekve rigardu, kiel la Esperanto-movado klopodis prezenti siajn dezirojn al Ligo de Nacioj, kaj esploru, ĉu la Ligo plenumis la atendojn, kiujn Hodler, kaj ne nur li, difinis kiel esencan antaŭkondiĉon por ĝia sukcesa funkciado.

1.8. *LUKTO KONTRAŬ ESPERANTO EN LIGO DE NACIOJ*

La laciĝon en la tutmonda publika opinio pri milito kiel rimedo por la solvo de internaciaj konfliktoj kaj la rezultan fidon, kiu estis montrata al Ligo de Nacioj[2], UEA tuj prenis kiel bonan ŝancon por postuli interregistaran interkonsenton pri la demando de enkonduko de Esperanto en lernejojn. Vervan pledanton ĝi

1. H. Hodler, „Novaj perspektivoj", *Esperanto* 15. 1919, p. 58; represita en *Hector Hodler*, p. 88. – Bona ekzemplo por la esperoj, kiujn la esperantistoj ligis kun Ligo de Nacioj, estas: M. Rollet de l'Isle, *La plus forte garantie de la Société des Nations. Une langue internationale*, Paris 1919.
2. La diversajn starpunktojn pri la rolo de Ligo de Nacioj resumas Heinz Gollwitzer, *Geschichte des weltpolitischen Denkens.* Band II: *Zeitalter des Imperialismus und der Weltkriege*, Göttingen 1982, p. 441 k. sekv.

havis en la persono de la publicisto Edmond Privat, kiu en la jaroj 1920 kaj 1921 oficis ĉe la Ligo kiel interpretisto kaj de 1922 ĝis 1927 estis unue konsilanto de la persa ĉefdelegito, poste ties anstataŭanto.[1] Privat estis samlernejano de Hodler kaj post ties morto transprenis la redaktadon de la revuo *Esperanto*.

En decembro 1920, laŭ la iniciato de Privat dek-unu delegitoj (el Belgio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Ĉilio, Ĉinio, Haitio, Hindio, Italio, Kolombio, Persio, Sudafriko[2]) prezentis al la Unua Asembleo de Ligo de Nacioj projekton de rezolucio. Atentigante pri la lingvaj malfacilaĵoj, „kiuj malhelpas rektajn rilatojn inter la popoloj", kaj esprimante la esperon, ke „la ĉiulandaj geknaboj sciu de nun almenaŭ du lingvojn, sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado", la projekto entenis peton al la ĝenerala sekretario de la Ligo prepari raporton pri la rezultoj de la Esperanto-instruado en la publikaj lernejoj de la ŝtatoj-membroj.[3]

Tiu ĉi propono povas esti prenata kiel ekzemplo por la idealismaj esperoj, kiujn precipe la malpli potencaj ŝtatoj direktis al la Ligo. Sed samtempe ĝi atestis la nesufiĉan singardon de la proponintoj, kiuj tute subtaksis, kiom da kontraŭstaro tia preskaŭ revolucia propono renkontos – precipe ĉe unu grandpotenco. Privat mem poste konfesis, ke estis taktika eraro jam en tiu frua stadio submeti la plej delikatan postulon: la enkondukon de Esperanto en lernejojn.[4]

La Dua Komisiono, kiu la 16an de decembro ekzamenis la proponon, forstrekis parton, nome la menciitan esperesprimon, kaj akceptis la ceteran tekston per 10 voĉoj kontraŭ 1 (Francio). Sed du tagojn poste, kiam la belga senatano Henri Lafontaine[5] rapor-

1. Vd. la specialan kajeron „Edmond Privat 1889-1962" de *Revue neuchâteloise* 11. 1968, n-ro 43/44; ankaŭ: Bernard Golden, „Edmond Privat (1889-1962) – politika ĵurnalisto", *Kontakto* 1979, n-ro 1 (61), p. 4-5.
2. La subskribintoj subtenis la projekton kiel privatuloj, ne nome de siaj respektivaj delegacioj. Inter ili estis Edvard Beneš (ČSR), Wellington Koo (Ĉinio) kaj Carlos Restrepo, la eksprezidanto de Kolombio.
3. Cit. *Esperanto* 16. 1920, p. 221.
4. Edmond Privat, „Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj", *Esperanto* 51. 1958, p. 57.
5. Henri Lafontaine (1854-1943) estis kunfondinto de Unio de Internaciaj Asocioj, prezidanto de Internacia Pac-Oficejo kaj ricevinto de la Nobel-Pacpremio en 1913. Li delonge subtenis Esperanton.

tis pri la rekomendo al la Asembleo, li renkontis akran proteston de la franca delegito, kiu postulis, ke oni ne permesu diskuton pri la afero. Francio, tiutempe sentante sin en defensivo pro la kreskanta prestiĝo de la angla[1], vidis en la poresperanta rezoluci-projekto plian minacon al la pozicio de la franca lingvo kiel la klasika lingvo de diplomatio. La delegito, Gabriel Hanotaux, membro de la Franca Akademio, eksministro pri eksterlandaj aferoj kaj historiisto, kiu en siaj verkoj gloris la francan imperiismon, kolere turnis sin kontraŭ la rekomendo. Sen ke la alilandaj delegitoj kuraĝis kontraŭparoli, Hanotaux elokvente postulis „honoron" por sia lingvo, la franca, „kiu havas sian historion, sian belecon, kiu estis uzata de tre grandaj verkistoj, kiu estas konata en la tuta mondo, kiu estis admirinda vastigilo de ideoj".[2] Li atingis, ke estis decidite, sen diskuto, prokrasti la aferon.

Antaŭ tiu rebato Privat ŝajne apenaŭ konsciis la pozicion de Francio. Nun, la esperantistoj kaj la delegitoj simpatiantaj kun ili devis konstati, ke la malbone preparita propono tuj iĝis viktimo de energia kontraŭstaro. Kial – tion klarigis Maurice Rollet de l'Isle, la prezidanto de Societo Franca por la Propagando de Esperanto, fine de decembro 1920 en letero al Privat: „Mi estas surprizita, ke vi miras pri tiu malamikeco, ĉar ni tie ĉi de kelka tempo renkontis la plej fortan malamikecon flanke de Quai d'Orsay".[3]

Tamen, la amikoj de Esperanto ne rezignaciis kaj nun pli bone preparis sin. En septembro 1921, okaze de la Dua Asembleo, la propono estis denove submetita, ĉi-foje apogata de delegitoj el Albanio, Belgio, Ĉeĥoslovakio, Finnlando, Ĉinio, Hindio, Japanio, Kolombio, Persio, Rumanio, Sudafriko kaj Venezuelo.[4]

1. La angla kaj franca estis la laborlingvoj en Ligo de Nacioj. Tiun aranĝon la propono esplori la staton de Esperanto ne celis ŝanĝi.
2. Cit. *Esperanto* 17. 1921, p. 3.
3. Letero de 30-12-1920; cit. Margaret Huber, *The Esperanto pressure group at the League of Nations, 1920-1925*, M.A. tezo pri historio, Universitato de Ottawa, 1973, p. 43. (Quai d'Orsay estas la sidejo de la franca Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj.) Por kontraŭagi akuzojn pri nepatriota sinteno de la francaj esperantistoj, Rollet de l'Isle publikigis apartan broŝuron: *Une équivoque. L'Esperanto contre le Français*, Paris 1920.
4. Ankaŭ la pola delegito donis sian apogon, farante la rezervon, ke la propono ne malaltigu la prestiĝon de la franca lingvo. – Notinde, ĉiuj aziaj ŝtatoj-membroj apogis la proponon, escepte de Siamo, kiu kredeble timis

Tiutempe ekzistis jam raporto de la ĝenerala vicsekretario, la japano Nitobe Inazô, pri la favoraj impresoj, kiujn li ricevis dum observo de la Universala Kongreso de Esperanto en Praha.[1] Iom kontraŭvole – „mi persone malŝatas paroli pri la laboranta popolo kiel pri aparta klaso" – Nitobe aparte elstarigis la entuziasman partoprenon de la laboristoj en la Esperanto-movado:

> Dum la riĉuloj kaj kleruloj ĝuas beletron kaj sciencajn traktaĵojn en la originalo, la malriĉuloj kaj humiluloj utiligas Esperanton kiel *lingua franca* por sia opini-interŝanĝo. Esperanto pro tio iĝas motoro de internacia demokratio kaj de forta kunligo. Necesas preni en konsideron tiun ĉi interesiĝon de la amasoj en racia kaj favora spirito, kiam oni studas tiun ĉi demandon de komuna lingvo.[2]

Ĉi-foje la Asembleo subtenis la proponon pri enketo, kaj en januaro 1922 la ĝenerala sekretario dissendis cirkuleron al la ŝtatoj-membroj, invitante ilin raporti pri la stato de Esperanto-instruado en lernejoj.

Dum la raporto estis kompilata, Francio intensigis sian kampanjon kontraŭ Esperanto. Malpermesita estis la uzado de Esperanto dum renkontiĝoj, en kiuj partoprenis francaj oficialuloj.[3] Por malfortigi la esperantistojn Francio eĉ donis kaŝan subtenon al Ido, la rivala lingvo-projekto de 1907, – evidente taktiko celanta subfosi la pozicion de Esperanto.[4] Krom tio, Privat havis ĝis fine de 1921 enirmalpermeson por Francio, kaj ankaŭ poste nur kun malfacilaĵoj ricevis vizon.[5]

---

ofendon al Francio; kp. Masatoshi Matsushita, *Japan in the League of Nations*, Ph. D. thesis, New York 1929, p. 51-52.

1. Vd. *Esperanto* 17. 1921, p. 157-158. – Nitobe (1862-1933), edukisto, kvakero, pacifisto kaj konata pledanto por la akordiĝo inter oriento kaj okcidento, estis ĝenerala vicsekretario de majo 1920 ĝis decembro 1926; poste li iĝis membro de la japana Ĉambro de Nobeloj. Lia plej konata verko estas *Bushido. The soul of Japan*, Philadelphia 1900, tradukita en multajn lingvojn.
2. Cit. laŭ Ivo Lapenna, „The common language question before international organizations", *La Monda Lingvo-Problemo* 2. 1970, p. 91-92.
3. Huber, p. 59.
4. Huber, p. 59, 64-65. – Pri tiu fakto la esperantistoj bone konsciis tiutempe: *Germana Esperantisto* 20. 1923, p. 171-172.
5. Huber, p. 60-62. La kialo estis, laŭdire, ke la sekurecaj aŭtoritatoj konfuzis Privat kun kontraŭfranca svisa ĵurnalisto, Etienne Privaz. Fakte, Privat ankaŭ malŝatigis sin per siaj dummilitaj artikoloj en *Le Temps* kaj *L'Humanité*, en kiuj li i.a. pledis por la sendependeco de Pollando: Edmond Privat, *Aventuroj de pioniro*, La Laguna 1963, p. 75-78; *Revue neuchâteloise*, p. 38-39, 50-52; Bernard Golden, „Edmond Privat kaj la sendependa Pollando", *Heroldo de Esperanto* 54. 1978, n-ro 15 (1639), p. 1, 3.

En aprilo 1922, en la Liga Palaco de Ĝenevo okazis tre sukcesa „Internacia konferenco pri la instruo de Esperanto en lernejoj", kiun partoprenis instruistoj el 28 landoj kaj oficialaj delegitoj de 16 registaroj. Post tio, la registaro en Parizo malfermis rektan kontraŭofensivon. La 3an de junio 1922 Léon Bérard, la ministro de publika instruado, dissendis cirkuleron, en kiu li instrukciis, ke en Francio lernejaj ĉambroj ne plu estu disponigataj al kursoj de Esperanto. Bérard atentigis pri la „danĝeroj", kiujn alportas la instruado de Esperanto; li vidis minacon al la latinkultura edukado „per la disvolviĝo de lingvo artefarita kaj loganta per sia facileco". Li daŭrigis:

> La franca lingvo estos ĉiam la lingvo de la civilizacio kaj samtempe la plej bona ilo por diskonigi nekompareblan literaturon kaj servi al la ekspansio de la franca penso. ...
>
> ... Internaciaj organizaĵoj, kies sidejo estas en eksterlando, klopodas evoluigi la rilatojn inter la esperantistaj grupoj de diversaj landoj. ... la celo de tiu propagando estas malpli simpligi la lingvajn rilatojn inter la popoloj, ol subpremi en la formado de la penso ĉe la infano kaj la plenaĝulo la ekzistokialon de nacia kulturo. Tiuj grupoj celas precipe la latinan spiriton kaj, tute speciale, la francan genion. Laŭ la eldiro de esperantisto, temas pri disigo inter la lingvo kaj la patrolando. Esperanto fariĝas do instrumento de sistema internaciismo, malamiko de la naciaj lingvoj kaj de ĉiuj originalaj pensoj, kiuj esprimas ilian evoluon.[1]

Responde al protesto de Ligo de Homaj Rajtoj, Bérard poste detaligis, ke dum la internaciaj Esperanto-kongresoj manifestiĝas „malamikeco kontraŭ la franca lingvo".[2]

Kelkajn semajnojn post la eldono de la cirkulero de Bérard, per kiu la aktivado de la francaj esperantistoj estis severe limigita, la sekretariejo de Ligo de Nacioj pretigis sian raporton pri *Esperanto kiel internacia helpa lingvo*.[3] En tiu estis donita am-

1. Teksto de la cirkulero en *Le Monde Espérantiste* 15. 1922, n-ro 3 (125), p. 18. – Pri reagoj de la franca gazetaro vd. A. Frechas, „Les gens d'esprit", *Le Monde Espérantiste* 15. 1922, n-ro 4 (126), p. 25-28.
2. Teksto de la letero de Bérard al Ligo de Homaj Rajtoj en *Le Monde Espérantiste* 16. 1923, n-ro 1 (129), p. 1; Esperante en *Esperanto* 19. 1923, p. 32. – Bérard (1876-1960) en majo 1923 dekretis la latinan lingvon deviga fako en duagradaj lernejoj; tiun dekreton lia posteulo nuligis. Poste Bérard iĝis membro de la Franca Akademio kaj (por la reĝimo de Vichy) ambasadoro en Vatikano.
3. Esperanta traduko de la raporto en *Esperanto* 18. 1922, p. 167-176. – La raporto aperis broŝurforme en pluraj naciaj lingvoj.

pleksa superrigardo pri la tutmonda disvastiĝo de Esperanto. Konklude estis konstatite:

> La potenco de lingvo estas granda forto, kaj la Ligo de Nacioj havas gravajn kaŭzojn sekvi kun aparta intereso la progreson de la Esperantista movado, kiu povus eble iam prezenti gravajn konsekvencojn je la vidpunkto de la morala unueco de la mondo, se ĝia disvastiĝo ĝeneraligas.[1]

Kiam la Kvina Komisiono pristudis, dum la Tria Asembleo en aŭtuno 1922, tiun ĉi favoran raporton, sian simpation deklaris interalie la brita helenisto Gilbert Murray, kiu reprezentis Sudafrikon. Sed la franca delegito, Georges Reynald, deklaris, ke li ricevis direktivojn malaprobi kiun ajn alian mondlingvon, ol la francan. Dum liaj argumentoj estis relative moderaj, la brazila delegito, Raul de Rio Branco, en longa parolado, kiun li poste presigis kaj private distribuis[2], enŝovis ideologiajn akuzojn de plej kruda speco en la diskuton. Li kondamnis Esperanton kiel „lingvon de mizeruloj kaj komunistoj, sen tradicio, sen literaturo, sen intelekta valoro", kaj asertis, ke en Brazilo oni instruas Esperanton nur en la ŝtato Sergipe, „la malplej civilizita".[3]

Post tritaga diskuto estis akceptita kompromisa solvo: La raporto estis – kun forstreko de la kvina parto, kiu entenis konkludojn kaj rekomendojn – oficiale aprobita kiel dokumento de la Ligo, sed la demando pri instruado en lernejoj estis transdonita al la Komisiono pri Intelekta Kooperado.

Lord Robert Cecil, amiko de Esperanto, admonis la Komisionon „memori, ke mondlingvo ne estas bezonata nur de intelektuloj, sed antaŭ ĉio de la popoloj mem".[4] Sed efektive la Komisiono pri Intelekta Kooperado estis la penseble plej netaŭga forumo por trakti la aferon de Esperanto – de lingvo, kiu – kiel favore emfazis Nitobe kaj timis de Rio Branco – ne estas unuavice komunikilo de intelektuloj. La Komisiono estis starigita en majo 1922 kaj konsistis el 12 (poste 15) membroj. Ĝia celo estis eduki al internacia solidareco kaj fortigi la pacservan influon de la Ligo. Tamen, fakte „oni devigis ĝin severe limigi sian agadon

1. Samloke, p. 175.
2. *Contre l'octroi du patronage de la Société des Nations à l'Espéranto*, Genève 1922.
3. Cit. *Esperanto* 18. 1922, p. 166.
4. Cit. samloke, p. 167.

kaj zorgi nur pri universitataj kaj bibliotekaj interrilatoj. Oni timis pli homaran kampon".[1]

En tiu Komisiono, sekve, la apogantoj de Esperanto troviĝis en senespera pozicio kontraŭ la politika premo de Francio kaj la antaŭjuĝoj de intelektuloj. La prezidanto, la franca filozofo Henri Bergson, konfidence certigis al Privat sian simpation, sed devis subordigi sian personan opinion al la instrukcioj, kiujn li ricevis el Parizo.[2] Kiel ĉefa oponanto de Esperanto prezentiĝis la svisa komisionano Gonzague de Reynold, profesoro pri historio kaj franca literaturo en la Universitatoj de Bern kaj Fribourg. Kvankam li koncentris sian publikan kritikon al la lingvistika nesufiĉeco de Esperanto kaj pledis por la latina lingvo „konata de katolikoj kaj intelektuloj", lin evidente ankoraŭ pli ĝenis la fakto, ke – kiel li skribis private – malantaŭ Esperanto „kaŝiĝas internaciisma kaj revolucia mistikismo".[3]

Kiugrade la problemo transiris la kadron de lingvistika diskuto, aludis – pli elegante ol de Rio Branco – la franco Julien Luchaire. Li entute kontestis, ke por „ne-intelektuloj" ekzistas bezono de internacia komunikilo, ĉar – tiel lia argumento – la popolaj amasoj de la diversaj landoj eniras en reciprokajn kontaktojn pere de siaj „gvidantoj" kaj pere de tradukoj. Laŭ tiu logiko, do, internaciaj kontaktoj restu la monopolo de kelkaj elektitoj kaj ne estas rekomendinde malfermi per la facila komunikilo Esperanto la pordon al tutmonda interrilatado de homoj el la subaj tavoloj.[4]

En tia atmosfero de franclingva hegemoniemo kaj de supereca

1. Edmond Privat, *Federala sperto. Studo pri du sukcesoj kaj unu malsukceso*, Hago 1958, p. 71.
2. Privat, *Aventuroj*, p. 97.
3. Letero al Abbé Ricard, de 5-6-1923; laŭ Huber, p. 84. – Vd. ankaŭ: Pierre Hirsch kaj Tazio Carlevaro, „Gonzague de Reynold kaj Esperanto", *Monata Cirkulero*, Kultura Centro Esperantista (La Chaux-de-Fonds) 1976, n-ro 78, p. 1-9.
4. Kp. Lapenna, „The common language question", p. 98. – La bezonon de senpera komunikado inter ne aŭ nesufiĉe instruitaj homoj neis ankaŭ raporto (de 30-12-1921) de la Komitato pri la Internacia Helplingvo de Amerika Filologia Asocio. Ĉar tiun komunikadon prizorgu estroj aŭ reprezentantoj, la vera bezono, laŭ la raporto, estas lingvo, „kiu kontentigos la intelektajn kaj estetikajn postulojn de la kleruloj en ĉiuj landoj, kaj tia lingvo apenaŭ povas esti ia alia ol la latina". Cit. *Esperanto Triumfonta* 1922, n-ro 108 (29 okt.), p. 3.

malŝato de la popolamasoj Esperanto ne plu havis ŝancon. La Komisiono decidis, la 1an de aŭgusto 1923, ne okupiĝi pri la demando de Esperanto-instruado en la lernejoj, esprimante la opinion, ke antaŭ ĉio necesas „celi favoradon al la studo de la vivantaj lingvoj kaj fremdaj literaturoj"[1], Nitobe komentis, ke post dudek jaroj tiu decido estos memorata kiel signo, ke al Ligo de Nacioj mankis saĝo.

En septembro 1923, kiam kunvenis la Kvara Asembleo, la franca delegito, estante provizita per instrukcio de sia registaro „definitive elpuŝi Esperanton"[2], proponis, ke la Ligo adoptu pliakrigitan version de la komisiona decido; laŭ tiu versio, la Ligo estis rekomendonta eksplicite la lernadon de fremdaj naciaj lingvoj prefere al la lernado de artefarita helplingvo. Sed per tio Francio trostreĉis la cedemon de la ceteraj delegacioj. Pluraj protestis, klarigante ke ili ne volas insisti pri Esperanto, sed ke ili ankaŭ ne volas akcepti ion, kio ŝajnas esti direktita kontraŭ Esperanto, „ĉar tiu movado havas multajn amikojn ĉe ni".[3]

Francio devis retiri sian proponon, tiel ke valida restis nur la raporto de 1922 pri la pozitivaj atingoj de Esperanto. Tio estis ne malatentinda sukceso de UEA, sed restis tamen konsiderinde sub ĝiaj atendoj. Konsolo estis, ke en septembro 1924 la nova registaro de Edouard Herriot[4] nuligis la dekreton de Bérard[5] kaj ke la Kvina Asembleo sammonate akceptis, sen kontraŭstaro de Francio, rekomendon pri la traktaĵo de Esperanto kiel „klara" lingvo en telegrafio.

Kiel ni scias, Ligo de Nacioj pli kaj pli perdis sian komencan reputacion, ĉar neniu ŝtato-membro pretis rezigni parton de sia nacia suvereneco, ĉar ĝiaj decidoj ne estis plenumitaj kaj ĉar grandpotencoj laŭbezone sabotis ĝian agadon. Ne nur restis limigita la politika influo de la Ligo, ankaŭ ne povis formiĝi tiu morala aŭtoritato, kiun oni atendis de ĝi. Ekzemplo estas ĉirilate la Komisiono pri Intelekta Kooperado, kiu „komplete mal-

1. Cit. Privat, „Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj", p. 59.
2. Samloke.
3. Samloke.
4. Antaŭ ol Herriot iĝis ĉefministro, Privat havis kun li du interparolojn: *Esperanto* 20. 1924, p. 143.
5. La nuligo estis komunikita per cirkulero de 19-6-1925: EdE, p. 152; *Heroldo de Esperanto* 6. 1925, n-ro 52 (280), p. 1.

sukcesis envicigi ilin [la intelektulojn de diversaj landoj] en komunan fronton kontraŭ la danĝeroj de naciaj malamoj kaj naciaj ambicioj".[1]

Ĝuste la pritrakto de Esperanto liveris instruon, kiu helpas klarigi la finan fiaskon de la Ligo. Grandpotenco povis per sia premo flankenŝovi iniciaton de ĉinoj, japanoj kaj de pluraj pli malgrandaj nacioj, kies celo estis kontribui per Esperanto al ioma neŭtraligo de konfliktaj naciaj interesoj kaj al eduko je internacia solidareco kiel la spirita bazo kaj unuigilo de la Ligo. La starpunkto, ke la ŝtatoj povus internacie akceli la populariĝon de la idealoj de la Ligo, se ili deklaras sin simpatiaj al la disvastigo de Esperanto, kunpuŝiĝis kun la tima zorgo de Francio pri la domina pozicio de la franca lingvo. Por defendi tiun pozicion la francoj eĉ ne unuavice argumentis pri lingva maltaŭgo de Esperanto, kvankam ekskluziva insistado pri nesufiĉa esprimpovo de artefarita lingvo kutime ne maltrafis sian celon. Male, la malamikoj de Esperanto troviĝis kvazaŭ en silenta interkonsento kun ĝiaj amikoj rilate agnoskon de la fakto, ke ja temas pri funkcipova lingvo, kaj ŝajne ili tion eĉ tro bone sciis, kiel supozigas la dekreto de Bérard aŭ la elitema arogo de Luchaire, kiun turmentis la penso, ke internacia komunikado eskapos la kontrolon de la „gvidantoj" kaj iĝos propraĵo ankaŭ de „ne-intelektuloj".

Konsiderante, kiaj konceptoj regis en la Komisiono pri Intelekta Kooperado, ni facile komprenas, kial tiu Komisiono ne sukcesis plenumi sian taskon: krei senton de monda solidareco, kiun antaŭenpuŝu la Ligo kaj je kiu ĝi siaflanke apogu sin por plialtigi sian aŭtoritaton super la naciaj egoismoj. La franca kampanjo kontraŭ Esperanto ĉe Ligo de Nacioj[2] nepretervideble estis diktita de la grandpotenca zorgo, ke la Ligo sin troe montros inda je sia nomo kaj iĝos ne nur sendeviga debatejo, sed internacia forumo, al kiu la nacioj devos cedi kelkajn siajn privilegiojn. Dum la esperantistoj, tiutempe ankoraŭ tro naivaj, ne imagis,

1. F.P. Walters, *A History of the League of Nations*. Vol. I, London, New York, Toronto 1952, p. 193. – La signifo de la Komisiono jam reduktiĝis de post 1924, kiam en Parizo estis fondita Instituto pri Intelekta Kooperado, finance subtenata de Francio; ties direktoro estis, de 1925 ĝis 1931, Julien Luchaire.
2. Necesas atentigi, ke malantaŭ la kulisoj ankaŭ la brita registaro klopodis eviti, ke la Ligo esprimu oficialan apogon al Esperanto: Huber, p. 87-90.

kiel provoka estas ilia postulo, ke ĉiu infano en la mondo lernu almenaŭ du lingvojn, la nacian kaj internacian, iliaj kontraŭuloj frutempe antaŭvidis la politikajn konsekvencojn, kiujn havus oficiala kuraĝigo flanke de la Ligo por lernado kaj uzado de neŭtrala interkomunikilo. Kiajn kluzojn oni malfermus per tia apogo al Esperanto, la kontraŭuloj klare konsciis. De Rio Branco en sia parolado turnis sin kontraŭ la koncepto, ke la Ligo estu „superŝtato"[1], kaj simile opiniis Gonzague de Reynold: „... necesas konstante batali kontraŭ ĉiuj ĉi, kiuj deziras fari el Ligo de Nacioj ne nur superŝtaton, sed ankaŭ supereklezion, kontraŭ ĉiuj utopiistaj internaciistoj ... Mi aludas al Esperanto."[2]

1.9. *LA BURĜA MOVADO EN DEFENSIVO*

Sur la kulmino de la franca agitado kontraŭ Esperanto Privat rimarkigis: „Eĉ post la interveno de S-ro Hanotaux ĉe la Ligo de Nacioj, eĉ ne unu vorto kontraŭfranca aperis en la esperanta gazetaro. Ankaŭ tute prave."[3] Certe, estis prava taktiko ne superflue provoki Francion, sed aliflanke restas konstati la bedaŭrindan fakton, ke UEA ne sentis sin sufiĉe forta kiel internacia premgrupo por pli energie defendi sian starpunkton kontraŭ la egoismaj interesoj de unu nacio. Ĝi ne nur indulgis la francojn, sed ankaŭ preterlasis senmaskigi la lingvan imperiismon, la orgojlan neglekton de intelektuloj pri la bezono de internacia komunikado por la subaj tavoloj, la elitisman pensmanie-

1. *Contre l'octroi...*, p. 7.
2. Letero al Abbé Ricard, de 5-6-1923; cit. Huber, p. 100. – En siaj memoroj, de Reynold skribas, ke la Komisiono, apenaŭ kreita, spertis „la atakon de absolutaj utopiistoj kaj integralaj internaciistoj: la esperantistoj": Gonzague de Reynold, *Mes mémoires*. Tome 3: *Les cercles concentriques*, Genève 1963, p. 452. En artikolo de 1925 li rimarkis „en tiu utopio de la artefarita lingvo malsanan formon de idealismo, signon de konfuzo, simptomon de dekadenco": „Le problème de la langue internationale", *Bibliothèque universelle et Revue de Genève* 1925, p. 768. Ankaŭ post la milito (dum kiu li estis kalkulinta pri la venko de Hitler) de Reynold daŭrigis sian agitadon kontraŭ Esperanto.
3. Edmond Privat, „Idealo kaj realigo", *Esperanto* 18. 1922, p. 121.

ron – ĉiujn ĉi faktorojn, kiuj tiel esence rolis en la strebado forpeli Esperanton el la tagordo de Ligo de Nacioj.

Same, ni hodiaŭ trovas bedaŭrinda, ke UEA, kiam premoj je la Ligo ne plu promesis tujan utilon, komencis turni al ĝi la dorson. Anstataŭ popularigi per Esperanto la noblajn principojn de la Ligo kaj tiamaniere prepari pli fekundan terenon por estontaj internaciaj interkonsentoj pri Esperanto, la asocio iom post iom malproksimiĝis de la gvidlinioj fiksitaj de Hodler. Dum la 20aj jaroj la internaciismo ĝenerale perdis allogon, kaj ankaŭ UEA ne kontraŭagis la tendencon – en tiu senco, ke ĝi iĝis ĉiam pli dependa de la naciaj Esperanto-societoj, kiuj preferis direkti sian atenton al la propra registaro kaj ofte ne montris sufiĉan rezistokapablon kontraŭ naciismaj fluoj en sia lando. Privat, socialdemokrato kaj senlaca batalanto kontraŭ koloniismo, estis predestinita kaj sincere strebanta daŭrigi sur la vojo montrita de sia mortinta amiko Hodler; lia erudicio kaj ĉarma personeco havigis al li la simpation de multaj delegitoj ĉe la Ligo, de la ĉeĥoslovaka ministro kaj posta prezidento Edvard Beneš, de Romain Rolland kaj de Mahatma Gandhi.[1] Sed, estante helpata de nur mezkvalitaj funkciuloj kaj ĉirkaŭata de multaj revemuloj, de politike ne konsciaj esperantistoj, li estis tro malforta por inspiri en la asocion la bezonatan fidon pri ĝia memstara misio en tutmonda skalo kaj senŝancelan pretecon defendi sian internaciismon kontraŭ la naciaj ĵaluzoj.

Tiu ĉi deflankiĝo de UEA disde la idealoj de ĝia fondinto ne estas komprenebla, tamen, sen konsidero de la fakto, ke post la milito, nelonge post la morto de Hodler, okazis laŭklasa dissplitiĝo interne de la Esperanto-movado. En aŭgusto 1921 fondiĝis Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), internacia organizaĵo de laboristaj esperantistoj, kiu ja heredis kelkajn impulsojn de Hodler (ekzemple, la organizformon surbaze de individua membreco), sed samtempe, sub la batalkrio „For la neŭtralismon!", rompis ĉiujn rilatojn kun la neŭtrala movado, identigata de ĝi kun burĝa, kaj pretendis, ke Esperanto estas valora kaj sub-

1. Vd. *Bon voisinage. Edmond Privat et Romain Rolland.* Lettres et documents présentés et annotés par Pierre Hirsch, Neuchâtel, Paris 1977; Edmond Privat, *Vivo de Gandhi*, La Laguna 1967.

teninda nur tiel longe, kiel ĝi povas efike servi al la internacia klasbatalo.

La agadon kaj signifon de SAT ni detale traktos en posta ĉapitro. Tie ĉi precipe gravas noti, ke la skismo inter laboristoj kaj „neŭtraluloj" profunde ŝanĝis la fizionomion de la Esperantomovado kaj ke tio siavice ne povis resti sen influo al la publika juĝo pri la lingvo mem.

Antaŭ la milito precipe la germanaj esperantistoj estis spertintaj, kiel ni montris, atakojn pro kontraŭnacieca celado. Dum la milito ili distribuis en Esperanta traduko diversajn dokumentojn, kiuj prezentis la starpunkton de la germana armeo[1]; sekve, ili postmilite kredis, ke tio estos vaste aprezata kiel pruvo por ilia patriotismo. Jam en marto 1915 la industriisto Albert Steche, membro de la saksa parlamento, estis deklarinta, ke per la milita propagando per Esperanto „antaŭ la tuta mondo evidentiĝas, ke la germanaj esperantistoj ne estas kosmopolitaj revuloj, sed fervoraj praktikaj patriotoj, kiuj faras bonan militan laboron kaj ŝparas nek penon nek oferojn por servi al la patrolando".[2]

Sed ŝovinistajn kontraŭulojn de Esperanto tiaj argumentoj malmulte impresis. Farante rikanajn komentojn pri tio, ke la milito tiel rapide sukcesis skui la „senradikan" internaciismon, ili rifuzis konkludi, ke internacia lingvo nun iĝis pli akceptebla por germanoj. La menciita Albert Zimmermann, ekzemple, rekonis, ke la germanaj esperantistoj subjektive estas bonaj patriotoj, samtempe tamen avertante „malvidi la internacian karakteron, la sennaciigan efikon de Esperanto".[3] La militemajn naciistojn pli multe ekscitis, ke ankaŭ la alia flanko uzis Esperanton en la milita propagando. En Parizo dum la milito pendis afiŝoj alvokantaj la francojn lerni Esperanton por tiel forpuŝi la malamindan lingvon germanan, kaj en aŭgusto 1922 ĉefministro Raymond Poincaré kolere skribis al generalo Sebert, ke germanaj oficiroj, utiligante la konfuzon kreitan per la uzo de lingvo sen

1. Vd. *Die Wahrheit ins Ausland durch Esperanto. Stimmen des Auslands über den Krieg*, Leipzig 1915. – De novembro 1914 ĝis januaro 1919 aperis 60 numeroj de „germana informilo pri la milito", *Internacia Bulteno*, eldonita de Germana Esperanto-Servo en Berlino.
2. Albert Steche, *Die Bedeutung der Welthilfssprache „Esperanto" für das deutsche Volk in Krieg und Frieden*, Leipzig 1915, p. 23.
3. Zimmermann, *Esperanto, ein Hindernis*, p. 14-15.

nacia karaktero, klopodas varbi esperantistojn en diversaj neŭtralaj landoj por la kampanjo direktita kontraŭ Francio kaj la Traktato de Versailles.[1]

La germanaj kaj francaj esperantistoj do malmulton gajnis per sia dummilita aktivado, ĉar ĝi ne vekis simpatiojn de naciistoj por Esperanto. Kaj la postmilita elirpozicio de la movado iĝis ankoraŭ pli komplika per la senprecedence granda alfluo de laboristoj. Klasbatalo eniris ankaŭ la Esperanto-movadon. En pluraj landoj, la novevarbitoj ne aliĝis al la tradicia, neŭtrala asocio, sed organiziĝis en memstaraj laboristaj Esperanto-unuiĝoj.

Tiu ĉi evoluo estis simptoma por la deziro de laboristoj plilarĝigi sian horizonton trans landlimojn kaj praktiki internaciismon tuj, post kiam la militfino donis por tio novan ŝancon. En dokumento de la Komitato pri Internacia Helpa Lingvo, kreita en 1919 de Internacia Esplora Konsilantaro, la vekiĝo de internaciisma konscio de ordinaraj homoj, precipe montriĝanta en la popularеco de Esperanto inter laboristoj, estis nomita „unu el la plej gravaj trajtoj de la tuta temo de internacilingva evoluo" el sociologia vidpunkto. La Komitato atentigis: „Se tiu ĉi interesiĝo de la amasoj povas esti zorge studata kaj kun simpatio komprenata de kompetentaj sociologoj, ĝi eble povos ricevi konstruan gvidon por la bono de ĉiuj; sed se neglektata kaj plene lasata al disvolvo per radikaluloj, ĝi servus nur al ventumado de la flamo de bolŝevismo."[2] Tute similan ekkonon de la problemo ni trovas ĉe Albert Steche, kiu jam en 1914 avertis kontraŭ „influoj malamikaj al popolo kaj ŝtato" interne de la Esperanto-movado kaj postulis:

> La registaroj kaj komunumoj devas interkonsiliĝi kaj zorgi pri tio, ke naciece pensantaj anoj de la popolo trovu ĉie la eblecon *senpage* lerni Esperanton. Se tiu ebleco ne ekzistos, la lernemuloj iras, kiel ni nun povas observi, en la socialdemokratajn kursojn, kie ili estas edukataj *ne nur al esperantistoj, sed ankaŭ al socialdemokratoj*.[3]

La postmilita kreiĝo kaj kresko de aparta laborista Esperanto-movado rapide malaktualigis la proponon de Steche, ke registaroj

1. Letero de 15-8-1922; laŭ Huber, p. 78.
2. Cit. Albert Léon Guérard, *A short history of the international language movement*, New York 1922, p. 185-187.
3. Albert Steche, „Der Siegeszug des Esperanto", *Leipziger Tageblatt*, 4 kaj 5 aprilo 1914; cit. laŭ la samtitola broŝura represo, Leipzig s.j., p. 7 (substrekoj tie).

oficialigu la instruadon de la lingvo por eviti radikaliĝon de la esperantistoj. Ĉiuokaze, la favora reeĥo, kiun trovis Esperanto inter laboristoj, pli reduktis ol stimulis la jen kaj jen eble ekzistantan inklinon de registaroj al subteno de la Esperanto-movado. Avertoj kiel tiu de Steche kontraŭ la penetrado de socialismaj ideoj en la vicojn de la esperantistoj eĉ estis kvazaŭ akvo al la mueliloj de konservativaj kaj reakciaj reĝimoj, kiuj, anstataŭ alproprigi al si la konkludon, ke necesas kontraŭpezi la enfiltriĝon per proprainiciata akcelado de Esperanto, emis ekrilati al la tuta movado, ankaŭ al la politike neŭtrala, pli suspekte.

En kia dilemo troviĝis la burĝaj esperantistoj – unuflanke, estante maltrankviligitaj pro la florado de Esperanto inter laboristoj, aliflanke, luktante kontraŭ la nekomprenemo de la supraj tavoloj, estas bone ilustreble ĝuste per la persono de Steche, kiu estis prezidanto de Germana Esperanto-Asocio de 1920 ĝis 1925. Membro de la Naciliberala Partio kaj aktivulo en industriistaj asocioj, Steche ne estis tamen nigra reakciulo el kontraŭkapitalisma legolibro, nek esperantisto ekskluzive dediĉita al komerca profito helpe de Esperanto.[1] Sian pledon por la enkonduko de Esperanto kiel sola fremdlingvo en elementajn lernejojn li klopodis bazi sur rimarkinda kombinaĵo de pensoj pri interklasa kaj internacia harmoniigo:

> Per tio oni pli multe povus benodone transponti la fendon inter riĉo kaj malriĉo, ĉar la malpli bonstata persono povas, same kiel la bonstata edukito, per Esperanto, enprofundiĝante en la plej bonajn verkojn de la monda literaturo, progresi kaj avanci kaj povas sen peno lingve komuniki kun homoj de alta kaj malalta rangoj en la tuta mondo. La socia interpacigo en la propra popolo krom tio kontribuas al interpacigo de la popoloj de la tero...[2]

Tiuj ĉi harmoniigaj ideoj de Steche iusence estis en akordo kun la

1. Steche (1862-1943), kemi-industriisto, estis vicprezidanto de Unuiĝo de Saksaj Industriistoj (1905-1920) kaj membro de la saksa parlamento (1909-1918). Li ankaŭ estis membro de la prezidantaro de Hansa Ligo, grava alianco fondita en 1909 de industriistoj kontraŭantaj la influon de ekstremaj konservativuloj en la politika kaj ekonomia vivo de Germanio. Vd. Johannes Dietterle (red.), *La Vendreda Klubo*, Leipzig 1921, p. 112-115; Fritz Fischer, *Krieg der Illusionen. Die deutsche Politik von 1911 bis 1914*, Düsseldorf 1969, p. 56-57, 333.
2. Albert Steche, *Entwicklungsgang der Weltsprache*, Leipzig 1922, p. 20; vd. ankaŭ de la sama, „Esperanto und die deutsche Kultur", *Das Esperanto ein Kulturfaktor*, Band 5. *Festschrift anläßlich des 14. Deutschen Esperanto-Kongresses*, Berlin 1925, p. 8-17.

tradicio de Esperanto, nome kun la tezo de Zamenhof, ke praktikado de neŭtrala lingvo helpas malakrigi konfliktojn. Tamen, la penso de Zamenhof ĉiam estis koncentrita al la forigo de *naciaj* antagonismoj helpe de Esperanto; li apenaŭ studis la sociajn radikojn de intergenta malamo. Kiel ajn: En la postmilita situacio, meze de inflacio kaj senlaboreco, estis iluzie paroli pri ĝenerale klas-interpaciga karaktero de la Esperanto-movado. Nemirige, do, ke la tezojn de Steche pri neŭtraligo de sociaj konfliktoj per Esperanto la laboristaj esperantistoj kondamnis kiel logkaptilon de kapitalisto. Por ili, anakronisma estis ankaŭ la idealismo, esprimita de Privat:

> Esperantismo estas la malplej „burĝa" movado el ĉiuj eblaj, sed ĝi staras ekster kaj super ĉiuj bataloj inter homoj, egale ĉu gentaj aŭ klasaj.[1]

Estis nun la laboristaj esperantistoj, kiuj komprenis sin la veraj gardantoj de la Esperanta tradico, kiuj per la uzo de Esperanto por la socialismo pretendis esti sur la ĝusta vojo:

> Kion signifas „socialismo"? Se oni volas anstataŭigi la terminon „socialismo" per alia vorto, tiam oni povas tion fari plej bone per homara liberigo, homara feliĉigo. Sed ĉu ne estas la ideo de homara feliĉigo, kiu estas je la bazo de Esperanto? Tiun penson ni ne enmetis, tiun ideon ni nur elprenis. Enmetis ĝin ... d-ro Zamenhof mem.[2]

Steche siaflanke kun bedaŭro registris la „malĝojigan situacion", ke, dum la malsupraj tavoloj entuziasmiĝas por la „nova latino de la demokratio", „la kleraj tavoloj, edukitaj kaj socie stabiligitaj en la pensomondo de la malnova latino, malplenumas la atendojn nun, kiam ili devus esti gvidantoj".[3] Efektive, nelonge post tiu plendo Steche devis noti plian seniluziiĝon, kiam la Komisiono pri Intelekta Kooperado jam vigle okupiĝis pri la unuecigo de muzeaj katalogoj, sed ne montris egalan komprenemon por la bezono de ordinaraj homoj interkomunikiĝi.

La evoluo pasis alie, ol imagis Steche, ĉar neeviteble ankaŭ en la Esperanto-movado speguliĝis la sociaj konflikoj kaj politikaj tensioj, kiuj karakterizis la 1920ajn jarojn. Tio cetere ne estis

1. Edmond Privat, „La 15 Decembro 1859", *Esperanto* 17. 1921, p. 201. – En 1924, la 16a Universala Kongreso de Esperanto en Vieno akceptis unuanime rezolucion deklarantan, ke „la kongreso neniel estas burĝa kongreso aŭ laborista, sed neŭtrala kongreso de ĉiuklasaj esperantistoj": *Esperanto* 20. 1924, p. 148.
2. F. Leuschner, „Wir und die Bürgerlichen", *Der Arbeiter-Esperantist* 8. 1922, n-ro 9, p. 10.
3. Steche, *Entwicklungsgang*, p. 20.

malprofita por Esperanto entute. La apartiĝo de la laboristaj esperantistoj pligrandigis la ŝancojn penetrigi la lingvon en la vicojn de la laborista movado, dum samtempe restis al la neŭtrala movado vasta tereno por gajni adeptojn en aliaj tavoloj. Tiel ambaŭ povis kunekzisti, precipe en la demokratiaj ŝtatoj.

Fakte, tuj post la milito en multaj landoj de Eŭropo, same en Usono, en Brazilo, en Japanio kaj dise en aliaj mondpartoj, estis tute favora grundo por la Esperanto-movado. Plej ofte la studo kaj uzo de Esperanto restis tute privata afero, al kiu dediĉis sin homoj, kiuj, estante scivolaj pri la mondo, strebis al rapida venkado de lingvaj kaj naciaj limoj. En la plej multaj landoj, kie ekzistis Esperanto-organizaĵoj, ilia agado disvolviĝis en libereco kaj sen rektaj ĝenoj. Ne mankis ankaŭ oficialaj apogoj. En Germanio, ekzemple, la „Esperanto-Instituto por la Germana Regno" ricevis regulan ŝtatan subvencion; lernejaj aŭtoritatoj deklaris sian simpation kaj permesis la instruadon de Esperanto en lernejoj ekster la oficiala programo, kio kredeble estis, laŭ tiutempa juĝo de esperantisto, la rezulto „de forta desuba premo, el rondoj de la popolo, kiuj flegas internaciajn rilatojn, ne ĝuinte fremdlingvan edukon en lernejoj".[1]

Metodon instrui Esperanton rapide kaj sen lernolibro ankaŭ al malpli kleraj homoj eltrovis Andreo Cseh, hungardevena katolika pastro el Rumanio. La kursoj gvidataj de li en tuta Eŭropo, dum kiuj la lingvo estis lernata kvazaŭ amuza ludo, baldaŭ havis multajn imitojn; ankaŭ la tradician instruadon eniris elementoj de la t.n. rekta metodo. En la intermilitaj jaroj miloj dankis sian scion de Esperanto al la pedagogia kapablo kaj ĉarmo de Andreo Cseh.

Kiu estis ellerninta la lingvon, tiu praktikis ĝin diversmaniere. Superregis la uzo en korespondado kaj dum vojaĝoj. Al la plej interesaj rezultoj de la ligitaj kontaktoj apartenis internaciaj geedziĝoj, en kiuj Esperanto do estis „edzperanto" kaj kiuj siavice sekvigis „denaskajn" esperantistojn. Por la aktiva esperantisto kulmino de la jaro estis la Universala Kongreso, en kiu meze ĉeestis 1500-2000 personoj. Krome, preskaŭ ĉiujare okazis inter-

1. Paul Bennemann, „Das Esperanto und die Schulbehörden", *Das Esperanto ein Kulturfaktor*, Band 8. *Festschrift anläßlich des 17. Deutschen Esperanto-Kongresses*, Berlin 1928, p. 55.

nacia konferenco dediĉita al la celo vastigi la praktikan aplikon de Esperanto, en kiu partoprenis delegitoj de registaroj, komercaj ĉambroj, foiroj kaj ekonomiaj organizaĵoj. La temoj de la konferencoj estis la uzo de Esperanto por komerco, radio, scienco kaj turismo. Aparte notinda estis ankaŭ la konferenco „Paco per lernejo", kiun en Pasko 1927 la ĝeneva Internacia Eduka Oficejo kunvokis al Praha kaj en kiu la preskaŭ 500 delegitoj el 19 landoj akceptis rekomendojn pri interŝanĝo de lernantoj kaj pri la senŝovinismigo de lernolibroj; Esperanto estis uzata kiel la sola traduk-lingvo.

Kreskis la nombro kaj kvalito de la Esperanta originala beletro. Formiĝis eĉ literaturaj skoloj, el kiuj la plej fama estis la Budapeŝta Skolo. Post la fondiĝo de la revuo *Literaturo Mondo* (1922) la hungara ĉefurbo iĝis centro de la Esperanta kulturo. Ĝi estis ankaŭ la hejmo de la plej populara Esperanto-verkisto, Julio Baghy, eksaktoro, kiu, surbaze de travivaĵoj en siberia militkaptiteco, estis trovinta en Esperanto sian mision. En multaj romanoj kaj poemoj li elmetis sian filozofion de amo, paco kaj homeco. Liaj verkoj, ĉiam optimismaj, altgrade idealismaj, ofte naive-sentimentale impresantaj, ekipis la idealojn, sur kiu baziĝis Esperanto, per emocia karaktero, kiun multe ŝatis la esperantistoj. Baghy, karese nomata „Paĉjo", esprimis sentojn, kiuj dekomence estis karaj al la esperantistoj kaj krom tio estis tipaj por la inklinoj de la modere progresema burĝaro en la tempo inter la du militoj. La sukceson de Baghy ankoraŭ akcelis la fakto, ke li ja pasie protestis kontraŭ socia maljusto kaj nacia limigiteco, sed nur malofte konkrete montris kiel venki tiujn malbonojn. Li evitis ligi sin al konataj politikaj-ideologiaj pozicioj kaj tiamaniere helpis al la meza nepolitikema esperantisto identigi sin kun lia idealo de homa frateco.[1]

Aliajn verkojn de la Esperanta literaturo karakterizis simila idealismo – ekzemple tiujn de la germano Teo Jung, kies ĉefa merito tamen estis, en 1920, la fondo de la gazeto *Esperanto Triumfonta*.[2] El la centoj da esperantlingvaj periodaĵoj tiu ĉi estis

1. Kp. Vilmos Benczik, „Julio Baghy – mitoj kaj realo", *Sennacieca Revuo* 1969, n-ro 97, p. 42-52; Marjorie Boulton, *Poeto fajrakora. La verkaro de Julio Baghy*, Saarbrücken 1983.
2. Vd. la memorojn de Teo Jung, *Ĉiu – ĉiun. Sep jardekojn en la Esperanto-*

ESPERANTO
★ TRIUMFONTA ★

15. Oktobro Nürnberg.

Semajna

Kun senpaga monata „Revuo"

Neŭtrala

Numero 105 ✂ Antwerpen, Barcelona, Edinburgh, Kaunas, Köln, Paris, Warszawa ✂ 8. Oktobro 1922.

Brazila Registaro subvencias.

Antaŭ la Forumo de l' Mondo.

Nokta Vizito.

Titolpaĝo de *Esperanto triumfonta*, gazeto fondita de Teo Jung, kiu estis la antaŭulo de la populara *Heroldo de Esperanto*.

la plej ofte, nome ĉiusemajne, aperanta. La gazeto, kiu ekde 1925 portis la titolon *Heroldo de Esperanto*, liveris al siaj legantoj argumentojn por la varbado kaj utiligis ĉiun raporton pri sukceso de la movado por apelacii al la esperantistoj, ke ili ne laciĝu en siaj klopodoj kaj plue batalu kun fido pri sia fina venko.

1.10. *PERSEKUTOJ EN LA 1920AJ JAROJ*

Kiam en Germanio esperantistoj iĝis objekto de polica observado, tio estis kaŭzita de ilia politika agado. En 1922 la polico de Frankfurto apud Majno esplordemandis la organizantojn de la tie preparata kongreso de SAT, post denunco de Esperanto-parolantaj policistoj en Dresden, kiuj indikis la SAT-anojn kiel „danĝerajn komunistojn".[1] Post la faligo de la laborista registaro en Saksio kaj la okupo de la lando per regnaj trupoj en oktobro 1923, la Polica Prezidiumo en Leipzig disponis pri propra „esperantlingva oficejo", kiu kolektis informojn pri la agado de Germana Laborista Esperanto-Asocio. En interna raporto tiu ĉi asocio estis nomita „serioze taksenda faktoro en la politika movado", ĉar ĝi eksplicite deklaras, ke ĝi volas uzi Esperanton nur kiel rimedon por la celo: realigo de la tutmonda proleta unuiĝo.[2] Okazis, interalie en Chemnitz[3], domtraserĉoj, konfisko de materialoj, kontrolado de kunvenoj, kaj en marto 1924 la Prezidiumo trovis konsilinda entute pli zorge atenti Esperanto-kursojn, „kiuj lastatempe okazas pli ofte ol antaŭe".[4] Sed aliflanke komunistaj esperantistoj en Leipzig povis de januaro ĝis oktobro 1924 eldoni 16 numerojn de la grandformata gazeto *Völkerspie-*

movado. Memorafoj de 86-jara optimisto, Antverpeno 1979.

1. A. Sproeck, „Polizei und Esperanto", *Der Arbeiter-Esperantist* 8. 1922, n-ro 8, p. 1; vd. ankaŭ *Sennacieca Revuo* 3. 1921/22, n-ro 10, p. 16; n-ro 11/12, p. 15.
2. Polizeiprāsidium Leipzig, Esperantosprachliche Dienststelle, den 22. Februar 1924. – S-ro Jürgen Hamann dankinde disponigis fotajn reproduktaĵojn de tiu ĉi kaj aliaj materialoj nun konservataj en Staatsarchiv, Leipzig.
3. *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-ro 4, p. 16.
4. Das Polizeiprāsidium, Pol. Abt., 19. Mārz 1924.

gel, ĉerpanta sian materialon el Esperantaj periodaĵoj kaj la leteroj de alilandaj kamaradoj, kvankam ĝi, kiel rimarkis la polico, funkciis kvazaŭ anstataŭaĵo de la malpermesita *Sächsische Arbeiterzeitung*.[1]

Multe pli da ĉikanoj, eĉ persekutojn, suferis laboristaj esperantistoj en aliaj landoj, unuavice en tiuj, kie ne povis ekzisti legalaj laboristaj partioj. En Bulgario, Rumanio, Hungario, Italio, Litovio, Latvio kaj Pollando la ricevado de eldonaĵoj de SAT estis malpermesita[2], fojfoje sekve de atentigoj el la neŭtrala tendaro[3]; en aliaj landoj ĝi estis riska. Povis okazi, ke alta procentaĵo de laboristoj en Esperanto-klubo sufiĉis por altiri la suspekton de polica komisaro, kiel en 1924 spertis la esperantistoj de Split en Jugoslavio[4]; en tiu lando la polico en kelkaj vilaĝoj simple malpermesis Esperanton.[5] Jugoslava SAT-ano amare plendis en 1926, ke en lia „putrujo" la ĝenerala diskriminacio kontraŭ laboristoj etendiĝas ankaŭ al ilia deziro lerni Esperanton.[6] En Estonio, laboristaj Esperanto-grupoj fonditaj en 1925 eĉ ne sukcesis ekagi – „pro malliberigo de plejparto de l' membraro".[7]

La malpermesoj kaj subpremaj agoj turnis sin kontraŭ la politika aktivado de laboristaj esperantistoj. Ili komence ne tuŝis la sorton de la neŭtrala movado. Al ties gvidantoj la plej saĝa taktiko ŝajnis esti: aŭ silenti aŭ kontentiĝi per la deklaro, ke Esperanto povas esti uzata de ĉiu kaj apartenas al neniu kaj nei kunrespondecon de la movado kiel tuto, kiam la lingvo estas uzata por difinita celo.

Plurfoje la aŭtoritatoj mem pretis deklari, ke iliaj agoj kontraŭ laboristaj esperantistoj ne estas direktitaj kontraŭ la Esperantomovado. En Pollando, la ministro de internaj aferoj sciigis en 1923, ke persekuto de SAT-anoj okazis nur pro ilia „kontraŭŝtata

1. Kp. Otto Bäßler, „Fortschrittliche Traditionen", *Der Esperantist* 2. 1966, n-ro 5/6 (apr./majo), p. 33-34.
2. *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 149; 5. 1928/29, p. 258, 456.
3. *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-ro 6 (47), p. 11-12 (pri Hungario).
4. Marinko Ĝivoje, *Historio de Esperanto-movado en Jugoslavio*, Zagreb 1965, ĉap. 8.
5. *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 27 (79), p. 4.
6. Samloke, n-ro 35 (87), p. 6.
7. *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 41, p. 8.

agado", ne pro Esperanto.[1] Kiam en 1922 en la rumana urbo Cluj junaj laboristoj estis arestitaj, ĉar trofervoraj policistoj komprenis la verdan stelon kiel komunistan insignon, la prezidanto de la militista tribunalo, antaŭ ol absolvi la kulpigitojn, deklaris, ke Esperanto estas „tre bela kulturmovado" kaj ke nur la uzon de la lingvo „por celoj malpermesitaj" necesas puni.[2] Kaj kiam en 1926 Sudslava Esperantista Ligo protestis ĉe la ministro de instruado pro tio, ke distriktestroj kaj ĝendarmoj malpermesis diversloke la fondon de Esperanto-kluboj aŭ la okazigon de kursoj, la ministro, Stjepan Radić, deklaris sin adepto de Esperanto kaj post nelonge enkondukis la lingvon en la instruplanon de la universitato de Zagreb.[3]

Aliflanke, per tio en Jugoslavio ne malaperis lokaj malhelpoj. La situacio estis simila en Hungario. La neŭtrala movado en duonfeŭda Hungario havis ĝenerale pli progreseman karakteron, ol tiu en la pli evoluintaj landoj de okcidenta Eŭropo. Prezidanto de Hungarlanda Esperanto-Societo estis de 1912 ĝis 1923 la katolika prelato Sándor Giesswein, kiu antaŭ la milito estis unu el la gvidantoj de Kristan-Socialista Partio, dum la milito sekrete disponigis la ĉefpastran palacon, eĉ preĝejojn al pacifistaj kunvenoj kaj post la milito kiel gvidanto de Reform-Partio pledis por demokratiigo.[4] La reĝimo de Miklós Horthy tamen bone memoris, ke Esperanto estis politike „misuzata" – dum la nelongviva Hungara Soveta Respubliko en 1919, kiam ankaŭ esperantistoj infektiĝis de revolucia entuziasmo.[5] En la 20aj jaroj, sekve, al hungaroj en la provinco kelkfoje necesis kuraĝo eĉ porti la verdan stelon. En 1923 esperantistoj en Debrecen raportis, ke la „grupfondiĝon malhelpas la konduto de la polico kaj oficialaj rondoj", kaj en 1925 la fondo de grupo en Mezőkövesd estis malpermesita, kun i.a. jenaj motivoj: ke la loĝantoj havas tiel primitivan gradon de klereco, ke eĉ la elementa instruado ne havis kaj havas la deziratan rezulton; kaj ke la instru-

1. *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-ro 6 (47), p. 12.
2. *Esperanto* 20. 1924, p. 51.
3. Ĝivoje, *Historio*, ĉap. 9.
4. Alfonso Pechan (red.), *Gvidlibro por Supera Ekzameno*. Dua eldono, Budapest 1979, p. 90.
5. Zoltán Barna, Ervin Fenyvesi, „Esperanto-movado dum la Konsilia Respubliko", *Hungara Vivo* 19. 1979, n-ro 1, p. 10-11.

horojn de Esperanto oni eble uzos por disvastigi kontraŭŝtatajn klopodojn.[1] Dum tamen al la neŭtrala societo restis vasta agadkampo, la laborista Esperanto-movado en Hungario konstante suferis pro malpermesoj de lokaj aŭtoritatoj. Por senpage instrui la lingvon al laboristoj necesis peti permeson de la polico, kiu ofte ne estis donita, jen ĉar ankaŭ burĝoj aranĝas kurson kaj la laboristoj lernu tie, jen ĉar hungaraj laboristoj unue alproprigu al si la gepatran lingvon, jen ĉar Esperanto-kurso en urbo kun tiom da analfabetoj estas simple superflua.[2] Direktoro de loka gimnazio rifuzis disponigi ejon por kurso, „ĉar la esperantistoj estas komunistoj".[3]

Kontraŭ eĉ pli da malfacilaĵoj devis lukti laboristaj esperantistoj en Bulgario, kies ministro de internaj aferoj stampis en 1924 Esperanton bolŝevika lingvo. Tio siavice havis kiel rezulton, ke laboristaj gazetoj, kiuj antaŭe ne interesiĝis pri Esperanto, konsiderante ĝin „burĝa, sencela kaj senutila afero", komencis ŝanĝi sian opinion.[4]

Laboristoj ne estis fortimigeblaj de lernado de Esperanto, sed emis trovi ĝin des pli alloga, ju pli „la reakcio" ĝin kondamnis. Tiu ĉi entuziasmo, per la persekutoj ne subpremebla, sed eĉ stimulata, iom post iom malgrandigis la pretecon aŭ kapablon de la aŭtoritatoj fari klaran distingon inter la movado kiel tuto kaj la radikalaj elementoj en ĝi. Kun la paso de la 20aj jaroj pli kaj pli la gardantoj de publika ordo almenaŭ subkomprenigis, ke la Esperanto-movado entute meritas pli zorgan observon. Paralele, ankaŭ en la publiko kreskis la tendenco subŝovi al la lingvo mem ideologiajn celadojn. La menciita cirkulero de la franca ministro Bérard servis kiel okazo por averti kontraŭ la larĝa uzo de Esperanto por la antaŭenigo de bolŝevismo[5], kaj la germana latinidisto Karl Vossler kredis eĉ esti malkovrinta, ke per tiu uzo jam ŝanĝiĝis la karaktero de la lingvo mem:

> ... en la gramatikon kaj vortaron de Esperanto lastatempe enloĝiĝis la internacia bolŝevismo, socialismo kaj komunismo, intencante ne nur

1. EdE, p. 230.
2. *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 19 (71), p. 8.
3. EdE, p. 230.
4. *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 3, p. 6.
5. Nesta H. Webster, *Secret societies and subversive movements*. 2a eld., London 1924, p. 345.

> animi ilin per sia idearo kaj atmosfero, per siaj sentosonoj kaj senco-akcentoj, per siaj proletaj voĉoj, sed ankaŭ fari politikan propagandon por ili.
> ... lingvo, kiu konscias, ke ĝi estas formita el internacia vortpruntaĵo kaj bezonas internacian komunikadon, devas montriĝi kiel nepre celkonforma, simpatia kaj lingvistike parenca al la kredo kaj faro, la idearo kaj disvastiĝo de la komunismo.[1]

Tiun intencan aŭ neintencan identigadon de Esperanto kun difinitaj politikaj strebadoj la gvidantoj de la neŭtrala movado ne povis pretervidi. Ili pli ofte sentis sin devigitaj defendi sin kontraŭ akuzoj, ke la Esperanto-movado servas kiel manovrejo de revoluciuloj.

Tiaspeca sindefendo ne restis sensukcesa. Eĉ Bérard eksplicite kontrastigis la „suspektindajn grupojn", por kiuj Esperanto iĝis „agilo de sistema internaciismo", kun „la sincereco de multaj francoj, ofte eminentaj, kiuj neniam opiniis, ke Esperanto estas alia afero krom praktika korespondilo". Tamen: ĝuste tiuj vortoj de Bérard rememorigas la dilemon, en kiu troviĝis la burĝaj esperantistoj. Ankaŭ ili, nome, ne kutimis paroli nur pri la avantaĝoj de Esperanto por praktikaj bezonoj, sed samtempe, kun diversgrada intenso, aludis al la idea signifo de la lingvo. Kiel ajn klare difinita ĝi estis – al la „interna ideo" de Esperanto ili sentis sin daŭre ligitaj, memorante la patosan deklaron de Zamenhof en 1906. Por disblovi la suspekton de registaroj pro politika „misuzo" de Esperanto, ili sekve ne plu povis, kiel ankoraŭ faris la francaj pioniroj, simple akcentadi, ke Esperanto estas nura lingvo havanta nenion komunan kun ideo. Rigora neo de idea enhavo flanke de la gvidantoj sendube estus renkontinta nekomprenemon inter la plej multaj etburĝaj adeptoj de Esperanto, konsistigantaj la neŭtralajn organizaĵojn, ĉar la firme enplantiĝinta „interna ideo" emocie ligis ilin al la movado. Se do ne eblis tute nei idean signifon de Esperanto kaj sę rezulte diverstendencaj esperantistoj plue havis plenan liberecon interpreti la „internan ideon" siamaniere, neeviteble Esperanto devis resti vundebla per atakoj de kontraŭuloj – des pli, ju pli la idealismo de la esperantistoj evoluis en direktoj, kiuj koliziis kun la ideologio de regantoj.

1. Karl Vossler, *Geist und Kultur in der Sprache*, Heidelberg 1925, p. 187-188.

Sub tiuj cirkonstancoj la gvidantoj de la neŭtrala movado povis nur ĉiufoje ripeti, ke la lingvo taŭgas por ĉiuj celoj, ke oni ne respondecigu ilin, se socialistoj kaj komunistoj aplikas ĝin, kaj ke la celkonscia agado de laboristoj instigu aliajn sociajn grupojn same uzi la servojn de Esperanto.

Sed neniu alia socia grupo sciis utiligi Esperanton tiel celkonscie kiel la laboristoj – kaj tio pli kaj pli embarasis la gvidantojn de la neŭtrala movado. Neplenumiĝis la atendoj de Steche, ke en la postmilita epoko la plidensiĝanta komerca interŝanĝo diktos al la supraj tavoloj la bezonon uzi Esperanton kiel internacian komunikilon, sed pli proksima al realiĝo ŝajnis la profetaĵo farita de la franca revolucia verkisto Henri Barbusse komence de 1921, ke venos baldaŭ tempo, kiam Esperanto, kiu unue „estis precipe prilaborata en burĝaj medioj", timigos la burĝojn, kiuj, ĉar la revoluciuloj prenis „tiun ĉi mirindan ŝlosileton" en siajn manojn, „ĝin malamos pro la evidenta frateco, de ĝi alportata".[1]

Plie, konservativaj esperantistoj devis demandi sin, ĉu entute konsilindas okupiĝi ankoraŭ pri Esperanto, se laboristoj sugestis, ke ankaŭ la „neŭtraluloj" nekonscie helpas rapidigi la tendencon al monda revolucio, kiel estis asertite en 1928 en la projekto por programo de SAT:

> ... esp-o mem estas dutranĉa glavo en la mano de la ekspluatistoj, ĉar lastfine ĝia uzado eĉ flanke de la burĝaro plifortigos la intern(aciajn) kontraŭkapitalismajn tendencojn en la popolamasoj.[2]

Ĉar tia deklaro tiutempe povis apogi sin je la populareco de Esperanto en Soveta Unio, inter la agantoj de neŭtralaj asocioj devis kreski la inklino pli emfazi sian distancon de la laborista movado. Tiu inklino esprimiĝis malsame – laŭ la grado de politika libereco reganta en la lando, en kiu oni klopodis disvastigi Esperanton. Ju pli nedemokrata estis la reĝimo, des pli la sindistancigoj de tieaj neŭtralaj organizaĵoj komencis alpreni la karakteron de rekta kontraŭstaro al la utiligo de Esperanto en politike nedezirata senco – kio, fine, signifis konteston de la rajto uzi la lingvon por kiu ajn celo. *Pola Esperantisto*, ekzemple, en 1923 alvokis la „verajn esperantistojn" protesti kontraŭ la altrudo

1. Henri Barbusse, „Al la Internaciistoj", *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 2, p. 3.
2. *Protokolaro de la VIII-a Kongreso* (de SAT) *en Göteborg ... 1928*, p. 57.

de sennaciismo, socialismo, komunismo aŭ pacifismo al la movado:

> ... ni, sinceraj amantoj de Esperanto, ne permesos, ke en la faldoj de nia standardo oni kontrabandu ion ajn, ni ne permesos, ke oni subfosu la templon, masonitan per peno kaj ŝvito de Unuaj Pioniroj.[1]

Konsekvence, persekutoj kontraŭ laboristaj esperantistoj ricevis en *Pola Esperantisto* la malvarmsangan komenton, ke „ili ofte mem estas kulpaj pri tio".[2] Simile, en Hungario la neŭtralaj societoj ne donis, kiel plendis la laboristoj, helpon, kiam „oni ofendas Esperanton", eĉ tiam ne, kiam dum la Universala Kongreso en Budapeŝto en 1929 la polico malpermesis deklamon de poemoj de Petőfi.[3]

La provo meti limon al politika uzo de Esperanto certe estis komprenebla, eĉ defendebla, sub la vidpunkto, ke lingva movado ne superflue kreu al si obstaklojn en diktatora reĝimo per publika aliancîĝo kun opoziciaj aŭ revoluciaj strebadoj. Aliflanke, tiu taktiko ofte entenis en si konsiderindan parton de memtrompo ĉe la „neŭtralaj" esperantistoj: Unue, ĝi preteratentis la fakton, ke la entuziasmo, kun kiu laboristoj agis por Esperanto, havis sian devenon en idealisma heredaĵo, kiun ili dividis kun nelaboristoj, kaj do ne estis stampebla kiel nura elfluo de la strategio de revoluciuloj. Due, la sindistancigaj deklaroj ne povis kaŝi, ke precipe en la fino de la 20aj jaroj jam ne plu eblis rigardi persekutojn kiel direktitajn nur kontraŭ la t.n. politika „misuzo" de Esperanto. Pli ĝuste, en oftaj kazoj ili estis inspiritaj de aliaj motivoj de la regantoj, ol de la nura zorgo malhelpi klasbatalan utiligon de la lingvo. Kelkaj ekzemploj tion ilustru.

Kiam en 1928 la bulgara ministro de popola klerigo ordonis la malfondon de ĉiuj Esperanto-kluboj de lernantoj kaj malpermesis la disvastigon de esperantlingvaj revuoj inter lernejanoj, inter la motivoj donitaj la klare sekurec-politika aspekto rangis nur je la fino. La kialoj estis:

> Ĉar Esperanto estas facila lingvo, la lernantoj ekkutimos al facilaĵoj kaj perdos la volon lerni pli malfacilajn aferojn; ĉar Esperanto estas internacia, la lernantoj ekŝatos la internaciismon kaj ekmalŝatos la

1. „Grava danĝero", *Pola Esperantisto* 17. 1923, p. 83.
2. Baroko, „Sub verda mantelo", *Pola Esperantisto* 18. 1924, p. 33.
3. L. Kökény, „Intervjuo kun s-ano Tieder, prezidanto de HESL", *Hungara Heroldo* 3. 1930, n-ro 7, p. 6.

nacian lingvon kaj kulturon; fine la Esperanto-movado estas suspektata, ke sub ĝi kaŝiĝas bolŝevistoj kaj anarkistoj.[1]

La ministro ne distingis inter neŭtrala kaj laborista Esperanto-movado, sed deklaris jam la lernadon de Esperanto „kontraŭpatruja ago".

Malagrablajn surprizojn devis sperti precipe homoj vivantaj ekster pli grandaj urboj kaj apartenantaj al la subaj tavoloj, kiam ili deziris lerni Esperanton. Ekzemple, sian rifuzon oficialigi grupon de esperantistoj fonditan en 1931 la Banuslanda Administracio en Zagreb motivis jene:

... ekzistas nek naci-kultura nek socia bezono fondi tian klubon el la kamparanoj kaj metiistoj en Djelekovec, ĉar ekzistas diversaj naciaj, kulturaj, ekonomiaj kaj societaj aspiroj, pri kiuj devas esti interesigita nia ethomo. Li devas esti instruata en la klerigo kaj kulturo, sed ne per la instruado de iu malviva artefarita lingvo (Esperanto), por kiu estas postulata antaŭinstruiteco kaj kono de almenaŭ unu reganta viva mondlingvo. Pro kaŭzoj, ke la klubo neniokaze povas atingi la celon por kiu ĝi estas fondita kaj pro tio, ĉar ekzistas pravigita danĝero, ke la klubo en nacia rilato povus agadi domaĝe, la malpermeso montriĝas oportuna kaj sur leĝo bazita.[2]

Tie ĉi frape montriĝas la tendenco de reakciaj aŭtoritatoj bremsi la emancipiĝon de homoj el neprivilegiitaj tavoloj, mem dikti al ili sian vojon al klerigo kaj subpremi ĉion, kio proprainiciate povus konduki al la larĝigo de la intelekta horizonto kaj al la starigo de internaciaj kontaktoj. La samaj konsideroj troviĝis ankaŭ malantaŭ malpermesoj en Hungario, kiel dokumentas multaj eldiroj de tieaj lokaj aŭtoritatoj:

... estas pli necesa la instruado de la hungara lingvo kaj la ortografio.[3]

... la laboristoj apenaŭ scias la hungaran lingvon, do ne estas supozeble, ke ili serioze volas lerni fremdan lingvon.[4]

... la laboristoj havas tute sufiĉan terenon por la memklerigado eĉ krom la scio de Esperanto.[5]

1. Dekreto n-ro 9607 de 10-4-1928; cit. *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 301. Vd. ankaŭ samloke, p. 285; kaj „Reakcio kaj mondlingvo", *La Socialisto* 3. 1928, p. 64. – La dekreto estis evidente influita de la cirkulero de Bérard: *Esperanto* 24. 1928, p. 130; Ivan Sarafov, *Skizo de la historio de bulgara Esperanto-movado*, Sofio 1971, p. 25.
2. Cit. Givoje, *Historio*, ĉap.12.
3. En Tótkomlós en 1927, menciita dum interpelacio de socialdemokrataj deputitoj en la parlamento; cit. EdE, p. 230.
4. Menciita dum la jarkunveno de Hungaria Esperantista Societo Laborista, 23-3-1930: *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 321.
5. En Pomáz en 1927, menciita dum interpelacio en parlamento; cit. EdE, p. 230.

... la loka grupo ne povas servi la komunan intereson, eble nur la individuajn interesojn de la anoj.[1]

Eĉ iu apudvilaĝa fonto, kiun en 1928 finkonstruis naturamikaj esperantistoj, ne rajtis, laŭ postulo de la vilaĝa estraro, porti la nomon „Esperanto", ĉar tiu, estante internacia, „estas ofenda el nacia vidpunkto".[2] En Orosháza la fondo de Esperanto-grupo ne estis permesita, kion oni motivis per tio, ke „la esperantistoj antaŭvideble interrilatiĝos kun eksterlandanoj".[3]

Resume, estas klare, ke en la sudorientaj landoj de Eŭropo, kie regis diktatoraj reĝimoj kaj kiuj ekonomie kaj socie postrestis aliajn eŭropajn landojn, la malpermesoj kaj persekutoj kontraŭ la aktivado de esperantistoj ne nur estis diktitaj de timoj pro revoluciaj elementoj en ties vicoj, sed ankaŭ de du pli principaj konsideroj: ke (1) Esperanto ĝenas la preskribitan procedon de edukado de la civitanoj kaj ke (2) Esperanto ebligas al la uzanto la akiron de scioj el eksterlando, kiuj povus havi ne kontroleblan influon je lia rilato al la propra socio.

Pro tio ankaŭ estas malfacile fiksi la limon inter persekutoj kontraŭ Esperanto en si mem kaj tiaj kontraŭ difinita apliko. Kiel la pozicio de registaro aŭ politika movado al Esperanto ne malofte liveras bonan mezurilon pri la grado de demokrateco, kiun havas la koncerna institucio, tiel same la politika konvinko, kiu submetis esperantiston al persekuto, ne estis tute apartigebla de Esperanto kaj kutime ŝajnis al li mem logika kompletigo de la Esperanta idealismo. Sekve, akcentante sian politikan neŭtralecon, kiam difinita apliko de Esperanto minacis negative influi la publikan opinion pri la lingvo entute, la ĝenerala movado estus devinta konsciigi al si la radikojn de multaj el tiuj negativaj juĝoj kaj rezultaj kontraŭagoj anstataŭ ĉefe atribui ilin al la aktivado de maldekstrulaj esperantistoj, de kiuj ĝi fervore distancigis sin. Ĝi ne vidis, kiomgrade la politikaj baroj inkluzivis vualitajn kaj

1. En Pécs en 1927; samloke.
2. *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 15. – Post unujara klopodado, la nomigo estis permesita, sed la fonto mem intertempe de kelkaj vilaĝanoj estis detruita: EdE, p. 230.
3. *Antaŭen* (organo de HESL) 1929, apr./majo, p. 18; kp. *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 364; cit. ankaŭ en EdE, p. 230. – Por pliaj detaloj vd. Ladislao Halka, „La historio de la Hungaria Esperantista Societo Laborista", *Hungara Heroldo* 2. 1929, n-ro B 6, p. 3-8; krome *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 353; 6. 1929/30, p. 413.

apertajn atencojn je la sopiro al memklerigo kaj je la spontana strebo al internaciaj kontaktoj, ambaŭ manifestiĝantaj en la lernado de Esperanto. Tiaj atencoj ja tuŝis la tutan Esperanto-movadon, ĉar la deziro proprainiciate klerigi sin kaj venki naciajn barojn estis fundamenta karakterizaĵo de la esperantistoj. Nerezisto kaj silento reage al subpremo pro motivoj kiel tiuj cititaj el Hungario[1] indikas, ke la neŭtrala movado ne atingis sufiĉan komprenon pri esencaj faktoroj, influantaj ĝian propran evoluon, eĉ minacantaj detrui la bazon de ĉia poresperanta aktivado – faktoroj, kiuj ne estis tiel facilanime ignoreblaj, kiel tio objektive okazis ekzemple per la jena „Deklaracio pri Neŭtraleco", publikigita en aprilo 1929, kelkajn monatojn antaŭ la Universala Kongreso en Budapeŝto:

> **De kelka tempo malamikoj de Esperanto klopodas por identigi la ĝeneralan propagandon por la internacia helplingvo Esperanto kun la agado por certaj sociaj celadoj.**
> **La Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado ... deklaras formale kaj firme, ke ĝia programo, celanta nur la enkondukon de Esperanto, estas absolute neŭtrala rilate aferojn de politiko, religio, raso aŭ socio.**
> **Ĝi insiste kontraŭstaras al tiuj malveraj asertoj, kies efiko signifas nur malhelpi la grandan progreson, rezultantan el la ĝenerala adopto de facile lernebla neŭtrala helplingvo apud la koncerna gepatra lingvo.**[2]

La deklaracio celis forigi suspektojn pri socia nefidindeco de la neŭtrala Esperanto-movado. Tamen, emfazante memkompreneblaĵojn, ĝi pro sia pure defensiva karaktero havis efikon preskaŭ nulan ĉe tiuj, al kiuj ĝi evidente sin turnis: Dekstruloj, se ne jam la ideon mem de internacia lingvo ili malaprobis, ĉiuokaze ignoris teoriojn pri la rigora neŭtraleco de la oficiala movado, kiam ili tiujn kontrastigis kun la praktiko: kun la ŝajne senhalta antaŭenmarŝo de Esperanto en la laborista klaso.

Dum kreskis la laborista Esperanto-movado, UEA kaj la neŭtralaj naciaj societoj observis regreson de la nombro de siaj membroj.[3] Aparte serioza estis la interna krizo en UEA. La asocio estis jam intelekte malriĉigita per la transiro de multaj progrese-

1. Vd. la plendojn pro la sinteno de „neŭtraluloj": *Antaŭen* 1929, apr./majo, p. 18; L. Kökény, „Intervjuo...", p. 6.
2. *Esperanto* 25. 1929, p. 75. – La aktuala okazo por tiu Deklaracio kredeble estis ĝenoj lige kun la organizo de la UK en Budapeŝto, pro kies subteno, ekzemple, la urbestro ricevis akran riproĉon de ministro: *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 364.
3. EdE, p. 548.

maj esperantistoj al SAT; la posteuloj de Hodler, kiel menciite, ne sukcesis pluevoluigi ties spiritan heredaĵon. Kvankam UEA restis asocio de individuaj membroj kaj do teorie ne dependis de naciaj fluoj, ĝi pli kaj pli tendencis eviti la ligiĝon kun internaciismaj celadoj (se nur por gardi limlinion al SAT) kaj samtempe vidis plifortiĝi postulojn pri kundecidrajto en la internacia movado flanke de la naciaj societoj, kiuj unuavice orientiĝis laŭ la kondiĉoj en la propra lando kaj parte jam pledis por pli granda akomodo de la Esperanto-movado al naciismo.

Kiam al UEA en 1932 minacis bankroto kaj ĝi draste reduktis sian monsubtenon por la Internacia Centra Komitato, kiu laŭ Kontrakto de Helsinki (1922) servis kiel komuna organo de reprezentantoj de la naciaj societoj kaj de UEA, ĉi-unuaj nuligis la kontrakton kaj komencis projekti novan internacian organizaĵon de la esperantistoj, baziĝontan sur la naciaj societoj. Tiu ĉi evoluo, definitive aŭguranta deturniĝon de la idealoj de Hodler, estis senpere kaŭzita de la financaj problemoj de UEA, sed ĝi samtempe signalis, kiom influis ankaŭ la Esperanto-movadon la ĝenerala malfido al internaciismo kaj ke al UEA mankis forto por batali kontraŭ la naciisma ondo sekvanta la mondan ekonomian krizon.

Komence de la 30aj jaroj, do, la neŭtralan movadon skuis internaj problemoj, dum ekstere en pluraj landoj la situacio por Esperanto komencis malboniĝi. Aliflanke, ankoraŭ ne temis pri vastskalaj persekutoj. Montrante al la principo de neŭtraleco aŭ, se necese, deklarante sian lojalecon al la registaro, la gvidantoj de la neŭtrala movado fidis, ke la malfavora atmosfero pasos kaj ke ĉiuokaze la lingvo mem ne iĝos la viktimo de politikaj ŝanĝoj. Tion eĉ kredis laboristaj esperantistoj: En oktobro 1932 *La Socialisto* en Aŭstrio estis konvinkita, ke pro la malpermesoj de laboristaj Esperanto-grupoj oni ne bezonas timi ĝeneralan danĝeron por la lingvo: „Estus malĝuste konkludi el tio, ke faŝismaj aŭ duonfaŝismaj registaroj volas subpremi Esperanton. Io tia ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne okazis. La agoj celas ne la ‚Esperanto'-organizaĵon, sed la politikan tendencon de la koncerna organizaĵo."[1]

1. Adolf Sproeck, „Esperantobewegung und Faschismus", *La Socialisto* 7. 1932, n-ro 10, p. 3.

Malmultajn monatojn, post kiam esprimiĝis tiu optimismo, en la centro de Eŭropo establiĝis reĝimo, kiu fundamente malpravigos la cititan eldiron.

2. „LINGVO DE JUDOJ KAJ KOMUNISTOJ"

2.1. *ESPERANTO EN LA RESPUBLIKO DE WEIMAR*

Dum la 20aj jaroj Germanio okupis en la internacia Esperanto-movado multrilate enviindan pozicion. Post la Unua Mondmilito kaj la kreiĝo de la Respubliko de Weimar la ideo de internacia, neŭtrala lingvo sukcesis altiri ĉiam pli da adeptoj inter la germanoj. La kolapso de la imperiismaj ambicioj de la germana militismo plifortigis, precipe ĉe laboristoj, la deziron venki la barojn de memizolado kaj grandpotenca arogo kaj surpaŝi per Esperanto la ponton al interhomaj kontaktoj kun mondo tiam skeptike observanta la junan germanan demokration. Sub la honora protekto de la regna prezidanto Friedrich Ebert en 1923 okazis en Nürnberg la 15a Universala Kongreso de Esperanto, kun preskaŭ 5 000 partoprenantoj. La aŭtoritatoj ne ŝparis per morala, okaze ankaŭ financa apogo, rekonante ke Esperanto estas „grava rimedo" por atingi „etikan edukon en la spirito de popola interpaciĝo".[1] Konataj eldonejoj, Ferdinand Hirt en Leipzig kaj Rudolf Mosse en Berlino, publikigis literaturon pri kaj en Esperanto. El Germanio tutmonde resonis la populara semajnrevuo *Heroldo de Esperanto*. Statistiko pri la jaro 1926 montris, ke esperantistoj nomas sin 30 868 germanoj, el kiuj 8 490 estas organizitaj en lokaj grupoj.[2]

La ondon de Esperanto en intermilita Germanio tamen ne profitis unuavice la tradicia, neŭtrala movado, kiel montras la membroevoluo de Germana Esperanto-Asocio (GEA): de 1921 ĝis 1924 ĝia membraro ŝrumpis de ĉ. 3 000 al 2 648, atingante fine de 1930 nombron de nur 2 371. Samtempe prosperis la ekster GEA aktivanta Germana Laborista Esperanto-Asocio, kiu aranĝis

1. Cirkulero de la Ŝtata Ministerio de Braunschweig, Fako pri Popola Klerigo, de 20-10-1920; cit. *Das Esperanto ein Kulturfaktor*, Band 8. *Festschrift anläßlich des 17. Deutschen Esperanto-Kongresses*, Berlin 1928, p. 63.
2. „Tutmonda statistiko esperantista", *Esperanto* 24. 1928, p. 137.

kursojn kun pluraj miloj da partoprenantoj; ĝia membraro kreskis de ĉ. 2 900 en 1924 al proksimume 4 000 en 1930.[1]

Partan klarigon por tiu neegala organiza evoluo de la du asocioj liveras la konstato, kiun faris Albert Steche, la prezidanto de GEA, en superrigardo pri la situacio de Esperanto en Germanio en la jarfino 1923: „La movadon malutilas la politika kaj ekonomia malprogreso. Ĝin esence portas la mezaj kaj subaj tavoloj de la popolo. La supraj klasoj, scienco, industrio, komerco kaj trafiko havas sintenon ĉiam ankoraŭ ĝenerale rifuzan, minimume indiferentan."[2] Per precize la samaj vortoj Steche karakterizis la situacion ankaŭ en la postaj du jaroj[3], dum pri 1926 li konstatis ioman pliboniĝon.[4] De tiam la jarraportoj de GEA registris konstantan kreskon de la publika favoro al Esperanto en Germanio[5] – evoluon, kiun ŝajne eĉ ne malhelpis la ekonomia krizo.[6] Malgraŭ tio, GEA ne povis altigi la nombron de siaj membroj.

La laŭklasa dissplitiĝo en Germanio do forte sentiĝis ankaŭ en la organizita Esperanto-movado. Steche realisme notis en 1924 ideologian fendegon, „nuntempe eĉ per Esperanto ne transponteblan", inter burĝoj unuflanke, kiuj „plej ofte konsideras Esperanton nur juda eltrovaĵo, servanta al la kontraŭgermana internaciismo kaj pacifismo kaj baranta la vojon al profitopovo per la scio de fremdaj naciaj lingvoj", kaj la laboristoj aliflanke, kiuj celkonscie utiligas Esperanton por la rapida alvenigo de socialismo.[7] Steche konkludis, ke sub tiuj cirkonstancoj GEA devas resti „plene neŭtrala lingva unuiĝo", en kiu trovu lokon „ĉiuj unuavice patriote sentantaj" germanaj esperantistoj; li turnis sin kontraŭ proponoj transformi GEA en „naciecan batalorganizon", ĉar tio „forpuŝus la plej bonajn burĝajn reprezentantojn".[8]

Efektive, dum la 20aj jaroj GEA sekvis tiun strikte neŭtralan

1. *Germana Esperantisto* 21. 1924, p. 145; EdE, p. 192, 195.
2. *Germana Esperantisto* 21. 1924, p. 5.
3. Samloke 22. 1925, p. 7; 23. 1926, p. 8.
4. Samloke 24. 1927, p. 20.
5. Pri 1928 estis notite, ke la „plej granda parto de la gazetaro estas favora al Esperanto": samloke 26. 1929, p. 7.
6. Samloke 29. 1932, p. 2; 30. 1933, p. 7.
7. „Bericht über den 12. Deutschen Esperanto-Kongreß in Plauen (7.-10. Juni 1924)", *Germana Esperantisto* 21. 1924, p. 146.
8. Samloke, p. 147.

linion. Nur tiel ĝi povis eviti, ke influa parto de la publika opinio, observante la rapidan disvastiĝon de Esperanto inter laboristoj, persiste identigu la lingvan movadon kun politikaj celoj, kaj esperi, ke per racia argumentado ĝi sukcesos iom post iom ne nur konvinki burĝajn germanojn pri la praktika utilo de Esperanto, sed ankaŭ malfortigi la reziston de la plej gravaj kontraŭuloj de la ideo de internacia helplingvo.

La tasko estis malfacila, ĉar, kiel skribis Eugen Wüster en 1931, en neniu lando „la kontraŭeco [al planlingvo] estis tiel forta kiel en Germanio; ĝis 1929 povis esti registrita eĉ ne unu simpatianto inter la lingvosciencistoj".[1] Grava bastiono de kontraŭuloj estis ekzemple, precipe ĝis la fino de la Unua Mondmilito, la lingvopurisma movado reprezentita per Allgemeiner Deutscher Sprachverein (Ĝenerala Germana Lingvo-Unuiĝo). Tiu ĉi asocio ne nur pledis por korekta uzo de la germana lingvo, sed ankaŭ – precipe dum la vilhelma epoko – emis denunci la uzantojn de fremdvortoj kiel intelektulajn perfidantojn de la germana popolo. Ĉar la puristoj enplektis en siajn atakojn ofte ankaŭ flankajn batojn kontraŭ Esperanto kiel plia danĝero por la pureco de la germana lingvo[2], la membroj de GEA dediĉis konsiderindan atenton al klopodoj akiri la simpation de Sprachverein. Ili argumentis, ke la lernado de Esperanto helpas akrigi ankaŭ la komprenon pri korekta uzo de la gepatra lingvo[3] kaj ke Esperanto „malhelpas la eluziĝon kaj malkomponiĝon de la naciaj lingvoj kaj garantias ilian liberan evoluon, forprenante de ili la ĝenajn internaciajn terminojn".[4] Esperantistoj estis alvokataj membriĝi en Sprachverein, ĉar kontraŭ ĝi Esperanto apenaŭ ŝajnis venkigebla en Germanio.[5] Efektive, granda nombro de germanaj esperantistoj, inkluzive la posteulon de Steche kiel prezidanto de

1. Eugen Wüster, *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik*, Berlin 1931, p. 350.
2. Eduard Engel, *Sprich Deutsch! Ein Buch zur Entwelschung*, Leipzig 1917, p. 15, 111; Maria Grunewald, „Die deutsche Sprache in der Wissenschaft", *Zeitschrift des Allgemeinen Deutschen Sprachvereins* 34. 1919, kol. 202.
3. Karl J. Loy, „Deutsch und Esperanto", *Esperanto-Praktiko* 1. 1919, p. 26.
4. Albert Steche, *Entwicklungsgang der Weltsprache*, Leipzig 1922, p. 21.
5. „Über die Gewinnung der höheren Volksschichten für Esperanto", *Germana Esperantisto* 23. 1926, p. 74.

GEA, Ernst Kliemke, konsideris sin entuziasmaj membroj de Sprachverein.[1]

La sinteno de Sprachverein mem estis malunueca, eĉ kontraŭdira. Nenomita membro ĝia kaj amiko de Esperanto asertis en majo 1926, ke ĝi rilatas „al nia afero neniel malamike" kaj ke en ĝia organo *Muttersprache* delonge ne aperis kontraŭesperanta artikolo.[2] Sed ĝuste en la sama monato tiu revuo publikigis ampleksan artikolon el la plumo de sia redaktoro, Oskar Streicher, kiu estis nete negativa pri Esperanto. Kvankam li koncedis, ke troviĝas en Sprachverein membroj, kiuj „scias akordigi la entuziasmon por la granda ideo de mondlingvo kun la plej varma amo al sia germana gepatra lingvo", li kritikis la nesufiĉan reprezentiĝon de germandevenaj vortoj en la Esperanta vortaro, neis, ke Esperanto iam povos iĝi vivanta lingvo, „ĉar en ĝi parolas la animo de neniu popolo", nomis la tradukon de *Ifigenio* de Goethe en artefaritan lingvon „sakrilegio kontraŭ sanktaĵo" kaj konkludis fine, ke „Esperanto konstruus larĝan ponton, sur kiu migrus miloj da ĝenaj fremdvortoj en la germanan parolon kaj miloj da germane parolantaj homoj en la por ili ĉiam allogan landon de la kosmopoliteco".[3]

Tio estis artikolo, kiu supozigis, ke ĝi esprimas se ne la oficialan starpunkton de Sprachverein, almenaŭ la opinion de la plimulto de ĝiaj membroj. Aliflanke, la prezidanto de Sprachverein, Richard Jahnke, estis adepto de Esperanto kaj distancigis sin de kontraŭesperantaj eldiroj en *Muttersprache*.[4] Al sobriĝo de la debatoj pri fremdvortoj kontribuis la filo de Albert Steche, la germanisto Theodor Steche, per rimarkinda scienca studo[5], kiu inkluzivis ankaŭ pledon por Esperanto. Ŝuldiĝis nelaste al la esperantemaj membroj de Sprachverein, ke militem-ŝovinismaj trajtoj perdis en ĝi dum la 20aj jaroj sian superregon kaj ke same moderiĝis la antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto.

1. Heinrich Orthal, „Wir und der Deutsche Sprachverein", *Germana Esperantisto* 23. 1926, p. 216.
2. „Über die Gewinnung...", p. 74.
3. Streicher, „Weltsprache", *Muttersprache* 41. 1926, kol. 133, 137-139.
4. Vd. la leteron de Jahnke, de 20-2-1930, publikigitan en *Aŭstria Esperantisto* 9. 1932, p. 1; kp. ankaŭ Streicher, kol. 133.
5. Theodor Steche, *Neue Wege zum reinen Deutsch*, Breslau 1925; vd. ankaŭ de la sama, „Sprachwissenschaft und Welthilfssprache", *Germana Esperantisto* 28. 1931, p. 85-90.

Tamen, la esperantistoj konsciis, ke en Sprachverein troviĝas ankaŭ membroj, kiuj pro sia ideologio simple ne deziras interpopolan komunikadon, kiujn per raciaj argumentoj ne eblas konvinki, ĉar ili abomenas ĉion, „kio odoras je internacieco".[1] En multe disvastigita libro pri lingvoscienco oni povis legi la opinion, ke Esperanto havos ŝancon nur, se estos evoluo al kosmopolitismo, al ĝenerala mondkulturo; tian evoluon la aŭtoro komprenis jene:

> ... nur se estus plenumitaj kaj tutmonde realigitaj la postuloj de la internacia socialismo aŭ komunismo, kiuj iras direkte al senspirita egaligado, al malvarm-racia utilec-politiko, al ŝablonigo de la homaro, al kontraŭbatalado de ĉio spirite elstara, al sennaciigo, al neado de genio kaj talento, oni povus fari al si ioman esperon pri la ĝenerala disvastiĝo de same ŝabloneca, racieca kaj senkolora internacia mondlingvo.[2]

Tiu ĉi opinio, kiun pluraj germanaj gazetoj represis[3], sendube respegulis la kulturan pesimismon ekzistantan en burĝaj medioj. Sekve, nur tiel longe, kiel naciismaj tendencoj ne akiris superregon en tiuj rondoj, la klopodoj varbi por Esperanto promesis havi sukceson.

Ĝis la fino de la 20aj jaroj GEA havis relative stabilan pozicion. Ĝi ŝajnis eĉ forta, se oni notas, kiom kontraŭuloj de Esperanto plendis pro la eksterproporcia graveco, kiun germanoj donis al tia lingvo anstataŭ subteni klopodojn por la disvastigo de la germana en eksterlando. Franz Thierfelder, dum preskaŭ dek jaroj (ĝis 1937) la ĝenerala sekretario de Germana Akademio en Munkeno, de institucio dediĉita al „scienca esploro kaj flego de germaneco", konstante asertis, ke en Germanio estas pli da organizitaj esperantistoj, ol en ĉiuj aliaj landoj kune.[4] Post la nazia

1. Orthal, „Wir und der Deutsche Sprachverein", p. 216.
2. Hermann Güntert, *Grundfragen der Sprachwissenschaft*, Leipzig 1925, p. 128-129.
3. Ekzemple, en *Rheinisch-Westfälische Zeitung* (Essen), 14-11-1925, matena eldono; kp. Streicher, „Weltsprache", kol. 134.
4. F. Thierfelder, „Geistige Grundlagen kultureller Auslandsarbeit", *Süddeutsche Monatshefte* 28. 1930/31, p. 229 (laŭ Kurt Düwell, *Deutschlands auswärtige Kulturpolitik 1918-1932. Grundlinien und Dokumente*, Köln, Wien 1976, p. 124). Thierfelder bazis sin sur la „Tutmonda statistiko esperantista", publikigita en 1928, preteratentante tamen, ke tiu statistiko ne povis konsideri, interalie, la disvastigitecon de Esperanto en Soveta Unio. – Por la opinio de Thierfelder vd. ankaŭ *Deutsche Weltsprache*, 1. Band. *Die Grundlagen der deutschen Sprachgeltung in Europa*, Berlin 1938, p. 29-35.

potencpreno li memoris, ke, kiam pli frue li protestis kontraŭ la malŝparo de publikaj rimedoj por Esperanto, la „internaciema" gazetaro sin ĵetis kontraŭ la ĝenulo kaj rifuzis al li siajn kolumnojn.[1] Thierfelder cetere apartenis al la pli respektindaj kontraŭuloj de Esperanto en Germanio. Li ne hezitis koncedi, ke la „venka iro" de Esperanto okazis „ne nur dank' al ege lerta varbado, sed pro ĝia sagaca kaj praktika interna strukturo"[2]; anstataŭ apelacii – kiel la vulgaraj naciistoj – al obtuzaj sentoj por ataki Esperanton, li senartifike eksplikadis, kial li malaprobas publikan akceladon de tiu lingvo – nome, ĉar tiamaniere endanĝeriĝas la monda signifo de la germana lingvo.

La argumentado de Thierfelder substrekas, kiugrade Esperanto en la Respubliko de Weimar ĉesis esti afero neglektinda aŭ esti simple ridindigita, kiom GEA komencis evolui al interesgrupo, al kiu seriozaj kontraŭuloj montris sian rekonon. Kvankam GEA pro sia neŭtraleco ne eksplicite subtenis iun el la internaciismaj movadoj, ĝi sendube kun profito ĉerpis el la populareco, kiun ĝuis ekzemple la paneŭropa ideo en la pli progresema parto de la germana burĝaro, tiel ke Thierfelder en 1933 rigardis – ne malprave – la antaŭan kreskon de la Esperanto-movado en Germanio kiel karakterizan „por la spirito de la postmilita epoko".[3]

2.2. *LA LEVIĜO DE NOVA MALAMIKO*

Tamen, neniam malaperis la naciistoj, kiuj, kaptitaj de misia fervoro ekflamigi kaj daŭre teni bolanta la – laŭ ili – deficitan nacian fieron de la germana popolo, konsideris la sinokupon pri Esperanto kiel eksteran distingilon de nesufiĉa patriotismo. Kaj inter tiuj leviĝis, unue apenaŭ rimarkite, novtipaj malamikoj de Esperanto: la nacisocialistoj. Ili ne ĉiel diferencis de tiuj militemaj ŝovinistoj, kiuj jam antaŭ la Unua Mondmilito direktis vene-

1. Thierfelder, „Weg mit Esperanto!", *Kölnische Zeitung*, 14-5-1933.
2. Samloke.
3. Samloke.

najn atakojn kontraŭ Esperanto, sed montris, ĉiam pli evidente kun la paso de la jaroj, senprecedence pli senkompromisan malamikecon kontraŭ la lingvo kaj la ideoj fakte aŭ supoze ligitaj kun ĝi.

La elirpunkto de tiu principa malamikeco estis la „juda origino" de Esperanto. Jam en 1923, sekve de agitado en nacisocialistaj kunvenoj kaj gazetoj en Bavario, precipe en la nordaj partoj, kie kampanjis la fifama antisemito Julius Streicher, estis ŝtelitaj afiŝtabuloj de la esperantistoj; dum la Universala Kongreso en Nürnberg „la hokkruculoj detrancis grandan verdan flagon antaŭ la kongresejo".[1] Nelonge, post kiam tiuj incidentoj iĝis konataj, ankaŭ la ĉefredaktoro de *Germana Esperantisto* devis rebati atakojn de malnova kontraŭulo, Albert Zimmermann, kiu deklaris unu el siaj vivtaskoj la batalon kontraŭ la „juda Esperanto".[2] Komence de 1926 ekstreme dekstra gazeto nomis Esperanton „danĝero, eĉ ĝismorta malamiko de ĉia nacieca evoluo", vidante la movadon estrata de judoj aŭ ties servantoj.[3]

La esperantistoj, kiuj okaze estis spertintaj malŝatajn rimarkojn pri la judeco de Zamenhof jam antaŭ la milito, emis komence simple kun malestimo ignori atakojn kontraŭ Esperanto, bazitajn sur rasa malamo.[4] Sed, alproksimiĝante al la fino de la 20aj jaroj, ili devis zorgoplene registri, kiom la atakoj flanke de la nazioj transiris la kadron de tradiciaj antisemitaj antaŭjuĝoj kontraŭ Esperanto. La 21an de januaro 1928, debato en la buĝeta komisiono de la bavara parlamento okulfrape reliefigis la divido-linion inter pure reakciaj kaj nete faŝismaj argumentoj en rilato al Esperanto. Sur la tagordo troviĝis peticio de Esperanto-grupoj en Munkeno kaj Nürnberg por la enkonduko de fakultativa instruado de Esperanto en mezlernejoj. El la diskutantoj pozitive sin esprimis nur la socialdemokrata[5] kaj komunista deputitoj. Tute negativa estis, kiel atendeble, la deputito de Germannacia Popola Partio, Hermann Bauer, kiu nomis

1. *Der Arbeiter-Esperantist* 10. 1924, p. 50, 55.
2. F. Ellersiek, „Alldeutsche Hetze gegen Esperanto", *Germana Esperantisto* 21. 1924, p. 224.
3. *Deutsch-Österreichische Tageszeitung*, 17-1-1926.
4. Hartenfels, „Die deutsche Presse und Esperanto", *Beiträge zur Welthilfssprachenfrage*, Dresden 1918, p. 18-19.
5. Wilhelm Hoegner, la postmilita ĉefministro de Bavario.

Esperanton „pure mekanisma, senanima kreaĵo", nura kodo; jam du jarojn antaŭe li estis parolinta en la parlamento pri „mallingvo" kaj komparinta la nivelon de Esperanto-kongreso kun tiu de nudprezentadoj.[1] Lin tamen multe superis per akreco la nacisocialista frakciestro Rudolf Buttmann. Por li Esperanto estis flikitaĵo de judo, de ano de raso konata pro sia malkapablo esti kreema kaj sia malamikeco kontraŭ la germana kulturo; ĝi subfosus la germanan influon ĉe pli malgrandaj nacioj kaj estas „vojpretiganto por latinidigo".[2]

La radikojn de tiu ĉi provo ligi Esperanton al tutmonda konspiro kontraŭ la germana nacio ni trovas ĉe Adolf Hitler mem, kiu jam en septembro 1922, dum parolado en Munkeno, aŭdigis la jenon:

> La marksismo fariĝis la alpelanto de la laboristoj, la framasonismo servis al la „intelektaj" tavoloj kiel malkomponilo, Esperanto estis faciligonta la interkompreniĝon.[3]

Sed pli konataj iĝis la formuloj de Hitler en *Mein Kampf* – la libro, kiu – kiel ni hodiaŭ scias – multrilate anticipis teorie tion, kio poste, dum la dekdujara regado de la nazioj en Germanio kaj Eŭropo, estis realigita ĝis la plej teruraj konsekvencoj:

> Tiel longe, kiel la judo ne fariĝis la mastro super la aliaj popoloj, li volenevole devas paroli ilian lingvon, sed tuj kiam tiuj estus liaj servutuloj, ili ĉiuj devus lerni unu universalan lingvon (ekz. Esperanto!), tiel ke ankaŭ per ĉi tiu rimedo la judaro povus regi ilin pli facile.[4]

Unu jaron post la apero de tiu libro oni povis legi, en 1926, en ekstreme dekstra semajna revuo karakterizan elfluon el tia mania konspiro-teorio:

> Tiu bastarda lingvo, sen radiko en la vivo de popolo kaj sen ia literaturo estiĝinta el tiu vivo, estas efektive akironta tiun mondan pozicion, kiun atribuas al ĝi cionisma plano, kaj estas helponta ekstermi patriotismon en la estontaj laborsklavoj de Ciono![5]

---

1. Cit. laŭ la flugfolio „An den Bayerischen Landtag! Protest der Esperantistenschaft Münchens gegen die Ausführungen des Abgeordneten Herrn H. Bauer über Esperanto vom 18. März 1926".
2. Bayer. Hauptstaatsarchiv München: „Niederschrift über die 271. Sitzung des Ausschusses für den Staatshaushalt vom 21. Januar 1928", p. 18-23. Vd. ankaŭ Georg Lorenz, „Esperanto im Bayrischen Landtag", *Arbeiter-Esperantist* 14. 1928, p. 15-16; „Im Bayrischen Landtag", *La Socialisto* 3. 1928, p. 25-26.
3. *Völkischer Beobachter*, 20-9-1922; ripresita en: Eberhard Jäckel (red.) *Hitler. Sämtliche Aufzeichnungen 1905-1924*, Stuttgart 1980, p. 691.
4. Adolf Hitler, *Mein Kampf*. 603-607a eldono, München 1941, p. 337.
5. Prof. Dr. Sieglerschmidt, „Das Esperanto", *Der Reichswart* 7. 1926, n-ro

La esperantistoj kun maltrankviliĝo registris la monstran bataldeklaron de la plifortiĝanta naziismo kontraŭ sia lingvo.[1] Ĉiam pli ofte en la organo de GEA aperis sinpravigaj artikoloj, traktantaj la rilatojn inter nacieco kaj internacia lingvo. Ĝiaj aŭtoroj pledis por „vera internaciismo", kiu eblas nur „surbaze de forta kaj sana naciismo"[2], aŭ ripetis la kuriozan aserton, ke Esperanto helpas purigi la germanan lingvon, englutante ĝiajn fremdvortojn.[3] En oktobro 1932 *Germana Esperantisto* publikigis proklamon de la nova gvidanto de Esperanto-Instituto por la Germana Regno, kiu postulis servigi Esperanton al la „plej alta surtera valoro, kiun konas germano, la patrolando"[4], kaj samnumere aperis eksiĝ-deklaro de membro de GEA, kiu vidis la kaŭzon de la nekontentiga progreso de la movado en ĝia troa ligiĝo al pacifismo.[5] Responde je tiu deklaro, Arnold Behrendt, poŝtkonsilisto kaj ekde 1929 prezidanto de GEA, konfirmis la nepran neŭtralecon de la asocio, juĝante politikan aŭ socian agadon per Esperanto „nek utila, nek necesa".[6]

Preskaŭ samspire tamen Behrendt konfesis, ke por li persone, „kiel ankaŭ kredeble por la plej multaj adeptoj de Esperanto", la movado estas „pli ol pure lingva movado"[7] – ŝajne ne konsciante la kontraŭdiron al la ĵus substrekita principo de neŭtraleco, kiun entenis tia implicita aludo al la „interna ideo". Ĉiuokaze, lia supozo pri la sentoj de la membraro ne estis maltrafa: Sendube la plimulto taksis sian movadon ne nur lingvodisvastiga, sed ankaŭ – pli-malpli eksplicite – pacakcela. Siavice, la nazioj notis kiel esencan kernon de Esperanto la strebon al popola interpaciĝo, kaj ili senhonte argumentis, ke tiun celon oni atingas per „mortobatoj al la vampiroj de la internaciaj potencoj" kulpaj pri la Trak-

27 (3 jul.).

1. Robert Trögel, *Esperanto kaj kulturo. Individuo, popolo, homaro*, Köln 1929, p. 25.
2. Prof. Dr. Wicke, „Volkstum und Esperanto", *Germana Esperantisto* 29. 1932, p. 131.
3. *Germana Esperantisto* 29. 1932, p. 113.
4. Letero de Max Friedrich Schreiber, de 23-9-1932, al la estraro de GEA, presita en *Germana Esperantisto* 29. 1932, p. 165.
5. Letero de Wolfgang Jäckel, de 11-7-1932, al Behrendt, samloke, p. 156-157.
6. Samloke, p. 174.
7. Samloke.

tato de Versailles, ne per tio, ke germano kaj franco „interbalbutas" en Esperanto.[1]

La mallertaj provoj de GEA defendi sin kontraŭ la kreskanta naziismo havigis al ĝi jam antaŭ la potencpreno de Hitler kritikon de eksterlandaj esperantistoj, kiuj rimarkis eĉ akomodiĝon de GEA al la naciisma ondo. Aŭstraj socialistoj notis, ke „la burĝaj esperantistoj senmaskigis sin", ke „ili flatas la naciismon kaj proponas sin al la faŝismo" kaj ke mutiĝis la babiladoj pri „mondpaco per Esperanto" kaj „nova sento".[2] La efiko de la reagoj de GEA, ĉu flataj aŭ ne, tamen komplete forvaporiĝis, ĉar la nazia gazetaro insistis stampi la esperantistojn adeptoj de „tiu artefarita, internacia pacifista lingvo, de tiu anemia varmdoma kulturaĵo por plua idiotigo de nekuraceblaj paneŭropaj miksrasuloj".[3]

2.3. *„SAMDIREKTIGO"*

Kiam Hitler akiris la potencon, la 30an de januaro 1933, la estroj de GEA, konsiderante la nerompeble negativan opinion de la nazioj pri internacia lingvo, povis facile imagi, ke la nova situacio ne restos sen postefikoj je la farto de Esperanto.

La unua alarmsigno estis la likvido de la forta laborista Esperanto-movado. Malpli ol du jarojn antaŭ la „nacisocialisma revolucio" ĝi estis spertinta skismon en ligo kun la akriĝanta konflikto inter la Socialdemokrata kaj Komunista Partioj.[4] Kiam GLEA en aprilo 1930 forlasis sian superpartian starpunkton, decidante aliĝi al la komunismema „Intereskomunaĵo por Laborista Kulturo", multaj nekomunistaj membroj eksiĝis kaj organizis sin en novfondita Socialista Esperanto-Asocio (SEA), kiu atingis preskaŭ 1 500 membrojn. Tiuj eventoj plirapidigis ankaŭ la skismon en la internacia laborista Esperanto-movado: GLEA, kiu

1. *Völkischer Beobachter*, 4-11-1930.
2. F.S. (Ferdinand Seidel), „Esperanto kaj naciismo", *La Socialisto* 7. 1932, n-ro 11, p. 1-2.
3. *Die Volksparole* (Düsseldorf), 28-5-1932; cit. *Germana Esperantisto* 29. 1932, p. 114.
4. Pri tio vd. sube, p. 263-264.

pretendis plue je proksimume 4 000 membroj, organizis en aŭgusto 1932 en Berlino la fondkongreson de Internacio de Proleta Esperantistaro (IPE), estante ties plej forta landa sekcio apud la soveta.[1]

Antaŭ ol venkis la nazioj, la rilatoj inter GLEA kaj SEA karakteriziĝis per reciproka insultado. Post la Reichstag-incendio de la 27a de februaro 1933, kiu servis al la nova reĝimo kiel preteksto por subpremi sindikatojn kaj laboristajn partiojn, ilin ambaŭ unuigis la sama sorto. Komence de aprilo policistoj invadis la sidejon de GLEA en Berlino, kiu samtempe servis kiel centro de IPE, kaj konfiskis la tutan posedaĵon; GLEA per tio estis disbatita, kvankam en kelkaj lokoj ĝi ankoraŭ daŭrigis kaŝan agadon.[2] SEA ne atendis oficialan malpermeson, sed libervole dissolviĝis la 31an de marto; la provon transvivi sub la nomo „Societo de Esperanto-Amikoj" ĝi rezignis post kelkaj semajnoj.[3] En Leipzig la polico konfiskis la stokon de la komunisma eldonejo EKRELO kaj arestis ĝian gvidanton Walter Kampfrad[4], dum la administrejo de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu troviĝis en la sama urbo, sukcesis ankoraŭ sendi grandan parton de sia havaĵo al Parizo, ĝis ankaŭ ĝin, fine de 1933, trafis malpermeso de ĉia plua agado.[5]

Multaj aktivuloj estis enkarcerigitaj; en unu distrikto oni arestis ĉiujn membrojn de grupo de GLEA.[6] Komence de junio germana SAT-ano raportis, ke SA-uloj „ĉion radikale konfiskas. La germanaj brunaj idiotoj ne favore rilatas al Esperanto; ili nomas ĝin juda lingvo, kiu meritas esti disvastigata inter la sovaĝuloj de

1. De socialdemokrata flanko la skismon klarigas A. Sproeck, „Warum Spaltung im Arbeiter-Esperanto-Bund?", *La Socialisto* 5. 1930, p. 63-65; por la komunista vidpunkto vd. Detlev Blanke, „Pri la Germana Laborista Esperanto-Asocio (LEA)", *Der Esperantist* 4. 1968, n-ro 26/27, p. 12-13.
2. *Bulteno de CK SEU* 12. 1933, p. 87; persona komuniko de Ludwig Schödl, Neuruppin (GDR), de 1-6-1969. Vd. ankaŭ la memorojn de Adolf Schwarz, „Mi estis persekutita", *Der Esperantist* 22. 1986, p. 11-12.
3. *Sennaciulo* 9. 1932/33, p. 83, 94; persona komuniko de Adolf Sproeck, okcidenta Berlino, de 28-7-1966.
4. *Bulteno de CK SEU*, p. 87.
5. *Sennaciulo* 18. 1947, n-ro 11, p. 5, 8.
6. *Sennaciulo* 9. 1932/33, p. 89.

Aŭstralio".[1] Peto de SEA-grupestro por permeso de tute privataj kursoj estis rifuzita.[2] Kompreneble, la persekutoj kontraŭ laboristaj esperantistoj celis unuavice ilian marksistan aktivadon, ne la scion de Esperanto. Sed ofte la ŝtata polico konsideris esperantistecon lasta guto, kiu, precipe en duba kazo, definitive igis necesa la areston de suspektata socialisto aŭ komunisto. Plurfoje tiaj viktimoj spertis, ke Gestapo nomis Esperanton „sekreta lingvo de komunistoj".

Post kiam per la disbato de la laborista movado jam preskaŭ tri kvaronoj de la esperantistoj en Germanio perdis sian organizan bazon, GEA opiniis, ke ĝi povos transvivi sub la nazia reĝimo nur, se ĝi forlasas sian antaŭan modere internaciisman linion kaj rezignas ankaŭ sian politikan neŭtralecon.

„Al ĉiuj!" estis titolita la aprila ĉefartikolo de *Germana Esperantisto*, en kiu – sub citaĵo de Hitler – la estraro de GEA emfazis sian fidelecon al la germana nacio.[3] Du monatojn poste Behrendt, kiu politike inklinis al Germannacia Popola Partio, aperigis kvinpaĝan artikolon pri „Esperanto serve al la germaneco", kiu konklude asertas, ke Esperanto kapablas „multe kontribui por plifirmigi la germannacian konscion, por pliprofundigi la konon kaj komprenon de la germana lingvo, por plifortigi kaj konservadi la germanecon eksterlande, por peri al la eksterlando komprenemon kaj estimon pri germana ecaro..."[4] En la sama numero GEA raportis pri siaj unuaj ofertoj al la registaro kiel utiligi Esperanton, precipe por kontraŭagi la „terurpropagandon" en eksterlando kontraŭ la nazia reĝimo.[5]

La 30an de majo GEA direktis al la Ministerio de Internaj Aferoj skriban peton pri „samdirektigo".[6] Post du semajnoj venis la respondo, ke la samdirektigo de GEA „povas esti lasata al (via) konsidero". Informante pri tiu nebule formulita ministeria res-

1. Samloke, p. 95.
2. *Sennaciulo* 10. 1933/34, p. 15.
3. „An Alle!", *Germana Esperantisto* 30. 1933, p. 61-62.
4. Behrendt, „Esperanto im Dienst am Deutschtum", *Germana Esperantisto* 30. 1933, p. 99.
5. Habellok, „Esperanto im neuen Deutschland", samloke, p.100.
6. Samloke. – La termino „samdirektigo" esprimas la diversajn metodojn de la nazia reĝimo submeti al si ĉiujn antaŭe sendependajn institucionjn kaj asociojn, ekzemple per tio, ke ties gvidajn oficojn okupis membroj de la nazia partio. Ofte okazis ankaŭ libervola „samdirektiĝo".

pondo, kiu ne eniris detalojn pri la sekvota procedo, la estraro prezentis al la membroj la gvidliniojn por samdirektigo. Ties punkto 11 postulis, ke „personoj kun kontraŭŝtata sinteno ne povas membriĝi en GEA" kaj ke en ĝiaj gvidaj organoj „nearjoj, marksistoj aŭ komunistoj ne estas allasitaj". Samtempe la estraro substrekis la neceson de la samdirektigo, „se GEA volas pluekzisti kaj senĝene daŭrigi sian laboron", kaj alvokis la membraron al disciplino.[1]

La gvidantoj de GEA konsciis, kiom da maltrankvilo tiutempe regis en la vicoj de la membraro. Jam fine de aprilo la prezidanto de la Saksa Ligo raportis, ke „tutaj grupoj" perdis pro la politikaj ŝanĝoj la kuraĝon plue disvastigi Esperanton.[2] En majo, Paul Christaller, prezidanto de la Esperanto-Grupo Stuttgart ekde ĝia fondiĝo komence de 1905, deklaris sian eksiĝon, ankaŭ kiel membro; estante konata pacifisto, li volis tiel evitigi al la grupo malagrablaĵojn sub reĝimo konsideranta pacifistojn, same kiel komunistojn, „popolaj malamikoj".[3] En julio aktivulo en Heilbronn skribis, ke en lia urbo la movado „preskaŭ tute stagnas", ĉar „ni ne havas tre bonan famon nuntempe tie ĉi".[4] Li kaj kredeble multaj aliaj atendis, kian rezulton alportos la proksima jarĉefkunveno de GEA, sed okazis ankaŭ protestoj kontraŭ la proponita samdirektigo.[5]

La situacio por GEA ankoraŭ plikomplikiĝis per tio, ke dum la unua duonjaro de la nazia reĝimo daŭris preparaj laboroj por la 25a Universala Kongreso, kiu estis okazonta en somero 1933 en Köln. La inviton faris en 1932 Konrad Adenauer, la tiutempa ĉefurbestro. Kiam la nazioj eksigis lin el lia ofico, la kongresaj preparoj eniris krizan stadion, ĉar la novaj aŭtoritatuloj limigis la subtenon al Loka Kongresa Komitato (LKK); la organizantoj krom tio sciis, ke jam tre frue la nazia gazetaro estis kondamninta

1. „Gleichschaltung der Esperanto-Bewegung in Deutschland", *Germana Esperantisto* 30. 1933, p. 121-122.
2. *Sächs. Esperanto-Landesverband des D.E.B.* (cirkulero) 1933, n-ro 4 (32), p. 1.
3. Teksto de la adiaŭa parolo de P. Christaller, de 11-5-1933; kopio en posedo de la aŭtoro.
4. Letero de Friedrich Bachmann, Heilbronn, al Heinrich Nischwitz, Mannheim, de 17-7-1933.
5. Anonimulo en Breslau dissendis tiusencan poŝtkarton al GEA-grupoj: *Germana Esperantisto* 30. 1933, p. 117.

la inviton de Esperanto-kongreso al Köln.[1] La zorgoj de LKK pliiĝis per la fakto, ke tuj, kiam en eksterlando disvastiĝis la unuaj informoj pri la nazia teroro reganta en Germanio, multaj aliĝintoj komencis heziti aŭ rezigni partoprenon en la kongreso. Venis alvokoj, ke oni transloku la kongreson al lando, kie al „judoj, laboristoj kaj entute al ĉiuj aliopiniantoj" estus garantiita la partopreno.[2] La indigno en eksterlando kreskis, kiam oni eksciis, ke slovaka komercisto, travojaĝanta Germanion, estis batita de nazioj ĝis senkonscio nur pro tio, ke li portis suspektindan insignon – la verdan stelon.[3]

Tamen, verŝajne plimulto de la germanaj esperantistoj favoris okazigi tiun internacian manifestacion en sia lando, esperante tiel havigi al si pli da apogo, aŭ malpli da premo, flanke de la novaj regantoj; oni sekve klopodis trankviligi tiujn eksterlandanojn, kiuj timis renkonti ĝenojn dum sia restado en hitlera Germanio. Precipe la semajna gazeto *Heroldo de Esperanto*, aperanta en Köln, ripete certigis, ke „hodiaŭ la situacio en Germanlando estas pli trankvila kaj pli sekura ol antaŭe".[4] Tiuj asertoj siavice ekflamigis protestojn[5], kaj komence de junio la Pola Esperanto-Kongreso en Varsovio akceptis rezolucion, ke la UK en Köln „ne povos esti de la Poloj vizitata".[6]

Meze de majo la prezidanto de UEA, Eduard Stettler, urĝe demandis al LKK, ĉu „la kongreso povos okazi ... en plena libereco, sen polica kontrolo aŭ neceso de polica protekto".[7] Ne riceviinte respondon post kvar semajnoj, Stettler la 17an de junio dissendis al la Komitatanoj de UEA cirkuleron, en kiu li petis voĉdonon pri la demando ĉu okazigi la kongreson en Köln aŭ rezigni

1. *Westdeutscher Beobachter*, 7-2-1932; *Lokal-Anzeiger* (Köln), 10-9-1932.
2. Alvoko de Vilna Esperantista Societo, majo 1933, cit. *Sur Posteno* 1933, p. 28; similan alvokon, ankaŭ en majo, faris Edvardo Wiesenfeld, „Publika letero al I.C.K. por LKK", *Pola Esperantisto* 27. 1933, p. 66-69.
3. *Sur Posteno* 1933, p. 28; *La Socialisto* 8. 1933, n-ro 8, p. 5.
4. „Mensogoj pri Germanujo", *Heroldo de Esperanto* 14. 1933, n-ro 13 (718), p. 2. – Laŭ siaj memoroj, la eldonisto de *Heroldo* frue eksciis pri teroraj agoj de la nazioj: Teo Jung, *Ĉiu – ĉiun. Sep jardekojn en la Esperanto-movado. Memorafoj de 86-jara optimisto*, Antverpeno, La Laguna 1979, p. 235-236.
5. *Sennaciulo* 9. 1932/33, p. 89.
6. Edvardo Wiesenfeld, „La VI Tutpola en Varsovio", *Pola Esperantisto* 27. 1933, p. 86.
7. Letero de 13-5-1933, presita en *Esperanto* 29. 1933, p. 98.

KOLONJO, KRON' JUVELA
EL URBOJ LA PLEJ BELA

Viro deziras esti

Invito de la ĉefurbestro Konrad Adenauer al la 25a Universala Kongreso. *Malsupre:* Malfermo de la 25a UK en Kolonjo: Anstataŭ la eksigita Adenauer la kongresanojn alparolis la nazia ĉefurbestro Günter Riesen.

pri ĝi. El la dudek respondintoj, 14 Komitatanoj, inter ili ĉiuj germanaj, voĉdonis por okazigo de la kongreso; nur kvar voĉdonis kontraŭ, kaj du sindetenis.[1] Stettler mem pretis rezigni pri la kongreso[2]; tia decido tamen estus koncerninta nur la kongreson de UEA, tradicie okazantan kadre de la Universala Kongreso, pri kiu kiel tuto kompetentis la Internacia Centra Komitato. En ĉiu okazo la rezulto de la voĉdono estis klara, kaj intertempe ankaŭ LKK povis komuniki certigon de la aŭtoritatoj, ke ne okazos „malfacilaĵoj aŭ ĝeno al invititaj eksterlandaj gastoj".[3] La nazia reĝimo, zorgema pri sia internacia reputacio, ankoraŭ malantaŭenŝovis sian ideologian kontraŭecon al Esperanto.

La kongreso fine sukcesis altiri nur 900 partoprenantojn el 32 landoj – proksimume duono de tiu nombro, kiun oni pli frue antaŭvidis.[4] Krom tio, kiel notis brita kongresano, „oni sentis iomete strangan atmosferon pro la kelkaj Hitlerajoj".[5] La nazia ĉefurbestro Günter Riesen salutis la kongreson en bruna ĉemizo. En sia parolado li, tute prisilentante Esperanton, esprimis sian ĝojon, ke venis tiom da eksterlandanoj „por konvinkiĝi per la faktoj pri Germanio, kiel ĝi vere estas"; la „nacisocialisman revolucion" li defendis kiel protekton de la mondo kontraŭ la bolŝevismo.[6] Poste, la gazetaro de Köln publikigis favorajn juĝojn de kelkaj kongresanoj pri la harmonia trapaso de la UK kaj asertis, ke en la tutmonda esperantistaro estonte ne plu havos grundon „terurfabeloj" pri Germanio.[7]

En la kadro de la Universala Kongreso okazis, la 29an de julio, la jarĉefkunveno de GEA, kies prioritata tagordo estis la propono pri samdirektigo de la asocio. La delegitoj – reprezentitaj

1. La voĉdoniloj estas konservataj en la arkivo de UEA en Rotterdam. La kvar kontraŭantoj estis Odo Bujwid, Andreo Ceh, J.R.G. Isbrücker kaj Vilho Setälä. Edmond Privat sindetenis rimarkante: „La Kongreso ne povas esti Zamenhofa en la nunaj kondiĉoj, sed UEA ne povas teni sin ekstere se ĝi okazos."
2. Hans Jakob, „Esperantismaj problemoj", *Esperanto* 39. 1946, p. 10.
3. Letero de LKK al Stettler, de 23-6-1933, presita en *Esperanto* 29. 1933, p. 131.
4. En Parizo (1932) estis 1650, en Stockhom (1934) 2042 kongresanoj. Unu jaron antaŭe oni kalkulis eĉ pri pli ol 3000 partoprenantoj (*Lokal-Anzeiger* [Köln], 12-8-1932; kp. Jung, *Ĉiu – ĉiun*, p. 238).
5. C.C.G., „De nubo al sunbrilo", *The British Esperantist* 29. 1933, p. 145.
6. *Kölnische Zeitung*, 31-7-1933.
7. *Kölner Tageblatt*, 17-8-1933.

estis 41 grupoj kun 106 voĉoj, kiuj konsistigis malpli ol kvin procentojn de la tuta membraro – unuanime aprobis la samdirektigon. Behrendt provizore transprenis la oficon de „givdanto". Al li senpere respondecis kvarmembra gvidkonsilantaro (anstataŭ estraro) kaj la estroj de la grupoj („Obmänner"). Al la jarĉefkunveno estis de tiam rezervita nur konsila karaktero.[1]

La nova statuto de GEA[2] ne plu entenis indikon pri politika neŭtraleco. Drastan ilustron de la ŝanĝita situacio liveris la minacaj vortoj de Behrendt en Köln, ke homojn, kiuj uzas Esperanton „por malbonaj celoj", do „misuzantojn oni punu".[3] Efektive, laŭ la gvidlinioj, personoj kun „kontraŭŝtata sinteno" ne rajtis aparteni al GEA.[4] Sed, kompare kun la projekto de gvidlinoj publikigita antaŭ la kongreso, en la fina versio ne troviĝis la postulo, ke „nearjoj, marksistoj aŭ komunistoj" estas ekskluditaj el gvidaj postenoj en la asocio. Tiu ĉi kondiĉo estis kaŭzinta indignajn reagojn: Malnova membro, la aŭstra Esperanto-pioniro Otto Simon, sendis al Behrendt akre formulitan eksiĝdeklaron[5], kaj ankaŭ flanke de germanaj esperantistoj venis multaj protestoj.[6] Kvankam la diskriminacia klaŭzo malaperis el la gvidlinioj, Behrendt tamen postulis de kandidato por la funkcio de grupestro skriban certigon, ke li ne estas judo, ne simpatias kun marksismo kaj informos al GEA pri „kontraŭŝtataj" membroj.[7]

La kongresraporto optimisme notis: „Nun ĉiuj zorgoj foriĝis, ĉar Germana Esperanto-Asocio efektivigis sian ‚Gleichschaltung'."[8] Sed tre baldaŭ montriĝis, ke tiu atendo estis iluzio. Unue, spite la esperon de Behrendt, neniu registara instanco nomis oficialan gvidanton de GEA, kiel tio necesis por laŭorda samdirektigo. Por inklinigi la reĝimon, Behrendt admonis la

1. *Germana Esperantisto* 30. 1933, p. 145-146.
2. Teksto samloke, p. 149-151.
3. *Heroldo de Esperanto* 14. 1933, n-ro 32/33 (737/738), p. 3.
4. *Germana Esperantisto* 30. 1933, p. 146.
5. La letero estas presita en *La Socialisto* 8. 1933, n-ro 8, p. 5. Reage, Behrendt skribis al Simon: „Mi tre bedaŭras, ke mi ne havas la eblon transdoni vin al la germana polico!" (*La Socialisto* 11. 1937, n-ro 2 [julio], p. 4; persona komuniko de Joseph T. Simon, Vieno, de 2-1-1974).
6. J. Ŝapiro, „Ne riproĉu spegulon, se ĝi montras nigrulon", *Pola Esperantisto* 28. 1934, p. 16.
7. Samloke, p. 16.
8. *Germana Esperantisto* 30. 1933, p. 139.

membrojn, ke estas ĉies devo utiligi la korespondadon kun eksterlandaj esperantistoj por „ĝusta informado" pri la nova Germanio.[1] Tiu alvoko efektive ne restis sen eĥo[2], kaj ankaŭ ne mankis esperantistaj voĉoj el aliaj landoj, kiuj esprimis sian simpation al la nazia reĝimo, inkluzive ĝian kontraŭjudan politikon.[3] Krom tio, *Germana Esperantisto* en oktobro 1933 publikigis sur pli ol ses paĝoj esperantlingvan tradukon de parolado de Hitler[4], kaj la Esperanto-Unuiĝo de Saksaj Geinstruistoj eldonis kvarpaĝan informilon *La Nova Germanlando*, kiu en 10 000 ekzempleroj estis dissendita al 70 landoj. Klopodante per statistikoj pruvi la superregon de judoj en la germana publika vivo, tiu ĉi pamfleto apartenas pro sia nepretervideble antisemita tendenco al la plej fiaj presaĵoj iam eldonitaj en la lingvo de Zamenhof.

2.4. *ESPERANTISTAJ NAZIOJ*

Due, ĉirkaŭ tiu tempo, en aŭtuno 1933, interne de la germana Esperanto-movado ekaktivis personoj, al kiuj la submetiĝemo de GEA ankoraŭ ne sufiĉis. Temis pri grupeto ĝis tiam apenaŭ konata: Jam la 9an de februaro 1931 juna SA-rotestro estis fondinta t.n. „Nationalsozialistischer Deutscher Esperanto-Bund", kiu dekomence disponigis sin al la propagando de naziismo per Esperanto. La partio tamen ne permesis al la asocio uzi la epiteton „nacisocialisma", tiel ke ĝi ŝanĝis sian nomon al „Neue Deutsche Esperanto-Bewegung" (NDEB). En oktobro tiu grupo lanĉis dissplitan kampanjon kontraŭ la „eternaj hieraŭuloj" de GEA kaj senvuale klopodis tiri al si ĝiajn membrojn.[5] La statuto de NDEB postulis i.a., ke ĉiu Esperanto-organizaĵo en Germa-

1. Samloke, p. 198-199.
2. Vidu ekz. la leteron de Esperanto-grupo de Frankfurt a. M., de marto 1934, presitan en *Sennaciulo* 10. 1933/34, p. 40.
3. Karl Krŏber, „Welt-Echo durch Esperanto-Außendienst", *Der Deutsche Esperantist* 32. 1935, p. 98-101.
4. „La mondo atentu: parolas Adolf Hitler!", *Germana Esperantisto* 30. 1933, p. 154-160. La teksto aperis ankaŭ kiel depresaĵo en 10 000 ekzempleroj.
5. *Germana Esperantisto* 30. 1933, p. 178, 192.

nio, „kiu toleras kaj akceptas kiel membrojn judojn, pacifistojn kaj negocemulojn", estu „ĉe ĉiuj interesitaj instancoj" kontraŭbatalata tiel longe, „ĝis ĉesos tiu negermana sinteno aŭ estos eldevigita la dissolvo".[1]

Komence, ĉefe pro la prestiĝo de Behrendt, la sukcesoj de la subfosa laboro de NDEB restis limigitaj; vidante, ke eĉ naziaj GEA-membroj ne amase transiris al ĝi, NDEB mildigis la antaŭan kondiĉon, ke nur partianoj povas aliĝi, kaj de tiam akceptis ankaŭ simpatiantojn. GEA reĵetis la atakojn de NDEB, asertante ke esence la celoj de la du organizaĵoj identas, krom se temas pri la ambicio de la NDEB-estroj kaj pri la juda problemo. Eksigo de la judaj membroj estis rifuzita (se ili montriĝis „honestaj homoj"), ĉar postulo pri apliko de la „arjo-paragrafo" en GEA ankoraŭ ne estis ricevita.[2]

En aprilo 1934, tamen, la konflikto eniris krizan stadion: Dekses lokaj grupoj en Saksio ultimate minacis per eksiĝo, se ne retiriĝos la gvidantaro de GEA kaj validiĝos la arjo-paragrafo.[3] Responde, Behrendt substrekis, ke por la ekzisto de judaj delegitoj de UEA en Germanio ne troviĝas leĝa malhelpo[4], kaj eksigis la ĉefan respondeculon de la ultimato, la estron de la Saksa Ligo, Albrecht Naumann.[5] Naumann, metilerneja instruisto kaj dum multaj jaroj gvidanto de la gazetara servo de GEA, ankoraŭ en Köln estis proponinta Behrendt kiel gvidanton de la asocio. Lia nuna provo forigi Behrendt trovis nur malmultan subtenon inter la membraro de GEA. El la 1 048, kiuj esprimis opinion, nur 22 pledis por tuja enkonduko de la arjoparagrafo[6], kaj en majo, dum la pentekosta jarĉefkunveno de GEA en Würzburg, Behrendt estis unuanime reelektita kiel gvidanto.

Sed ankoraŭ dum la jarĉefkunveno venis nova ultimato: NDEB postulis, ke ambaŭ asocioj kunfandiĝu al „Germana

1. Teksto de la statuto en *Esperanto in Deutschland* 1934, n-ro 1 (sept.).
2. Justus, „Brauchen wir eine ‚Neue' Deutsche E-Bewegung?", *Der Deutsche Esperantist* 31. 1934, p. 2-5.
3. Teksto de la letero, de 8-4-1934, en *Rundschreiben Nr. 2* de la Gvidanto de GEA, 11-4-1934.
4. Samloke.
5. *Deutscher Esperanto-Bund, Gauverband Sachsen* (cirkulero) 1934, n-ro 4 (38), 28 aprilo.
6. „Die Bundesführung im Lichte der Mitgliedermeinung", *Der Deutsche Esperantist* 31. 1934, p. 70.

Esperanto-Fronto", kies estro estu Naumann; se GEA ne cedos, NDEB anoncis „konduki en plej senkompata kaj akra maniero fanatikan batalon kontraŭ la nunaj personecoj, kiuj kiel reakciuloj provas obstini kontraŭ la estiĝo de nacieca spirito interne de la germana esperantistaro".[1] La jarĉefkunveno kvitancis la voĉlegon de la letero de NDEB per „fi"- vokoj kaj ridado, sed la ĵus reelektita Behrendt, estante vundita pro la akuzo esti „reakciulo", nun rezignis kaj deklaris sian demision.[2] Kiel novan gvidanton li proponis la inĝenieron Kurt Walther el Dresden, partianon, kiu nur fine de 1931 estis aliĝinta al GEA.

Transpreninte sian oficon, Walther ne nur omaĝis al sia antaŭulo, sed sin klinis ankaŭ antaŭ Naumann. Jam du semajnojn poste, la 3an de junio, li (por GEA) kaj Willibald Pietsch (por NDEB) subskribis interkonsenton pri kuniĝo de la du organizaĵoj en laborkomunaĵon, kiu fiksis al si kiel celon la kreon de Germana Esperanto-Fronto.[3] En julio Walther postulis de ĉiuj GEA-membroj plenigi enketilon kaj respondi i.a. la demandon, ĉu li/ŝi estas juddevena aŭ ne.[4]

Dum kelka tempo ŝajnis, ke GEA plene adaptiĝis al la linio de NDEB, ke efektive ĉesis la kvereloj. Sed la konkordo ne daŭris longe, ĉar Friedrich Ellersiek, la eldonisto de la organo de GEA, kategorie rifuzis akcepti iajn sciigojn de NDEB en sia revuo. Kiam, krome, berlina grupo kontestis la validon de la decidoj de Würzburg – fakte, Behrendt pro la ĝenerala konfuziĝo ne estis atentinta la ĝustan procedon por inviti al la jarĉefkunveno –, NDEB denove rompis la rilatojn kun GEA kaj ekde septembro 1934 ekaperigis propran informilon.[5] Senkaŝe ĝi alvokis la membrojn de GEA forlasi sian asocion, atakis Ellersiek pro la aperigo de reklamoj pri „kontraŭgermanaj" Esperanto-eldonaĵoj kaj postulis utiligi la lingvon por la patrujo „sur senkondiĉe nacisocialisma bazo". Kvankam apenaŭ pasis monato, kiam GEA ne

1. Letero de 17-5-1934, presita en *Der Deutsche Esperantist* 31. 1934, p. 103.
2. Samloke, p. 104. Naŭ monatojn poste, la 24an de februaro 1935, Behrendt mortis, 58-jara; vd. la nekrologon de F. Ellersiek en *Der Deutsche Esperantist* 32. 1935, p. 49-52.
3. *Der Deutsche Esperantist* 31. 1934, p. 106.
4. Samloke, p. 117.
5. Samloke, p. 134. La informilon, *Esperanto in Deutschland*, redaktis Naumann; ĝi aperis ĝis n-ro 9/10 (majo/jun. 1935).

komplezis al la nazia reĝimo, NDEB konsideris tion nura oportunismo.[1]

Por ne plu liveri al NDEB nutraĵon por atakoj, Walther klopodis ĉiam pli forviŝi la lastajn diferencojn inter GEA kaj NDEB. Li certigis al Pietsch, la estro de NDEB, ke kun lia konsento en GEA okazas nenio, kio ne akordiĝas kun liaj nacisocialismaj principoj.[2] La 6an de januaro 1935 eksterordinara jarĉefkunveno de GEA en Dresden akceptis novan statuton, en kiu kiel celo de la asocio estis difinita, apud la disvastigo de Esperanto, ĝia „utiligo en nacisocialisma senco".[3] Nun definitive elektita kiel gvidanto, Walther petis la kunhelpon de siaj membroj „por disvastigi per Esperanto nian nacisocialisman mondkoncepton en ĉiuj ŝtatoj de la mondo".[4] Kaj, fine, por *„ĉi*urilate kontentigi la postulojn de la tempo", Walther komunikis en septembro 1935: *„Membroj de GEA povas esti nur germanaj samnacianoj!"*[5] Tio signifis, ke judoj devis eksiĝi el la asocio.

La iam neŭtrala kaj tutmonde respektata Germana Esperanto-Asocio elpelis en la nomo de „amo al la nacio" el siaj vicoj la samgentanojn de Zamenhof, la kreinto de Esperanto, kiu iam estis vokinta al siaepokaj ideaj patroj de faŝismo: „Vi, nigraj semantoj de malpaco, parolu nur pri malamo al ĉio, kio ne estas via, parolu pri egoismo, sed neniam uzu la vorton ‚amo', ĉar en via buŝo la sankta vorto ‚amo' malpuriĝas."[6]

2.5. *LA VOJO AL MALPERMESO*

Priskribinte la etapojn de la degenero de la politike neŭtrala GEA al asocio, kiu deklaris sin dediĉita al la nazia ideologio, ni nun, utiligante ankaŭ aktojn de la Sekreta Ŝtata Polico nun kon-

1. *Esperanto in Deutschland* 1934, p. 8.
2. Letero de 30-9-1934, presita en *Der Deutsche Esperantist* 31. 1934, p. 154.
3. Teksto en *Der Deutsche Esperantist* 32. 1935, p. 15-19.
4. Samloke, p. 2.
5. Samloke, p. 130.
6. „Parolado en la Guildhall de Londono" (21-8-1907), PVZ VIII 89.

servatajn en Federacia Arkivo en Koblenz, klopodu rekonstrui la taktikon, kiun sekvis la reĝimo en sia kontraŭesperanta politiko, esplorante samtempe, kiel ĝi reagis je la provoj krei ian simbiozon de Esperanto kaj nacisocialismo.

La unuan gravan oficialan baton kontraŭ la germana Esperanto-movado donis, post la detruo de la laboristaj asocioj, dekreto de la Regna kaj Prusa Ministro pri Scienco, Edukado kaj Popola Klerigo, Bernhard Rust, de la 17a de majo 1935:

> La flegado de artefaritaj mondhelplingvoj kiel la lingvo Esperanto ne havas lokon en la nacisocialisma ŝtato. Ilia uzado kondukas al malfortigo de esencaj valoroj de nacia ecaro. Tial oni evitu ĉian akceladon de instruado de tiaj lingvoj, porinstruaj klasĉambroj ne estu disponigataj por tiu celo.[1]

Kvankam tiu ĉi dekreto, nuligante oficialan permeson pri instruado el la jaro 1924, nur sankciis la jam antaŭe silente ĉesigitan instruadon (ĉiaj radiokursoj de Esperanto estis likviditaj tuj post la potencpreno), ĝi tamen sekvigis vastan reeĥon en la gazetaro, kiu kutime interpretis ĝin kiel malpermeson de Esperanto entute.[2] Responde je memorando, sendita al la registaro antaŭ la dekreto, Walther ricevis la 3an de junio sciigon de la Ministerio de Internaj Aferoj, ke la laboro por Esperanto „ne estos malpermesita, sed ankaŭ ne estos ŝtate subtenata". Informante pri tio la membrojn de la gvidantaro kaj la grupestrojn, Walther petis „urĝe", ke ĉiuj membroj transsendu al li eltirajojn el siaj privataj korespondajoj, kiuj dokumentu, „ke la esperantistoj per sia mondhelplingvo agadis en eksterlando por popolo kaj patrolando".[3]

Sed preskaŭ samtempe, unuafoje venis aŭtoritata opiniesprimo pri la ĝistiamaj provoj de germanaj esperantistoj servigi Esperanton al la nazia ideologio kaj per tio ignori la humanisman estiĝofonon de sia lingvo kaj movado. Tiu opiniesprimo estis klare negativa. En duonoficiala komentario pri la dekreto de

1. *Deutsche Wissenschaft, Erziehung und Volksbildung* 1. 1935, n-ro 10 (20 majo), oficiala parto, p. 228. Laŭ Walther, denuncoj de NDEB kontraŭ GEA kondukis al tiu dekreto: Cirkulero de 23-12-1935.
2. Ekzemple *Heidelberger Neueste Nachrichten*, 11-6-1935; *Die Ostschweiz* (St. Gallen), 17-6-1935 („Esperantoverbot in Deutschland"); kp. la cirkuleron de Walther, de 23-12-1935.
3. Cirkulero de 12-6-1935.

Rust, la ministeria konsilisto Kohlbach donis al la esperantistoj la jenan lecionon:

> Kiel ĉe la plej multaj internaciaj strebadoj, ankaŭ ĉe la Esperanto-movado pelanta impulso estas la deziro je alvenigo de eterna interpopola paco. ... Eĉ se hodiaŭ multaj germanaj esperantistoj distanciĝas de tiaj politikaj fantaziaĵoj ..., tamen la origine pelanta ideo de movado ne estas facile likvidebla. Sed ankoraŭ pli granda ol la danĝero de memtrompo ... estas, ke elementoj, kiuj malakcepte kontraŭstaras al la hodiaŭa ŝtatformo kaj al ĉiu nacia memkonservado, eluzas tian movadon por, ŝirmitaj per ĝi, sekvi siajn malnovajn celojn interne de ĝi kaj sur ĝiaj vojoj.[1]

Tio estis ankoraŭ relative modera eldiro kompare kun la tono, kiun uzis NDEB. En aprilo 1935 ĝi plene malkovris siajn detruemajn tendencojn, atingante gradon de perfido al la tradicio de Esperanto neniam antaŭe spertitan. Ĝi turnis sin kontraŭ „la senlima glorado de d-ro Zamenhof, kiu bedaŭrinde hodiaŭ ankoraŭ estas bonmoda en iuj germanaj Esperanto-rondoj", kaj daŭrigis sian friponecon per la elversŝo, ke „inter la jud-pacifisma celado de la ‚interna ideo' de iu Zamenhof kaj la pacvolo de nia Gvidanto ekzistas rase kondiĉita kaj tial abisme profunda kontrasto".[2]

La situacio de GEA pli kaj pli komplikiĝadis pro la daŭra batalo kontraŭ du frontoj. Ĝian papagan eĥadon de naziaj sloganoj kaj servuteman oportunismon ni devas fakte atribui malpli al specifa naziemo de GEA, ol al alta grado de politika blindeco – sekvo de multjara tradicio ignori la politikajn implicojn de la laboro por Esperanto. Necesas ankaŭ konsideri, ke tiutempe la grandega plimulto de la germana popolo estis blindigita kaj ke multe pli grandaj lumoj, ol Behrendt aŭ Walther, reverencis al la reĝimo per lojalec-deklaroj. Estus maljuste kondamni la tutan membraron de GEA pro infektiĝo per brunaj virusoj. Kiel diris germanaj esperantistoj por sia pravigo post la milito, ili nur alekstere, kunpremante la dentojn, ŝajnigis, „ke la Esperanto-klubo harmonias kun la ‚naciaj konceptoj'", por tiamaniere savi ĝian transvivadon.[3] Kelkaj, ekzemple la eldonisto Ellersiek, frue

1. Kohlbach, „Vom Esperanto", *Deutsche Wissenschaft, Erziehung und Volksbildung* 1. 1935, n-ro 11 (5 jun.), neoficiala parto, p. 106.
2. Brunwald, „Was wird das Ausland dazu sagen?", *Esperanto in Deutschland* 1935, p. 18.
3. Letero de „malnova esperantisto", en *GEJ-Gazeto* 1984, n-ro 3 (majo/jun.), p. 34.

montris la limojn de sia adaptiĝemo aŭ eĉ rekte protestis kontraŭ maljustaĵoj. Post kiam la GEA-grupo en Magdeburg en 1934 enkondukis la arjoparagrafon, ĝi tuj perdis krom sia sola juda membro per libervola eksiĝo proksimume kvaronon de siaj membroj.[1]

Kiom malmulte la sinteno de GEA fontis el sincera konvinko, ankaŭ pruvas la eldiroj de NDEB. Certagrade, la naziisma devio de GEA estas pardonebla pro la konstanta premo kaj kalumniado flanke de NDEB, kiu ne laciĝis kulpigi la gvidantojn de GEA pro ilia nesincera kaj „reakcia" sinteno kaj kiu fine devis ŝaŭme konstati, ke la plej multaj esperantistoj en Germanio tamen plumarŝas, konscie aŭ nekonscie, „sur la malnovaj plattretitaj vojoj de judaj popol-interfratigaj iluzioj".[2] Restas tamen noti la malgloran fakton, ke GEA prezentiĝis ĉiam pli kiel tia „nacieca batalorganizo", en kian dek jaroj pli frue Steche rifuzis ĝin transformi – kun la argumento, interalie, ke tio „komplete kontraŭas la bazajn ideojn de Esperanto".[3]

Walther en 1935 ŝajne ne konsciis la vanon de sia batalo kontraŭ la reĝima malfavoro, unuflanke, kaj la insultoj de NDEB, aliflanke. Akcentante ke GEA pretas kontroli malamikajn Esperanto-presaĵojn el eksterlando, li petis la 23an de junio la Ministerion de Internaj Aferoj „protekti" la asocion kontraŭ kalumniaj artikoloj en la gazetaro pri nepatriota ag- kaj pensmaniero de la germanaj esperantistoj kaj doni deklaron, ke GEA gvidata de partiano „daŭrigas sian laŭstatutan agadon" kaj ke al ĝi rajtas aparteni ankaŭ oficistoj kaj instruistoj.[4] Sed la Ministerio simple rifuzis – „pro principaj konsideroj" – doni tian deklaron[5], tiel ke GEA nun troviĝis en la delikata pozicio, ke ĝi estis

1. Letero de Fritz Rockmann, Magdeburg, al Hans Jakob, de 13-12-1934.
2. Cirkulero al la membroj de NDEB, de 18-8-1935.
3. *Germana Esperantisto* 21. 1924, p. 147.
4. Letero de 23-6-1935; teksto en aldono al cirkulero de Walther al la membroj de GEA, de 23-6-1935.
5. Letero de 2-7-1935, presita en *Der Deutsche Esperantist* 32. 1935, p. 108. – La letero, same kiel tiu de 3-6-1935, estis subskribita de Rudolf Buttmann, kiu en 1928 estis atakinta Esperanton en la Bavara Parlamento. Buttmann ekde 5-5-1933 estris la kulturpolitikan fakon en la Ministerio de Internaj Aferoj. Krome, li estis ekde junio prezidanto de Deutscher Sprachverein kaj en 1935 iĝis ankaŭ gvidanto de novkreita Deutsches Sprachpflegeamt (Germana Lingvoflega Oficejo).

nek malpermesita nek provizita per oficiala konfirmo, ke ĝi agas legale.

Baldaŭ poste ankaŭ NDEB ekkonis la limojn de sia agado: El siaj intertraktoj kun la instancoj, interalie la Ministerio de Propagando, ĝi konkludis, ke „varbado por Esperanto en ligo kun la nacisocialismo ne estas dezirata". Sekve, dum renkontiĝo en Leipzig, la 18an de aŭgusto, ĝi decidis dissolvi siajn lokajn grupojn, ĉesigi varbadon por Esperanto en Germanio kaj limigi sin nur al „praktika uzo" de la lingvo por la propagando de naziismo en eksterlando; samtempe ĝi minacis al GEA drastajn konsekvencojn, se ne ankaŭ tiu rezignos pri enlanda varbado.[1]

Nek GEA nek NDEB povis scii, ke en somero 1935 la politika polico jam insistis ĉe la ministerioj pri dissolvo de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj. La 26an de junio Reinhard Heydrich, la anstataŭanto de *Der Politische Polizeikommandeur der Länder*, Heinrich Himmler, atentigis la Ministerion de Internaj Aferoj, ke „lastatempe la Esperanto-movado disvolvas tre viglan aktivadon"; kiel ekzemplon li menciis, ke inter 36 personoj, arestitaj en marto 1935 en Düsseldorf pro ŝtat-perfido, troviĝis ne malpli ol 29 esperantistoj.[2] Ĉar „granda parto de la membroj de la Esperanto-unuiĝoj estas suspektataj pro kontraŭŝtata aktivado" kaj ĉar aliflanke ne eblas grandskale kontroli la korespondadon, Heydrich rekomendis dissolvi kaj malpermesi ĉiujn unuiĝojn kaj konfiski ilian havaĵon.[3]

Dum la Ministerio pri Scienco, Edukado kaj Popola Klerigo

1. Cirkulero al la membroj de NDEB, de 18-8-1935. La gvidadon de NDEB transprenis Albrecht Naumann, ĉar lia antaŭulo Willibald Pietsch kiel estinta framasono ne povis iĝi partiano.
2. Unu el la arestitoj, Matthias Trauden, deklaris al Gestapo, ke NDEB estas „la sola komunisma organizaĵo de Germanio, kiu laboras legale", kaj ke sub la ŝirmo de gvidantaro konsistanta el partianoj „oni povas sen-ĝene labori". NDEB, kiu eksigis Trauden post lia arestiĝo, konfesis, ke ĝi havis malfacilaĵojn pro „iamaj laboristaj esperantistoj" en siaj vicoj, sed certigis, ke pro ĝia „konstanta kontakto" kun Gestapo ne necesas zorgi tiurilate: Bundesarchiv Koblenz, R 58/378; kp. *Esperanto in Deutschland* 1935, p. 25. – Por pliaj detaloj pri la enfiltriĝo de NDEB per komunistoj vd. la sekretan cirkuleron de Preußische Geheime Staatspolizei, Der stellv. Chef und Inspekteur, al la Ministerio de Internaj Aferoj, la Ministerio de Propagando, la regna estraro de NSDAP kaj la Sekureca Ĉefoficejo, de 13-11-1935: Bundesarchiv Koblenz, R 58/389.
3. Bundesarchiv Koblenz, R 58/378.

apogis la proponon de Heydrich[1], ĝuste la Ministerio de Propagando, estrata de Joseph Goebbels, havis skrupulojn kontraŭ rekta malpermeso en tiu stadio. Per letero de la 23a de oktobro ĝi esprimis zorgojn pro la internacia reago, kiun havus tia paŝo:

> Inter la milionoj da adeptoj de Esperanto en eksterlando certe troviĝas tre granda nombro, kiu estas nepolitika kaj vidas nur la idean flankon de la strebadoj de Esperanto. Pro agado iliaopinie tute sendanĝera, kia ja estas la lernado de nova lingvo, ĉiuj ĉi homoj ricevos la impreson, ke en Germanio eĉ tiaj asocioj estas persekutataj. Tiun opinion kompreneble montros sennombraj pamfletoj, kiujn la Esperanto-unuiĝoj disvastigas en la tuta mondo. Ankaŭ la eksterlanda gazetaro utiligos tiun okazon por propagandi kontraŭ Germanio.

Tial, rekomendis la Ministerio, Esperanto-asociojn gvidatajn de partianoj ne trafu oficiala malpermeso, sed oni klopodu pri ilia – „per iom da premo facile atingebla" – libervola dissolviĝo.[2]

La 21an de januaro 1936, Heydrich komunikis tiun opinion de la Ministerio de Propagando al Rudolf Heß, la anstataŭanto de la *Führer*. En sia letero li ripetis, ke en la ĵus pasinta jaro la Esperanto-movado vigle aktivis: en Münster 44 membroj de komunista grupo estis arestitaj, kaj en Bottrop la loka grupo de GEA estis dissolvita pro la distribuo de flugfolioj fare de antaŭaj GLEA-membroj. Heydrich skribis, ke pri dissolvo de Esperanto-organizaĵoj „nuntempe ankoraŭ ne estas intenco", sed li direktis al Heß la peton, ke estu eldonita partia ordono kontraŭ membreco de partianoj en tiuj organizaĵoj. Samtempe li petis la ministerion de Goebbels „propagandi en taŭga formo" kontraŭ GEA.[3]

Efektive jam ekde la fino de 1935 en la nazia gazetaro estis rimarkebla kontraŭesperanta kampanjo, kies akreco multe superis la tonon de antaŭaj atakoj. En novembro, *Der Weltkampf*, revuo fondita de la nazia ĉefideologo Alfred Rosenberg kaj plene dediĉita al batalo kontraŭ judoj, nomis Esperanton „aliancano de la tutmonda judaro". Preter ĉiuj absurdaĵoj, la revuo malkaŝis, kiel oni prijuĝis la porreĝiman servemon de GEA – nome, rekte inverse al la imagoj de ties gvidantoj:

---

1. Letero de 20-9-1935, samloke.
2. Samloke. En 1940, Heydrich notis, ke post la dissolvo la eksterlanda gazetaro ne enmiksiĝis „escepte de unusola kazo": Akta noto de 8-6-1940, Bundesarchiv Koblenz, R 58/384.
3. Letero de Geheimes Staatspolizeiamt al Stellvertreter des Führers, de 21-1-1936, Bundesarchiv Koblenz, R 58/378.

... oni dezirus opinii, ke la germanaj esperantistoj nun fine devus ekprudentiĝi kaj kompreni la frenezon de sia intenco gajni ĉe judoj kaj jud-kunuloj komprenon por la Nova Germanio.[1]

Komence de 1936 la atakoj tiom oftiĝis kaj intensiĝis, ke devis ekesti la impreso pri koordinita agado celanta sisteme prepari la likvidon de la movado. Sian ĉefan atenton la gazetoj dediĉis al la uzado de la lingvo en nacisocialisma senco, kiun ili kondamnis senrezerve. Sub la titolo „Informado sub la soveta stelo" la organo de la nazia studenta unuiĝo skribis, ke ĝin mirigas la fakto, „ke la Germana Esperanto-Asocio estas tiel naiva kredi, ke ĝi *per* sia *internaciisma artefarita lingvo* povas ĉe la judmarksisme influitaj laboristoj de fremdaj ŝtatoj *propagandi por nacieca ideo*, kia estas la nacisocialismo".[2] Ĝuste de nazia flanko, do, GEA devis lerni, ke ĝi kondutis naive kaj ne komprenis la malakordigeblon de naziismo kaj Esperanto. La disreviĝo ne povis esti pli kruela.

La atakoj cetere demonstris intiman konon de la Esperanto-movado. La semajna gazeto *Fridericus*, kiu tutpaĝe tamburis kontraŭ „Esperanto, monda danĝero", atentigis, ke *Heroldo de Esperanto* preparas sian translokiĝon de Köln al Nederlando kaj ke ankaŭ eksterlandaj esperantistoj tion postulas.[3] La aludo ilustras la delikatajn implicojn, kiujn entenis la pluaperado de tiu populara Esperanto-gazeto en hitlera Germanio. Jam en 1933, antaŭ la Universala Kongreso en Köln, *Heroldo* ricevis kaj protestojn el eksterlando pro artikoloj pentrantaj tro favoran bildon de la evoluo en la unuaj monatoj sub la nazia regado[4] kaj anonimajn poŝtkartojn de „grupo de germane sentantaj esperantistoj" en Leipzig, postulanta „tujan adaptiĝon al la nova epoko" kaj ĉesigon de la reklamado por libroj de Erich Maria Remarque.[5]

1. Theodor Koch, „Esperanto, ein Bundesgenosse des Weltjudentums", *Der Weltkampf* 12. 1935, p. 327. – La aŭtoro skribis artikolon kontraŭ Esperanto ankaŭ en la antisemita periodaĵo *Judenkenner* (n-ro 27, 21-8-1935) kaj krome provizis Gestapon per informoj pri la movado (Bundesarchiv Koblenz, R 58/593/2, R 58/378, R 58/384).
2. *Die Bewegung* (Zentralorgan des Nationalsozialistischen Deutschen Studentenbundes) 1936, n-ro 2 (8 jan.).
3. *Fridericus* (Berlin) 19. 1936, n-ro 4 (jan.), p. 2.
4. *Heroldo de Esperanto* 14. 1933, n-ro 14 (719), p. 1; n-ro 15 (720), p. 2; n-ro 17 (722), p. 3.
5. Tri poŝtkartoj de 28-5, 3-6 kaj 20-6-1933 (disponigitaj al la aŭtoro de Teo Jung).

En oktobro 1934 la eldonisto kaj ĉefredaktoro Teo Jung maldungis ses kunlaborantojn; fine de la sama jaro li fondis duan ĉefsidejon en Rotterdam, kien li intencis eskapi, se restos la financaj malfacilaĵoj. En septembro 1935 li grandlitere anoncis: „Heroldo venkis la krizon! Nun ni povas komenci novan konstruan laboron".[1] Du monatojn poste tamen li devis legi en *Pola Esperantisto* ultimatan postulon, ke aŭ *Heroldo* kiel eble plej baldaŭ translokiĝu en alian landon „aŭ la tutmonda esperantistaro solidare ĉesos aboni kaj subteni tiun ĉi ĵurnalon, kies aperado en la moderna Germanujo estas granda paradokso".[2] Jung, kiu nomis tion „pereiga taktiko"[3], preparis sin je la definitiva translokiĝo, kiu estis antaŭvidita por aŭtuno 1936.[4] Sed la nazia premo, precipe la atako en *Fridericus*, plirapidigis la elmigran procedon. En julio 1936, kiam GEA devis dissolviĝi, Jung estis vokita, ne la unuan fojon, al Gestapo por aŭskulti la deklaron, ke lia entrepreno estas „nedezirata".[5] Abrupte li devis ĉesigi la eldonadon de *Heroldo* en Köln.[6]

Jam fine de 1935 estis ĉesinta aperi la organo de GEA, ĉar ĝia eldonisto Friedrich Ellersiek rezignaciis pro financaj malfacilaĵoj kaj pro la senĉesaj atakoj, kiujn NDEB kun aparta prefero estis direktinta kontraŭ lia „negermana sinteno"; laŭ la policaj aktoj, unu el la gvidantoj de NDEB lin plurfoje, ekde oktobro 1934, denuncis ĉe Gestapo.[7]

En la lasta numero de la organo Kurt Walther ankoraŭ esperplene citis komunikon de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj: „Ĉiu germano povas, se li volas, lerni Esperanton!"[8] Sed, meze de preparlaboroj por la 25a Germana Esperanto-Kongreso en

1. *Heroldo de Esperanto* 16. 1935, n-ro 37 (846), p. 1.
2. Isaj Dratwer, „Pri ‚Heroldo de Esperanto'", *Pola Esperantisto* 29. 1935, p.141.
3. *Heroldo de Esperanto* 16. 1935, n-ro 46 (855), p. 1; kp. Jung, *Ĉiu*, p. 260-261.
4. Laŭ persona komuniko de Teo Jung, de 7-5-1970, liaj intertraktoj pri translokiĝo „okazis tute nedepende de kiu ajn ‚ultimato'".
5. Persona komuniko de Teo Jung, de 29-5-1969; Bundesarchiv, R 58/593/2; Jung, *Ĉiu*, p. 266.
6. Jung rekomencis la aperigadon de sia gazeto en Scheveningen ekde oktobro 1936, post grandaj materiaj perdoj.
7. Bundesarchiv, R 58/593/2.
8. Letero de la Ministerio al esperantistoj en Katowice, de 13-9-1935; cit. *Der Deutsche Esperantist* 32. 1935, p. 162.

Weimar, venis la dekreto, postulita de Heydrich. Subskribis ĝin, kun dato de la 18a de februaro 1936, Martin Bormann, stabestro de la anstataŭanto de la *Führer*:

> Ĉar la kreo de internacia mikslingvo kontraŭas al la bazaj konceptoj de la nacisocialismo kaj finfine povas respondi nur al la intereso de superŝtataj potencoj, la anstataŭanto de la *Führer* malpermesas al ĉiuj partianoj kaj membroj de la organizoj filiigitaj al la partio apartenon al ĉiuspecaj unuiĝoj de artefarita lingvo.[1]

Ĉar NDEB estis gvidata de partianoj kaj kredeble granda nombro de ĝiaj membroj[2] same apartenis al la Partio, ĝi praktike finis per tiu ĉi dekreto sian malhonorindan ekziston. Jam fine de 1935 Walther rimarkis, ke NDEB apenaŭ plu montras signojn de aktivado, verŝajne ĉar la aŭtoritatoj komprenigis al ĝi, ke ĝuste la propagando per Esperanto por nacisocialismo, kiun ĝi laste difinis kiel solan celon de sia agado, estas maldecaĵo.[3] Willibald Pietsch, la antaŭa gvidanto de NDEB, ĝis la fino de la Tria Regno troviĝis sub konstanta observo de Gestapo.[4]

Ankaŭ GEA frontis la demandon ĉu entute daŭrigi la agadon aŭ dissolvi la asocion, ĉar pro la dekreto de Bormann ne nur Walther, sed multaj membroj devis eksiĝi. Kiel planite, ankoraŭ okazis fine de majo 1936 la kongreso en Weimar; je tiu okazo aperis varbbroŝuro pri Esperanto, en kiu mankis ĉia informo pri la estiĝo de la lingvo aŭ pri la aŭtoreco de iu Zamenhof.[5] Unuanime la delegitoj decidis daŭrigi la agadon, akceptis novan statuton (la kvaran dum tri jaroj) kaj elektis la dresdenan komerciston Fritz Thieme nova gvidanto.[6]

Sed la nova estraro apenaŭ povis ĝui paŭzon por ekspiri, ĉar intertempe la reĝimo faligis la lastajn skrupulojn. La 26an de aprilo du nederlandaj esperantistoj, kiuj en Düsseldorf havis

1. Dekreto n-ro 29/36, en *Zusammenstellung aller bis zum 31. März 1937 erlassenen und noch gültigen Anordnungen des Stellvertreters des Führers*, München 1937, p. 262.
2. Meze de januaro 1935 NDEB pretendis havi 350 membrojn, komence de aprilo 500: Leteroj de Wolf Zickler (komisiito de NDEB por eksterlando kaj UEA), Berlino, al Robert Kreuz (direktoro de UEA), Ĝenevo, de 3-2-1935 kaj 6-4-1935, en la arkivo de UEA.
3. Cirkulero de Walther, de 23-12-1935.
4. Intervjuo kun Willibald Pietsch, Hamburgo, 14-5-1967.
5. *Warum Esperanto? Warum Deutscher Esperanto-Bund?* Dresden 1936.
6. Deutscher Esperanto-Bund e.V., *Bundesnachrichten* 1936, n-ro 5 (junio/julio).

kunvenon kun germanaj samlingvanoj, estis arestitaj de Gestapo; post kvartaga pridemandado ili estis kondukitaj al la landlimo.[1] La daton de la 24a de aprilo portas interna dekreto de la politika polico, kiu lasas al la bontrovo de lokaj policejoj dissolvi grupojn, kies membroj agas kontraŭŝtate. Ni legas en ĝi ankaŭ: „Pro ŝtatpolitikaj kialoj ĝenerala malpermeso de la Esperanto-unuiĝoj nuntempe ne estas intencata." Kiel asertis Heydrich en 1940, post tio daŭris la nekontrolebla nelaŭleĝa aktivado de membroj de Esperanto-asocioj, tiel ke necesis meti finon al la organizita movado entute. La mortiga bato venis la 20an de junio: Dekreto de Heinrich Himmler, ĵus kuniginta la oficojn de policestro kaj de gvidanto de SS, malpermesis la agadon por la internaciaj organizaĵoj UEA kaj SAT[2] kaj postulis de la enlandaj asocioj, unuavice de GEA[3], mem likvidi sin ĝis la 15a de julio, se ili volas eviti devigan dissolvon. Post tiu dato ĉia aktivado por organizaĵo de artefarita lingvo estis malpermesita.[4]

Tiun postulon Thieme sciigis al la grupoj kaj individuaj membroj per cirkulero de la 4a de julio.[5] Tridek jarojn kaj preskaŭ du monatojn post sia fondiĝo Germana Esperanto-Asocio ĉesis ekzisti.[6]

2.6. *ESPERANTO – ĈU NURA LINGVO?*

Kian instruon, do, liveras studo de la aktoj de la sekreta ŝtata

1. J.M. van Meegeren, „La ‚malliberiga stelo'", *La Praktiko* 5. 1936, n-ro 6 (54), p. 5.
2. Same, la „Occidental-Union" en Svislando.
3. Krome, NDEB, la Esperanto-klubo „Amika Rondo" en Berlino kaj Komercista Esperanto-Unio en Radebeul. Germana Ido-Federuro estis tuj malpermesita.
4. Bundesarchiv, R 58/384. Vd. ankaŭ la cirkuleron de Bayerische Politische Polizei, de 8-7-1936 (kopio disponigita de Institut für Zeitgeschichte, Munkeno).
5. La teksto de la dekreto Thieme povis legi, sed ne rajtis ricevi por konigo al la membroj: Cirkulero de Thieme, de 12-7-1936. Formale juraj kialoj prokrastis la dissolviĝon de GEA, kiu perdis sian „rajtkapablecon" la 31an de majo 1937: Bundesarchiv, R 58/384, R 58/388. Komercista Esperanto-Unio povis, sub la nomo „Komerca Unio", dum iom da tempo pluagadi. Esperanto-Instituto por la Germana Regno fermis sian oficejon en Leipzig la 31an de decembro 1936.
6. Post la milito, GEA estis refondita (12-4-1947).

polico? Unuarigarde, oni povas konkludi, ke GEA estis malpermesita, ĉar malgraŭ sia adaptiĝo ĝi restis penetrita per kontraŭreĝimaj elementoj.

Ne estas dubo, ke dum la tuta daŭro de la Tria Regno okazis kontraŭfaŝisma rezistado de esperantistoj, precipe laboristaj. Grandparte malaperis, pro la komuna malamiko, la kontraŭeco inter GLEA kaj SEA[1], sed plej aktivaj en la organizado de rezistado helpe de Esperanto montriĝis la komunistoj.[2] Dum la unuaj jaroj de la nazia reĝimo, membroj de GLEA okazigis konspirajn kursojn[3] kaj disvastigis inter siaj eksterlandaj kamaradoj informojn pri la situacio en Germanio, kiuj kelkfoje estis kaŝitaj sub la eksteraĵo de reklamilo, ekzemple por la kremo NIVEA.[4] Inverse, tradukoj el la eksterlanda laborista Esperanto-gazetaro servis kiel instrumaterialo en nelaŭleĝaj kontraŭnaziaj ĉeloj. Ankaŭ la revuoj de SAT de 1933 ĝis 1935 estis plenaj de aŭtentikaj raportoj de germanaj kamaradoj pri la nazia teroro; ŝajnas cetere, ke tiuj ĝenerale pentris pli realecan bildon de la situacio[5], ol la komunistaj PEK-bultenoj.[6] Laboristaj esperantistoj ne nur konservis inter si kontakton per sekretaj renkontiĝoj en privataj loĝejoj, eĉ en banejoj kaj arbaroj[7], sed ankaŭ disponigis sin por kurieraj servoj, transportante ilegalan literaturon de Ĉeĥoslovakio al Saksio[8] aŭ de Ruhr-regiono al Nederlando[9]; en Hamburgo maristoj kontrabandis al lokaj esperantistoj kontraŭnaziajn bro-

1. -ulo (= Hermann Wagner), „Pri la situacio en Germanio", *Sennacieca Revuo*, nova serio 2. 1934/35, p. 102.
2. *Protokolaro pri la XIV-a Kongreso de SAT en Valencio*, 1934, p. 5.
3. *Sur Posteno* 1934, n-ro 25 (161), p. 90; 1935, n-ro 1 (169), p. 1.
4. L. Schödl, „NIVEA", *Der Esperantist* 7. 1971, n-ro 50, p. 6-8.
5. Ekzemple, ili neis, ke laboristoj en Germanio heroe batalas kontraŭ la faŝismo, kaj nomis malprava la komunistan propagandon pri nelonga vivipovo de la reĝimo: *Sennacieca Revuo* n.s. 1. 1933/34, p. 51-53.
6. W.G. Keable parolis pri ilia „grandiozemo, erara ‚altpolitikemo'": *Sur Posteno* 1933, n-ro 8 (145), p. 61.
7. *Protokolaro ... Valencio*, p. 6.
8. Willi Glier k.a., *Zur Geschichte der Arbeiter-Esperanto-Bewegung im Bezirk Erzgebirge-Vogtland (1907-1933)*, Karl-Marx-Stadt 1976, p. 32-33.
9. Karl Schabrod, *Widerstand an Rhein und Ruhr 1933-1945*, Düsseldorf 1969, p. 40. La gvidanto de la laborista Esperanto-grupo, kiu faris tiujn kurierajn servojn, estis Alois H. el Duisburg, poste kondamnita al dumviva karcero.

ŝurojn.[1] Esperanto helpis ankaŭ por ebligi al politikaj persekutatoj la fuĝon al eksterlando. Multaj laboristaj esperantistoj tamen iĝis viktimoj de la reĝimo: Longa estas la listo de tiuj, kiuj, parte dum pluraj jaroj, suferis en malliberejoj kaj koncentrejoj. En la koncentrejo Hohenstein la instruisto Schubert pro troaj torturoj mortigis sin[2], kaj Theodor Stöterau, la fondinto de laborista Esperanto-grupo en Bremerhaven, el la kvina etaĝo de la tribunalo, kiu kondamnis lin al sesjara malliberecо, ĵetis sin al morto.[3] Tre aktiva komunista esperantisto en Frankfurto apud Majno, Herbert Haupt, arestita jam en 1933, estis mortpafita verŝajne en kelo.[4] Murditaj estis ankaŭ Willi Fründt el Grabow kaj la sarlanda komunisto Willi Herrmann.

Ankaŭ en koncentrejo laboristoj plue instruis Esperanton, se tio eblis, kvankam ŝajnas, ke tiaj kursoj pli kaj pli servis ĉefe kiel kaŝa forumo por politikaj diskutoj.[5] Entute, kun la paso de la jaroj la eblecoj labori por la disvastigo de Esperanto reduktiĝis al minimumo. Ekzemple, el berlina grupo de GLEA evoluis antifaŝisma rezista grupo, kiu sukcesis transvivi ĝis 1944; ĝian kernon formis esperantistoj, sed iom post iom aliĝis al ĝi por konspira laboro kontraŭ la reĝimo ĉiam pli da novaj homoj, kiuj ne povis utiligi Esperanton kaj eĉ ne sciis ĝin.[6]

Kiom la rezistado de laboristaj esperantistoj tuŝis GEA? Kiel entute ili rilatis al la „neŭtraluloj" sub la kondiĉoj de faŝismo? La SAT-anoj estis en junio 1933 rememorigitaj de sia gvidanto Lanti pri konsilo jam donita en aŭgusto 1929 al membroj en landoj, kie SAT estis malpermesita: Lanti konsilis, ke „kie niaj anoj ne povas kolektiĝi sub nian ruĝan flagon, tie ili devas ŝirmi sin per la nure verda; ili devas partopreni la neŭtralan, burĝan, eĉ faŝistan

1. H. Theobald, *Dokumentoj de la rezistado*, Hamburg 1948, p. 59.
2. El referaĵo de H. Fuchs, *Der Esperantist* 5. 1969, n-ro 28/29, p. 30.
3. Persona komuniko de Robert Stoffers, Cassis, de 15-11-1970. Stöterau estis arestita kune kun siaj grupanoj. Lian nomon hodiaŭ portas strato en Bremerhaven.
4. Intervjuo kun Kurt Nissen, julio 1977.
5. Wolfgang Langhoff, *Die Moorsoldaten. 13 Monate Konzentrationslager*, München 1946, p. 225. – Temas pri travivaĵoj en la koncentrejo Börgermoor apud Papenburg en 1933/34.
6. Diethelm Becker, *Der Arbeiter-Esperanto-Bund auf dem Weg zu einer revolutionären Organisation des deutschen Proletariats*. Diploma tezo, Universitato de Rostock, 1968, p. 47-48.

esperantan movadon".[1] Kvankam Lanti celis unuavice la kondiĉojn de agado en landoj de „blanka teroro", kiuj – malsame kiel hitlera Germanio – ne estis principe malamikaj al la neŭtrala Esperanto-movado, parto de la germanaj SAT-anoj certe sekvis lian konsilon kaj aliĝis al GEA „por havi kontakton kaj ne perdi nian lingvoscion".[2] Sed kontraŭ grandskala infiltriĝo de GEA per socialistoj kaj komunistoj parolas ĉefe la jenaj faktoj: Unue, GEA mem pro singardemo apenaŭ emis toleri amasan aliĝadon de personoj pli frue konataj kiel anoj de laborista organizaĵo; due, tiuj, kiuj sekvis la alvokon de Lanti, estis admonataj de SAT ne agi politike en la kadro de la neŭtrala asocio; trie, inter la SAT-anoj leviĝis ankaŭ la kritiko, ke Lanti „forgesis, ke la esp. movado en Germanio ne plu estas ‚neŭtrala', sed faŝisma", kaj ke al tia movado „aliĝo nia ne eblas".[3] Decidaj rezistantoj do ne povis konsideri GEA taŭga forumo por sia agado.

Kontraŭ konkludo, ke GEA estis malpermesita, ĉar ĝi ne sukcesis liberigi sin de membroj malamikaj al la reĝimo, sin altrudas ankoraŭ alia konsidero, nome ke Heydrich intence trogravigis la ekziston de marksistaj elementoj en la germana Esperanto-movado, ĉar tiamaniere li esperis pli rapide atingi sian bazan celon, al kiu la konservativa burokratio (kaj, ŝajne, eĉ la Ministerio de Propagando) ankoraŭ malinklinis: komplete frakasi la tutan Esperanto-movadon. Heydrich, kiun obsedis la imago pri kontraŭgermana konspiro de la tutmonda judaro, estis per siaj agentoj sendube bone informita pri la interna strukturo de GEA kaj pri la mentaleco de ĝiaj plejparte nepolitikemaj membroj. Ĉu agis en ĝi pli-malpli granda nombro de marksistoj aŭ ne, tio apenaŭ povis esence influi lian bazan konvinkon, ke Esperanto estas eltrovaĵo de judo, subtenata de judoj kaj sekve ekstermenda. Por li ĉiuj aktivaj esperantistoj kvazaŭ nature estis malamikoj de la ŝtato, ĉar nur tiaj povas interesiĝi, kiel li skribis en junio 1935, „pri la propagando, tute superflua kaj el nacieca vidpunkto akre rifuzenda, de universala lingvo por la homoj de ĉiuj popoloj kaj

1. E.L., „Inter ni", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 534. Represita sub la titolo „Vivu la neŭtralismo!" en *Vortoj de Kamarado E. Lanti*, Leipzig 1931 (represo Laroque Timbaut 1979), p. 73-74; kaj en *Sennaciulo* 9. 1932/33, p. 93-94.
2. *Protokolaro ... Valencio*, p. 6.
3. *Protokolaro pri la XIII-a SAT-Kongreso en Stokholmo*, 1933, p. 8.

rasoj".[1] La insistadon de Heydrich pri detruo de la Esperanto-movado oni povas konsideri cetere konsistiga ero en lukto por plifortigita pozicio de Gestapo kaj SS en la ŝtato: Sian celon Himmler kaj Heydrich atingis, la 17an de junio 1936, per la starigo de la institucio *Reichsführer SS und Chef der Deutschen Polizei*.[2] Tri tagojn poste estis dekretita la definitiva malapero de GEA.

Ke Heydrich celis ekstermi Esperanton mem, ne nur malebligi ĝian utiligon por politikaj strebadoj ne konformaj al la naziismo, plej klare vidiĝas el interna raporto de dekunu tajpitaj paĝoj de la 8a de junio 1940, kompilita de *Reichssicherheitshauptamt* (Regna Ĉefoficejo por Sekureco, ekde oktobro 1939 la centro de Sekureca Polico kaj Sekureca Servo), kiu resumas la ideologian pozicion de la nazioj en rilato kun Esperanto. Enkonduke, oni legas pri la estiĝo de Esperanto la jenon:

> El cionisma movado (Ĥaveve Cion[3]) devenas la pola judo *Zamenhof*, siatempe okulkuracisto en Varsovio. Li strebis realigi la judan mondregnon laŭ la profeta eldiro de Jesaja 2, 2-4, do pacregnon sub juda gvidado.[4] Ĉiuj popoloj estis libervole submetiĝontaj al la judaro. Tiu celo estis atingota per „paca" trapenetrado kaj malkomponado de la mastraj popoloj. Kiel rimedoj servis al Zamenhof senbrida pacifismo, nova religio iniciatita de li, homaranismo, kiel antaŭŝtupo al juda religio kaj la universala lingvo „Esperanto" inventita de li, kiu pere de sama legaĵo por la homoj de ĉiuj popoloj, koloroj kaj klimatoj, pere de samaj eduko, idealoj, konvinkoj kaj celadoj iom post iom estis kondukonta al ĝenerala kaĉo de popoloj.
>
> Ĉiuj tri celadoj kune, ne nur la propagando por universala lingvo, konsistigas la esperantismon, kiu de post ĉ. 1905 ludas la rolon de helpa armilo de la judaro.
>
> Kiel specialaj rimedoj estis antaŭvidataj i.a.: Internacia gazetaro, unue parte, poste tute en Esperanto; internacia literaturo; internacia laborperado kaj loĝlibereco.

1. Letero de Der Politische Polizeikommandeur der Länder al Ministro de Internaj Aferoj, de 26-6-1935, Bundesarchiv Koblenz, R 58/378.
2. Per tio la germana polico estis centrigita, sed samtempe, per sia kunfando kun la partia SS, kvazaŭ eksterŝtatigita: Hans Buchheim, *Anatomie des SS-Staates*. Band I: *Die SS – das Herrschaftsinstrument. Befehl und Gehorsam*, Olten, Freiburg i. Br. 1965, p. 47 k. sekv., 55. Vd. ankaŭ Shlomo Aronson, *Reinhard Heydrich und die Frühgeschichte von Gestapo und SD*, Stuttgart 1971.
3. Misskribo de „Ĥovevej Cion" (Hovevei Zion, Amikoj de Ciono).
4. Aludo al la profetaĵo de Jesaja pri estonta regno de eterna paco: „Kaj Li juĝos inter la nacioj, kaj Li decidos pri multaj popoloj; kaj ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon." Vd. *La Sankta Biblio*, Londono, Edinburgo 1972, „La Malnova Testamento" (trad. Zamenhof), p. 577.

Daŭrigante, la dokumento analizas tra naziaj okulvitroj la evoluon de Esperanto en la Respubliko de Weimar.

> Ĝuste en la epoko post 1918 la esperantismo povis tre bone enradikiĝi en Germanio. La maldekstraj partioj kaj rondoj utiligis la artefaritan lingvon „Esperanto". La gvidado de preskaŭ ĉiuj Esperanto-asocioj troviĝis en la manoj de judoj kaj framasonoj. La sistem-epokaj registaroj tre akcelis tiun lingvon, ĉar ĝi tre propagandis en sia literaturo la ideojn de marksismo kaj komunismo, estante bonega internacia organo de la mondinterfratiga ideo de tiuj mondkonceptoj, kiujn utiligis la judo por la atingo de sia celo – mondregado.

Post tio, apenaŭ mirigas, ke eĉ la adaptiĝema GEA ne trovis indulgon. Eĉ se malmultaj naciemaj homoj volis akceli kaj disvastigi Esperanton „en senco utila al la ŝtato" – daŭrigas la dokumento – la spertoj montris, ke tio estas „tute erara kredo". Malgraŭ la samdirektiĝo, eĉ politike fidindaj gvidantoj de Esperanto-organizaĵoj ne povis malhelpi agadon en iliaj vicoj malamikan al la ŝtato, ĉar granda parto de la membraro devenas el la laboristaro, kiu ne sciis profesie uzi la lingvon, „sed utiligis ĝin por sia ilegala politika agado". Tia politika influo al la germanaj esperantistoj estas atribuata ankaŭ al Universala Esperanto-Asocio, kvankam la dokumento – relative korekte – difinas ĝin „internacia unuiĝo de burĝ-liberalisma karaktero por neŭtrala apliko de Esperanto sur la kampo de turismo ktp."[1]

Ne konante tiun ĉi dokumenton, oni eble povas sin demandi, ĉu ne tamen la nazioj pretis toleri Esperanton kiel lingvon. Fritz Thieme, la lasta gvidanto de GEA, en julio 1936 informis al la membroj, ke la dekreto de Himmler ne turnas sin „kontraŭ la apliko" de Esperanto „en la buŝa kaj skriba interŝanĝo de pensoj kun fremdlingvaj homoj"[2] kaj ke „Esperanto mem ne estas malpermesita en Germanio".[3] Ankaŭ Heydrich notis sub la dato de 27a de aŭgusto 1936: „La uzo de Esperanto en privata korespondado ne estas kontraŭstarebla, kondiĉe ke tio ne okazas kun kontraŭŝtata intenco aŭ por akceli la kuniĝon de la esperantistoj."[4] En la posta jaro Gestapo konfirmis, ke „malpermeso de la apliko de Esperanto ĝis nun ne okazis kaj kredeble ankaŭ ne okazos".[5]

1. Bundesarchiv Koblenz, R 58/384.
2. Cirkulero de Thieme, de 12-7-1936.
3. Cirkulero de Thieme, de 21-7-1936.
4. Bundesarchiv Koblenz, R 58/384.
5. Geheime Staatspolizei Berlin, 1-7-1937, Bundesarchiv Koblenz, R 58/387.

Efektive, post la dissolvo de GEA multaj esperantistoj – tiuj, kiuj ne timis persekuton pro politika aktivado – daŭrigis sian privatan okupiĝon pri la lingvo, korespondante kun eksterlandaj geamikoj kaj abonante neŭtralajn revuojn. Internacia Esperanto-Ligo konservis pere de *Heroldo de Esperanto* kontaktojn kun centoj da germanoj[1], la organo de UEA jen alvenis, jen malaperis[2], dum nur malmultaj ekzempleroj de la SAT-gazetoj penetris Germanion, kie ili iris de mano al mano.[3] La permeso private uzi Esperanton tamen ofte havis nur surpaperan valoron: ĝi nek iĝis vaste konata nek malhelpis individuajn ĉikanojn flanke de lokaj gestapanoj. Tial ni scias, unuflanke, pri esperantistoj, kiuj neniam renkontis malhelpojn, kaj eĉ pri kelkaj germanoj, fuĝintaj dum la milito al Svislando, kiuj estis kaŝe lernintaj Esperanton.[4] Aliaj kontraŭe estis vokitaj al la polico pro abonado al eksterlandaj Esperanto-revuoj, ricevis skriban ordonon „deteni sin de ĉia agado por la Esperanto-lingvo"[5] aŭ post partopreno en neformala kunveno, kie Esperanto estis parolata, estis minacataj per puno.[6] Foje antverpena esperantisto ricevis rekomendon de la germana ambasadoro en Belgio, ke li ĉesigu la Esperantan korespondadon kun sia germana amiko[7], kaj kiam la ĉina Esperanto-revuo *Voĉoj el Oriento* enpresis la nomojn de du aŭstraj mondonacintoj, Gestapo ne preterlasis interesiĝi pri ilia identeco.[8]

Kiam la 3an de junio 1939 la oficejo de Reichsführer SS notis, ke „disvastigo de Esperanto en Germanio estas malpermesita"[9], ĝi konfirmis la faktan staton. Kaj se ankoraŭ restas duboj, ĉu ne post la disbato de la organizaĵoj la nazioj komencis esti cedemaj pri Esperanto kiel nura ŝatokupo, la menciita dokumento de 1940 instruas al ni la kontraŭon:

1. *Esperanto Internacia* 4. 1940, p. 35.
2. *Esperanto* 33. 1937, p. 80 („sendata al trideko da amikoj").
3. „Kvin jaroj da Hitlera reĝimo", *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 31.
4. E. Malmgren, „Novjara saluto...", *Esperanto* 41. 1948, p. 1.
5. Geheime Staatspolizei Hamburg al Oscar Bünemann, 22-9-1936; faksimilo en H. Theobald, *Dokumentoj de la rezistado*, p. 60.
6. Geheime Staatspolizei, Staatspolizeileitstelle Berlin, al Erwin Stolpe, 15-11-1937; persona komuniko de Erwin Stolpe, de 30-1-1968.
7. Persona komuniko de Artur Gitzinger, Solingen, de 4-7-1966.
8. Bundesarchiv Koblenz, R 58/384.
9. Samloke.

Konsideri „Esperanton" nur kiel helplingvon por la internacia komunikado estas malĝuste. La artefarita lingvo Esperanto estas parto de la esperantismo, de la armilo de la judoj.

Kiom intertempe severiĝis la sinteno de Heydrich, tion povis persone sperti la svisa ĵurnalisto Hans Unger, kiu laboris en Berlino i.a. kiel kunlaboranto de Associated Press. Kiam post renkontiĝo kun dekduo da esperantistoj en berlina kafejo li estis vokita al la ĉefoficejo de Gestapo, Heydrich persone pridemandis lin kaj nomis la kontaktojn de Unger kun esperantistoj provoj organizi „internacian reton" kontraŭ la Tria Regno. La respondajn argumentojn, ke frapus la konsciencon de la tuta homaro, se nur pro la uzado de Esperanto oni sendus homon en koncentrejon, Heydrich akre interrompis: „Nia konscienco estas germana, kaj nur laŭ ĝi ni agas. La ‚homara konscienco' estas juda kreitaĵo kaj ne interesas nin!" Similajn insultojn Unger poste aŭdis de Rudolf Heß, kiu krom tio sciigis al la sviso fantazian planon pri simpligita germana lingvo altrudota al tuteŭropa ŝtata federacio sub nazigermana hegemonio.[1]

Nelonge post la konversacioj de Unger kun Heydrich kaj Heß eksplodis la Dua Mondmilito, kiu alportis morton kaj neimageblajn suferojn al milionoj da homoj. Detalojn pri la nazia teroro, furiozanta precipe en orienta Eŭropo, ne necesas prezenti tie ĉi. Malpli konata aspekto de la sklaviga politiko de la nazioj estas la subpremo de ankaŭ la komunikaj rajtoj de judoj kaj slavoj. Hitler mem postulis en julio 1942, ke al la negermana loĝantaro en la okupitaj teritorioj de orienta Eŭropo „neniel estu permesita pli alta eduko", ke en la lernejoj oni „lasu lerni ĝin ne pli, ol maksimume la signifon de la trafikaj indikiloj". La germana estis instruota al judoj kaj slavoj nur tiom, kiom necesis „por krei la lingvajn antaŭkondiĉojn por nia gvidado" – do, por komprenigi al ili naziajn ordonojn.[2]

1. Raporto de d-ro Hans Unger al Germana Esperanto-Instituto, de 2-6-1948; eltirajo en *La Ponto* 3. 1949, p. 5-6. – Hitler mem diris komence de 1941, ke post cent jaroj la germana estos la lingvo de Eŭropo: Werner Jochmann (red.), *Adolf Hitler. Monologe im Führerhauptquartier 1941-1944*, Hamburg 1980, p. 124.
2. Henry Picker (red.), *Hitlers Tischgespräche im Führerhauptquartier*. 3a eld., Stuttgart 1976, p. 453-454. En majo 1942 Hitler esprimis esperon, ke en Bohemio kaj Moravio oni sukcesos „en 20 jaroj repuŝi la ĉeĥan lingvon al la signifo de dialekto": samloke, p. 322.

Superflue diri, ke la ekspansio de la nazioj orienten neniigis ankaŭ la eblecojn por uzo de Esperanto, de tiu simbolo de lingva egalrajteco, kiu ĝuste inter judoj kaj slavoj estis trovinta siajn unuajn entuziasmajn adeptojn. Jam en la dua aŭ tria tago de la okupado de Pollando germanaj soldatoj aperis ĉe esperantistoj[1], kaj inter la unuaj viktimoj estis la familianoj Zamenhof. Nur kelkajn tagojn, post kiam, la 28an de septembro 1939, Varsovio estis okupita de la germanaj trupoj, SS-anoj venis al la Juda Hospitalo kaj demandis pri Adam Zamenhof, kiu estis ĉefkuracisto de ties oftalmologia fako.[2] Adam, la filo de Lazaro Zamenhof, estis arestita.

Ĉar entute ĉiuj judoj kaj polaj inteligentuloj ne plu estis sekuraj antaŭ la senbrida ĉasado de la ekzekutistoj de Heydrich, ni povus supozi, ke ne estis bezono de speciala ordono por aresti la familion Zamenhof kaj aliajn esperantistojn.[3] La rezulto ĉiukaze estis sama: Adam Zamenhof estis mortpafita la 29an de januaro 1940.[4] Liaj fratinoj Zofia kaj Lidja kaj la fratino de Lazaro, Ida Zimmermann, en 1942 estis el la varsovia geto transportitaj al Treblinka, kie ĉiuj tri pereis.[5] Multaj esperantistoj apartenis al la sennombraj viktimoj de la amasmurdado en Pollando[6], verŝajne kelkaj el ili unuavice pro tio, ke ili aktivadis por Esperanto.[7]

Ni ne havas definitivan pruvon pri tio, ĉu ankaŭ la arestado de esperantistoj en Pollando originis en zorga plano farita en la ĉef-

1. *Esperanto Internacia* 11. 1947, p. 3.
2. Isaj Dratwer, „Kiel pereis la familio de d-ro Zamenhof", *Germana Esperanto-Revuo* 17. 1964, p. 57.
3. Vd. Marjorie Boulton, *Zamenhof. Aŭtoro de Esperanto*, La Laguna 1962, p. 248.
4. Andrzej Pettyn, *Skizo pri la Esperanto-movado en Pollando*, Varsovio 1978, p. 4.
5. Samloke. Vd. ankaŭ Isaj Dratwer, *Lidja Zamenhof. Vivo kaj agado*, Antverpeno, La Laguna 1980, p. 102-109 (reproduktaĵoj de kvar poŝtkartoj skribitaj el la geto inter majo 1940 kaj januaro 1942); Wendy Heller, *Lidia. The life of Lidia Zamenhof, daughter of Esperanto*, Oxford 1985. – Wanda, la edzino de Adam, kaj ŝia filo estis kaŝitaj de nejuda familio en Varsovio kaj transvivis.
6. La pli konataj estas Leo Belmont, Leopold Dreher, Izrael Lejzerowicz, Wilhelm Róbin, Jakób Szapiro kaj Edward Wiesenfeld.
7. Czeslaw Pruski, la delegito de UEA en Lublin, estis mortpafita komence de februaro 1941 verŝajne ĉefe pro sia esperantisteco: Jan Zawada en *Pola Esperantisto* 42. 1962, n-ro 4 (jul./aŭg.), p. 5.

Ĉesupre: Idoj de Lazaro Zamenhof, murditaj de la nazioj: Lidja, Zofia kaj Adam. *Sube:* Nova espero postmilita: Je la 29a datreveno de la morto de Zamenhof, la 14a de aprilo 1946, polaj esperantistoj kolektiĝas sur la ruinoj de la domo, en kiu iam loĝis Zamenhof. Plej supre la dua de dekstre la nepo Ludoviko Zamenhof. (Foto de Tadeusz Pleskaczyński.)

oficejo de Gestapo en Berlino. Sed verŝajne estis tiel. Estas ĉiukaze konfirmo por la cinika pedanteco de Heydrich, ke super sia fanatika malamo kontraŭ ĉio juda, kontraŭ ĉio, kion lia mastro Hitler indikis kiel ne plu vivindan, li ne forgesis – dum la buĉado proksimiĝis al sia kulmino – dediĉi denove apartan atenton al Esperanto, komisiante kompili la cititan raporton de la 8a de junio 1940, por liveri tiel, unu fojon pli, ideologian pravigon por la persekutoj kontraŭ Esperanto, „la armilo de la judoj".

Iam kondamnita per unu frazo en *Mein Kampf*, ankaŭ Esperanto ne eskapis la celkonscian detruemon de Hitler.

2.7. *EN LA OKUPITAJ LANDOJ*

Antaŭ kaj post la invado en Pollando – lando, kiu kolektive plej multe suferis dum la milito – en multaj landoj de Eŭropo, kiujn la nazioj aneksis aŭ en kiuj ili sukcesis plifortigi sian influon, laŭleĝa movado de Esperanto ne plu estis ebla. Kiel unua spertis tion *Aŭstrio*. La laborista Esperanto-movado estis tie, simile kiel en Germanio, multe pli forta, ol la neŭtrala. La socialdemokrata Aŭstria Laborista Ligo Esperantista (ALLE), kies motoro estis Franz Jonas, la postmilita Federacia Prezidanto de Aŭstrio, havis fine de 1933 pli ol 1700 membrojn, la neŭtrala Aŭstria Esperanto-Asocio (AEA) nur ĉ. 500. Post la malsukcesa laborista ribelo de februaro 1934, la diktatoreca reĝimo de Engelbert Dollfuß malpermesis ALLE kune kun ĉiuj laboristaj organizaĵoj. La tradician favoron de aŭstraj aŭtoritatuloj al Esperanto tiu ĉi paŝo ne influis, des pli ĉar Hugo Steiner, la prezidanto de AEA, tuj faris deklaron de lojaleco al la registaro.[1] AEA subtenis alvokon, ke ĝiaj membroj aliĝu al la Patrolanda Fronto[2], kaj kiam en 1936 okazis en Vieno la 28a Universala Kongreso de Esperanto, ĝian Honoran Komitaton konsistigis granda nombro de eminentuloj – de la Federacia Prezidanto ĝis la prezidanto de la Danuba Vaporŝipvetura Societo.[3]

1. „Al la Savintoj de Aŭstrio!", *Aŭstria Esperantisto* 11. 1934, p. 13.
2. *Aŭstria Esperantisto* 11. 1934, p. 27.
3. *Aŭstria Esperantisto* 13. 1936, n-ro 2, p. 2.

La 12an de marto 1938 ĉesis la sendependeco de Aŭstrio. Jam unu monaton post la alligo al Germanio, esperantistoj spertis esplorviziton de Gestapo-agentoj[1], kaj la 20an de aprilo SS-anoj fermis la Internacian Esperanto-Muzeon en Vieno.[2] La 1an de aŭgusto, ordono el Berlino dekretis la finon de la organizita Esperanto-movado[3]: Notinde, ĝi distingis inter AEA, kiu estis karakterizita kiel ĉefe katolika kaj dekstra, kaj la konkurenca organizaĵo Aŭstria Esperantista Federacio, fondita en 1936 kaj, laŭ la nazioj, estrata de ekssocialistoj; la unua estis „petita" mem likvidi sin, la dua estis perforte dissolvita.

Poste, ĝis dum la milito, aŭstraj esperantistoj kaŝe kunvenis en privataj hejmoj. Dum unu el tiuj renkontiĝoj, fine de junio 1944, en la hejmo de Gustav Weber, la iama ĉefdelegito de Internacia Esperanto-Ligo, subite aperis gestapanoj; ili arestis ĉiujn ĉeestantojn. Weber estis sendita al la koncentrejo Mauthausen, kie eĉ SS-oficiroj ne volis kredi, ke Weber estis arestita nur pro Esperanto, sentante sin primokataj, kiam li insistis, ke tio estis la sola kialo. Weber estis poste transportita al Gusen por peza laboro en ŝtonminejo. Iun tagon, nelonge antaŭ la liberiĝo, SS-gardisto, kiun nervozigis la senĉesa ridetado de Weber – signo de ties komenciĝanta mensa perturbiĝo, forprenis el liaj manoj ŝovelilon kaj frapis lin sur la kapon, ĝis li mortis.[4]

La plej longe aktivinta esperantista asocio, kiu portis la epiteton „germana", estis Germana Esperanto-Ligo en *Ĉeĥoslovakio*. Post la anekso de Sudetlando ĝi estis dissolvita, la 16an de decembro 1938, sekve de surloka iniciato, do, antaŭ ol venis koncerna ordono el Berlino.[5] Ankaŭ la germana Esperanto-societo en Praha likvidiĝis, la 20an de februaro 1939. Post la detruo de la ĉeĥoslovaka ŝtato en marto 1939, la movado en la „Protektorato Bohemio kaj Moravio" kontraŭatende ne tuj estis malpermesita,

1. *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 75.
2. Hugo Steiner, *Katalogo pri la kolektoj de Internacia Esperanto-Muzeo en Wien*. Parto I, Wien 1957, p. XXIX.
3. Bundesarchiv Koblenz, R 58/384.
4. Pierre Jayer, „‚Pro Esperanto'. Memoro pri Gustav Weber", manuskripto, 1966. – Martiro de la naziismo estis ankaŭ alia esperantisto, la konata katolika pacifisto Max Josef Metzger; kondamnita al morto pro „defetismo", li estis senkapigita en Berlino la 17an de aprilo 1944.
5. Bundesarchiv Koblenz, R 58/384.

sed Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA), kiu prenis la lokon de la antaŭa Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko, devis limigi sin nur al agado inter ĉeĥoj.[1] En marto 1940 ĝi devis fermi sian oficejon, kaj en kunveno de la 3a de novembro 1940 ĈEA decidis, sekve de ordono ricevita de Gestapo, likvidi sin.[2] La Esperanto-Klubo de Praha kaŝe ekzistis ankoraŭ ĝis 1944. En la Protektorato, kies reganto fariĝis en septembro 1941 Reinhard Heydrich[3], ankaŭ multaj esperantistoj estis inter la viktimoj de la kruela persekutado.[4]

En la landoj okupitaj dum la milito la politiko de la nazioj rilate al Esperanto ne estis unueca; ĝenerale, ilia subpremo atingis en Skandinavio kaj okcidenta Eŭropo malpli terurajn dimensiojn, ol en la oriento. En *Francio* ne okazis sistemaj malhelpoj; Esperanto-kursoj estis foje permesitaj, foje ne, sed cetere estis preskaŭ ĉie kaŝe gvidataj.[5] Simile, en *Norvegio*[6] kaj *Danlando*[7] la movado neniam estis malpermesita. En 1942 la Laborista Esperanto-Klubo de Kopenhago kuraĝis eĉ eldoni libron kun la signifoplena titolo *Tra densa mallumo*, en kiu la ĉinaj esperantistoj ricevas laŭdon pro tio, ke ili „tre vigle laboras metante Esperanton en la servo de sia lukto kontraŭ la japanaj invadantoj", kaj la germanaj esperantistoj estas kritikataj pro sia „freneza agmaniero", kiam ili, „ŝajne por savi la movadon, deklaris sin pretaj servi al la nazismo".[8] Ankaŭ en Danlando, judaj familioj, al kiuj minacis deportado, povis esti ĝustatempe avertataj pro sekreta telefona interligilo, kiun germana soldato-esperantisto konstruis de la Ĉefa Germana Stabejo al la hejmo de sia

1. *Ligilo*, 25-8-1939; laŭ *Esperanto* 35. 1939, p. 34.
2. Stanislav Kamarýt, *Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio*, Praha 1983, p. 69.
3. Kiel konate, en junio 1942 Heydrich estis mortigita per atenco, post kio la nazioj masakris la loĝantojn de la vilaĝo Lidice.
4. Kamarýt, p. 76-81.
5. Pierre Petit, „50-monata esperantista propagando sub germana okupado", *Esperanto Internacia* 9. 1945, p.3-5.
6. Arnfinn Jensson, „Norvega Esperantista Ligo dum la milito", *Esperanto Internacia* 9. 1945, p.78.
7. K.T. Hansen, „En Danujo dum la milito", *Esperanto Internacia* 9. 1945, p.87.
8. *Tra densa mallumo. Esperanto-eseoj pri movado kaj lingvo*, Kopenhago 1942, p. 27, 25.

amiko, dana esperantisto, kaj kiu ebligis aŭskulti interparolojn en la Stabejo.[1]

En *Belgio*, la flandraj esperantistoj eldonis ekde januaro 1941 sen permeso kvin numerojn de *Mededeelingen voor den Vlaamschen Esperantist*. Kiam la sesa numero estis presata, Gestapo aperis kaj, post pridemandado kaj traserĉoj, formale malpermesis al Flandra Ligo Esperantista pluan aktivadon. En decembro 1941, tamen, la loka grupo en Bruĝo komencis kaŝe eldoni monatan bultenon, multobligitan, kies titolo estis programo: *Paco kaj Justeco*.[2]

Ankaŭ en *Nederlando* la okupantoj komence ne ĝenis la movadon, eĉ permesante uzi Esperanton en korespondado kun la neŭtrala eksterlando. Sed la 20an de marto 1941 Nederlanda Esperanto-Asocio estis dissolvita per dekreto de la Komandanto de la Sekureca Polico kaj Sekureca Servo.[3] Pri la plenumo de la dekreto respondecis „fanatika malamiko de Esperanto", Werner Schwier, la estro de la Sekcio pri Internaciaj Organizaĵoj en la Regna Komisariato por la Okupitaj Nederlandaj Teritorioj. Laŭ raporto de Andreo Cseh pri la fermo de Internacia Esperanto-Instituto en Hago („apudorganizaĵo de la framasonaj loĝioj"), Schwier fanfarone deklaris, „ke li jam neniigis la Esperanto-movadon en Germanujo kaj Pollando, kaj li minacis nin per aresto kaj koncentracia kampo, se ni pledas por Esperanto", ĉar „pacifismo kaj humanismo estas la plej grandaj krimoj kontraŭ la vivo de la popoloj".[4] Parto de la libraro de la nederlandaj Esperanto-organizaĵoj – du kestoj – estis sendita de Schwier en aŭgusto 1942 al Berlino, kie oni destinis ĝin por la biblioteko de postmilite

1. *Heroldo de Esperanto* 22. 1946, n-ro 7 (1056), p. 2.
2. E. Cortvriendt, „Flandra Ligo Esperantista dum la milito", *Esperanto Internacia* 9. 1945, p. 88-89.
3. Persona komuniko de Rijksinstituut voor Oorlogsdocumentatie, Amsterdam, de 14-3-1969; vd. ankaŭ „La verda stelo brilis en la mallumo. Esperantista vivo en la okupita Nederlando", *La Praktiko* 11. 1946, p. 87.
4. Andreo Cseh, „La Ĉe Instituto dum la milito", *Esperanto Internacia* 9. 1945, p. 57; la sama, „Dum la uragano", *La Praktiko* 11. 1946, p. 15. – En 1967 la nederlanda registaro sendis al la registaro de FR Germanio liston de 658 personoj suspektataj pro militkrimoj; sur la listo troviĝis ankaŭ la nomo de Schwier: *Nederlanda Esperantisto* 32. 1967, p. 75.

starigota *Hohe Schule der NSDAP* – por servi kiel studmaterialo pri la konspira aktivado de la judoj.[1]

2.8. *SEKVANTE LA NAZIAN MODELON*

Eĉ antaŭ ol la nazioj etendis siajn manojn al la najbaraj landoj de Germanio, tie rimarkiĝis tendencoj, kiuj malfavore influis la disvastigon de Esperanto. Apud kontraŭkomunismo, unuavice temis pri la antisemitismo, kiu pli-malpli latente regis en multaj, ankaŭ demokratiaj landoj de Eŭropo; ĝi nutris inter la anoj de larĝaj tavoloj antipation kontraŭ Esperanto kiel kreaĵo de judo kaj estis faktoro, kiun la esperantistoj eĉ en landoj kun relative „esperantema" registaro devis konsideri. Ekzemplo por tio estis la situacio en *Pollando*. En majo 1934 Esperanto-instruisto en gimnazio en Bydgoszcz faris enketon inter tiuj lernantoj, kiuj rifuzis elekti Esperanton kiel instruobjekton. Klarigante siajn motivojn, la gimnazianoj montriĝis jam nekuraceble infektitaj de kontraŭjudaj sentoj:

> ... ĉar ĝi estas juda ĵargono, kiun ni devas malŝati...
> Esperanto servas al kontraŭreligia propagando. Esperantistoj estas plej ofte judoj aŭ ateistoj. Esperanton oni devas ĝisgrunde detrui.
> ... mi estas granda antisemito, mi ne ŝatas pro tio Esperanton...
> ... ĉar ĝi estas laŭ mia opinio cionisma eltrovaĵo por pli facila disvastigo de komunismo, framasoneco kaj aliaj malutilaĵoj...[2]

Kelkajn jarojn post tiu ĉi enketo, esperantistoj el la tuta mondo iĝis observantoj de la inkuba forto de naciismo kaj antisemitismo en lando, kiu mem estis baldaŭ viktimiĝonta. Kiam la aŭtoritateca reĝimo de Pollando, kredeble ankaŭ por plibonigi sian inter-

1. Kp. *Der Prozeß gegen die Hauptkriegsverbrecher vor dem Internationalen Militärgerichtshof, Nürnberg, 14. November 1945 – 1. Oktober 1946.* Vol. XXV, Nürnberg 1947, p. 252-253. – La konfiskadon de bibliotekoj de internaciaj organizaĵoj por la menciita celo gvidis la t.n. Operacia Stabo Rosenberg, kiu en julio 1940 ricevis de Hitler la komision sekurigi en la okupitaj teritorioj materialon de ĉiuj organizaĵoj mondkoncepte malamikaj al la naziismo.
2. Mieczysław Sygnarski, „Kion opinias la junularo pri Esperanto?", *Internacia Pedagogia Revuo* 17. 1938, n-ro 1, p. 6-14.

nacian renomon, donis la permeson, ke en Varsovio, la naskiĝurbo de Esperanto, okazu en 1937 la Ora Jubilea Kongreso, celanta memori la 50an datrevenon de la publikigo de la lingvo, la ekstreme dekstra kaj faŝisma gazetaro akre atakis la registaron pro tio, ke ĝi konsentis la okazigon de „jud-komunista" kongreso.[1] Dum la kongresa semajno mem tiuj gazetoj per siaj plej absurdaj kalumnioj kaj „cinike senhontaj atakoj" kreis tiel preman atmosferon, „ke la kongresanaro, almenaŭ granda ĝia parto sentis sin kvazaŭ terorita".[2]

En Pollando, la malamikoj de Esperanto ne sukcesis esence influi la sintenon de la registaro, sed per la ekzemplo de la nazia reĝimo, kiu kiel unua sisteme kontraŭbatalis ne nur ĝenajn elementojn en la Esperanto-movado, sed la tutan movadon kaj lingvon mem, pluraj aliaj dekstraj kaj faŝismaj reĝimoj estis stimulitaj pli atente observi la esperantistojn kaj, pli vastskale ol antaŭe, persekuti ilin – ofte rezignante la pli frue ankoraŭ praktikatan diferencigon inter neŭtrala kaj laborista movado.

Portugalio, kie en 1932 komenciĝis la preskaŭ kvardekjara rego de Salazar, pionire imitis la germanan modelon. En septembro 1936 ĉiuj esperantistaj societoj estis fermitaj; policistoj sigelis la ejojn kaj tage kaj nokte patrolis antaŭ iliaj pordoj. La subitan disrompon de la portugala movado, kiu havis fortan proletan koloron, evidente influis la okazaĵoj en la najbara Hispanio, nome la ĵus eksplodinta Civila Milito; la rekta kialo verŝajne estis esperantlingva alvoko sendita el Barcelona al lisbonaj esperantistoj, „por ke ili ekagu kontraŭ sia registaro". Laŭdire, inter ribelintaj portugalaj maristoj troviĝis ankaŭ kelkaj esperantistoj.[3] Almenaŭ dum la daŭro de la hispana milito oni riskis arestiĝon, se oni varbis por Esperanto en Portugalio.[4] Dum la Dua Mondmilito, en kiu Portugalio ne partoprenis, denove povis funkcii Portugala Esperanto-Ligo, sed la 11an de aŭgusto 1948 dekreto de la Ministerio de Internaj Aferoj konfirmis la malpermeson de

1. ESTO, „29-a Universala Esperanto-Kongreso en Varsovio", *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 2.
2. Georgo Verda (= Izrael Lejzerowicz), „La Jubilea", *Literatura Mondo* II, 7. 1937, p. 99.
3. *Sennaciulo* 13. 1936/37, p. 4; kp. Saldanha Carreira, „La nuna movado en Portugalio", *Esperanto Internacia* 1. 1937, p. 74.
4. *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 23, 88; 15. 1938/39, p. 78.

„iuj ajn aktivaĵoj aŭ presaĵoj esperantistaj", kaj du monatojn poste la Ministerio de Edukado malpermesis la instruadon de Esperanto.[1] Agentoj de la sekreta polico PIDE traserĉis la loĝejojn de esperantistoj, forportis Esperantan materialon kaj, en aŭgusto 1949, konfiskis la posedaĵon de PEL; la polico informis, ke oni konfiskos ankaŭ leterojn venantajn el eksterlando, kiuj surhavas glumarkojn de Esperanto.[2]

Sub la kondiĉo, ke Esperanto estu uzata „nur lingvistike", la 11an de aprilo 1951 nova Ministro de Internaj Aferoj nuligis la malpermesan dekreton de 1948.[3] La esperantistoj komencis entuziasme reorganizi Portugalan Esperanto-Asocion, sed ĉar la Ministerio de Edukado rifuzis agnoski ĝian statuton kaj plue malpermesis Esperanto-kursojn, la asocio estis devigita fermi sian sidejon kaj haltigi la kolektadon de kotizoj.[4] Tia restis la situacio dum la sekvantaj jaroj.[5] Dum la Ministerio de Internaj Aferoj jam ĉesis klasifiki la lernadon de Esperanto ŝtatrenversa ago, la Ministerio de Edukado plue bremsis la movadon, ŝajne nun ĉefe surbaze de la reakcia argumento, ke Esperanto havas malutilan influon al la pureco de la portugala lingvo.[6]

Longe, do, al Portugalio apartenis la dubinda gloro esti la sola lando en okcidenta Eŭropo, kiu rifuzis modifi sian kontraŭesperantan pozicion. Nur per ruzaĵoj la esperantistoj sukcesis iom disvastigi sian lingvon: Ekzemple, ili produktis verdan sapon kun la nomo „Esperanto"; aĉeteblaj estis skatoloj kun ses pecoj da sapo, kiuj havis volvaĵon kun po unu mallonga leciono de Esperanto.[7] En 1972 la aŭtoritatoj konsentis pri refondiĝo de Portugala Esperanto-Asocio, kondiĉe ke tiu en siaj rilatoj kun eksterlando submetiĝu al la gvidlinioj de la Ministerio de Edukado.[8] Decidan ŝanĝon alportis nur la aprila revolucio de 1974. Post

1. *Scienca Revuo* 2. 1950, p. 27.
2. *Esperanto* 42. 1949, p. 48, 149.
3. *Esperanto* 44. 1951, p. 132; *Sennaciulo* 22. 1951, n-ro 8/9, p. 7.
4. *Heroldo de Esperanto* 28. 1952, n-ro 10 (1152), p. 2; n-ro 18 (1170), p. 2.
5. G.C. Fighiera, „Okazas en Lisbono", *Heroldo de Esperanto* 39. 1963, n-ro 19 (1369), p. 2.
6. „Esperanta kaj portugala lingvoj", *Revista Portuguesa de Esperanto* 1. 1973, n-ro 5/6 (nov./dec.), p. 14.
7. *Heroldo de Esperanto* 31. 1955, n-ro 15 (1221), p.2.
8. La 26an de junio 1971 estis permesita la instruado de Esperanto: *Esperanto* 65. 1972, p. 22.

multjara periodo de malhelpoj, fine, la falo de la faŝisma reĝimo permesis al la portugalaj esperantistoj informi siajn eksterlandajn amikojn pri kormalŝarĝa fakto: „Esperanto en nia lando ne plu estos la danĝera lingvo." [1]

La kialoj, pro kiuj Esperanto renkontis oficialan malaprobon en *Hispanio*, nur parte similis tiujn en Portugalio. Antaŭ la eksplodo de la Civila Milito, dum kiu la esperantistoj estis de la faŝistoj pli-malpli bloke kalkulataj al la tendaro de la malamikoj, konfliktoj kun la ŝtata potenco estis okazintaj ne pro klasbatala agitado per Esperanto, sed – ŝajne paradokse – pro la utiligo de la lingvo por naciismaj celadoj, pli precize pro ĝia implikiĝo en la aŭtonomismajn aspirojn de katalunoj. Jam en 1905 la societo „Unió Catalanista" alprenis Esperanton por siaj internaciaj rilatoj [2], kaj la gvidado de la kataluna Esperanto-movado dekomence estis firme en la manoj de personoj, por kiuj validis la maksimo: kataluna lingvo la unua, Esperanto la dua. La hispana, la oficiala lingvo de la lando, estis sisteme flankenlasata sur la paĝoj de la revuo *Kataluna Esperantisto*, kaj kontaktojn kun la internacia movado oni flegis rekte, ne tra Hispana Esperanto-Asocio en Madrid.[3] Sekve, precipe dum la militista diktatoreco de Primo de Rivera (1923-1930), Kataluna Esperantista Federacio estis ofte kulpigata pro separatisma agado kontraŭ la hispana ŝtato. Kiam generalo reganta en Barcelona postulis en 1928, ke la Federacio ne plu nomu sin kataluna kaj zorgu pri interfratiĝo kun la ceteraj hispanaj regionoj, la katalunaj esperantistoj, anstataŭ submetiĝi, decidis interrompi la agadon de la organizo kaj atendi pli favorajn cirkonstancojn. Post la falo de la diktatora reĝimo en 1930 rekomenciĝis nova periodo, kaj jam en la posta jaro povis aperi dua eldono de *Kataluna Antologio*, en kiu pli ol 50 verkis-

1. *Revista Portuguesa de Esperanto* 2. 1974, p. 101.
2. *Lingvo Internacia* 10. 1905, p. 564.
3. EdE, p. 216-220; vd. ankaŭ „Katolika taktiko ĉe hispana regiono de Katalunio", *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 42 (94), p. 1-2. – Komence, la ĉefa motoro de Esperanto en Katalunio estis la verkisto Frederic Pujulà i Vallès, unu el la gvidantoj de la katalun-naciista movado. Pro artikolo en Esperanta revuo, kritika kontraŭ hispanaj militistoj, li fine de 1905 devis fuĝi al Francio, kie li restis dum kelkaj jaroj: *Lingvo Internacia* 11. 1906, p. 150; EdE, p. 217, 458-459. Ekde 1911 Kataluna Esperantista Federacio preskaŭ ĉiujare okazigis literaturajn konkursojn, la t.n. Internaciajn Florajn Ludojn, en kiuj partoprenis diverslandaj Esperanto-verkistoj.

toj per siaj prozaĵoj kaj versoj tradukitaj en Esperanton elokvente pledis por sia lingvo kaj popolo.[1]

Sed baldaŭ venis nova, pli terura elprovo, kiu trafis ne nur la katalunajn esperantistojn: La ribelo de la trupoj de Franco kontraŭ la popolfronta registaro en julio 1936 malvastigis kaj, post sia sukceso, plene forigis la agadeblecojn de la tuta hispana movado. Sur kiu flanko troviĝis la esperantistoj dum la sanga interfrata milito, pri tio ne povis esti dubo, almenaŭ se oni juĝas laŭ la enhavo de la esperantlingvaj periodaĵoj, kiuj prenis pozicion kontraŭ la faŝismo. La plej konata inter ili estis revuo eldonata de „Grupo Laborista Esperantista" en Valencia, *Popola Fronto*, kiu dum la pli ol du jaroj de sia aperado klopodis skui siajn legantojn en tutmondo per senprecedence batalema Esperanta lingvaĵo.[2] Apud ĝi, aperis en Esperanto gazetaraj komunikoj de la kataluna registaro[3], anarkiista *Informa Bulteno* kaj aliaj, malpli longvivaj periodaĵoj, kiuj, respegulante la heterogenan konsiston de la kontraŭfaŝisma tendaro, polemikis ankaŭ inter si.[4]

Esperantistoj luktis kontraŭ la faŝisma danĝero ne nur plume: Ankaŭ al la Internaciaj Brigadoj aliĝis pluraj el la kvazaŭ proverbaj „pacaj batalantoj"[5], venintaj al Hispanio el Aŭstrio, Germanio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Italio, Bulgario, Pollando, Hungario, Jugoslavio, Svedio kaj aliaj landoj; ekzistis, almenaŭ komence, speciala esperantista taĉmento, kaj ankaŭ Esperantokursoj estis organizitaj en la kadro de la Brigadoj.[6] La plej elstara esperantista brigadano estis la germana verkisto Ludwig Renn, kiu per Radio Barcelona faris esperantlingvan salutadreson al

1. EdE, p. 219-220. – La unua eldono de *Kataluna Antologio*, aperinta en 1925, estis unu el la kaŭzoj de la persekuto.
2. De novembro 1936 ĝis januaro 1939 aperis 44 numeroj de tiu ĉi „informa bulteno internacia pri hispana lukto kontraŭ la faŝismo".
3. *Comunicat de Premsa* (Generalitat de Catalunya). Aperis de 1937 ĝis 1938 minimume 33 numeroj.
4. Ankaŭ la kontraŭstalinisma (ne trockiisma) Laborista Partio de Marksista Unuiĝo (POUM) en Barcelona eldonis en 1937 Esperantan bultenon, *La Hispana Revolucio*. – Pri la polemikoj vd. i.a. *Popola Fronto* 2. 1937, n-ro 22, p. 7; 3. 1938, n-ro 36, p. 3; *Informa Bulteno* 2. 1937, n-ro 7, p. 3; n-ro 8, p. 4; *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 35, 68-69.
5. Franz Haiderer, „La Internaciaj Brigadoj kaj la esperantistoj", *Der Esperantist* 10. 1974, n-ro 5/6 (67/68), p. 10-12.
6. Samloke, p. 11; *La Socialisto* 11. 1937, n-ro 1 (majo), p. 5.

kunbatalantaj esperantistoj.[1] Flanke de la hispanoj, sur la respublikana flanko batalis la prezidanto de Hispana Esperanto-Asocio, la kolonelo kaj posta generalo Julio Mangada Rosenörn, kiu en la tutmonda movado estis konata kiel eldoninto de broŝuro de Zamenhof pri homaranismo (1913) kaj kiel aŭtoro de delikataj poemoj en Esperanto.[2]

Eĉ se la faŝistoj pli frue ne donis atenton al Esperanto, ili ĉiukaze ne povis pretervidi la larĝan uzon de la lingvo por defendo de la respubliko. En marto 1937 *Popola Fronto* kaŭzis konsterniĝon en la internacia movado per la jena sciigo:

> Tranĉanta kiel klingo de ponardo, venas kruda sciigo: La faŝistoj en Kordobo mortigis ĉiujn esperantistojn!
> ... Esperanto havis pionirojn, naskis apostolojn kaj hodiaŭ, post kvindek jaroj de paca ekzistado, ĝi jam povas prezenti eĉ martirojn al la filistra mondo, kiu rigardadas nin ankoraŭ kun indiferento kaj mokoj.
> ... En la nigra Hispanio, Esperanto ne jam estas ludo, ĝi estas risko je morto![3]

Detalojn pri la aludita okazaĵo oni ĝis hodiaŭ ne povis akiri.[4] Post kiam nederlanda katolika esperantisto ricevis kvazaŭ dementan informon, ke Franco „sentas kompreneble nenian antaŭjuĝon kontraŭ Esperanto"[5], *Popola Fronto* klarige aldonis, ke ĝi bazis sin sur elsendo de faŝista radiostacio, en kiu, sen pliaj detaloj, estis dirita proksimume la jeno: „En Kordobo, ĉiuj membroj de la sektoj, framasonoj kaj esperantistoj, ricevis adekvatan punon pro sia partopreno en antinaciaj laboroj."[6] Kiel ajn oni imagu la karakteron de tiu puno – de hispana esperantisto foje venis insista peto al la redaktoro de *Heroldo de Esperanto*, ke oni ne

1. *Sur Posteno* 4. 1937, n-ro 49 (jan.), p. 5.
2. Hugh Thomas (*Der Spanische Bürgerkrieg*. 2a eld., Berlin, Frankfurt a.M., Wien 1964, p. 164) nomas lin „ege populara oficiro".
3. *Popola Fronto* 2. 1937, n-ro 9, p. 1.
4. Kp. André Caubel, „Kaj Kordovo?", *SAT-Amikaro* 1968, p. 102-103, 110-111.
5. *Espero Katolika* 34. 1937, p. 63.
6. *Popola Fronto* 2. 1937, n-ro 16, p. 2. – Raportojn pri mortpafado de esperantistoj en diversaj urboj de Hispanio mencias ankaŭ *La Socialisto* 11. 1937, n-ro 1 (majo), p. 5; konkretan kazon indikas *La Brita Esperantisto* 81. 1985, p. 33. La arkitekto kaj socialista parlamentano Francisco Azorín, kiu antaŭe loĝis en Córdoba, raportis al la Tria IPE-Kongreso en Parizo (1937), ke la faŝistoj bruligis lian domon pro la ĉefa kialo, ke sur ĝi troviĝis verda stelo, sed li je tiu okazo ne parolis pri ĝenerala fusilado de esperantistoj: *Ruĝa Esperantisto* 1937, n-ro 64 (sept.), p. 4.

plu skribu al li Esperante, „ĉar estas danĝere kiel la morto".[1]

Neeviteble, post la venko de Franco, Esperanto estis, kvankam ne oficiale malpermesita, dum kelkaj jaroj suspekte rigardata de la aŭtoritatoj.[2] En 1948 povis refondiĝi Hispana Esperanto-Federacio, sed kiam en la Universitato de La Laguna (Tenerife) oni klopodis starigi kurson, falangista studenta gazeto per ataka artikolo zorgis, ke ĝi estu malpermesita.[3] En Madrid nur en 1951, post 14jara paŭzo, komencis denove okazi Esperanto-kursoj. Poste tamen ne plu estis malhelpoj, kaj en 1968, preskaŭ 30 jarojn post la fino de la Civila Milito, la ĉefurbo gastigis la 53an Universalan Kongreson – sub la honora protektado de generalisimo Franco.

Italio sub Mussolini longe servis al la reprezentantoj de la neŭtrala movado kiel apogilo de la tezo, ke la Internacia Lingvo eĉ sub ekstreme naciisma reĝimo sukcesas transvivi; la forta pozicio, kiun la itala movado konservis dum la unuaj 15 jaroj de la regado de Mussolini, kredigis al multaj, ke faŝismo kaj Esperanto povas tute bone harmonii. La italaj esperantistoj ofte povis registri apogon de la aŭtoritatoj, kiuj vidis en la lingvo utilan ilon por la diskonigo de la turismaj belaĵoj de Italio en eksterlando. Ne tute maltrafa ŝajnas ankaŭ la observo de Franz Thierfelder, la vigla kontraŭbatalanto de Esperanto en Germanio, ke la italaj lingvopolitikistoj atribuas al Esperanto pro ĝiaj latinidaj elementoj nerektan varban efikon por la itala lingvo.[4] Kulmino de la registara subteno estis en 1935 la okazigo de la 27a Universala Kongreso en Romo.

Nelonge post tiu Kongreso tamen la klopodoj de la itala movado sekurigi al si daŭran oficialan favoron alprenis pli kompromitan karakteron. Komence de 1936 la organo de Itala Esperantista Federacio (IEF) alvokis la esperantistojn en la mondo montri sian simpation al Italio pro ties konkera milito en Etiopio.[5] En 1938 la delegito de IEF kaŭzis incidenton dum la inaŭguro de la Universala Kongreso en Londono, kiam li, pro la

1. Jung, *Ĉiu – ĉiun*, p. 195. – Temas pri la advokato Andrés Piño en Valencia, kiu ankaŭ estis socialista parlamentano.
2. *Esperanto* 40. 1947, p. 114-115.
3. *Esperanto* 42. 1949, p. 23.
4. Franz Thierfelder, *Sprachpolitik und Rundfunk*, Berlin 1941, p. 38-39.
5. Laŭ *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 33.

ĉeesto de reprezentanto de la Hispana Respubliko, rifuzis fari sian salutparolon.[1] Tiutempe, por la italaj esperantistoj jam blovis malpli favora vento enlande. En 1936 kaj 1937 ne povis okazi la naciaj kongresoj, kaj baldaŭ, precipe de kiam Italio sub la premo de Germanio akceptis, en 1938, kontraŭjudajn leĝojn, la kolumnojn de la gazetaro eniris kontraŭesperanta propagando. *Il Popolo d'Italia* subite eltrovis, ke la ekzisto de Zamenhofstrato en Milano „insultas Romon, kiu por la rilatoj kun aliaj popoloj posedas aliajn pontojn", ol Esperanton.[2] Fine de 1939 la organo de Internacia Esperanto-Ligo notis, ke de kelkaj monatoj la italoj „ĝuas" legaĵon, jam bone konatan el Germanio: la argumenton, ke Esperanto estas juda lingvo.[3]

Burokrataj ĉikanoj malebligis en septembro 1939 organizi la jam anoncitan kongreson en Torino; „por ŝpari paperon" la Federacio devis ĉesigi la eldonadon de sia bulteno.[4] Kiam en oktobro 1941 faŝisma gazeto insultis kontraŭ la kreaĵo de la pola judo Zamenhof, la „instrumento de la cionismo kaj de la internacia subfosismo"[5], tiel do malfrue, sed ne miskompreneble transprenante la nazian konspiro-teorion, jam haltigitaj estis la Esperantaj elsendoj de Radio Roma[6] kaj apenaŭ plu restis la ebleco labori publike por Esperanto en Italio.

En 1969 estis publikigitaj en *Hungario* antaŭmilitaj dokumentoj de la polico pri la laborista Esperanto-movado en la departemento Békés. Laŭ la antaŭparolo de la kolekto, tiuj dokumentoj montras, ke inter la nelaŭleĝa komunisma movado kaj la Esperanto-movado ekzistis forta ligiteco kaj ke en la jaroj 1920 ĝis 1930 „esti laborista esperantisto signifis ne nur simplan lingvolernadon, sed ankaŭ politikan lecionon".[7] Multaj el tiuj junaj labor-

1. *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 82.
2. Laŭ *Esperanto* 35. 1939, p. 11.
3. „La plej stulta argumento", *Esperanto Internacia* 3. 1939, p. 321. – Laŭ Marjorie Boulton (*Zamenhof. Aŭtoro de Esperanto*, La Laguna 1962, p. 245), IEF devis ankaŭ elpeli siajn judajn membrojn.
4. Gianfranco Cardone, *Il movimento esperantista cattolico in Italia. Storia dei rapporti fra stato e chiesa*. Doktoriĝa tezo, Universitato de Torino, 1973/74, p. 144; kp. la resumon „La Esperanta katolika movado en Italio", *Espero Katolika* 72. 1975, p. 108.
5. *Roma Fascista*, 9-10-1941; cit. Cardone, p. 179.
6. *Esperanto Internacia* 5. 1941, p. 37.
7. Bálint Ferenc, *A Békés Megyei munkás eszperantó mozgalom válogatott*

istaj esperantistoj poste fariĝis aktivuloj en la Komunista Partio[1], kaj agante en la kadro de Hungaria Esperantista Societo Laborista (HESL) ili ne nur devis konstante gardi sin kontraŭ la polico, sed ankaŭ kontraŭ la estraro de Hungara Socialdemokrata Partio, al kiu HESL estis filiigita. En multaj grupoj de HESL regis pli revolucia spirito, ol pretis toleri la socialdemokratoj[2], tiel ke en 1930 la gvidantoj de HESL, kiuj en sia plimulto kontraŭis tro maldekstran politikan koloriĝon de sia societo, komencis eksigi komunistajn membrojn, eĉ unu tutan grupon.[3] Sed ĉar daŭris konfliktoj, en februaro 1934 la Socialdemokrata Partio ĉesigis siajn rilatojn kun HESL, kiu tiutempe pretendis havi 600 membrojn; en junio de la sama jaro HESL estis dissolvita de la registaro.[4]

En 1935 estis fondita Hungara Esperanto-Federacio (HEF), kiu diference de la neŭtrala, modere progresema Hungarlanda Esperanto-Societo (HES) pledis por submetiĝo al la politika linio de la reĝimo. HES devis cedi kaj aliĝis al la Federacio, kiu en januaro 1939 starigis ankaŭ apartan sekcion por laboristoj.[5] Kvankam dum la milito la Federacio konsiderinde ŝoviĝis dekstren, ĝi rezistis al oficiala premo eksigi siajn judajn membrojn, kaj la prezidanto de HEF, József Mihalik, klopodis savi la vivon de juddevenaj junuloj.[6] Tiel longe, kiel la registaro de Horthy povis konservi iom da spitokapablo kontraŭ sia potenca aliancano, la nazia Germanio, ankaŭ restis modesta agadlibereco por

---

dokumentumai 1925-1934. Elektitaj dokumentoj de laborista esperantista movado en departemento Békés 1925-1934, Gyula 1969, p. 5.

1. Alfonso Pechan (red.), *Gvidlibro por Supera Ekzameno. Historio, literaturo, metodologio*. Dua eldono, Budapest 1979, p. 107; vd. ankaŭ: Zoltán Barna, „Katarina Hámán – martiro kaj esperantisto", *Hungara Vivo* 24. 1984, p. 208-209.
2. Ludoviko Kökény, „La libroeldonagado de Literatura Mondo", *Hungara Vivo* 12. 1972, n-ro 4, p. 6.
3. B. Szerémi, „1918-1958", *Bulteno* (Cirkulero de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro) 1958, p. 51-52.
4. Samloke, p. 52; Pechan, p. 106; *Sennaciulo* 10. 1933/34, p. 35. – Laŭ Szerémi, en 1934 temis pri „ordinara trompŝtelo", nome pri monŝuldoj al aŭstroj, kun kiuj HESL kunlaboris en ISE. Sed vd. ankaŭ la leteron „je nomo de HESL", de 3-3-1934, en *Sur Posteno* 1934, n-ro 18 (154), p. 37.
5. Emba (= Imre Baranyai), „La laboristesperantista movado reviviĝis en Hungario", *Sennaciulo* 16. 1940, n-ro 486 (mar.), p. 4.
6. Pechan, p. 96.

la hungaraj esperantistoj, sed post kiam en oktobro 1944 ekregis la faŝistaj „sagkrucanoj" por mallonga, sed sangoplena periodo, tio alportis finon al la organizita movado. Ankoraŭ en tiuj lastaj monatoj antaŭ la militfino multaj hungaraj esperantistoj iĝis martiroj de la faŝismo.[1]

En *Bulgario*[2] la neŭtrala movado multe penis, precipe ekde la fino de la 1920aj jaroj, disblovi la suspekton de la aŭtoritatoj, ke ĝi servas kiel kamuflaĵo por komunisma aktivado. Sekve, ĝiaj gvidantoj ne tre bedaŭris, ke la laboristoj komencis aparte organizi sin. En 1929 ekaperis la revuo *Balkana Laboristo*[3], kaj en la posta jaro estis fondita la komuniste dominata Bulgara Laborista Esperanto-Asocio (BLEA). Dum la neŭtrala bulgara Esperantista Asocio (BEA) atingis en 1931 la nuligon de ministra dekreto, kiu en 1928 estis malpermesinta la instruadon de Esperanto en lernejoj[4], la organiza memstariĝo de la laboristaj esperantistoj estis akompanata de arestadoj.[5] Kiel spertis Todor Pavlov, postmilite prezidanto de Bulgara Akademio de Sciencoj, tiutempe en pluraj malliberejoj oni entuziasme lernis la lingvon.[6] Kvankam BLEA povis aktivi nur dum kelkaj jaroj, ĝi sukcesis krei solidan fundamenton, de kiu post la milito multe profitis la movado en la Popola Respubliko. Ĝi eldonis ekde novembro 1932 la periodaĵon *Meĵdunaroden rabselkor* (Internacia Laborist-Kamparana Korespondanto), kiu en eldonkvanto de 6 000-7 000 ekzempleroj, ekspluatante nur materialojn ricevitajn per Esperanto, informis pri la vivo en Soveta Unio kaj la bataloj de la tutmonda laboristaro.[7] La bulgaraj aktivuloj havis siajn proprajn koncep-

1. Pechan, p. 108.
2. Pri la historio de la bulgara movado vd. interalie la artikol-kolektojn, kompilitajn de Dimitr Papazov: *Skizoj pri la historio de bulgara Esperanto-movado*, Sofio 1982; kaj *Bulgara Espérantista Asocio – aktiva batalanto por paco, internacia kompreniĝo kaj socia progreso*, Sofio 1982.
3. Dimitar Papazov, *Revuo „Balkana Laboristo" – tribuno kaj organizanto de laboristaj esperantistoj en Bulgario (1929-1931)*, Sofio 1983.
4. EdE, p. 75.
5. *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 270, 397; *Internaciisto* 2. 1932, p. 39-40, 118.
6. Todor Pavlov, „Esperanto en la malliberejo", *Nuntempa Bulgario* 4. 1960, n-ro 4, p. 27 (bulgara originalo en *Meĵdunaroden ezik* 1931, n-ro 4); Cano Todorov Ignev, „Esperanto en la malliberejo de Sliven", *Bulgara Esperantisto* 45. 1976, n-ro 3, p. 3-6.
7. Maria T. Jankova-Bojaĝieva, *La bulgara revolucia Esperanta gazetaro dum la periodo 1929-1934*, Sofio 1983.

tojn pri la maniero kiel akordigi la revolucian strebadon kun sia poresperanta fervoro: Unu el ili, Ĥristo Gorov, memorante pri distrikta konferenco en la Rodopi-montaro en printempo 1933, priskribis sian kamaradon Stojan Kostadinov jene: „Li estis armita per bombo kaj pistolo kaj mi vere fieris, vidante tian revoluciulon kun verda stelo sur la brusto."[1]

Post kiam en majo 1934 la reĝo starigis diktatorecan reĝimon, BLEA estis dissolvita kune kun ĉiuj komunismaj organizaĵoj. Tiuj membroj ĝiaj, kiuj eskapis malliberigon, nun revenis al BEA, kie ili akiris konsiderindan influon.[2] La sekvo estis, interalie, ke en 1936 dufoje estis ĵetita de nekonatoj bombo en la klubejon de la Esperanto-societo „Albatro" en Varna[3] kaj ke la polico postulis okaze de la nacia kongreso en Pazarĝik en junio 1937, ke dum la kunsidoj oni parolu ne Esperante, sed en la bulgara.[4] Dum la sama jaro, tamen, la Ministerio de Komerco permesis la fakultativan instruadon de Esperanto en mezaj komercaj kaj profesiaj lernejoj.

Laŭ postulo de la policdirektoro, en 1939 BEA devis eksigi dudek gvidajn komunistajn membrojn.[5] De tiam la laboristaj esperantistoj estis pli kaj pli pelataj al subtera laboro. En malliberejoj oni eldonis mane skribitajn Esperanto-gazetojn, kaj bibliografio pri la konspira gazetaro en Bulgario, publikigita de Bulgara Komunista Partio en 1968, registras la titolojn de naŭ konspiraj gazetoj de esperantistoj, aperintaj inter 1934 kaj 1942.[6] En la jaroj 1941 ĝis 1944 el la vicoj de la iama BLEA rekrutiĝis multaj partoprenantoj en la kontraŭfaŝisma rezista movado. Konataj estas la nomoj de 227 esperantistoj bulgaraj, kiuj pereis

1. „Nia sekretario. Rememoroj de Ĥrima", *Bulgara Esperantisto* 44. 1975, n-ro 3/4, p. 12.
2. Nenko Jonkov, „La partopreno de la bulgaraj esperantistoj en la kontraŭfaŝisma batalo", *Bulgara Esperantisto* 43. 1974, n-ro 9, p. 5.
3. Canko Murgin, „Per bomboj kontraŭ Esperanto", *Nuntempa Bulgario* 5. 1961, n-ro 9, p. 39.
4. Ivan Sarafov, *Skizo de la historio de bulgara Esperanto-movado*, Sofia 1971, p. 33. – La saman postulon jam en 1928 ricevis kongreso en Varna: *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 99.
5. Sarafov, p. 34.
6. Venelin Mitev, „Inda loko al la esperantista konspira gazetaro", *Nuntempa Bulgario* 1969, n-ro 1, p. 48.

kiel partizanoj, mortis en malliberejo aŭ falis dum la hispana Civila Milito.[1]

Per diversaj artifikoj la neŭtrala BEA povis transvivi; pro la pliakrigita kontrolo de la registaro ĝi dum la milito evitis publike demonstri sian ekziston.[2] La akcepton de invito aliĝi al la organizaĵo „Otec Paisij", en kiu estis kunigitaj preskaŭ ĉiuj klerigaj asocioj de la lando, BEA intence prokrastadis tiel longe, ke la aŭtoritatoj fine forgesis pri la afero. La lasta numero de la organo *Bulgara Esperantisto* aperis en junio 1942.[3] Iom pli frue, meze de februaro, Radio Sofia, kiu elsendis ankaŭ esperantlingvan programon, iun tagon ricevis viziton de la germana kulturataŝeo; ankoraŭ en la sama vespero la deĵoranta esperantisto estis informita pri la ĉesigo de la elsendoj – pro „sugesto de altaj aŭtoritatoj".[4]

2.9. *SANIGA LECIONO POR LA NEŬTRALA MOVADO*

Je la fino de tiu ĉi superrigardo pri la persekutoj en la landoj sub nazigermana influo necesas dediĉi specialan atenton al *Jugoslavio*, ĉar la tiea movado jam en frua stadio tiris konsekvencojn el la faŝisma bataldeklaro kontraŭ Esperanto, donante impulsojn, kiuj efikis ankaŭ internacie. Disvolviĝante en ŝtato, kiun karakterizis fundamentaj soci-kulturaj diversecoj kaj forta, ofte apenaŭ transpontebla antagonismo inter la nacioj ĝin konsistigantaj, la jugoslavia movado kiel tuto alprenis ĝenerale pli progreseman profilon, ol tiuj en la najbaraj landoj. Jam en 1922, lige kun la preparlaboroj por la fondo de Sudslava Esperantista Ligo, estis akcentita la volo

1. Vd. la listojn en *Bulgara Esperantisto* 43. 1974, n-ro 10/11; 53. 1984, n-roj 11 kaj 12; 54. 1985, n-ro 1.
2. Atanas D. Atanasov, „Esperanto en dummilita Bulgarujo", *Esperanto Internacia* 9. 1945, p. 79.
3. Sarafov, p. 35.
4. Nik. Nikolov, „Esperanto – 35 jarojn en Radio Sofia", *Esperanto* 63. 1970, p. 102 (intervjuo kun Kiril Draĵev).

uzi ĉiujn eblecojn por ke almenaŭ en niaj rondoj konserviĝu antaŭ ĉio la Homo, civitano de tuta mondo, sed ne sole de sia naskiĝa terpeco. Tion komprenu ĉiuj: Kroatoj, Serboj, Slovenoj kaj aliaj, katolikoj, ortodoksuloj, mahometanoj kaj aliaj kaj ni montru al niaj samlandanoj nian solidarecon kiu estas la fundamento de nia sukceso kaj la plej efika influo.[1]

Akorde kun tiu postulo pri unueco trans naciajn kaj religiajn limojn, la jugoslavia movado povis gardi ankaŭ pli grandan internan koheron, ol la movadoj en aliaj landoj. Kvankam sekve de rezolucio por Esperanto, akceptita en junio 1920 de la Dua Kongreso de Komunistoj en Jugoslavio[2], multaj maldekstruloj eniris ĝiajn vicojn, la movado neniam dissplitiĝis laŭ la alilande observebla divido-linio inter burĝoj kaj laboristoj. Kompreneble ne mankis kunpuŝiĝoj inter pli progresemaj membroj kaj tiuj, kiuj timante la premon de la reĝimo pledis por rigora sinlimigo al porlingva aktivado, sed la konfliktoj neniam skuis la unuecan organizan kadron.[3] Al kunforĝo de la jugoslavia movado evidente kontribuis je konsiderinda grado la daŭraj ĉikanoj, al kiuj la esperantistoj, precipe sur loka nivelo, estis submetitaj, kaj la kutime mizeraj argumentoj, per kiuj la aŭtoritatoj klopodis pravigi la trasercadon de hejmoj aŭ la rifuzon de petoj pri grupfondo.[4] La jugoslaviaj esperantistoj bone komprenis, ke, ĉar la persekutoj ne restis limigitaj al eksplicite revolucia agado per Esperanto, sed respegulis ĝeneralan zorgon de la regantoj pri desubaj emancipaj tendencoj, necesas resti solidaraj kaj kune spiti la defion.

Estante devigitaj defendi sian pozicion kontraŭ la konkreta realaĵo de sia lando, la jugoslaviaj esperantistoj do frutempe ricevis akrigitan konscion pri la sociaj kaj politikaj implikiĝoj de sia agado. Tiu memfido de la jugoslavoj disradiis ankaŭ eksterlanden – precipe de post kiam ili, en julio 1932, disponis la plejparte esperantlingvan revuon *La Suda Stelo* kiel tribunon por la diskonigo de sia starpunkto. Jam en junio 1933 Jugoslavia Esper-

1. *Konkordo* (Zagreb) 1. 1922, n-ro 1 (apr.), p. 1; kp. Marinko Ĝivoje, *Historio de Esperanto-movado en Jugoslavio*, Zagreb 1965, ĉap. 5.
2. Ĝivoje, ĉap. 4; kp. EeP, p. 646.
3. Peter Zlatnar, „Ideoj kaj agoj de esperantistoj en Jugoslavio", en: Franjo Vokoun k.a. (red.), *Honore al ili. Memorlibro pri falintaj esperantistoj 1941-1945*, Zagreb 1976, p. 12-14.
4. Vd. supre, p. 86.

anto-Ligo (JEL) okazigis kadre de sia kongreso en Beograd internacian konferencon pri la temo „La ideologia problemo de l' esperantismo".[1] Per tiu aranĝo, kies centra ideo estis poste resumita per la frazo: „Nur unu aferon ni ĉiuj kondamnas: la subpremon de libera vorto!"[2], JEL lanĉis diskuton, kies aktualecon demonstris la ĵusa evoluo en Germanio, sed pri kiu la internacia Esperanto-movado apenaŭ pensis tiutempe.

Kvankam la malamikeco de la nazioj estis konata, la internacia movado bezonis kelkajn jarojn por kompreni, ke tiu malamikeco estas novtipa, de principa karaktero – ke ĝi tuŝas la fundamentan ekzistorajton de Esperanto. Fine de septembro 1932, do kvar monatojn antaŭ la venko de Hitler, nederlanda esperantisto sendis al la Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado en Ĝenevo malmultvortan poŝtkarton. Unue, li citis el *Mein Kampf* la opinion de Hitler pri Esperanto, kaj je la fino aldonis la unufrazan demandon:

> Ĉu ni povas resti indiferentaj por movado jam deklarinta al ni la militon?

La respondo, kiun ricevis la atenta demandinto, egalis trankviligan pilolon. Ĝi estas dokumento de politika miopeco:

> ... La citaĵo estas tre interesa. Ĝi nur pruvas la malaltan nivelon de la aŭtoro, kiu arogas perfortigi al aliaj vidpunkton kiu estas akceptebla nur de homoj kun tre mallarĝa horizonto. ... Ŝajnas al ni superflue perdi nian tempon, batalante kontraŭ mueliloj, kiuj iam ja ekhaltos, ĉar mankos taŭga vento. Kompreneble ni observas la kampon...[3]

Kiam en 1933 la revuo *Esperanto* ricevis protestajn leterojn de legantoj kontraŭ la unuaj teruragoj de la nazioj, la redakcio rifuzis aperigi ilin, admonante la skribintojn: „*Ne protestu* pro politikaj okazintaĵoj, kiujn ni ne povas malhelpi, en nomo de esperantista organizaĵo." Kvankam estis substrekita la principo de neŭtraleco rilate al religio, nacieco aŭ politiko, UEA eksplicite konsentis, ke tiu principo laŭbezone povas esti malobservata: „En landoj kun naciisma-aŭtoritateca reĝimo, la nacia societo

1. La tekstoj de la prelegoj de Jakob Stefančić kaj Rudolf Rakuša aperis en *La Suda Stelo* 2. 1933, p. 101-102 kaj 115-116.
2. Leo Kun, „Post la beograda kongreso", *La Suda Stelo* 2. 1933, p. 77.
3. Poŝtkarto de B.E.J. Zieck Jr., Scheveningen, de 30-9-1932, kaj responda poŝtkarto de Robert Kreuz por ICK, de 11-10-1932 (en la arkivo de UEA).

esperantista ne povas alie, ol aranĝi sin laŭ la donitaj kondiĉoj."[1] Tia maniero de argumentado servis ankaŭ por pravigo de la organizado de kongresoj en diktatoraj ŝtatoj. Pri la multaj protestoj, venintaj kontraŭ la okazigo de la Universala Kongreso en Köln en 1933, UEA asertis post la milito, ke ĝi pretis malmendi la kongreson, se cent negermanoj tion estus postulintaj.[2] La fakton, ke centoj ne aliĝis aŭ nuligis sian aliĝon, UEA evidente ne konsideris sufiĉe forta esprimo de malaprobo – kaj la kongreso okazis kiel antaŭvidite.

En 1934, alian teston pri sia rezistopovo kontraŭ ekstera premo UEA povis eviti: Kiam NDEB ultimate postulis de Ĝenevo, ke en la Jarlibro ne plu aperu sub Germanio la nomoj de judaj delegitoj, la problemo solviĝis per tio, ke la koncernaj delegitoj propravole (?) eksiĝis.[3] En la sama jaro la organo de UEA faris strangan demonstron de sia neŭtraleco: La decembra numero, dediĉita al la 75a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, enhavis artikolon, kiu per blufaj citaĵoj de Hitler kaj Frick prezentis la nazian vidpunkton pri la rasa problemo[4], kaj samnumere, kvazaŭ kiel kontraŭpezo, aperis pasia akuzo de Lidja Zamenhof kontraŭ la tutmonde ondanta ŝovinismo.[5] Kvankam ne mankis voĉoj en la neŭtrala movado, kiuj post la kongreso en Köln postulis „revizii la esencan karakteron kaj ideologion de la esperantismo", se la movado opiniis utile kongresi en la Tria Regno, „kiam la plej bravaj amikoj de la verda standardo putras kaj suferas en la karceroj kaj koncentraciaj tendaroj"[6], UEA kaj la semajna gazeto *Heroldo de Esperanto* ne vidigis komprenkapablon pri la principa malamikeco, montrata de la naziismo al Esperanto, kaj sekve ne sciis difini sian pozicion al la danĝero minacanta la tutan movadon.

1. H.J. (Hans Jakob), „Esperantistaj problemoj. La neŭtraleco", *Esperanto* 29. 1933, p. 161.
2. Hans Jakob, „Esperantismaj problemoj, I. Nia ideologio", *Esperanto* 39. 1946, p. 10.
3. Samloke.
4. E.W., „La germana vidpunkto pri la rasproblemo", *Esperanto* 30. 1934, p. 169. – Tiutempe UEA havis kiel vicprezidanton la nazipartianon Anton Vogt.
5. Lidja Zamenhof, „Nia misio", samloke, p. 166-167.
6. I. Lejzerowicz, „Sobre kaj decide", *Pola Esperantisto* 27. 1933, p. 116.

Fakte, la ĝistiama historio de la Esperanto-movado ne konis precedenton por tiagrada minaco. Kvankam konfliktojn kun ŝtataj aŭtoritatoj oni havis ekde la publikiĝo de la lingvo, kutime eblis daŭrigi la agadon sub nefavoraj politikaj kondiĉoj, se samtempe, montrante al la principo de neŭtraleco, oni decide distancigis sin de tiuj esperantistoj, kiuj uzis Esperanton por celoj nefavorataj de la koncerna reĝimo. Eĉ la pli-malpli emfaza akcentado de la „interna ideo", per kiu la movado pretendis komprenigi, ke ĝia karaktero ne estas nur lingva, sed ĝenerale interfratiga kaj paciga, pli frue ne provokis rektan kontraŭstaron de registaroj – des pli ĉar la „interna ideo" kutime servis al la membroj de neŭtralaj grupoj, krom esti interna koherigilo, kiel kvazaŭa ŝirmilo kontraŭ implikiĝo de Esperanto en la batalon inter la ideologioj kaj klasoj kaj ĉar ĉian provon konkretigi, sekve politikigi la „internan ideon" bremsis ĝuste la principo de neŭtraleco.

Sed, kvankam la neŭtraleco helpis al la movado spiti eksteran malfavoron, ĝi samtempe akcelis fatalan miskomprenon: Nome, ĝi ne distingis klare tiujn registarojn kaj ideologiojn, kiuj, kiel la liberala demokratio, portis en si trajtojn akordigeblajn kun la humanisma bazo de Esperanto aŭ kiuj almenaŭ toleris ĝin, disde politikaj movadoj, kies programo rekte kontraŭis al internacia pensmaniero kaj kies venko signifis la malfortiĝon aŭ eĉ malaperon de la bazaj premisoj por fruktodona poresperanta agado. Pro tia sinteno iĝas kompreneble, ke reage al insultoj kontraŭ la „juda universala lingvo" la gvidaj funkciuloj de la neŭtrala movado unue kontentiĝis simple envicigi la punkton „Esperanto kaj judeco" en sian liston de kontraŭbatalendaj antaŭjuĝoj. Ekzemple, *Heroldo de Esperanto* refutocele atentigis, ke laŭ la sama logiko, kiel la antisemitoj atakas Esperanton, ili „devus ankaŭ rifuzi la kontraŭsifilisan sanigilon Salvarsan, enkondukitan de la judo Ehrlich".[1] La apologetoj kompreneble pravis, emfazante la tuthomaran kaj ne nur judan karakteron de la lingvo, sed ili, ĉefe pro la baroj de la neŭtraleco, ne konsciigis al si, ke ne havas sencon provi konvinki homojn nekonvinkiĝemajn, kiaj estis tiuj kondamnantaj aferon pro ĝia judeco. Por movado,

1. *Heroldo de Esperanto* 18. 1937, n-ro 44 (951), p. 1; kp. Jung, *Ĉiu – ĉiun*, p. 262.

kiu volis kontribui al interhoma fratiĝo, personoj kun tiaj „antaŭjuĝoj" nur povis esti danĝera balasto: Estis absurde kvazaŭ varbi antisemitojn por internacia lingvo. Dum neniu kongreso en la unuaj jaroj de la hitlera reĝimo iu gvidanto de la neŭtrala movado faris deklaron, ke la judoj estas same valora elemento de la homaro, kiel la anoj de aliaj rasoj kaj religioj.[1] Anstataŭ protesti kontraŭ antisemitismo, la miskomprenata neŭtraleco kondukis al tiagrada oportunismo, ke estis eĉ uzata la hontinda argumento: „*Kvankam* Zamenhof estis judo, liaj pensmaniero kaj karaktero estis tute ariaj, nejudaj..."[2] Kaj ankoraŭ fine de 1939 oni povis renkonti esprimojn, kiuj draste ilustras la intelektan konfuzon regantan en la neŭtrala movado: „Esperanto ... estas kunmetita de judo. Ni ne timu tion konfesi. Spite de tio ĝi estas mirinda instrumento..."[3]

Vidi la danĝeron, kiun frontis ne nur la Esperanto-movado, sed la tuta homa civilizo flanke de malamiko pacigebla nek per deklaroj pri neŭtraleco nek per oportunismo, la gvidantoj estis malhelpitaj ankaŭ per lukso, kiun ili permesis al si ĝuste dum la 30aj jaroj: per longaj debatoj pri la organizformo de la movado. La internaj konfliktoj kulminis en 1936, kiam la neŭtrala movado disduiĝis en du konkurencajn organizaĵojn, UEA kaj la novfonditan Internacian Esperanto-Ligon (IEL). UEA de tiam ne plu ludis esencan rolon, dum al IEL, kiu estis samtempe federacio de la naciaj Esperanto-societoj, aliĝis la plej multaj antaŭaj individuaj membroj de UEA.[4] Certagrade la skismo estis sekvo de la kreskanta pretendo de la naciaj societoj akiri kundecidrajton en UEA, sed interpreti la fondon de IEL, kiu klopodis harmoniigi la individuan membrecon kun la federaciiĝo de naciaj societoj, kiel rompon kun la supernacia tradicio de UEA estus tamen troigo.[5] Kvankam la interesoj de la landaj movadoj iĝis internacie pli rimarkeblaj ol antaŭe, tiun evoluon estis ekiginta unuavice mal-

1. H.J., „Kalejdoskopo de l' esperantismo. La kontraŭjudismo", *Esperanto* 33. 1937, p. 74.
2. Cit. laŭ letero de juda esperantisto al la redakcio de *Esperanto* 33. 1937, p. 88.
3. „La plej stulta argumento", *Esperanto Internacia* 3. 1939, p. 322.
4. En aprilo 1947 la du organizajoj reunuiĝis – sub la nomo UEA, sed esence kun la organizformo de IEL.
5. Al tia interpreto tendencas Forster, *The Esperanto movement*, p. 219-220.

kontento pro la malbona financa mastrumado de UEA, ne principa kontraŭstaro al la idealo de supernacieco. Restas tamen konstati la fakton, ke organizaj aferoj tiom katenis la atenton de la funkciuloj de la neŭtrala movado, ke ili neglektis ekkoni la eksteran danĝeron en ĝia tuta dimensio.

Dum la internacia movado ĉefe okupiĝis pri si mem, la jugoslaviaj esperantistoj riproĉis ĝin pro la pasiva sinteno al faŝismo. Sub la impreso de la malpermeso en Germanio kaj de la plifortiĝanta premo en la propra lando ili turnis sin kontraŭ la senprotesta akcepto de la persekutoj, tiutempe vaste praktikata, kaj iniciatis kontraŭofensivon kontraŭ la malamikoj de Esperanto. En 1937, la aprila ĉefartikolo de *La Suda Stelo* atakis la falsan komprenon de neŭtraleco, kiu efikas kiel „kancera vundo" en la Esperanto-movado. La verkinto, la juna kroata juristo Ivo Lapenna, skribis, ke iuj esperantistoj atendas de aliaj „esti neŭtralaj en senco malebla, t.e. nenion pensi kaj nenion opinii, aŭ silenti kaj per silentado ĉion aprobadi!" Lapenna postulis, ke la „principoj de pensolibereco kaj demokrateco" devas akompani la neŭtralecon, por ke ĝi ne iĝu negativa fenomeno.[1] Du monatojn poste li kompletige proponis, ke la Esperanto-movado, troviĝante preskaŭ ĉie en defensivo, komprenu kiel sian komunan bazon „tiun ideologion, kiu estas kontraŭa al la principoj de niaj malamikoj, kaj kiu tial per si mem tute nature altrudiĝas: la ideologion de plena demokrateco, kiu samtempe signifas liberecon, egalecon, toleremon, kulturon kaj progreson". Pri tiuj valoroj necesas rekonsciigi la movadon, por ke ĝi transvivu kaj reakiru memfidon en tempo, kiam la „esperantistoj estas persekutataj kaj eĉ mortigataj nur tial, ĉar ili en alinacianoj rigardas homojn kaj ne malsuperajn estaĵojn, homojn, kun kiuj ili deziras interŝanĝi la ideojn, kontaktiĝi, amikiĝi kaj kunlabori anstataŭ reciproke detruiĝi".[2]

Tion skribis persono, kiu en septembro 1937 estis elektita kiel prezidanto de JEL, unu jaron poste eniris la estraron ankaŭ de Internacia Esperanto-Ligo kaj post la milito dum multaj jaroj

1. Ivo Lapenna, „La malneŭtrala ‚neŭtraleco'", *La Suda Stelo* 6. 1937, p. 9-10.
2. Ivo Lapenna, „La danĝero unuigas", *La Suda Stelo* 6. 1937, p. 25-26.

estis ĝenerala sekretario kaj prezidanto de UEA.[1]

La cititaj kaj aliaj similaj artikoloj en *La Suda Stelo* estas des pli atentindaj, ke tiaj opiniesprimoj poŝtulis kuraĝon en tiutempa Jugoslavio. La ĝenerale kontraŭdiktatoreca sinteno de JEL, kiu estis manifestata ankaŭ publike, ekzemple per kongresaj paroladoj, dum kiuj la oratoroj protestis kun levita pugno kontraŭ la persekutaj reĝimoj, fakte ne restis kaŝita antaŭ la Ministerio de Internaj Aferoj. Kiel sekvo, la polico konfiskis numerojn de *La Suda Stelo* kaj dissolvis lokajn Esperanto-klubojn, interalie en Osijek kaj Ljubljana.[2] Tamen, JEL ne cedis, postulante de siaj membroj krei „unuecfronton por batali kontraŭ la komunan malamikon, por venkigi fine Esperanton".[3]

Ĉirkaŭ la sama tempo, kiam la jugoslavoj postulis aktive kontraŭstari la eksterajn danĝerojn por Esperanto, ankaŭ en aliaj landoj sentiĝis malkontento pro la strut-skrupule observata principo de absoluta neŭtraleco. Inter la membroj de IEL kaj UEA kreskis, almenaŭ ekde la dua duono de la 1930aj jaroj, la deziro ne plu konfuzi neŭtralecon kun silento, kiel ili klare demonstris ekzemple dum la Universala Kongreso en Varsovio en 1937. Saluttelegramon de la kataluna registaro la ĉeestantoj kvitancis per tondra aplaŭdo[4], kaj membro de SAT, kiu partoprenis la kongreson kaj atendis renkonti tie ĉefe nepolitikemajn etburĝojn, notis kun surpriziĝo, ke la inaŭguro iĝis „manifestacio por liberalismo, humanitarismo, demokratio". Siajn impresojn li resumis per konstato, preskaŭ hereza por SAT-ano: nome, ke la burĝa Esperanto-movado „estas en sia esenco kontraŭfaŝista".[5]

Unu jaron poste, dum la Universala Kongreso en Londono, Ivo Lapenna akiris la simpatiojn de la partoprenantoj per skua

1. Kp. U. Lins, „La juna Lapenna", *Kontakto* 11. 1974, n-ro 1, p. 15-17.
2. Ĝivoje, *Historio*, ĉap. 15; Jože Kozlevčar, *Al la venko. Historiaj eventoj dum 35 jaroj de Esperanto-movado en Ljubljana*, Ljubljana 1956, p. 22-23.
3. Ivo Lapenna, „Per unueco al venko", *La Suda Stelo* 6. 1937, p. 2.
4. Georgo Verda, „La Jubilea", *Literatura Mondo* II, 7. 1937, p. 98. – Pri la evento poste raportis faŝista radiostacio en Salamanca jene: „La bolŝevika kongreso de la juda lingvo Esperanto, en Varsovio, tralegis revolucian telegramon de la ruĝa registaro de Katalunio. La partoprenantoj, bolŝevikoj k judoj, laŭte aplaŭdis." (Laŭ *Popola Fronto* 2. 1937, n-ro 22, p. 1.)
5. ESTO, „29-a Universala Esperanto-Kongreso en Varsovio", *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 2-3.

parolado, kiu estis dediĉita al senkompromisa defendo de la ideo de monda paco kaj interkonsento de la popoloj[1], kaj en novembro 1938, post kiam la anekson de Aŭstrio estis sekvinta la detruo de sendependa Ĉeĥoslovakio, oni povis legi en la organo de UEA tro longe retenitan vokon – „For la iluzion!" – kaj la jenan konfeson:

> Resti indiferenta, do neŭtrala laŭ malnova koncepto, estus perfidigo de niaj idealoj. Esperanto staras kaj sukcesas nur kun reĝimo respektanta liberecon individuan.[2]

Kiam eksplodis la Dua Mondmilito, *Esperanto* ne plu kaŝis evidentan fakton: „Plia sukceso de tiu ĉi reĝimo [la nazia] forvišus nian aferon entute."[3] Fine, do, la spertoj pri la senhalta antaŭenmarŝo de faŝismo iĝis saniga leciono por la internacia movado – en tiu senco, ke ĝi rezignis sian neŭtralecon tie, kie ĝi egalis al politika blindeco, kaj aktive rekonfirmis la internaciismajn kaj humanismajn fundamentojn de la Esperanto-movado. Sed la merito esti iniciatinta memkritikan prijuĝon de la propra pozicio grandparte apartenas al la jugoslavoj, kies firma kaj senkompromisa sinteno estis honorinda ekzemplo de rezisto en la tiama pasiveco de la neŭtralaj organizaĵoj. Kiam *Heroldo de Esperanto* ankoraŭ fine de 1937 atribuis al sukcesoj atingitaj ĉe diktatoraj reĝimoj „pli gravan signifon", ĉar tiuj havas „multe pli grandan aŭtoritaton kaj ĝenerale ankaŭ pli grandan konstantecon", ol demokrataj registaroj[4], *La Suda Stelo* rebatis tion kiel signon de submetiĝo al persekutantoj: „... se ni ne povas redoni la ricevitan vangofrapon, ***ni almenaŭ ne humiliĝu antaŭ tiuj, kiuj nin batis.*** Kontraŭe, ni fieru, ke ili – ne konsentas kun ni."[5] La movado ne estu, laŭ la jugoslaviaj esperantistoj, „ia senvertebra kreitaĵo, kiu ĉiam skuiĝas kiel la vento blovas"[6], kaj en majo

1. Vuk Jovanović, „Impona kongreso en Londono", *La Suda Stelo* 7. 1938, p. 65-66; vd. ankaŭ *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 82; *Esperanto Internacia* 2. 1938, p. 140-141.
2. H.J., „For la iluzion!", *Esperanto* 34. 1938, p. 69.
3. „Milito kaj esperantismo", *Esperanto* 35. 1939, p. 30. – simile: C.C.G. (Cecil C. Goldsmith), „La monstro faras saltojn", *Esperanto Internacia* 4. 1940, p. 97.
4. *Heroldo de Esperanto* 18. 1937, n-ro 45 (952), p. 1.
5. Ivo Lapenna, „La malpermeso", *La Suda Stelo* 7. 1938, p. 17-18.
6. B. Borjan, „Ni kuraĝe diru...", *La Suda Stelo* 8. 1939, p. 13; represita en *Honore al ili*, p. 94.

1939 ilia kongreso en Karlovac unuanime akceptis rezolucion proponotan al la Universala Kongreso en Bern, kiu konstatis, ke IEL neniam protestis, post kiam la movado en iu lando estis malpermesita, kaj sekve postulis, „ke oni klare diru kion ni deziras kaj ke ni kontraŭbatalu tiujn kiuj persekutas nian movadon".[1]

Baldaŭ devis eksilenti *La Suda Stelo* mem. Ĝia lasta numero aperis en marto 1941. La 10an de aprilo, germanaj trupoj invadis Zagreb, sur kies stratoj ankoraŭ pendis afiŝoj reklamantaj por la printempaj kursoj de Esperanto. Jam la sekvantan tagon la kroat-faŝista polico enpenetris la ejojn de la Esperanto-kluboj, detruis aŭ bruligis ilian havaĵon kaj arestis grandan nombron de esperantistoj.[2] Inter la unuaj viktimoj de la teroro de la „ustaŝoj" troviĝis pluraj membroj de la komitato de JEL. El tiuj esperantistoj, kiuj eskapis arestadon, la plimulto aliĝis al la Naciliberiga Movado kaj ĝiaj partizanaj taĉmentoj. Laŭ la akireblaj informoj[3], 340 esperantistoj el 90 diversaj lokoj de Jugoslavio falis en la batalo aŭ estis mortigitaj en karceroj kaj koncentrejoj; el ili, 37 estis poste proklamitaj kiel „popolaj herooj". La jugoslavia Esperanto-movado, perdante ĉiun trian organizitan esperantiston[4], suferis teruran elprovon de sia fido je la fina supereco de kulturo kaj progreso kontraŭ la fortoj de barbareco.

La infera fajrobano de la Dua Mondmilito ne preteriris, kiel ni vidis, ankaŭ la movadojn en aliaj landoj. IEL kaj UEA per la perado de korespondaĵoj kaj la sendado de medikamentoj kaj nutraĵoj klopodis iom mildigi la vivkondiĉojn de multaj suferantoj en diversaj partoj de Eŭropo, sed la esperantista interhelpo ne plu povis esti tiel efika kiel dum la Unua Mondmilito. Kelkfoje, esperantistoj povis elsaviĝi, ĉar en kriza situacio soldato aŭ eĉ SS-ano hazarde malkovriĝis kiel samlingvano.[5] En la

1. *La Suda Stelo* 8. 1939, p. 62; vd. ankaŭ Borjan, „Esperanto atakata – Esperanto batalanta", samloke, p. 61-62.
2. Letero de Ivo Lapenna; eltiraĵo en *Esperanto Internacia* 8. 1944, p. 54-55.
3. *Honore al ili*, p. 7.
4. Zlatnar, „Ideoj kaj agoj", p. 17.
5. Ekzemploj pri saviĝo dank' al renkonto de esperantisto: *American Esperanto Magazine* 67. 1953, p. 83; *Sennaciulo* 25. 1954, n-ro 5, p. 3; *Germana Esperanto-Revuo* 8. 1955, p. 94; *Paco* 4. 1956, n-ro 34/35, p. 16; *La Libera Esperantisto* 1961, n-ro 60, p. 7. – La aŭstro Karl Nell estis liberigita el la koncentrejo Buchenwald, post kiam brita esperantisto subskribis garantion por li: *ELNA Newsletter* 1986, jul./aŭg., p. 4.

koncentrejo Dachau la jugoslavia arestito Jože Kozlevčar gvidis kurson de Esperanto, kiun partoprenis samsortanoj el kelkaj nacioj.[1] En la koncentrejo Stutthof apud Gdańsk de mano al mano iris Esperanta lernilo, kiun la polo Albin Makowski tie estis kompilinta laŭmemore.[2] Kaj en Nederlando dum la nazia okupo du esperantistinoj, Gesine kaj Ali Obbes, riskante sian propran vivon dum jaroj kaŝis en sia loĝejo judan paron.[3] Estas multaj aliaj ekzemploj, kiuj montras, ke dum la milito esperantistoj plue uzis sian lingvon kaj eĉ ke Esperanto povis alporti helpon.

Feliĉe, post la milito la internacia Esperanto-movado tuj konsciis sian moralan respondecon al la multnombraj viktimoj de faŝismo. La 14an de aprilo 1946, polaj esperantistoj hisis en la ŝtona dezerto de Varsovio sian verdan flagon de espero – en tiu loko, kie iam staris la hejmo de Zamenhof. Tio ĉi estis gesto simbolanta la nevenkitan entuziasmon por Esperanto. Sed eĉ pli grave estis, ke la movado, akceptante i.a. la impulsojn venintajn el Jugoslavio, likvidis sian antaŭmilitan senkolorecon kaj indiferenton pri la sociaj kaj politikaj manifestiĝoj de la homa vivo, de kiuj la lingvo kiel socia fenomeno ne estis disigebla. Sub la impreso de la sovaĝaj atakoj de la nazioj kontraŭ ĉiuspecaj popolinterfratigaj celadoj, estis akirita nova memfido pri la idea signifo de la laboro por Esperanto.

Aliflanke, ne sufiĉis simple daŭrigi sur la vojo de idealismo, kiom ajn tiu havis la honoron esti atakata de la faŝistoj. La „naiva internaciismo de l' tempo de Zamenhof estas for"[4], konstatis la organo de UEA fine de 1946, kaj efektive la „interna ideo" en sia tradicia, iom neklara formo kaj pro sia inklino al trogravigo de la rolo de Esperanto ne povis taŭgi en la postmilita rekonstrua periodo. Tion komprenante, la gvidantoj de la neŭtrala movado, unualoke la jugoslavo Ivo Lapenna, ne klopodis formuli novan propran ideologion de esperantismo, sed anstataŭe deklaris la

1. *Honore al ili*, p. 76-79; vd. ankaŭ Francisko Haiderer, „Esperanto en la koncentrejo", *Aŭstria Esperanto-Revuo* 30. 1975, n-ro 10/12, p. 11-12.
2. Janusz Sulzycki, „Intervjuo kun numero ‚P 23407'", *Paco* 1979, GDR-eldono, p. 12-15.
3. Letero de s-ino Prent, *Israela Esperantisto* 1986, n-ro 92 (feb), p. 8-9.
4. „Konsideroj pri organizo", *Esperanto* 39. 1946, p. 43.

Esperanto-movadon ligita al valoroj ne validaj nur por esperantistoj, sed pli vaste agnoskataj: nome al la homaj rajtoj.

Kiam UEA meze de 1947 estis restarigita kiel la reprezenta organizaĵo de la internacia Esperanto-movado, ĝi aldonis al sia Statuto alineon, laŭ kiu „la respekto de la homrajtoj estas por ĝia laboro esenca kondiĉo".[1] Per tio UEA substrekis, ke ĝia neŭtraleco rilate al politiko, raso kaj religio ĉesas tie, kie okazas malobservoj de la fundamentaj homaj rajtoj kaj minacas tendencoj malamikaj al la evoluo de paco kaj internacia kunlaboro. UEA, do, redifinis la principon de neŭtraleco; de tiam oni povas nomi ĝin aktiva neŭtraleco – diference de la senkuraĝa, pasiva neŭtraleco praktikata en la uragano de la persekutoj. Unue, ebligante al la membroj konservi la propran mondkoncepton kaj libere esprimi sian opinion *per* Esperanto, la neŭtraleco evitas la danĝeron degeneri al idea malriĉiĝo kaj uniformeco de pensado. Kaj due, en la eksteraj rilatoj ne dependigante sin de sociaj movadoj kaj politikaj fluoj, per tiu sama neŭtraleco UEA povas gardi sian memstarecon. Je tiu sendependeco UEA sekve povas apogi sin por levi sian voĉon tiam, kiam ĝi vidas siajn interesojn minacataj, precipe por protesti kontraŭ lingva diskriminacio, kies plej ekstreman formon – persekutadon – tiel ofte spertis Esperanto, kaj ankaŭ por averti kontraŭ politikaj evoluoj, kiuj endanĝerigus la bazajn antaŭkondiĉojn de la laboro por Esperanto en monda skalo.

Esperanto sukcesis transvivi la faŝisman epokon, pruvi sian vivkapablon malgraŭ la premo kaj persekuto de senindulgaj malamikoj. Nur tial, ke la movado samtempe lernis la lecionon el propraj eraroj kaj transiris al pli realeca juĝo pri la ekstera mondo, estas pravigeble diri ankaŭ, ke Esperanto venkis la faŝismon.

1. Tio ĉi okazis proksimume unu jaron kaj duonon antaŭ la akceptiĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj (10-12-1948).

3. PERSEKUTOJ EN ORIENTA AZIO

3.1. *ĈINIO*

Nitobe Inazô, kiel ĝenerala vicsekretario de Ligo de Nacioj ĵus spertinte la fortan kontraŭstaron de la franca registaro al Esperanto, konstatis en 1924: „Kiom ajn ĝi eble renkontos antaŭjuĝon kaj malamikecon en Eŭropo, Esperanto estis vastanime akceptita en la Fora Oriento."

La observo estas ĝusta – kun rezervo, tamen, kiun Nitobe mem tuj aldonas: „Ĝi estis akuzita kiel kanalo de radikala pensado..."[1] Efektive, kvankam Esperanto, lingvo naskita en Eŭropo, trovis multe da simpatioj en Orienta Azio kaj apenaŭ renkontis reziston bazitan sur kontraŭblankula ksenofobio, ĝi ja en tiu mondparto suferis persekutojn – sed tiuj estis direktitaj preskaŭ ekskluzive kontraŭ ĝia vera aŭ supozata ligiteco kun revoluciaj strebadoj. Siavice, la intensa atento, per kiu la aŭtoritatoj en orientaziaj landoj sekvis la aktivadon de la esperantistoj, substrekas la fakton, kiel rapide la lingvo ĉesis esti konsiderata kiel nura bela ludaĵo por okcidentemaj intelektuloj. Ĉinio kaj Japanio estas la solaj landoj ekster Eŭropo kun lingvoj nehindeŭropaj, kie ekfunkciis Esperanta movado jam antaŭ la Unua Mondmilito, kaj ĝia disvolviĝo tra la postaj jardekoj pruvas, ke la okupiĝo de orientazianoj pri Esperanto estis multe pli, ol simptomo de troa enamiĝo al nove furorantaj pensatingoj el Eŭropo.

En Ĉinio, Esperanto ŝajnis eĉ bele akordiĝi kun multjarcenta tradicio de utopia pensado.[2] La granda reformisto Kang Youwei, kiu ĉerpis kaj el la konfucea heredaĵo kaj el la moderna anarkiismo, okupiĝis en 1887 – la naskiĝjaro de Esperanto – pri la projekto de „Instituto de Universala Lingvo"; klarige li skribis, ke lerni multajn lingvojn estas malŝparo de homa energio kaj

1. Inazo Nitobé, *The use and study of foreign languages in Japan*, Genève 1924, p. 26; represita en *The works of Inazo Nitobe*. Vol. IV, Tokyo 1972, p. 461.
2. Historia resumo estas: Hou Zhiping, „La Esperanto-movado en Ĉinio", *El Popola Ĉinio* 1982, n-roj 2-4.

malutilas la homan menson.[1] La ideo de Kang pri mondlingvo, forpuŝonta la naciajn lingvojn, formis parton de grandioza vizio pri unueca monda ŝtato kaj tuthomara harmonio – „Granda Komunaĵo", kiun estros demokratia mondregistaro, kiu ne plu konos lingvan diversecon kaj landlimojn, kie ĉesos esti klasoj, rasoj kaj familioj kaj regos inter la homoj eterna paco kaj senmakula feliĉo.[2]

La fama utopia verko de Kang Youwei estis finverkita en 1902. Kvankam nur multe pli malfrue ĝi estis publikigita[3], eĉ fragmenta scio certigis al ĝi grandan influon je ĉinaj revoluciuloj. Ankaŭ la argumentoj de la unuaj pledantoj por Esperanto montras frapan similecon al la ideoj de Kang. Surbaze de la konvinko, ke la skribosistemo kaj komplikeco de la ĉina lingvo ne konformas kun la bezono radikale modernigi la landon, la gazeto *Xinshiji*, ekde 1907 eldonata de ĉinaj anarkiistoj en Parizo, postulis la ĝeneralan enkondukon de Esperanto en Ĉinio:

> ... por igi Ĥinujon ĉiutage antaŭeniri en la direkto al la civilizacio, necesas, ke la edukado estu larĝe disvastigita tra la tuta Imperio. Tio estos nefarebla, se oni ne forigos la ĥinan lingvon kaj anstataŭigos ĝin per Esperanto.[4]

Ne ĉiuj povis subteni tiel ekstreman postulon, sed samtempe ankaŭ inter ĉinaj anarkiistoj en Tokio, kiuj estis malpli senkritike flamiĝemaj por okcidentaj modeloj, ol iliaj parizaj samideanoj, Esperanto estis tre populara. En 1908 ilia revuo *Hengbao* notis kun fiero, ke ĝi estas la unua gazeto en Azio, kiu pledas por Esperanto kiel la plej facila interkomprenigilo de diverslandaj revoluciuloj.[5] Plej proksimen al la imagoj de Kang Youwei pri

1. Kung-chuan Hsiao, *A modern China and a new world. K'ang Yu-wei, reformer and utopian, 1858-1927*, Seattle, London 1975, p. 53, 460.
2. Laurence Thompson (trad.), *Ta T'ung Shu. The one-world philosophy of K'ang Yu-wei*, London 1958, precipe p. 93-94, 101-102; kp. Wolfgang Bauer, *China und die Hoffnung auf Glück. Paradiese, Utopien, Idealvorstellungen*, München 1971, p. 423-424.
3. Partoj aperis en 1913 kaj 1929, la kompleta verko nur en 1935.
4. Cit. laŭ „Esperanto kaj la ĥina lingvo", *The British Esperantist* 4. 1908, p. 107 (parta traduko de artikolo de *Xinshiji*). – Notinde, Esperanto ankoraŭ nun por la ĉinoj kvazaŭ identas, kontraŭ sia propra pretendo, kun mondlingvo: Estas uzataj por ĝi ideografiaĵoj, kiuj havas la signifon „mondlingvo" (*shijieyu*).
5. Vd. la citaĵon en *Japana Esperantisto* 3. 1908, p. 74; ankaŭ en *Internacia Socia Revuo* 2. 1908, p. 95.

La Voĉo de l'Popolo

Ĉiusemajna ĥina kaj Esperanta gazeto, pri ĉio, 'kio kondukas socian revolucion kaj progresigas universalan unuiĝon.

JARABONO | PAGMANIERO

REKLAMO

la jaro — 20 Aŭgusto 1913 — No. 1

Redakcio kaj Administracio:

Sifo, 8. Chih-Sin Tung St., Sai-Kwan, Canton (Ĥinujo)

AL LA SAMIDEANOJ DE TUTMONDO

Komunismo;
Sindikatismo;
Vegetarismo;
Universala lingvo;
Universala unuiĝo.

Sifo, anarkiisto kaj esperantisto, en 1913 komencis eldoni ĉinan-Esperantan revuon por revoluciuloj. *Dekstre:* Hujucz (1896-1986) dum jardekoj elstaris en la ĉina Esperanto-movado.

La ĉina verkisto Lu Xun (Lusin; sidas dua de dekstre) kaj Vasilij Eroŝenko (tria de dekstre) kune kun pekinaj esperantistoj en majo 1922.

estonta paradizo, en kiu unueciĝos ankaŭ ĉiuj lingvoj, venis tamen la anarkiisto Liu Shifu (Sifo), kaj li en la lando mem klopodis fari la unuajn paŝojn por la atingo de tiu celo. Provante krei simbiozon inter la ekstrema okcidentemo de la parizanoj kaj la modera tradiciemo de la tokianoj, Sifo kunfandis naciecajn konsiderojn kaj kosmopolitajn idealojn al fascina perspektivo: al la ideo, ke Ĉinio estas la antaŭbatalanto de monda revolucio, en kiu kuniĝos en unueco la okcidenta kaj orienta kulturoj.[1] Kaj la mondlingvo, pri kiu revis Kang, estis por Sifo jam ekzistanta: Esperanto. Post la falo de la dinastio en 1911, li senlace agis por transplanti sian revolucian idealon en la ne tre invitan realecon de la skuata kaj postrestinta Ĉinio. En 1913 li ekeldonis la unuan enlandan anarkiisman revuon, *Minsheng* (*La Voĉo de la Popolo*), kiu samtempe estis propaganda revuo por Esperanto.[2] Tiel ofereme Sifo dediĉis sin al sia laboro, ke li ruinigis sian sanon kaj mortis, nur 31jara, en 1915.

La starto de Esperanto en Ĉinio, kiu estis apenaŭ disigeble ligita kun la strebo al revolucio, necese prezentis hipotekon por la postaj jaroj, ĉar la atendoj pri fundamenta ŝanĝo en la ĉina socio ne plenumiĝis. Jam en 1913 Sifo devis dufoje ŝanĝi la redaktejon de sia revuo[3], kaj la respondeculoj de la semajna revuo *Ĥina Socialisto*, kiu nomis sin „la unua socialista gazeto en ĥina lingvo"[4], devis post nur kvinmonata apero fuĝi al la Malaja Insularo. Dekreto de la unua respublika edukministro, Cai Yuanpei, pri la enkonduko de Esperanto kiel nedeviga objekto en elementajn lernejojn[5] neniam havis praktikan sekvon. Ne pasis la interesiĝo pri Esperanto: Antaŭ kaj dum la Kultura Revolucio de 1919, en ligo kun la demando de reformo de la ĉina

1. Kp. Bauer, p. 490-494.
2. La revuo, de kiu aperis 34 n-roj, regule havis paĝojn en Esperanto. Komence, en la ĉinlingva parto preskaŭ ekskluzive aperis tradukoj el *Internacia Socia Revuo* pri la revolucia movado en diversaj landoj.
3. De Kantono li fuĝis unue al Makao, poste al Ŝanhajo. En n-roj 3 ĝis 29 kiel eldonloko estis kamuflo-cele indikita Tokio.
4. *Internacia Socia Revuo* 7. 1913, p. 162-163. – *Ĥina Socialisto* (ĉine *Rendao zhoubao*) ekaperis fine de januaro 1913 en Ŝanhajo.
5. Vd. la eltiraĵon el letero de Cai al Sebert: *La Revuo* 7. 1912/13, n-ro 1 (73), sept. 1912, aldono, p. 7. Kp. William J. Duiker, *Ts'ai Yüan-p'ei. Educator of modern China*, University Park, London 1977, p. 61-62; Hou Zhiping, „Cai Yuanpei kaj Esperanto", *El Popola Ĉinio* 1982, n-ro 7, p. 10-11.

lingvo, intelektuloj kiel Qian Xuantong, Hu Shi kaj Chen Duxiu arde diskutis, kiel adapti la ĉinan lingvon kaj skribon al la modernaj bezonoj kaj ĉu entute orientaj lingvoj taŭgas por sciencaj celoj.[1] La plej radikala el ili estis Qian, kiu senhezite proponis rezigni la ĉinajn ideografiaĵojn kaj transiri al Esperanto.[2] Kvankam la pesimismon pri la reformeblo de la ĉina lingvo feliĉe ne ĉiuj dividis, Esperanto estis ĝenerale alte taksata. Al tio kontribuis ankaŭ ĝia efika servado kiel „pontolingvo": Multaj verkoj de orienteŭropaj kaj aliaj malmulte konataj literaturoj estis unuafoje ĉinigitaj el Esperanta traduko.[3] La simpatio de progresemaj intelektuloj tamen ne povis ŝanĝi la situacion, ke Esperanto nur malrapide disvastiĝis inter la amasoj, kaj tiu simpatio krome igis la movadon vundebla, kiam establiĝis reĝimo ne inklina al revoluciaj eksperimentoj. Ĉar en Ĉinio ne ekzistis forta neŭtrala movado, kiu estus povinta formi kontraŭpezon, ĉiufoje kiam poste Ĉiang Kajŝek rompis unu taktikan aliancon kun la komunistoj, ankaŭ la esperantistoj riskis iĝi viktimoj de la severiĝo de la enlanda klimato.

En la komenco de la 1930aj jaroj Ŝanhajo ekfirmiĝis kiel centro de esperantista aktivado. Fine de 1931 tie fondiĝis Ĉina Proleta Esperantista Unio, konsistigata ĉefe de studentoj, instruistoj kaj ĵurnalistoj.[4] Tiu ĉi mem koncentris sin al subtera agado, sed ĝia kerno, Ŝanhaja Esperantista Ligo (ŜEL), elpaŝis publike. Kvankam ĝia tuta oficejo perdiĝis en cindro pro japana atako en 1932, ŜEL komencis en decembro de tiu jaro eldoni la monatan gazeton *La Mondo*, kiu baldaŭ iĝis kvazaŭ la centra organo de la Esperanto-movado en Ĉinio, kaj ĝis la militeksplodo de 1937 kvante kaj kvalite atingis senprecedence altan nivelon de agado.

1. Por superrigardo pri tiu diskuto vd. Chun-Jo Liu, *Controversies in modern Chinese intellectual history. An analytical bibliography of periodical articles, mainly of the May Fourth and post-May Fourth Era*, Cambridge, Mass. 1964, p. 1-7.
2. John DeFrancis, *Nationalism and language reform in China*, Princeton 1950, p. 68; Kuraisi Seishirô, *Kanzi no unmei* (La sorto de la ideografiaĵoj), Tôkyô 1966, p. 79.
3. Sun Jung (Sun Yong), „Alilandaj literaturoj elesperantigitaj en Ĉinio", *El Popola Ĉinio* 1959, n-ro 6, p. 234-235.
4. *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 87; 2. 1932, p. 10. – Vd. ankaŭ Ĉ. Ĉen (Zhang Qicheng), „Rememoroj pri Ĉina Proleta Esperantista Unio", *El Popola Ĉinio* 1978, n-ro 4, p. 14-16.

Eble la plej rimarkinda laboro, kiun faris la ŝanhajaj esperantistoj, estas ilia kontribuo al la skribreforma movado. Tiukampe aktivis precipe Ye Laishi, kiu en la Popola Respubliko fariĝis vicprezidanto de la Komitato pri Skribreformo. Ekde 1933, i.a. per novkreita lingvoscienca aldono al sia revuo *La Mondo*, ili unuafoje konatigis en Ĉinio novan sistemon de latinigo, „Latinxua", kiu estis kompilita en Soveta Unio; prezentan artikolon pri tiu sistemo, aperintan en moskva Esperanto-revuo[1], la ŝanhaja esperantisto Jiao Feng (Tikos) tradukis ĉinen, kaj la sama estris ankaŭ la unuan grupon de apogantoj de „Latinxua", fondita en aŭgusto 1934.[2] La nova latiniga projekto, tiel do per Esperanto donita al publika atento, ricevis la subtenon de la verkistoj Lu Xun, Guo Moruo, Ba Jin (Bakin[3]) kaj Mao Dun, same de Mao Zedong – kaj tiuj pli-malpli emfaze simpatiis ankaŭ al Esperanto. La agado de ŜEL kaj la popularigaj artikoloj de *La Mondo* dokumentis, ke Esperanto ne taŭgis nur en periodo de ikonoklasmo, ke la utopiaj revoj de la unua generacio de ĉinaj esperantistoj intertempe cedis lokon al pli realec-konforma kompreno pri la urĝaj bezonoj:

> **Dank' al la sociologia lingvoscienca literaturo aperinta en esp-o k la sperto travivita de esp-o mem, progresemaj esp-istoj en Ŝanhajo multe servas al la nun tre disvastiĝanta batalo por „Amasa Lingvo" (Dacunju en ĉina lingvo) – lingvo komprenebla, legebla, skribebla por la vastaj ĉinaj amasoj, kiuj estas fremdaj al ĉina ideografo.[4]**

Tia starpunkto ne estis akceptebla por la guomindanga registaro. Ĝia malaprobo kontraŭ la latiniga sistemo, kulminanta en 1935, kiam estis mortpafita la kunkreinto de „Latinxua", Qu Qiubai, etendiĝis ankaŭ al la esperantistoj, kiuj pionire popularigis la sistemon. En 1937 ĉiutendencaj esperantistoj okazigis en Hankoŭ fondkongreson de Ĉina Esperanto-Ligo, sed la registaro rifuzis

1. E. Sjao (= Xiao San), „La alfabeto de l' ĉina revolucio". Trad. V. Elsudo (= Viktor Kolĉinskij), *La Nova Etapo* 1. 1932, p. 80-83.
2. **DeFrancis, p. 109-110, 114-115; Kuraisi, p. 109.**
3. Lao Bai, „Vizito al verkisto Bakin", *El Popola Ĉinio* 1979, n-ro 9, p. 15-17; U. Lins, „Bakin: verkisto, anarkisto, esperantisto", *l' omnibuso* 7. 1970, n-ro 5 (39), p. 1-4.
4. *La Mondo* 2. 1934, p. 36; vd. ankaŭ Ĵelezo (= Ye Laishi), „Esperanto kaj reformado de la ĉina skriba lingvo", *El Popola Ĉinio* 1984, n-ro 3, p. 13, 22.

ĝin leĝe registri.[1] La sekreta polico ofte aperis en Esperanto-grupoj aŭ en novaj kursoj, vizitis esperantistojn en iliaj hejmoj, sekvis ilin tra la stratoj, kontrolis poŝtaĵojn, malpermesis kaj arestis. En Kantono, du ĉinoj, laŭdire malliberigitaj nur pro sia amo al Esperanto, ankoraŭ en karcero, kiun ili mem ne transvivis, kaŝe instruis la lingvon al samsortanoj.[2] La subpremo eĉ ne ŝparis esperantistojn simpatiantajn al Guomindang. Foje la guomindanga veterano Wu Zhihui estis petita helpe interveni, ĉar oni memoris, ke iam li, en la pariza *Xinshiji*, entuziasme rekomendis Esperanton kiel la lingvon de estonta mondo bazita sur anarkiismo. Tiutempe li proklamis, ke en la venontaj tridek jaroj oni uzu la ĉinajn klasikaĵojn plue nur kiel necesejan paperon[3], sed ĉ. 1940, post la paso de tri jardekoj, lia revolucia fervoro estis tiom estingiĝinta, ke li nete rifuzis helpi: „Ho, nun ne estas ĝusta tempo por esperantaĵo!"[4]

Nur la nacia batalunueco kontraŭ la antaŭenmarŝo de la japana imperiismo donis al la ĉinaj esperantistoj iom pli da agli-bereco. Sub la devizo „Per Esperanto por la liberigo de Ĉinio!" ili tre efike uzis la lingvon por informi eksterlandanojn pri la bataloj kaj suferoj de Ĉinio dum la milito, eldonante plurajn Esperantajn revuojn, i.a. *Ĉinio hurlas, Voĉoj el Oriento, Orienta Kuriero* kaj – plej longtempe – *Heroldo de Ĉinio*; ĉi-lasta havis legantojn en pli ol 850 urboj de 63 landoj.[5] Sub la titolo *Ĉinio batalos ĝisfine* en 1940 aperis kolekto de la paroladoj de Ĉiang Kajŝek. Eĉ en la milita periodo oni ne neglektis la disvastigon de Esperanto en la propra lando: Koresponda Lernejo en Chongqing eldonis en 1944 preskaŭ milpaĝan Plenan Vortaron Esperantan-Ĉinan kaj sukcesis varbi ĉirkaŭ trimil lernantojn.[6] Ankaŭ en Yan'an, la

1. Similaj, same vanaj provoj starigi tutlandan organizaĵon estis faritaj en 1940 kaj 1945.
2. Kiugi, „Meditoj okaze de la 75a jaro de Esperanto", *Paco* 9. 1962, n-ro 102/103 (aŭg.), ĉina eldono, p. 10.
3. Bauer, p. 483.
4. Lupid, „Ĉan' kaj Ĉerk' kontraŭ Esperanto", *Ĵurnalisto* 1947, n-ro 2 (jul.), p. 11.
5. Tikos kaj Giani, „Esperanto en Ĉinio", *El Popola Ĉinio* 1. 1950, n-ro 2 (jun.), p. 6. – De *Heroldo de Ĉinio* aperis inter junio 1939 kaj decembro 1944 entute 74 numeroj.
6. Lilin, „Ĉiam antaŭen!", *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 11/12 (jul./aŭg. 1947), p. 26 (parta represo el *Ĵurnalisto*).

centro de komunista rezistado kontraŭ la japanoj, la lingvo estis instruata en la Kontraŭjapana Milita kaj Politika Universitato kaj en la Lusin'a Kolegio de Artoj[1]; en la vintro de 1939/40 la tieaj esperantistoj elektis Mao Zedong honora komitatano de sia asocio[2] kaj ricevis de la komunista gvidanto favoran deklaron pri Esperanto.[3]

Mencion meritas la partopreno de la japanino Hasegawa Teru en la kontraŭjapana kampanjo de la ĉinaj esperantistoj. Aktivulino de la japana proleta Esperanto-movado, ŝi forlasis Japanion en aprilo 1937 por sekvi sian ĉinan edzon. Ankoraŭ samjare ŝi direktis al la japanaj esperantistoj publikan leteron: „Venko de Ĉinio estas ŝlosilo de morgaŭo de Tutazio."[4] Post kiam per Radio Hankoŭ ŝi japanlingve turnis sin al siaj samnacianoj, tio havigis al ŝi de japanaj gazetoj furiozajn insultojn, kiel „sirenvoĉa naciperfidulino"[5], sed ŝiaj ĉinaj amikoj enfermis ŝin en sian koron kiel „pacan kolombon".[6] Efektive, Hasegawa Teru estis rara specio de japan(in)o, kiu per Esperanto atingis veran fratecon kun ĉinoj, praktikante formon de solidareco, fundamente diferenca de la slogano pri „tutazia kunprospero", per kiu hipokrite maskis sin la hegemonia strebado de la japana militismo.[7]

Tuj post la sukcesa fino de la kontraŭjapana milito, kiam Ĉiang Kajŝek refoje kunpuŝiĝis kun siaj enlandaj malamikoj, ankaŭ la komunistaj esperantistoj estis denove persekutataj. La plej konata viktimo estas la ĵurnalisto Xu Shouzhen, unu el la gvidantoj de la Koresponda Lernejo en Chongqing ekde 1940 kaj

1. Hju Hong kaj Huang Dong, „En la tagoj kiam ni okupiĝis pri Esperantaj laboroj en Jan-an", *El Popola Ĉinio* 1970, n-ro 1, p. 45-46; Wang Zhongfang, „Rememoro pri Esperanto-movado en Yan'an", *El Popola Ĉinio* 1983, n-ro 12, p. 2-4.
2. *Voĉoj el Oriento* 3. 1940, n-ro 25 (jan.), p. 8.
3. Vang Taŭ, „Prezidanto Maŭ Zedong pri Esperanto", *El Popola Ĉinio* 1978, n-ro 1, p. 2-4.
4. *Ĉinio hurlas*, n.s. 3. 1937, n-ro 4 (5 nov.), p. 7; represita en *Verkoj de Verda Majo*, Beijing 1982, p. 377-380.
5. *Miyako sinbun*, 1-11-1938; cit. Tone Kôiti, *Teru no syôgai* (La vivo de Teru), Tôkyô 1969, p. 66.
6. Elpin (= An Ousheng), „Paca kolombo" (poemo), *Orienta Kuriero* 2. 1939, n-ro 1 (9), p. 23.
7. Ŝiaj verkoj, aperintaj sub la plumnomo „Verda Majo", estas i.a.: *Flustr' el uragano*, Chungking 1941; kaj *En Ĉinio batalanta*, Chungking 1945. Vd. la kolekton *Verkoj de Verda Majo*, Beijing 1982.

tradukinto de revoluciaj poemoj kaj kantoj. Sub la plumnomo Eltunko li post la milito tenis viglan kontakton kun esperantistoj en Eŭropo, kaŝe eldonante la bultenon *Ĵurnalisto*, en kiu li per tre fortaj esprimoj atakis la guomindangan registaron. En decembro 1948 Eltunko estis arestita en Chengdu. Dum sia restado en la karcero li instruis Esperanton al kunuloj (el kiuj multaj poste pereis), sentime kantis la Internacion kaj insultis la direktoron de la malliberejo. Lia sorto decidiĝis komence de decembro 1949, kelkajn tagojn, antaŭ ol la Popola Armeo de la jam proklamita Ĉina Popola Respubliko atingis Chengdu: Eltunko rifuzis surgrimpi la aŭton irontan al ekzekutejo kaj tiam estis surloke mortpafita de la sekreta polico. Oni elfosis la mutilitajn kadavrojn de Eltunko kaj ĉirkaŭ tridek aliaj viktimoj nur post la alveno de la Ruĝa Armeo, kiam la ĉina Esperantomovado eniris novan etapon de sia historio.[1]

3.2. *JAPANIO*

La progreson de Esperanto en Ĉinio plej multe bremsis ĝeneralaj faktoroj kiel la politika nestabileco, la ekonomia mizero de la amasoj, la militoj. Dume, en Japanio, kun ĝia almenaŭ surface pli stabila sistemo enlanda, regis pli promesplenaj antaŭkondiĉoj por disvolviĝo de la movado, ĉar tie, krom revoluciemaj personoj, plej malsamaj grupoj malkovris la utilon de Esperanto por siaj respektivaj celoj. Ekzemple, liberaluloj entuziasme akceptis ĝin kiel unu admirindan rezulton de okcidenta inventemo, naciistoj vidis en Esperanto ilon por kontraŭbatali la lingvan imperiismon de Eŭropo[2], kaj medicinistoj, sopirante al pli facila scienca komunikado, ofte aperigis studojn aŭ resumojn en Esperanto.

1. Laŭlum (= Li Shijun), „El la liberigita Ĉinio", *Internacia Kulturo* 5. 1950, n-ro 5/6, p. 20; Honfan, „Nova sanga ŝuldo", *Popola Mondo* 1. 1950, n-ro 4, p. 4-5, 14 (samnumere, aliaj artikoloj de kaj pri Eltunko); Hou Zhiping, „Memore al kamarado Eltunko", *El Popola Ĉinio* 1980, n-ro 12, p. 20-21.
2. En projekto pri radikala reformo de Japanio, la naciisto Kita Ikki en 1919 pledis por abolo de la deviga instruado de la angla lingvo en lernejoj kaj por alpreno de Esperanto kiel dua gepatra lingvo: George M. Wilson, *Radical nationalist in Japan. Kita Ikki, 1883-1937*, Cambridge, Mass. 1969, p. 57.

La naskiĝo de organizita movado en Japanio datiĝas de 1906. Meze de tiu jaro estis fondita Japana Esperantista Asocio (JEA) kaj aperis lernolibro, kompilita de la fama verkisto Hutabatei Simei. La unua ĝenerala kunveno de JEA, en septembro 1906, elektis dek-unu konsilantojn, inter kiuj troviĝis Kuroita Katumi, aŭtoritata historiisto kaj komence la ĉefa motoro de la asocio, krome la menciita Hutabatei kaj la poste famiĝontaj radikaluloj Ôsugi Sakae[1] kaj Sakai Tosihiko. Tiun ĉi heterogenan rondon, kiu konkorde staris apud la lulilo de Esperanto en Japanio, honorprezidis grafo Hayasi Tadasu, la ministro de eksterlandaj aferoj.[2]

Kiom ajn tia konsisto de la gvidantaro de la frutempa movado demonstris la pretecon toleri la kunekziston de malsamaj individuaj opinioj, kiam ili estas kunigitaj per la komuna deziro konatigi Esperanton al la japana publiko, la fervoro de socialistoj, la timoj de konservativuloj kaj la subprema minaco de la registaro ne povis favori longdaŭran konservon de la harmonio. Iĝis konate, ke multaj homoj en la intelekta ĉirkaŭaĵo de la anarkiisto Kôtoku Syûsui, ekzekutita en 1911, simpatiis al Esperanto, lernis aŭ eĉ, kiel Ôsugi, instruis ĝin, kaj kvankam Kuroita dum kelka tempo povis teni sian ŝirman manon super la radikalaj membroj de JEA, tiu laŭokaza protekto ne estis garantio kontraŭ leviĝantaj suspektoj, ke esperantistoj estas unu plia variaĵo de la portantoj de „danĝeraj ideoj".

La eksterordinaran allogon de Esperanto je progresemaj spiritoj, kiu restis konsistiga parto de la japana movado, kiel ankaŭ la nedoktrinecan medion, en kiu la lingvo trovis malfermitajn pordojn, ilustras la fakto, ke grava ĝermo de radikala humanismo, la „Societo de Novaj Homoj" (Sinzinkai), fondita en 1919 de studentoj de la prestiĝa Universitato de Tokio, prezentis sur la laŭvicaj titolpaĝoj de sia unua revuo, *Demokurasii* (Demokratio), la portretojn de Rousseau, Tolstoj, Marx, Kropotkin, Lincoln, Rosa Luxemburg – kaj de Zamenhof; la daŭriga revuo *Senku* (1920) portis la subtitolon *La Pioniro*. Esperanto ludis rolon

1. Vd. Miyamoto Masao, *La morta suito. Oosugi Sakae, anarkiisto-esperantisto*, Kioto 1984.
2. K. Kroita, „La historio de Japana Esperantista Asocio", *The British Esperantist* 3. 1907, p. 197-199.

Membroj de Esperanta Lernejo, fondita en septembro 1906 en Tokio. En la mezo la fondinto Ôsugi Sakae, dekstre apud li Kuroita Katumi. Tute dekstre Tihu Tosio.

Miyake Sihei (1901-1980) dum jardekoj estis sekretario de Japana Esperanto-Instituto.

Reklama folio por la sesvoluma *Proleta kurso de Esperanto* (Tokio 1930-31).

ankaŭ en la unua organo de la prolet-literatura movado, *Tanemakuhito*, kiu vastanime kunigis diversajn, baldaŭ ne plu akordiĝontajn marksismajn kaj nemarksismajn revoluciemajn fluojn. Unu el ĝiaj fondintoj, la dramisto Sasaki Takamaru[1], ekuzigis la Esperantan subtitolon[2] *La Semanto* por la revuo ekde ĝia apero en Tokio en oktobro 1921 kaj ofte varbis en ĝi por Esperanto kiel lingva ligilo de la monda proletaro.[3]

La reformema atmosfero post la Unua Mondmilito, kiam ankaŭ Japanio estis kaptita de la esperoj pri paca kaj internaciisma epoko, pligrandigis la ŝancojn de publika atento pri Esperanto. Japana Esperanto-Instituto (JEI), fondita en 1919 de la inĝeniero Osaka Kenzi (Ossaka Kenĵi) kaj aliaj, kaj anstataŭanta la antaŭmilitan JEA, povis sukcese ekspluati la favoran konjunkturon. Utila rimedo por gajni adeptojn de Esperanto estis en Japanio, same kiel en aliaj landoj, la apelacio al idealismaj sentoj, ĉar ne estis konsilinde akcenti la praktikajn avantaĝojn de la lingvo, kiam efektive la aplikeblecoj, ekzemple en komerco kaj turismo, estis ankoraŭ tre limigitaj, por japanoj eĉ multe pli, ol por eŭropanoj. Mobilizan efikon havis precipe la personeco de Zamenhof: La modesta figuro de la „majstro" kaj liaj homaranismaj ideoj trovis multe da entuziasmaj adeptoj, kaj la homaranismo estis de siaj japanaj apostoloj kelkfoje levita preskaŭ al la rango de nova religio:

> La verda stelo, kiu sur nia brusto brilas, gvidas nin al la alta celo; eterna paco, kie nur regas la justeco kaj frateco, ne tronas la forto, nek reĝas la artifiko, benos iam la homaron dum longe suferintan.[4]

Tre interesan adapton de la homaranismo al japana „indiĝena" pensado ni rimarkas en la kazo de la religia sekto Oomoto. La

1. Takamaru Sasaki, *Mia kaŝita vivo. Mallonga aŭtobiografio de iu neortodoksa esperantisto*, Tokio 1978.
2. La esperantlingvaj subtitoloj, per kiuj aliaj kulturaj revuoj ornamis sin en la 20aj kaj 30aj jaroj, montras, kiajn ideojn oni preferis ligi al la lingvo: *La Rekonstruo, La Emancipo, Laborista Movado, La Fronto, La Kritiko Socialista, Nigra Fronto, La Proleta Budismo, La Scienco Proleta*. Kelkaj, ekzemple ĉi-lasta, krome aperigis paĝojn en Esperanto.
3. Jean-Jacques Tschudin, *Tanemakuhito. La première revue de littérature prolétarienne japonaise*, Paris 1979, p. 31, 33, 47, 49-50.
4. Tokunosuke Itoo, „La interna ideo sola estas vera esperantismo", *Verda Utopio* 4. 1923, p. 9; vd. ankaŭ Itô Tokunosuke, *Midori no hosi ni akogarete. Sopirante al verda stelo*, Kyôto 1925.

fakto, ke tradiciema grupo, ne suspektebla pro ia adoremo al la okcidento, en 1923 alprenis Esperanton por siaj internaciaj rilatoj, bone montras, kiugrade Esperanto enpenetris pli larĝajn tavolojn kaj ke ĝia deveno el la eŭropa kultursfero ne plu prezentis signifan handikapon kontraŭ disvastiĝo en Japanio. Krome, la utiligo de Esperanto fare de Oomoto estis notinda simptomo de deziro kompensi la subkonscian senton de kultura malplivaloro, estiĝintan pro la daŭra unudirekta influvojo el okcidento, per proprainiciataj klopodoj kontakti la eksteran mondon kaj konvinki ĝin pri la valoroj de Japanio, neglekte rigardataj en Eŭropo. Aliflanke, la rezulta kombino de Esperanta homaranismo kaj japanocentrismo produktis iom aplomban misian fervoron, kiu en revuo de Oomoto esprimiĝis jene:

> Esperanto estas pli necesa por la orientaj popoloj, kiuj estas de nun ludontaj la gravan rolon en la historio de l' homaro kaj precipe por nia nacio, ol por la Eŭropanoj aŭ Usonanoj, kiuj jam finis sian parton.

Tiu ĉi optimisma antaŭenrigardo nur pene kaŝis senton de izolo, la konscion esti malestimata:

> Kion ni faris ĝis hodiaŭ por la civilizacio de la mondo? Ĉu ni povus esti kontentaj por ĉiam je la pronomo de „flavaj simioj"?

Fine, la konkludo perdiĝas en altfluga, bela retoriko:

> Konduki la moralan kaj materialan civilizacion en belan florĝardenon de l' perfekta harmonio! Jen atendas la grava kaj granda misio de ni, japanoj. Kaj Esperanto estas, laŭ mia forta konvinko, la sola vojo tien kondukanta.[1]

Antaŭ ol tia nerealeca pensmaniero, al kiu pli-malpli inklinis ankaŭ esperantistoj ekster Oomoto, okupis dominan pozicion en la propagando de JEI, leviĝis kontraŭa fluo interne de la japana movado. Reprezentis ĝin la komitatano Tihu Tosio (Ĉif Toŝio), kunaŭtoro de vortaro kaj verkinto de detala gramatiko de Esperanto. Tihu estis alarmita en 1923 pro la ekĝerminta netoleremo de la homaranistoj kaj pro la pledo de kelkaj JEI-anoj por modifo de la Bulonja Deklaracio de 1905, laŭ kiu esperantismo estas nur la celado disvastigi la lingvon kaj ne konfuziĝu kun ies persona koncepto. Kontraŭ tiuj, kiuj malobservante la Deklaracion kvazaŭ anatemis ĉiun, kiu ne pretis identigi esperantismon

1. Sakurai Yasuo, „Nia misio kaj Esperanto", *La Verda Mondo* 2. 1926, n-ro 6, p. 1; por detaloj vd. Ulrich Lins, *Die Ômoto-Bewegung und der radikale Nationalismus in Japan*, München, Wien 1976, p. 124-125, 129-132.

kun homaranismo, Tihu prave argumentis, ke la esperantismo origine ne rilatas al kiu ajn ideologio kaj ke Zamenhof mem neniam postulis de la esperantistoj aliĝi al lia doktrino. Tihu koncedis, ke Esperanto estas unu el la plej gravaj faktoroj de internacia paco, sed li admonis la trofervorulojn atenti la jenon: „Ĉar Esperanto ne estas ia specifika kuracilo kontraŭ malpaco, estus granda ridindaĵo, se oni pensus, ke homoj hodiaŭ englutinte Esperanton jam morgaŭ ĉesos bataladi."[1]

Tihu, kiu en julio 1923 proteste eksiĝis el la komitato de JEI, estis ofte atakata de pli idealismaj esperantistoj pro tio, ke li defendis la uzon de Esperanto por kiu ajn celo, kaj estis suspektata pri timema zorgo, ke la homaranismo povus ligiĝi kun socialismaj ideoj kaj tiel provoki persekutojn.[2] Tamen, restas konstati, ke lia neŭtralismo havis multajn pozitivajn flankojn. Tihu kontraŭagis la danĝeron, ke la idealistoj proklamos la praktikan aplikon de Esperanto malŝatinda, kaj samtempe, verŝajne senintence, li – oponante identigon de esperantismo kaj homaranismo – faris la vojon libera al laŭplaĉa disponeblo de la lingvo por kiuj ajn „-istoj". Nome, pro tio, ke la Bulonja Deklaracio ne estis modifita, en Japanio la adepto de ĉiu ideologio, ne nur de homaranismo, plue rajtis nomi sin esperantisto – kio estis grava precipe en la kazo de tiuj, kiuj poste klopodis reinterpreti la homaranismon surbaze de sia socialisma konvinko.

Formale, la starpunkto de Tihu estis adoptita de JEI en 1924. Malgraŭ tio, efektive en la japana movado establiĝis hibrida miksaĵo el homaranismo kaj neŭtralismo. Tiuj du kunekzistis, apenaŭ distingeble kungluiĝintaj, kvankam ili, severe juĝate, ne estis akordigeblaj: Esti konscia adepto de homaranismo kaj fidele sekvi la modelon de Zamenhof signifis preti je rezigno de la neŭtraleco kaj laŭbezone protesti, ekzemple kontraŭ maljustaĵoj. Ĉar tion Osaka kaj liaj samideanoj volis nepre eviti por ne liveri kialon por subpremo, oni kredis trovi solvon de la dilemo per tio, ke tiun neŭtralecon, kiun Zamenhof dum oficialaj Esper-

1. Chif, „La esperantismo estas pure lingva movado", *Verda Utopio* 4. 1923, p. 13.
2. Miyamoto Masao, *Historieto de la japana Esperanto-movado*. 3a eld., Oosaka 1977, p. 40-41. – Vd. ankaŭ la artikolserion de Tubota Kôki, „Skize pri Ĉif Tošio kaj lia laboro", *La Movado* 1978, n-roj 324-327.

anto-aranĝoj ja respektis (iom kontraŭvole), sed ne imagis transprenebla en homaranismon, la japanaj zamenhofanoj simple utiligis por pravigi sian nepolitikan homaranismon, nome la pure abstraktan parolon pri frateco inter la popoloj, kiu inkluzivis silentadon en difinitaj kazoj (ekzemple dum la pogromoj kontraŭ koreoj post la tokia tertremo en 1923[1]). Sekve, la neŭtralismo asekuris la homaranistojn kontraŭ la bezono teorie pliklarigi sian idearon kaj alpreni pozicion pri realaj okazaĵoj en Japanio kaj la mondo.

Sendube, la homaranismo estis pro sia emocia forto grava elemento por varbi kaj organizi esperantistojn, sed ĝi devis resti socie nepotenca tiel longe, kiel ĝi rezistis kunligiĝon kun pli vaste agnoskataj fluoj kiel demokratio kaj socialismo. Estas karakterize por la supraĵa karaktero de la japanstila homaranismo, ke JEI donis preskaŭ nenian atenton al tiu kampo, kiu havas eble la plej proksiman rilaton al la celoj propraj al Esperanto kaj sur kiu, eĉ sen eksplicita partianiĝo por politikaj strebadoj, la homaranismo povus konkrete manifesti sian sincerecon: nome al la problemo de lingva egalrajteco en Koreio kaj Tajvano, la tiutempaj kolonioj de Japanio. Precedentoj ne mankis: En 1919, membroj de la „Societo de Novaj Homoj", kiuj regule renkontiĝis kun studentoj el Ĉinio kaj Koreio por diskutado, post iom da tempo eksentis, ke la uzo de la japana lingvo malprivilegiigas iliajn kundiskutantojn, kaj sekve decidis kune kun ili lerni Esperanton por havi lingvon, per kiu la konversacioj pasu sur la bazo de plena egaleco.[2] Ankaŭ en la organo de JEI, *La Revuo Orienta*, en 1926 aperis artikolo, kiu senkaŝe tuŝis tiklan temon: la suspektemon kaj antipation de koreoj kontraŭ japanoj. La aŭtoro, Kiyomi Rokurô[3], avertis: „Perfortigi iun nacian lingvon al iu alia nacio aŭ gento, kiu havas sian propran lingvon, historion kaj tradicion, estas kontraŭnature per si mem." Postulante, ke la korea lingvo „por ĉiam prosperu", li rekomendis alpreni por la interkompre-

1. Post la tertremo, Ôsugi Sakae, tiam renoma anarkiisto, estis murdita de policano. JEI ne kuraĝis aperigi nekrologon pri sia pioniro.
2. Sakuzo Yoshino, „Liberalism in Japan", en: K.K. Kawakami (red.), *What Japan thinks*, New York 1921, p. 90.
3. Kiyomi en 1927 publikigis multatentatan tradukon de la pola romano *Marta* de Eliza Orzeszko en la japanan, laŭ la Esperanta traduko de Zamenhof, kiu donis stimulon al la virina movado en Japanio.

niĝo inter koreoj kaj japanoj Esperanton: „Koreoj! Se efektive vi volas esprimi ĝisfunde viajn sopirojn, malĝojon, indignon, ĉiujn nuancojn de sentimento, iru al Esperanto!"[1]

Sed tiu ĉi voko estis, laŭ la konstato de la Esperanto-historiisto Asahiga Noboru, rara kaj eĉ maksimuma formo de rezisto flanke de JEI en tiu tempo.[2] Konsiderante tion, ni eble diru, ke restadi sur la pozicio de neŭtralismo estis por JEI intelekte pli honesta sinteno, ol poezie prikanti interhoman fratecon kaj samtempe skrupule eviti praktikajn paŝojn por pliproksimigo de tiu celo.

Ne implikiĝante en politikajn kaj ideologiajn konfliktojn, JEI povis dum la 1920aj jaroj kontentige progresi. Persekutojn okaze suferis progresemaj esperantistoj, ne la neŭtrala movado. En 1919, Yamaga Taizi, disĉiplo de Ôsugi, estis kondamnita al trijara malliberecо, ĉar li distribuis ilegalan represon de la anarkiisma broŝuro *La evangelio de la horo*.[3] En majo 1921 la ukraina blinda poeto kaj esperantisto Vasilij Eroŝenko, kiu ĝuis grandan popularecon inter japanaj maldekstruloj, estis forpelita el Japanio pro sia partopreno en Maja Demonstracio kaj en la Dua Kongreso de Japana Socialista Unio.[4] Tiuokaze tokia ĵurnalo grandlitere dissemis, ke JEI „sekrete propagandas politike danĝerajn ideojn en la nomo de esperanta kultura movado"[5], kaj Osaka plurfoje estis ĝenata per la vizito de policanoj. Ankaŭ okazis, fine de septembro 1922, ke paroladon pri „Kosmopolitismo kaj Esperanto" interrompis policano, opiniante ke temas pri „danĝeraj ideoj".[6] Sed la Instituto mem ne estis malhelpata. Kontraŭe, ĝi kontente registris post la forpelo de Eroŝenko, ke la publikeco de tiu afero vekis scivolon pri Esperanto en la popolo. Se ne kontraŭ popularaj antaŭjuĝoj („Esperantistoj similas

1. Rokuroo Kijomi, „Al la junaj koreoj", *La Revuo Orienta* 7. 1926, p. 126-128.
2. Asahiga Noboru, „Nihon Esuperanto Gakkai 50-nen no ayumi" (La 50jara historio de JEI), *La Revuo Orienta* 51. 1970, p. 114.
3. Verkinto estis la franca anarkiisto kaj esperantisto Paul Berthelot. Yamaga distribuis represon de la Esperanta traduko, aperinta en 1912.
4. Mine Yositaka, „Skizo pri la vivo de V. Eroŝenko", en *La tundro ĝemas. Verkoj de V. Eroŝenko*, Toyonaka 1980, p. 69-70. – Verkoj de kaj pri Eroŝenko (1890-1952) aperis en Esperanto, la japana, ĉina, ukraina kaj rusa lingvoj.
5. *Verda Utopio* 3. 1922, p. 116.
6. *La Revuo Orienta* 3. 1922, p. 162. – La parolanto estis Sasaki Takamaru.

akvomelonojn: ekstere verdaj, sed interne ruĝaj"), almenaŭ kontraŭ registaraj persekuloj JEI sukcesis sin protekti.

La situacio de la japana movado tamen ŝanĝiĝis, kiam, komence de la 1930aj jaroj, maldekstruloj lanĉis fortan kritikon kontraŭ la „hipokriteco" de la Instituto, estante malkontentaj pro ties oscilado inter nebula homaranismo kaj ĝisosta neŭtralismo. Meze de la vendosukceso de *Proleta Kurso de Esperanto*[1] en januaro 1931 estis fondita aparta maldekstrula organizaĵo, Japana Prolet-Esperantista Unio (JPEU), kies prezidon transprenis la konata dramverkisto Akita Uzyaku. Post kiam en oktobro de la sama jaro estis starigita la komunist-tendenca „Federacio de Proletaj Kulturorganizoj Japanaj" (KOPF), JPEU iĝis unu el ĝiaj specialigitaj grupoj.[2] Poste, ĝi aliĝis kiel japana sekcio al Internacio de Proleta Esperantistaro, fondita en aŭgusto 1932. JPEU havis ĉirkaŭ 300 aktivajn membrojn, organizis kursojn en la tuta lando, eldonis bonege redaktatan revuon *Kamarado* kaj spronis la estiĝon de similaj organizaĵoj en Ĉinio kaj Koreio.

Tamen, la perspektivoj por efika penetrado de tiu unua firme organizita proleta Esperanto-organizaĵo en la amasojn estis dekomence limigitaj pro la socia kaj politika streĉiteco antaŭ kaj post la Manĉuria Incidento (septembro 1931) kaj pro la rigora persekutado polica. Jam antaŭ majo 1931 ĉiuj gvidantoj de fabrikaj Esperanto-kursoj en Tokio estis arestitaj cele al perforta ĉesigo de la instruado, kaj la polico vizitis kursanojn por deteni ilin de partopreno en la kursoj. Malpermesita estis la disvendo de la legolibro *La Unua de Majo*, de la elementa lernolibro *La teksto unua* kaj de la kvina volumo de *Proleta Kurso*.

Ĉar JPEU, malgraŭ la malhelpoj, peris la interŝanĝon de salutleteroj inter japanaj prolet-kulturaj organizaĵoj kaj samtendencaj asocioj en eksterlando[3], tiu ĉi plifortiĝanta internacia kunligo de japanaj proletoj siavice intensigis la polican kontraŭstaron. Dum la inaŭguro de la Dua Kongreso de JPEU en marto 1932

1. *Puroretaria esuperanto kôza*, 6 vol., Tôkyô 1930-31 (represo 1968).
2. KOPF havis, krom JPEU, 11 pliajn suborganizaĵojn, i.a. de verkistoj, de muzikistoj, fotografistoj, ateistoj, pri teatro, filmo, naskolimigo, edukado.
3. Vd. ekzemple la saluton al la germana laboristaro: *Arbeiter-Esperantist* 17. 1931, n-ro 8, p. 1.

ĉeestantaj policanoj unue malpermesis la voĉlegadon de preskaŭ ĉiuj salutleteroj ricevitaj de en- kaj eksterlandaj fratorganizaĵoj, konfiskante la skribaĵojn, poste oni ordonis, ke la debatoj ne okazu esperantlingve, kaj fine, antaŭ ol la Centra Komitato povis fari sian raporton, policoficiro deklaris la kongreson dissolvita, ĉar „la atmosfero estas danĝera". Policanoj invadis la oficejon de JPEU kaj vandale detruis valorajn materialojn, kun aparta prefero tiujn venintajn el eksterlando. De tiam JPEU devis barakti kontraŭ senĉesa spionado kaj minaco de disbato. Pri proleta fakkunsido, okazinta kadre de la 20a Kongreso de Japanaj Esperantistoj en Tokio en oktobro 1932, la oficiala protokolo donas la jenan lakonan raporton: „Pro la malhelpo de la polico ni ne povis havi la kunsidon. Bedaŭre post unu taso da kafo oni devis disiĝi."[1]

Ekde la posta jaro la severaj persekutoj kontraŭ gvidantoj de la proleta movado grandparte malebligis ankaŭ la aktivadon de JPEU. Ĝia monata revuo *Kamarado*, kiu portempe havis ĉirkaŭ 2 500 abonantojn, ĉesis aperi, ĉar la eldonejo timis la financan riskon pro la daŭraj konfiskoj.[2] Komence de 1934 la ĉefaj funkciuloj de JPEU estis arestitaj aŭ eksiĝis, tiel ke meze de la jaro la organizaĵo praktike jam ne plu ekzistis. Poste, la malliberejoj servis kvazaŭ kiel rekrutejoj por novaj esperantistoj: Oni scias pri multaj, parte konataj komunistoj, kiuj en aresta ĉelo almenaŭ supraĵe alproprigis al si Esperanton.

Krom la persekutoj, la rapidan pereon de JPEU akcelis ankaŭ internaj eraroj, precipe la neglekto de la disvastigo de Esperanto favore al troa emfazo de aktualaj politikaj taskoj. Estis akordo kun la ĝenerala evoluo de la maldekstra movado en Japanio, sed rompo kun la tradicia toleremo de la japana Esperanto-movado, ke la prolet-esperantistoj deturnis sin de la pli frue karakteriza maldogmemo kaj preskaŭ senkondiĉe submetis sin al la gvidlinioj de Komintern, kiuj supozis Japanion staranta sur la sojlo de revolucio. La fakto, ke JPEU postulis de siaj membroj, inter kiuj cetere troviĝis relative malmultaj laboristoj, malpli kontentigan

1. *La XX-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj. Oficiala protokolo*, Tokio 1932, p. 19.
2. *Kamarado* (kies antaŭulo estis *Proleta Esperantisto*, marto ĝis septembro 1931) aperis de oktobro 1931 ĝis julio/aŭgusto 1933.

regon de la lingvo, ol altan politikan konscion, malebligis al ĝi ludi rolon konkurencan al JEI kaj fine kontribuis al ĝia disfalo.

Meze en la dissolviĝa procedo de JPEU, tamen, kelkaj lokaj aktivuloj, ĝis tiam eskapintaj arestiĝon, klopodis daŭrigi la laboron sur malcentrigita bazo, rezignante ankaŭ la troan dogmismon de JPEU. Avangarde agis la filio en Kôbe. Sub gvido de Nakatuka Kitizi ĝi eksiĝis el JPEU en marto 1934 kaj proklamis novan principaron: subteni diverstendencajn kontraŭfaŝismajn movadojn, zorgi por altigo de la lingva nivelo de la membroj kaj doni preferon al internacia korespondado. La grupo de Nakatuka, kiu orientiĝis laŭ la sukcesoj de la progresema Esperanto-movado en Ĉinio (kiu siavice pli frue estis influita de Japanio) kaj kunlaboris kun IPE, sed ne postulis de siaj membroj partian disciplinon, kolektiĝis ĉirkaŭ la revuo *Marŝu*.[1] Al la grupo de *Marŝu* aliĝis ankaŭ Kurisu Kei, kiu pli frue prizorgis en la tokia centro de JPEU ĉefe la internacian korespondadon, estis arestita kaj post sia liberiĝo transloĝiĝis al Kôbe. Tie Kurisu fondis apartan literaturan grupon, „Maja Rondo", kiu havis organon, *Majo*, tute en Esperanto kaj rilatadis kun Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj (IAREV).[2]

Inter la lokaj agantoj de la japana prolet-esperantista movado elstaris ankaŭ radikala protagonisto de reformo de la japana lingvo, Saitô Hidekatu, kiu en Yamagata fondis grupon kun organo *Latinigo*.[3] Saitô opiniis, ke la latiniga movado, disvolvata de intelektuloj, devos dediĉi pli da atento al laboristoj kaj kamparanoj, kiuj ĝis tiam apenaŭ partoprenis en la movado, ĉar „latinigo estas por la liberigo de subpremita popolo sed ne por reganta klaso".[4] Skribante tiel en *La Mondo*, la organo de Ŝanhaja Esperantista Ligo, Saitô akcentis la neceson „ellerni de ĉinaj kamaradoj la

1. Aperis de septembro 1934 ĝis marto 1936 entute 11 n-roj, preskaŭ nur en la japana lingvo.
2. La unua n-ro de *Majo* aperis en aŭgusto 1935, la postaj en marto, julio, novembro 1936. Kurisu estis sekretario de la grupo; redaktoro estis (en 1936) Yonemura Ken. Kunlaboris ankaŭ Hasegawa Teru, kiu en 1937 eskapis al Ĉinio. – Laŭ la modelo de *Marŝu*, establiĝis ankaŭ aliaj lokaj centroj: *Frato* en Ôsaka, *Saluton* en Nagoya kaj *Amiko* en Okayama.
3. Konataj estas nur du n-roj el 1936, kun teksto en Esperanto.
4. H. Saito, „La historieto de japana latiniga movado", *La Mondo* 4. 1936, p. 53.

socian signifon de tiu movado" kaj koalicii kun la ĉinaj esperantistoj, kiuj sub la gvido de Ye Laishi pionire batalis por „Latinxua". Same kiel por la ĉinoj, por Saitô la latinigo kaj Esperanto estis reciproke sin kompletigantaj iloj en la lukto por la emancipo de popolamasoj kaj nacioj: Por plifaciligi al larĝaj tavoloj la akiron de scio, kion baras la ideografiaĵoj, kaj por malhelpi, ke la scio restu monopolo de la regantoj, estas bezonata la amasa disvastigo de la japana lingvo – kaj por tio la adopto de latinaj literoj estas la unua antaŭkondiĉo. Plue, li postulis, ke tiun rolon, kiun enlande ludas la latinaj literoj, en internacia skalo plenumu Esperanto. Konkrete, Saitô imagis la rolon de Esperanto jene:

> Necesas ankaŭ la lingva emancipiĝo de la kolonioj (Koreio, Tajvano, Manĉurio). Por ne altrudi la japanan lingvon, sed por libere evoluigi la lingvojn de la koloniaj popoloj, oni devas antaŭenpuŝi ilian latinigon kaj uzi Esperanton por interkomunikado inter la kolonioj kaj Japanio.[1]

Estas evidente, ke la tezoj de Saitô entenis tiklaĵojn. Unue, lia pledo por la radikala forigo de ideografiaĵoj per si mem signifis en tiu tempo malrespekton al la unikeco kaj sankteco de la japana lingvo. Due – kaj tio pezis eĉ pli – liaj lingvoemancipaj teorioj estis rekta defio kontraŭ la registara politiko de la perforta asimilado de alinacianoj, kies celo estis, ekzemple, ekstermi la korean lingvon kaj kulturon, tiel kvazaŭ renaskigante la koreojn sur „pli alta" kultura nivelo – kiel subulojn de la japana imperiestro.

Bedaŭrinde, al la menciitaj grupoj – la idoj de JPEU – apenaŭ restis tempo por pruvi, ke iliaj agmetodoj promesas pli da sukcesoj, ol tiuj de JPEU, ĉar grandskalaj persekutoj inter decembro 1936 kaj majo 1937 definitive frakasis la maldekstran Esperantomovadon. Pri tiuj persekutoj ekzistas abundaj dokumentoj de la tiutempaj aŭtoritatoj, precipe de la Ministerioj de Justico kaj de Internaj Aferoj. Ekzemple, la „Monata Raporto pri Pensoj", kiun eldonis la Kriminala Oficejo de la Justic-Ministerio, regule listigis konfiskitajn Esperanto-revuojn kaj -librojn, indikante la kialon de la malpermeso kaj kelkfoje eĉ citante el la koncerna artikolo. Sed la plej grava dokumento estas la 284paĝa verko,

1. Cit. Asahiga Noboru, „Saitô Hidekatu no iti-zuke" (Difino de la pozicio de Saitô Hidekatu), *La Revuo Orienta* 52. 1971, p. 181.

deklarita kiel „strikte sekreta", kun la titolo *Pri la proleta Esperanto-movado.*[1] Ĝi estis kompilita de la prokuroro Takeuti Zirô kaj aperis en novembro 1939 kiel volumo 69 en la serio „Materialoj pri Pensesploroj" de la Justic-Ministerio. Per la represitaj enket-protokoloj de arestitaj JPEU-funkciuloj ĝi permesas detale sekvi la etapojn de la agado kaj detruo de JPEU kaj ankaŭ informiĝi pri la evoluo de la internacia laborista Esperanto-movado. Ĉi-sube ni bazas nin grandparte sur tiu verko kaj aliaj iam konfidencaj aŭ sekretaj dokumentoj.

Multaj arestitoj estis per psikologia premo aŭ torturoj devigitaj promesi ĉesigon de ĉia kontraŭregistara agado. Kelkfoje la viktimoj ŝajnigis konvertiĝon al la ortodoksaj mitoj de Japanio por rericevi sian liberecon. Tamen, pluraj mortis en la karcero aŭ tuj post liberiĝo. Al ili apartenas ankaŭ Nakatuka Kitizi, la redaktoro de *Marŝu* kaj la animo de la popolfronta Esperanto-movado. La protokolo, kiun li devis subskribi, disradias neskueblan fidon pri la estonteco de tiu idealo, kiu igis lin viktimo de senskrupula ŝtata aparato. Nakatuka substrekis, ke li utiligis Esperanton unuavice por la klasbatalo, sed li aldonis, ke, eĉ se, kiel nun, la lingvo ne plu povas servi al tio, „la esperantistoj laŭ sia naturo amas demokration kaj estas por internaciismo" kaj sekve iom post iom redonos al ĝi la rolon, por kiu ĝi estas destinita: „La Esperanto-movado ekzistos tiel longe, kiel vivas homoj kaj ekzistas socio..."[2] Nakatuka mortis, sen helpo de ekstere, pro tuberkulozo en hospitalo en Ôsaka, kien li, korpe kaj anime jam frakasita, estis sendita post longa restado en malliberejo. Laŭdire, antaŭ ol fari la lastan spiron, li murmuris: „Budho min kompatu."

Simile tragikan sorton havis Saitô Hidekatu. Li obstine rifuzis deklari sian konvertiĝon kaj malakceptis ankaŭ aliĝon al JEI, ĉar, kiel li klarigis, ties neŭtraleco kontraŭis al lia propra ideologio. Sian nekompromisemon li pagis per ftizo; kiel solan, lastan „favoron" liaj persekutantoj donis al li en aprilo 1940 liberecon,

1. Takeuti Zirô, *Puroretaria esuperanto undô ni tuite*, Tôkyô 1939. – Kp. mian artikolon „La plej sekreta libro pri Esperanto", *esperanto* 65. 1972, p. 28-29.
2. *Sisô geppô*, n-ro 39, septembro 1937, p. 391-392.

por ke li mortu en sia hejmo. La 5an de septembro de la sama jaro Saitô forpasis, nur 32jara.

Esperantistoj, konataj kiel maldekstruloj aŭ eĉ nur kiel liberaluloj, restis suspektataj, eĉ kiam ili nur deziris perfektigi sian lingvan teknikon. Ekzemple, membroj de la iama filio de JPEU en Ôsaka estis arestitaj, ĉar ili en privata hejmo kune studis verkon de Zamenhof kaj faris komunan ekskurson al proksima monto.[1] Tia ekzercado, memkomprenebla por fervoraj esperantistoj, evidente servis, laŭ la aŭtoritatoj, por reorganizi komunistan ĉelon. Aparte maltrankviligis la sekretan policon, se oni troe emfazis la idean flankon de Esperanto. En septembro 1939 tri esperantistoj, kiuj tri jarojn antaŭe estis fondintaj Esperantoligon en la gubernio Kumamoto, estis arestitaj: Kiel klarigis la monata raporto de la politika polico, ili eluzis la legalecon de la Esperanto-movado kaj aparte akcentis la kontraŭmilitan kaj kontraŭfaŝisman karakteron de la homaranismo de Zamenhof; por „malhelpi la politikan faŝismiĝon aŭ reakciiĝon de la neŭtralaj esperantistoj" ili stimulis la esperantistojn al la „kontraŭmilita kaj kontraŭfaŝisma zamenhofismo".[2] Fakte, multaj eksmembroj de JPEU mergiĝis en la neŭtrala movado – aŭ por lingve perfektiĝi kaj daŭre informiĝi pri la evoluo de Esperanto en- kaj eksterlande aŭ, kiel avertis la prokuroro Takeuti, por „kamufli sian politikan koloron".[3] Sekve, JEI kaj lokaj grupoj devis toleri la vizitadon de policanoj, kiuj postulis membro-listojn, traserĉis bibliotekojn kaj kontrolis aliĝintojn al nova kurso. En la provinco ofte okazis, ke homoj estis almenaŭ vokitaj al la policejo, pro tio, ke ili enskribiĝis por kurso.[4] Foje la politika polico donis al libro-brokantejo Esperantan vortaron – ne por vendigi ĝin, sed por ekscii pri aĉetemaj klientoj.[5] Kien ne penetris la observemaj

1. Unu el la osakanoj, Sakagami Muturô, arestiĝinte en aŭtuno 1939, mortis aŭ en la malliberejo aŭ nelonge post liberiĝo. La saman sorton havis Takaragi Yutaka, redaktoro de *Frato*. Satô Tokirô, la ĉefa respondeculo de *Saluton* en Nagoya, estis pro akuta tuberkulozo provizore liberigita, sed baldaŭ poste mortis.
2. *Tokkô geppô*, aprilo 1940, p. 5-6.
3. Takeuti, p. 251.
4. Intervjuo kun Miyake Sihei, 1-9-1971.
5. T. Kurisu, „Esperanta vortaro kiel logbirdo de japana sekreta polico", *Heroldo de Esperanto* 24. 1948, n-ro 17 (1095), p. 1 (kompiltrad. el *Nova Fronto*).

okuloj de la polico, tie ofte sufiĉis, precipe dum la milito, la suspekta rigardo de poŝtistoj kaj najbaroj por sufoki la entuziasmon por Esperanto: En la provinco ricevo de eksterlandaj korespondaĵoj, egale el kiu lando kaj egale en kiu lingvo, per si mem entenis por la adresato la riskon de socia premo.

Aliflanke, ne temis pri konstantaj ĝenoj al la laboro de JEI, kaj neniam, laŭ nia scio, Esperanto estis en Japanio oficiale stampita kiel „danĝera lingvo." La teroro restis laŭokaza kaj nekunordigita, kiel ajn terura ĝi estis en la individua kazo, kaj ne atingis la stadion de sistemaj persekutoj, kiaj furiozis, ekzemple, en la Tria Regno. Por tio JEI eĉ ne bezonis pagi la prezon, kiun pretis pagi – por savi la movadon, sensukcese – la germanaj esperantistoj, rekte perfidante la originan idealon de Esperanto. JEI ja ne lasis multe da loko al „kontraŭfaŝisma" interpreto de la ideoj de Zamenhof, sed ankaŭ ne kompromitis sin per troa aklamado al la milito en la nomo de homaranismo. Tion ĝi dankas unuavice al kelkaj klarvidaj gvidantoj, kiuj en epoko de kreskanta ideologiiĝo de la japana politiko klopodis stiri la Instituton tra la uragano de persekutoj per rigora sindifinado kiel pure porlingva organizaĵo. *Tia* neŭtralismo estis la sola ebleco por malhelpi, ke la persekutoj kontraŭ la forta proleta movado englutu ankaŭ la „burĝ-demokratan", kaj la antaŭkondiĉo por bremsi la troan politikemon aŭ nesufiĉan singardon de maldekstraj membroj, unuflanke, por konservi kaj eluzi ilian lingvan kaj organizan kapablon, aliflanke. Kompreneble, al la neŭtralismo apartenis ofte iom riska ĵonglado, sed ke la balancilo foje povis eĉ favore inklini al la maldekstra flanko, karakterize montras ekzemplo el la eldona politiko de JEI: En 1932 ĝi publikigis japanlingvan tradukon de grava studo de la soveta esperantologo Efim Spiridoviĉ, *Lingvoscienco kaj Lingvo Internacia*[1], kaj por „kontraŭpezigi" tiun ĉi prezenton de marksisma teorio, JEI kelkajn monatojn pli frue aperigis, sub la sama serio-titolo, kompare ne tre signifan broŝureton de konservativuloj, *De la protekto de la*

1. *Gengogaku to kokusaigo*. Trad. Ôsima Yosio kaj Yamazaki Huzio, Tôkyô 1932 (represo Kyôto 1976); rusa originalo: *Jazykoznanie i mejdunarodnyi jazyk*, Moskva 1931. – En 1934, JEI eldonis ankaŭ tradukon de la verko de E. Drezen, *Historio de la mondolingvo: Sekaigo no rekisi*. Trad. Ôsima Yosio.

nacia lingvo ĝis la internacia lingvo.[1]

Estinte kritikata de maldekstruloj, JEI do poste disponigis sin al ili kiel rifuĝejo. Samtempe ĝi venis sub fajron flanke de dekstremaj membroj. Dum la 22a Kongreso en Nagasaki en aprilo 1934 estis submetita propono de la Esperanto-Federacio de Kaho: „Dediĉi aeroplanon (aŭ monon por landdefendado) al nia Patrujo", por tiamaniere „montri ke Esperantistoj japanaj ne estas malpatriotoj" kaj „vigligi nian movadon en tiel malfavora tempo kiel nuna". Al la sama kongreso la Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto proponis uzi la formojn „Nipponlando" kaj „Nippono" anstataŭ (aŭ paralele al) „Japanujo" kaj „Japano". Tiajn elpaŝojn la gvidantoj de JEI sukcesis elegante subtabligi, „en tondra aplaŭdo de l' kongresanoj"[2], sed fine en 1937, post la eksplodo de la plena milito kun Ĉinio, JEI ekfrontis pli seriozan defion, eĉ la minacon de skismo, kiam kelkaj oportunistaj kaj dekstraj membroj atakis la Instituton pro ĝia neŭtrala pozicio kaj nekomprenemo pri la naciaj bezonoj de Japanio. Pro tio, ke JEI rifuzis propagandi al eksterlando la „porpacajn celojn de la nuna milito en orienta Azio", tiuj personoj starigis Esperantistan Patriotan Union.[3] Malgraŭ la eldonado de kelkaj broŝuroj, la entrepreno tre baldaŭ montriĝis fiasko, ĉar oni ne sukcesis forlogi de JEI signifan nombron de membroj.

Dum la Pacifika Milito, tamen, la situacio de JEI iĝis multe pli tikla. En aŭgusto 1940 ĝi eksiĝis el Internacia Esperanto-Ligo, ĉar algluiĝo al la malnova sistemo de „harmoniismo bazita sur la principo de nacia memdecido" estas kontraŭa al la spirito de la nova sistemo, projektata de Japanio. JEI tiuokaze faris deklaron, kiu montras ĝian akomodiĝemon al la japana lingva imperiismo:

> La rolon de internacia lingvo en la Orientazia Kultursfero kompreneble plenumu la japana lingvo. Per aliaj vortoj, Esperanto estu „internacia lingvo" por la landoj ekster orienta Azio...[4]

1. *Kokugo no yôgo o ron-zite kokusaigo ni oyobu*, Tôkyô 1932 (kontribuaĵoj de Nisi Seiho, Kuroita Katumi, Miyake Seturei k.a.).
2. *La XXII-a Kongreso de Japanaj Esperantistoj. Oficiala protokolo*, Nagasaki 1934, p. 7-10.
3. Al la personoj apartenis Huzisawa Tikao, unu el la plej pasiaj teoriaj pravigantoj de simbiozo el ŝintoa ekspansiismo kaj Esperanta homaranismo.
4. Cit. Asahiga Noboru, „Nihon Esuperanto Gakkai 50-nen no ayumi" (La 50jara historio de JEI), *La Revuo Orienta* 51. 1970, p. 184-185.

Al kelkaj ekstremaj membroj eĉ tia deklaro ankoraŭ ŝajnis nesufiĉa. Unu el ili, Takeuti Tôkiti[1], postulis en 1942, ke la sekretario de JEI, Miyake Sihei, demisiu kaj ke malaperu ĉiaj celdifinoj, ke Esperanto anstataŭ la japana lingvo iĝu komuna helplingvo en orienta Azio.

La atakita Miyake restis en sia posteno. Fakte, al li, kiu certagrade estis disĉiplo de Tihu Tosio, JEI ĉefe dankas sian esence neŭtralan karakteron. Kiel liberalulo, Miyake scipovis sobre analizi la perspektivojn de la Esperanto-movado en ŝanĝiĝantaj politikaj kondiĉoj; li neniam emis patose deklami pri homaranismo, sekve ankaŭ ne pri la homara misio de Japanio. Fari cedojn al la potenculoj li ja estis devigita: JEI ne povis resti izola insulo netuŝata de la nacia pormilita mobilizado. Dum la militaj jaroj, la revuon de JEI makulis deklaroj pri la „justa milito", patriotisme heroaj poemoj kaj asertoj, ke la sopiro de Zamenhof pri frateco inter ĉiuj popoloj plene akordiĝas kun la mondĉirkaŭbraka idealo proklamita de la mitologia imperiestra fondinto de Japanio kaj nun disvastigata de la imperiestra armeo. Sed Miyake kiam eble konservis sian balancan taktikon, presigante en 1942, sur la kulmino de la milito, opiniojn de kuraĝuloj kiel Inoue Masuzô, kiuj rekte kontraŭparolis al la praktikata lingvopolitiko de la japanoj en la okupitaj regionoj:

> Oni devas tre gardi sin kontraŭ la transmara penetrado aŭ tutmondigo de la japana lingvo. La traktadoj kun aliaj nacioj en Azio devos esti faritaj per Esperanto.[2]

Neŭtralismo sendube ne signifis rezistopovon kontraŭ la naciismo kaj militismo. Sed la neŭtralismo de JEI, ofte konsiderata kiel pala aŭ eĉ malmorala, ne tiom signifis senvertebran sintenon, kiom en aliaj landoj. Ĝi ĉiuokaze pruviĝis dum la milito preferinda al spirita unuigo de la japanaj esperantistoj sub la standardo de homaranismo, ĉar ilia tro emocia kaj pense ne maturiĝinta kompreno de homaranismo ne nur ne povis rezisti englutiĝon per la ŝajn-universalisma ideologio de la japana imperiismo, sed ankaŭ estis facile stimulebla por liveri idealisman apogon al la defendantoj de japana hegemonio, kiuj ofte uzis

1. En 1937, la SAT-fondinto Lanti gastis ĉe Takeuti: E. Borsboom, *Vivo de Lanti*, Parizo 1976, p. 152-153; Miyamoto, *Historieto*, p. 65-66.
2. Cit. Asahiga, p. 185.

supernacian retorikon por kvazaŭe pravigi la ekspansion de Japanio en Azio kiel altruisman mision por la bono de la homaro.[1]

La persekutoj kontraŭ proletaj kaj liberalaj esperantistoj, do, ne serioze damaĝis la pluekziston de la japana Esperanto-movado. La organo de JEI, *La Revuo Orienta*, ĉesis aperi en marto 1944 – en surprize malfrua stadio kompare kun aliaj kulturaj organizaĵoj. Tuj en la fina konvulsio de la japana imperio montriĝis, ke la ŝajne ĉiopova kaj ĉieesta polico ne sukcesis estingi la fajron de poresperanta fervoro: En aŭgusto 1945, nelonge antaŭ la kapitulaco, polic-agentoj kun antaŭtimo registris, ke revigliĝis la „komunismema Esperanto-movado".[2]

Post la milito la transvivintaj maldekstruloj, eĉ se grumble, konsentis kunlabori en JEI. Tio ŝuldiĝis ne laste al la fakto, ke la Instituto, ne lasante sin envolvi en memmortigan reziston de proletoj, dank' al sia neŭtraleco ankaŭ sukcesis distancigi sin de la homaranismo – de pensaro, kiu riskis esti ĉirkaŭbrakata de imperiismo kaj servi kiel plia ideologia bazo de militismo. Tiel la Instituto eskapis la danĝeron retrovi sin en la postmilita epoko nerebonigeble kompromitita en la okuloj de granda nombro de suferintaj, nun denove esperantaj esperantistoj.

3.3. *KOREIO KAJ TAJVANO*

Kiel ni vidis, la japanaj esperantistoj, kun kelkaj esceptoj, ne multe aktivis sur la kampo de lingva egaleco, sur kiu ili estus povintaj akiri pli klaran profilon kontraŭ aliaj progresemaj movadoj antaŭ la milito. Ĉi-sekve ni esploru, ĉu entute ekzistis

1. Tiun „englutiĝon" ankaŭ ne eskapis la Esperanta revuo *Tempo*, kiu aperis en Kioto de 1934 ĝis 1940, Ĝi estis esence liberalisma (pluraj numeroj estis malpermesitaj), sed ekde 1937 pli kaj pli klopodis pravigi per misiemaj deklaroj la japanan ekspansion en Azio. Vd. la represon de la tuta kolekto de *Tempo*, kun postparoloj de Nozima Yasutarô kaj Ulrich Lins, Nagoya 1982.
2. Rodger Swearingen, Paul Langer, *Red flag in Japan. International Communism in action, 1919-1951*, Cambridge, Mass. 1952, p. 87; kp. Miyamoto, *Historieto*, p. 76.

en la dependaj teritorioj, en Koreio kaj Tajvano, preteco aŭskulti al okazaj alvokoj, ekzemple de Saitô Hidekatu, flegi la propran lingvon kaj utiligi Esperanton kiel batalilon kontraŭ lingva diskriminacio.

En Tajvano pli vasta publiko unuafoje aŭdis pri Esperanto en 1913, en tempo de forta rezisto kontraŭ la japana regado, kiam la japano Kodama Sirô anoncis Esperanto-kurson en la gazeto *Taiwan Niti Niti Sinpô*. Li poste instruis al dek-kelkaj personoj, sed la kurso okazis sub nefavoraj cirkonstancoj: La polico sendis senuniformajn anojn por observi la enhavon de la lecionoj, kaj Kodama devis unufoje monate raporti al la policejo pri la movoj de siaj kursanoj.[1] Tiutempe ankaŭ en Koreio vivis japanaj esperantistoj, sed anstataŭ ili, estis koreaj studentoj en Japanio kaj koreaj pioniroj de la nacia emancipo agintaj en Ĉinio, kiuj post sia reveno klopodis konatigi Esperanton en Koreio.

Post la Unua Mondmilito, la indigno de koreoj kaj tajvananoj kontraŭ la koloniiga politiko de Japanio atingis sian kulminon. Unu el la esprimiloj de la protesto de intelektuloj iĝis Esperanto. Kiam post la landskalaj demonstracioj en Koreio (1 marto 1919) sange silentigitaj, la japana registaro, komprenante la fiaskon de nure militista represio, proklamis la transiron al „kultura politiko" kaj permesis (en 1920) la aperigon de la korelingvaj taggazetoj *Tong-A Ilbo* kaj *Chosŏn Ilbo*, la Esperanto-movado ekpaŝis samtempe kun la ekfloranta kultura movado, en kiun koreaj intelektuloj verŝis siajn pasiojn. Kiel memoris unu el la gvidaj koreaj esperantistoj: „En la unua periodo Esperanto-movado en Koreujo estis konsiderata de ĉiuj koreaj inteligentuloj ne nur, kiel ideala movado, sed ankaŭ kiel plej progresinta landonsavanta movado..."[2]. La fortan kunplektiĝon de Esperanto-movado kaj naciliberigaj celadoj ilustras la persono de Kim Ŏk („Verda E. Kim"), redaktoro kaj verkisto, studinta en la filozofia fakultato de Keiô-Universitato en Tokio, kaj la patro de Esperanto en Koreio. Krom Esperantaj lernolibroj Kim eldonis

1. Matuda Haruhi, „Midori no kage de. Syokumin-ti Taiwan esuperanto undô si" (En la verda ombro. Historio de la Esperanto-movado en kolonia Tajvano), *La Revuo Orienta* 58. 1977, p. 218.
2. Hengwi Hong, „Okaze de la nova organo", *Korea Revuo* 1964, n-ro 1 (mar.), p. 3.

plurajn poemvolumojn, en kiuj li primokis nobelojn kaj burokratojn servantajn al la japanaj aŭtoritatoj – kio estis unu el la malmultaj formoj, kiuj restis al koreaj intelektuloj por esprimi sian opozicion kontraŭ la koloniistoj.[1]

En somero 1920 Kim gvidis ĉe YMCA en Seulo la unuan publikan kurson de Esperanto, rezulte de kiu fondiĝis Korea Esperanto-Asocio. De tiam, la lingvo rapide disvastiĝis: En la ĉefaj ĵurnaloj korelingvaj ofte aperis alvokoj por lernado de Esperanto, apogo estis donita interalie de la religio Ch'ŏndogyo, kies revuo *Kaepyŏk* fine de 1922 aperigis lecionojn verkitajn de Kim, kaj la gazeto *Tong-A Ilbo* en 1924 ĉiulunde havis kolumnon en Esperanto.[2]

Ankaŭ en Tajvano la Esperanto-movado organiziĝis en ligo kun la plifortiĝantaj emancipaj aspiroj de nejapanaj loĝantoj. Du tajvanaj maldekstremaj junuloj, Su Bihui (So Pekfui) kaj Lian Wenqing (Ren Sonkio), iniciatis en 1919 la fondon de Formosa Esperantista Societo kaj la aperigon de monata organo, *La Verda Ombro*. Ili ludis gvidan rolon ankaŭ en Tajvana Kultura Asocio, fondita en 1921, kies baldaŭ ĉ. dekmil ĉefe meztavolaj membroj postulis tajvanan parlamenton kaj protestis kontraŭ la diskriminacio de tajvananoj. Sekve, la tajvanaj esperantistoj kuraĝe sekvis la linion propagandi Esperanton kaj samtempe pledi, pli-malpli senkaŝe, por la lingvaj, kulturaj kaj politikaj rajtoj de la nejapanaj insulanoj. En oktobro 1922, ekzemple, oni povis legi en *La Verda Ombro*:

> Dum estintaj kelkaj centjaroj la kolonipolitiko en chiuj fortaj landoj estis celanta asimiligi la popolon de dependata lando, kaj ili kredas, tie, kie la lingvo de reganta lando bondisvastighos, la frukto de asimiligo povos [esti] rikoltata. ... Sed kontraŭ tio, post la mondmilito tiu senprudenta ideo malaperis de la monda tendenco kiel lavango en printempo, kaj en la reakcio Esperanto estas disvastigata tra la tuta mondo ..., char la spiriton de novepoko la plej perfekte povas respeguli Esperanto, elpensita sur libereco, egaleco.[3]

1. Nezu Masasi, *Nihon gendai-si* (Moderna historio de Japanio). III, Tôkyô 1967, p. 156-157. – En 1950, dum la Korea Milito, Kim estis deportita al Norda Koreio kaj verŝajne tie pereis.
2. Vd. Nakada Hisato (komp.), *Oriento vokas. Esperanto-kolumno en la korea ĵurnalo Dong-A Ilbo*, Yokohama 1977.
3. Lepismo, „Kontraŭmodulo kaj perfidanto", *La Verda Ombro* 4. 1922, p. 60.

Nedubeble, similaj sentimentoj nestis en la koroj de la esperantistoj en Koreio. Juna korea Esperanto-historiisto resumis iliajn motivojn jene: „Estis nature, ke tiamaj kleruloj interesis sin pri Esperanto ĉe tiu periodo, kiam unu el plej gravaj krimoj estis uzi korean lingvon."[1] La fondiĝa deklaro de Korea Esperantista Federacio montras, ke ankaŭ japanaj esperantistoj vivantaj en Koreio sentis sin ligitaj al la idealo forigi naciajn antaŭjuĝojn pere de Esperanto. La deklaro, subskribita en novembro 1924 de kvar koreoj kaj du japanoj, eksplicite turnis sin kontraŭ lingva imperiismo:

> Jam delonge al la homarano venis la tempo unuiĝi en la vera amo kaj kompreno de kunfratiĝo por forpeli malbenitan antaŭjuĝon kaj baron de la gento. Kaj la homarano humaneca jam malĝoje vidis, kiel absurda kaj nenatura ĝi estas, ke nur per sia propra lingvo unu altrudis perforte la alian. Propra lingvo mem deviĝas esti por ĉiu gento kaj por la tuta homaro nur troviĝas Esperanto komuna por ĉiuj.[2]

Ke koreoj kaj tajvananoj subite entuziasmiĝis por Esperanto, estis por la japanaj aŭtoritatoj suspektinda fenomeno. Kiam en oktobro 1923 Formosa Esperantista Societo aranĝis propagandan rondan kurson tra la insulo, la polico plurloke malhelpis la komenciĝon de la kursoj. La estraro de kompanio ricevis minacon, ke ĝi ne permesu la instruadon de Esperanto al siaj dungitoj. Senuniformaj policanoj vizitis ĉiun aliĝinton de kurso, klopodante persvadi ilin ne lerni la lingvon kaj minacante meti ilin sur nigran liston de danĝeruloj – pro tio, ke Formosa Esperantista Societo havas rilaton kun Tajvana Kultura Asocio. Kiam minacoj ne havis efikon kaj kurso okazis malgraŭ la premo, la kursgvidanto kaj ĉiuj partoprenantoj devis toleri la neplezuran ĉeeston de policano dum la tuta daŭro de la kurso.[3]

Por japanoj en Tajvano kaj Koreio ne estis malhelpoj lerni Esperanton, kondiĉe ke ili ne faris politikan laboron per ĝi. Sed se la indiĝenaj loĝantoj okupiĝis pri ĝia lernado, tiam la aŭtoritatoj emis tion juĝi unua ŝtupo, de kiu la paŝo al „danĝera pensado" ne ŝajnis haltigebla. De la japanino Yamaguti Kosizu[4], kiu kun-

1. Zeon Gjong-dok, „La studo pri historio de Esp.-movado en Koreujo", *La Junulo* 1973, n-ro 2 (apr./majo), p. 25.
2. *Tong-A Ilbo*, 24-11-1924; cit. Kim Sam-su, *Historio de Esperanto-movado en Koreujo (1906-1975)*, Seoul 1976, p. 90.
3. *La Verda Ombro* 5. 1923, p. 58-61.
4. Yamaguti Kosizu estis amikino de Yamakawa Kikue, la edzino de la

laboris kun Lian Wenqing en la varbado por Esperanto inter tajvananoj, ni disponas pri interesa raporto pri la motivoj, starantaj malantaŭ la ĉikanoj kontraŭ Esperanto en Tajvano. Ŝi citis la jenan klarigon de altranga funkciulo de la japana polico:

> Ĝenerale necesas kompreni, ke la signifo iom diferencas, kiam temas pri ago de japano kaj kiam temas pri tiu de tajvanano. Ekzemple, se japano sur la marĝeno de letero skribas „1922", tio signifas nur, ke li uzas jarindikon kutiman en la mondo. Sed se same skribas tajvanano, tio ne havas tiel simplan signifon: Ni devas rimarki, ke li ne nur malobservas la jarindikon „11a jaro de Taisyô-erao", sed ankaŭ intencas ĝin forpuŝi. Same estas pri la lernado de Esperanto. Ne estas dubo, ke japanoj elektas Esperanton nur, ĉar ili opinias ĝin komuna internacia lingvo de la mondo, lingvo simbola por la estonta homara paco aŭ rimedo por la estimo de sia nacia lingvo. Sed la situacio tute ŝanĝiĝas, se temas pri tajvananoj. Ili okupiĝas pri tiu mondlingvo ne simple kiel unu popolo en la mondo, sed ilia lernado de Esperanto implicas plenan forĵeton de la japana lingvo. Inter lingvo kaj penso estas intima rilato, kaj tial la forĵeto de la japana lingvo signifas malakcepton de Japanio entute. La kolonia politiko de Japanio absolute ne povas toleri tiajn perfidulojn.[1]

Tie ĉi estas plej notinda la sincereco, la manko de ĉia provo vuali la evidentan strebadon trakti nejapanojn kiel duaklasanojn kaj apliki du mezurilojn, eĉ kiam temas pri nura lernado de Esperanto.

Malgraŭ la akuzo, ke disvastigi Esperanton signifas perfidi Japanion, Lian kaj Su spitis la daŭran minacon de subpremo kaj plue eldonis sian revuon. Post februaro 1924, tamen, ĉesis la regula aperado de *La Verda Ombro*.[2] En la postaj jaroj estis ĉefe japanoj, kiuj zorgis pri la vivtenado de kursoj, dum la tajvananoj koncentris sin al politika agado. Kiam Lian foje vojaĝis al Japanio, li estis ĉiupaŝe sekvata de spionoj kaj ne sukcesis aŭdigi sian voĉon ĉe kunveno de esperantistoj en Tokio.[3]

En septembro 1931 okazis la Unua Tajvana Esperanto-Kongreso, dum kiu estis proponita starigo de Formosa Esperanto-Federacio kiel komuna organizaĵo de japanaj kaj tajvanaj esperantistoj. La plano fiaskis, ĉar la japanaj kunlaborantoj timis la

komunista gvidanto Yamakawa Hitosi. Ŝi kunlaboris kun Lian ankaŭ en helpokampanjo por malsatantaj en Soveta Ruslando.

1. „El la verkaĵoj de f-ino K. Jamaguĉi", *La Verda Ombro* 5. 1923, p. 11-12 (originalo japanlingva).
2. Aperis ankoraŭ unu numero en marto 1926.
3. *Oriento* 1925, n-ro 2, p. 78 (redakcia noto pri artikolo de S. Ren, „Formoso kaj formosano", p. 73-78).

superregan pozicion de maldekstruloj en la Federacio.[1] En decembro estis malpermesita unu numero de nova informilo de tajvanaj esperantistoj, eldonata de Lian. Entute, post la Manĉuria Incidento la situacio de la Esperanto-movado en Koreio kaj Tajvano rapide malboniĝis. Alproksimiĝis pli kaj pli severa periodo, dum kiu fine „ĉiuj karceroj en Koreujo fariĝis, kvazaŭ Esperanto-lernejo."[2] Korea Prolet-Esperantista Unio, kiu funkciis ŝajne ĉirkaŭ 1931/32 analoge al similaj asocioj en Japanio kaj Ĉinio, neniam povis disvolvi atentindan aktivadon. Por esti arestita sufiĉis korespondi en Esperanto kun laboristo en Soveta Unio aŭ posedi la japanan *Proleta Kurso*.

En ligo kun la planata plena spirita mobilizado sekve de la komenciĝo de la Ĉin-Japana Milito en 1937, la japanoj likvidis la modestajn restaĵojn de kultura aŭtonomio en Koreio kaj Tajvano. En la publikaj lernejoj de Tajvano estis ĉesigita la instruado de la ĉina lingvo; de tajvananoj oni postulis paroli eĉ hejme nur la japanan.[3] En 1938 la japanoj abolis ankaŭ la instruadon de la korea lingvo en ĉiuj primaraj kaj sekundaraj lernejoj. En aŭgusto 1940 estis subpremitaj la du kore-lingvaj gazetoj *Tong-A Ilbo* kaj *Chosŏn Ilbo*, kaj en oktobro 1942 estis disbatita la Societo por Studo de la Korea Lingvo per aresto de preskaŭ ĉiuj gvidaj membroj ĝiaj.[4] La politiko de perforta asimilado kondukis al tio, ke la uzo de la japana iĝis deviga eĉ surstrate. Homoj parolantaj sian propran lingvon devis, se kaptitaj, suferi punon.

Konsiderante, kiom energie la koreaj esperantistoj estis pledintaj por la principo de lingva egalrajteco, ni ne povas nomi nur hazarda koincido, ke, dum komenciĝis la subpremo de la korea lingvo, eksilenti devis ankaŭ la Esperanto-movado en Koreio. En oktobro 1937 aperis la unua numero de belaspekta, tutesperanta revuo, *Korea Esperantisto*. Ne sekvis ĝin dua numero, ĉar la eldonanto, Hong Hengwi, estis enkarcerigita. Ĝis la fino de la milito la publika propagando kaj lernado de Esperanto restis severe malpermesitaj.

1. *Internaciisto* 2. 1932, p. 10; *Informo de F.E.S.* 1932, n-ro 2 (16 jun.), p. 29; Matuda Haruhi, „Midori no kage de", p. 349-351.
2. Hengwi Hong, „Okaze de la nova organo", p. 3.
3. Matuda, „Midori no kage de", *La Revuo Orienta* 59. 1978, p. 21.
4. Li Ogg, „Les japonais et la langue coréenne", *Revue d'histoire de la deuxième guerre mondiale* 23. 1973, n-ro 89, p. 75-77.

Nur post la milito la revo pri egalrajteco de la korea kaj japana lingvoj sur la bazo de Esperanto kaj la espero pri kontribuo de Esperanto al pli profunda interkompreniĝo inter japanoj kaj ĝiaj aziaj najbaroj povis porti fruktojn. Nuntempe estas regulaj kontaktoj inter esperantistoj de Japanio kaj Suda Koreio, kaj dum reciprokaj vizitoj Esperanto povas plene demonstri sian utilan neŭtraligan rolon.[1] Konata japana etnologo, Umesao Tadao, foje deklaris, ke, kiam li prelegis en Koreio, la pli aĝaj inter liaj aŭskultantoj ja sciis la japanan, sed kredeble, lerninte ĝin sub premo, sentis reziston kontraŭ ĝia uzo; dume, li, Umesao, mem estis hezitema paroli japanlingve en Koreio. Pro tio li preferis prelegi pri sia faka temo en Esperanto, kun posta traduko en la korean.[2]

Tiel Esperanto servas kiel glacirompanto. Estante komunikilo inter japanoj kaj koreoj en limigita skalo, ĝi tamen helpas forigi la mensan ĝeniĝon, kiu restas ankoraŭ venkenda restaĵo el malĝojinda historio, penetrita per subpremo kaj perforto, sed ankaŭ ne malplena de kuraĝaj (kaj kuraĝigaj) provoj trarompi la barojn de diskriminacio kaj nekompreno.

1. Vd. la raporton pri la Kvara Komuna Esperanto-Seminario inter Korea kaj Japana Junularoj, kies temo estis „Kiel koreoj kaj japanoj scias, duonscias, ne scias aŭ misscias unuj la aliajn", en *La Revuo Orienta* 6. 1985, p. 262-267. – Necesas aldoni, ke ekde la dua duono de la 70aj jaroj proksimiĝis ankaŭ la rilatoj inter ĉinaj kaj japanaj esperantistoj.
2. Umesao Tadao, Takemura Ken'iti, „Sirarezaru sugao no Nihon. Taidan" (La nekonata vizaĝo de Japanio. Interparolo), *Ušio* 1971, n-ro 7, p. 201.

4. „LINGVO DE ETBURĜOJ KAJ KOSMOPOLITOJ"

Meze de marto 1979 okazis en Moskvo la fonda konferenco de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj. Dum ĝi deklaris profesoro Magomet Isaev, la asocia prezidanto:

> La sovetiaj esperantistoj dank' al sia sukcesa kaj multjara laboro pruvis al la tuta mondo, ke ili ekzistas kaj sukcese agas, ke Esperanto en nia lando ne estas persekutata (kiel iuj ŝatus prezenti la staton de la afero).[1]

En oficiala raporto pri la konferenco ni legas ankaŭ malkonfirmon de asertoj de la „okcidenta propagando", laŭ kiuj „al sovetianoj oni malpermesas korespondi kun eksterlandanoj": Estas emfaze dirite, ke „similaj ‚malpermesoj' en USSR neniam estis".[2]

Kio kaŝiĝas malantaŭ tiuj ĉi dementoj pri persekuto kaj malpermesoj? Ni prezentu alian citaĵon:

> La plej granda tragedio kaj retropuŝo en la historio de la internacia lingvo estis la kontraŭleĝa subpremo fare de la ŝtatsekureca organo al la Sovetrespublikara Esperantista Unio...

Tion skribis en 1976 la malnova brita komunisto kaj esperantisto William Keable[3], nedubeble amiko de Soveta Unio. Kaj li aldonis al sia konstato la impreson: „Ŝajnas, ke la vero pri la historio de Esperanto en Sovetunio ankoraŭ ne povas publikiĝi en Sovetunio mem!" Keable demandas: „Kial ne?"

Se en la ĝisnuna pritrakto ni montris, kiom devis suferi la Esperanto-movado pro la atakoj de konservativaj kaj faŝismaj reĝimoj, ni nun venas al dua variaĵo de persekutoj kontraŭ Esperanto – flanke de reĝimo, kiu konsideris sin la avangardo de

---

1. „Pri la stato kaj pliefikigo de laboro de sovetiaj esperantistoj kaj plibonigo de iliaj internaciaj ligoj" (raporto de Isaev), *Moscow News*, Supplement to issue No. 16 (2848), 1979 (22 apr.), p. 15.
2. Aleksandr Ĥarkovskij, „Mi aplaŭdas al kreiĝo de esperantista asocio...", samloke, p. 11-12.
3. Bill Keable, „Marxism-Leninism requires *all* the facts", *Communist Party Esperanto Group, Bulletin*, 1976, n-ro 8 (apr.). – Esperanta traduko: „Marksismo-leninismo bezonas *ĉiujn* faktojn", *La Verda Kolombo* 1976, n-ro 45 (apr./majo), p. 9-13 (citaĵo p. 10); n-ro 46 (jun./jul.), p. 11-14 (citaĵo p. 11).

tutmonda socialismo. Kvankam esplori la detalojn kaj kialojn de la subpremo de Esperanto en Soveta Unio estas senkompare pli malfacile, ol analizi la persekutojn sub Hitler, ĉar ni ne povas, kiel ekzemple pri Germanio kaj Japanio, uzi arkivajn materialojn de la polico, ni tamen frontu la taskon surbaze de la disponeblaj dokumentoj kaj klopodu atingi komprenon pri tio, kian sorton havis la Esperanto-movado en Soveta Unio.

4.1. *PROSPERO DE ESPERANTO EN SOVETA UNIO*

4.1.1. *Postrevoluciaj esperoj*

La rusaj esperantistoj, kiuj dekomence estis tre progresema elemento en la adeptaro de la Internacia Lingvo, en sia granda plimulto sendube bonvenigis la politikajn ŝanĝojn de la jaro 1917 – eĉ se nur pro tio, ke fine forfalis la cenzuraj baroj kaj la policaj ĝenoj de la malnova reĝimo. Jam tuj post la Februara Revolucio fondiĝis en Ruslando lokaj grupoj de esperantistoj-socialistoj, kaj inter la multaj partioj, kiuj naskiĝis en la unuaj monatoj post la falo de carismo, troviĝis ankaŭ „Tutmonda Unuiĝo de Socialistoj", kiu enhavis en sia programo la postulon pri senprokrasta enkonduko de Esperanto kiel internacia lingvo.[1] En 1918/19 estis Esperanto-grupoj en ĉ. 100 lokoj de Ruslando.[2] Ili plej ofte agis sendepende unu de la alia, sed estis faritaj ankaŭ klopodoj koordini la movadon – per la fondo de Tutruslanda Esperantista Komunista Unuiĝo kaj Tutruslanda Federacio de Junaj Esperantistoj.

La teksto de propaganda afiŝo el la jaro 1919 eble plej bone ilustras la esperojn, kiujn havis la esperantistoj en postcara Ruslando. Ĝi estis eldonita de „Domo Esperanto" en Moskvo, iama palaco de riĉulo[3], kiun la registaro senpage disponigis al

1. E. Drezen, „Unuaj pioniroj de laborista Esp.-movado. Kronologia skizo ĝis la jaro 1921", *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 4 (56), p. 5-6.
2. EdE, p. 590.
3. *Esperantista Laboristo* 1. 1920, n-ro 2 (mar.), p. 4. – La riĉulo estis Lopatin.

moskvaj kaj tutruslandaj Esperanto-organizaĵoj.[1] En tiu afiŝo estis komparata la historia signifo de la Komunista Manifesto de 1848 kun tiu de la Zamenhofa lingvo-projekto de 1887: La postulon de la unua, „Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!", ekplenumis la Oktobra Revolucio; nun venis la tempo, ke la liberigita proletaro same energie ĵetu sin al la tasko realigi ankaŭ la ideon de la dua, alprenante Esperanton kiel la tutmondan interkomprenigilon de la proletaro.[2]

Tiaj esperoj ne estis tute senbazaj. Kuraĝiga signo ŝajnis, ke en januaro 1919 ĉe la sovetrusa Popola Komisarejo pri Klerigo („Narkompros") estis organizita speciala komisiono por esplori la demandon pri enkonduko de fakultativa instruado de lingvo internacia en lernejoj. La komisionon konsistigis kelkaj esperantistoj, unu adepto de la projekto Ido kaj tri profesoroj de lingvistiko.[3] Subtenis ĝian laboron ankaŭ la verkisto Maksim Gor'kij, kies deklaro poste estis ofte citata de progresemaj esperantistoj:

> La konservativa pensado obstine pruvas, ke esperanto estas utopio. La vivanta, laŭleĝe disvastiĝanta realeco ne rapidante, sed ĉiam pli decide refutas la argumentojn de l' konservativuloj.

Gor'kij esprimis sian konvinkon, ke la organizita volo de la popoloj plene kapablos „naturigi" la artefaritan lingvon Esperanto kaj ke tia lingvo „donos fortegan antaŭenpuŝon al la proceso de kultura disvolvado".[4] Post kelkaj kunsidoj la komisiono konkludis en tezaro, ke la sola lingvo povanta ludi la rolon de internacia lingvo estas Esperanto. Poste ĝi ĉesis aktivi kaj ankaŭ preterlasis liveri al la Lerneja Sekcio de Narkompros definitivan raporton pri la farita laboro.[5]

1. *Esperanto* 16. 1920, p. 32. – Laŭ tiu fonto, aperis pri tio informo en *Izvestija* de 16/17-1-1919.
2. La afiŝo estas reproduktita en *esperanto* 63. 1970, p. 111.
3. Membroj estis i.a. la malnova esperantisto N.P. Evstifeev kaj la idisto L.T. Titov; la profesoroj estis R.F. Brandt, V.K. Porĵezinskij kaj D.N. Ušakov: *Esperantista Movado* 1921, n-ro 1/2 (11/12), p. 20.
4. „M. Gor'kij ob Esperanto", *Esperantista Movado* 1921, n-ro 1/2 (11/12), p. 3-4; cit. laŭ la Esperanta traduko de P. Medem, „M. Gorkij pri Esperanto", *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 4/5 (15/16), p. 6.
5. „En Moskvo", *Espero* (Petrograd) 1920, n-ro 1 (jun.); represita en *Mejdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 297-298, parte ankaŭ en *Esperanto* 17. 1921, p. 10, kaj *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 2 (13), p. 6. – La tezoj (de 5-3-1919) estas ruslingve publikigitaj en *Esperantista Movado* 1920, n-ro 3 (10), p. 10-11.

Kvankam la komisiono ne finplenumis sian taskon, ĝi havis kuriozan postefikon. Komence de 1920 polaj kaj germanaj gazetoj publikigis depeŝon kun eltiraĵo el sovetrusa gazeto, kiu anoncis la devigan enkondukon de Esperanto en lernejoj laŭ decido de oficiala komisiono elektita de la registaro.[1] La franca verkisto Romain Rolland tuj bonvenigis la supozatan decidon „historia evento, kies sekvoj estos grandegaj; ĝi estos pli farinta por la homara Internacio ol ĉiuj teoriaj diskutoj, aŭ disputoj de partioj en kiuj absorbiĝas la agado de la okcidenta socialismo"[2], kaj eĉ burĝaj esperantistoj rekonis „la grandegan civilizacian meriton"[3] de la raportita paŝo. Sub la influo de la informo el Soveta Ruslando, pluraj naciaj kongresoj de komunistaj partioj alprenis rezoluciojn favore al Esperanto.[4] Ŝajnis temi pri decido, pro kiu la laboristoj de ĉiuj landoj sentos sin kvazaŭ devigitaj lerni Esperanton.

La informon pri enkonduko de Esperanto en lernejojn de Soveta Ruslando tamen dekomence akompanis dubo kaj skeptiko, kiuj ĉiam pli fortiĝis, kiam la rusaj esperantistoj ne sukcesis prezenti pruvon por la ĝusteco de la informo. Ke ĉiuokaze ne temis pri deviga enkonduko, jam en majo 1920 precizigis la Popola Komisaro pri Klerigo mem, Anatolij Lunaĉarskij. Li tamen deklaris, ke la soveta registaro permesas lerni Esperanton

1. *Esperanto* 17. 1921, p. 10; *Esperantista Laboristo* 1. 1920, n-ro 4 (majo), p. 2; Edmond Privat, „Venkoj de Esperanto", *Esperanto* 16. 1920, p. 91; E. Adam, „Le Bolchevisme et l'Esperanto. La langue de Zamenhof officiellement adoptée par le Gouvernement des Soviets", *Le Travailleur Espérantiste* (3a serio) 1. 1920, n-ro 3 (apr.), p. 1.
2. Letero al E. Adam, de 20-4-1920, en *Esperantista Laboristo* 1. 1920, n-ro 4 (majo), p. 2; por la franclingva originalo vd. Pierre Hirsch, *Leteroj de Eugène Adam aŭ Lanti al Edmond Privat*; La Chaux-de-Fonds 1973, p. 13.
3. R. Maske, „Bolŝevikoj kaj Esperanto", *Germana Esperantisto* 17. 1920, p. 61.
4. La Dua Kongreso de Socialista Laborista Partio de Jugoslavio, rekte menciante la „decidon" de Soveta Ruslando, akceptis aparte favoran rezolucion en junio 1920: Marinko Ĝivoje, *Historio de Esperanto-Movado en Jugoslavio*, Zagreb 1965, ĉap. 4; EeP, p. 646. En aŭgusto 1920, kongreso de rumanaj socialistoj oficiale alprenis Esperanton kiel internacian lingvon: Andreo Ĉe (Cseh) en *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 1 (12), p. 6. Ankaŭ la fondkongreso de Franca Komunista Partio en Parizo, en majo 1920, akceptis dezirespримon por pli da instruado de Esperanto, „mirinda helpilo por atingi konkordon inter la popoloj kaj malhelpi la militojn": *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 6 (17), p. 10.

fakultative kaj egale kiel la francan, germanan kaj anglan lingvojn[1], kaj fakte regis atmosfero favora al Esperanto: En decembro estis notite, ke preskaŭ ne ekzistas iu urbo, kie loka fako de popolklerigo malfavore rilatas al Esperanto.[2] Tiuj fakoj eĉ donis salajron al la gvidantoj de Esperanto-kursoj.[3]

Aliflanke, la observanto konstatinta ĝeneralan favoron samtempe konfesis, ke plivastigo de la movado dependos de tio, ĉu „nia registaro diros sian opinion pri internacia lingvo".[4] Evidente, do, la rusaj esperantistoj konsciis, ke decido por la deviga lerneja instruado de Esperanto ne estis farita. Ĉar tamen daŭris, precipe inter komunistoj en eksterlando, spekulacioj pri oficiala bonvolemo al Esperanto en Moskvo, fine la gazetoj *Izvestija* kaj *Trud* devis aperigi dementon, kiu ne plu allasis dubojn:

> Ĉefpolitkleriga Fako pro demandoj el diversaj lokoj pri instruado kaj lernado de lingvo Esperanto klarigas, ke opinii la lingvon Esperanto kiel internacian lingvon, indan de ekskluziva registara atento, estas nun antaŭtempe. La esperantistaj rondetoj estas privataj organizaĵoj. Ekzistantaj sekcioj de Esperanto ĉe politklerigaj fakoj en kelkaj urboj devas esti likviditaj.[5]

Tiu deklaro do ne nur forigis iluziojn estiĝintajn en ligo kun la komisiono ĉe Narkompros, sed ankaŭ ĉesigis la modestajn atingojn ĉe lokaj politklerigaj fakoj. Ŝajnas, ke rusaj esperantistoj damaĝis al si mem per troa fervoro kaj aplomba distrumpetado de nematuriĝintaj pridiskutoj de diversaj, ĉefe lokaj, aŭtoritatoj. Gor'kij en 1933 iom mistere supozis: „La unuajn jarojn post la Oktobro ankaŭ ĉe ni oni provis malfermi larĝe la pordon al Esperanto. Sed... io ekbremsis, iu ion ne prikonsideris, ien deflankiĝis."[6] Pri „multaj ne pripensitaj agoj" de siaj samlanda-

1. Laŭ atesto de M.S. Valentinov, CK-ano de SEU, en *Sennacieca Revuo* 3. 1921/22, n-ro 5 (24), p. 9.
2. N. Karatajev, „Kion ni devas fari?", *Esperantista Movado* 1920, n-ro 3 (10), dec., p. 5.
3. „Esperanto en Rusio", *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 2 (13), p. 6.
4. Kiel noto 2.
5. 21-12-1921; laŭ *Sennacieca Revuo* 3. 1921/22, n-ro 5 (24), p. 9. – Jam pli frue, en oktobro 1920, la Tria Kongreso de Komunista Junularo (Komsomol) decidis, ke la lernado de Esperanto estas persona afero de ĉiu membro: N. Karatajev, „Pri propagando inter gejunularo", *Esperantista Movado* 1921, n-ro 1/2 (11/12), p. 7.
6. I. Ŝkapa, „Novaj, nekonataj materialoj pri M. Gorkij kaj Esperanto", *Esperanta Finnlando* 1969, n-ro 5 (jun.), p. 42; represita ankaŭ en *Bulgara Esperantisto* 38, 1969, n-ro 12, p. 3.

noj parolis rusa esperantisto en 1921[1], kaj Ernest Drezen, poste la ĉefa figuro en la soveta Esperanto-movado, jam en la dua duono de 1920, aludante al fiaskintaj eksperimentoj kiel la komisiono, avertis kontraŭ „grandioziga" tendenco.[2]

Al tiuj eksperimentoj apartenis ankaŭ provoj alproksimiĝi al Komintern. En novembro 1919, kelkaj esperantistoj en Samara (nun Kujbyŝev) fondis t.n. „Esperantan Sekcion ĉe IIIa Komunista Internacionalo", eĉ ne demandinte la Komintern, kiu havis nur naciajn sekciojn. Laŭ la postulo de Komintern, la grupo, intertempe translokiĝinta al Moskvo, ŝanĝis sian nomon al „Esperanta Komunista Internacio" (ESKI), sed tio ne savis ĝin: En aŭtuno 1921 la Centra Komitato de la Rusa Komunista Partio malpermesis la pluekziston de ESKI, kredeble konsiderante ĝin sekteca entrepreno.[3]

Malsukcesa estis ankaŭ rekta klopodo ĉe Komintern akiri favoran pritrakton de la demando de internacia lingvo. Propono, ke oni diskutu tiun demandon dum la Dua Kongreso de Komintern en julio/aŭgusto 1920 en Petrograd kaj Moskvo, estis submetita de kelkaj delegitoj, inter ili la hispano Angel Pestaña.[4] Ĝi estis transdonita al la Plenumkomitato por pritrakto en la venonta kongreso. Efektive, kiam tiu okazis, en Moskvo en junio/julio 1921, venis rezoluci-propono, ĉi-foje subtenata de delegitoj el preskaŭ ĉiuj reprezentitaj nacioj; ĝi pledis, ke – jam starigita – Studa Komisiono por alpreno de helpa lingvo en la Tria Internacio science ekzamenu la utilon kaj aplikeblon de internacia lingvo.[5] En la lasta kongresa tago, la 12an de julio

1. N. Karatajev, „Esperanta movado en Sovieta Respubliko", *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 4/5 (15/16), p. 7.
2. E. Drezen, „La sperto de la lastaj ruslandaj Esperanto-eksperimentoj", *Esperantista Movado* 1920, n-ro 2 (9), okt./nov., p. 3.
3. H.K. „Kial Esperanto en Rusio malvenkas", *Sennacieca Revuo* 3. 1921/22, n-ro 10 (28), p. 7. – La iniciatintoj de ESKI estis Ort Sunnam (alinome, Ohitovič) kaj Drezen, kiu lasta poste nevolonte estis memorigita pri sia rolo. Ŝajne, ilia ideo estis koncentri en ESKI la tutan Esperanto-movadon en Soveta Ruslando: *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 4/5 (15/16), p. 8; vd. ankaŭ EdE, p. 123.
4. *Esperantista Movado* 1920, n-ro 2 (9), p. 10, 15.
5. *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 7/8 (18/19), p. 12-13; *Sennacieca Revuo* 2. 1921/22, n-ro 1 (20), p. 12; Jörg Mager, „Die Esperantobewegung in Rußland", *Der Arbeiter-Esperantist* 7. 1921, n-ro 10, p. 49. – La

1921, la germano Wilhelm Koenen nome de la Prezidiumo atingis konsenton, ke la propono estu pritraktata en la Plenumkomitato.[1] Prenante tion kiel oficialan mandaton, la komisiono komencis labori – sub prezidanto, József Pogány[2] kaj sekretario, Hans Itschner, kiuj ambaŭ estis idistoj.

Jam kelkajn monatojn poste en komunistaj gazetoj[3] aperis informoj, ke la komisiono venis al la konkludo, ke lingvo kiel Ido havas pli da ŝanco, ol Esperanto, esti akceptita kiel internacia lingvo.[4] La ekscitiĝo inter la esperantistoj estis granda: Ne malprave ili suspektis la laboron de la komisiono kiel intrigon de manpleno da idistoj sub la „kvazaŭa aŭspicio" de Komintern. Kvankam baldaŭ venis sciigo el Moskvo, ke la komisiono estis jam likvidita ĉ. marto 1922[5], la franco Eugène Lanti, la gvidanto de Sennacieca Asocio Tutmonda, el Parizo alvojaĝis Moskvon por persone informiĝi pri la afero. De Mátyás Rákosi, sekretario de la Plenumkomitato de Komintern, Lanti ricevis konfirmon, ke Komintern dissolvis la komisionon, „kiu fakte neniam funkciis", kaj ke entute la Internacio „havis nenian intereson por tiu entrepreno".[6] En majo 1923, fine, la Plenumkomitato notis en oficiala protokolo, ke „neniu porlingva organizaĵo havas la rajton apogi sin sur la aŭtoritaton de Komintern".[7]

---

rezoluci-proponon iniciatis la sviso Itschner, tiutempe membro de la Plenumkomitato de Komintern. Inter la subskribintoj estis la franco Boris Souvarine, la sviso Jules Humbert-Droz kaj la germano Willi Münzenberg.

1. *Protokoll des III. Kongresses der Kommunistischen Internationale. Moskau, 22. Juni bis 12. Juli 1921*, Hamburg 1921 (represo Erlangen 1973), p. 1057.
2. Pogány (1886-1938) en 1919 estis popolkomisaro de Hungara Konsilantara Respubliko.
3. Interalie en *L'Humanité*, 28-3-1922; laŭ *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 7/8 (37/38), p. 23.
4. E.L., „Stranga informo", *Sennacieca Revuo* 3. 1921/22, n-ro 10 (28), p. 8.
5. Letero de Sovjetlanda Unuiĝo Esperantista al E. Lanty, de 24-6-1922, en *Sennacieca Revuo* 3. 1921/22, n-ro 11/12 (30/31), p. 18.
6. E.L., „Finita la komedio...", *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 1 (32), p. 9-10; E.L., „Tri semajnojn en Rusio", *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 3 (33), p. 5 (ankaŭ en *Vortoj de kamarado E. Lanti*, Leipzig 1931 [represo Laroque Timbaut 1979], p. 18-19).
7. *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 11/12 (41/42), p. 14. Vd. ankaŭ A. Tivel', M. Ĥejmo, *10 let Kominterna v rešenijaĥ i cifraĥ. Spravočnik po istorii Kominterna* (10 jaroj de Komintern en decidoj kaj ciferoj. Informlibro pri la historio de Komintern), Moskva, Leningrad 1929 (represo

La dissolvo de oficialaj Esperanto-sekcioj ĉe politklerigaj fakoj kaj la konfirmo de Komintern, ke ĝi ne interesiĝas pri Esperanto aŭ Ido, draste konsciigis al la sovetaj esperantistoj, kiajn limojn starigis al ili la kruda realeco en la postcara Ruslando. Ambaŭ eventoj markas la unuan cezuron en la historio de la soveta Esperanto-movado.

Multaj rusaj esperantistoj estis bonfide salutintaj la revolucion kiel aŭroron ankaŭ por Esperanto kaj kaptiĝis de fajra entuziasmo pro la perspektivo faciligi la liberigon de la subpremataj klasfratoj en okcidento per la uzo de la lingvo de la tutmonda proletaro, Esperanto.[1] Fakte, la spontanea deziro tuj servigi Esperanton al la mondrevolucio konformis al la atmosfero en la unuaj jaroj sub la soveta rego. Ne estas hazarde, ke la subita multiĝo de Esperanto-grupoj okazis en la sama periodo, inter 1917 kaj 1921, en kiu disvastiĝis ankaŭ la t.n. proletkultura movado, kaj oni ankaŭ ne povas nei, ke la du fenomenoj estis interligitaj. Laŭ la ideoj de la inspirinto de la proletkultura movado, Aleksandr Bogdanov[2], la tutmonda proletaro krom per politikaj kaj ekonomiaj agadoj kunproksimiĝu ankaŭ per kultura laboro, kiu ne estu submetita al la kontrolo de la Partio. Preskaŭ ekzalte la adeptoj de „Proletkul't" proklamis la proletaron portanto de tute nova kulturo, radikale diferenca de la antaŭa, burĝa kulturo. Tiu ĉi – tuj kreenda – proleta kulturo estis destinita iĝi

---

Milano 1967), p. 34, 52, 57, 78. – En 1924 dumtempe estis denove espero, ke Komintern interesiĝos pri la mondlingva demando. Ĝia sekretario Béla Kun petis raporton pri la laborista Esperanto-movado. Laŭ komisio de la Komunista Frakcio de SAT, Lanti verkis tiun raporton franclingve kaj sendis al Moskvo (E.L., „Publika letero al kompartiaj SAT-anoj", *Sennaciulo* 8. 1931/32, p. 138). Ŝajnas, ke Komintern enketis ankaŭ inter la komunistaj partioj pri la situacio de la Esperanto-movado en diversaj landoj: Letero de KP de Ĉeĥoslovakio al R. Burda, de 22-3-1926, en *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 29 (81), p. 7. Pri ia sekvo nenio estas konata. (La raporto por Komintern poste aperis broŝurforme: E. Lanty, *La langue internationale. Ce que tout militant ouvrier doit connaître de la question*, Paris 1925.)

1. Por viva priskribo, kiel en 1920 juna ruĝarmeano estis varbita por Esperanto, vd. S.N. Podkaminer, „Oktobra Revolucio kaj rusia esperantista movado", *Der Esperantist* 14. 1978, n-ro 3 (89), p. 4.
2. Pseŭdonimo de A.A. Malinovskij (1873-1928). Pri li vd. Dietrich Grille, *Lenins Rivale. Bogdanov und seine Philosophie*, Köln 1966. – En Esperanto aperis A. Bogdanov, *Ruĝa stelo. Fantazia romano*. Trad. N. Nekrasov kaj S. Rublev, Leipzig 1929.

ĝenerale-homa kulturo post la frakaso de la laŭklasa disdivido de la socio.[1]

La proletkultura movado, kies komencoj estis en la jaro 1906, multe prosperis post la revolucio. En 1920, sur la kulmino de sia aktivado, ĝi havis ĉ. 500 000 membrojn. Aperis ĉ. 20 literaturaj kaj kulturpolitikaj periodaĵoj, kaj eĉ en malproksimaj regionoj „Proletkul't" havis siajn klubojn kaj studiojn pri teatro, muziko, arto kaj literaturo, kie laboristoj per kolektiva kultura aktivado estis edukotaj al proleta konscio.

La radikala pledo por nova, tuthomara kulturo, bazita sur la kreema potenco de la monda proletaro, sonis alloge ankaŭ por esperantistoj – precipe por tiuj, kiuj en la senco de la propaganda afiŝo el 1919 esperis de la revolucio barorompan efikon por sia movado. Same, en la proletkultura movado ne mankis inklino kalkuli la Esperanto-movadon al la sama tendaro. En februaro 1919 unu el la teoriistoj de „Proletkul't", V. Kerĵencev[2], en artikolo pri „Internacia revolucio kaj proleta kulturo" argumentis, ke por plifaciligi la kulturan interŝanĝon de laboristoj de diversaj landoj necesas pensi pri (proleta) internacia lingvo. Tia lingvo „estus nova atingo de la kulturo kaj teknika ilo de reciprokaj rilatoj".[3] Ankaŭ Bogdanov dediĉis en 1919 prelegon al la temo „Proleta kulturo kaj internacia lingvo"; li parolis pri unuiĝo de la lingvoj per ĉiam pli da kontakto inter la popoloj. Kiel kernon de internacia lingvo Bogdanov tamen konsideris la anglan; li neis, ke „la senfina komplikeco kaj varieco de la sociaj rilatoj kaj spertoj kun iliaj nuancoj kaj ilia interplektiĝo povus esti objektive, t.e. ĝenerale-valide esprimata per naiv-ŝabloneca Esperanto".[4]

1. Gabriele Gorzka, *A. Bogdanov und der russische Proletkult. Theorie und Praxis einer sozialistischen Kulturrevolution*, Frankfurt a.M., New York 1980.
2. Pseŭdonimo de P.M. Lebedev (1881-1940).
3. V. Kerĵencev, „Meĵdunarodnaja revoljucija i proletarskaja kul'tura", *Proletarskaja kul'tura* 1919, n-ro 6; germana traduko en: Richard Lorenz (red.), *Proletarische Kulturrevolution in Sowjetrußland (1917-1921). Dokumente des ‚Proletkult'*, München 1969, p. 76.
4. A. Bogdanov, *O proletarskoj kul'ture*, Leningrad, Moskva 1924, p. 329. – Pli malfrue li juĝis pri Esperanto pli favore, kvankam ankoraŭ skeptike; vd. lian antaŭparolon al artikolo, „De la filozofio al la organiza scienco", speciale verkita por *Sennacieca Revuo. Literatur-scienca aldono* 1 (3). 1923/24, p. 83-84. Krome, vd. A. Tom, „V tupike, Èvoljucija vzgljadov A. Bogdanova na meĵdunarodnyj jazyk" (En senelirejo. La evoluo de la

Aliflanke, en 1920 Tutruslanda Kongreso de Arto unuanime voĉdonis favore al Esperanto[1], en diversaj lokoj efektiviĝis kunlaboro inter grupoj de „Proletkul't" kaj esperantistoj[2], kaj ankaŭ Lanti, kiu dum sia restado en Moskvo detale informiĝis pri la celoj de la proletkultura movado, ekvidis ŝancojn, ke Esperanto ludos gravan rolon en ĝi.[3] Pri ambaŭ, la esperantistoj kaj la anoj de „Proletkul't", oni povas fakte konstati la ekziston de forta romantik-utopiisma elemento.

Tamen, jam en 1922 „Proletkul't" havis la zeniton de sia agado malantaŭ si. La spontaneemo de la proletkultura movado ne harmoniis kun la organizaj celoj de la Komunista Partio, inter kiuj pleje gravis la politika fortikigo de la soveta ŝtato kaj la restarigo de la ekonomio. Lenin, malnova antagonisto de Bogdanov, pragmate celis unuavice kontraŭbatali la analfabetecon kaj levi la ĝeneralan klerec-nivelon de la popolo, al kiu li deziris proksimigi la tradician kulturan heredaĵon, eĉ se burĝan, anstataŭ konfuzi ĝin per eksperimentoj pri revolucia arto kaj literaturo. Klerigi la popolon, t.e. havigi al ĝi la scion necesan por la konstruado de socialismo, estis laŭ Lenin la vera „kultura revolucio". La pretendon pri „kultura aŭtonomio" de la proletaro li konsideris nekonforma al la postuloj de la tempo, eĉ minaca al la hegemonio de la Partio, kaj tial postulis en oktobro 1920, ke „Proletkul't" estu submetita al la Popola Komisarejo pri Klerigo.[4] En 1922 ĝi praktike disfalis kiel amas-organizaĵo.

Se „Proletkul't" malgraŭ la dekomenca opono de Lenin povis dum kelka tempo aktivi, tio ŝuldiĝis interalie al la ŝirma mano de Lunaĉarskij, la Komisaro pri Klerigo. Ankaŭ li diferencigis inter

---

opinio de A. Bogdanov pri internacia lingvo), *Izvestija C.K. SĖSR* 6. 1928, p. 257-266.

1. *Esperantista Movado* 1920, n-ro 2 (9), p. 11.
2. Ekzemple, la gubernia komitato de junaj esperantistoj en Simbirsk (nun Ul'janov) ricevis materian helpon de Proletkul't: *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 7/8 (18/19), p. 13.
3. E.L. „Tri semajnojn en Rusio", *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 4 (34), p. 5-7; n-ro 5 (35), p. 9-10. – Lanti i.a. renkontiĝis kun la antaŭa prezidanto de Proletkul't, V.I. Lebedev-Poljanskij. Tamen, dum la tempo de lia vizito la graveco de Proletkul't jam estis esence reduktita.
4. Carmen Claudin-Urondo, *Lénine et la révolution culturelle*, La Haye, Paris 1974; Wladimir Gorbunow, *Lenin und der Proletkult*, Berlin 1979 (trad. el la rusa).

klasa kulturo kaj la „socialisma kulturo de la estonteco", difinita de li kiel ĝenerale-homa, eksterklasa kulturo.[1] En la lernejoj Lunaĉarskij celis edukon bazitan sur internaciismo, energie kontraŭante ekz. „patriotisman instruadon de historio". Sed ekde 1921 Lunaĉarskij devis cedi al Lenin ne nur pri la proletkultura movado: Li devis toleri eĉ drastan redukton de la eduka buĝeto, kio entombigis la esperon pri baldaŭaj sukcesoj de la komencita pedagogia revolucio.[2]

Tiu evoluo jam apartenis al la komenca fazo de nova politik-ekonomia celdifino de la soveta ŝtato. Por restarigi la rusan ekonomion, kiun pro la civila milito kaj la tro rapidaj socialismigaj provoj minacis kolapso, Lenin en marto 1921 estis proklaminta sian t.n. Novan Ekonomian Politikon (NEP). Ties ĉefa celo estis radikala sanigo de la ekonomio – eĉ je la kostoj de konsekvenca observo de komunismaj principoj: NEP i.a. permesis denove privatajn entreprenojn kaj preskaŭ liberan komercon. Starigante kvazaŭ ŝtatkapitalisman sistemon, en kiu mono, merkato, salajro laŭ merito kaj persona iniciatemo rericevis gravon, la nova politiko sur la ekonomia kampo estis por multaj komunistoj ŝoko kaj dolora detruo de iluzioj.[3]

Kiel montris la dissolvo de la Esperanto-sekcioj ĉe politklerigaj fakoj, ankaŭ la Esperanto-movado spertis la sekvojn de evoluo, dum kiu la premaj realaĵoj diktis subigon de revolucia entuziasmo. En junio 1922 rusa esperantisto notis, ke NEP „senigis multajn kultur-entreprenojn de regna helpo. Inter ilian nombron trafis ankaŭ Esperanto. Do nun la rusa esperantistaro aranĝas sin laŭ la privata maniero." Tiun ĉi konstaton sekvis juĝo sufiĉe optimisma: „La situacio malgraŭ ĉio ne estas pli malbona."[4]

---

1. A. Lunatscharski, *Die Kulturaufgaben der Arbeiterklasse. Allgemeinmenschliche Kultur und Klassen-Kultur*, Berlin-Wilmersdorf 1919. – Sheila Fitzpatrick, *The Commissariat of Enlightenment. Soviet organization of education and arts under Lunacharsky, October 1917–1921*, London 1970.
2. Oskar Anweiler, „Erziehungs- und Bildungspolitik", en: Oskar Anweiler, Karl-Heinz Ruffmann (red.), *Kulturpolitik der Sowjetunion*, Stuttgart 1973, p. 28, 68.
3. Pri tio kp. la diskuton inter Lanti kaj rusa komunisto: E.L., „Tri semajnojn en Rusio", *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 7/8 (37/38), p. 18-21.
4. N. Futerfas, "Esperanto en Rusio", *La Nova Epoko* 1922, n-ro 1 (jun.), kol. 22.

4.1.2. *Fondiĝo de SEU kaj SAT*

La ĵus citita observo celis resumi la spertojn de unu jaro, dum kiu, ankoraŭ en la fazo de eksperimentado, estis faritaj la unuaj paŝoj por adapti la Esperanto-movadon al la ŝanĝiĝintaj cirkonstancoj. Komence de junio 1921 en Petrogrado estis okazinta la Tria Tutruslanda Esperantista Kongreso, la unua post la revolucio. Partoprenis ĝin ĉ. 160 delegitoj, kiuj precipe diskutis kiel reorganizi la movadon en Ruslando sub la soveta reĝimo. La rezulto estis la fondo de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU)[1], kiu dekomence pretendis esti la reprezenta organizaĵo de la esperantistoj en Soveta Ruslando.

Pri la fondiĝo de SEU ne regis unuanimeco: 20 delegitoj forlasis la kongreson[2], proteste kontraŭ „kruda kaj severa unuformigo de la movado" en Ruslando.[3] Sed venkis tiuj, kiuj emfazis la neceson de organiza unueco post preskaŭ kvarjara malordo kaj dissplititeco. La kongreso akceptis du tezarojn: Unu, pri organizaj demandoj, deklaris la sovetrusan Esperanto-movadon senkondiĉe alkonformigenda al la reĝimo, kritikante la „frakciojn", kiuj de nur esperantista vidpunkto juĝas la nuntempon; la dua, pri rilatoj kun eksterlando, atentigis, ke ĉiu Esperanta aktivado, inkluzive la ricevon de gazetoj kaj literaturo el eksterlando, devos esti plene centrigita ĉe SEU.[4]

---

1. Ruslingve: Sojuz Ėsperantistov Sovetskiĥ Stran. De 1927 la nomo estis: Sovetrespublikara Esperantista Unio (Sojuz Ėsperantistov Sovetskiĥ Respublik).
2. EdE, p. 591.
3. E. Drezen, „Al la sovetlanda esperantistaro", *Esperanta Informilo* (Monata organo de Petrograda Societo Esperantista) 1921, n-ro 2/6 (jun./okt.), p. 6. – Partopreninto de la kongreso memoras, ke estis „varmegaj" diskutoj pri la rolo de la esperantistoj en la konstruado de la soveta ŝtato kaj ke nur malplimulto de la delegitoj defendis la principon de neŭtraleco de la Esperanto-movado: Efim Flejs, „Pasis kvindek jaroj", *Bulgara Esperantisto* 30. 1961, n-ro 10, p. 9. Laŭ raporto de ĉino, kiu tiutempe studis en Moskvo, okazis eĉ arestoj kaj dumtempa fermo de Esperanto-grupoj sekve de tio, ke „multe da malnovaj samideanoj" rezistis la strebadon „unuigi esperantismon kun komunismo" kaj esprimis sin kontraŭ bolŝevismo ankaŭ en leteroj al eksterlando: Bao Pu, „La movado de Esperanto en Rusujo", *La Verda Lumo* 3. 1923/24, p. 5.
4. „Tezaro pri la organizaj demandoj de Ruslanda Tutesperanta movado", *Esperanta Informilo* 1921, n-ro 2/6 (jun./okt.), p. 3-5; „Tezaro pri Sovetlandaj Esperanto-interrilatoj kun la internacia esperantistaro", samloke, p. 5-6.

La tezarojn ellaboris Ernest Karlovič Drezen, kiu estis elektita prezidanto de la 15-membra Centra Komitato de SEU. Ĉar Drezen gvidis la organizaĵon dum ĝia tuta ekzisto, necesas doni pri li kelkajn biografiajn detalojn. Laŭdevene latvo, naskita en 1892, Drezen vizitis gimnazion en Kronŝtadt kaj poste la teknikan altlernejon en Peterburgo, kie li ankaŭ tre aktive agis en Studenta Esperantista Grupo. Grupa kolego memoras lin „gaja petolema junulo", kiu estis inteligenta kaj bone edukita.[1] Dum la milito Drezen estis sendita al militinĝeniera lernejo kaj en aŭgusto 1916 iĝis oficiro en elektro-inĝeniera bataliono. Post la Februara Revolucio, en kies tria tago jam li helpis gardi arestitajn carajn ministrojn en la Taŭrida Palaco, li aliĝis al la maldekstra alo de la Partio de Soci-revoluciuloj, kiu kune kun la bolŝevikoj formis la unuan sovetan registaron. En 1918 Drezen membriĝis en la Komunista Partio, al kiu li servis en la Ruĝa Armeo kiel komandanto kaj komisaro. De 1921 li laboris en Kremlo – kiel vic-afergvidanto en la Centra Ekzekutiva Komitato de Sovetoj.[2] Havi prezidanton en pozicio, kiu estis proksima al la centro de potenco, sendube estis avantaĝe por la nova organizaĵo de sovetaj esperantistoj. Ĝia fondiĝo do, la novkomenco post la trompiĝo de la unuaj postrevoluciaj esperoj, ŝajnis promesdona.

Du monatojn post la fondiĝo de SEU, ankaŭ en la internacia Esperanto-movado okazis organiza evento, kiu signis la eniron en novan evolufazon: Komence de aŭgusto 1921 estis fondita Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), kiu celis esti la reprezenta organizaĵo de homoj unuigitaj per la deziro servigi Esperanton al la tutmonda klasbatalo.

Klopodoj krei memstarajn grupojn de laboristaj esperantistoj komenciĝis jam en la jaroj antaŭ la eksplodo de la Unua Mondmilito; ilin kuraĝigis Zamenhof mem, skribante al la redaktoro

1. Letero de Roman Sakowicz al Hans Jakob, de 2-7-1957; S.A. Kovič (= Sakowicz), „Ĉu V.I. Lenin estis esperantisto?", *Heroldo de Esperanto* 45. 1969, n-ro 8 (1471), p. 2.
2. R. Nikolskij, „Kontraŭ kalumnioj pri kamarado Drezen", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 212-213. – De 1924 Drezen (laŭ EdE, p. 112) laboris ĉefe en scienca kampo, i.a. pri racia laborорganizo kaj lingvistiko. De 1926 ĝis 1930 li estis direktoro de la Instituto de Komunikado. Li estis profesoro en diversaj teknikaj altlernejoj kaj ankaŭ estrarano de Tutsoveta Societo por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando (VOKS).

de nove fondita laborista Esperanto-gazeto en Germanio, ke „eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj", kaj ke tiuj „ankaŭ pli ol aliaj sentos la *esencon* kaj la *ideon* de la esperantismo".[1] Ankaŭ jam antaŭ la mondmilito estis rimarkebla la jena fenomeno: La plimulto de la laboristoj uzantaj Esperanton konsideris daŭran kunlaboron kun la neŭtralaj organizaĵoj kiel nerealan alternativon kaj sekve preferis havi siajn proprajn grupojn kaj periodaĵojn. Krom la fakto, ke la gvido de la movado preskaŭ ekskluzive troviĝis en la manoj de riĉaj kaj socie respektataj personoj, la laboristojn fortimigis la nepolitikema „samideana" etoso, la ofte troa kulto ĉirkaŭ la „majstro" Zamenhof (kiun tiu mem abomenis), la kantado de naiva himno kaj la abunda uzo de simboloj kiel verdaj flagoj kaj steloj. Ne malplej grave, ili estis aparte impresiĝemaj de la idealisma komponento de Esperanto kaj tial kun maltrankvilo registris, ke multaj esperantistoj ŝajnis havi nesufiĉan komprenon por la ideoj de Zamenhof aŭ Hodler, kiuj emfazis la ligitecon de Esperanto al la celo forigi internacian strecitecon kaj socian maljuston.

La historian meriton esti la kreinto de memstara internacia organizaĵo de laboristaj esperantistoj portas la franco Eugène Adam, kiu iĝis konata per la pseŭdonimo Lanti.[2] Naskiĝinte en 1879 en Normandio, Lanti ricevis nur elementan instruadon, sed kiel aŭtodidakto alproprigis al si rapide konsiderindan scion. Li lernis la lignaĵistan metion, kiun poste li ankaŭ instruis. En Parizo, ĉirkaŭ la jarcent-ŝanĝiĝo, Lanti estis allogita al anarkiismo, sub la influo de Petr Kropotkin kaj Elisée Reclus, kaj poste havis personan rilaton precipe kun la teoriistoj Sébastien Faure, Jean Grave kaj Han Ryner.[3] Ravis lin precipe la nedogmemaj trajtoj de anarkiismo kaj la radikala kontraŭstaro

1. Letero de Zamenhof al Leopold Schlaf, de 20-9-1910, en *Der Arbeiter-Esperantist/La Laborista Esperantisto* 1. 1910, n-ro 2 (sept.), p. 10. – Tiu ĉi letero estis ofte represita, laste en PVZ IX 147-148.
2. Formita laŭ *l'anti* (la kontraŭulo). Adam nomis sin Lanty ekde oktobro 1921, Lanti ekde 1928.
3. *Leteroj de E. Lanti*, Paris 1940, p. 179; E. Borsboom, *Vivo de Lanti*, Parizo 1976, p. 11-12, 14. – Plej longdaŭra estis la kontakto kun la franca verkisto-filozofo Han Ryner (1861-1938), kies verkon *La veraj interparoladoj de Sokrato* (Laroque Timbaut 1979) Lanti mem esperantigis.

al naciismo. La milito, kiun Lanti partoprenis en ambulanc-taĉmento, pligrandigis lian abomenon al ĉio nacieca, sed aliflanke, pro la seniluziiga ekzemplo de la anarkiista grandulo Kropotkin, kiu en 1914 malkaŝis sin rusa patrioto, ankaŭ kondukis al distanciĝo de anarkiismo. Sekve, kiam en 1917 venkis la Oktobra Revolucio, Lanti volonte aliĝis al la simpatiantoj de la bolŝevikoj.

En decembro 1914 komencinte lerni Esperanton, Lanti post la milito ekhavis kontakton kun revoluciemaj esperantistoj en Parizo, kiuj ĵus restarigis sian jam antaŭmilite ekzistintan malgrandan organizaĵon „Liberiga Stelo". Ili ofertis al Lanti la redakton de sia organo *Le Travailleur Espérantiste*. Li akceptis kaj enmetis en la unuan numeron deklaron, kiu enkonduke metis la prioritaton „Socialistoj kaj sindikalistoj unue... Esperantistoj poste..." kaj finiĝis per la postulo „For ĉiujn fanatikismojn!".[1]

En siaj artikoloj por la gazeto, kies origine franclingva enhavo baldaŭ cedis lokon al ekskluzive Esperantaj paĝoj, Lanti esprimis sin skeptike pri provoj kunigi la naciajn laboristajn asociojn en „ruĝverda Internacio". Li pledis, unuafoje en aprilo 1920, por „sennacieca" organizformo[2], kaj en la postaj monatoj daŭre revenis al tiu temo. Fojon post fojo proklamante sian konvinkon, ke naciojn necesas neniigi, li alvokis al siaj legantoj jam tuj „kvazaŭ embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii la universala socio". Lanti koncedis, ke naciaj asocioj estas bezonataj, sed rifuzis, ke sur ilia bazo fondiĝu la celata tutmonda organizaĵo. Laŭ li, prefere oni per esperantlingva mikrokosmo klopodu krei „sennaciecan popolon", kiu „senprokraste kutimiĝu al eksternacia agado, pens- kaj sentkapablo".[3] Li mem faris la komencon, ekde la mezo de 1920 subskribante siajn artikolojn per „Sennaciulo".

Lanti ankaŭ pledis por laŭeble rigora apartigo disde la neŭtrala Esperanto-movado. Ties burĝan spiriton li kondamnis same kiel

1. „Déclaration", *Le Travailleur Espérantiste* (2a serio) 1. 1919, n-ro 1 (aŭg.), p. 1.
2. Aseto, „Diskutejo. Ĉu internacia aŭ sennacieca organizaĵo?", *Esperantista Laboristo* 1. 1920, n-ro 3 (apr.), p. 2.
3. Sennaciulo, „Liberiga Stelo al la Verdruĝuloj", *Esperantista Laboristo* 1. 1920, n-ro 10 (nov.), p. 2.

la iluzion, ke Esperanto malhelpos militojn[1], kaj entute la Esperantan neŭtralismon, kiu „nebuligas la vidon al klaskonscio".[2] Laŭ Lanti, „Esperanto ne estas la *celo* de nia agado, sed *nur rimedo* por atingi nian celon"[3] – kaj li konkludis per la batalkrio „For la neŭtralismon!". Sub tiu titolo poste aperis broŝuro kun la artikolaro de Lanti, sur kies kovrilo estis presitaj la jenaj subtenaj vortoj de la franca revolucia verkisto Henri Barbusse: „La burĝoj kaj mondumaj esperantistoj estos pli kaj pli mirigataj kaj terurigataj de ĉio povanta eliri el tiu talismano: Instrumento donanta al ĉiuj ajn homoj la eblon interkompreniĝi."[4]

Lanti ja povis prave vidi sin ligita al malnova tradicio en la laborista movado, kiam li tiel verve pledis por la ignoro de nacioj.[5] Same, inspiris lin la modelo de Hector Hodler, kiu en 1908 estis fondinta Universalan Esperanto-Asocion sur la bazo de individuaj membroj, ne de naciaj asocioj.[6] Originala tamen estis la decida provo meti Esperanton en la servon de klasbatalo senrigarde al partipolitikaj preferoj: Li dekomence celis malfermi sian organizaĵon egale al socialistoj, komunistoj kaj anarkiistoj kaj ne lasi ĝin traskui per la pasioj kaj taktikaj zigzagoj de la malsamaj laboristaj partioj. Laŭ sia karaktero, la organizaĵo estu ne (parti-)

1. E. Lanti, *For la neŭtralismon!* 3a eld., Leipzig 1928, p. 11; unue en *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 4/5 (15/16), p. 2.
2. Samloke, p. 10; unue en *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 4/5 (15/16), p. 2 (tie: „... al konscia klasbatalo").
3. Samloke, p. 10; unue en *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 3 (14), p. 1.
4. La vortoj estas el salutletero de Henri Barbusse al la fondkongreso de SAT en Praha. Plena teksto franclingve en *Le Monde Espérantiste* 14. 1921, n-ro 5 (121), p. 38 (transprenita el *L'Humanité*); Esperante en *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 7/8 (18/19), p. 1. – Jam pli frue Barbusse estis nominta Esperanton „la ABC de l' Internacio": „Al la internaciistoj", *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 2 (13), p. 3. La simpatio de Barbusse por Esperanto iĝis konata precipe per lia antaŭparolo al la lernolibro *Cours rationnel et complet d'Esperanto* (Paris 1921); Esperanta traduko en *Sennacieca Revuo* 3. 1921/22, n-ro 6 (25), mar. 1922, p. 2-3.
5. Pri tio vd. ĉap. 4.3. – Aperigante artikolon de Rosa Luxemburg el *Die russische Revolution* (1918) pri „Imperiismo, naciismo k socialismo" (*Sennacieca Revuo*, n.s. 1. 1933/34, p. 1-3), Lanti asertis plenan akordiĝon inter ŝia malrekomendo de la batalo por naciliberigo kaj lia „sennaciismo". Estas konate, kiom da kontraŭstaro flanke de Lenin spertis Rosa Luxemburg pro sia radikala internaciismo.
6. Kp. E. Adam, „Mortis nobla internaciisto", *Esperantista Laboristo* 1. 1920, n-ro 4 (majo), p. 1-2.

politika, sed „eduka, kleriga, helpa, realiga"; ĝia celo ne estu krei funkciulojn, sed eduki konsciajn revoluciulojn.

Resume, Esperanto servu, laŭ Lanti, nur kiel ilo por antaŭenigi la celojn de la tutmonda laboristaro. Eĉ se la kompreno pri tiuj celoj diverĝas, Esperanto restu la komuna lingvo de revoluciuloj, disponigante sin kiel bazon por la solidarigo de homoj, kiuj ekster la kadro de Esperanta organizaĵo sentas sin ĉefe ligitaj al sia respektiva partio. Tio implicis, ke almenaŭ tendence al Esperanto apartenis pli vasta rolo, ol esti nur ilo en la klasbatalo. Nome, Lanti skribis ankaŭ:

> Pere de nia komuna lingvo devas estiĝi spirita trafluado super ĉiuj ŝtatlimoj. Konstanta interrilatado kreskigos en nia koro supernacian senton. Ĝi estos kvazaŭ kontraŭveneno por la finacieca edukado, kiun la ŝtato trudas al ni. Ĝi estos ia spirita higieno kontraŭ la naciecaj miasmoj, kiujn ni senĉese enspiras meze de la ŝovinisma atmosfero, kreita de la registaroj. Uzante kiel eble plej ofte artefaritan lingvon, ni enkarnigos en ni ecojn taŭgajn por igi nin veraj mondcivitanoj. Ni ne povas tro taksi la gravecon de tiu fakto. Tie kuŝas la esenca revoluciigeco de esperanto. Senĉese interrilatante kun niaj ĉiulandaj Kamaradoj ni povos pro tio prave fieri, ke ni estas la plej konsekvencaj el la t.n. internaciistoj.[1]

Ni vidos poste, ĉu inter la postulo subigi Esperanton al klasbatalo[2] kaj la implicita aserto, ke ĝi per si mem efikas revoluciige, troviĝis kontraŭdiro, kaj, se estis konflikto, ĉu eblis ĝin solvi.

Komence de aŭgusto 1921, kadre de la 13a Universala Kongreso de Esperanto en Praha, okdeko da membroj de „Liberiga Stelo" kunvenis por fondi asocion laŭ la gvidaj ideoj formulitaj de Lanti. Ĝi alprenis la nomon *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT). Kiel honora prezidanto de la fondkongreso funkciis, sen ĉeesti, Henri Barbusse, kies movado „Clarté" – unuiĝo de progresemaj intelektuloj diverslandaj[3] – rilate sian nedogmecan internaciismon iom similis al la organizaĵo de revoluciaj esper-

1. E. Lanti, *For la neŭtralismon!*, p. 18; unue en *Esperantista Laboristo* 2. 1921, n-ro 6 (17), p. 1.
2. Vd. la kvazaŭ programan artikolon de L. Revo (= Lucien Laurat), „Mondlingvo kaj klasbatalo", *Sennacieca Revuo* 3. 1921/22, n-ro 1 (20), p. 1-2.
3. Vd. „Lettre de Henri Barbusse", *Le Travaileur Esperantiste* (2a serio) 1. 1919, n-ro 2 (sept.), p. 1; „Intelektula Internacio", *Esperantista Laboristo* 1. 1920, n-ro 1 (feb.), p. 5. – En la revuo *Clarté* dum 1920 estis diskuto pri projektoj de internacia lingvo: Nicole Racine, „The Clarté movement in France, 1919-21", *Journal of Contemporary History* 2. 1967, n-ro 2, p. 203. Lanti kontribuis artikolon al *Clarté* de 21-2-1920: Pierre Hirsch,

antistoj.[1] Lanti estis zorge planinta la fondon de SAT, celante eviti du rifojn: unue malhelpi, ke la asocio estu influata de la „iluziplena" homaranismo; due, ne allasi, ke ĝin konsistigu nur membroj de unu politika partio. La unua rifo estis facile forigita; rilate la duan, temis pri la danĝero de komunista unuformeco, sed la diskutoj en Praha montris, ke plimulto el la komunistoj akceptis la projekton de superpartia organizaĵo.[2] Unuanime akceptita estis la fondiĝa rezolucio, kies finaj vortoj tekstis: „For la hipokritan neŭtralismon, for la kapitalismon, vivu S.A.T.!"[3] La rompo inter la laborista kaj neŭtrala Esperanto-movado estis nun plenumita fakto.

Kiom serioza SAT prenis sian defion al la „neŭtralismo", montris en 1922 la Dua Kongreso en Frankfurto apud Majno. Per malgranda plimulto la ĉeestantoj decidis pri statuta precizigo, laŭ kiu SAT-ano ne rajtas samtempe membri en „iu burĝa kaj tiel nomata ‚neŭtrala' esperantista organizaĵo". Kiam Romain Rolland, la honora prezidanto de la kongreso, legis pri tiu malpermeso en *L'Humanité*, li tuj akre kritikis ĝin. Konsiderante la decidon sekteca, Rolland riproĉis al la revoluciaj esperantistoj, ke ili „tute ne konscias pri la grandeco de Esperanto ... (kiu) estas, per si mem, revolucio multe pli efika ol ĉiuj t.n. revoluciaj kongresoj: ĉar ĝi kreas ... pensmanieron internacian, ‚sennacieca tutmonda'".[4] Fakte, ne eblis konservi la radikalan postulon; jam en 1924 la severa artikolo 2 de la statuto estis mildigita.[5] Tamen,

---

Leteroj de Eugène Adam aŭ Lanti al Edmond Privat, La Chaux-de-Fonds 1973, p. 10; vd. ankaŭ la leteron de H. Hodler al Lanti, de 21-10-1919, en *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 65.

1. Pro konflikto inter idealistaj maldekstruloj kaj decidaj partianoj de Komintern la movado „Clarté" tamen jam fine de 1921 perdis sian originan karakteron de sendependa intelektula internacio.
2. „La 1-a Internacia Kongreso de la Revolucia Esperantistaro" (protokolo), *Sennacieca Revuo* 3. 1921/22, n-ro 1 (20), p. 2.
3. Samloke, p. 4.
4. Letero de Romain Rolland al E. Lanty, de 9-9-1922, trad. en *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 1, p. 15. – Por la respondo de Lanti vd. „Publika letero al Romain Rolland" „*Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 2, p. 13-14 (represita en *Vortoj de kamarado E. Lanti*, Leipzig 1931, p. 52-56).
5. Vd. la diskuton pri la artikolo 2 en *Kongresa dokumentaro. IVa Kongreso, Bruxelles, 14. ĝis 18. aŭgusto 1924*, Leipig 1924, p. 17-21. – La nova formulo estis: „... povas esti membro de SAT *nur* persono, kiu aprobas ĝian Statuton kaj sin deklaras preta tutplene servi la interesojn de la Asocio."

ĉu kun aŭ sen statuta gvidlinio, en la unuaj jaroj de la vivo de SAT estis fortiritaj el la neŭtrala movado multaj kapablaj esperantistoj. Ankaŭ poste daŭris evoluo, ke homoj maldekstremaj preferis membriĝi en SAT anstataŭ en aliaj, neŭtralaj Esperanto-asocioj. La natura sekvo estis ne nur laŭnombra malfortiĝo, sed ankaŭ plia ideologia malriĉiĝo en la neŭtrala movado. Nome, ĝiaj gvidantoj iom post iom ŝajnis perfekte kongrui kun la klišaj imagoj dekomence flegataj en SAT: komercistoj, generaloj, pastroj kaj reakciaj profesoroj, agantaj kun amaso da etburĝaj esperantistoj. Kaj la membroj de SAT siavice fieris pri sia aparteco, koketante per la samsoneco de SAT-ano kaj satano.

La nombro de membroj rapide kreskis: de 1 064 en 1922 al 2 960 en 1926, 5 216 en 1927 kaj 6 500 en 1929. La oficiala organo de SAT estis unue, ekde oktobro 1921, *Sennacieca Revuo*, la antaŭa *Esperantista Laboristo*. Post tri jaroj la ĉefa periodaĵo iĝis la nove fondita *Sennaciulo*, kiu ĝis la fino de 1931 aperis ĉiusemajne[1]; sub la redakto de juna germana komunisto, Norbert Barthelmess, ĝi iĝis iom post iom unu el la plej gravaj gazetoj en Esperanto. Dekomence estis la intenco fari el *Sennaciulo* spegulon de la reala vivo de laboristoj en la tuta mondo. Ĉar ĝiaj kolumnoj efektive estis grandparte plenigitaj per priskriboj de la ĉiutaga vivo senditaj de la legantoj mem[2] kaj ĉar, precipe en la 20aj jaroj, ĉiujare 100-200 artikoloj estis tradukitaj en naciajn lingvojn, la rektaj, ofte tute senafektaj raportoj en *Sennaciulo* pri la vivkondiĉoj en diversaj landoj atingis legantaron, kiu vaste superis la rondon de laboristaj esperantistoj.

4.1.3. *Pluralismo kaj unueca fronto*

Por la tutmonda laborista movado ĝenerale esencan rolon ludis la rilatoj kun Soveta Ruslando – la unua ŝtato, kie, laŭ ĝia propra pretendo, la proletaro transprenis la potencon. Same, ankaŭ SAT ekde sia fondiĝo konsciis la apartajn ligojn, kiujn ĝi

1. Ekde januaro 1932 *Sennaciulo* aperis dusemajne, ekde februaro 1933 monate. *Sennacieca Revuo* pluaperis kiel monata revuo pri literaturo kaj scienco (de oktobro 1928 ĝis februaro 1933 sub la nomo *La Nova Epoko*).
2. Vd. precipe la serion „Tago el mia vivo", en kiu diverslandaj SAT-membroj rakontis pri siaj personaj vivkondiĉoj. Ĝin iniciatis la anglo Howard Stay: *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 125/126 (19 feb. 1927), p. 5-6.

neeviteble havis kun tiu lando, kie preskaŭ samtempe estis starigita Sovetlanda Esperantista Unuiĝo. Problemoj de tiu interrilato ne estis dekomence evidentaj: Ekster Soveta Ruslando, ankaŭ la nekomunistaj SAT-anoj ĝenerale sentis simpation al la ŝtato de Leńin, kio faciligis la kunlaboron de diversaj socialismaj skoloj en la sino de SAT kiel partipolitike sendependa organizaĵo. Krome, efikis unuecige la komuna deziro varbi por Esperanto inter laboristoj en la tuta mondo. Malmultaj kredeble demandis sin jam tiutempe: Kiel longe daŭros la konkordo? Kiun influon havos la evoluo en Soveta Ruslando je la sinteno de ekstersovetaj kamaradoj? Kaj ĉu la soveta flanko pretos toleri la supertendencan karakteron de SAT?

Unue urĝis pli proksime interkonatiĝi post la unuaj postrevoluciaj jaroj, dum kiuj tiom da kontraŭdiraj informoj pri la soveta Esperanto-movado estis penetrintaj eksterlanden. Por Lanti la okazo prezentiĝis en aŭgusto 1922, kiam li vojaĝis al Moskvo por la jam menciita esploro ĉe Komintern pri ĝia sinteno al Esperanto. Dum sia vizito li renkontis ankaŭ Drezen; sian postan ĉefan antagoniston li trovis homo ame dediĉita al la lingvo. La sondado pri kunlaboro inter SAT kaj SEU restis provizore senrezulta: Drezen riproĉis, ke SAT ne estas pure komunista, kaj rifuzis kunlaboron kun anarkiistoj kaj socialdemokratoj, dum Lanti en sia raporto pri la konversacio rebate atentigis je la fakto, ke Drezen estas prezidanto de unuiĝo, „en kiu estas ne nur anarkistoj sed burĝoj el plej certa speco".[1]

Eĉ pli draste sin esprimis kontraŭ Drezen kaj la „burĝeca kaj burokrata fizionomio"[2] de SEU la rusoj Grigorij Demidjuk kaj Nikolaj Nekrasov, kiuj vigle korespondis kun Lanti post ties restado en Moskvo. Ili estis fondintaj en junio 1922 internacian literatur-socian revuon, *La Nova Epoko*, kiu komprenis sin tribuno de „ĉiuj ribelaj fortoj, plensukaj, freŝaj, aktivaj, prematajj kaj persekutataj de la malnova sociordo".[3] Al la redaktoroj aparte-

1. E.L. „Tri semajnojn en Rusio", *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 3 (33), p. 6. – La vojaĝraporto de Lanti estas reeldonita en: *El verkoj de E. Lanti*. 2, Laroque Timbaut 1982, p. 1-65.
2. Letero de Demidjuk al Lanti, de 12-1-1923.
3. „La Nova Epoko", *La Nova Epoko* 1922, kol. 2. – Pri vizito de Lanti en la redaktejo: E.L., „Tri semajnojn en Rusio", *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 3 (33), p. 5.

E. Lanti (1879-1947), la fondinto de Sennacieca Asocio Tutmonda.

Redakcianoj de la moskva literatura gazeto *La nova epoko*. De maldekstre: Demidjuk, Nekrasov, Futerfas, Poljakov.

Soveta Unio eldonis la unuajn poŝtmarkojn kun Esperanta teksto.

nis la anarkiisto Natan Futerfas, kiu en la antaŭa jaro estis forlasinta la kongreson en Petrogrado proteste kontraŭ la centralizemo de Drezen.[1] Ankaŭ inter la kunlaborantoj de la revuo estis anarkiistoj, ekzemple Sergej Hajdovskij kaj Johanson Zil'berfarb. Ili ĉiuj samopiniis pri tio, ke SEU ne rajtas reprezenti la sovetan movadon, ĉar en ĝi regas neŭtralismo-oportunismo.

En aŭgusto 1922 Futerfas en recenzo pri verko de Drezen kritikis la – laŭ li – vanan klopodon pravigi artefaritan lingvon el la vidpunkto de historia materiismo.[2] Drezen postulis, ke *La Nova Epoko* aperigu refutan leteron de li. Kiam la redakcio rifuzis, li sin turnis al la literatura ĉefadministrejo, kio kaŭzis provizoran interrompon de la aperado de la revuo.[3] La konflikto proksimiĝis al batalo por potenco.[4] Dum Drezen ne kaŝis sian celon silentigi la oponantojn, la Moskva Klubo Esperantista, kiu en oktobro eksiĝis el SEU, postulis, ke la Centra Komitato de SEU forlasu „ĝis nun praktikitajn neŭtralismajn principojn" kaj eksigu el siaj vicoj „ĉiujn neŭtrale-burĝajn elementojn".[5] Samtempe la respondeculoj de *La Nova Epoko* rezistis la proponon de Drezen, ke SAT aliĝu al Komintern.[6] Ili defendis la pluralismon de SAT kaj, implicite, postulis, ke tiu principo regu ankaŭ interne de SEU.

Sed frue montriĝis, ke la pozicio de Drezen estis pli forta, ĉar la Popolkomisarejo pri Internaj Aferoj rifuzis la registriĝon de Esperantaj organizaĵoj agantaj ekster la kadro de SEU. Drezen

1. È. Drezen, „V bor'be za SÈSR (En batalo por SEU), *Meĵdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 107. – Ankaŭ Nekrasov kredeble simpatiis kun anarkiismo; Demidjuk (kiel la aliaj) ne estis membro de la Komunista Partio.
2. *La Nova Epoko* 1922, kol. 70-71 (recenzo pri broŝuro de Drezen, *Problema meĵdunarodnogo jazyka. Opyt materialističeskogo obosnovanija voprosa*, Moskva 1922).
3. Letero de „la Novepokuloj" al Lanti, de 2-10-1922; letero de Futerfas al Lanti de okt. 1922; letero de Demidjuk al Lanti, de 12-1-1923. – La fakto, ke Drezen plendis ĉe la cenzuro, instigis Nekrasov verki satiran baladon, „La kanto pri sorĉpova kremlulo"; presita en *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 29. Vd. ankaŭ Nekrasov, „Malfermita letero al legantaro de ‚Sennaciulo'", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 44.
4. Pri tiu konflikto pli detale vd. mian artikolon „Drezen, Lanti kaj La Nova Epoko. La proksimiĝo de la sovetia Esperanto-movado al SAT", *Sennacieca Revuo*, n-ro 115, 1987, p. 35-52.
5. Deklaro de la komitato de Moskva Klubo Esperantista, de 26-10-1922.
6. G. Demidjuk, „Kial?...", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 45.

sukcesis persvadi kelkajn eksiĝintojn eniri la Centran Komitaton.[1] Ĉar ankaŭ Demidjuk kaj Nekrasov montris kompromisemon, pli kaj pli izoliĝis „maldekstraj radikaluloj" kiel Futerfas. Siaflanke, Drezen, kiu el sia laborĉambro en Kremlo povis deproksime palpi la politikajn fluojn, rekonsideris sian skeptikan pozicion al SAT. En novembro 1922, tuj post la venko de la faŝistoj en Italio, la Kvara Kongreso de Komintern solene proklamis la gvidlinion, ke la komunistoj klopodu krei unuecan fronton de la laborista klaso, kunlaborante, se necese, eĉ kun socialdemokrataj organizaĵoj.[2] Tiu rekomendo ne malfermis larĝe la pordon al kunlaboro inter komunistoj kaj socialdemokratoj, sed ja servis kiel legitimigo de provoj atingi tian kunlaboron, precipe kiam ili promesis esti avantaĝaj por Komintern.

SEU en la sekvantaj monatoj interne diskutis kiel akordigi sin al la gvidlinioj de Komintern. En principa deklaro, difinanta la pozicion de SEU, la Centra Komitato en marto 1923 ne lasis dubon pri sia takso de SAT – ĝia idealismo, „politika malprecizeco" kaj „politike-ideologia neŭtralismo" – sed decidis tamen alvoki la komunistajn esperantistojn de ĉiuj landoj subteni SAT tiel longe, „ĝis estos kreita pli taŭga por la komunistoj organizformo de internacia agado, samtempe senmask[ig]ante idealismajn falsideojn de SAT k trudante al ĝi pli da vera praktikeco, pli da komunista influo".[3] Sekve, ekvalidis la linio, laŭ kiu SEU subtenu SAT, eĉ se ne tre entuziasme.[4]

Malgraŭ la – tiutempe ne publike konata – intenco iom post iom alkonformigi SAT al ideologie pli akceptebla asocio, SEU

1. Leteroj de Demidjuk al Lanti, de 12-1-1923 kaj 5-6-1923.
2. Lige kun la Nova Ekonomia Politiko, kiu almenaŭ por la pli proksima tempo subigis la batalon por monda revolucio, jam la Tria Kongreso de Komintern en 1921 transprenis la pledon de Lenin por kreo de „laboristaj registaroj" en la industriigitaj landoj. En decembro 1921 la Plenumkomitato de Komintern publikigis siajn tezojn pri unueca fronto, kiujn poste konfirmis la Kvara Kongreso.
3. Centra Komitato de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo, *Nia pozicio. (Deklaracia letero al ĉiuj revoluciaj esperantistaj organizaĵoj)*, Moskvo, marto 1923 (kvar presitaj folioj); kp. *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 79.
4. En 1932, post la skismo, la CK de SEU deklaris, ke ĝia dokumento „Nia pozicio" de 1923, difinanta la rilatojn al SAT, „en historia aspekto plene praviĝis kaj estis ĝusta": *Bulteno de Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio* 11. 1932, p. 14.

alekstere prezentis sin kunlaborema partoprenanto en la internacia laborista Esperanto-movado. Signalo de tio estis ankaŭ, ke en majo 1923 ĝi likvidis la reprezentiĝon de UEA en la soveta teritorio per delegitoj aŭ membroj[1], kaj tri monatojn poste la unuan fojon soveta delegacio aperis en kongreso de SAT: Drezen kaj kvin aliaj delegitoj de SEU ĉeestis la Trian Kongreson en Kassel. Elektita unu el la kunsid-prezidantoj, Drezen montris sin en siaj fermaj vortoj lojala kunmarŝanto:

> Tie-ĉi ni trovis tiun mezan vojon, kiun ni, revolucianoj, uzantaj por la profito de la proletaro la internacian lingvon, povas kune iri egale, ĉu anarkistoj, ĉu komunistoj, ĉu anoj de aliaj partioj revoluciaj. Ni kredas, ke ni trovis ĝustan kaj veran vojon.[2]

Ankoraŭ en la sama jaro, en kiu Drezen deklaris sian ligitecon al SAT, aperis libreto kiel eldonaĵo de SAT, por kiu Miĥail Kalinin, la prezidanto de la Centra Ekzekutiva Komitato de Sovetoj, speciale verkis antaŭparolon.[3] SEU mem eldonis komence de 1923 ilustritan libron pri la kvina datreveno de la Oktobra Revolucio, kies profito estis transdonota al la Centra Komisiono por likvido de la malsato-sekvoj[4], provizita per tutpaĝaj portretoj de Lenin, Kalinin, Trockij, Zinov'ev, Lunaĉarskij, Kamenev, Rykov kaj aliaj partiaj gvidantoj, sed ne de Stalin, la libro neatendite baldaŭ iĝis historia raraĵo. Kaj en 1924 SEU publikigis skizon pri la komunista movado, kies traduko estis permesita de la Centra Komitato de la Komunista Partio.[5]

Tiuj ĉi eldonaĵoj jam atestis pri la strebo de la nova soveta Esperanto-movado al seriozeco. Sin distancigante de la antaŭa „troa flamiĝemo", SEU en la menciita jubilea libro fidoplene rigardis al ne fora estonteco, kiam – post la interna milito kaj la plago de malsato – la juna Sovetlando povos pli multe atenti la

1. La koncernaj leteroj de SEU al UEA estas presitaj en *Esperanto* 19. 1923, p. 141-142. – Komentante la decidon, UEA protestis, tute neneŭtrale, kontraŭ la „bolŝevika perfortigo", transdonante „la esprimon de sia varma simpatio al la subpremitaj rusaj Samideanoj".
2. „IIIa Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, Cassel, 11a-15a aŭgusto 1923" (protokolo), *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-ro 1 (43), p. 11.
3. *Dokumentoj de komunismo*, Düsseldorf 1923.
4. L. Sosnovski, *Jarkvino de la Oktobra Revolucio*. Trad. V. Polakov. Antaŭparolo de E. Drezen, Moskvo 1923. (La kovrila titolo estas *La Kvinjaro de Sovetlandoj*.)
5. *Komunista movado. Historia skizo. El Kalendaro de la Komunisto por 1923 jaro*. Trad. G. Demidjuk, Moskvo 1924.

grandan valoron de Esperanto „kaj finfine kronos la unuigon de la tutmonda popolaro en unu socion per komuna ligilo, per komuna interkomprenilo".[1]

Ĉar tiu ĉi monda perspektivo en la agado de SEU necesigis ligon al la internacia laborista Esperanto-movado, la kunlaboro kun SAT en la sekvaj jaroj ĉiam pli intensiĝis. Samtempe la makulo de SAT, ĝia rezisto kontraŭ komunisma partieciĝo, iĝis des pli facile tolerebla, ju pli efike la gvidantoj de SEU sukcesis malebligi al siaj membroj imiti la supertendencan pretendon interne de sia soveta organizaĵo. En la dua duono de 1923 Drezen forte sentigis sian deziron, ke regu disciplino en la soveta Esperanto-movado. *La Nova Epoko* ĉesis aperi, per kio la revoluciaj esperantistoj starantaj ekster SEU seniĝis de sia parolejo. Daŭris la periodo de konfuzo kaj necerteco. Komence de 1924 Demidjuk troviĝis en malliberejo dum tri semajnoj.[2] Kaj eĉ Drezen spertis malagrablaĵojn; samjare li estis, en la kadro de partia „purigo", por nelonga tempo eksigita el la Partio.[3] Sed triumfon li havis, gajnante la kunlaboron de Demidjuk kaj Nekrasov, kiuj, laŭ la konsilo de Lanti mem[4], ĉesigis sian sensancan opozicion kontraŭ Drezen.

Futerfas kaj Zil'berfarb ne sekvis la ekzemplon de Demidjuk kaj Nekrasov. La agado de la anarkiistoj restis por Drezen ĝena – des pli, ĉar ĝi rekte tuŝis la tiklan punkton de la pluralismo oficiale postulata de SAT. Meze de 1924 *Sennacieca Revuo* aperigis

1. Sosnovski, *Jarkvino*, p. 52.
2. Letero de Demidjuk al Lanti, de 25-4-1924; E.L., „Kial Demidjuk reviziis?", *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 102. – Demidjuk estis suspektita pri ligoj kun anarkiismo. En la klopodoj lin liberigi ankaŭ helpis Drezen.
3. Letero de Demidjuk al Lanti, de 25-4-1924; „2-a Kongreso de Sovetlanda Esperantista Unio", *Sovetskij esperantist* 1925, p. 138. – Laŭ Demidjuk, tio ĉi havis rilaton kun la antaŭa membreco de Drezen en la Partio de Socirevoluciuloj, sed citas kiel opinion de Drezen mem, ke temas pri intrigo de komunistaj idistoj kontraŭ lia aktivado por Esperanto. Post sia rehonorigo Drezen reprenis la gvidan funkcion en SEU kun la titolo „ĝenerala sekretario".
4. E.L., „Kial Demidjuk", p. 102; Drezen, „V bor'be", p. 108; letero de Nekrasov al Lanti, de 9-5-1925; letero de Lanti al Demidjuk, de 27-8-1930. – La franco Robert Guihéneuf jam antaŭ la kongreso en Kassel komunikis al Lanti el Moskvo, ke la pozicio de Drezen estas neskuebla kaj ke la – tre simpatiaj – homoj de *La Nova Epoko* estas „absolute nekapablaj" detronigi lin (letero de 21-7-1923).

ampleksan artikolon de ukraina anarkiist-esperantisto, A. Levandovskij, pri la sorto de la anarkiista movado sub la soveta reĝimo.[1] La artikolo estis atentinda, ĉar ĝi senkaŝe raportis la kunpuŝiĝojn kun la bolŝevikoj kaj la persekutadon, kaj la intereso pri ĝi kreskis ankoraŭ, post kiam Lanti, kiel redaktoro, sekve de protesto de Levandovskij vidis sin devigita aperigi ankaŭ tiujn partojn de la originala manuskripto, kiujn li pro zorgemo pri reago de SEU estis forstrekinta.[2] Ĉi-okaze, Lanti esprimis bedaŭron, ke SAT-anoj „volas altrudi artikolojn, kiuj riskas danĝerigi la unuecfrontan agadon de nia organizaĵo", kaj kiam kiel atendeble venis akra respondo el Moskvo, en kiu Levandovskij estis kulpigita, ke li objektive faras „kontraŭ-revolucian laboron", Lanti aldone anoncis, ke estonte li rifuzos aperigi artikolojn, kiuj entenas atakojn aŭ ofendojn kontraŭ tendencoj laŭstatute reprezentitaj en SAT.[3]

Levandovskij estis arestita komence de 1925[4], kelkajn monatojn poste ankaŭ la kunlaborinto de *La Nova Epoko*, Hajdovskij, kaj lia edzino, kiuj dividis sian sorton kun ĉirkaŭ 80 anarkiistoj en Moskvo kaj Leningrado.[5] La malliberigoj trovis ĉe Lanti nur mildan, ne publike eldiritan kritikon[6], kaj propono al la Kvina Kongreso de SAT en Vieno (aŭgusto 1925) postuli de la soveta registaro la liberigon de la SAT-ano Hajdovskij[7] estis malakceptita de la komisiono pri proponoj, „ĉar ni ne konas la aferon Hajdovski, do ne povas enmiksiĝi".[8]

1. A. Levandovskij, „Skizo pri la anarkista movado en Rusio dum la Revolucio (1917-1923)", *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-ro 9 (50), p. 9-10; n-ro 10 (51), p. 7-8.
2. *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 10, p. 4-5.
3. E. Drezen, Lucien Revo, „Pri iu ‚kompletigo'", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 18, p. 4.
4. Borsboom, *Vivo de Lanti*, p. 53. – Levandovskij estis ekzilita al Siberio. En 1931, la germandevena SAT-ano Theodor Weder, Novjorko, parolis pri ligo inter denunco de Drezen kaj la enkarcerigo de Levandovskij: *Protokolaro pri la XIa Kongreso en Amsterdamo, 2-7 aŭgusto 1931*, Paris 1931, p. 49-50.
5. *Libera Laboristo* 1. 1925, n-ro 1 (aŭg.), p. 14; kp. Borsboom, p. 53. – Hajdovskij kaj lia edzino estis kondamnitaj al trijara ekzilo.
6. Letero al Demidjuk kaj Nekrasov, de 23-6-1925, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 82.
7. *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 45/46, p. 10. – La proponon faris Ch. F. Hochhäuser.
8. „Protokolo de la Va SAT-Kongreso en Wien", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 51, p. 3; kp. Borsboom, p. 65-66. – Ankoraŭ en 1928, la saman sorton

Tiu ĉi rifuzo estis la provizora kulmino de procezo en SAT, kiu pasis kvazaŭ sub la devizo „unueco super ĉio". La unuaj viktimoj estis la anarkiistoj, kiuj jam en 1924 perdis sian fidon al SAT kaj fondis propran organizaĵon, sub la nomo Tutmonda Ligo de Esperantistaj Senŝtatanoj (TLES). Post la sperto pri la artikolo de Levandovskij la periodaĵoj de SAT alprenis pli unuforman karakteron: Anstataŭ la anoncita libera konkurado de diversaj tendencoj ilin karakterizis artikoloj, kies enhavo plejparte ne riskis ofendi iun. Kontribuaĵojn kun kontraŭsoveta tendenco la redakcio asertis entute ne esti ricevinta, kaj responde al kritiko kontraŭ superpezo de komunisma tendenco Lanti simple deklaris, ke tio devenas de tio, ke „la komunistaj k-doj estis pli agemaj".[1]

La jaro 1925 do markas cezuron kaj por SAT kaj por SEU: La unua spertis, ke organizaĵo, kiu deziris servi al la proletaro trans ĉiujn partiajn diferencojn, ne povis eskapi de la antagonismoj regantaj en la laborista movado. La dilemon konkrete evidentigis la anarkiistoj, kaj SAT provizore solvis ĝin favore al la penso pri unueca fronto, kio signifis komunistan superregon almenaŭ en la periodaĵoj. SAT oferis al la unuec-strebo sian deklaritan toleremon pri malsamaj opinioj. SEU, aliflanke, venkis la krizojn de 1923/24 kiel organizaĵo, kiu estis interne firmigita, obeis al la sovetaj gvidprincipoj kaj havis gvidanton ne plu kontestatan. En julio 1925, dum la Dua Kongreso de SEU, Drezen konsideris sian pozicion jam tiel forta, ke li invitis ankaŭ la anarkiistojn Futerfas kaj Zil'berfarb aliĝi al la vicoj de SEU.[2] La vojo nun estis libera ankaŭ por plivastigo de la kunlaboro kun SAT: La Centra Komitato oficiale alvokis ĉiujn aktivajn membrojn de SEU aliĝi al SAT, kaj por montri al la tutmonda organizaĵo sian

---

havis propono pri solidarec-esprimo favore al Levandovskij; ĝi estis per plimulto malakceptita: *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 349; *Protokolaro de la VIII-a Kongreso en Göteborg...*, Leipzig 1928, p. 40.

1. „Protokolo de la Va SAT-Kongreso en Wien", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 49, p. 4-5; kp. la leteron de Lanti al Martin Muribo, de 27-1-1925, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 61. – Ankaŭ la socialdemokrato Franz Jonas rimarkis, ke la rusaj SAT-anoj „estas pli agemaj ol ni": „Protokolo...", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 51, p. 3.
2. *Sovetskij esperantist* 1925, p. 157. – Futerfas pereis en la 30aj jaroj en Siberio (Borsboom, *Vivo de Lanti*, p. 52), Zil'berfarb post la milito publikigis i.a. ruslingvan verkon pri la franca utopia socialisto Charles Fourier kaj mortis en 1970 (*Sennaciulo* 41. 1970, p. 48).

„revolucian simpation" SEU decidis aĉeti akciojn ĉe la Eldona Kooperativo de SAT.[1]

La atingita organiza stabiliĝo estis samtempe la antaŭkondiĉo por plenumo de la agadplano. La celo de SEU estis varbi en la soveta publiko por la utilo de Esperanto. La obstakloj, kun kiuj tiurilate necesis kalkuli, estis konsiderindaj. Antaŭ kaj tuj post la revolucio pledantoj por Esperanto inter la bolŝevikoj ne estis multnombraj, kaj tiuj ofte devis aŭskulti de sampartianoj riproĉojn, el kiuj tiu, ke ili malŝparas siajn energiojn por negravaĵo, estis ankoraŭ la plej milda. Rákosi, la funkciulo de Komintern, avertis sian vizitanton Lanti, ke li ne fidu al la rusaj esperantistoj: „Multaj estas kontraŭrevoluciuloj."[2] Lanti mem observis, ke la komunistaj esperantistoj „hontas pri sia esperantisteco", „timas sin kompromiti farante propagandon en komunistaj rondoj" kaj ke la „severa disciplino komunista sufokis ĉe multaj la entuziasmon kaj la fervoron" por Esperanto.[3] La plej fortajn suspektojn kontraŭ la nefidindaj esperantistoj Drezen kredeble ja sukcesis elimini per la celkonscia „sovetigo" de SEU. Eblis ekde 1925 pli ofte registri simpatideklarojn de komunistaj eminentuloj, ekzemple de la antaŭa Popola Komisaro pri Ekstera Komerco, Leonid Krasin[4], de la prezidanto de la Malgranda Konsilantaro de Popolkomisaroj, Miĥail Boguslavskij[5], de la japana membro de la Plenumkomitato de Komintern, Katayama Sen[6], kaj ankaŭ

1. „Raporto pri agado de CK SEU dum 1923-1925 jj.", *Sovetskij esperantist* 1925, p. 98. – Ĉar kompromisemon en la rilatoj kun SAT Drezen povis permesi al si nur sur la bazo de plena homogeneco de SEU, li plue atakis la anarkiistajn esperantistojn en Soveta Unio, nomante ilin „multe pli malagrablaj kaj eĉ danĝeraj por nia movado", ol la restintaj reprezentantoj de „neŭtrala esperantismo": E. Drezen, „La vojoj de la movado mondlingva en Sovetlando", *Mejdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 15 (41), p. 3-4.
2. E. Lanti, „Tri semajnojn en Ruslando", *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 3 (33), p. 5.
3. Samloke, p. 7.
4. Deklaro de 27-2-1925: *Sovetskij esperantist* 1925, p. 55; trad. en *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 26, p. 7.
5. Deklaro de 28-7-1925: *Mejdunarodnyj jazyk* 1925, n-ro 1 (27), p. 2; trad. en *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 1 (53), p. 8. – La deklaro aparte favore taksis la utilon de Esperanto por la proletaro. Boguslavskij estis eksigita el la Partio en 1927 kaj mortis en malliberejo en 1937.
6. Saluto al la sovetaj esperantistoj, de 12-5-1925, kaj letero al la Esperantogrupo en Dolinskaja: *Sovetskij esperantist* 1925, p. 87-89; trad. en *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 38, p. 6.

de la verkisto Il'ja Ėrenburg.[1] Sed dum la Dua Kongreso de SEU pluraj delegitoj plendis, ke la partiaj, sindikataj, junkomunistaj kaj aliaj organizaĵoj rilatas al Esperanto indiferente kaj ke tio restas la ĉefa baro por sukcesa surloka agado.[2]

4.1.4. *Internaci-eduka laboro per Esperanto*

Drezen kompreneble bone konsciis la situacion, pri kiu plendis la lokaj delegitoj. La recepto, kiun li ofertis por ŝanĝi ĝin – por forigi la ignoran traktadon aŭ eĉ mokon, kiun renkontis la esperantistoj inter „rondoj aŭtoritataj revoluciaj", estis tre simpla: Necesas uzi la lingvon kaj tiel pruvi al la dubantoj, ke ĝi havas praktikan utilon. Kaj Drezen ne preterlasis nomi ankaŭ la kampon, sur kiu Esperanto demonstru tiun utilon: Per sia rekomendo „Apliku Esperanton!" li celis precipe la elprovadon de Esperanto kiel facila rimedo por la interrilatado de sovetaj kaj alilandaj laboristoj.

Klarigante tion, Drezen menciis, ke lastatempe oni donas multe da atento al la „senpera interrilatigo" de diverslandaj laboristaj gazet-korespondantoj.[3] Efektive, en julio 1924, dum la Kvina Kongreso de Komintern en Moskvo, la demando estis pridiskutata kiel pliintensigi la informadon al eksterlandaj laboristoj pri la luktoj kaj ĉiutaga vivo de iliaj sovetaj klasfratoj kaj, inverse, la informadon al la laboristoj en Soveta Unio pri iliaj kamaradoj en okcidenta Eŭropo, ankoraŭ suferantaj sub la jugo de kapitalismo. Kiel konkretan paŝon la Plenumkomitato de Komintern rekomendis, ke la t.n. laboristaj korespondantoj vastigu sian agadsferon al eksterlando.[4] Tiutempe en Soveta Unio jam ekzistis granda reto de laboristaj korespondantoj, komprenataj kiel novtipaj, volontulaj ĵurnalistoj: homoj, kiuj, agante

1. En la eseo *A vsë-taki ona vertitsja* (Kaj tamen ĝi moviĝas), 192; citaĵo en *Sovetskij esperantist* 1925, p. 55, trad. en *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 26, p. 7.
2. *Sovetskij esperantist* 1925, p. 136, 137, 139. – Pri *Izvestija* estis dirite, ke ĝi lastatempe publikigas notojn pri Esperanto; pri *Pravda* – ke ĝi „ankoraŭ ĝis nun rilatas al Esperanto ne sufiĉe favore" (p. 139).
3. E. Drezen, „Apliku Esperanton!", *Senaciulo* 1. 1924/25, n-ro 17, p. 6.
4. J.A. Lwunin (Ju.A. L'vunin), „Zum Briefwechsel zwischen sowjetischen und deutschen Arbeitern und Arbeiterkorrespondenten 1924-1929", *Beiträge zur Geschichte der Arbeiterbewegung* 19. 1977, p. 1013.

meze inter la laboristaj amasoj, per siaj diversmaniere disvastigataj korespondaĵoj klopodis reflekti la dezirojn de la lokaj laboristoj, transdoni ties plendojn kaj proponojn al superaj instancoj kaj tiel funkcii kiel interproksimigantoj de partio kaj laboristoj. La ĉefaj tribunoj de la laboristaj (kaj kamparanaj) korespondantoj estis regionaj kaj lokaj gazetoj, uzinaj bultenoj kaj murgazetoj. En tiuj, ili „senkompate elportas por juĝo de socio ĉiujn ulcerojn de ĉiutaga vivo kaj laboro"[1] de la sovetaj laboristoj kaj kamparanoj.

La movado de laboristaj korespondantoj estis jam firma institucio en Soveta Unio kaj trovis imiton ankaŭ fare de la komunistaj partioj en aliaj landoj, kiam en julio 1924 aldone estis publikigita la alvoko organizi internacian laboristan korespondadon. Drezen, ĝuste komprenante, kiom baros amasan korespondadon inter sovetaj kaj alilandaj laboristoj la lingvaj malfacilaĵoj, vidis en la nova iniciato de Komintern unikan ŝancon por demonstri la utilon de Esperanto kaj fortigi la ekzistorajton de SEU. Ekde la komenco de 1925 li apelaciadis al la membroj ne nur propagandi Esperanton, sed jam tuj praktike apliki ĝin, kaj ne nur private korespondi, sed proponi siajn peresperantajn servojn al ĉiuj sovetaj organizaĵoj, kiuj deziras kontakti kun eksterlando.[2] Kiel la ĉefa tasko de SEU estis difinita: „direkti aplikadon de Esperanto por la celoj de Sovetismo, proksimiĝi al alilandaj laboristoj kaj, rakontante al ili la veron pri Sovetlandoj, varbi inter ili amikojn de sovetia laborularo kaj de sovetia sistemo".[3]

La alvoko de Drezen servis al multaj membroj kiel konfirmo, ke ili jam agas en la ĝusta direkto, ĉar fakte tuj post la disrompo de la internacia izoliĝo de la soveta ŝtato la esperantistoj vaste ekkorespondis kun eksterlando. La kvanto de tiu Esperanta korespondado estis impona: En 1925/26, nur el la urboj Minsk

1. A. Tomo (= E.F. Spiridoviĉ), „‚Labkoroj' en Sovet-Unio", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 24, p. 4. – Por ĝenerala superrigardo vd. Andreas Guski, „Zur Entwicklung der sowjetischen Arbeiter- und Bauernkorrespondentenbewegung 1917-1932", en: Eberhard Knödler-Bunte, Gernot Erler (red.), *Kultur und Kulturrevolution in der Sowjetunion*, Berlin, Kronberg/Ts. 1978, p. 94-104.
2. E. Drezen, „Apliku Esperanton!", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 17, p. 6.
3. „Raporto pri agado de ĈK SEU dum 1923-1925 jj.", *Sovetskij esperantist* 1925, p. 98.

kaj Smolensk dum ok monatoj estis senditaj eksterlanden po ĉ. dumil leteroj en Esperanto. Post kiam estis proklamita la konscia disvolvo de internacia laborista korespondado, multaj el la leteroj ricevitaj el eksterlando estis tradukitaj kaj publikigitaj en ĵurnaloj kaj murgazetoj. Dum unu jaro pli ol 360 Esperantaj leteroj estis presitaj en gazetoj de Belorusio, kaj jam meze de 1924 en la urbo Tver' (nun Kalinin) la loka ĵurnalo aperigis pli ol 100 Esperanto-korespondaĵojn el eksterlando. Kiam en majo 1926 tutsoveta konferenco de laboristaj kaj kamparanaj korespondantoj en Moskvo revuis la ĝisnunajn atingojn de la apenaŭ dujara kampanjo por internacia korespondado, kun laŭdo estis menciita la agado en Krimeo, Smolensk kaj Tver' – ĉiuj estis organizaĵoj de laboristaj korespondantoj, kiuj faris sian internacian laboron preskaŭ nur per Esperanto.[1]

La interesiĝo pri Esperanto evidente kreskis konsiderinde en ligo kun la celkonscia utiligo de leteroj el eksterlando, tiel ke komence de marto 1926 la Centra Komitato de Komsomolo dissendis al siaj guberniaj komitatoj instrukcion kiel organizi Esperanto-rondetojn en junularaj kluboj; la cirkulero kuraĝigis al fondo de rondetoj tiam, kiam estas interesiĝo pri Esperanto, postulante ke la membroj „devas kunligi sian lernadon de la lingvo kun praktika laboro en la formo de korespondado kun alilandaj laboristoj".[2] Kaj tri monatojn poste la sovetaj esperantistoj ricevis aŭtoritatan laŭdon, kiun ili registris kun aparta fiero: La moskva *Izvestija* en granda artikolo nomis la internacian laboristan korespondadon, faratan de kamaradoj en Smolensk per Esperanto, modelo por la tuta Soveta Unio.[3]

1. „Internacia laborista korespondado" (raporto de Vladimir Varankin), *Protokolo de la VI-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, Leningrado, 6-10 aŭgusto 1926*. Ekstra numero de *Sennaciulo*, novembro 1926, p. 17-18. – Laŭ tiu raporto, la laboro en Smolensk estis farata de 18 rondetoj de laboristaj korespondantoj, el kiuj 95% skribis rekte en Esperanto.
2. Cit. *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 30 (82), p. 5 (ruslingva originalo en *Meĵdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 11 [37], p. 2). – La cirkulero rekomendis al la rondetanoj aliĝon al SEU kaj SAT kaj abonon al *Sennaciulo* kaj *Sennacieca Revuo*.
3. Gr. L'vovič, „Smolenskij ‚narkomindel'" (La smolenska „popola komisarejo pri eksteraj aferoj"), *Izvestija CIK*, 1-6-1926; represita en *Meĵdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 17 (43), p. 15. Vd. ankaŭ *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 38 (90), p. 6.

La jaro 1925 do ŝanĝis la situacion de la Esperanto-movado en Soveta Unio. Kiel Drezen konstatis ses jarojn poste, de tiu tempo, kiam la aŭtoritatoj proklamis la neceson de internacia eduka laboro por la laboristaj amasoj kaj kiam la esperantistoj proponis tiucele siajn servojn al la publiko, la agado, farita antaŭe nur por la esperantistoj mem, „fariĝis nun publika bezonaĵo. ... Tio tiris atenton de la aŭtoritatoj al esperanto kiel al atentinda kultura faktoro".[1] La rekonon de la serva rolo de Esperanto en internacia korespondado simbole substrekis la fakto, ke en 1925 la soveta poŝto por la unua fojo en la filatela historio eldonis poŝtmarkojn kun teksto en Esperanto.

Tiuspeca praktika apliko de la lingvo okazis en la kadro de la revo je monda revolucio. Ĝi malgrandskale jam ŝajnis anticipi tion, kio karakterizos la interhomajn rilatojn en proleta civilizo de la proksima estonteco. Tian antaŭvidon havis ankaŭ la soveta publicisto L.S. Sosnovskij, farante en 1925 la jenan prognozon:

> Se ne hodiaŭ, do morgaŭ ekfluos per granda torento la amasaj ekskursoj de laboristoj el SSSR eksterlanden kaj inverse. Esperi, ke rusa laboristo, veturanta en Eŭropon, ellernos antaŭe 5-6 lingvojn por viziti 5-6 landojn, – estas naive. Li ne povos, certe, ankaŭ per Esperanto sin turni al la laboristaj amasoj de Okcidento, ĉar ankaŭ tie tiu ĉi lingvo ne estas sufiĉe disvastigita. Sed se en ĉiu lando la komunistaj partioj almenaŭ iomete sin okupus pri tiu ĉi problemo, kiomoble plifaciliĝus la eblo por nia vica laboristo, ne posedanta la fremdajn lingvojn, komunikiĝi kun la fratoj laŭ la laboro kaj laŭ la batalo en aliaj landoj.[2]

Estis kvazaŭ konfirmo por la optimismo de Sosnovskij, ke pli kaj pli ofte okcidentaj laboristoj, vizitantaj Sovetan Union, trovis per Esperanto facilan kontakton. Tiuj vizitantoj, kies unuaj estis brita[3], ĉeĥa[4], germana[5] kaj sveda[6] laboristoj, dum sia restado en

1. E. Drezen, *Analiza historio de Esperanto-movado*, Leipzig 1931, p. 86.
2. *Sovetskij esperantist* 1925, p. 33; cit. *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 26, p. 7.
3. P. Kirjuŝin, „Ĉerez Belorussiju pri pomoŝĉi Ėsperanto" (Tra Beloruslando helpe de Esperanto), *Meĵdunarodnyj jazyk* 1925, n-ro 1 (27), p. 7-8. – Pri Arthur Whitham.
4. R. Nikolskij, „Unu vespero kaj ĝiaj rezultoj", *Meĵdunarodnyj jazyk* 1925, n-ro 2 (28), p. 9. – Pri la ĉeĥino Anna Bouda.
5. W. Bennewitz, „Kun la germana delegacio laborista al Sovetlando", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 52, p. 1, kaj en pluraj postaj numeroj; la sama, „Ĉu Esperanto estas utila por laboristaro tutmonda?", *Meĵdunarodnyj jazyk* 1925, n-ro 5 (31), p. 1-3 (ankaŭ ruslingve). – La delegacio, al kiu apartenis Willy Bennewitz, estis la unua tiaspeca, kiun organizis Komunista Partio de Germanio. Vd. la broŝuron *Was sahen 58 deutsche Arbeiter in Rußland?*, Berlin 1925.
6. John Nilsson, „Impresoj el Sovet-Unio", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 48, p. 4.

Soveta Unio helpis forigi la skeptikon de lokaj instancoj pri la funkcikapablo de Esperanto kaj, reveninte hejmen, disvastigis favorajn raportojn pri siaj impresoj en Soveta Unio.[1]

Pli rektan helpon al la agado de SEU donis kelkaj spertaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj venis al Soveta Unio por pli longa restado. Krom politikaj elmigrintoj, kiel la hungaroj Pál Robicsek[2], István Michalicska[3] kaj Sándor Szatmári[4], al ili apartenis du fondaj membroj de SAT. Unu, Robert Guihéneuf, estis amiko de Lanti.[5] La alia, la aŭstrodevena komunisto Lucien Laurat[6], ludis aparte gravan rolon, ĉar li vivis en Moskvo dum kvar jaroj ekde 1923. Laborante en la gazetara oficejo de Komintern, funkciante kiel korespondanto de *L'Humanité* kaj instruante en la Komunista Universitato de Orientaj Laboruloj, Laurat en tiuj jaroj, dum kiuj li estis ankaŭ membro de la CK de SEU kaj aperigis, sub la pseŭdonimo L. Revo, multajn artikolojn en *Sennaciulo*, kvazaŭ personigis la proksiman interligiĝon de SAT kaj SEU.

La ligoj kun SAT iĝis por SEU ĉiam pli gravaj, ĉar por efike

1. „Kelkaj rezultoj de laboristaj ekskursoj al Sovet-Unio", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 52, p. 4; P. Kirjušin, *Mejdunarodnaja rabočaja svjaz' na ésperanto* (Internacia laborista kunligo en Esperanto), Moskva 1930, p. 10-12. – Vd. ankaŭ: N.V. Nekrasov (komp.), *Tra U.S.S.R. per Esperanto. Malgranda helplibreto por alilanda esperantisto,* Moskvo, Kazanjo 1926.
2. Paŭlo Robiček, „Pri la laboro inter politikaj elmigrintoj", *Sovetskij ésperantist* 1925, p. 39. – Robicsek, kiu same kiel Michalicska dumtempe apartenis al la CK de SEU, en 1919 estis vic-popolkomisaro pri poŝto en la Hungara Konsilantara Respubliko.
3. Stefan Michalicska, „Kiel mi lernis Esperanton", *Mejdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 7 (33), p. 3-4 (ankaŭ ruslingve). – Michalicska lernis Esperanton en hungara malliberejo.
4. Borbála Szerémi-Tóth, „Perloj el la historio de Esperanto", *Hungara Vivo* 3. 1963, n-ro 1, p. 10-12. – Szatmári ne estas identa kun la hungara Esperanto-verkisto Szathmári.
5. Guihéneuf (pseŭdonimo: Ivon) laboris i.a. kiel ĉefadministranto de arbarego en Ĥabarovsk. En 1934, jam perdinte sian entuziasmon por Soveta Unio, li povis forlasi la landon kun siaj rusaj edzino kaj infano: Borsboom, *Vivo de Lanti*, p. 28, 136.
6. Lia origina nomo estis Otto Maschl. Naskita en 1898 en Vieno, li lernis Esperanton en 1913. De 1932 ĝis 1939 li instruis marksismon kaj ekonomion en la Supera Laborista Instituto de Franca Sindikata Asocio (CGT). Depost 1949 li estis redaktoro pri soveta ekonomio ĉe la revuo *Est-et-Ouest*. Al liaj verkoj apartenas *Staline, la linguistique et l'impérialisme russe* (1951). Laurat mortis en marto 1973 en Parizo.

antaŭenigi la internacian korespondadon de siaj membroj ĝi bezonis la kunlaboron de alilandaj laboristaj Esperanto-asocioj kaj la koordinan agadon de tutmonda organizaĵo. Pro tiu ĉi konsidero Drezen forte substrekis la principon de unueca fronto. En radio-parolado pri la Kvina Kongreso de SAT en Vieno (1925) li ne nur subtenis la karakterizon de SAT kiel „kultura asocio en la servo de la proletaria klaso", sed eĉ eksplicite salutis la venkon kontraŭ „kamaradoj tro partiecaj kaj doktrinemaj":

> Ne necesas, ke ni faru propagandon en SAT por niaj specialaj politikaj idealoj. Ni argumentu per faktoj. Ni citu sole la faktojn. La faktoj posedas mirigan econ de la klerigado, de la kulturigo.[1]

Jam unu jaron poste al la sovetaj esperantistoj prezentiĝis grava okazo por testi ne nur la komunikajn eblecojn de sia lingvo, sed ankaŭ la aktualan sintenon de la aŭtoritatoj je la provoj meti Esperanton en la servon de internacia klerigo de la laboristoj. En aŭgusto 1926, nome, SAT organizis sian Sesan Kongreson en Leningrado. Al la kongresejo, la Taŭrida Palaco, venis pli ol 400 partoprenantoj, el kiuj ĉ. 150 estis eksterlandanoj. La Popola Komisaro pri Klerigo, Lunaĉarskij, akceptis esti honora prezidanto de la kongreso; en sia skriba salut-mesaĝo li agnoskis, „ke la esperantistoj, sentante sin kondukantoj de la ekstreme progresigaj formoj de homa interkomunikado, sentas ankaŭ ian proksimecon al la granda komunisma movado".[2] Okaze de la kongreso aperis speciala poŝtmarko. Reprezentanto de la Asocio de Proletaj Verkistoj publike konfesis „gravan eraron" – nome tiun, ke li kaj liaj kamaradoj antaŭe opiniis Esperanton „utopiaĵo kaj fantazia afero".[3] Aludante al tiuj kaj similaj deklaroj de apogo[4], Drezen en sia ferma parolado diris, ke la kongreso „signas turnopunkton en nia movado".[5]

Ne malpli, ankaŭ la interfratiĝa etoso dum la kongresaj tagoj levis la partoprenantojn preskaŭ en staton de eŭforio, kiu influis

1. E. Drezen, „Pri la rezultoj de la V. Kongreso de SAT", *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 1 (53), p. 1.
2. *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 46 (98/99), p. 4.
3. *Protokolo de la VI-a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, Leningrado, 6-10 aŭgusto 1926.* Ekstra numero de *Sennaciulo*, novembro 1926, p. 13.
4. Vd. ankaŭ la saluton de A.E. Fersman nome de la Akademio de Sciencoj: *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 100, p. 6.
5. *Protokolo de la VI-a Kongreso*, p. 56.

pozitive ilian ĝeneralan juĝon pri Soveta Unio. Barthelmess entuziasme parolis pri „paradizo por esperantistoj kaj homoj kun liberaj ideoj", nomis la liberecon de la soveta civitano nekompareble pli alta, ol „en iu ajn ‚demokrata' lando", kaj rakontis pri „enviindaj kuraclokoj kaj banlokoj", en kiuj la laboristoj post ŝvita laboro ĝuas la merititan ripozon.[1] La konvinko, ke nur dank' al Esperanto eblis ekkoni kaj ĝuste aprezi la gigantajn progresojn de Soveta Unio, konsekvence inspiris al la unuanima akceptiĝo de rezolucio, kiu postulis, ke per Esperanto oni batalu „kontraŭ la penado de pseŭdogvidantoj trompi kaj teni en malscio la laboristojn el diversaj landoj, kaŝi de ili la veron pri vivkondiĉoj de la laboristoj en diversaj landoj, malhelpi kreon de la unueca fronto".[2] Pri la kongreso mem estis fiere konstatite, ke ĝi signifas grandan paŝon antaŭen en la klopodoj demonstri la taŭgecon de Esperanto „ne nur por komerco, turismo, filatelio, nudkulturo ktp., sed ankaŭ por esprimi sciencperfekte ĉiujn batalaspirojn de la proletaro".[3]

Kiel unu el la plej gravaj ekzemploj por la servokapablo de Esperanto estis nomata ĝia apliko en la internacia laborista korespondado, pri kiu la kongreso akceptis apartan rezolucion.[4] Tiu ĉi rezolucio alvokis ĉiujn SAT-anojn doni „unuavican atenton" al la korespondado, disponigante sian helpon al laboristaj organizaĵoj, kiuj deziras havi ligon kun eksterlando, kaj organizante la tradukadon de korespondaĵoj el *Sennaciulo* por lokaj laboristaj ĵurnaloj kiel ankaŭ de leteroj de eksterlandaj laboristoj, kiujn rekte ricevis tiuj ĵurnaloj. La gazeto de SAT do estis servonta kiel centra organo de la internacia korespondado per Esperanto, de kiu eliru granda multobliga efiko, kaj tial Drezen dum la kongreso denove emfazis la neceson elimini ĉion, kio malhelpas plenumon de tiu celo. Traktante leteron de Lanti, kiu enhavis plendojn pri malfacilaĵoj en la redakta laboro de *Sennaciulo*, Drezen diris: „Ni devas en la nomo de la kongreso

1. N. Barthelmess, „Ĉe la laboruloj. Impresoj pri kongresvojaĝo", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 104, p. 5.
2. *Protokolo de la VI-a Kongreso*, p. 49.
3. L. Revo, „Al la proletaj verkistoj esperantistaj!", *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 101, p. 7.
4. *Protokolo de la VI-a Kongreso*, p. 51-52.

esprimi plenan konfidon al nia meritoplena K-do. Li rajtu rifuzi presigon de artikoloj tro ‚komunistaj' aŭ tro ‚anarkistaj', kiuj povas malhelpi al la unueca fronto proletaria de SAT."[1]

Resume, la kongreso ne nur fortigis la enlandan pozicion de SEU, sed montriĝis fruktodona ankaŭ por SAT: Ĝia membraro en Soveta Unio atingis post Leningrado la nombron de preskaŭ 2000.[2]

4.1.5. *Sukcesoj en la koresponda agado*

La entuziasmon pri tio, ke dank' al Esperanto la internaciaj rilatoj ĉesis esti „privilegio de potenculoj kaj de riĉuloj"[3], meze de la 1920aj jaroj akcelis ankaŭ la evoluo de radio. Tiu teknika atingo, permesanta transsalti landlimojn, ŝajnis kvazaŭ altrudi la penson pri Esperanto kiel solvo de la malpli facile venkebla baro de diverslingveco, kaj efektive komence de marto 1926 la Unua Tutsoveta Kongreso de la Societo de Radio-Amikoj rekomendis al ĉiuj membroj lerni kaj apliki Esperanton.[4] Komenciĝis disaŭdigoj de Esperantaj kursoj kaj elsendoj en la lingvo'mem, interalie de la moskva stacio „Komintern"[5], kaj ligiĝis kontakto inter sovetaj kaj alilandaj radio-amatoroj.[6]

Tamen, pro la tre limigita ebleco persone rilati kun eksterlandaj esperantistoj, neniu formo de praktika uzo de Esperanto povis atingi tiun gravecon, kiun havis la korespondado. Ĝi kaj malfermis al la individua SEU-membro pordon al la ekstera mondo kaj, baziĝante sur la bonvolo de la aŭtoritatoj al la ideo de

1. *Protokolo de la VI-a Kongreso*, p. 52. – Lanti ne ĉeestis la kongreson.
2. *Historio de S.A.T., 1921-1952*, Paris 1953, p. 40.
3. N.P. Evstifeieff, „Alvoko al tutmondaj kamaradoj", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 51, p. 4.
4. *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 31 (83), p. 5; n-ro 44 (96), p. 7. – Vd. ankaŭ la paroladon de la prezidanto de la Societo, A.M. Ljubovič: *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 22 (74), p. 5-6.
5. Reage, jam tre frue ĉeĥoslovaka ministro notis, ke sovetaj radio-paroladoj en Esperanto „superŝutas Eŭropon": laŭ *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 25 (77), p. 7.
6. A. Gudkov, „Kak rabotajut radio-ljubiteli-esperantisty" (Kiel laboras radio-amatoroj esperantistoj), *Izvestija C.K. SESR* 5. 1926/27, p. 198-199; N. Modenov, *Granda en malgranda. Esperanto kaj P.T.T.R.*, Parizo, Moskvo 1928; *Profesia Unuiĝo de Poŝto, Telegrafio, Telefono kaj Radio de U.S.S.R.* Trad. Viktor Ĵavoronkov, Paris 1926.

internacia laborista korespondado ĝenerale, samtempe helpis levi la prestiĝon koj organizan fortecon de SEU kiel tuto.

En la jaroj 1926/27 sole la esperantistoj en la regiono Smolensk sendis 3800 leterojn al eksterlando, el kiuj 1001 estis publikigitaj en naciaj komunistaj gazetoj; ili ricevis el eksterlando 3600 leterojn, el kiuj 778 aperis en la gubernia gazeto *Rabočij put'*.[1] Iliaj kolegoj en Dnepropetrovsk interrilatis kun laboristaj korespondantoj en 40 landoj; en la unua duonjaro de 1927 ili skribis ĉ. 1000 kaj ricevis 981 leterojn.[2] Oficejo por Internaciaj Ligoj en Minsk, kiu koordinis la agadon de pluraj Esperanto-grupoj en Belorusio, korespondis kun 247 adresoj en ĉiuj kvin kontinentoj; de majo 1925 ĝis majo 1926 ĝi ekspedis 4209 leterojn kaj ricevis 4035 korespondaĵojn.[3] Similajn dimensiojn atingis la korespondado en multaj aliaj lokoj, precipe en la okcidenta parto de Soveta Unio. Pri tiu amasa utiligo de Esperanto raportis interalie *Pravda* kaj la oficiala organo de la sovetaj laboristaj kaj kamparanaj korespondantoj, *Raboče-krest'janskij korrespondent*.[4]

Ke la kampanjo efektive respondis al la deziro de multaj sovetaj esperantistoj, montris la granda nombro de korespond-anoncoj, kiuj aperis en preskaŭ ĉiu numero de *Sennaciulo*. Kiajn sentojn donis la konscio ligiĝi per Esperanto kun la tuta mondo, bone priskribas la memoroj de la konata germanisto Lev Kopelev[5], kiu en 1926, kiel lernejano en Kiev, eklernis Esperanton. Parolante pri sia instruisto kaj la entuziasmo, kiun li ekflamigis inter la junuloj, Kopelev skribas:

> En la gazetoj estis tede stereotipaj sciigoj el eksterlando, en la revuoj oni vidis malhelgrizajn fotojn: malfortaj kopioj de malproksima, fremda vivo...

1. *Izvestija C.K. SESR* 6. 1928, p. 17; kp. Lwunin, „Zum Briefwechsel..." p. 1020. – La leterojn sendis (dum unu kaj duona jaroj) 120 personoj el 16 lokoj de la gubernio Smolensk; venis leteroj de 316 eksterlandanoj (el 283 urboj en 31 landoj): R. Nikol'skij, „283 goroda, 31 strana...", *Izvestija C.K. SESR* 5. 1926/27, p. 357-359.
2. Lwunin, „Zum Briefwechsel...", p. 1020.
3. Kirjušin, *Mejdunarodnaja rabočaja svjaz'*, p. 15.
4. Vd. la represitajn leterojn en *Bjulleten' CK SESS* 5. 1926/27, p. 14-15.
5. Lev Kopelev (nask. 1912), verkisto, literatura kritikisto kaj tradukisto el la germana, en 1945 pro „kompato al la malamiko" estis kondamnita al dek jaroj en koncentrejo. Pro siaj simpati-deklaroj al Andrej Saĥarov kaj aliaj t.n. „disidentoj", en januaro 1981, dum restado en Federacia Respubliko Germanio, li estis eksŝtatanigita.

Kaj jen kontraste Kopelev rimarkis

> la personajn leterojn el malproksimaj regionoj, nur lastatempe alvenintajn kaj adresitajn al tiu viro: nia instruisto. Li tiris el malnova aktujo buntajn, kvazaŭ lakitajn poŝtmarkojn, kovertojn kun fremdlandaj markoj. Oni povis preni ilin en la manon, ili eligis nekutimajn odorojn: la spiron de Londono, Parizo, Sanfrancisko, Tokio...
> ... Mia koro ĉesis bati, kiam mi vidis la kovertojn kun poŝtmarkoj el Aŭstralio, Japanio, Usono, Hispanio, Argentino... Kaj ĉie estis surskribita lia nomo, ĉiu letero komencis per la bela alparolo „kamarado" aŭ „samideano"...[1]

La koresponda agado, kiu konformis al la desupre postulata „internacia eduklaboro de la amasoj" kaj samtempe kontentigis la personajn aspirojn de individuaj sovetianoj pri kontakto kun eksterlando, grandskale kreskigis la interesiĝon pri Esperanto en Soveta Unio. Lernolibro eldonita en 10 000 ekzempleroj plene disvendiĝis dum tri monatoj, tiel ke jam en aprilo 1926 SEU parolis pri sia limigita kapablo efektive respondi al la interesiĝo.[2] La membraro ĉirkaŭ tiu tempo atingis la nombron 10 000.[3] Esperanto ĉesis, laŭ Drezen, esti celo de agado, sed jam fariĝis reale kaj serioze utiligata rimedo je dispono de la „vastaj popolmasoj".[4]

Por ankoraŭ plialtigi la amasan efikon de la lingvo la Centra Komitato de SEU alvokis siajn membrojn ne resti inter si en Esperanto-kluboj, tiel sin apartigante de la socia vivo; anstataŭe, „la tuta pezocentro de la laboro devas esti en organizo kaj gvido de Esperanto-ĉeloj ĉe uzinoj, fabrikoj, oficejoj".[5] En tiu klopodo SEU ricevis la apogon de oficialaj instancoj: Fine de nov-

1. Lew Kopelew, *Und schuf mir einen Götzen. Lehrjahre eines Kommunisten*, Hamburg 1979, p. 127-128. La ruslingva originalo (*I sotvoril sebe kumira*) aperis en Usono, 1978; angla traduko: *The education of a true believer*, London 1981, p. 98-99. – Por tute similaj rememoroj kp. Lev G. Fišbejn, „Kamarado Esperanto", *Nuntempa Bulgario* 1966, n-ro 4, p. V; vd. ankaŭ Konstantin Paustowskij, *Ferne Jahre. Erinnerungen an Kindheit und Jugend*, München 1961 (trad. el la rusa), p. 230-231. Estas interese kompari la memorojn de bulgara vilaĝano pri la korespondado: Trifon Ĥristovski, *Mia vivo*. Trad. Nikola Aleksiev, Sofia 1981, p. 117-118.
2. *Mejdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 13 (39), p. 7.
3. El tiuj, 3400 estis persone registritaj ĉe la CK de SEU kaj regule ricevis la organon.
4. E. Drezen, „La vojoj de nia progreso", *Mejdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 13 (39), p. 5.
5. „Evitu erarojn! ĝuste komprenu la devizon ‚Esperanto en masojn'!", *Mejdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 11 (37), p. 6.

embro 1926 la Gubernia Komitato de la Partio en Tver' en cirkulero al la distriktaj komitatoj konstatis, ke la granda signifo de la laboro por internacia interligo, gvidata de Esperantaj organizaĵoj, ankoraŭ ne ricevas sufiĉan atenton, kaj alvokis la lokajn partiajn, komsomolajn kaj profesiajn organizaĵojn „tutforte helpi al la organizado de esperanto-rondetoj en laboristaj kluboj".[1] Aparte favora estis la sinteno de la Centra Sindikata Konsilantaro de Ukrainio, kies kultur-kleriga fako en septembro 1926 substrekis la neceson disvastigi Esperanton „inter la larĝaj laboristaj amasoj".[2] Unu jaron poste la decido enkonduki Esperanton en laboristajn klubojn estis konfirmita, ĉar la Esperanto-rondetoj „pruvis sian celkonformecon" kaj „montris bonajn rezultojn" precipe en la utiligo de la lingvo por la internacia laborista korespondado kaj „por la disvastigo de l' vero pri Sovet-Unio".[3] Kvankam mankis simila apogo flanke de la plej superaj instancoj en Moskvo[4], SEU povis meze de 1927 kun kontento registri, ke ĝi ricevas „gravan subtenon de la partiaj kaj sociaj organizaĵoj. Ĝi ne jam havas iun formalan eksteraĵon – iun ĝeneralan direktivon – sed ĝi estas sentebla por ni ĉiutage. Oni ne plu rilatas al ni mokeme aŭ suspekte, aŭ ignore – oni konsideras SEU kaj la proletan Esperanto-movadon kiel valoran socian faktoron".[5]

Plia konfirmo de la respektata pozicio, kiun ĝuis SEU en tiu tempo, estis la fakto, ke ĝi ricevis, same kiel aliaj sovetaj organizaĵoj, en 1927 la rajton inviti gastojn el eksterlando por partopreno en la solenaĵoj okaze de la deka datreveno de la Oktobra Revolucio. La inviton sekvis 11 personoj el 9 landoj, al kiuj aldoniĝis 12 aliaj esperantistoj, apartenantaj al diversaj delegacioj.[6]

1. *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 119/120, p. 10.
2. *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 106, p. 7.
3. *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 79.
4. Fine de julio 1925, dum la Dua Kongreso de SEU, estis dirite, ke en la CK de la Partio „antaŭ nelonge ĉe agitpropaganda fako fondiĝis sekcio por zorgi pri diversaj publikaj societoj, kiu nun sufiĉe interesiĝas pri Esperanto": *Sovetskij esperantist* 1925, p. 139. Poste Drezen konfirmis, ke tiu fako „serioze pritraktas la problemon pri Esperanto": *Mejdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 13 (39), p. 6. Sed pri ia decido nenio estis konigita.
5. „Pli da atento kaj seriozeco", *Bjulleten' CK SESR* 5. 1926/27, p. 69.
6. „Alilanda delegitaro esperantista en Sovetio", *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 113-114. – La gastoj de SEU estis kvar komunistoj, kvar socialdemokratoj kaj tri senpartiuloj.

Ili ĉeestis interalie en Mondkongreso de la Amikoj de Soveta Unio (10a ĝis 12a de novembro 1927), el kies preskaŭ 1000 delegitoj el pli ol 40 landoj unu kvarono subskribis dezirespriman por pli vasta utiligo de Esperanto en la kulturaj rilatoj inter Soveta Unio kaj eksterlando.[1] Krome, la esperantistoj vizitis la redaktejojn de gazetoj kaj dum aparta konferenco interŝanĝis la spertojn pri internacia korespondado.[2] La vojaĝo, kiu kondukis la gastojn de SEU ankaŭ al aliaj urboj de Soveta Unio, ebligis gajni impresojn de la soveta vivo, kiuj verŝajne estis pli profundaj, ol tiuj, kiujn povis ricevi la plimulto de aliaj delegitoj, ne uzantaj la servon de Esperanto.[3]

Pro la amplekso de la korespondaj rilatoj inter sovetaj kaj alilandaj esperantistoj estas praktike ne eble havi superrigardon pri la temoj, kiuj konsistigis la enhavon de la amase interŝanĝataj leteroj. Sed la fakto, ke tiu korespondado estis grandparte celdirektita, permesas al ni konkludi pri la preferata enhavo de la leteroj. Ĉar SEU celis al alta efiko de la korespondado kaj deziris maksimume alirebligi la ricevitajn leterojn al kiel eble plej granda publiko, nome per aperigo en gazetoj, ĝi kaj regule donis al siaj membroj praktikajn konsilojn kiel organizi la korespondadon[4] kaj klopodis instrui al la eksterlandaj korespondantoj pri

1. „Esperanto ĉe la Mondkongreso de l' Amikoj de Sovetio", *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 116.
2. „Internacia Konferenco pri Laborista Korespondado", *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 114-116. – La konferenco estis iniciatita de SEU.
3. Tiuj impresoj estis ĝenerale favoraj: „Per propraj okuloj", *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 118. En sia raporto, la franca komunisto Georges Salan tamen malkaŝe priskribis ankaŭ negativajn aspektojn de la soveta vivo: G. Salan, „Impresoj pri Sovetio de okulvidinto, orelaŭdinto, fingrotuŝinto", *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 119-121, 127, 135, 143, 167-168, 176-177, 182. Entuziasma estis la raporto de la sveda ĵurnalisto Einar Adamson, *Sub la ruĝa standardo. Impresoj kaj travivaĵoj en Sovetio*, Göteborg 1928. Plej detale priskribis siajn impresojn la konata japana dramverkisto Akita Uzyaku: *Wakaki Sovêto Rosiya* (Juna Soveta Ruslando), Tôkyô 1929. Tiu libro trovis konsiderindan atenton ĉe japanaj intelektuloj; vd. ankaŭ *Akita Uzyaku nikki* (Taglibro de Akita Uzyaku). Red. Ozaki Kôzi. Vol. 2, Tôkyô 1965, p. 36-58. Similan aŭ eĉ pli grandan influon inter ĉinaj intelektuloj havis pli malfrue la libro de Hu Yuzhi *Mosike yinxiang ji* (Impresoj el Moskvo), Ŝanhajo 1931, kiu baziĝis sur unusemajna restado inter sovetaj esperantistoj; kp. Ŝaŭ Bin, „Hujucz kaj Esperanto", *El Popola Ĉinio* 1986, n-ro 3, p. 7, 9.
4. Vd. ekz. la artikolojn, i.a. de Kirjuŝin kaj Nikol'skij, en *Izvestija C.K. SÉSR* 5. 1926/27, p. 15-20, 25-26, 254-256.

Soveta Unio kiel vojaĝ-celo de esperantistoj. *Supre:* Raporto de Lanti en *Sennacieca revuo* (1922). Manlibreto de SEU por eksterlandaj vojaĝantoj (1926). *Meze:* Libro de sveda ĵurnalisto (1928). Vojaĝimpresoj en *Juna soveta Ruslando* de la japana dramverkisto Akita Uzyaku (1929). *Apude:* Raporto pri vizito de berlinaj laboristaj esperantistoj (1932).

tio, kiaj estu iliaj leteroj por povi servi kiel materialo por sovetaj gazetoj. Analizo de la eksterlanden direktitaj instrukcioj pri dezirindaj leter-temoj montras precipe du karakterizaĵojn.

Unue, estis la admono ne plenigi la leterojn per bagatelaĵoj. Konstatinte ke granda nombro da leteroj „diras al ni pri nenio grava – ili priskribas la belaĵojn de la hejmlando aŭ pure burĝajn, lokajn sensaciojn", la aktivulo P. Kirjuŝin en Minsk precizigis, kio estis atendata de la eksterlandaj korespondantoj. Laŭ li, simplaj leteroj de laboristoj, kiuj „senĝene" rakontu pri diversaj flankoj de sia vivo, estas aparte bonvenaj:

> Por ni kaj nia legantaro estos interese el la letero de simpla laboristo ekscii, kiaj laborkondiĉoj estas en iaj lokoj de iu lando kaj estas grave, se tion priskribus okulvidanto mem. Same interese por ni estas legi pri politikaj rajtoj de laboristoj, pri persekutado de laborista movado, pri laboristaj idealoj kaj la sento de la tutmonda laborula frateco.[1]

Ne mankis preteco flanke de okcidentaj kamaradoj respondi je tiaj alvokoj, ĉar indikitaj estis temoj, kiuj – en tiu ĝenerala formulo – ŝajnis esti de komuna intereso por laboristoj en ĉiuj landoj. Multaj estis simple konvinkitaj, ke Soveta Unio meritas subtenon, kaj tial volonte utiligis Esperanton por montri sian solidarecon. Ili siavice esperis kompense ricevi de sovetaj korespondantoj informojn pri la vivkondiĉoj en Soveta Unio, kiuj estis publikigotaj en nacilingvaj laboristaj gazetoj. Tiucele la pli fervoraj eĉ rekte petis al siaj sovetaj amikoj, ke ili helpu per aŭtentikaj sciigoj ĝustigi misprezentojn de sia lando. Ekzemple, post kiam la angla *Evening News* en junio 1927 asertis, ke la soveta laboristo devas mem pagi por la edukado de siaj infanoj, tre baldaŭ en *Sennaciulo* aperis rilata artikoleto kun la alvoko: „Ĉu iu sovetiano helpos nin kontraŭbatali la burĝan mensogaron per respondoj al jenaj demandoj: ..."[2] En alia okazo, estis traduke reaperigita artikolo de *Münchener Zeitung* pri Siberio, kiu per citaĵoj el siberiaj gazetoj donis ekzemplojn de malkulturo, drinkemo, vagisteco kaj superstiĉo, kaj estis publikigita la peto de munkena SAT-ano, ke oni rebatu la asertojn, por ke li povu post-

1. P. Kirjuŝin, „Kion ni atendas de niaj korespondantoj?", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 109, p. 6.
2. (Mark Starr), „Pri edukado en Sovetio", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 145, p. 3.

uli de la gazeto ĝustigon.[1] Reago venis de la membroj de Esperanto-kurso en la kavaleria lernejo de Tver', kiuj listigis paŝojn faratajn de la soveta registaro por kontraŭbatali la priskribitajn negativaĵojn.[2]

Sed certe ne estus korekte supozi, ke la korespondaj rilatoj inter sovetaj kaj eksterlandaj esperantistoj dankis sian viglecon al la sinteno de homoj, kiuj eliris de la premiso, ke burĝaj gazetoj skribas nur malĝustaĵojn pri Soveta Unio kaj ke Esperanto malfermas privilegian vojon por ekscii la veron. Male, la korespondado floris, ĉar ankaŭ tiuj SAT-anoj, kiuj malpli inklinis rigardi Sovetan Union kiel modelan landon de socialisma konstruado, trovis ĝin kaj interesa por si mem kaj grava por la Esperanto-movado. Multaj ekkorespondis kun sovetianoj pro natura scivolo pri la vivkondiĉoj en ilia lando kaj pro la deziro rakonti en siaj leteroj pri la propra medio. Ili krome konsciis, ke en Soveta Unio estis granda interesiĝo pri korespondado kun eksterlando, kiun respondi ŝajnis kvazaŭ devo ankaŭ el la vidpunkto de subteno al la Esperanto-movado, kaj tiun konscion akrigis la avertoj de tempo al tempo publikigitaj en *Sennaciulo* kontraŭ minacanta malekvilibro inter la disvastiĝo de Esperanto en Soveta Unio kaj tiu en eksterlando.[3]

Tio nin kondukas al la dua ĉefa karakterizaĵo de la korespondado. Kiel montras la avertoj kontraŭ malekvilibro, al kiuj ni povas ankoraŭ aldoni la konstantan admonon, ke la membroj de SAT estu fidelaj, akurataj korespondantoj, la deziro entute progresigi la korespondadon klare superregis tendencojn tro detale fiksi temojn, kiuj ĝin konsistigu. Apenaŭ necesas atentigi pri la praktika neebleco preskribi la enhavon de la korespondado, kaj certe neniam jen la kamaradoj en eksterlando limigis sin al plendoj pri sia mizera vivo sub kapitalismo kaj jen iliaj sovetaj korespondantoj konstante rakontadis al ili pri siaj venkoj en la konstruado de socialismo. Kiom ajn forta estis la instigo trakti en lete-

1. „Barbaraĵoj en Sovet-Siberio'", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 111, p. 4-5. – La originalo aperis en *Münchener Zeitung* de 22 okt. 1926.
2. *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 15, p. 3. – La kursanoj esprimis indignon pro la selekta maniero de la artikolo, sed ne neis la faktojn mem.
3. I. Avrunin, „Danĝero", *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 38 (90), p. 6; V. Varankin, „Pri internacia laborista korespondado", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 104, p. 6.

roj temojn, kiuj povus poste interesi ankaŭ la legantojn de gazetoj, ĝi ĉiuokaze ne povis malfortigi la elementon de spontaneo, scivolo kaj persona plezuro. Sed, kio estas grava: ankaŭ por la celata ekspluato de eksterlandaj leteroj en ekzemple uzinaj gazetoj origine estis eĉ preferata la specifa aromo de persona letero. La koloro de individueco en la leteroj skribitaj de eksterlandanoj estis ŝatata, kiel emfazis komence de 1927 laborista Esperanto-korespondanto en Kremenĉug:

> Leteroj de simplaj apenaŭ kleraj laboristoj havas ofte multe pli da sukceso ol altpolitikaj rezonadoj, ĉar ili estas pli „vivecaj".[1]

Simile, la redakcio de *Sennaciulo* apelaciis al siaj korespondantoj:

> ... ne verku politikecajn artikolojn, ne provu imitaĉi la profesiajn publicistojn; rakontu simple pri via vivo, pri via profesio, pri la moroj en via regiono kaj tiel nia gazeto akiros specialan karakteron, certan originalecon.[2]

Ke korespondaĵoj konatigu la vivkondiĉojn de eksterlandaj laboristoj anstataŭ doni priskribon de la ĝenerala politika situacio, eksplicite postulis ankaŭ belorusa sindikata gazeto en letero al esperantistoj, kiuj ofertis liveri al ĝi materialon per Esperanto.[3] Kaj kiam similan deziron regule ricevi unuavice informojn pri vivkondiĉoj en eksterlando esprimis la redakcio de gazeto por ukrainaj laboristinoj, ĝiaj esperantistaj priservantoj detaligis por nesovetaj SAT-anoj la temojn, kiujn traktu leteroj destinitaj por aperigo:

> ... en kiaj kondiĉoj laboristinoj laboras ĉe la fabrikaj laborejoj; kiel ili estas salajrataj (diferenco inter la vira kaj virina salajroj); kiom da horoj oni laboras; danĝeroj de l' laboro kaj akcidentoj (vundiĝoj dum laboro); ĉu la entreprenejo havigas specialan vestaron, se la laboro estas malpuriga aŭ ĉifiga; ĉu la laboristinoj ricevas dum la jaro pripagatan libertempon (forpermeson), kiom longa; ĉu ekzistas asekuro de l' laboro (kion laboristino ricevas dum malsano, lastaj monatoj de gravedeco kaj post la akuŝo, pro vundo; kiu, kiel, kiomlonge kaj kiomsume pripagas tiujn mallaborajn periodojn); skribu pri ekspluatado de l' virina (kaj speciala knabina) laboro; skribu pri sukcesoj de l' revoluciul-ina movado kaj pri la batalo kontraŭ la *etburĝa* "por-emancipa" virinmovado; pri kulturlaboro inter laboristinoj; kiel la labor-

1. „Konsiloj al la gazetservantoj", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 121/122, p. 9.
2. *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 100, p. 7.
3. Letero de la redakcio de *Profruĥ Belorussii*, de 23-7-1926, al Esperanta Centra Oficejo en Minsk, trad. en *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 100, p. 7. – La redakcio nomis la jenan deziron „treege grava": „necesas ke la leteroj ne rilatu la ĝeneralan politikan analizon de la landa situacio".

ist(edz)inoj partoprenas en la koopera laboro; kiel laboristaj kooperativoj plifaciligas la laboristinan vivon (fondo de manĝejoj, sučinfanoj, infanĝardenoj, helpo al gravedulinoj ktp.); senlaboreco inter inoj... Direktu al ni torenton da leteroj! Skribigu viajn konatulinojn! La leteroj estu simplaj, sed faktoričaj![1]

Preferon do havis, laŭ tiuj alvokoj, leteroj, kies temaro estis proksima al la ĉiutaga sperto de laboristoj en kiu ajn lando. Tio signifis, ke por la gazetara utiligo de leteroj estis dezirata enhavo, kiu verŝajne kongruis kun tiuj temoj, pri kiuj la plej multaj laboristaj esperantistoj en ĉiu okazo preferis interŝanĝi informojn kaj opiniojn. Ĉar artikoloj pri la vivkondiĉoj en diversaj landoj konsistigis ankaŭ grandan parton de *Sennaciulo* kaj evidente estis aparte ŝatataj de la legantoj, ni povas supozi, ke eĉ sen speciala admono la plimulto el la SAT-anoj malinklinis al „altpolitikaj rezonadoj", opiniante, ke estas pli interese kaj pli konforme al ilia kompetento, se ili korespondas pri aferoj de la ĉiutaga vivo. Tial estis kuraĝige, ke ankaŭ de soveta flanko venis subteno al la uzo de korespondado por la komparo de faktoj. La ŝanco ŝajnis esti bona, ke la celdirektita korespondado inter Soveta Unio kaj aliaj landoj ne deformiĝos en rimedon por reciproka entuziasmigo aŭ propagandeca konfirmo de ideologiaj premisoj.

4.1.6. *Akriĝinta klasbatalo kaj la „misuzo" de Esperanto*

Kiel supozigas la postuloj pri „vivecaj" kaj „faktoričaj" leteroj, en Soveta Unio tiutempe estis konsiderinda surloka libero en la selektado de leteraj temoj taŭgaj por publikigo. Tamen, tiu libero ne estis tiel vasta kiel la temo-gamo de la skribintoj. Per aliaj vortoj: Ne ĉio estis publikigebla, kion eksterlandanoj skribis al siaj sovetaj amikoj. Lanti mem spertis tion jam en 1924/25, kiam li servis al siberia gazeto kiel esperantista korespondanto. Post ĉ. duona jaro li rezignis sian – pagatan – kunlaboron, riceviinte sciigon de la redakcio, „ke miaj artikoloj ne multe plaĉas al la legantoj; ne pro tio, ke ili ne estas interesaj, sed tial ke ŝajne mi

1. V. Kolčinski, „La SAT-aparato servu", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 119/120, p. 9. – La artikolo prezentas tradukon de letero de la redakcio de *Komunarka Ukrainy* (organo de la Centra Fako pri Laboristinoj kaj Vilaĝaninoj en la Komunista Partio de Ukrainio).

ne opinias, ke la franca kapitalismo staras ĉe la rando de bankroto; ankaŭ pro tio, ke mi ne raportis sufiĉe optimisme pri la ‚progresoj' de l' kompartio".[1] Ne estas surprize, ke la malkaŝemo de Lanti kunpuŝiĝis kun la redaktaj kriterioj de soveta gazeto. Sed, pli signife, ankaŭ la persona korespondado ne estis senproblema: Eksterlandaj esperantistoj en siaj leteroj ne nur, ofte nekonscie, komprenigis, ke la vivkondiĉoj de laboristoj en kapitalismaj landoj ne ĉiam kompariĝas nesaveble pli malbonaj kun tiuj en Soveta Unio. Ili ankaŭ, eĉ se plene simpatiante kun la konstruado de socialismo en Soveta Unio, de tempo al tempo vidigis la fenomenon de revoluciula ĉasteco, nome la sintenon de homoj, kiuj naive mezuris la realecon de Soveta Unio laŭ siaj imagoj pri la karaktero de sukcesa revolucio. Ekzemple, iu en letero al sia soveta korespondanto esprimis grandan miron pri la informo, ke la sovetaj sindikatoj „devas zorgi pri pli produktiva laboro" anstataŭ batali por la laboristo kaj kontraŭ la uzina administracio. Reage je tiaj leteroj, SEU jam en 1926 admonis siajn membrojn, ke ili evitu doni neĝustajn aŭ neprecizajn informojn pri la vivo en Soveta Unio, kiuj „naskas konfuzon ĉe alilandaj laboristoj".[2]

En la unuaj tri jaroj SEU tuŝis nur sporade negativajn aspektojn en ligo kun la koresponda aktivado. Se problemoj estis nomitaj, ili temis ekzemple pri la „pezaj kondiĉoj", en kiuj laboras eksterlandaj korespondantoj[3], aŭ pri tio, ke en kelkaj landoj esperantistoj, kiuj korespondas kun Soveta Unio, estas persekutataj.[4] Ke tamen ankaŭ la prezento de Soveta Unio en leteroj iĝis objekto de atento, unue montris diskutoj en *Sennaciulo*: Jam en aprilo 1927 Demidjuk, membro de la CK de SEU, vidis kialon por furiozi kontraŭ pli frue aperintaj asertoj de iu „Sovetiano" pri salajroj, impostoj, loĝeja pago kaj libertempo, kiuj, laŭ

1. Letero al Laval, de 2-12-1935, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 116.
2. R. Skribemulo, „Neobdumannye pis'ma" (Nepripensitaj leteroj), *Izvestija C.K. SÈSS* 5. 1926/27, p. 22.
3. Kir-in, „Vsegda pod obstrelom" (Ĉiam sub pafoj), *Izvestija C.K. SÈSS* 5. 1926/27, p. 27-28.
4. R. Nikol'skij, „Ĵertvy naŝej neostorojnosti" (Viktimoj de nia nesingardemo), *Izvestija C.K. SÈSR* 5. 1926/27, p. 102-103. – La artikolo admonis la membrojn de SEU esti singardemaj korespondante kun esperantistoj en tiuj landoj.

Demidjuk, „tiomgrade fuŝas la faktojn, ke oni povas supozi komencon de iu *sistema misinformado* pri Sovetio".[1] Pli principan prilumon de problemoj rilatantaj al la korespondado kaj la kontribuado de sovetaj esperantistoj al *Sennaciulo* unuafoje donis letero, kiun la organo de SAT publikigis komence de 1928. Subtenante la opinion de germana SAT-ano, ke sovetaj kamaradoj verkas artikolojn „kvazaŭ laŭ propono de soveta registaro", esperantisto el Rostov plendis, ke en *Sennaciulo* „abundas prisovetia materialo pri plensukcesoj de laborista, ekonomia, kultura vivo", kaj faris energian pledon por pli realec-konforma raportado pri la vivo en sia lando. Li rekomendis, ke la sovetaj esperantistoj „ne prisilentu la temojn pri senlaboruloj, senhejmuloj..., loĝeja krizo en urboj, pri malklereco de kamparanoj", ĉar nur tiamaniere la kamaradoj en eksterlando ricevos „plenan bildon". La letero finiĝis jene: „Mi kredas, ke vero devas esti antaŭ ĉio."[2]

Tiu ĉi pledo koncernis la enhavon de kontribuaĵoj al *Sennaciulo*, sed kiam temas pri leteroj, ŝajnas, ke tiutempe en ili jam pli ofte estis traktataj ĝuste la negativaj flankoj de la soveta vivo. Siavice, nesovetaj esperantistoj en siaj leteroj montris ĝenan scivolemon, demandante la opinion de siaj korespondantoj pri luktoj interne de la soveta Partio, post kiam en decembro 1927 estis eksigitaj la opoziciuloj Trockij, Zinov'ev kaj Kamenev. En letero al sia siberia korespondanto Benjamin Zyrjanov la bavara SAT-ano Karl Weber ja aprobis tiun eksigon, sed samtempe esprimis malkonsenton „pri la mortiga punekzilo, ĉar tio estas kontraŭrevoluciula, kontraŭmarksista fiago". Weber krome demandis pri la ĝusteco de onidiroj, laŭ kiuj la leteroj, kiujn sovetaj esperantistoj sendas eksterlanden, „plejparte ne estas verkitaj de ili mem, sed de iu Esperanto-oficejo", al kiu oni ankaŭ devas submeti la korespondaĵojn ricevitajn el eksterlando. Li avertis, ke, se la informo montriĝos ĝusta, li kaj liaj kamaradoj ĉesos korespondi kun sovetaj esperantistoj, ĉar sub

1. G. Demidjuk, „Ankaŭ letero el Sovetio", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 133/134, p. 6.
2. Letero de Andrej Sidorov, de decembro 1927, en *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 129.

tiaj kondiĉoj ili „ĉiam estus trompitaj kaj neniam ekscius la veron pri Sovetio".[1]

Ĉar multiĝis la okazoj de malagrabla interesiĝo en eksterlando, ofte evidente stimulita per leteroj ricevitaj el Soveta Unio mem, la Centra Komitato de SEU faris en julio 1928 senprecedencan paŝon: En letero adresita al la redakcio de *Sennaciulo* ĝi komunikis:

> Lastatempe apartaj neŭtralaj esperantistoj, ankoraŭ loĝantaj en Sovetio..., en siaj leteroj al eksterlando disvastigas mensogajn sciigojn pri kvazaŭ politikaj kaj ekonomiaj krizoj en Sovetrespublikaro, pri kvazaŭ kruela traktado al politikaj enkarcerigitoj... Certe eksterlandaj proletaj esperantistoj ... estas konfuzataj de tiuj informoj kaj rezulte al SEU-organizoj kaj apartaj Sovetrespublikaraj esperantistoj venas multaj demandoj pri vereco de tiuj informoj.

SEU nomis la informojn „senhontaj kalumniaj mensogoj". Same aludante asertojn pri la ekzisto de ŝtata cenzura oficejo, al kiu la sovetaj esperantistoj devas sendi siajn leterojn destinitajn por eksterlando, SEU kategorie neis, ke tia oficejo ekzistas; ĝi kulpigis „neŭtralulojn" en Soveta Unio, ke ili en anonimaj leteroj disvastigis ankaŭ tiun aserton. Konklude, SEU patose emfazis:

> Sovetlandaj esperantistoj SAT-anoj, kaj SEU-anoj skribas al siaj eksterlandaj klasfratoj nur veron, nur tion, kion diktas ilia klasa honoro, ilia laborista koro.[2]

Samtempe la Centra Komitato sendis ankaŭ al la SEU-organizaĵoj cirkuleron avertantan kontraŭ „misinformoj" venantaj el Soveta Unio. Tiu cirkulero tamen klare agnoskis, ke malfacilaĵoj en la korespondado ne fontis nur el la leteroj de sovetaj „neŭtraluloj". Nome, sendepende de tio, „eksterlandaj esperantistoj lastatempe superŝutas esperantistojn de Sovetio per leteroj kun demandoj pri agado de l' opozicio kaj pri apartaj opoziciaj tezoj,

---

1. R. Nikol'skij, „Vezdesuŝĉie ‚agenty Kominterna'" (Ĉiestantaj „agentoj de Komintern"), *Izvestija C.K. SESR* 6. 1928, p. 152-154. – Citante el la letero, Nikol'skij kontrastigis Weber, kies „facilkredeman laboristan kapon" li nomis „nebuligita", kun la juĝo de eksterlanda esperantisto vizitinta Sovetan Union; laŭ tiu, „eĉ la aero de la soveta lando estas plenigita de libero kaj ĝojo pro kreema laboro, en fumplena loĝkvartalo de soveta urbo pli facile eblas spiri, ol en kiu ajn marborda kuracloko de kiu ajn kapitalisma lando". La aserton pri ekzisto de ŝtata Esperanto-oficejo Nikol'skij nomis „sensenca ofendo al ĉiuj sovetaj esperantistoj".
2. Letero de la Sekretariaro de CK SEU, de 25-7-1928, en *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 400. – La letero estis subskribita de Drezen, Iodko, Nekrasov, Demidjuk, Nikol'skij kaj Varankin.

alsendas specimenojn de eksterlandaj opoziciaj flugfolioj ktp.". Sekve, kreskis la konfuziĝo interne de la membraro de SEU: „Ofte niaj kamaradoj, ne povante respondi ĉiujn, iam tre malfacilajn demandojn, bombardas CK SEU per leteroj, petante konsilojn..."[1]

Jam antaŭ ol SEU publike alarmis pri kalumniaj leteroj kaj embarasaj demandoj, ĝi konfesis „kelkajn sufiĉe gravajn difektojn" en la korespondado inter sovetaj kaj alilandaj esperantistoj. Ties radikojn ĝi atribuis ĉefe al la fakto, ke la korespondado estas farata preskaŭ ekskluzive sur individua bazo. La difektojn ĝi karakterizis jene:

> ... medio de eluzado de ricevataj leteroj estas tre malvasta kaj ofte, krom la korespondanto mem, neniu scias pri tiu korespondado; en individua korespondado pli ofte okazas misinformado al eksterlandaj kamaradoj pri vivo en Sovetio; individua korespondado estas tre malfacile kalkulebla.

Por evitigi misinformadon kaj por vastigi la praktikan aplikon de Esperanto inter la laboristaj amasoj SEU opiniis necesa reorganizi la korespondan agadon entute. Ĝi rekomendis „nun transiri al pli supera ŝtupo de korespondado – al la korespondado kolektiva". Kiel tiu aspektu en la praktiko, SEU ilustris per la konsilo, ke letero el eksterlando estu publike diskutata en grupo, ke ĝia traduko estu elpendigita en speciala tabulo, por ke ankaŭ neesperantistoj informiĝu pri ĝia enhavo, kaj ke fine ankaŭ la respondo al la eksterlandano estu la rezulto de kolektive diskutata, unue ruslingve ellaborita teksto.[2] Estis klare, ke SEU celis, per la slogano „kolektiva korespondado", al pli da reglamentado. La CK-ano Roman Nikol'skij eĉ postulis „ĉiurimede kaj plene anstataŭi privatan individuan korespondadon per la kolektiva korespondado de konformaj grupoj (partiaj, fakaj, sindikataj ktp.) kaj per porgazeta korespondado".[3]

---

1. „Korespondado pri politika vivo de Sovet-unio. Cirkulera letero de CK SEU al ĉiuj SEU-organizaĵoj", *Bulteno de CK SEU*. 1927/28, p. 70. – La CK petis siajn lokajn komitatojn „pliintensigi konsiladon al kamaradoj, korespondantaj kun eksterlando".
2. „Pri kolektiva korespondado. Cirkulera letero de C.K. al ĉiuj SEU-organizaĵoj", *Bulteno de CK SEU* 6. 1927/28, p. 34.
3. R. Nikolskij, „Nuntempaj statoj kaj taskoj de internacia korespondado. Tezoj por la IV-a kongreso de SEU", *Bulteno de CK SEU* 2. 1927/28, p. 67.

En pli frua cirkulero al siaj organizaĵoj SEU atentigis, ke la „plivigliĝo de neŭtraluloj" kaj mankoj en la politika eduko de la membraro, kaŭzantaj misprezentadon de la soveta vivo en leteroj al eksterlando, havas rektan rilaton al ĝia socia strukturo – ke la danĝeraj tendencoj ŝuldiĝas ankaŭ al la nesufiĉa proporcio de laboristoj en SEU. Per tio ĝi tuŝis vundan punkton, ĉar efektive al la membraro apartenis multaj instruistoj kaj oficistoj, sed nur malmultaj laboristoj.[1] De nun al la varbado de industriaj laboristoj estis dediĉota unuavica atento. La Centra Komitato alvokis siajn lokajn organizaĵojn streĉi siajn fortojn, ke la procentaĵo de laboristoj en SEU estu levita de 17% al almenaŭ 40%. Samtempe ĉiuj SEU-anoj estis admonitaj plifortigi la batalon „kontraŭ provoj eluzi la lingvon internacian ne por klasaj, revoluciaj kaj teknikaj celoj, sed por simpla amuzado, flirtado ktp.".[2]

Internaj konfliktoj en la Centra Komitato de SEU mem, kiuj iĝis konataj en la komencaj monatoj de 1928, evidente ne estis senrilataj al tiuj severaj admonoj. La CK-ano Ivan Lidin pro malakordo kun sia kolego Demidjuk kaj pro „nekontentiga redakto" de la *Bulteno* estis liberigita de siaj taskoj.[3] Eĉ pli grave, en decembro 1927 Nikol'skij, kiu kiel sekretario de la CK respondecis pri la internacia korespondado, deklaris sian eksiĝon el SEU. En letero li motivis tion per la „troa mildeco" de la CK, specife de Drezen, al „neŭtraluloj". Kelkajn semajnojn poste Nikol'skij retiris siajn akuzojn kaj estis revenigita al sia antaŭa pozicio.[4] Tio evidente estis la rezulto de kompromiso, ĉar Drezen nun siaflanke, kvazaŭ por forigi suspektojn pro cedemo, transiris al pli batalema lingvaĵo: En tezoj por la okazonta Kvara Kongreso de SEU li komprenigis, ke jam ne plu temas nur pri lukto kontraŭ neŭtralismo, sed ke necesas senmaskigi precipe „la

1. Statistiko pri la 135 delegitoj de la Tria Kongreso de SEU en aŭgusto 1926 montris la jenan laŭprofesian reprezentiĝon: 36 kleriglaboruloj, 7 fervojistoj, 25 kontoristoj, 12 medicinistoj, 4 krudlaboristoj, 5 terlaboristoj, 2 nutraĵistoj, 4 poŝtistoj, 3 ĵurnalistoj, 1 scienculo, 1 frizisto, 1 ledisto, 7 militistoj, 1 ĉarpentisto, 7 teknikistoj kaj 19 aliaj: *Mejdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 23 (49), p. 9.
2. „Al ĉiuj SEU-organizaĵoj", *Bjulleten' CK SÉSR* 6. 1927/28, p. 1-2.
3. *Bulteno de CK SEU* 6. 1927/28, p. 37.
4. Samloke; vd. ankaŭ R. Nikolskij, „Kontraŭ kalumnioj pri k-do Drezen", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 213.

tendencojn oportunistajn klasperfidajn de certaj eksterlandaj laboristgvidantoj". Drezen nomis la mondan situacion karakterizita „per ĉiuloka pliakrigo de la klasa interlukto", dum kiu „fariĝas sensencaj ĉiuj mezaj pozicioj". Krome, li ripetis, ke la membroj de SEU „laŭpove" forlasu „la malnovajn metodojn de individua korespondado" favore al „kolektiva grupa interkorespondado".[1] Kiom hardiĝis la pozicio de la gvidantoj, montris atakoj ankaŭ kontraŭ la „25%-a neŭtralismo", praktikata de tiuj SEU-anoj, kiuj „preferas kolekti poŝtmarkojn anstataŭ pritrakti sociajn temojn".[2] Ĝuste al tiaj interŝanĝemuloj direktiĝis la postulo estonte serioziĝi per kolektiva korespondado.[3]

La mencio de Drezen pri „akriĝo de klasbatalo" memorigas pri la politika fono, sen kies konsidero la ĉiam pli ordona tono, uzata de la gvidantoj de SEU ekde 1928, fakte ne estus komprenebla. Estis Stalin mem, kiu lanĉis la agitsloganon pri „akriĝinta klasbatalo" en ligo kun siaj du grandaj celoj: kolektivigo de la agrikulturo kaj rapida industriigo, kaj ĝi utilis al li malpli kiel rimedo por analizi veran situacion, ol kiel preteksto por pravigi senkompatan batalon kontraŭ ĉia opozicio al la efektivigo de tiuj celoj.

La 15a Kongreso de la Partio en Decembro 1927, kiu akceptis direktivojn por la ellaboro de Kvinjarplano cele al industria ekspansio, finiĝis per la forpelo de Trockij kaj aliaj „maldekstruloj", kiuj kontraŭstaris la stalinan programon pri la konstruado de socialismo en unu lando. Sekvis jam komence de 1928 la arestado kaj ekzilado de opoziciuloj, dum samtempe, kiam pro malbona rikolto en 1927 la ekonomia krizo atingis sian kulminon, la Partio rigore intervenis en la vivon de la kamparanoj, ordonante la konfiskadon de iliaj gren-provizoj.

Ke anonciĝis eĉ pli drastaj politikaj ŝanĝoj, iĝis evidente en marto 1928, kiam la sekreta polico asertis esti malkovrinta kontraŭrevolucian konspiron de „specialistoj" en la nordkaŭkaza

1. E. Drezen, „Nuntempa soci-politika situacio kaj la taskoj de SEU. Tezoj por IV-a Kongreso de SEU", *Bulteno de CK SEU* 6. 1927/28, p. 50.
2. *Bulteno de CK SEU* 6. 1927/28, p. 63.
3. N. Ŝumarin, „Kuda idet Ivanovo-Voznesensk?" (Kien iras Ivanovo-Voznesensk?), *Izvestija C.K. SESR* 6. 1928, p. 276-280. – La artikolo konstatis, ke kelkaj grupoj en la gubernio Ivanovo-Voznesensk „havas neseriozan internacian korespondadon nur por interŝanĝi ilustritajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn".

urbo Ŝaĥty. Ne nur sekvis publika proceso kaj mortverdiktoj, sed ankaŭ insistaj alvokoj por pli alta atentemo pri burĝaj specialistoj. Per tio la dekjara alianco inter la Partio kaj nekomunistaj fakuloj, karakteriza por la periodo de Nova Ekonomia Politiko, alproksimiĝis al sia fino.

Stalin en 1928 ne tuj atingis sian celon de solregado, ĉar moderuloj inter la partiaj gvidantoj, precipe Buĥarin, rezistis kontraŭ tro rapida industriigo kaj la akompana ekspluato de kamparanoj. En junio Kamenev kaj Zinov'ev estis reallasitaj kiel membroj de la Partio. Kaŝe, tamen, Stalin daŭre laboris por senkreditigi la moderulojn. Kiam en julio estis malfermita en Moskvo la Sesa Kongreso de Komintern, li postkulise intrigis kontraŭ Buĥarin, kiu estis la prezidanto de Komintern. La kongreso fine submetiĝis al Stalin, proklamante batalon kontraŭ ĉiuj dekstraj deviantoj kaj reformistoj en la komunistaj partioj kaj kontraŭ la socialdemokratoj. Per tio Komintern metis finon al sia unuecfronta devizo kaj krome anticipe legitimigis la pli fortan batalon kontraŭ dekstruloj en Soveta Unio mem, kiun Stalin preparis enmeze de disvastiĝanta atmosfero de politika teroro kontraŭ ĉiuj malsamopiniantoj.

En novembro 1928 Stalin prezentis al la Centra Komitato la teorian bazon de la estonta politiko. Li asertis, ke la venko de socialismo povos esti garantiita nur, se en la industria kaj ekonomia evoluo oni atingos kaj preterpasos la kapitalismajn landojn. Krome, ne eblos certigi la sekurecon kaj sendependecon de Soveta Unio sen la kreo de industria bazo por la nacia defendo. Tiu kurso trovis la aprobon de la Centra Komitato.

Ankoraŭ ne fidante la stabilecon de sia pozicio, Stalin intensigis la kampanjon kontraŭ ideologiaj deviantoj. Unue, li disbatis la restintajn „maldekstrulojn"; Trockij en januaro 1929 estis ekzilita el Soveta Unio. Sed por Stalin jam estis pli grave elimini ankaŭ la influon de Buĥarin kaj aliaj „dekstruloj". Meze de marto komenciĝis senbrida gazetara propagando kontraŭ la „dekstruloj" kaj entute kontraŭ ĉiaspecaj „malamikoj de la Partio". Por mutigi la opoziciulojn kaj por plene obeigi la popolon al siaj instrukcioj, la Partio kompletige al la propagando pri akriĝinta klasbatalo lanĉis la same disciplin-instigan tezon, ke ĉiam pli aktuala iĝas la danĝero de imperiisma milito kaj de surpriz-

atako kontraŭ Soveta Unio. La landon kvazaŭ ĉirkaŭis atmosfero de sieĝata fortikaĵo.

Ĉio ĉi okazis paralele kun la plifortiĝanta suferado de vastaj popolamasoj. En nordokcidenta Ruslando kaj en suda Ukrainio kamparanoj multnombre malsatmortis. Laboristoj estis submetitaj al severaj ordonoj kaj minacoj de puno, celantaj levi la „laboran disciplinon". Arestado iĝis amasa fenomeno, kiun homoj jam ne plu spertis nur pro politika devio, sed eĉ pro la nura aparteno al socia grupo.[1] En aprilo 1929 definitive estis akceptita la Kvinjarplano por la industriigo kaj la plano pri rapida kolektivigo. Finiĝis la kompromisa Nova Ekonomia Politiko, siatempe proklamita de Lenin, kaj komenciĝis nova etapo en la historio de Soveta Unio, kies nepridisputata mastro estis Stalin. Li nun povis per revolucio de supre konstrui la socialismon en unu lando.

Tia estis la interna politika situacio en Soveta Unio, kiu reflektiĝis en la agado de SEU ekde 1928. En posta ĉapitro ni klopodos priskribi pli detale, kiel SEU akordigis sin al tiu situacio. Sed unue ni ĉi-sekve esploru, kiamaniere evoluis ĝis la jaroj 1928/29 la rilatoj inter SEU kaj SAT. La demando, kiu precipe interesas nin, estas, ĉu la t.n. „akriĝo de klasbatalo" en Soveta Unio, kiu interne de SEU esprimiĝis per signoj de kreskanta maltoleremo kaj per severaj admonoj al la membraro, havis influon al la rilatoj inter la sovetaj esperantistoj kaj SAT.

4.1.7. *Diskuto pri programo de SAT*

Lanti, kiu en majo 1925 estis eksiĝinta el la Ekzekutiva Komitato de SAT, ĉefe por montri al la anarkiistoj, ke li „tute ne celas ian ajn personan diktatorecon"[2], en julio 1926 denove transprenis la redaktorecon de la revuo *Sennaciulo*.[3] Lia gvida principo

1. Fine de decembro 1929 Stalin postulis la likvidon de la tuta klaso de kulakoj.
2. Letero de Lanti al Demidjuk kaj Nekrasov, de 23-6-1925, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 81.
3. En septembro 1925 Barthelmess, kiu jam sub Lanti redaktis *Sennaciulon*, estis eksigita el la redaktora pozicio. La poste starigita naŭmembra redakci-komisiono en Leipzig celis pli ekvilibran reprezentiĝon de la diversaj tendencoj, sed jam en decembro ĝiaj du anarkiistaj membroj eksiĝis. La revuo tial restis ĉefe komunist-tendenca, kia ĝi estis dum la redakto

estis stiri la asocion tiel, ke neniu el la anoj de diversaj tendencoj de la socialisma movado, kunigitaj sub la tegmento de laborista Esperanto-organizaĵo, sentu sin diskriminaciata. Al socialistoj, komunistoj kaj aliaj partianoj estis rekomendite formi frakciojn, en kiuj ili faru, ekster la respondeco de SAT, sian partian laboron. En *Sennaciulo*, kontraŭe, polemikoj de la anoj de unu tendenco kontraŭ tiuj de alia tute ne havu lokon. Ke tiu principo ofte invitis al silento pri maljustaĵoj, aliaj ol tiuj de la kapitalisma sistemo, jam estis montrinta la kazo de Levandovskij kaj aliaj anarkiistoj. Sed Lanti nur tiamaniere esperis konservi la unuecon de SAT, kaj lian singardon, kiel ni vidis, ankaŭ Drezen subtenis en 1926.

Pro la sama kialo Lanti tre skeptike observis la provojn doni al SAT programon, ĉar tio riskus igi SAT simila al aliaj laboristaj organizaĵoj kaj malatenti ĝian specialan karakteron kiel „servaparato".[1] Sekve, kiam projekto de programo, prezentita en marto 1926, en lingvaĵo ĉefe komunisma difinis SAT „kiel organizaĵon de unueca proleta fronto kontraŭkapitalista"[2], ĝi tuj trovis la kontraŭstaron de Lanti[3], kaj la afero restis en pritrakto de komisiono.

Kiel montris la priprograma diskuto, Lanti ne hezitis bremsi la entrudiĝon de partiecaj tendencoj en SAT. Sed la komunistaj membroj de la asocio ne povis esti surprizitaj pro lia kritiko kontraŭ la program-projekto, ĉar ili sciis, ke li, eĉ kiel partiano, neniam estis tre aktiva komunisto. Ili konis lian konfeson, skribitan en 1923 pri la vojaĝo al Moskvo, ke li „ne kunportis el Rusio kuraĝigajn impresojn pri la efektivigebleco de l' komunismo, kiel teorie oni ĝin prezentas al si".[4] Kaj ankaŭ al Lanti estis klare, ke

---

de Barthelmess, kaj tio kredeble instigis Lanti zorgi, ke la revuo ekde julio 1926 estu presata kaj redaktata en Parizo. – En februaro 1928 denove Barthelmess iĝis redaktoro, nun konvertiĝinte al la nedogmeca sinteno de Lanti.

1. Letero de Lanti al Demidjuk kaj Nekrasov, de 23-6-1925, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 79.
2. „Projekto de programo", *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 26 (78), p. 6. – La projekton ellaboris Nekrasov kaj Laurat.
3. E. Lanty, „Pri frontunueco", *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-roj 41 (93) ĝis 44 (96).
4. E.L. „Tri semajnojn en Rusio", *Sennacieca Revuo* 4. 1922/23, n-ro 6 (36), p. 12.

minimume parto el la komunistaj membroj de SAT daŭre rigardis lin kun malfido. En persona letero li malkaŝis komence de 1925 la jenan observon: „... en Moskvo estas kelkaj ‚komunistoj', kiuj celas pere de S.E.U. kapti en siajn manojn la gvidadon de la esperanta movado laŭ internacia skalo. Kaj por tion fari ili ne preterlasas la okazon prezenti min kiel ne tre ortodoksan komuniston."[1] Tiamaniere ambaŭ flankoj bone konsciis pri siaj diverĝaj pozicioj, sed malgraŭ tio sukcesis konservi *modus vivendi* – aŭ eble pro tiu ĉi konscio des pli zorgis subordigi politik-ideologiajn diferencojn al la komune dezirata disvastigo de Esperanto.

Tamen, en aŭgusto 1928 (dum okazis en Moskvo la Sesa Kongreso de Komintern) unuafoje estis signoj de publika kunpuŝiĝo inter Lanti kaj Drezen. La estro de SEU en laborkunsido de la Oka Kongreso de SAT en Göteborg faris deklaron, kiu sonis minace:

> Mi povas diri tute klare: ni en Sovetio havas diktaturon lab-istan; tiel longe kiel SAT-movado helpas al pliklerigo de nia lab-istaro, ni partoprenas en SAT. Eble povas veni momento, kiam ni estos devigitaj foriri el SAT aŭ el SAT foriros ĉiuj alitendencanoj.

Drezen estis aparte furioza pro kelkaj neortodoksaj artikoloj de Lanti en *Sennaciulo*, aperintaj precipe en la rubriko „Inter ni"[2], en kiu Lanti per ofte ironia tono akcentis la specifan, „sennaciecan" karakteron de SAT kaj celis konsciigi al la membraro, ke ĝi „ne devas estis politika, sed eduka, kultura, informa organizo".[3] Malgraŭ sia kritiko kontraŭ la nesufiĉe klasbatalaj artikoloj de Lanti, Drezen konfirmis sian ligitecon al SAT, tuj aldonante, ke la momento de foriro „povas okazi nur, kiam ŝanĝiĝos la cirkonstancoj":

> Nun SAT havu politikon, por ke ni ĉiuj ne interpuŝiĝu, ĉar tio povas esti utila al neniu. Estas bone, se *Lanti* sukcesas trovi mezan vojon por ni ĉiuj, kun zigzagoj jen al unu flanko, jen al alia. Se estas tiel, ni dum kelkaj jaroj havu eblon iri kune. Por ni estas kara nia „S-ulo", kiu donas al ĉiuj bonajn informojn. Ni ne volas frakasi ĝin kun neklara

1. Letero al Martin Muribo, de 27-1-1925, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 59. – Muribo estis norvega anarkiisto, kiun Lanti klopodis konvinki, ke SAT ne estas regata de komunistoj.
2. Parte represitaj en *Vortoj de kamarado E. Lanti*, Leipzig 1931 (represo Laroque Timbaut 1979).
3. Tiel la klarigo de Lanti: *Protokolaro de la VIII-a Kongreso en Göteborg (Svedio), 14.-18. aŭgusto 1928*, Leipzig 1928, p. 24.

espero pri io, kio eble estus por ni pli agrabla. Ni starigu unuecan fronton almenaŭ en tiuj medioj, kie tio estas ebla en kultura laborkampo.[1]

Drezen ankaŭ ne kontraŭstaris proponon de Lanti pri kompletigo de la statuto de SAT per redifino de ĝiaj celoj, kiu implicite estis direktita kontraŭ la pravemo de komunistoj. La kongreso akceptis aldonon al la unua paragrafo de la statuto, laŭ kiu SAT atendas de siaj membroj komprenemon kaj toleremon rilate al la diversaj klasbatalaj movadoj: „... per komparo de faktoj kaj ideoj, per libera diskutado ĝi celas malebligi ĉe siaj membroj la *dogmiĝon* de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj."[2] Tiu ĉi punkto estis por Lanti aparte grava, kaj li kontentis pri ĝia senproblema akceptiĝo. Post la kongreso li tial esprimis sin fidoplena, „ke la SAT-aneca sento superregas la disigajn fortojn en la kadro de nia Asocio".[3]

Sed pri la programo la plua diskuto montris daŭrantan malakordon. En Göteborg Lanti estis nominta ankaŭ la reviziitan program-projekton neakceptebla, ĉar ĝi „ne ebligas al anoj de ĉiuj lab. organizoj aliĝi al SAT"; li malkaŝis sian opinion, ke prefere oni eble entute ne havu programon. Ankaŭ Drezen je tiu okazo konsentis, ke la projekto bezonas prilaboron.[4] Sed kiam en la kongresa protokolo aperis kritikaj rimarkoj de Lanti pri la projekto, kiuj egalis ĝian plenan kondamnon, venis forta reago de Drezen. Li nun nete kulpigis la Direkcion[5] de SAT pri „reviziado de la SAT-idearo".[6] Tiu atako de Drezen estis farita evidente malpli por defendi la projekton de programo mem, ol por refuti la argumentojn, kiujn Lanti estis uzinta por kondamni ĝin; ĉar la projekto grandparte estis komunist-tendenca, Lanti neeviteble estis kontraŭargumentinta en maniero, kiu provokis la komunistojn. Sekve, Drezen sentis sin devigita akre rebati la komentojn de Lanti.[7]

1. *Protokolaro ... Göteborg*, p. 25.
2. *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 293; *Protokolaro ... Göteborg*, p. 38.
3. E. Lanti, „El la urbo de nia VIII-a", *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 395.
4. *Protokolaro ... Göteborg*, p. 47. – La teksto de la nova projekto estas publikigita, kune kun la komentoj de Lanti, samloke, p. 53-63.
5. La Direkcion konsistigis la afergvidantaj membroj de la Ekzekutiva Komitato de SAT, loĝantaj en la sideja urbo (Parizo).
6. „Pri programo kaj pri senprogrameco" (letero de Drezen k.a.), *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 115-116.
7. En poŝtkarto al Lanti, de 15-12-1928, Drezen varbis por kompreno, ke li

Kvankam Drezen, ĝuste taksante la danĝeron de plua partipolitika polemiko, jam en marto 1929 proponis ĉesigon de la debato pri programo, ĉar „pli valoras la praktika laboro"[1], lia kritiko kontraŭ Lanti, precipe la akuzo pri „reviziado", ne povis esti ignorata. En majo 1929 la direkcio de SAT respondis al Drezen per longa deklaro, kiu, inversigante la lancon, akuzis la ĝeneralan sekretarion de SEU kiel „ĉefrevizianton", ĉar li aspiras transformi la superpartian SAT en unuecfrontan organizaĵon laŭ la proponoj de Komintern. La deklaro finiĝis per averto al la „reviziemuloj", ke, se per sia agado ili okazigos skismon en SAT, „ili portu antaŭ la Historio plenan respondecon pro tiu krimo kontraŭ la veraj interesoj de l' Proletaro".[2] En junio la CK de SEU respondis al la Direkcio per letero, kiu defendis la starpunkton de Drezen kaj protestis kontraŭ la suspekto, ke iuj sovetaj membroj provas estigi skismon en SAT. Sed la letero ne ripetis la akuzon pri „reviziado" kaj entute estis verkita en surprize milda tono.[3]

Kiom ajn ambaŭ flankoj klopodis zorgi, ke la disputo ne eskaladu, je tiu tempo jam aldoniĝis plia signo, ke paralele kun la kreskinta sentemo de la komunistoj malkreskis ankaŭ la sinretenemo de Lanti. Fine de 1928 SAT estis publikiginta broŝuron, kiu portis la titolon *La laborista esperantismo*. La aŭtoro de la broŝuro estis Lanti, kaj en la antaŭparolo li, kiu antaŭe ĝuste kontraŭ programo de SAT estis avertinta, nomis sian verketon „kvazaŭa programo" por la SAT-anoj.[4]

Tiu ĉi karakterizo de la broŝuro kaj la fakto, ke Lanti en ĝi eksplikis sian specifan interpreton de „sennaciismo"[5], trovis malaprobon ĉe la CK de SEU, kiu en sia menciita letero de junio 1929 nomis la broŝuron plia pruvo, ke Lanti, misuzante sian aŭtoritaton, propagandas en SAT siajn proprajn ideojn, kiuj por la

devis tiel reagi, konsidere al la enlanda situacio. En responda letero, de 25-11-1928, Lanti siavice petis, ke „oni estu pli justa kontraŭ mi en Moskvo". Sed en letero al Demidjuk (de 4-2-1929) Lanti skribis, ke li ne dubas pri tio, ke Drezen „jam preparas la grundon" por skismo.

1. Letero de Drezen, de 18-3-1929, *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 266.
2. „Deklaro de la SAT-Direkcio", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 309-310, 322-323.
3. *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 397. – Ankaŭ la Direkcio mildiĝis: „Se en tiu nia rebato ni tro forte ĵetis sagojn k se iuj mistrafis, ni tion sincere bedaŭras."
4. E. Lanti, *La laborista esperantismo*, Leipzig, Paris 1928, p. 3.
5. Por detaloj pri la enhavo de la broŝuro vd. sube p. 259-261.

anoj de almenaŭ unu tendenco – la komunista – ne estas akceptebla j. Sekve, Drezen lanĉis en Leipzig, dum la Naŭa Kongreso de SAT, novan ofensivon kontraŭ la Direkcio. Permesinte la publikigon de la broŝuro, ĝi faris, laŭ li, „pekojn aŭ krimojn ... kontraŭ la revolucia tradicio". Kvankam li ne proponis eksigon de Lanti el la gvidado de la revuo, li postulis, ke la Direkcio transiru de Parizo al germana urbo, kie ĝiaj anoj „estu pli ligitaj kun la amaso".[1] Denove ekaperis la nuboj de skismo, sed, surprize, Drezen jam la postan tagon, rimarkinte la kontraŭstaron, rezignis sian postulon pri ŝanĝo de la Direkcio, admonante nur, ke la erarintoj „ne ripetu siajn erarojn". En emociplena parolado li deklaris, ke al li, kiu dum 22 jaroj „estis pli malbona komunisto ol bona esperantisto"[2], la danĝero de disfalo kaŭzas sentojn de doloro: „Tial mi serĉas mezan vojon, por gardi la unuecon. Ni malplej celas komunistigi SAT."[3]

Ankoraŭfoje estis trovita kompromiso: La kongresa rezolucio de Leipzig esprimis fidon al la Direkcio kaj notis ties konfeson, ke la *maniero*, laŭ kiu eldoniĝis *La laborista esperantisto*, estis „mispaŝo". Ĝi deklaris la program-komisionon dissolvita kaj krome ŝovis la kulpon pri miskomprenoj en la priprograma diskuto ĉefe al „la fordetruenda kapitalisma sistemo, kiu nuntempe malebligas normalajn kaj liberajn kontaktojn de la larĝaj amasoj el Sovetio kun la proletaro de la kapitalismaj landoj".[4]

Lanti faris post la kongreso optimisman bilancon, skribante ke la rezolucio revenigis SAT „al pura, sana stato". Li hipotezis, kredeble pensante ankaŭ pri la vortoj de Drezen, ke la evito de skismo eble ŝuldiĝis al tio, „ke ni ĉiuj, pli malpli konscie, estas unue esperantistoj kaj nur due partianoj".[5]

---

1. „Protokolaro de la 9-a SAT-Kongreso, 4.-10. aŭgusto 1929 en Leipzig", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 491.
2. Pro tiu deklaro Drezen estis kritikita de membroj de la Komunista Frakcio, kiuj ankaŭ riproĉis lin pro „interkisado" kun Lanti. Drezen poste asertis, ke la protokolo falsis liajn vortojn. Vd. Jakov Vlasov, „Pli da klasbatalemo en nian laboron", *Kunligilo* 1. 1929/30, n-ro 1 (nov. 1929), p. 4.
3. „Protokolaro", p. 495.
4. „Protokolaro", p. 497.
5. E.L., „Postkongresaj pripensoj", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 469. – Kelkajn jarojn poste, en oktobro 1936, Lanti rakontis (en letero al siaj parizaj kamaradoj), ke post la surpriza cedo de Drezen en Leipzig Demidjuk konfesis al li: „Nu vian politikan linion *ni devas* ja kontraŭbatali, sed

Ne povas esti dubo, ke Drezen ankoraŭ en Leipzig opiniis skismon en SAT evitebla. Lia tuta sinteno montris, ke li estis tre fleksebla, jen energie defendante tion, kio laŭ komunista kompreno estis la ĝusta klasbatala linio, jen tuj cedante, kiam la elstarigo de la komunista pozicio minacis tuŝi la bazan interkonsenton pri la unueca karaktero de SAT. Sed same ne estis pretervideble, ke la interna situacio en Soveta Unio pli kaj pli malvastigis la manovro-kapablon de SEU. En Soveta Unio ŝanĝiĝis la cirkonstancoj, de kiuj – laŭ la diro de Drezen en Göteborg – dependis, ĉu SEU povos resti en SAT. La demando estis, kiel longe ankoraŭ eblos konservi la kontraŭdiron inter la kondamno de „mezaj pozicioj", direktita de Drezen al la membroj de SEU en 1928, kaj lia subteno de „meza vojo" por SAT, proklamita en Leipzig.

4.2. *SKISMO EN SAT KAJ PEREO DE LA SOVETA MOVADO*

4.2.1. *La agado de SEU inter subteno kaj suspekto*

Revenante al la evoluo de la Esperanto-movado en Soveta Unio, ni disponas pri multaj faktoj, kiuj permesas la konkludon, ke ĝi troviĝis en prospera stato fine de la 1920aj jaroj. La korespondaj rilatoj inter sovetaj kaj eksterlandaj esperantistoj atingis imponajn ciferojn. Dum ok monatoj la esperantistoj de Sebastopolo ricevis 500 leterojn el 20 landoj[1], iliaj kolegoj en Kurgan dum 17 monatoj ricevis 696 leterojn el 23 landoj kaj mem sendis 938 korespondaĵojn.[2] En Irkutsk, kie la komitato de junkomunistoj rekomendis al siaj ĉeloj lerni fremdajn lingvojn cele al internacia edukiĝo, nomante Esperanton unualoke, la korespondado kun eksterlando ampleksis jare ĉ. 500 sendaĵojn.[3] Oni

ni ne povas fari tion tre akre, tial ke en la fundo de nia koro ni estas unue esp-istoj". Lanti aldonis sian impreson, ke tio validis ankaŭ por Drezen: *Leteroj de E. Lanti*, p. 129.

1. I. Lisičnik, „Zavoevyvaem massy" (Ni almilitas la amasojn), *Izvestija C.K. SESR* 6. 1928, p. 74.
2. „696 korrespondencii iz 23 stran" (696 korespondaĵoj el 23 landoj), *Izvestija C.K. SESR* 6. 1928, p. 145.
3. M. Krjukov, „Esperanta movado en Irkutsk", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 106-107.

rimarkis kreskantan pretecon de redakcioj publikigi materialojn ricevitajn per tiu korespondado. Ili aperis regule en pli ol 10% de la soveta gazetaro.[1] En 29 periodaĵoj de Moskvo dum duona jaro aperis 82 korespondaĵoj, tradukitaj el Esperanto[2], kaj en Kurgan el 481 leteroj ricevitaj dum unu jaro 86 aperis en ĵurnaloj aŭ murgazetoj.[3] De la materialo el eksterlando, kiu dum la vintro 1928/29 aperis en la fabrikaj gazetoj de la leningrada urboparto Volodarskij, 95% havis esperantlingvan originon.[4] La revuoj de SEU regule raportis pri surlokaj spertoj en la koresponda agado, donante konsilojn al siaj membroj, „kiel per lerta uzado de peresperanta korespondado oni povas en ĉiu redakcio trabori indiferentecon kaj eĉ kontraŭstaron rilate al esperanto".[5] Redakcioj, kiuj preferis utiligi naciajn lingvojn por la korespondado, estis kritikataj pro malŝparo de mono, ĉar anstataŭ uzi la servon de Esperanto ili elspezas grandajn sumojn por tradukantoj.[6] La esperantistoj argumentis ankaŭ, ke ilia materialo estas pli aŭtentika, ol tiu, kiun gazetoj ricevas el eksterlando pere de „transdonaj instancoj".[7]

Ŝuldiĝis precipe al tiu senlaca utiligo de Esperanto en la internaci-koresponda laboro, ke SEU renkontis pli ofte favoran sintenon al sia agado flanke de organizaĵoj aŭ influaj personoj. Komence de 1928, ekzemple, la gazetara fako de la Komunista Partio en Belorusio aprobe atentigis pri la sukcesa agado de la Esperanto-korespondantoj en Minsk.[8] Tiujare la sovetaj labor-

1. „Rezolucio pri internacia korespondado" (de la Kvara SEU-Kongreso), *Bulteno de CK SEU* 6. 1927/28, p. 101.
2. N. Incertov, „Al novaj venkoj", *Bulteno de CK SEU* 6. 1927/28, p. 74.
3. V. Sokolov, B. Zyrjanov, „God raboty Kurganskogo ‚Narkomindela'" (Unujara laboro de Kurgana Narkomindel [Popolkomisararo por eksterlandaj aferoj]), *Izvestija C.K. SĖSR* 6. 1928, p. 17.
4. P. Lisicin, „Batalo sur la lingva kampo", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 400-401.
5. P. Kirjušin, „Ot ‚principial'nogo nesoglasija' – k polnoj pobede" (De „principa malkonsento" – al plena venko), *Izvestija C.K. SĖSR* 6. 1928, p.19.
6. Baranov, „Vot poprobujte perelomit' uprjamstvo redakcii" (Jen ekprovu rompi la obstinecon de redakcioj), *Izvestija C.K. SĖSR* 6. 1928, p. 141.
7. Lisicin, „Batalo...", p. 400-401. – P. Kirjušin, *Meĵdunarodnaja rabočaja svjaz'*, p. 24.
8. *Izvestija C.K. SĖSR* 6. 1928, p. 175-176; kp. Lwunin, „Zum Briefwechsel..." p. 1020.

Novaj lernantoj de Esperanto en la Pola Pedagogia Teknikumo de Minsk (1927).

Anoj de Esperanto-grupo en Lipeck, Tambova gubernio (1927/28).

istoj estis oficiale alvokitaj lerni fremdajn lingvojn por povi pli intime ligiĝi kun eksterlandanoj; SEU reagis je tio argumentante, ke Esperanto estas la plej facile lernebla lingvo kaj krome helpas la lernadon de fremdaj naciaj lingvoj.[1] Efikoj ne mankis. En aŭgusto 1929 la Centra Komitato de Ukraina Komsomolo, jam pli frue agnoskinte la servojn de junaj komunistaj esperantistoj sur la kampo de internacia korepondado, laŭdis la „plenan taŭgecon" de Esperanto precipe por la interkompreniĝo de diverslandaj junaj laboristoj kaj insiste rekomendis al siaj membroj la lernadon kaj uzadon de la lingvo.[2] Ĉirkaŭ la sama tempo konata verkisto kaj kultura aktivulo, Jurij Larin, ligis la nuntempan utilon de Esperanto kun la bezonoj de internacia komunikado en la epoko post la monda revolucio:

> Ekmastri en unu fojo plurajn fremdajn lingvojn nia laboristo ne povas. Sed estas necese havi la eblon komuniki kun eksterlandaj kamaradoj, kompreni ilin. Ja tiuj, kiuj nun eniras lernejojn, estos plenkreskuloj post la venko de la proleta revolucio en la resto de Eŭropo, kiam vojaĝoj al eksterlando (kaj la alveno de eksterlandanoj al ni) fariĝos ĉiutagaj kaj amasaj. Se estas malfacile ellerni ĉiujn lingvojn, estas do facile ellerni la ununuran Esperanton ... Jam nun oni povas travojaĝi ĉiujn ĉefajn landojn de Eŭropo kaj interrilati kun la tieaj laboristoj sciante nur Esperanton. ... Se en niaj duagradaj lernejoj oni enkondukus la instruadon de la lingvo Esperanto, tio forte antaŭenpuŝus la pluan konatiĝon kun ĝi kaj kun eksterlandaj laboristoj...[3]

Organize, SEU registris kreskadon „en grado preskaŭ katastrofa". En majo 1928 la Centra Komitato kalkulis, ke jam la dua dekmilo da homoj „estas tirita en niajn rondetojn kaj grupojn". La aktivaj membroj de SEU (kiuj abonis la revuojn) tiutempe estis 3500. Sole dum duona jaro estis venditaj lernolibroj en 35 000 ekzempleroj.[4] Kvankam tiuj atingoj ankoraŭ ne kontenti-

1. EdE, p. 591.
2. Dneprano, „La junkomunistaro de Ukrainio lernos kaj aplikos Esperanton", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 545; „Esperanto v ocenke Komsomola Ukrainy" (Esperanto en la pritakso de la Komsomolo de Ukrainio), *Mejdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 278-280. – Vd. ankaŭ V. Kolčinskij, „Esperanto v internacional'noj rabote Komsomola Ukrainy" (Esperanto en internacia laboro de la Komsomolo de Ukrainio), *Mejdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 39-43.
3. Ju. Larin, „Boevye voprosy narodnogo obrazovanija" (Bataltaskoj de la popola klerigo), *Revoljucija i kul'tura* 3. 1929, n-ro 14 (jul.), p. 14-15; kp. *Mejdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 283, kaj *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 10-11.
4. „Ni bezonas disciplinon, devokonscion kaj memkritikon", *Bulteno de CK SEU* 6. 1927/28, p. 65.

gis SEU kaj ĝi ofte riproĉis al siaj lokaj grupoj organizajn mankojn, la publika interesiĝo pri Esperanto ŝajnis sufiĉe granda por rigardi al la estonteco kun optimismo.

Komence de la Kvinjarplano, dum kiu estis entuziasme glorata la heroeco de la soveta laboristo, por SEU estis aparte grave progresi ankaŭ rilate sian proklamitan celon altigi la procentaĵon de laboristoj en la membraro. El la lokoj venis al la centro raportoj pri sukcesoj en plenumo de la plano: Jen Sebastopolo informis, ke la procentaĵo de laboristoj kreskis de 7,6 al 22,9[1]; jen en la gubernio Moskvo ĝi grimpis de 18 al 23.[2] Sed tio ankoraŭ ne sufiĉis, kaj SEU daŭrigis siajn fortostreĉojn por pligrandigo de la laborista kerno en la soveta Esperanto-movado, des pli ĉar ĝian konscion pri la urĝeco de tiu tasko akcelis la sperto, ke ĝuste la gvidantoj de la oficiala laborist-koresponda movado montris malinklinon al vasta apliko de Esperanto. Iliaj rezervoj fontis el antaŭjuĝoj kontraŭ artefarita lingvo, sed ricevis plian, gravan nutraĵon per la observo, ke la socia konsisto de ĝiaj uzantoj ne estis sufiĉe proleteca. Krome, la materialo publikigita en gazetoj surbaze de Esperantaj korespondaĵoj ne ĉiam ŝajnis konformi al la ideologiaj reguloj.

En novembro 1928 la organo de la laboristaj kaj kamparanaj korespondantoj, *Raboče-krest'janskij korrespondent*, publike traktis la demandon de la apliko de Esperanto. En ĝi aperis artikolo, kiun verkis neniu alia ol la fratino de Lenin, Maria Ul'janova, la respondeca redaktorino de la revuo. Ŝi nete deklaris, ke Esperanto, kvankam oni dankas al ĝi kelkajn rezultojn en la organizado de internacia interligo, pro sia nesufiĉa esprimpovo kaj limigita disvastigiteco ne havas estontecon – „malgraŭ laŭdaj himnoj de siaj adeptoj", ke laboristo prefere lernu fremdan nacian lingvon kaj ke ekzistas okazoj, kiam „oni uzas esperanton malutile por Sovetio".[3] Tiun lastan punkton ankoraŭ pli draste elstarigis alia aŭtoro en la sekvanta numero de la revuo:

> Oni havas faktojn, kiuj konfirmas, ke esperanton uzas malamikoj de l' laborista klaso por disvastigo de mensogoj kaj nekredindaj informoj

1. *Bulteno de CK SEU* 6. 1927/28, p. 42.
2. Samloke, p. 52.
3. M.I. Ul'janova, „Protiv iskusstvennogo meĵdunarodnogo jazyka" (Kontraŭ artefarita internacia lingvo), *Raboče-krest'janskij korrespondent* 1928, n-ro 21 (15 nov.); eltiraĵoj trad. en *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 134.

pri la situacio de l' laboristaro en USSR kaj en kapitalistaj landoj. Necesas ankoraŭ aldoni, ke esperanto en eksterlando estas pli disvastigita inter etburĝaro, en medio de diversaj oficistoj, komercistoj kaj burokratoj, en tiu de personoj, kiuj estas malamike agorditaj al ĉio revoluciema. Estas superflue paroli pri tio, kiel tiaspecaj homoj utiligas eblon dank' al esperanto de libera interligo kun la laboristaro en Sovetio. Al tio jam delonge necesas direkti atenton.[1]

Estas notinde, ke tiu averto pri misuzo de Esperanto estis publikigita nur kvar monatojn, post kiam la CK de SEU mem, en letero al *Sennaciulo*, estis konfesinta, ke „neŭtralaj esperantistoj" disvastigis eksterlanden „mensogajn sciigojn" pri la politika situacio en Soveta Unio.

La atakoj de *Raboče-krest'janskij korrespondent* okazis ĵus antaŭ la Kvara Konferenco de Laboristaj kaj Kamparanaj Korespondantoj en Moskvo (28a de novembro ĝis 7a de decembro 1928). Sur ĝia tagordo troviĝis ankaŭ la uzo de Esperanto en la internacia laborista interligo. Projekto de rezolucio, submetita al la konferenco, entenis la aserton, ke la Esperanto-movado estas etburĝa. Krome, la esperantistoj estis kulpigitaj pro troa fanfaronemo pri siaj atingoj. Dum la diskuto tamen elpaŝis ankaŭ multaj defendantoj de Esperanto, tiel ke el la rezoluciprojekto fine estis forstrekita la frazo pri etburĝeco de la Esperanto-movado kaj anstataŭigita per la rekomendo utiligi por la korespondado paralele al naciaj lingvoj ankaŭ Esperanton.[2]

Simile, malgraŭ la eksplicita malrekomendo de la sekretario de la Tutsoveta Komsomolo, Lazar Ŝackin[3], lerni Esperanton, la Oka Kongreso de Komsomolo en majo 1928, dank' al persistaj pledoj de multaj delegitoj, akceptis rezolucion, laŭ kiu Esperanto-organizaĵoj „devas esti utiligataj por la internacia ligo".[4] Ambaŭ eventoj montris do, ke estis eble limigi la influon de gvidantoj malamikaj al Esperanto – ne nur per desuba premo, pri kiu SEU aparte fieris[5], sed ankaŭ pro la fakto, ke en la superaj in-

1. V. Fin, (Al vojo de interligo), *Raboče-krest'janskij korrespondent* 1928, n-ro 22 (30 nov.); eltiraĵoj samloke, p. 134.
2. *Bulteno de CK SEU* 1929, p. 9, 20, 33.
3. Ŝackin, nask. 1902, estis eksigita el la Partio en 1935 kaj mortis en malliberejo en 1937.
4. G. Demidjuk, „Jes, de malsupre kaj per praktikado", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 245. – Vd. ankaŭ: G. Dem:, „Pod natiskom molodnjaka" (Sub atako de la idaro), *Izvestija C.K. SESR* 6. 1928, p. 165-171; „Komsomol i ėsperanto", *Mejdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 53-54, 56.
5. Vd. ankaŭ: N. Incertov, „Snizu vverh, a zatem vsir' i vglub'. Opyt siste-

stancoj ne regis unueca opinio rilate la Esperanto-movadon. En Komsomolo, ekzemple, la starpunkton de Ŝackin kontraŭpezis la varma subteno de ukrainaj funkciuloj kaj de aliaj, kiuj agnoskis la potencialon de Esperanto kaj rekomendis al la junkomunistoj atenti „tiun ĉi vastan volontulan movadon, kiu estiĝis spontane, sen ajna premo de supre".[1] Reprezentanto de la distrikta parti-komitato de Vladivostok en marto 1929 nomis „malsana", ke loka lernejo korespondas angle kun burĝaj lernantoj en Usono, kaj rekomendis: „Niaj lernantoj devas korespondi kun infanoj de alilandaj proletoj, kaj tion povas helpi esperanto."[2] Redakcioj, kiuj komence preferis organizi korespondadon en naciaj lingvoj, devis konstati, ke per Esperanto estas ricevata pli da utiligebla materialo el eksterlando.[3]

Aliflanke, ke ĝuste la gvidantoj de la laborist-koresponda movado kontraŭis Esperanton, sendube ĝenis la agadon de SEU. Al gubernia ĵurnalo la redakcio de *Pravda* sendis el Moskvo admonan leteron pro la misuzo de papero per pritrakto de Esperanto.[4] Sekve, okazis, ke gazetoj aperigis materialon ricevitan de esperantistoj sen indiko pri la fontolingvo aŭ kun sindistanciga noto, montranta al la oficiala pozicio, ke en interligoj prefere estu uzata la gepatra lingvo de eksterlandaj laboristoj[5] – aŭ ke ili entute rifuzis aperigi ĝin. La revuo *Raboče-krest'janskij korrespondent* ne ĉesis riproĉi la esperantistojn pro aplomba agado kaj kritiki gazetojn, „precipe en la provinco", ke ili tro abunde aperigas leterojn tradukitajn el Esperanto. La propagando de Esperanto kiel ilo de interproksimigo de la laboristaj amasoj estis nomata „la plej malutila formo de ŝmirado (= mis-klarigado) pri klasbatalo"; uzi anstataŭ naciaj lingvoj la artefaritan Esperanton

matiĉeskoj propagandy" (De malsupre supren, kaj poste laŭlarĝe kaj profunden. Sperto de sistema propagando), *Izvestija C.K. SĖSR* 6. 1928, p. 292-297. – Priskribo, kiel oni atingis aplikon de Esperanto fare de Tutsovetia Ateista Unio.

1. Demidjuk, „Jes, de malsupre...", p. 245. – Tiel esprimis sin Kaplan, reprezentanto de la CK de Komsomolo, ĉe konferenco de esperantistaj junkomunistoj en Moskvo (februaro 1929).
2. *Bulteno de CK SEU* 1929, p. 123.
3. Samloke, p. 116.
4. Samloke, p. 117.
5. Samloke, p. 55.

signifas „en plej bona okazo agitadi por margarino anstataŭ butero".[1] Por dokumenti, ke la korespondado per Esperanto kondukas al dubindaj rezultoj, eĉ al „politike malutilaj sensencaĵoj", la revuo citis el diversaj provincaj gazetoj kontribuaĵojn, kiujn ĝi trovis nebezonaj, malseriozaj, naivaj aŭ simple danĝeraj – kiel la leteron de germana esperantisto, kiu plendis, ke la socialistaj kaj komunistaj partioj okaze pli multe batalas inter si, ol kontraŭ la burĝaro.[2] Iu ĵurnalisto bazis sian kritikon kontraŭ la esperantistoj sur la konstato, ke en laboristaj Esperanto-gazetoj amase troviĝas anoncoj de filatelistoj aŭ eĉ de edzin-serĉantoj.[3]

Sekve, *Meĵdunarodnyj jazyk*, la monata teoria organo de SEU, tra la jaro 1929 dediĉis multe da spaco al klopodoj refuti precipe la kulpigon, ke la sovetaj esperantistoj korespondas kun eksterlandaj etburĝoj. Konsentante, ke la Esperanto-movado en aliaj landoj havas etburĝajn restaĵojn, ĝi atentigis, ke la korespondantoj preskaŭ senescepte apartenas al la laborista klaso.[4] Pruvcele estis prezentita la persona fono de kelkaj el tiuj korespondantoj, kaj ankaŭ estis donitaj citaĵoj el iliaj leteroj, laŭ kiuj la eksterlandaj amikoj brulas pro scivolo pri la atingoj de Soveta Unio, entuziasme apogas la batalon kontraŭ kulakoj kaj dekstraj deviantoj aŭ konfesas, ke, foje ŝanceliĝinte per misprezentoj de klasmalamikoj, ili retrovis sian revolucian ekvilibron dank' al la konvinkaj klarigoj de siaj sovetaj korespondantoj.[5] Alia artikolo, citante el leteroj de aŭskultantoj, celis montri, kiom efikas la esperantlingvaj elsendoj de Radio Komintern en Moskvo por

1. D. Iĥok, „Za ili protiv esperanto?" (Ĉu por aŭ kontraŭ Esperanto?), *Raboče-krest'janskij korrespondent* 1929, n-ro 7/8 (apr.); eltiraĵoj trad. en *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 353.
2. I. Ėl'vin, „Protiv ĥaltury i bezgramotnosti v meĵdunarodnoj svjazi" (Kontraŭ fuŝado kaj analfabeteco en la internaciaj ligoj), *Raboče-krest'janskij korrespondent* 1929, n-ro 15 (aŭg.); represita en *Meĵdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 253-255. – Vd. ankaŭ *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 98.
3. P. Tilin, „Filatelismo, bagatelismo kaj lab. esp. propagando", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 412.
4. P. Kirjuŝin, „Kto nom pišet iz-za granicy?" (Kiu skribas al ni el eksterlando?), *Meĵdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 82-83.
5. I. Lisičnik, „Naši zarubežnye korrespondenty" (Niaj eksterlandaj korespondantoj), *Meĵdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 84-87; P. Kirjuŝin, „Moi zagraničnye ‚sobkory'" (Miaj eksterlandaj „propraj korespondantoj"), *Meĵdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 149-151.

kreskigi la sentojn de solidareco kaj simpatio de eksterlandaj laboristoj al Soveta Unio.[1]

La sindefendojn kompletigis admonoj al la membroj. Kian celon havis la kampanjo por „laboristigo" de la soveta movado, montris la klarigo, ke „nur tiam ĝi estos ideologie pura".[2] Simile, la provoj de SEU mobilizi siajn membrojn al kolektiva korespondado intensiĝis pro la timo, ke ili, donante troan atenton al privata, individua interŝanĝo de leteroj, sentas sin „kiel iun apartan kaston" kaj ne „unu el branĉoj de la ĝenerala laborist-kamparan-korespondanta movado".[3] La fakto, ke la menciita Kvara Konferenco de Laboristaj kaj Kamparanaj Korespondantoj oficiale decidis doni al la kolektiva korespondado pli grandan atenton[4], ankoraŭ pligravigis la tiurilatajn klopodojn de SEU.

Tio ĉi kondukas al la demando, ĝis kiu grado esperantistoj en eksterlando, de kies kunlaboro fine dependis sukceso, emis partopreni en la novtipa kolektiva korespondado. Ĉu ili pretis sekvi la vojon, kiun iri diktis al SEU la aktualaj bezonoj en Soveta Unio?

La jaro 1929 montris ankaŭ flanke de la ekstersovetaj SAT-anoj ŝanĝiĝantan sintenon al la korespondado. En januaro Ida Lisiĉnik, unu el la plej aktivaj organizantoj de korespondado en SEU, turnis sin al la legantoj de *Sennaciulo* per apelacio: Ŝi alvokis la SAT-anojn plikonsciiĝi pri la „socia signifo" de korespondado kaj speciale instigis ilin pli aktive strebi al la interligiĝo de samprofesiuloj, laborejoj, partiaj ĉeloj, redakcioj k.s. de diversaj landoj. Por substreki sian pledon ŝi atentigis, ke en ŝia urbo, Sebastopolo, la junkomunistoj „deziregas" korespondi, sed ke *Sennaciulo* ne disponigas al ili sufiĉe da adresoj de partneroj konformaj laŭ aĝo kaj profesio.[5] Unu monaton poste Barthelmess respondis la alvokon de Ida Lisiĉnik. Li principe subtenis ĝin,

1. N. Modenov, „Razve my mojem ubivat' sovetskih tovariŝĉej?" (Ĉu ni povas mortigi sovetiajn kamaradojn?), *Mejdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 91-93.
2. H. Ponjatovski, „Nian SAT-movadon devas konsistigi pure laboristaj elementoj", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 510.
3. „Rezolucio pri internacia korespondado", *Bulteno de CK SEU* 6. 1928, p. 101.
4. Lwunin, „Zum Briefwechsel...", p. 1026.
5. Ida Lisiĉnik, „Aktuala problemo", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 154.

ankaŭ la ideon pri la interligo de kolektivoj, sed samtempe nomis du gravajn barojn, kiuj „tujan solvon praktike malebligas". Unu estas la ĝenerala fendo, ekzistanta inter la korespond-proponoj el Soveta Unio kaj la korespond-respondoj el la cetera mondo. La alia baro, kiu kontraŭstaras vastigon de la korespondaj rilatoj, fontas el sovetaj propraĵoj:

> Ni ofte povis rimarki, ke sovetiaj leterskribantoj kontentiĝas per adresado de agitvortoj kaj laŭskema, seka pritrakto de organizaj temoj al la eksterlandaj K-doj. Sovetiaj junk-doj pripensu, ke la spiritostato de multaj junaj K-doj alilandaj formiĝas en medio tute fremda al la sovetia mondo kaj ke, por trovi la intiman kontakton kun ili, oni ne devas komenci per priskribo de organiza aŭ partia laboro, sed per rakonto pri vivkondiĉoj individuaj kaj kolektivaj en laborejo, klubo kaj familio.[1]

Tiaj admonoj ĝis tiam aŭ ne necesis aŭ estis retenitaj. Ili sendube baziĝis sur aktualaj impresoj, sed en la momento de publikigo jam estis iusence anakronismaj. Barthelmess kredeble ne konsciis, ke, subtenante kolektivan korespondadon kaj pledante por malpli da agitvortoj, li celis du aferojn, kiuj reciproke sin eksludis: La invito al la sovetaj esperantistoj, ke en siaj leteroj ili klopodu adapti sin al la „spiritostato" de alilandanoj kaj ne rezignu priskribi sian privatan sferon kaj esprimi personajn sentojn, sendube estis adresitaj al homoj, kies pensmaniero ne esence diferencis de loĝantoj en la cetera mondo. Sed la novstila kolektiva korespondado, kia ĝin propagandis SEU sub la kondiĉoj de „akriginta klasbatalo", ĝuste celis subordigi la nekalkuleblan riskon de individueco. El eksterlando ĝi bezonis unuavice tiajn korespondaĵojn, kiuj harmoniis kun la redakta politiko de la soveta gazetaro kaj atestis la utilon de Esperanto por la havigo de bonvenaj informoj. Analoge, al eksterlando fluu leteroj, en kiuj la sovetaj esperantistoj fidinde raportu la atingojn de la socialisma konstruado. SEU en 1929 komencis rekte preskribi al siaj membroj, pri kio ili skribu al eksterlando – nome, „pri la senco kaj signifo de kvinjara programo de la ‚Grandaj laboroj', de la seninterrompa kaj kvintaga laborsemajno kaj aliaj gravaj momentoj en la vivo de Sovetio".[2] Ĝuste je tiaj temoj, tamen, multaj nesovetaj membroj de SAT jam komencis satiĝi, kaj se

1. N.B., „Internacia interligo", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 191.
2. P. Kirjušin, „Očerednye zadači esperkorovskogo dviženija" (La aktualaj taskoj de la Esperanto-koresponda movado), *Meždunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 326.

entute ili plu *volis* korespondi kun Soveta Unio, ili ĉiam malpli *povis* liveri leterojn kun enhavo, kiu taŭgis por publikigo en sovetaj ĵurnaloj, uzinaj bultenoj kaj murgazetoj.

4.2.2. *SAT kaj la sennaciismo*

En la sama tempo, kiam SEU klopodis altigi la procentaĵon de laboristoj en sia membraro kaj liberiĝi de suspektoj, ke ĝia koresponda aktivado permesas la infiltriĝon de etburĝaj ideoj, ĝi vidis sin devigita dediĉi kreskantan atenton ankaŭ al la evoluo de siaj rilatoj kun SAT. Estis ĉefe du faktoroj, kiujn necesis konsideri. Unue, la interesoj de la komunisma movado tute kunfandiĝis kun la celo garantii la potencon de Soveta Unio. Stalin en 1927 difinis, ke „internaciisto estas tiu, kiu senrezerve, senhezite, senkondiĉe pretas protekti USSR, ĉar USSR estas la bazo de la tutmonda revolucia movado".[1] En la posta jaro Komintern kompletigis tiun postulon per bataldeklaro kontraŭ ĉiuj, kiuj, laŭ ĝia vidpunkto, forlasis la veran linion de klasbatalo kaj per nesubteno de Soveta Unio servas al la imperiisma konspiro. Pasis la tempo, kiam Soveta Unio, rigardante al la celo de monda revolucio, propagandis aŭ almenaŭ toleris la lojalan kunagadon de komunistoj en internaciaj laboristaj organizaĵoj, kaj ekvalidis la tezo, ke krom la faŝistoj la socialdemokratoj estas la plej danĝera malamiko de Soveta Unio – de la patrolando de ĉiuj proletoj.

Pli-malpli frue SEU devis rimarki tiun evolutendencon en la komunisma movado kaj klopodi sin adapti al ĝi koncerne sian kunlaboron en SAT. Ni jam vidis, kiom kunpuŝiĝis Drezen kaj Lanti dum la kongresoj de Göteborg kaj Leipzig, tiel ke multaj jam time antaŭsentis skismon. Ankoraŭ ne venis la momento de disiĝo, kiun kredeble Drezen same timis; en Göteborg li esprimis la esperon, ke, kvankam laŭ lia opinio „Moskvo k Amsterdamo neniam interharmonios", tamen „*ni* povas harmonii".[2] Sed la pluiradon sur komuna vojo plikomplikis dua faktoro, kiu aldoniĝis ekde la fino de 1928: Temis pri ŝanĝoj en SAT mem.

Kiel ni klarigis supre, SAT dekomence celis eduki siajn membrojn al eksternacia, „sennacieca" pensmaniero. Ĝi konsciis, ke

1. Stalin, *Werke* X 45.
2. *Protokolaro ... Göteborg*, p. 25.

naciaj tradicioj plue havas grandan persistopovon, ankaŭ en la laborista movado, sed almenaŭ la SAT-anoj, unuigitaj per komuna lingvo, neniam infektiĝu per naciismaj tendencoj kaj tiel kvazaŭ modele demonstru la solidarecon de la tutmonda proletaro. Tiun solidareco-senton ili defendu ne nur kontraŭ malvastaj naciaj lojalecoj, sed ankaŭ kontraŭ la partioj, kiuj konkure pretendis plej bone reprezenti la proletaron. En la praktiko ne estis eble deteni sin de la laboro en partioj aŭ sindikatoj (ankaŭ ĉar la membroj tie varbu por Esperanto). Des pli zorgemaj estis la gvidantoj de SAT, precipe Lanti, ke partiaj konfliktoj ne enŝoviĝu en la asocion – ke en la sino de SAT kiel kultura kaj kleriga organizaĵo regu intertendenca harmonio. Kiel eksplicite postulis la statuta kompletigo akceptita en Göteborg, SAT celis per la mensolarĝigo, kiun ebligas la internacia lingvo Esperanto, ankaŭ liveri kontraŭpezon al la dogmiĝo, kiun en la cerbo de proleto povas elvoki la gvidlinioj de partio.

La fakto, ke SAT mem ne alprenis difinitan starpunkton pri la plej bona revolucia starpunkto nek tro multe precizigis la enhavon de „sennacieca" pensmaniero, sendube helpis la kunekzistadon de la anoj de diversaj partioj, kvankam neniam mankis okazoj de ekscitiĝo pro artikoloj en *Sennaciulo* kaj *Sennacieca Revuo*, kiujn tiu aŭ alia partiano trovis ofendaj. Tamen, fine de la 20aj jaroj plimultiĝis terenoj de interfrotiĝo. Inter la okcidentaj nekomunistaj SAT-anoj la preteco ŝpari al Soveta Unio ĉian kritikon malkreskis des pli, kiam interne de la unuopaj landoj pliakriĝis la rilatoj inter komunistoj kaj socialdemokratoj. Ŝajnis nur demando de tempo, kiam skuiĝos ankaŭ la ekvilibro en SAT.

SAT-anoj, kiuj estis, kiel la socialdemokratoj, samtempe firme enkadrigitaj en partio, pligrandigis siajn streĉojn por malhelpi, ke SAT estu entirita en la kreskantan antagonismon de komunistoj kaj socialistoj; ili, kiuj antaŭe ofte plendis pri komunista superrego en SAT, sed pro la bono de unueco kutime detenis sin de polemikoj, nun atente observis, ĉu SAT gardos sian sendependecon. Por ili estis grave, ke la evoluo en SAT ne ĝenu ilian agadon en nacia kadro, precipe la pozicion antaŭ la landa socialdemokrata partio.

Aliaj, al kiuj mankis la kuseno de partio aŭ kiuj ne bezonis konsideri landajn cirkonstancojn, same celis konservi la unuecon

de SAT. Sed ili, por atingi tion, konsideris necesa doni al SAT pli memstaran profilon, kiu kapabligu ĝin rezisti la entrudiĝon de partiaj disputoj. Al tiuj apartenis unuavice Lanti. En 1928 li, jam ne paginte kotizon dum du-tri jaroj, eksiĝis el la Franca Komunista Partio. La seniluziiĝo pri komunismo, kiun esprimis tiu paŝo kaj kiun freŝe nutris raportoj de Laurat, reveninta en 1927 el Moskvo post kvarjara restado[1], lasis al Lanti kiel solan hejmon la propran fondaĵon – SAT. Kaj tio instigis lin pli konkrete elstarigi la karakterizaĵojn de SAT – ĝuste en tempo, kiam la interpartiaj konfliktoj elmetis la tradician, intence neniam klare difinitan pluralismon de SAT al grava elprovo.

Estas jam menciite, ke fine de 1928 Lanti en broŝuro sub la titolo *La laborista esperantismo* faris provon prezenti la „sennaciismon" kiel apartan doktrinon. Pri tiu ĉi termino antaŭe ne estis multe da diskuto inter la SAT-anoj; la plej multaj, inkluzive la komunistojn kaj kredeble Lanti mem, longe kontentiĝis konsideri ĝin kombinaĵo el la proleta internaciismo plus la strebo al internacia lingvo. Fruan provon teorie difini la sennaciismon faris Nekrasov dum la Tria Kongreso en Kassel en 1923. Citante Marx, Kautsky, Lenin kaj Stalin por montri al natura strebado de socialistoj je la asimiliĝo de nacioj kaj kulturoj, li komprenigis, ke SAT sur kultura kampo, aparte emfazante la batalon kontraŭ naciismo, kompletigu la ĝeneralan batalon de revoluciuloj por senklasa socio per batalo por sennacia mondordo.[2] Proksimume unu jaron poste Nekrasov precizige aldonis, ke la sennaciismo ne signifas toleron al la disvastiĝanta monda kapitalismo kaj ke SAT ne forgesu helpi la subprematojn en kolonioj, „ĉar ilia ‚nacia' revolucio estas direktata kontraŭ la kapitalismo internacia".[3] En 1924 SAT eldonis broŝuron, *A.B.C. de sennaciismo*, kiu same argumentis, ke sennaciismo tute akordiĝas kun la antaŭvidoj de Kautsky kaj Lenin pri asimiliĝo de nacioj post la venko de socialismo.[4]

1. Borsboom, *Vivo de Lanti*, p. 65.
2. „Elementoj de sennaciismo", *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-ro 1 (43), p. 8-9.
3. N. Nekrasov, „Sennaciismo ... burĝa?", *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-ro 11/12 (52/53), p. 14. – Kiel konate, Komintern serĉis komunan agadon kun la nacia burĝaro en la kolonioj.
4. V. Elsudo (= Viktor Kolĉinskij), *A.B.C. de sennaciismo*. Dua eldono,

En la unuaj jaroj de SAT tiaj teoriaj eksplikoj ne estis oftaj. Entute, pri sennaciismo estis malpli ofte la parolo, ol pri la „sennacieca" pensmaniero, kiun SAT statute postulis de siaj membroj. Se aŭdiĝis kritiko kontraŭ sennaciismo, ĝi unue venis ĉefe de socialdemokratoj, precipe la germanaj kaj aŭstraj, al kiuj tia ismo ŝajnis utopia, eĉ absurda.[1] Inter la sovetaj esperantistoj, kontraŭe, la sennaciismo – „nia morgaŭa tago"[2] – havis entuziasmajn adeptojn; multaj rigardis la praktikadon de Esperanto kiel edukilon al tiu idealo.[3] Kopelev priskribas en siaj memoroj, kiajn sentojn li havis, kiam li kiel 14jara lernanto ricevis la membrokarton de SAT: „De nun je la demando pri nacieco ni estis respondontaj fiere: ‚neniu!' ... Tiu ĉi ludo estis des pli bela, ĉar ĝi prezentis la komenciĝon de nova vivo."[4] Li krome klarigas:

> Kiam en la lernejo mi aŭdis pri la lingvo, destinita interligi ĉiujn popolojn de la mondo, la estonteco ŝajnis al mi simpla kaj klara. La homoj de ĉiuj landoj lernos kompreni unu la alian; kaj tute per si mem malaperos malfido, malamikeco, mensogaj fabeloj de ŝovinistoj.
> ... Ni esperis, ke baldaŭ sur la tuta mondo venkos tiuj fortoj, kiuj batalas por la frateco de ĉiuj homoj – por la komunismo. Kaj ni kredis, ke en nia lando tiuj bonaj fortoj triumfas, ke ĉe ni jam okazas la kunfandiĝo de la diversaj gentoj kaj popoloj.[5]

Tio ĉi redonas la atmosferon de la jaro 1926. Du-tri jarojn poste, kiam Soveta Unio plene koncentriĝis al la konstruado de socialismo en la propra lando, la minacon de lojalec-konflikto inter la aparteno al SAT kaj la subteno de Soveta Unio, kiu plue rigardis sin modelo por tutmonda revolucio, la esperantistoj povis eskapi nur tiel longe, kiel la enhavo de sennaciismo restis apenaŭ difinita. Sed precize tion Lanti klopodis fari.

En *La laborista esperantismo* Lanti dediĉas la pli grandan parton al resumo de la celoj de SAT, denove emfazante ĝian kontraŭdogman karakteron kaj la malfermitecon al libera diskutado. Sed en unu ĉapitro, „Apero de nova tendenco: Sennaciismo", li

---

Paris, Leipzig 1926. – Vd. ankaŭ: A. Tomo, „Lenin pri senaciismo", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 129/130, p. 2.

1. *La Socialisto* 4. 1929, p. 29, 40.
2. „Rezolucio de SAT-kunveno en Moskvo", *Sennaciulo* 1. 1924/25, n-ro 47, p. 8.
3. V. Vozdviženskij, „Interlanda Esperanto-korespondo kiel edukilo al sennaciismo", *Sennaciulo* 4. 1927/28, p. 71, 78.
4. Lew Kopelew, *Und schuf mir einen Götzen*, p. 126-127.
5. Samloke, p. 157.

malkaŝas sian deziron, ke malgraŭ sia superpartieco SAT pli multe ebligu la diskonigon de sennaciismo, eĉ se tiu „kelkrilate ne akordiĝas kun la nuntempa programo de la laboristaj partioj".[1] Ĉi-kuntekste Lanti atentigas pri la disvastiĝado de „internaciaj trustoj"; li skribas: „Kontraŭbatali la imperialismon signifas bari al la historia procezo, kiu tendencas nepre al starigo de mondmastrumado kaj mondlingvo."[2] Kiel atingi, ke tiu procezo rezultu en socialismo, Lanti tamen ne detaligas – krom akcenti, kiom la uzo de Esperanto povas kontribui al sennaciigo de la mondo. Li asertas, ke la unuiĝo de la proletaro, premiso por sukcesa agado, „estas ebla nur per la helpo de komuna lingvo", kaj riproĉas al la laboristaj gvidantoj, ke, malatentante tion, ili „senkonscie perfidas ... la interesojn de l' Proletaro".[3]

La tezoj de Lanti baldaŭ provokis energian kontraŭstaron, precipe flanke de gvidaj sovetaj esperantistoj. Ili kulpigis lin pro defendo de „ideologia oportunismo", ĉar li nomis la batalon kontraŭ imperiismo vana kaj la rajton de nacioj je memdecido ne subteninda.[4] Lanti respondis lakone, ke pri tiuj demandoj jam disputis Lenin kaj Rosa Luxemburg.[5] Malnova bolŝeviko, Boris Ėjdel'man, kiu en 1898 estis kunorganizinta la fondkongreson de Rusa Socialdemokrata Partio en Minsk, riproĉis al Lanti, ke li „evidente tre malmulte zorgas pri la marksismo", je kio tiu reagis per la konfeso, ke li preferas pensi mem, ne per la cerbo de „iu ajn aŭtoritatulo".[6] Inter la unuaj atakoj eble la plej vunda estis tiu de Nekrasov, kiun Lanti kalkulis inter siaj amikoj. Li argumentis, ke Lanti, oponante al nacia emancipiĝo kaj kvazaŭ esperante sennaciiĝon pere de asimiliĝo, „faras fatale teruran kaj

1. E. Lanti, *La laborista esperantismo*, Leipzig 1928, p. 30.
2. Samloke, p. 29.
3. Samloke, p. 37.
4. Homo (Herbert Muravkin), „Kial SAT devas batali kontraŭ la imperialismo?", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 164.
5. E.L., „Respondo al ‚respondo'", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 172. – Sian malŝaton de batalo por nacia sendependeco Lanti jam pli frue evidentigis: Vd. ekz. "Sennaciismo je praktika vidpunkto", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 123/124, p. 1-2.
6. B. Ejdelman, „Pri difinoj de internaciismo kaj sennaciismo ĉe k-do Lanti", en: B. Ejdelman, N. Nekrasov, *Sennaciismo kaj internaciismo*, Moskvo 1930, p. 8; pli frue en *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 224 (tie ankaŭ la citita respondo de Lanti).

treege danĝeran eraron", ĉar ignori la batalon de la subpremataj popoloj estas inviti la apetiton de la „grandnaciismoj".[1] Nekrasov, kiel ankaŭ Ejdel'man[2], insistis, ke Lanti kreis grandan konfuzon, prezentante la sennaciismon kiel novan tendencon, ĉar tiu termino jam delonge ekzistas kaj „tute plene akordiĝas kun la proleta koncepto de l' internaciismo", substrekante nur la aldonan strebon konsciigi la proletaron pri la bezono de komuna lingvo en monda – senklasa kaj sennacia – socio.[3]

Dum la sovetaj esperantistoj, almenaŭ komence, klopodis savi sian komprenon de sennaciismo kontraŭ la reinterpreto de Lanti, al la socialdemokratoj la tuta debato pli servis kiel pruvo de sia ne nova suspekto, ke Lanti celas trudi al la laboristaj esperantistoj apartan ideologion de SAT. Efektive, ne estis logike, ke Lanti unuflanke konfirmis, ke li volas eviti ĉion, kio malhelpas al diverstendencaj anoj resti en SAT, kaj ke aliflanke li implicite propagandis specifan tendencon de SAT. Lanti skuis la fragilan ekvilibron. Lia elpaŝo estis ĉiuokaze plej embarasa por la sovetaj esperantistoj – des pli, ĉar ĝi evidente estis elfluo de lia seniluziiĝo pri Soveta Unio kiel pioniro de monda revolucio.

En decembro 1929, nelonge post la pena kompromiso de Leipzig, *Sennaciulo* aperigis la tradukon de longa artikolo el *Daily Herald*, laŭ kiu en Soveta Unio reviviĝas naciismo kaj la bolŝevikoj „celas malpli al la realigo de Mondrevolucia kataklismo, ol al la asekuro de la sendanĝereco de Rusio".[4] Per tio Lanti liveris novan municion al tiuj, kiuj vidis lin fordrivi en kontraŭsovetan tendaron. La gvidantoj de SEU, por kiuj la kunagado en organizaĵo ne kontrolata de komunistoj jam iĝis riska, nun devis demandi sin, kiel longe ankoraŭ eblos enlande prezenti SEU kiel ideologie fidindan organizaĵon, dum samtempe ili toleras, ke SAT ne nur rezistu konformiĝon kun gvidprincipoj de

1. N. Nekrasov, „Sennacieca kulturo kaj internacia politiko", en: Ejdelman/Nekrasov, p. 38-39.
2. B. Ejdel'man, „Internacionalizm i meĵdunarodnyj jazyk" (Internaciismo kaj lingvo internacia), *Meĵdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 132.
3. Nekrasov, „Sennacieca kulturo...", p. 44. – Vd. ankaŭ: E. Spiridoviĉ, „La ‚mikrokosma' sennaciismo", *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 244, 254.
4. Mikael Farbman, „Naciisma reviviĝo en la nova Rusio. Fiereco je propra lando kaj izoligo de Eŭropo. Ekonomia rekonstruo", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 125 (el *Daily Herald*, 19-10-1929).

Komintern, sed per disvastiĝo de la tezoj de Lanti eĉ akiru pli memstaran idean profilon, ol iam antaŭe.

4.2.3. *Skismo en la laborista Esperanto-movado*

La kreskanta antagonismo interne de SAT kondukis al nepretervidebla reaktiviĝo de la frakcioj. Post Leipzig, Franz Jonas vokis la socialistajn SAT-anojn al singardemo, atentigante ke la insulta esprimo „socialfaŝismo", uzata de la komunistoj, direktiĝas kontraŭ minimume la duono de la SAT-membraro[1]; evidente pro tio jam dum la kongreso estis refondita la Socialdemokrata Frakcio de SAT.[2] Nelonge poste, fine de septembro 1929, komunistaj esperantistoj en Leipzig fondis propran gazetaran servon, *Proleta Esperanto-Korespondanto*[3], kies elekto de novaĵoj respegulis plenan akordiĝon kun la soveta difino de la ĝusta klasbatala linio. Kaj en novembro, kiel organo de „Internacia Komunista Esperantista Frakcio", estis kreita la bulteno *Kunligilo*, kiu senĝene levis la demandon, ĉu „klaskonsciaj" esperantistoj povos plue resti en „politike senforma asocio simila al SAT" – ĉu ili ne devos foriri, se daŭros la „fuŝa oportunisma filozofado" de ties gvidantoj.[4]

Grava etapo en la vojo al skismo estis la evoluo en Laborista Esperanto-Asocio por la Germanlingvaj Regionoj (LEA), kiu post SEU estis la plej granda nacia organizaĵo kunlaboranta kun SAT. Kvankam la membraron konsistigis plimulto de nekomunistoj, la estraro de LEA estis jam de 1924 ĉefe komunista. Kiam ekde 1928 ankaŭ en kelkaj lokaj grupoj komunistoj transprenis la gvidadon aŭ, kiel en Berlino, malobservis la pripartian neŭtralecon per kolektiva membriĝo de la grupo en la komuniste regata

1. Franz Jonas, „Ĉirkaŭ la Naŭa SAT-Kongreso", *La Socialisto* 4. 1929, p. 76.
2. *La Socialisto* 4. 1929, p. 98. – Jonas estis sekretario de la frakcio.
3. Subtitolo: „Por servi la revoluciajn presorganojn kaj internacian laboristan korespondadon". – Unu el la iniciatintoj de la nova gazetara servo estis Otto Bäßler, kiu gvidis ekde la komenco de 1927 la „Esperanto-Servon" de SAT.
4. „Pri instruoj de la IX-a SAT-kongreso", *Kunligilo* 1. 1929/30, n-ro 1 (29 nov.), p. 3; kp. E. Lanti, „Principoj de unueco", *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 25. – Mankas indiko de aŭtoro, sed Lanti asertis, ke la artikolon verkis Drezen.

Laborista Kartelo de Sporto kaj Kulturo, pluraj socialdemokrataj membroj de LEA eksiĝis kaj fondis en siaj lokoj proprajn grupojn. Per statuta ŝanĝo ili volis atingi, ke ankaŭ tiuj novaj grupoj povu aparteni al LEA. Pri tio devis decidi la jarkunveno de LEA, okazanta en aprilo 1930 en Essen. Dank' al lertaj preparoj flanke de la komunistoj, kiuj profitis de la fakto, ke el 207 lokaj grupoj (kun ĉ. 3 600 membroj) nur 59 estis reprezentitaj, la propono allasi kelkajn grupojn en unu loko estis malakceptita. Krome, plimulto de la delegitoj voĉdonis por membriĝo de LEA en „Intereskomunaĵo por Laborista Kulturo", kiu estis klare komunista organizaĵo. Kiel sekvo, demisiis la socialdemokrata redaktoro de la asocia organo kaj eksiĝis el LEA granda nombro de socialdemokrataj membroj, parto el kiuj fondis propran organizaĵon sub la nomo Socialista Esperanto-Asocio. LEA de tiam estis firme en la manoj de komunistoj.[1]

Por SAT estis granda bato, ke LEA forlasis sian supertendencan karakteron. Ankoraŭ pli forta, neatendita bato sekvis du monatojn post la paskaj eventoj en Essen: La administracio de SAT sciigis, ke la soveta Popola Komisaro pri Financoj malpermesis la pluan transpagon de mono el la bonhavo de SAT en Moskvo, atinginta la sumon de pli ol 15 000 germanaj markoj, kaj ke tial provizore ne plu eblas akcepti abonojn kaj mendojn el Soveta Unio.[2]

La administracio direktis al Drezen insistan peton uzi sian influon por reguligi la transsendon de la mono, kiu estis kolektiĝinta ĉefe per la kotizoj de preskaŭ 2 000 sovetaj SAT-membroj. La maniero, en kiu respondis Drezen, estis interpretebla kiel neta rifuzo helpi: Li skribis, ke „SAT nun ne estas ĉe ni atentata tiel, kiel antaŭ 3-4 jaroj", kaj ke pro la ĝenerala sinteno de la gvidantoj en Parizo lia persona interveno „povus ŝajni nur tre stranga". Drezen tamen ne ekskludis klopodojn flanke de SEU,

1. *Protokolo de la 8-a Asocitago – Pasko 1930 en Essen* (aldono al *Arbeiter-Esperantist*, junio 1930); A. Sproeck, „Warum Spaltung im Arbeiter-Esperanto-Bund?", *La Socialisto* 5. 1930, p. 63-65. – Vd. ankaŭ: Hartmann Wunderer, *Arbeitervereine und Arbeiterparteien. Kultur- und Massenorganisationen in der Arbeiterbewegung (1890-1933)*, Frankfurt, New York 1980, p. 188.
2. „Al ĉiuj sovetiaj gek-doj!", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 436.

kaj tiuj efektive okazis. Demidjuk informis, ke laŭ la ricevitaj sciigoj transpago ne eblos „ĝis oktobro", iom poste aldonante sian impreson, „ke la nunaj malhelpoj estas provizoraj". Kiom ajn realisma estis la atendo, ke la deviza problemo estos solvebla, SAT meze de 1930 estis minacata de bankroto.

Kvankam la Direkcio de SAT komence klopodis maldramigi la monproblemon, nomante ĝin „signo de ‚rusto' ĉe ŝtata aparato, rusto kontraŭ kiu batalas la sovetia proletaro"[1], inter ĝiaj membroj la informo, ke la mono de SAT estas blokita en Moskvo, elvokis ŝokon kaj indignon. La publikigitaj leteroj montris nekredemon, ke laborista mono el Soveta Unio ne estas transpagata al laborista asocio, kaj furiozon pri tio, ke SAT, kiu ĉiam servis al Soveta Unio kaj kiun pro tio la klasaj malamikoj tiel ofte nomis „maskita komunista entrepreno", nun suferas tian ĉikanan trakton.[2] Baldaŭ *Sennaciulo* aperigis ankaŭ leterojn de sovetaj membroj, kiuj – anonime – ne nur plendis pri „inertemo" de la CK de SEU rilate la monproblemon, sed ankaŭ aludis tute specife je diktatora sinteno kaj „rabema" politiko de Drezen.[3] Kvankam ĉirkaŭ la sama tempo Demidjuk klarigis, ke pro la bojkoto en eksterlando kontraŭ sovetaj varoj[4] la ŝtato devis limigi la laŭplanan eksporton de mono kaj ke tiu decido ne trafis nur SAT, promesante ankaŭ, ke SEU laŭ siaj povoj pretas fari por SAT ĉion por kompensi la ŝuldon[5], la rilatoj inter SAT kaj SEU de tiam disvolviĝis al kulmino de streĉiteco, kiu estis aparte gravigata per la emocioj de la membroj: Ekster Soveta Unio la monafero forblovis la restaĵojn de la naiva kredo pri natura alianco inter la proleta ŝtato kaj la „kultura kaj interhelpa organizo de prolet-esperantistoj", dum inter la sovetaj SAT-anoj disvastiĝis malespero pro la perspektivo, ke al ili nun kiel legaĵo restos nur esperantlingvaj broŝuroj pri la konstruado de socialismo eldonitaj de SEU kaj tradukitaj el la rusa lingvo.

1. „Rifo sur la vojo", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 467-468.
2. „Voĉoj de SAT-anoj", samloke, p. 468, 483.
3. „Voĉoj el Sovetio", samloke, p. 492.
4. Citaĵo: „La grandiozaj streĉoj de Sovetio por efektivigo de sia kvinjara konstruplano, por sia ekonomia emancipo de la ŝtatoj kapitalistaj – kaŭzis, ke en eksterlando stariĝis komploto por malhelpi al vendo eksterlanden de sovetiaj varoj (ekz. en Germanio la sovetaj alumetoj)."
5. „Voĉoj el Sovetio", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 490-492.

Komence de aŭgusto 1930 en Londono okazis la Deka Kongreso de SAT. En ĝi por la unua fojo ne partoprenis sovetaj delegitoj; pri la kialoj la kongresa komitato ne ricevis klarigojn. La unua laborkunsido de la kongreso, kiu aŭdis la raportojn de la Plenum-Komitato, komenciĝis en trankvila atmosfero: Lanti montris sin optimisma, ke la monafero „solviĝos pli malpli kontentige", kaj kvazaŭ petege deklaris sian „tutan admiron" al la soveta revolucio.[1] Tiam subite, aŭskultinte la vortojn de Lanti, ke la valutaj malfacilaĵoj ne detruis lian fidon je la solidareco de la sovetaj SAT-anoj, la kongresanoj sciiĝis pri la teksto de telegramo ĵus ricevita el Moskvo:

> Lastjare nuna Direkcio kaj *Sennaciulo* faris chion por malhelpi SAT kaj ankaŭ SEU agadon. Nuna Direkcio kondukas SAT al rapida skismo. Proteste agojn de Direkcio CK SEU decidis ne utila sian cheeston en London. Alilandaj kongresanoj decidu mem pri situacio. Ni esperas, ke la chikanantoj kaj subfosantoj estos malhelpataj pluen chikani kaj subfosi. Se por la estonta Kongreso estos elektita Moskvo ni faros chion por ke ghi sukcesu. Ni promesas fidelon al nia laborafero CK SEU.[2]

Je tiu telegramo, kiu anstataŭ anonci, kiel multaj atendis, solvon de la monproblemo, krude kulpigis la gvidantojn de SAT pri skismiga agado, la kongresanoj reagis per silenta konsterniĝo. La atmosfero nun abrupte ŝanĝiĝis. Kiam la germana komunisto Willi Vildebrand ripetis la akuzon, ke la Direkcio de SAT „ne plenumas siajn laŭstatutajn devojn",[3] Laurat, la franca eksmembro de la CK de SEU, eklančis kontraŭofensivon. Plurfoje aludante siajn personajn spertojn akiritajn dum la restado en Moskvo, Laurat protestis ne nur kontraŭ „la bolŝevika ĵargono" kaj la „kazerna tono" uzata de la komunistoj, sed pledis ankaŭ, ke la Direkcio rezignu sian timemon publikigi en *Sennaciulo* materialojn „pri la mispaŝoj k pri la malbonaj rezultoj de la politiko" de la sovetaj regantoj. Li eldiris sian suspekton, ke „iuj sovetiaj K-doj" ekspluatas la problemon de montranssendo por „trudelpremi" la garantion, ke *Sennaciulo* konservu favoran raportadon pri Soveta Unio. Krome, li rekte demandis al la

1. *Protokolaro de la Xa Kongreso en Londono, 3-7. aŭgusto 1930*, Paris 1930, p. 21-22.
2. Samloke, p. 23; *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 507.
3. *Protokolaro ... Londono*, p. 28.

komunistaj frakcianoj, ĉu ili, dum Komintern klopodas disigi sindikatojn, sportajn kaj kulturajn asociojn de laboristoj, „volas sammaniere agi en SAT".[1]

Post la longa interveno de Laurat, kiu – kiel „renegato" – aparte ekscitis la komunistajn kongresanojn, ankaŭ Lanti rezignis la sinretenon montritan komence de la kongreso. Kvankam jam en Leipzig estis proponite kongresi en Moskvo, li rekomendis malakcepti la „kvazaŭan minac-inviton" de SEU, ĉar ĝi implicite metis kiel kondiĉon, ke antaŭe estu forpelita la nuna Direkcio de SAT. Lanti malkaŝis krome, ke li ricevis el Soveta Unio leterojn kun „tre gravaj akuzoj" kontraŭ la CK de SEU; el ili li konkludis, ke precipe Drezen havas multajn malamikojn inter la sovetaj membroj de SAT.[2]

La Londona Kongreso, la unua en la historio de SAT, dum kiu aŭdiĝis rekte malfavoraj juĝoj pri la soveta reĝimo, esprimis sian fidon al la Plenum-Komitato kaj – malgraŭ ĉio – „principe" voĉdonis por okazigo de la venonta kongreso en Moskvo.[3]

Pri tiu rezulto tre rapide informiĝis la CK de SEU, kaj jam la 7an de aŭgusto – unu tagon post la voĉdonoj – kunvenis en Moskvo. La kunsido, kiun partoprenis ankaŭ du gastoj de Germana Laborista Esperanto-Asocio (GLEA)[4], decidis i.a. fari „vastan agitadon" cele al malvenko de Lanti en la referendumo pri la kongresaj decidoj; prepari la kongreson en Moskvo „por reguligi la novan revolucian organizadon"[5]; kaj kunlabore kun GLEA eldoni revoluciajn librojn kaj novan revuon. Fina decido pri la estonta kunlaboro kun SAT estis prokrastita ĝis post la membrara referendumo, sed SEU deklaris sian intencon intertempe zorgi pri repago de sia ŝuldo al SAT.

Protokolo[6] de la kunsido de la CK de SEU estis baldaŭ koni-

1. Samloke, p. 29-32; vd. ankaŭ p. 53-54.
2. Samloke, p. 78-79.
3. Samloke, p. 68, 79. – La fidesprimon subtenis 119, kontraŭis 59, sindetenis 12; por Moskvo kiel kongresurbo voĉdonis 114, kontraŭ 72.
4. Ili estis Otto Bäßler kaj F.C. Richter.
5. Tiel la traduko de SEU mem. La tradukoj aperigitaj en *Sennaciulo* havas alian nuancon, kredigante skismigan celadon de SEU: „Por formi la novan revolucian organizon" aŭ „por oficialigi novan revolucian organizon".
6. *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 6; *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 22.

gita al la Direkcio de SAT, kiu, publikigante ekstraktojn el ĝi en *Sennaciulo*, nun definitive ĉesigis sian taktikon ne enverŝi oleon en la fajron, dum daŭris la traktadoj pri solvo de la transpaga problemo. Konstatante ke SEU malobservas interkonsenton faritan inter la landaj laboristaj asocioj kaj SAT, laŭ kiu ili publikigu nur nacilingvajn verkojn pri Esperanto, dum SAT eldonu la esperantlingvajn librojn[1], kaj komprenante kiel celon de la planata kongreso en Moskvo la starigon de nova organizaĵo, la Direkcio oficiale transiris al la interpreto, en formo de suspekto jam formulita de Laurat, ke la monafero servas al SEU kiel bonvena okazo por malfortigi la financan bazon de SAT kaj ĉantaĝe subpremi la disvastiĝon de „kontraŭsovetaj" tendencoj. Aparte notinda trajto de la reago estis, ke la Direkcio koncentris sian kontraŭatakon grandparte al Drezen. Ĝi neis malamikan sintenon al Soveta Unio kaj pozis eĉ kiel ĝia pli fervora defendanto, dum Drezen estis karakterizita kiel „intrigulo k ŝajnkomunisto", kiu denuncis SAT ĉe la sovetaj aŭtoritatoj „por kaŝi sian burĝecon, sian esperantistan neŭtralismon, k aspekti ortodoksa".[2] Stampante Drezen kiel ĉeffriponon, la Direkcio do ŝovis la kulpon preskaŭ ekskluzive al unu persono. Evidente, ĝi tiamaniere celis krei fendon interne de SEU, simile kiel Lanti en Londono estis distinginta inter Drezen unuflanke kaj granda nombro de sovetaj membroj fidelaj al SAT aliflanke.

Estas dubinde, ĉu la Direkcio konsciis la riskon, kiun ĝia atako kontraŭ Drezen prezentis por la sovetaj SAT-anoj. Nek ni scias, kiugrade la kulpigo baziĝis sur fidindaj informoj aŭ kiom ĝin

1. Tio ĉi estis la enhavo de la t.n. Gotenburga Konvencio, akceptita dum la kongreso en Göteborg en 1928.
2. „Kiel la Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio klopodas por ke SAT ‚evitu la rifon'", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 531-532. – Iom poste estis dirite pri Drezen, ke li „ĉiam estis ĝisosta, neforigebla neŭtralulo, kiu kontraŭvole ludas komunistan rolon": *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 263. Tiu karakterizo certe ne estis tute senbaza. Nikol'skij, kiu defendis Drezen, konfesis, ke al liaj malbonaj trajtoj apartenas „nesociemeco, malofta estado inter la amasoj" („Kontraŭ kalumnioj pri k-do Drezen", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 213), kaj Roman Sakowicz, kiu konis Drezen jam antaŭ la revolucio, memorante pri renkonto en 1927 juĝis, ke „li estis nur karieristo, kiu simulis bolŝevikon" (letero al Hans Jakob, de 2-7-1957).

influis taktikaj konsideroj.[1] Ĉiuokaze mankas pruvo, ke la netranspago de valuto ŝuldiĝis al denunco de Drezen. Li mem parolis tiurilate pri „monstra mensogo" kaj oficiale plendis al la Kontrol-Komitato (t.e. konflikt-komisiono) de SAT pro „personeca kompromitado" flanke de la Direkcio.[2]

Fakte, la reago de la Direkcio de SAT maltrafis la veran kernon de la problemo, kiu en septembro 1930 ne plu turniĝis ĉirkaŭ valutaj malfacilaĵoj. Ĝi ne rimarkis, kiom gravaj estis por SEU du punktoj, kiujn la CK en la protokolo pri siaj decidoj rangigis unualoke. La unua decido tekstis:

> a) Konstati, ke propaganditaj ideoj de sennaciismo k ĝenerala sinteno de SAT-Direkcio dum la lasta tempo nur malhelpis la SEU-laboron (elpaŝo de K-do Skrypnik). Ĉi sennaciisman ideologion necesas plej decide kontraŭbatali.

Pri kio temis? Ĝuste kiam Demidjuk kaj eble ankaŭ Drezen klopodis pri ordigo de la monproblemo, SEU enlande estis dolore puŝita al konsciiĝo pri la delikataj implicoj, kiujn havis ĝia tuta kunlaboro kun SAT. La puŝo venis de unu el la plej aŭtoritataj politikistoj de Soveta Unio. En junio 1930 *Komunist*, la organo de la Komunista Partio de Ukrainio, publikigis sub la titolo „Ĉu esperantigo aŭ ukrainigo?" la tekston de parolado de Mykola Skrypnyk (ruse Nikolaj Skrypnik), la ukraina popolkomisaro pri klerigo.[3] En tiu parolado Skrypnyk traktis progresojn kaj obstaklojn en la procedo de disvastigo de la ukraina lingvo en Ukrainio – procedo, per kiu estis venkota la multjarcenta heredaĵo de rusigo. Parolante pri malhelpoj, Skrypnyk larĝe traktis la teorion de sennaciismo, kies adeptojn li renkontis, je sia miro, eĉ inter junkomunistoj. Lia starpunkto estis malaproba: La fakto, ke en kelkaj lernejoj Esperanto estas instruata kaj prezentata kiel alternativo al ukrainigo, servis al li kiel ekzemplo por tendenco

1. Je koncerna demando Barthelmes en persona komuniko de 2-2-1981 skribis: „Certe en la sinteno de SAT al Dr. kunrolis taktikaj konsideroj."
2. E. Drezen, „Al la Kontrol-Komitato de SAT", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 7.
3. „Esperantyzacija čy ukraïnizacija", *Komunist*, 19-6-1930; laste represita en: Mykola Skrypnyk, *Statti i promovy z nacional'noho pytannja* (Artikoloj pri paroladoj pri la nacia demando), München 1974, p. 185-191; ruslingva teksto („Esperantizacija ili ukrainizacija?") en *Mejdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 74-77. – Temas pri parolado, kiun Skrypnyk faris antaŭ kulturaj aktivuloj en Stalino (30-5-1930).

transsalti senpere al unueca lingvo kaj – je la nomo de internaciismo – malgravigi la signifon de naciaj kulturoj kaj lingvoj en la epoko de socialisma konstruado. Per tio estas ignorata, diris Skrypnyk, la ekzisto de gepatra lingvo de milionoj da laboruloj kaj sekve ankaŭ la praktika tasko levi ilian kulturan nivelon pere de lingvo, en kiu la amasoj parolas. Tiuj, kiuj pledas por la deviga enkonduko de Esperanto en lernejojn, havas la etburĝan deziron eskapi ukrainigon; se nova lernfako estas bezonata, tiam necesus enkonduki politeknikismon, sed ne Esperanton. Se la esperantistoj pledas por aparta internacia, sennacieca kulturo, metata kontraŭ la nacia kulturo de la amasoj, tia teorio devas esti kontraŭbatalata, ĉar ĝi estas nek proleta nek komunisma nek internacia, sed reakcia kaj falsa.

En alia loko ni pli detale analizos la politikan fonon de la elpaŝo de Skrypnyk.[1] Tie ĉi gravas noti, ke SEU reagis je lia surpriza atako per tuja memkritiko: „Ni estas kulpaj, ĉar ni ne klarigis bone al niaj k-doj ke sennaciismon ni konsideras nur kiel batalilon kontraŭ naciismo, ŝovinismo de socialŝovinistoj en laborista movado... ke ni ne celas per esperanto krei iun apartan esperantan kulturon, sed ke ni celas *uzi* esperanton por eduki internacian spiriton proletan kaj anstataŭi per ĝi la spiriton malvaste nacian, naciisman."[2] En la lumo de tiu konfeso, ke la tuta ĝisnuna teoria laboro de SEU estis malsufiĉa, iĝas facile kompreneble, kial la CK envicigis en siajn decidojn de la aŭgusta kunsido frontloke la alvokon batali kontraŭ la sennaciisma ideologio, kiun Lanti lastatempe estis klopodinta reformuli kun la evidenta celo utiligi ĝin kiel novan integrigilon por SAT skuata de interpartia luktado.

Aldoniĝis alia zorgo de SEU: Penante pruvi al la partiaj aŭtoritatoj, ke ĝi havas nenion komunan kun sennaciismo en la senco de ignoro de la naciaj kulturoj en Soveta Unio, kaj laŭe eduki ankaŭ siajn membrojn, ĝi sentis sin aparte vundita per la konstato, ke multaj sovetaj SAT-anoj, laŭ la eldiro de Lanti mem, skribis leterojn apoge al la Direkcio en Parizo kaj ke kelkaj el tiuj, entenante fortajn akuzojn kontraŭ la CK, estis publikigitaj

1. Vd. sube, p. 357-359.
2. „Bona instruo por nia aktivularo", *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 127 (kun citaĵoj el la parolado de Skrypnyk).

en *Sennaciulo*. Pri tio temis la sekva decido en la protokolo:

> b) ... Anonima karaktero de tiuj elpaŝoj ankoraŭ pli substrekas ilian kontraŭsovetan esencon. CK SEU alvokas lokajn organizojn de SEU k SAT plej krude malaprobi la agentojn de reformista alo, kiuj penetris en la vicojn de Soveta esperanta movado.

En la unua informo de *Sennaciulo* pri la kunsido de SEU tiu punkto ne estis citita. SAT nek registris la signifon de la parolado de Skrypnyk[1], minimume ne komprenis ĝin kiel elementon en la decidoj de la CK, nek konsideris, ke Drezen, jam en defensivo post la atakoj de alta ŝtata funkciulo, estis aldone timigita per la publika alvoko al la sovetaj SAT-anoj senigi sin de gvidanto, kiu estas kaŝita malamiko de Soveta Unio. Ne plu tamen povis esti surprizo por SAT, ke Drezen kaj la CK nun siavice malfermis grandskalan kampanjon kontraŭ la Direkcio de SAT[2], pri kiu estis klare, ke ĝi devos konduki al rompiĝo.

Jam en oktobro 1930 ekaperis la anoncita nova revuo, *Internaciisto*[3], kies unua numero portis deklaron de la „klasbatala SAT-opozicio" vokantan al batalo por retransformo de SAT en revolucian organizaĵon kaj forpelo de la Direkcio, kiu faris el la asocio „ian sekton deŝiritan de la vastaj proletaj amasoj".[4] En novembro estis fondita en Leipzig la eldonejo EKRELO, en kiu komencis aperi, presitaj en Moskvo, dekoj da libroj kaj broŝuroj. Ĉirkaŭ la sama tempo, evidente pro interveno de SEU ĉe la aŭtoritatoj, eldonaĵoj de SAT senditaj al Soveta Unio komencis esti konfiskataj.[5] En januaro 1931 la opozicio publike alvokis al bojkoto de la revuoj de SAT kaj anoncis la organizon de referendumo cele al eksigo de la Direkcio.[6] Sekvis kontraŭbato de la gvi-

1. Komence de septembro 1930 tamen aperis artikoleto ironie raportanta pri la kritiko de Skrypnyk: Grodnano, „La surduloj, kiuj lernas muziki", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 529.
2. „En lukto por la klasbatala SAT", *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 149-156.
3. Redaktoro estis la ekzilita hungaro József Batta, loĝanta en Berlino. La dusemajna revuo estis presita, krom du numeroj, en Moskvo ĝis novembro 1931, poste, ekde januaro 1932, en Berlino.
4. „Al la SAT-anaro de la tuta mondo. Deklaro de la klasbatala SAT-Opozicio", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 1-2.
5. Ekde la mezo de novembro 1930 multiĝis plendoj de sovetaj abonantoj pro nericevo de *Sennaciulo*: *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 194, vd. ankaŭ p. 223; *Protokolaro pri la XIa Kongreso en Amsterdamo, 2-7 aŭgusto 1931*, Paris 1932, p. 58-59.
6. *Internacisto* 1. 1930/31, p. 66.

dantaro de SAT: Ĝi eksigis la ĉefajn opoziciulojn kaj minacis eksigi ĉiujn aliajn, kiuj partoprenis ilian „detruan laboron".[1] La polemiko en la gazetoj atingis senprecedencan apogeon de reciprokaj kulpigoj kaj insultoj. La ruslingva revuo de SEU aperigis serion da artikoloj por denunci la „kontraŭrevolucian" karakteron de sennaciismo[2], *Internaciisto* atakadis la „fiagadon" kaj kalumniojn de la „uzurpulaj" SAT-gvidantoj kaj instigis porti la batalon inter „oportunistoj" kaj „klaskonsciaj proletesperantistoj" ankaŭ en la kadron de la landaj asocioj[3], dum *Sennaciulo* nun regule publikigis leterojn el Soveta Unio, en kiuj troviĝis deklaroj de subteno al la Direkcio kaj samtempe esprimoj de forta malaprobo de la CK, specife de la persono de Drezen.[4]

Ĉar disbloviĝis la espero kongresi en Moskvo, la 11a Kongreso de SAT okazis, komence de aŭgusto 1931, en Amsterdamo. Ĝin denove ne partoprenis delegitoj el Soveta Unio[5], sed la starpunkton de SEU dum la kongresaj kunsidoj reprezentis kelkaj el la jam eksigitaj kaj aliaj opoziciuloj, kiuj per bruado kaj kriaj intervokoj substrekis sian postulon, ke per forpelo de Lanti kaj la ceteraj gvidantoj estu restarigita la klasbatala unueco kaj demokrateco en SAT. Lanti defendis sin kontraŭ tiu agitado, denove asertante ke SAT havas inter la sovetaj esperantistoj plimulton de simpatiantoj, ke SEU pro tio denuncis la SAT-eldonaĵojn kiel kontraŭsovetajn kaj ke la Direkcio de SAT „pli bone servas la

1. „Al la tuta SAT-anaro!", *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 193-194. – La unuaj eksigitoj estis: Drezen, Otto Bäßler, F.C. Richter, Walter Kampfrad (la estro de EKRELO), József Batta, F. Wolff, Georg Richter, Herbert Muravkin, Willi Vildebrand: *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 239. Krom Drezen, ĉiuj estis germanoj aŭ loĝis en Germanio (Batta kaj Muravkin).
2. R. Nikol'skij, „Manifest podtasovok, putanicy i klevety" (Manifesto de substituoj, mikso kaj mensogo), *Mejdunarodnyj jazyk* 9. 1931, p. 5-11 (pri Lanti, *Manifesto de la sennaciistoj*); P. Kirjušin, „Ideologija Lanti i kontrrevoljucija" (Ideologio de Lanti kaj kontraŭrevolucio), samloke, p. 69-72; P. Kirjušin, „U istokov lantizma. ‚Ljuksemburgianstvo i sennacizm'" (Ĉe fontoj de lantiismo. „Luksemburgismo kaj sennaciismo"), *Mejdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 36-43, 70-77 (provo montri, ke la elirpunkto de sennaciismo estas la „falsaj teorioj" de Rosa Luxemburg).
3. „La taskoj de la opozicianoj", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 26. – Efektive, en pluraj Laboristaj Esperanto-Asocioj la komunistoj aŭ transprenis la gvidadon, laŭ la modelo de la Germana LEA (ekzemple en Britio kaj Francio), aŭ starigis konkurencajn organizaĵojn.
4. „Voĉoj el Sovetio", *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 143-144, 247, 280, 342-343.
5. Krom la ruso Muravkin, kiu alveturis el Berlino.

interesojn de l' Sovetia popolo ol faras la CK de SEU".[1] Voĉdono rezultigis preskaŭ unuaniman apogon al la agado de la Plenum-Komitato.[2] Sed jam antaŭ ĝi la opoziciuloj proteste forlasis la kunsidon kaj malfermis sian propran „Kongreson de Revoluciaj Esperantistoj"[3], kiu fondis Internacian Unuigan Komitaton por reorganizo de la proleta Esperanto-movado. La skismo en SAT per tio estis plenumita fakto.

4.2.4. *IPE, ISE kaj SAT*

La sekvojn de la amsterdama „batalkongreso" eblas priskribi koncize. La malvenkintaj opoziciuloj vokis al „batalo kontraŭ la restaĵoj de SAT mem".[4] Nun ankaŭ la mono iĝis malkaŝe utiligata armilo: Jam en julio 1931 la CK de SEU decidis „ĉesigi provizore la transpagon de SAT-mono ĝis kiam estos restarigita la internacia organo de proleta esperanto-movado".[5] Poste, apogante sin sur la rezultoj de aranĝita voĉdono, laŭ kiu granda plimulto de la laboristaj esperantistoj ne plu subtenas la Direkcion de SAT[6], la CK destinis la Internacian Unuigan Komitaton „la vera heredanto de tiu mono".[7] Fine, dum kongreso en Berlino, en aŭgusto 1932, estis fondita nova organizaĵo. Ĝi alprenis la

1. *Protokolaro ... Amsterdamo*, p. 63.
2. 105 aprobis la agadon de la Plenum-Komitato, 6 malaprobis kaj 6 sindetenis: samloke, p. 64.
3. Vd. la broŝuron *Kongreso de Revoluciaj Esperantistoj (SAT-opozicio k klasbatalaj LEA-oj), Amsterdam, la 5-an de aŭgusto 1931*, Berlin 1931. – En tiu „kongreso" partoprenis 54 personoj el ok landoj. Al Amsterdamo venis entute pli ol 400 el 14 landoj, el kiuj 252 estis nederlandanoj.
4. „Pri la XI-a SAT-Kongreso en Amsterdam", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 185.
5. „Raporto de la Revizia Komisiono de SEU al la 5-a Kongreso", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 132; vd. ankaŭ „Plivastigita plenkunsido de CK SEU", samloke, p. 88.
6. En referendumo ekorganizita en januaro 1931 la opozicio donis voĉdonrajton ne nur al SAT-anoj, sed ankaŭ al „ĉiuj senlaboruloj, malriĉuloj, sovetianoj, neabonantoj de ‚S-ulo', t.n. pasivaj membroj": *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 74. Jam meze de 1931 la opozicio asertis, ke 75% de ĉiuj organizitaj laboristaj esperantistoj esprimis sin por ĝia vidpunkto: *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 137.
7. N. Nekrasov, „La 5-a kongreso de SEU unuanime voĉdonis por IUK", *Internaciisto* 2. 1932, p. 10.

nomon „Internacio de Proleta Esperantistaro" (IPE).[1] Diference de SAT, kiu havis membrecon sur individua bazo kaj nur kunlaborajn rilatojn kun naciaj laboristaj Esperanto-asocioj, IPE estis asocio konsistigata de landaj sekcioj – kaj tio permesis al ĝi dekomence proklami sian „amasan karakteron" kiel kolektivo de 14 000 proletaj esperantistoj.[2]

La skismo en la laborista Esperanto-movado, kiu unue perdigis al SAT la sovetajn membrojn kaj fine kulminis en la starigo de konkurenca organizaĵo, sendube estis influita de la katastrofe malutila decido de Komintern komenci la frakason de faŝismo per la detruo de ĝia „ĝemelo", la socialdemokrataro. Tiu ĉi politiko, decidita en Moskvo kaj instiganta la komunistojn al senkompata batalo kontraŭ „socialfaŝistoj", malebligis al la sovetaj movad-gvidantoj plue konservi sian eĉ nur silentan toleron de la pluralismo de SAT kaj fari signifajn cedojn en la rapide evoluanta procedo de dispolusiĝo. Esperanto ne plu povis servi kiel unuiga faktoro super la rivalaĵoj de la laboristaj partioj, eĉ se SEU mem ĝis la lasta momento – kredeble ankoraŭ ĝis la mezo de 1930 – tion esperis. Pro tiuj eksteraj cirkonstancoj ankaŭ la klopodoj de SAT preterpasi Drezen de maldekstre kaj sendi al siaj sovetaj membroj „fratecan saluton trans la kapoj de la nuna C.K. de SEU"[3] devis kolizii kun la politika premo, al kiu SEU interne de sia lando estis submetita – por ne paroli pri tio, ke la tezoj de Lanti pri sennaciismo, propagandataj ĝuste en la plej tikla periodo, kvazaŭ devige puŝis SEU en fronton kontraŭ SAT.

Aliflanke, la skismo en SAT estis pli, ol sekvo de la disduiĝo de internacia laborista movado en du alojn, unu stalinisman kaj unu demokrat-socialistan. Nome, ĝi havis sian specife esperantistan

1. Pri la fondkongreso de IPE: *Internaciisto* 2. 1932, p. 81-83, 85-86. Ĉeestis 348 kongresanoj el 11 landoj, inter kiuj, pro viz-rifuzo de la germanaj aŭtoritatoj, ne estis delegito el Soveta Unio.
2. Tiuj sekcioj estis, ĵus antaŭ la fondo, la asocioj aŭ „unuigaj komitatoj" en Belgio, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Estonio, Francio, Germanio, Japanio, Nederlando, Norvegio, Soveta Unio, Svedio kaj Usono: „Larĝa estas nia bazo. Antaŭen al fondo de IPE!!", *Internaciisto* 2. 1932, p. 75. – En 1935 IPE indikis membronombron de 13 728; el tiuj tamen 11 195 estis sovetianoj: *Sur Posteno* (internacia eldono) 3. 1935, p. 188.
3. Tiel Lanti en la malfermo de la kongreso en 1932: *Protokolaro pri la XII-a Kongreso de S.A.T. en Ŝtutgart* (suplemento al *Sennaciulo*, n-ro 393, 8 sept. 1932), p. 1.

koloron – en tiu senco, ke SAT post la foriro de komunistoj ĉesis esti akceptebla hejmo ankaŭ por adeptoj de la alia ĉefa direkto en la laborista movado, la socialista, kaj tiel preskaŭ estis reduktita al malgranda grupiĝo de sennaciistoj kaj senpartiuloj. Se ni ne mencius tiun aspekton, ni maltrafus plenan komprenon pri la signifo de la skismo.

Inter multaj socialistaj membroj de SAT kaj precipe de la landaj organizaĵoj jam delonge regis malkontento pri la organiz-strukturaj kaj ideologiaj apartaĵoj de SAT. Tio validis unuavice por la aŭstroj: Fakte, Aŭstria Laborista Ligo Esperantista (ALLE), kiu en sia lando proksime kunlaboris kun la Socialista Partio, ĉiam estis skeptika pri SAT, ĉar tiu rezulte de sia principo de individua membreco emis neglekti la agadon por Esperanto en nacia kadro kaj ne sinapogis al la laboristaj Internacioj por tiamaniere kunordigi la laboron de la landaj aktivuloj.[1] Se la aŭstroj kunlaboris dum pli ol dek jaroj kun SAT, ilia ĉefa motivo estis per tio malhelpi, ke en la asocio superregu la komunistoj. Sed estas karakterize, ke ankoraŭ en 1932 el 2000 membroj de ALLE nur 118 estis samtempe aliĝintaj al SAT.[2]

La skismo ŝanĝis la situacion ankaŭ por la socialistaj esperantistoj. Jam antaŭ la fondiĝo de IPE, ALLE anoncis, ke socialistoj ne vidas kialon resti en SAT post la eksiĝo de la komunistoj, ĉar tiam forfalus por ili la bezono gardi la supertendencan karakteron de la asocio.[3] En aŭgusto 1932, dum la SAT-Kongreso en Stuttgart, 40 aŭstraj SAT-anoj faris lastan provon por realigo de sia delonga revo: fari el SAT esperantistan Internacion bazitan sur la landaj organizaĵoj de laboristaj esperantistoj, do komplete ŝanĝi ĝian sennaciecan, „individuisman" strukturon. La provo fiaskis[4], tuj poste fondiĝis IPE, kaj ALLE nun siaflanke paŝis al

1. A.F. Klatil, „Taskoj de la laborista Esperantomovado", *La Socialisto* 8. 1933, n-ro 1, p. 2-3; persona komuniko de Adalbert Klatil, de 3-1-1977.
2. *La Socialisto* 7. 1932, n-ro 9, p. 7.
3. Vidu la rezolucion (proponitan de Franz Jonas) unuanime akceptitan de la 10a plenkunveno de ALLE komence de aprilo 1931: *La Socialisto* 6. 1931, p. 37. La socialistoj estis nomataj la „plej granda parto de la senkomunista SAT".
4. *Sennaciulo* 8. 1931/32, p. 225; *Protokolaro pri la XII-a Kongreso de S.A.T. en Ŝtutgart* (suplemento al *Sennaciulo*, n-ro 394, 22 sept. 1932), p. 12. – En la kongreso la propono ricevis nur kvar voĉojn.

la starigo de propra Internacio, kiu sentu sin konscia parto de la socialista movado. Malgraŭ certigoj, ke ne temas pri konkurenco al SAT, la proklamoj de ALLE, precipe de ĝia motoro Franz Jonas, elradiis la konvinkon, ke SAT, elŝirinte la laboristojn el la neŭtrala movado, „jam plenumis sian historian funkcion" kaj ke devas nun sekvi nova etapo. Jonas prijuĝis la situacion de SAT post la foriro de la komunistoj jene:

> Kio restis en SAT? K-doj, kiuj al neniu partio apartenas, do senpartiuloj, kiuj pro iuj sentimentalaj kaj individualistaj kaŭzoj faras „memstaran" klasbatalon, mondreformantoj, fantaziuloj kaj ĉagreniĝintaj filantropoj. Ili montriĝas ĉiuj en SAT sub la masko de revoluciuloj. Krom ili restis en SAT la granda aro de socialistaj esperantistoj. Ĉu tiuj pro la senpartiuloj restu supertendencaj? Neebla postulo![1]

Dum la pentekostaj tagoj de 1933, komence de junio, la reprezentantoj de asocioj de socialistaj esperantistoj en Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Francio kaj Hungario[2], kunvenintaj por Mezeŭropa Konferenco en Vieno, starigis Internacion de Socialistaj Esperantistoj (ISE). Ĝi prenis kiel organon la revuon *La Socialisto*, kiun aperigis ALLE ekde 1926. Sed la multpromesa starto de ISE, kiu celis koncentri sin al la disvastigo de Esperanto inter la partioj de la Dua Internacio, volante nek influiĝi de la politikumado de IPE nek malŝpari siajn energiojn per sennaciismaj ĥimeroj, baldaŭ venis al abrupta fino. Kelkajn monatojn post sia fondiĝo ĝi perdis en februaro 1934 sian faktan bazon, kiam en Aŭstrio la dekstra reĝimo de Engelbert Dollfuß malpermesis kune kun ĉiuj laboristaj organizaĵoj ankaŭ ALLE. Tio trafis la vivonervon de ISE, eĉ se ĝi ankoraŭ, dank' al siaj sekcioj en Francio kaj Nederlando, daŭrigis sian ekziston ĝis la militeksplodo.

Transvivis ankaŭ SAT, kvankam organize kaj finance ĝi estis preskaŭ ruinigita. Komence de 1933 ĝi havis malpli ol 2000 membrojn.[3] La organo *Sennaciulo* aperis en reduktita amplekso kaj

1. Franz Jonas, „Kie mankas la mondrigardo?", *La Socialisto* 8. 1933, n-ro 9, p. 4. – Temas pri respondo al la artikolo: John Johansson, „Kie la mondrigardo mankas. Malferma letero al miaj aŭstraj kamaradoj", *Svenska Arbetar Esperantisten* 12. 1933, n-ro 6/7 (jul.), p. 7.
2. Aldoniĝis sekcioj en Dancigo, Finnlando, Nederlando (1935) kaj Britio (1938). La germana SEA partoprenis en la preparlaboroj por ISE, sed en la tempo de ĝia fondo estis jam dissolvita de la nazioj.
3. En majo 1935 SAT havis 1244 membrojn, el kiuj 310 estis nederlandanoj. La meza eldonkvanto de *Sennaciulo* en 1934/35 estis 4200 ekzempleroj.

malpli ofta ritmo – ekde februaro 1933 nur unu fojon monate.[1] Fine de 1932, kiam minacis jam la apartiĝo de la socialistoj, Lanti sentis la respondecon ne plu portebla kaj anoncis sian eksiĝon el la gvida pozicio de SAT.[2] Lin turmentis la penso, ke lia persono povus esti obstaklo en la klopodoj savi la asocion kontraŭ disfalo, ĉar „ekzistas la emo ĉe multaj personoj konsideri miajn dirojn kiel ion oficialan".[3] Li konsciis, ke estis malfacile konvinke klarigi, ke sennaciismo, pri kies propagando li ne volis rezigni, estas nur unu el la tendencoj reprezentitaj en SAT – kaj tio efektive estis malfacila, ĉar la Sennaciista Frakcio estis la sola frakcio, kiu ne havis apogon ekster SAT, kaj ĉar sennacie*can* sintenon la asocio postulis de ĉiu membro. Sekve, Lanti, kiu insistis pri la rajto plue „herezumi", decidis demeti siajn funkciojn, esperante ke tio ankaŭ helpos „faciligi la rekuniĝon de ĉiuj fortoj en SAT".[4] Li restis regula kontribuanto al la revuoj, sed post 1933 ne plu partoprenis en kongreso de SAT. En 1936 li por ĉiam forlasis Eŭropon, komencante kelkjaran mondvojaĝon, kiu kondukis lin al Japanio, Aŭstralio, Novzelando kaj Suda Ameriko. Lia fina stacio estis Meksikio, kie en januaro 1947 li mortigis sin.[5]

En sia abdika artikolo Lanti proponis, „ke sur nian standardon oni skribu novan frazon, nome: *Ni estu unue esperantistoj, SAT-anoj*"[6], kaj en aŭgusto 1933, dum la kongreso en Stokholmo, kie li demisiis, li nomis erara la naskiĝan sloganon de SAT „ni estu unue revoluciuloj k nur due esperantistoj".[7] Kvankam tio praktike egalis deklaron pri bankrotiĝo de la principoj de SAT, fontantan el plena seniluziiĝo pri la centrifugaj fortoj en la laborista movado, sendube la transvivo de SAT ŝuldiĝis – krom al la financa helpo de la nederlanda asocio[8] – ĝuste al tiuj membroj

1. Krome, aperis, ankaŭ monate, *Sennacieca Revuo* (nova serio ekde marto 1933).
2. E. Lanti, „De ekstere – de supre", *Sennaciulo* 9. 1932/33, p. 45-47.
3. E.L., „Epiloge", *Sennaciulo* 9. 1932/33, p. 73.
4. *Protokolaro pri la XIII-a SAT-Kongreso en Stokholmo* (suplemento al *Sennaciulo*, n-ro 409, 25 sept. 1933), p. 6.
5. Pri la lastaj vivojaroj de Lanti: Borsboom, *Vivo de Lanti*, p. 145-177.
6. Lanti, „De ekstere – de supre", p. 46.
7. *Protokolaro ... Stokholmo*, p. 5.
8. Pro la forteco de siaj nederlandaj membroj SAT povis okazigi en 1937 en Rotterdam kongreson kun la rekorda partopren-nombro de 800 personoj (el 16 landoj).

(inter kiuj restis ankaŭ kelkaj komunistoj[1]), kiuj povis kaj volis ne subordigi sian esperantistecon al partiecaj konsideroj aŭ kiuj, ne estante ligitaj al iu partio, ne bezonis pensi pri prioritatoj. Per aliaj vortoj: SAT post la duobla skismo iĝis pli kohera organizaĵo, ĉar la restintaj membroj, plejparte loĝantaj en demokrataj landoj, ne sentis konflikton inter partia linio kaj sia lojaleco al Esperanto. La kosto de tio ofte estis manko de politika klarvido, kiel montris ekzemple la distanciĝema pozicio de multaj SAT-anoj rilate al la Civila Milito en Hispanio[2], sed kompare kun la malglora bildo, kiun prezentis la kelkjara vivo de IPE, oni povas diri pri SAT almenaŭ tion: ĝi kuraĝigis al memstara pensado kaj estis je dispono kiel libera diskut-forumo. Dank' al la fideleco de siaj restintaj membroj SAT sukcesis rezisti la politikajn ŝtormojn de la 30aj jaroj, kaj ĝian organizan malfortiĝon ĝertagrade kompensis la fakto, ke ĝi fine povis pli senĝene demonstri sian bazan karakterizaĵon, kiun en la unua jardeko ofte ombris partieca fanatiko kaj oportunisma nedecidemo: la toleremon.

4.2.5. *Esperanto en la maturiĝ-procezo de stalinismo*

La skismo en SAT estis por la sovetaj membroj doloriga sperto – ankaŭ por tiuj, kiuj, kiel Demidjuk kaj Nekrasov[3], ne povis tion konfesi. Ilia kunlaboro en SAT estis tro aktiva, ĝia utilo kiel

1. „Protokolaro pri la 18-a Kongreso de S.A.T. en Bruselo", *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 90 (interveno de Paul Neergaard); Plenum-Komitato de SAT, „Ni staras fortaj", *Sennaciulo* 15. 1938/39, p. 25. – En 1937 estis refunkciigita „Komunistema Frakcio (3-a Internacio)" en SAT, kies sekretario estis la dano Poul Thorsen. Pli frue estis fonditaj „Sovetkomunista Frakcio", kiu pledis por la restarigo de „sovetoj", kaj la trockiisma „Bolŝevist-Leninista Frakcio".
2. Vd. i.a. *Sennaciulo* 13. 1936/37, p. 25; *Popola Fronto* 2. 1937, n-ro 10 (15 mar.), p. 6; *Sennaciulo* 13. 1936/37, p. 70, 73-75; *Popola Fronto* 2. 1937, n-ro 20/21 (1 sept.), p. 4-5; *La Socialisto* 11. 1937, n-ro 3 (sept./okt.) p. 6. – Aparte interesas la publikaj leteroj, kiujn interŝanĝis la hispana SAT-ano Guillermo Bosch kaj Lanti. „Publika letero pri sennaciismo" de Bosch, de 29-1-1937, aperis kiel aldono al *Popola Fronto*, n-ro 18 (15 jul. 1937); la respondo de Lanti, „Ĉia diletantismo estu for!", de aŭgusto 1937, aperis en *Sennaciista Bulteno*, n.s. 1937, n-ro 2, p. 3-6. Ambaŭ tekstoj estas denove publikigitaj en la broŝuro E. Lanti, *Herezulo. Herezaĵo*, Laroque Timbaut 1975, p. 29-41.
3. Lanti kaj Nekrasov interŝanĝis komunikojn (pere de Vilmos Bleier) ankoraŭ en 1932. Nekrasov demandis Lanti, ĉu „eble ni denove povos trovi la vojon por tiu kunlaborado, kiu forte amikigis nin iam antaŭ dek

peranto de kontaktoj kun laboristaj esperantistoj ekster Soveta Unio estis tro evidenta, por ke la disrompiĝo de unueco ne lasu profundan vundon. La membroj de SAT en Soveta Unio estis kvazaŭ forŝiritaj de intima hejmo; por ili la ĉeso de livero de *Sennaciulo* signifis la adiaŭon al revuo, al kiu ili ofte kontribuis, per kiu ili konigis siajn korespond-dezirojn kaj kiu provizis ilin per legonutraĵo jam ne plu trovebla en sovetaj gazetoj. Estas dubinde, ĉu la teoriaj diskutoj pri sennaciismo aŭ la pikoj de Lanti kontraŭ la soveta patriotismo multe malagrabligis al ili la legadon. Fakte, ĝis tuj antaŭ la skismo *Sennaciulo* neniel povis esti konsiderata kiel kontraŭsoveta revuo. Eĉ male: Ankoraŭ fine de 1928 Lanti varbis por la subteno de Drezen, plendante ke „en Moskvo oni ne ĝuste taksas mian laboron", dum efektive li multe strečas „por malhelpi atakojn kontraŭ Sovetio". Li aldonis: „Eĉ inter komunistoj oni riproĉas, ke mi ne permesas diri la ‚veron' ktp."[1] Kaj en sia redakta raporto por la Londona Kongreso Lanti skribis, ke „la materialo ricevita el Sovetio estis precipe abunda", ke aperis en la agadjaro 1929/30 entute 60 artikoloj pri Soveta Unio kaj ke intence li „enmetis nur favoran materialon pri Sovetio, ĉar ni konsideris, ke aperas sufiĉe da malfavora materialo en burĝaj gazetoj". La kritiko kontraŭ tio ne mutiĝis; komence de junio 1930 parizaj SAT-anoj rezoluciis kontraŭ la tro laŭda raportado de *Sennaciulo* pri Soveta Unio.[2] Sed se plendis sovetaj legantoj mem, ili ĉefe turnis sin kontraŭ la abundo de artikoloj pri sia lando.[3]

---

jaroj", sed samtempe esprimis sin skeptike, ĉu eblas „korekti tiun grandiozan katastrofon, kiu okazis" (letero al Bleier, de 18-4-1932). En sia respondo (letero de 4-5-1932), Lanti certigis al Nekrasov, ke liaj „sciigoj, konsiloj, sugestoj estos ĉiam bonvenaj k atentataj". Pli frue, Nekrasov estis skribinta (en letero al Richard Lerchner, de 17-7-1931): „Ankoraŭ nun mi konservas mian malnovan amon al Lanti, sed kiam mi vidas liajn nunajn agaĉojn, mi kordolore pli kaj pli senreviĝas."

1. Letero de Lanti al Drezen, de 25-12-1928. – Lanti skribis al Demidjuk, ke „la komunistoj pli ol iuj ajn aliaj havas intereson..., ke nia Asocio ne aspektu komunista" (letero de 4-2-1929); en alia letero li nomis la atakojn de komunistoj kontraŭ la Direkcio aparte ĉagrenaj pro tio, ke ili helpas „plifortigi la influon de la social-demokratoj", kaj ĉi-rilate avertis kontraŭ Jonas, Sproeck kaj Revo (letero al Demidjuk, de 27-8-1930).
2. *Protokolaro ... Londono*, p. 20, 31. – Lanti distancigis sin de la rezolucio, ĉar ĝi „iel povas aspekti kiel kontraŭsovetia" (letero al Krjukov, de 10-11-1930).
3. *Protokolaro ... Londono*, p. 20.

Nemirige do, ke la interrompo de livero de *Sennaciulo* lige kun la montranssenda problemo ŝokis la sovetajn SAT-anojn. La Centran Komitaton de SEU atingis insistaj petoj, ke ĝi ordigu la transpagon de la kotizoj de SAT, ĉar la disvolviĝon de la loka movado tre malhelpas la foresto de *Sennaciulo*, la revuo „tiel de ĉiuj ŝatata k legata".[1] Precipe post kiam pro la cenzuro aldone iĝis maleble profiti donac-abonojn, multaj skribis amarajn leterojn al SAT, en kiuj ofte – ĉu prave aŭ ne – la kulpo pro tiu situacio estis donita al la CK en Moskvo.

Kiel ni vidis, Lanti post komenca hezitemo larĝe utiligis tiujn leterojn en sia sindefendo kontraŭ la komunistaj atakoj. Deklarante, ke *Sennaciulo* restas lojala al Soveta Unio, kaj eĉ esprimante komprenemon por la ekzisto de cenzuro malhelpe al „la spionado de la kapitalistaj landoj k la konspiroj de la blankuloj", li celis diferencigi inter Soveta Unio unuflanke kaj la ambiciaj interesoj de la CK de SEU aliflanke. „Danĝeraj malamikoj de Sovetio troviĝas en Moskvo mem"[2], estis lia drameca konkludo. Verŝajne Lanti pravis supozante, ke multaj sovetaj esperantistoj malŝatas Drezen kaj emas sekvi la rezonadon, ke la skisma danĝero fontas el lia regemo. Sed – aŭ naive aŭ intence – Lanti silentis pri la politikaj kondiĉoj, kiuj plej malfrue meze de 1930 pelis la CK al konfrontiĝo kun SAT, kaj pri la premo, sub kiu troviĝis Drezen mem. Postulante revenigi SAT al klasbatalaj pozicioj kaj tiel dependigi ĝin de Komintern, la CK sciis sin plene akorda kun la aktualaj taskoj proklamitaj por la sovetaj civitanoj kaj sekve starigantaj ankaŭ la kondiĉojn por plua agado de SEU, eĉ se ĝi ne ricevis eksplicitan ordonon kaperi la gvidadon de SAT. Pro tio la provo de Lanti apelacii al la solidareco de la sovetaj SAT-anoj trans la kapojn de la CK kaj prezenti Drezen kiel karieriston kaj kaŝitan neŭtraliston estis, se ne memtrompo, minimume nebuligo de la politika kunteksto, en kiu disvolviĝis la konflikto inter SAT kaj la komunista opozicio.[3]

1. La 25an de julio 1930 la esperantistoj de Nijnij-Novgorod decidis fari tian peton al la CK de SEU: *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 88.
2. *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 303-304.
3. Ŝajnas, ke Lanti tion baldaŭ komprenis. En oktobro 1936 li skribis al siaj amikoj en Parizo: „Kiam oni konas la situacion en Sovetio, oni povas esti indulga eĉ al Drezen." *Leteroj de E. Lanti*, p. 129.

Plie, tiu provo estis danĝera por la sovetaj SAT-anoj, ĉar la atakoj el Parizo ne povis skui la pozicion de Drezen. Jam antaŭ ol la Direkcio en semptembro 1930 malfermis sian kampanjon kontraŭ Drezen, Ivan Lidin, antaŭa membro de la CK de SEU, estis transdoninta al la Partia Kontrolkomisiono materialojn malfavorajn pri Drezen. Sekve, tiu ricevis „severan mallaŭdon kun averto".[1] Post refoja esploro, tamen, la kontrolorganoj deklaris Drezen „absolute pura de tiuj malĝustaj atakoj"; Lidin estis eksigita el SEU.[2] Drezen ricevis helpon ankaŭ de du antaŭaj kontraŭuloj, la CK-anoj Demidjuk kaj Nikol'skij, kiuj pli frue estis akuzintaj lin pro tro maldekstra sinteno resp. troa mildeco: Ili rebatis la kulpigon de la Direkcio per longaj artikoloj.[3] Ĉar en la leteroj de sovetaj SAT-anoj ofte troviĝis plendoj pri la „teruro de Drezena kompanio"[4] kaj asertoj, ke oponintoj de Drezen „trafis malliberejon" aŭ estis timigitaj „per polica domtraserĉo"[5], Nikol'skij opiniis necesa eksplicite nei, ke iu „pro ne konsento kun Drezen trafis malliberejon".

Se ne malliberigon, almenaŭ silentigon atingis la CK en la kazo de tiuj, kiuj kuraĝis protesti la batalon de SEU kontraŭ SAT. Maksim Krjukov en Irkutsk, partiano de 1904, kiu en 1907 renkontiĝis kun Zamenhof[6] kaj en oftaj kontribuaĵoj al *Sennaciulo* elstarigis, foje per aŭdacaj ekzemploj[7], la revolucian karakteron

1. Leteroj de Lidin al Marceau Dessoit, Parizo, de 31-12-1929 kaj 6-1-1930; „Kiel la Centra Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio klopodas por ke SAT ‚evitu la rifon'", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 531; vd. ankaŭ *Sennaciulo* 8. 1931/32, p. 151.
2. *Bulteno de CK SEU* 1929, p. 160; „5-a Kongreso de Sovetrespublikara Esperantista Unio", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 132, E.D., „Paraleloj", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 123; N. Bartelmes, L. Glodo (Glodeau), „Paraleloj", *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 327. – Lidin poste deklaris, ke la decido de la Partio „tute kontentigas lin", kaj petis reanigon.
3. G. Demidjuk, „Kial Lanti atakas personojn?", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 13; sama, „Kial?...", samloke, p. 45-46; R. Nikolskij, „Kontraŭ kalumnioj pri k-do Drezen", samloke, p. 212-213 (ruslingve: „Protiv klevety na tov. Drezena", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 98-99).
4. *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 280.
5. „Raporto de la Kontrol-Komitato", *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 340.
6. Maks Krjukov, „Rememoroj pri Zamenhof", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 313-314.
7. M. Krjukov, „Niaj kontraŭuloj estas analfabetaj en politiko", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 382-383. – Traktante la kontraŭstaron al Esperanto inter laborist-movadaj gvidantoj, Krjukov donis tabelon pri la klasa deveno de famaj revoluciuloj, inkl. de Lenin („etburĝo, ido de regna oficisto").

de sennaciismo, en 1930 en letero al la estraro de la Komunista Frakcio riproĉis ĝian „malutilan malpacigan aplomban rilaton al organizo de unuecfronto SAT". Tiun leteron SEU publikigis en sia ruslingva revuo kun minaca komento.[1] Depost tiam, laŭ la konstato de Lanti en Amsterdamo, Krjukov silentis.[2]

Aludoj pri „perfiduloj" inter la sovetaj esperantistoj[3] klare montris, ke SEU ne intencis allasi dubojn pri sia volo elimini ĉiujn, kiuj konservis rilatojn kun la Direkcio en Parizo. Paralele kun sia laboro por „reorganizo" de la internacia proleta Esperanto-movado ĝi intensigis la fortostreĉojn por restarigi enlande la organizan kaj ideologian koheron. La membroj estis alvokataj eltrovi kaj senmaskigi adeptojn de Lanti en siaj vicoj; al la „plej obstinaj" la CK minacis eksigon el SEU.[4] Pedante estis registritaj la nomoj de SEU-membroj, kies pozicio en la konflikto kun SAT ŝajnis neklara, kaj pri la loka movado en Barnaul, kiu malobservis la direktivojn de SEU, averte estis deklarite, ke ĝi „estas destinita, inter kondiĉoj de soveta konstruado, al fiasko".[5] Kie ajn montriĝis signoj de devio, la CK tuj publike ilin skurĝis. Ekzemple, pri la grupo en Kofima estis notite, ke ĝi al centoj da homoj „neŭtralece" instruas Esperanton, sen doni al ili „vivan laboron" per korespondado. Por ilustri, ke tie regas „plena dekadenco", estis cititaj la vortoj de unu Esperanto-lernanto:

Kompare montrante ke Zamenhof estis „nur simpla k malriĉa okulisto", li konkludis, ke la kontraŭuloj de Esperanto estas „ordinare burĝe poliglotaj".

1. „Dvurušnikov – k otvetu!" (Duvizaĝulojn – al respondo!), *Mejdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 275. – Krjukov skribis al Lanti (poŝtkarto de 11-10-1930), ke li intencas plendi al „partiaj aŭtoritatoj" pri la stato de la aferoj inter SEU kaj SAT.
2. *Protokolaro ... Amsterdamo*, p. 10.
3. „En komenco de la deka jaro", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 2.
4. Ruslingva cirkulero de la CK, de 31-10-1930; cit. *Historio pri la skismo en la laborista Esperanto-movado*, Paris 1935, p. 15. – Por simila postulo vd. „El rezolucio de SAT-kunveno en Stalino", *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 161.
5. „Voĉoj el Sovetio", *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 303 (fragmento el protokolo de kunsido de la sekretariaro de CK de SEU, de 18-4-1931). – Baldaŭ poste venis informo, ke la movado en Barnaul „disŝutiĝis en polvon", ĉar ĝi sekvis „la vojon, diktatan de Lanti": „La vivo argumentas", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 73.

> Kial mi skribu pri mia vivo al alilandaj k-doj, se mi estas nur oficisto, t.e. pariao, forrifuzito, se miaj infanoj ne lernas en lernejo, se mi preskaŭ nenion ricevas el produktejo, se post la laboro mi ne ripozas, sed laboras en arbaro aŭ staras en antaŭbutikaj vicoj ktp.?

Ankaŭ tiaj „fiparoloj" estis atribuitaj al influo de Lanti. La sekvo estis, ke la Landa Komitato de Ivanovo „decidis fari personan purigadon de ĉiuj urbaj esperantistoj" en Kofima.[1]

Kiom vasta fakte estis la malkontento inter la sovetaj esperantistoj pri la ĉesigo de siaj rilatoj kun SAT, ne plu eblas konstati.[2] Sendube, multaj pli-malpli frue akceptis la oficialan tezon, ke SAT degeneris al „socialfaŝisma" organizaĵo kaj transiris en kontraŭsovetan tendaron. Kiuj dubis pri tio, estis silentigitaj iom post iom, dum la CK de SEU sentigis sian firman volon ne toleri opozicion kaj denunci ĉiun malsamopinianton kiel amikon de eksterlandaj renegatoj aŭ eĉ kiel perfidulon de socialismo. La plej multaj membroj de SEU kredeble preferis plue praktiki la lingvon malgraŭ la ŝanĝiĝinta situacio. Kelkaj el ili, dank' al varbkampanjo de *Heroldo de Esperanto* por donac-abonoj por sovetaj esperantistoj, ĝoje profitis la eblecon senkoste ricevi tiun neŭtralan gazeton.[3] Kvankam *La Socialisto* en Aŭstrio konjektis en 1931, ke inteligentaj esperantistoj en Soveta Unio retiriĝas el la organizaĵo „por mute protesti kontraŭ la intelekta endogamio"[4], la oficiala statistiko de SEU montris kreskon de la membraro. Nome, fine de 1930 estis 5116 membroj en 686 lokoj, unu jaron poste 5740 en 884 lokoj[5], kaj dum la Kvina Kongreso de SEU fine de novembro 1931 en Moskvo Drezen eĉ konstatis, ke „la movado superkreskis la ĝisnunajn formojn" kaj ke diversloke

1. N. Sumarin, „Rezultoj de renegata laboro", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 75-76.
2. SEU mem notis: „Necesas konfesi, ke multaj el niaj k-doj estis lerte trompataj de Lanti, portinta en la poŝo eĉ bileton de komunista partio...": „Laboristaj esperantistoj forskuis de si sinjoron Lanti", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 86. – Estas ankaŭ menciinde, ke el la ses sovetaj membroj de la Ĝenerala Konsilantaro de SAT (Izgur, Juŝmanov, Albanov, Gol'dfeder, Krjukov kaj Baĵenov) nur unu, Juŝmanov, aliĝis al la opozicio, laŭ atentigo de Lanti: *Protokolaro ... Amsterdamo*, p. 10.
3. „Donu por trinki al la soifantoj!", *Heroldo de Esperanto* 12. 1931, n-ro 17 (617), p. 1. – Estis raportite el unu soveta urbo, ke tie unu ekzemplero de la gazeto estas legata de pli ol okdek personoj.
4. F.S., „Ein organisatorisches Problem", *La Socialisto* 6. 1931, p. 94.
5. *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 142.

„estas efektivigata brilanta modela esp. laboro". Li pentris ĝenerale optimisman bildon pri la estonteco.[1]

En la kongreso, kiu okazis post plurfoja prokrasto[2], partoprenis 119 delegitoj el 45 lokoj; el tiuj 70 estis oficistoj kaj 49 laboristoj.[3] La fakton, ke 41% de la kongresanoj estis laboristoj, SEU nomis aparte fierinda karakterizaĵo, „ĉar ne estas sekreto, ke ĝis nun en Sovetio la absoluta plimulto de la esp.-istaro konsistis el oficistoj k studentoj".[4]

Kiel menciite, estis la celo de SEU plialtigi la procentaĵon de laboristoj en sia membraro, kiu ankoraŭ en septembro 1932 restis sub 33%.[5] Tiu celo estis proklamita sub la impreso de atakoj

1. „5-a Kongreso de Sovetrespublikara Esperantista Unio", samloke, p. 135.
2. Vd. sube, p. 400.
3. *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 140. – Laŭ partia aparteno, 40 delegitoj estis komunistoj kaj 26 junkomunistoj (kune 55%). Laŭ nacia aparteno, la rusojn (66) sekvis kiel plej fortaj grupoj la judoj (22) kaj ukrainoj (18). Laŭ aĝo, superregis 21- ĝis 40jaruloj. 77 sciis krom Esperanto neniun fremdan lingvon.
4. N. Nekrasov, „La 5-a kongreso de SEU unuanime voĉdonis por IUK", *Internaciisto* 2. 1932, p. 9.
5. Statistiko pri 3544 membroj de SEU montris la jenan laŭprofesian dividon: oficistoj 53,24%, laboristoj 32,62%, kamparanoj 7,03%, aliaj (lernantoj, ruĝarmeanoj ktp.) 7,11%. – 17,16% de la membroj apartenis al la Partio, 23,05% al Komsomolo. Viroj estis 74%. Interesas la ciferoj pri nacia aparteno:

Rusoj	1780	50,23%
Ukrainoj	786	22,18
Judoj	410	11,57
Kartveloj	136	3,84
Armenoj	84	2,37
Belorusoj	76	2,14
Germanoj	48	1,35
Ĉuvaŝoj	33	0,93
Poloj	31	0,87
Tataroj	25	0,71
Latvoj	19	0,54
Litovoj	12	0,34
Grekoj	11	0,31
29 aliaj naciecoj (po malpli ol 10)	93	2,62

La reprezentiĝo de rusoj kaj ukrainoj en la membraro de SEU ne multe diferencas de ilia procentaĵo en la tuta loĝantaro de Soveta Unio; tiu estis en 1926 47,5% resp. 21,4%. Sed atentinda estas la forta reprezentiĝo de judoj: Ili konsistigis pli ol 11% de la membraro, dum en la loĝantaro ili estis nur 2,4%.

flanke de la oficiala laborist-koresponda movado, ke la korespondado per Esperanto riskas altiri precipe etburĝajn elementojn. En la klopodoj liberigi sin de tiaj suspektoj ne mankis sukcesoj. Precipe en Ukrainio daŭris la kuraĝiga subteno de sindikatoj kaj Komsomolo al la uzo de Esperanto por internacia edukado.[1] Kiam en aprilo 1930 Tutsoveta Konsiliĝo por Kluba Laboro diskutis en Moskvo proponon por la utiligo de la lingvo fare de sindikataj kluboj, la tuta ukraina delegitaro voĉdonis por tiu propono, dum ĉiuj delegitoj el Moskvo, Leningrado kaj aliaj lokoj de RSFSR voĉdonis kontraŭ ĝi.[2] Kiel granda sukceso estis notita la fakto, ke la ĉeforgano de Komsomolo, *Komsomol'skaja pravda*, fine de 1930 por la unua fojo aperigis paĝon kun leteroj ricevitaj en Esperanto el diversaj mondpartoj.[3] Kaj en 1931 la Moskva Landa Intersindikata Konsilantaro akceptis decidon, kiu, atentigante ke Esperanto „povas kaj devas esti prepara ŝtupo al studado de fremdaj lingvoj", kuraĝigis al la organizado de Esperanto-rondetoj ĉe fabrikoj.[4]

Aliflanke, ne malofte okazis, ke lokaj gazetoj rifuzis materialon, deklarante ekzemple, ke ĉiuj eksterlandaj esperantistoj estas socialdemokratoj.[5] Eĉ la interveno de partia komitato, favora al Esperanto, foje ne povis ŝanĝi la negativan sintenon, kiun sekve de la kontraŭesperanta kampanjo de *Raboče-krest'janskij korrespondent* montris redakcioj al la utiligo de Esperanto-korespondantoj, kaj ankaŭ estis farita la observo, ke fabrikaj gazetoj entute ne multe interesiĝas pri internacia edukado.[6] La esperantistaj organizantoj de koresponda laboro tial

---

La statistiko pri la membraro de SEU (stato: 1-9-1932) estas publikigita en *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 71; el entute 3657 tiutempe rekotizintaj membroj en 581 lokoj 3544 respondis la enketon. La indikoj pri la tuta loĝantaro estas prenitaj el: Hélène Carrère d'Encausse, *Risse im roten Imperium. Das Nationalitätenproblem in der Sowjetunion*, Wien k.a. 1979, p. 64.

1. Sz. Carovskij, „Gekamaradoj, aktiviĝu!", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 175-176; V.K., „SEU-movado en Ukrainio kreskas kaj fortas", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 4-5 (kp. *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 40).
2. *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 130.
3. *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 79.
4. „Laboristaj sindikatoj subtenas esperanton", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 101.
5. *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 88 (pri Niĵnij-Novgorod).
6. *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 133.

ankoraŭ pli akcentis la neceson de kolektiva korespondado por povi pli celtrafe priservi la gazetaron. La eksterlandaj kamaradoj estis petataj forĵeti „malutilan individuismon"[1] kaj devis aŭskulti eĉ tiun ĉi admonon: „Nuntempe estas krimo antaŭ esp-o k sia klaso amuziĝi nur per persona korespondado."[2]

Ju pli akriĝis la konflikto kun SAT, des pli severaj iĝis la mobilizaj vokoj de SEU en rilato kun la korespondado. En novembro 1930 cirkulero de la CK transdonis al la organizaĵoj de SEU la direktivon, ke en sia korespondado kun eksterlando ili estonte „pritraktu unuavice la aktualajn problemojn de sovetia vivo", kaj ĝi ankaŭ tuj precizigis la temojn, kiujn necesas atenti „por la proksima tempoperiodo", nome:

> la proceson de „Industria Partio"[3], la vastajn planojn de detrimentado (detruiga malhelpado) en diversaj fakoj de sovetia ekonomio, malkovritajn de OGPU (Ŝtata Politika Administr[ac]io) kaj evidentigitan kunligon inter detrimentistoj de sovetia ekonomio kaj eksterlandaj kapitalistaj grupoj kaj ŝtatorganizoj, ellaborantaj la planojn de la nova militinterveno.[4]

Baldaŭ poste la CK kontente registris, ke la novajn gvidliniojn oni jam fidele observas sur regiona nivelo:

> Nia korespondada laboro jam eliris el kadroj de simpla kolektado de poŝtmarkoj kaj kartoj, ni plenumas socian-politikan taskon per informado de eksterlandaj gelaboristoj pri niaj mirindaj sukcesoj en la socialisma konstruado en la orientaj respublikoj de USSR.[5]

Ĉar plue estis dezirinde pruvi ankaŭ al la enlanda publiko la servokapablon de Esperanto, oni atendis kompensojn flanke de la eksterlandaj korespondantoj. Sed tiuj bedaŭrinde ofte postlamis: Kiel plendis Dmitrij Snejko jam en marto 1930, ili ne live-

1. A. Erjuĥin, „For individuismon", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 266.
2. S. Boĵev, „De individua al kolektiva korespondado", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 332. – Tiu admono des pli validis por la sovetaj esperantistoj mem. Unu, ekzemple, estis laŭnome atakita i.a. pro tio, ke li korespondas kun eksterlando „por sia propra plezuro" kaj ne disponigis iun el la ricevitaj leteroj al la tabulo „Esperanto-vivo": V. Fuchs, „Ni kontrolu niajn vicojn!", *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 25.
3. Pri tiu proceso SEU publikigis la broŝuron: *Preparantoj de milito. Akuza konkludo en la proceso de Industria Partio*, Moskvo 1930. – La broŝuro, kiu aperis en eldonkvanto de 6000 ekzempleroj, estis sendita al eksterlandaj korespondantoj.
4. „Al organizoj de SEU, al sovetiaj PEK-filioj", *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 169.
5. Kokanda rajona Komitato de SEU, „Ne ekzistas baroj por disvolvo de nia movado", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 57-58.

ris raportojn pri la sinteno de sialandaj laboristoj je la Kvinjara Plano nek „pri teknika helpo al USSR, pri kolektado de mono por aĉeti traktorojn al Sovetiaj vilaĝoj". Dum komunist-partiaj gazetoj „batalas per viva, aktuala lingvo de bolanta vivpulso", la materialo entenata en *Proleta Esperanto-Korespondanto* (PEK) estis, laŭ Snejko, ne sufiĉe interesa, seka kaj ofte ne utila.[1]

La plendo de Snejko aperis ĉirkaŭ la sama tempo, kiam flanke de SEU multiĝis alvokoj „direkti la tutan korespondadon al teknika helpo por industriigo de la lando kaj por kolektivigo de agrikulturo".[2] En tiuj alvokoj, faritaj en la jaro 1930, kiam okazis interalie la amasa deportado de „kulakoj", montriĝis la efiko, kiun la Kvinjarplano, pelanta la tutan Sovetan Union al grandega industriiga fortostreĉo, neeviteble havis ankaŭ je la esperantistoj. Ili ne povis stari flanke, dum Stalin por bona noto fare de ĉiu soveta civitano deklaris en februaro 1931: „Ni postrestis la progresintajn landojn je kvindek ĝis cent jaroj. Ni devas trakuri tiun distancon en dek jaroj. Aŭ ni kapablos tion fari aŭ ni estos frakasitaj."[3] SEU konsciis, ke novajn taskojn metos sur ĝin la plirapidigita konstruado de socialismo – ke ĝi „devas esti pli proksime ligita kun la produktado, kun la amasoj".[4] En la praktiko tio signifis, ke la utiligo de Esperanto havu sencon malpli por stimuli la mondrevolucian fervoron de ĉiulandaj laboristoj, ol por havigi aklamon kaj subtenon al la industriigo de Soveta Unio.

Kiugrade la sovetaj esperantistoj montriĝis kapablaj transiri al la nova, produktad-orientita maniero de korespondado, ni klopodos anilizi, almenaŭ parte, en alia loko. Sed se temas pri la ekstersovetiaj esperantistoj kaj la de ili atendata servo al la soveta industriigo, la plendaj rimarkoj de Snejko supozigas, ke la sinadapto de laboristoj en la kapitalistaj landoj estis malrapida.

1. Dim. Snejko, „Kiel ni verku por ‚PEK'?", *Proleta Esperanto-Korespondanto* 1. 1929/30, p. 32.
2. „Sur la vojon de praktika partopreno en la socialisma konstruado (Pri 1-a Moskva landkonferenco de SEU)", *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 47.
3. Cit. Karl-Heinz Ruffmann, *Sowjetrußland. Struktur und Entfaltung einer Weltmacht*, München 1967, p. 111.
4. „Plivastigita plenkunsido de CK SEU en Moskvo la 25 kaj 26 de julio 1931", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 87 (raporto de Incertov).

Fakte, postuli ankaŭ de ili ĉefe prisovetajn materialojn kaj malpli, kiel estis tradicie, informojn pri la vivkondiĉoj en ilia lando ne estis aparte inspire – kaj estas cetere dubinde, ĉu tiaj materialoj, se liveritaj kaj presitaj, ankoraŭ povis variigi la monotonecon de sovetaj gazetoj kaj tiamaniere turni atenton al la fontolingvo. Ĉiuokaze, se akorde kun partia direktivo SEU petis el eksterlando teknikan helpon en formo de faka materialo kaj eĉ „aĵoj"[1], ĝi evidente ne konsciis, kiom per tiu peto ĝi ne nur trostreĉis la bonvolon, sed ankaŭ malkonsideris la kompetentecon de siaj eksterlandaj laborist-korespondantoj.

En aprilo 1931 la Centra Komitato de la Komunista Partio dekretis reorganizon de la movado de laborist-kamparanaj korespondantoj en Soveta Unio.[2] Kritikante ke la korespondantoj tro ofte okupiĝas pri ĝeneralaj problemoj, la Partio postulis de ili estonte dediĉi sian atenton ekskluzive al fakspecifaj problemoj. La movado estis subigita al la gvido de *Pravda*. Per tio la Partio, kiu je la fino de la Kvinjarplano elstarigis la bezonon havi specialistojn, celis definitive likvidi la riskon, ke ĉe la bazo formiĝu spontanea, nekontrolata agado, kiu estus neakordigebla kun la burokrata centrismo.[3] Ĉar la redakcioj pli kaj pli rezignis pri la helpo de „specialaj korespondantoj" en laborejoj kaj preferis utiligi profesiajn ĵurnalistojn, kiuj estis pli spertaj ekspliki la partian linion, la graveco de la koresponda movado, iam instiginta al amasa agado ĉe la laborfronto, de tiam konstante malkreskis.

Se jam la enlanda reto de laborist-kamparanaj korespondantoj estis submetita al kuratoreco, la internacia korespondo-movado, precipe tiu per Esperanto, ne povis farti pli bone – aŭ eĉ malpli, ĉar ĝi estis malplej proksima al la aktualaj produktadaj bezonoj. La admona tono de SEU atingis ankoraŭ pli altan ŝtupon. Sovetaj esperantistoj, kiuj anoncis korespond-deziron en *Heroldo de*

1. P. Tilin, „Tri gravaj problemoj", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 45; N. Nekrasov, „La 5-a kongreso de SEU...", *Internaciisto* 2. 1932, p. 10.
2. SEU publikigis la dekreton en sia organo: „O perestrojke rabsel'korovskogo dviženija. Postanovlenie CK VKP (b) ot 16 aprelja 1931 goda", *Meždunarodnyj jazyk* 9. 1931, p. 153-154.
3. Guski, „Zur Entwicklung der sowjetischen Arbeiter- und Bauernkorrespondentenbewegung 1917-1932", p. 100-101.

Esperanto kaj kies dankleteroj pro donac-abono aperis en tiu neŭtrala revuo, revidis siajn leterojn en piloriaj artikoloj de la organo de SEU, kie ili estis atakataj kiel homoj, kiuj petas „burĝan almozon" kaj profitas „falsan filantropion".[1] Dum la kongreso de SEU Nikol'skij furiozis, ke „restas ankoraŭ inter ni elementoj, kiuj estas fremdaj al la revolucio kaj eluzas sian SEU-anecon por kontraŭrevoluciaj celoj", menciante la parencon de kulako, kiu en kunveno minacis informi per Esperanto la mondon pri la persekutado de kulakoj. Nikol'skij ankaŭ diris, ke sovetaj esperantistoj, kiuj, „korespondante kun aliaj landoj, okupas sin pri iuj belaj bildkartoj", perfidas la celojn de la movado: „Oni devas senkompate elĵeti el internacia korespondado la senpolitikecon."[2]

La sekvoj de tiuj severaj admonoj, nome kreskanta stereotipeco de la skribaĵoj venantaj el Soveta Unio, estis baldaŭ registrataj en eksterlando. Jam meze de 1931 *La Socialisto* en Vieno observis: „Ŝajnas, ke la tuta Esperanta korespondado komencas iĝi malagrabla al iuj homoj, kiuj sekve provas aranĝi ĉirkaŭiron de la rekta leterinterŝanĝo de laboristo al laboristo."[3] Kiel plej freŝan ekzemplon por tiu tendenco la gazeto indikis la fakton, ke leterojn el Soveta Unio komencis akompani aŭ eĉ anstataŭi presitaj folioj, kiuj portis la titolon *„La vero pri Sovetio.* Niaj respondoj al alilandaj laboristoj". En tiuj folioj, de kiuj SEU ekde 1931 eldonis minimume 15 en kvanto de 7 000 ĝis 10 000 ekzempleroj[4], estis responditaj interalie la jenaj demandoj:

> Ĉu estas vero, ke laboristoj en Sovetio malsatas?
> Ni ne komprenas: vi, sovetiaj kamaradoj, ĉiam skribas pri sukcesoj de la socialisma konstruado, sed samtempe – vi alarmas pri diversaj „breĉoj".

1. *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 13, 79; vd. ankaŭ la memkritikon de unu atakito en *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 19. – Plendon pri „naŭza servopetemo" de sovetaj esperantistoj, fare de Ralph Bonesper (Novjorko), citis la artikolo „Ne misuzu korespondemon de alilandaj kamaradoj!", *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 44.
2. „5-a Kongreso de Sovetrespublika Esperantista Unio", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 133.
3. F. Seidl, „Wie sollen wir korrespondieren?", *La Socialisto* 6. 1931, p. 72.
4. En la Biblioteko de UEA troviĝas n-roj 6 ĝis 12, ĉiuj el 1931, krome tri folioj sen indiko de numero kaj jaro. Sed ankoraŭ en 1933 aperis tiutitola bulteno kiel eldonaĵo de la moskva PEK-centro.

Kial k-do Litvinov en Ĝenevo parolas pri la senarmiĝo, sed samtempe la Sovetia registaro pligrandigas la batalforton de sia Ruĝa armeo?
Kial Trockij estas eksigita el la komunista partio kaj ekzilita el Sovetunio?
Ĉu ĉiuj laboristoj en Sovetio ĝuas la sephoran labortagon?
Kion signifas ke Sovetio finas nunjare (t.e. en 1931) konstruadon de la fundamento de socialisma ekonomio? Ĉu en la sekvonta jaro en via lando jam estos la socialismo?

La folioj estis destinitaj faciligi al la membroj de SEU, inter kiuj, denove laŭ Nikol'skij, „treege ofte renkontiĝas politika analfabetismo", la taskon doni trafan respondon al la demandoj de siaj eksterlandaj korespondantoj. Ke la demandoj kutime similis unu la alian, tiel ke montriĝis ekonomie respondi ilin per presitaj folioj, povus esti unu klarigo por la helposervo de SEU, sed pli verŝajne estas, ke la demandoj el eksterlando plej ofte estis tiklaj kaj tial necesigis poluritan respondon. Ke fakte la malfacilaĵoj fontis ĝuste el tio kaj ke ankaŭ flugfolioj jam ne plu sufiĉis por venki ilin, ni povas konkludi el notinda raporto, kiun donis loka grupo de SEU frue en 1931: En Tuapse ĉe Nigra Maro la SEU-ĉelo postulis de ĉiuj siaj membroj, kiuj korespondis kun eksterlando, viziti politikan lernejon de la partio. Krome, ĝi estis en regula konsulta rilato kun la kulturpropaganda fako de la loka partia komitato. La celo de instruiĝo kaj konsultado estis kiel eviti politikajn erarojn en la internacia korespondado kaj levi la „kvaliton" de la leteroj, ĉar estis farita la sperto, ke „eksterlandaj k-doj donas demandojn, pri kiu eĉ ne ĉiu komunisto povas respondi".[1]

Kiom tiklaj povis esti tiuj demandoj, pri tio la organo de SEU mem donis karakterizan ekzemplon. Ĝi citis el letero de franca admiranto de Soveta Unio al lia korespondanto la peton, ke tiu liveru al li klarigojn pri la sendube tute nekredindaj asertoj trovitaj en franca katolika gazeto: „En Rusujo ... oni vidas en la kamparo grandajn arojn de malfeliĉaj infanoj. Ili estas forlasitaj kaj vivas, kiel ili povas. Multaj mortas pro malsato."[2]

1. B. Belakov, „Evitu politikerarojn dum internacia korespondado", *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 46.
2. S. Levickij, „Kio interesas eksterlandan instruiston", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 29.

Nemirige, la korespondado rapide perdis sian sukon. La grupo de GLEA en Munkeno spertis, ke sovetaj korespondemuloj eksilentis, ricevinte la unuajn leterojn. Je ĝia korespond-anonco ja venis proksimume 40 leteroj el Soveta Unio, sed kiam la germanaj kamaradoj reskribis, iliaj leteroj ŝajne estis tiel embarasaj, ke el la kvardeko nur kvar-kvin respondis.[1] La malskribemo de sovetaj esperantistoj precipe indignigis la senrezervajn adeptojn de Soveta Unio, kiel montris reagoj de la germanaj komunistoj Otto Bäßler kaj Walter Kampfrad, kiuj apartenis al la unuaj opoziciuloj eksigitaj el SAT. Bäßler raportis pri vaste aŭditaj plendoj „pri nefunkciado de la korespondado" inter Germanio kaj Soveta Unio. Se tamen venis leteroj, tiam ilia enhavo estis seniluziiga:

> Kaj kion ni plejparte ricevas por legi en ĉi tiuj leteroj? „Ni estas patrio de l' mondproletaro, ni plenumas kvinjarplanon en kvar jaroj, ni konstruas socialismon, tie kaj tie estas konstruita tiom kaj tiom granda uzino, en ĝi laboras tiom kaj tiom da laboristoj k.t.p." Poste ankoraŭ sekvas la adreso en esperanta, rusa aŭ ukraina lingvoj – kaj tio estas plej ofte ĉio.

Leterojn kun tiaspeca enhavo Bäßler konsideris kvazaŭ insulto al sia ligiteco kun Soveta Unio: „Ni tion scias kaj kredas, ni ja estas komunistoj." Anstataŭ uzi batalvokojn kaj gazetstilajn parolturnojn, admonis Bäßler, la sovetaj kamaradoj skribu „per simpla, primitiva lingvo de proleto" pri sia labora kaj kluba vivo, familio, laborkondiĉoj kaj salajroj. Por substreki, kiajn malutilajn sekvojn havas frazeologia korespondmaniero, li menciis, ke 70-membra komunista ĉelo en Leipzig ĉesigis sian kolektivan korespondadon kun granduzino en Ĥarkovo, „argumentante, ke ĝi ne ŝatas legi gazetartikolojn".[2]

Tute simile, Kampfrad plendis, ke la kolektivan korespondadon malhelpas la soveta flanko – aŭ per silento aŭ per agiteca respondo. Amare li raportis, ke en Germanio plurfoje okazis, ke post multe da peno kaj sub „daŭra minaco de maldungo" esperantista laboristo persvadis siajn kolegojn en la fabriko komenci korespondadon kun soveta fabriko, sed ke „en 95 okazoj el 100" la rezulto „estas ĉio alia, nur ne ĝojiga". Aŭ tute ne venis reago

1. Ludwig Schlamp, „Plendo (Letero al Redakcio de ‚Bulteno')", *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 36.
2. O. Bässler, „Alvoko", *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 52.

aŭ la sovetaj laboristoj respondis „per nenion diranta frazaro pri socialisma konstruado, pri grandioza Ruĝa armeo k.t.p." kaj per informoj delonge konataj, ekzemple „ni venkis nian kapitalistaron ... kaj ni esperas ke vi venkos la vian". Post tio, laŭ Kampfrad, la germanaj laboristoj, kiuj deziris interalie sciiĝi pri salajroj en rilato al vivkostoj en Soveta Unio, ĝenerale perdis la emon je plua kontakto.[1] Ankaŭ japanoj ĉagrenite riproĉis al la sovetaj esperantistoj, ke ili estas inertaj, ĝuste kiam oni „sopiras scii ĉion pri Sovetio".[2]

SEU mem publikigis tiujn plendojn, apelaciante al siaj membroj, ke ili nepre respondu la leterojn ricevitajn el eksterlando. Ĝi eĉ ne faris provon ŝovi parton de la kulpo pro mankoj en la korespondado ankaŭ al la eksterlandaj kamaradoj. Tiuj fakte klopodis esti servemaj al SEU ĝis ekstremo kaj pruvi la utilon de Esperanta korespondado ankaŭ per plenumo de la peniga tasko doni teknikan helpon al la socialisma konstruado. Ekzemple, la PEK-filio en Munkeno deklaris sian pretecon „liveri: ĝenerale – sciigojn pri maŝin-konstruado kaj speciale – sciigojn pri fabrikado de flugmotoroj, veturilmotoroj kaj konstruado de fundamenthavaj (Diesel) motoroj".[3] La oferton akompanis la peto sendi nur „konkretajn dezirojn teknik-bazajn" kaj flankenlasi korespondon cele al interligo de fabrikoj, „ĉar tio nur malrapidigus nian intencon, helpi al la teknika konstruo en USSR".[4]

4.2.6. *Distanciĝo inter SEU kaj IPE*

La efikec-orientita laboro de la munkena PEK-filio ne plu povis rikolti fruktojn, ĉar tre baldaŭ la politika evoluo en Germanio igis malebla la konservon de rilatoj kun sovetaj esperantistoj.

1. W. Kampfrad, „Pekoj kontraŭ ‚PEK'", *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 60. – Pri konkreta ekzemplo de malsukcesinta interligo de germana kaj soveta fabrikoj vd. „Kiel iuj sovetiaj kamaradoj perfidas la laboron", *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 17. Specimeno de letero verkita en la nomo de laboristoj de fabriko en Moskvo estas presita en *Sennaciulo* 8. 1931/32, p. 147.
2. Japana PEK-servo, „Alarmon al sovetiaj esperantistoj!", *Bulteno de CK SEU* 12. 1933, p. 32.
3. „Teknika helpo al socialisma konstruado", *Bulteno de CK SEU* 12. 1933, p. 32.
4. „‚Teknika helpo al la socialisma konstruo de USSR!'", *Internaciisto* 2. 1932, p. 111.

Per la potencpreno de Hitler ankaŭ la nur kelkmonata ekzisto de Internacio de Proleta Esperantistaro ricevis fortan baton, ĉar GLEA, la germana sekcio, kiun dissolvis la nazioj, estis unu el ĝiaj du ĉefkolonoj. Por transvivi kiel atentinda organizaĵo IPE tial bezonis la plenan subtenon de sia alia kolono – de SEU.

En Moskvo establiĝis provizora oficejo de IPE.[1] Meze de 1933 SEU transformis sian *Bultenon* en la revuon *Sur Posteno*, kiu, anstataŭante *Internaciiston* laste aperintan en Berlino, proklamis sin samtempe organo de IPE. Tiun nov-aranĝon multaj ekstersovetiaj IPE-membroj rigardis kun miksitaj sentoj, ĉar ili memoris, ke fine de 1931 la tasko presi *Internaciiston* en Moskvo estis forprenita de SEU, pro daŭraj malfruoj en ĝia aperado, kaj transdonita al GLEA. Efektive, ankaŭ *Sur Posteno* eldoniĝis laŭ tiel neregula ritmo, ke jam post malpli ol unu jaro oni parolis pri la alternativo reaperigi *Internaciiston* en okcidenta lando[2], des pli ĉar la enhavo de *Sur Posteno* karakteriziĝis per malfacile digestebla kombinaĵo el furiozaj polemikoj kontraŭ la „socialfaŝistoj" en SAT[3] kaj tedaj komunikoj pri la kvinjarplanaj atingoj de Soveta Unio. Krome, kialon por grumbli plue donis al okcidentaj IPE-membroj la soveta kontribuo al PEK, do la publikigcela organizado de korespondado. La brito William Keable plendis, ke la soveta PEK-bulteno *Vero pri Sovetio* prezentas nenion novan, sed nur statistikojn kaj faktojn jam legitajn en la propra partia gazetaro, dum tio, kion avide akceptus la gazetoj, nome leteroj kun „priskribo de l' vivo de individuaj laboristoj" sovetaj ne venas.[4] Keable raportis, ke, kiam alproksimiĝis la datreveno de la Oktobra Revolucio, sovetaj esperantistoj „superŝutis nin per postuloj pri livero de salutleteroj". La britaj kamaradoj plenumis la peton, kvankam ili vane atendis respondon je antaŭe

1. *IPE vivas! Komunikoj de la provizora IPE-oficejo*, n-ro 1 (25-5-1933), p. 2.
2. *IPE kunligilo. Interna organo de la IPE-oficejo, Amsterdam*, n-ro 4, majo 1934, p. 3.
3. Vd. ekzemple: H.M., „IPE – la sola klasbatala internacia organizo de proletaj esperantistoj. Kontraŭ manovroj de socialfaŝistaj gvidantoj", *Sur Posteno* 1933, p. 25-26; „Demagogoj kaj trompistoj fiaskos", p. 33; G.D., „Lanti batalas kontraŭ ... faŝismo", p. 50-51.
4. W.G. Keable, „Al ĝusta linio", *Sur Posteno* 1933, p. 62.

senditaj leteroj al Soveta Unio. La sperto servis kiel okazo por amika kritiko adrese al la sovetaj esperantistoj: „... unu intima letero, skribita per viaj propraj manoj faras milfoje pli fortan impreson ol centoj de eĉ la plej bonaj pres-artikoloj."[1]

Ne plu estis parolo pri tio, ke en Moskvo okazu, kiel anoncite en Berlino, la Dua Kongreso de IPE. Anstataŭe, en aŭgusto 1934 sepdeko da okcidenteŭropaj komunistoj-esperantistoj kunvenis por konferenco en Lille. Tie la debatojn jam okupis la demando ĉu entute valoras daŭrigi la agadon.[2] Delegito de SEU ne ĉeestis, sed aperis soveta sindikata funkciulo, kiu transdonis, franclingve, la salutojn de SEU. Surprize, li sugestis – la dissolvon de IPE.[3]

Anstataŭ obei la okcidentaj IPE-membroj nun ne plu bridis sian malkontenton pri SEU. La franca aktivulo Marcel Boubou diris, ke „SEU-estroj ne propagandas por IPE", kaj la saman konstaton faris nederlanda delegitino pri leteroj de sovetaj esperantistoj ĝenerale.[4] Rezolucio pri la PEK-laboro admonis, ke la „malserioza rilato, precipe ĉe sovetiaj k-doj", al korespondado „miskreditigas" la Esperanto-movadon.[5] Kaj hungaro rimarkis, ke, ne trovante informojn pri la soveta movado en *Sur Posteno*, li „devas ilin serĉi en neŭtralaj gazetoj".[6] Fine, la konferencanoj decidis estonte eldoni la organon de IPE en Amsterdamo, timante ĝenojn al sia agado en kapitalismaj landoj pro la

1. „Kiu sin enjungis devas tiri", *Sur Posteno* 1933, p. 84 (represita el la brita PEK-bulteno).
2. Ludwig Schödl, „El dokumentoj kaj memoroj pri la laborista Esperanto-movado", *Paco* 1973, n-ro 4, GDR-eldono, p. 10.
3. Laŭ *Sur Posteno Klasbatala* (1934, p. 114), la soveta reprezentanto nomiĝis Litvin. La pledo por dissolvo ne estas menciita en la revuoj de IPE kaj SEU; tiu informo devenas de Ludwig Schödl (persona komuniko de 1-6-1969), kiu tamen memoras alian nomon de la soveta reprezentanto.
4. N. Incertov, „La IPE-Konferenco en Lille pri SEU", *Sur Posteno Klasbatala* 1934, p. 119.
5. „Rezolucio pri la PEK-laboro", *Sur Posteno* (internacia eldono) 2. 1934, p. 105-106; vd. ankaŭ *Sur Posteno Klasbatala* 1934, p. 117-118, 120. – La rezolucio, kritikante tiujn, kiuj anstataŭ organizi korespondadon „okupas sin nur pri nuda propagando de esperanto", daŭrigis kun montrofingro evidente celanta al SEU: „Despli malaprobindaj estas provoj de kelkiuj IPE-organizaĵoj neniigi organizadon de laboristamasoj por internacia korespondado, neniigi amasan peresperantan servon (ĉeso korespondigi laboristkolektivojn, eldoni PEK-bultenojn k.s.)."
6. „IPE-konferenco en Lille", *Sur Posteno Klasbatala* 1934, p. 112.

malakurata apero[1], malfacila stilo kaj tro partieca enhavo de la moskva revuo.[2] La organo de IPE konservis la nomon *Sur Posteno*, dum la antaŭa revuo, kiel organo de SEU, de tiam nomis sin *Sur Posteno Klasbatala*.

Reage al la riproĉoj eldiritaj en Lille SEU faris malfortan provon defendi sin, uzis memkritikon kaj cetere promesis pliaktiviĝi, ankaŭ doni pli da atento al siaj taskoj en IPE.[3] Tia estis deklaro direktita eksteren, sed enlande SEU jam de du-tri jaroj aŭdigis tezojn, kiuj igas pli facile kompreneblaj la rimarkitan malentuziasmiĝon de sovetaj esperantistoj kaj la neglekton de IPE fare de SEU.

Jam antaŭ la Kvina Kongreso en novembro 1931 la CK de SEU estis kritikata de ĝuste unu el la plej aktivaj membroj de SEU, Viktor Kolĉinskij, pro tio, ke ĝi mem ĉesis doni gravecon al la varbado por Esperanto. En letero li skribis:

> En Sovetio oni elpensis teorion, ke la procedo de soc. konstruado malebligas sin okupi pri duagradaj aferoj (inter ili esp-o) pli malpli vastskale.
> Alilande oni elpensis alian teorion – ke pro malbona ekonomia stato de diversaj landoj la movado ne povas bone disvolviĝi.
> Ili estas du plej oportunistaj teorioj, kiujn ni devas plej akre kontraŭbatali.

Citante el la letero, la CK ja neis, ke ĝi propagandas la unuan teorion, sed samtempe konfesis sian opinion, ke efektive amasa propagando de Esperanto kaj klopodoj pri oficiala agnosko estas senutilaj tiel longe, kiel ne eblas konsiderinde vastigi la praktikan aplikadon de la lingvo en la epoko de la Kvinjarplano. La CK nomis kiel prioritaton larĝigi la financan bazon de SEU kaj kreskigi la uzeblecon de Esperanto; precipe necesas koncentri la energiojn al „teknika aplikado":

> Unu moderna esperantlingva verko pri traktor-produktado aŭ pri perekskavatora ekspluatado de minejoj estos pli potenca, ol miliono da esperanto-lernolibroj por sovetianoj...

1. *Sur Posteno Klasbatala* (1934, p. 98) indikis kiel kaŭzojn de la malakurata apero: „trošarĝiteco de presejoj pro la grandega kulturbezono de la amasoj".
2. „Gvidrezolucio, unuanime akceptita de Konferenco", *Sur Posteno* (internacia eldono) 2. 1934, p. 91. – Pri la nova *Sur Posteno* estis postulite, ke ĝi ne nur uzu pli legeblan stilon, sed ankaŭ „evitu insultojn kontraŭ alitendencaj organizoj".
3. Incertov, „La IPE-Konferenco", p. 119.

La akuzo pri oportunismo estis redonita al Kolĉinskij, ĉar li, tiurilate similante al la tendenco de „neŭtraluloj" kaj de SAT „trotaksi" Esperanton, pledis por „substituo de laboro por plivastigo de esperanto-uzeblo per vastskala propagando de esperanto".[1]

Se en tiu polemiko[2] ŝajne temis ankoraŭ pri la plej bona strategio kiel venkigi Esperanton, nur kelkajn monatojn poste la gvidanto de SEU mem senkaŝe deklaris, ke la cirkonstancoj ne permesas rapidigi la Esperanto-movadon. Meze de 1932 la teoria organo de SEU aperigis, en formo de letero al leningrada esperantisto, artikolon de Drezen, en kiu li skribis, ke dum la Dua Kvinjarplano kaj ankoraŭ longan tempon „la demandoj de la ekonomia konstruado kaj la demandoj de la organizado de la defenda kapablo de USSR" havos prioritaton kontraŭ ĉiuj aliaj, inkluzive la demandon pri alpreno de internacia helplingvo. Laŭ Drezen, ja kreskos la nombro de esperantistoj, sed ne pli, ol al kelk-dekmil, kio ankoraŭ ne estos amasa movado. Eĉ se Esperanto pli grandskale disvastiĝus en Soveta Unio, tio estus „apenaŭ ĝojiga", ĉar tiel kreiĝus malekvilibro kontraŭ aliaj landoj, kie la movado postrestas. Nur sub la kondiĉo, ke eksterlande la movado estas pli forta, ol en Soveta Unio, eblas pensi „pri agoj cele al rapidigo de la ĝisnuna kresk-rapideco" de la soveta Esperanto-movado.[3]

Estas facile imageble, ke tiuj tezoj provokis inter la sovetaj esperantistoj ŝtormon de indigno. Lanti ricevis leteron de iama soveta SAT-ano, kiu juĝis, ke la CK, bremsante la movadon, faras krimon kontraŭ Esperanto.[4] SEU mem parolis eŭfemisme pri „certa nekompreno", kiun kaŭzis la letero de Drezen inter

1. „Saluton al la kvina kongreso de SEU!", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 113-114.
2. Raporto pri plenkunsido de la CK, fine de julio 1931, montras, ke ankaŭ tie oni vigle diskutis pri la demando, kiom da graveco havu la varbado de novaj membroj: *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 88.
3. E. Drezen, „Počemu my ne forsiruem esperdviženie. O perspektivah esperanto vo vtoroj pjatiletke" (Kial ni ne rapidigas la Esperanto-movadon. Pri la perspektivoj de Esperanto en la Dua Plan-Jarkvino), *Meždunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 181-182 (letero al B. Ĥ. Toll'). – Drezen skribis, ke por helpi la ekstersovetian movadon SEU eldonas ankaŭ lernolibrojn de Esperanto en la germana, franca, angla kaj hispana lingvoj.
4. „De niaj sovetiaj amikoj", *Sennaciulo* 9. 1932/33, p. 51. – La letero, de 17-11-1932, ne aperis, kompreneble, kun aŭtor-indiko.

„kelkaj aktivuloj", kaj tial, konfesânte ke ĝi estis interpretebla „preskaŭ kiel direktivo por malkonstruo de la Esperanto-movado", sentis sin devigita pli detale ekspliki ĝian sencon. Unue, la elpaŝo de Drezen estis laŭdata kiel „decida bato kontraŭ la maldekstre radikalaj fantaziaĵoj" esprimiĝintaj ekzemple en pledoj por esperantigo anstataŭ evoluigo de la naciaj kulturoj en Soveta Unio. Tia „‚maldekstra' deviado", laŭ SEU, invitus laboristojn „deturni sian atenton kaj siajn fortojn de la aktiva agado en centoj da konstruejoj, en miloj da fabrikoj kaj uzinoj, en kiuj estas solvataj la ĉefaj problemoj de la konstruado de senklasa socialisma socio", kaj igus ilin ankaŭ neglekti la studadon de fremdaj lingvoj, kiuj necesas por regi la teknikon. Post tiuj rezonadoj, malantaŭ kiuj facile malkovreblas la ĝenerala tendenco de la admonoj, kiujn SEU ricevadis de partiaj aŭtoritatuloj, la membroj estas trankviligataj per la certigo, ke ne rapidigi tamen *ne* estas ne laŭ la bezonoj disvastigi. Alivorte, postuloj al la movado kreskas, sed tiujn ĝi ne kapablas respondi, precipe ĉar ĝi postrestas en servigo de Esperanto en la nova etapo karakteriziĝanta per „‚sinturno' al produktado" – etapo, en kiu ne sufiĉas bazi la agitadon de SEU sur klarigoj pri la signifo de la internaciaj ligoj de laboristoj kiel potenca ilo de internaciisma eduko kaj pri la ĉi-rilata rolo de Esperanto, sed necesas subordigi ĝin al la plej proksimaj problemoj de socialisma konstruado kaj internacia klasbatalo.[1] Por substreki la kernan tezon de Drezen SEU deklaris: „Necesas klare diri, ke la Esperanto-movado ne rajtas esti rapidigata, ke la lingva problemo kaj eĉ certagrade la internaciaj ligoj de la laboristoj ne rajtas esti metataj sur la tagordon kiel unuarangaj ĉeftaskoj en la nuna periodo."[2]

SEU bonkaŭze publikigis sian averton kontraŭ „rapidigo" de la movado nur ruslingve, tiel ŝparante al siaj kamaradoj en IPE la cerbumadon pri tio, kial subite malpli graviĝis la internaciaj ligoj aŭ kial al proletaj esperantistoj, kiuj dekomence celis meti

1. Tiu ĉi klarigo pri la bezonoj en la nova etapo estas citaĵo el la rezolucio de la Kvina Kongreso de SEU.
2. CK SÉSR (CK SEU), „Usilivat' razvitie esperanto-dviženija všir' i vglub', no ne forsirovat'" (Plivastigu kaj profundigu disvolvon de la Esperanto-movado, sed ne tro rapidigu ĝin), *Meždunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 304-306.

Esperanton en la servon de klasbatalo, necesis prediki pri „trotakso" de la lingvo. Sed eĉ sen scio pri la teorio[1] estis evidente, ke malrapidiĝo de la soveta movado okazas en la praktiko. Regreso sur iuj kampoj jam estis rimarkebla ekde 1932/33: La revuo *La Nova Etapo*, organo de Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj (IAREV)[2], eldonata en Moskvo, estis en 1932 plena de interesaj kontribuaĵoj, interalie pri la rilato inter marksismo kaj internacia lingvo; en 1933 aperis ankoraŭ unu sensuka kajero, kiu estis preskaŭ ekskluzive plenigita per tradukoj el la soveta priplanplenuma literaturo, kaj poste la revuo silente forpasis. Pri la stato de la movado en Soveta Unio inter la esperantistoj ekregis sentoj de malespero: Unu skribis, ke li „preferas silente atendi pli favorajn cirkonstancojn", alia konfesis, ke lin „regas ia indiferento".[3] Tristan bildon pri la situacio de SEU entute donis raporto pri plenkunsido de la CK, okazinta la 24an de septembro 1933; laŭ ĝi, la varboplano „ne estas plenumita eĉ duongrade", ne funkciis la organizado de korespondado, en la lokaj grupoj regis senplaneco, sendisciplineco, hazardeco, espero je memfariĝo, kaj, plej malbone, preskaŭ ne estis „subteno al SEU en ĝiaj ĉiutagaj praktikaj laboroj flanke de sindikatoj kaj aliaj organizaĵoj".[4] Ne mankis ankaŭ esprimoj de rekte malamika sinteno, ekzemple en Leningrado, kie la urba komitato de Komsomolo deklaris la lernadon de Esperanto „sencela kaj malutila".[5]

Eksterlande, kiel montris la debatoj dum la IPE-konferenco en Lille, ne restis kaŝitaj la malforto de SEU kaj la efikoj de nefavora enlanda situacio, de kiu estis simptomo la teoriaj ekzercoj

1. Sed almenaŭ legantoj de *Sennaciulo* (9. 1932/33, p. 51) povis informiĝi pri ĝi per la letero de soveta esperantisto (de 17-11-1932), kiu citis el la skribaĵo de Drezen.
2. IAREV estis fondita fine de 1931 sekve de iniciato de la germana verkisto Ludwig Renn (1889-1979) kaj de la soveta Esperanto-poeto Evgenij Miĥal'skij, kiel sekcio de la Internacia Unio de Revoluciaj Verkistoj. Renn iĝis ĝia prezidanto.
3. „De niaj sovetiaj amikoj", *Sennaciulo* 9. 1932/33, p. 51-52 (anonimaj leteroj, de 17-11-1932 kaj 12-9-1932).
4. N. Incertov, „Likvidi breĉojn, rearanĝi vicojn por novaj taskoj!", *Sur Posteno* 1933, p. 42-43.
5. B. Toll, „Laborista Esperanto-Universitato en Leningrad", *Bulteno de CK SEU* 12. 1933, p. 91. – La sindikatoj tie tamen subtenis Esperanton.

de Drezen. Sed la bildon pri stagnado de SEU kaj fremdiĝo inter ĝi kaj IPE konfuzas kontraŭdiroj. Ankaŭ post Lille ekzistis IPE-centro en Leningrado, krom la oficejo de IPE en Amsterdamo.[1] Pri la interna situacio de SEU en 1934 venis novaj informoj, kiuj ŝajnis ne apogi plenan pesimismon pri la estonteco de la soveta Esperanto-movado. Farante bilancon de siaj atingoj en tiu jaro, SEU raportis, ke estis akirita la subteno de Intersindikata Konsilantaro al la internaci-koresponda laboro farata de esperantistoj en entreprenoj kaj fortan apogon donas ankaŭ la Centra Komitato de Ukraina Junkomunista Unio. La retorikan demandon, ĉu estas favoraj kondiĉoj „por pli vaste organizi laboron por plu venki", SEU respondis tiel: „Jes, kiel neniam antaŭe." Pruvcele estis atentigite pri la kresko de la membraro: de 4 600 en 1932 al 8 580 en 1934, kio donis kuraĝon por proklami kiel celon por 1935, ke „SEU fariĝu amasa organizaĵo".[2] La procentaĵo de laboristoj kreskis de 30 komence de 1934 al 45 ok monatojn poste.[3]

Aliflanke, komence de septembro 1934, plenkunsido de la CK de SEU traktis raportojn pri malaperintaj aŭ nekontentige laborantaj grupoj; oni registris, ke kaj en la provinco kaj en Moskvo regas la opinio, ke Esperanto mortis; kaj Demidjuk rimarkis, ke en Soveta Unio „ĝenerale oni ne multe aŭdas pri esperanto – plena kontrasto al tio, kion ni havis antaŭ 6-7 jaroj". Nekrasov kritikis la „formalan karakteron" de la raporto donita de la CK, kies „tezoj entenas nur burokratecajn frazojn kaj nenion pri la viva laboro". Drezen efektive liveris tre palan raporton, senigitan de la entuziasmo, kiun pli frue li sukcesis inspiri al la organizaĵo; li nun devis aŭdi, publike, la riproĉon, ke li ne nur malatentas la varbadon por Esperanto, sed eĉ neas ĝian neceson.[4]

1. Post ĉ. unujara funkciado en Moskvo la IPE-centro estis translokita meze de 1934 al Leningrado; ĝin gvidis Herbert Muravkin. La oficejo en Amsterdamo (ĉe F. Visser) funkciis de aŭgusto 1933 ĝis oktobro 1935. Poste, de la fino de 1935 ĝis novembro 1936 la okcidenta oficejo estis en Londono, fine en Nîmes. Ekde aŭgusto 1937 estis ununura centro en Londono.
2. „Antaŭ la nova jaro", *Sur Posteno Klasbatala* 1934, p. 121. – Krom „membroj", SEU havis la kategoriojn de „junuloj" (3 078 en 1932, 2 824 en 1933, 3 704 en 1933) kaj de „amikoj" (ĉ. 500 en 1933, 4 876 en 1934).
3. „Plenkunsido de CK SEU", *Sur Posteno Klasbatala* 1934, p. 130 (raporto de Incertov).
4. Samloke, p. 129-132. – Krom Demidjuk kaj Nekrasov, la diskuton partoprenis i.a. Šamil' Usmanov el Moskvo (kritiko kontraŭ Drezen) kaj Moi-

La volo ne laciĝi en la poresperanta fervoro restis forta. Kvankam en la numero de *Sur Posteno Klasbatala*, kiu raportis pri la plenkunsido de la CK, troviĝis ĉefartikolo okaze de la murdo de la leningrada parti-sekretario Sergej Kirov[1] kun minaca anonco, ke baldaŭ „ni publikigos la materialojn senmaskigantajn trockianojn en la esperantista tendaro" („ideaj fratoj de la aĉa zinovjevana opozicia grupo")[2], la cetera enhavo de la sama numero havis trajtojn, kiuj povis doni al la membroj de SEU la esperon pri nova komenco. La redakcio, nomante prava la kritikon esprimitan en Lille, enkondukis kelkajn enhavajn ŝanĝojn, ekzemple lingvan angulon, enigmofakon kaj humuran rubrikon („Rido ruĝa") por tiamaniere iom mildigi la agitecan karakteron de la organo. Eĉ pli: Estis publikigita letero de leganto, laŭ kiu ŝajnis, ke la ŝanceliĝado de SEU fine atingos punkton, kiam ne plu estas tabuo fari el la uzo de la lingvo simple ŝatokupon. La skribinto, Evgenij Blinov, alvokis altigi la lingvan nivelon de la sovetaj esperantistoj kaj ŝanĝi la manieron de varbado por Esperanto, postulante ke oni ne „deklinaciu ĉie kaj ĉiam la vortojn: kapitalismo kaj proletaro", ĉar tia „r-r-revolucia" bigoteco nun malhelpas la progreson de la movado. Blinov ne hezitis pledi, eĉ se tio ne plaĉas al „radikaluloj", por la rajto esprimi per Esperanto „amajn sentojn".[3]

En la postulo de Blinov liberiĝi de „pseŭda bombasta revolucieco" respeguliĝis la tendenco de partiaj deklaroj pri atingo de senklasa socio kaj la sekva rajto de la sovetaj civitanoj ĝui la fruktojn de sia konstrulaboro por socialismo. Komencis regi pli optimismaj sentoj, dum iom post iom pliboniĝis la ekonomia situacio; ekde aŭtuno 1935 ne plu necesis porciumi nutraĵojn. Novan fidon pri la estonteco stimulis ankaŭ la decido revizii la sovetan konstitucion, anoncita en februaro 1935. En kunvenoj

---

sej Rejtman el Krivoj Rog, kiu energie postulis de SEU „fari la organizaĵon amasa".

1. Kiel konate, la murdo de Kirov (1 dec. 1934) servis al Stalin kiel bona okazo por antaŭenpuŝi siajn preparojn de la Granda Purigo.
2. „Memore al k-do Kirov", *Sur Posteno Klasbatala* 1934, p. 129. – La anoncita artikolo, „Proletoj, pligrandigu vian klasan atentemon!", enhavanta ĉefe atakojn kontraŭ Lanti kaj lia influo, aperis en la postsekvanta numero: *Sur Posteno Klasbatala* 1935, p. 9-10.
3. *Sur Posteno Klasbatala* 1934, p. 136.

tra la tuta lando la Partio diskutigis pri la proponitaj ŝanĝoj – pri „demokratiigo de la elekto-sistemo", la principo de politika egaleco de ĉiuj civitanoj kaj la garantiado de fundamentaj homaj liberecoj. Kvankam la nova konstitucio, aprobita en decembro 1936, neniel limigis la superregan pozicion de la Partio, kio en la praktiko lasis ĝiajn promesojn surpaperaj, ĝi tamen plue akcelis la esperojn, ke pasis la tempo de ekstrema politika premo. Kaj tio ŝajnis aŭguri ankaŭ pli helajn perspektivojn por la amikoj de Esperanto en Soveta Unio.

Ke kreskis la interesiĝo pri Esperanto, montras la membroevoluo de SEU: Meze de novembro 1935 estis registritaj 13 344 membroj, kio estis rekorda nombro en la historio de la organizaĵo.[1] Tamen, tiu kresko ne kongruis kun la organiza stato kaj materiaj rimedoj de SEU. Ĉar rapide vastiĝis la postuloj pri lernolibroj de la lingvo, montriĝis necese uzi la disponeblan paperon unuavice por tiuj.[2] Post 1934 aperis nur tri numeroj de la esperantlingva organo. Fine, ankaŭ mankis papero por lernolibroj, ĉar la jara paperprovizo, jam antaŭe de jaro al jaro reduktita, ne estis donita al SEU.[3]

Por ne perdi la kontakton kun siaj membroj la CK de SEU dissendis al la regionaj organizaĵoj kaj ĉefaj aktivuloj modestan esperantlingvan informilon[4] kaj dupaĝan folion en la rusa.[5] En 1936 aperis denove unu – la lasta – numero de *Sur Posteno Klasbatala*; ĝi ne enhavis sciigon pri plibonigo de la situacio. Kvankam angla komunista esperantisto, Thomas Aldworth, kiu en junio 1936 vizitis Sovetan Union, revenis kun la impreso, ke Esperanto „longe dormis en Sovetio k nun ĝi vekiĝas denove", aliaj informoj parolis pri tio, ke „en la grandaj urboj Moskvo, Kievo, Odeso, la agado velkas", ĉefe pro la neapero de revuo[6], kaj ankaŭ Aldworth konfirmis, ke la „terura manko de papero por

1. „Pri nuna stato de SEU-movado", *Informilo. Interna organo de la IPE-centro* 1935, n-ro 3 (dec.), p. 13.
2. „La nova jaro", *Sur Posteno Klasbatala* 1936, n-ro 1/2, p. 1.
3. „Pri nuna stato...", p. 15.
4. Tiu estis la *Informilo* de la IPE-centro en Leningrado. Konsulteblaj estis n-ro 2 (aprilo 1935), 13paĝa, kaj n-ro 3 (decembro 1935), 22paĝa, ambaŭ tajpitaj.
5. Laŭ informo de soveta esperantisto, en *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 29.
6. „Esperanto en Sovetio", *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 59.

libroj" kaj la tempomanko de la laboristoj, devantaj „studi teknikon de metio", grave malhelpas Esperanton.[1]

Aldone al tio, interne de SEU evidente daŭris malakordo kiel difini la aktualajn taskojn de la soveta movado, kiel ni povas konkludi el nova, publika interveno de Kolĉinskij en 1936. La menciita kritikinto de Drezen memorigis pri la elstara loko, kiun en la postularo de la esperantistoj, ĉu „neŭtralaj", ĉu laboristaj, ĉiam okupis la pledo por enkonduko de Esperanto en lernejojn, kaj akre kritikis tiujn funkciulojn de SEU, kiuj pro la kontraŭstaro de politikistoj rezignas pri tiu postulo – uzante la pretekston, ke mankas instruistoj kaj lernolibroj, kaj argumentante ke oni ne rajtas malproksimiĝi de aktualaj klasbatalaj taskoj. Laŭ Kolĉinskij, inter la gvidantoj de SEU iuj („treege malmultaj, sed pretendantaj ke tia estu la opinio de l' tuta organizo") asertis, ke en la nuna stadio la Esperanto-movado ne povas estis amasa. Tian sintenon li skurĝis „misa ‚maldekstrumo'", ĉar ĝi signifas okupi „kapitulacistan" pozicion.[2] Kion Kolĉinskij faris, estis eble la lasta provo forpuŝi la disvastiĝantajn sentojn de defetismo.

4.2.7. *La sovetaj esperantistoj silentas*

Ni ne scias, ĉu la „kapitulacistoj", inter kiuj Kolĉinskij sendube kalkulis Drezen, progresis sur sia vojo aŭ ĉu la kritikantoj de timema sindeteno ankoraŭ povis regajni iom da tereno. Kolĉinskij mem ne aperigis sian pledon en iu eldonaĵo de SEU, sed en *Sur Posteno*, la organo de IPE, kiu post kelkmonata interrompo ekde januaro 1936 aperis en Nîmes. Preskaŭ nur per tiu

1. T. Aldworth, „Esperanto en Sovetio", *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 74. – Aldworth publikigis en *Sennacieca Revuo* (n.s. 4. 1936/37, p. 154-156, 170-172; 5. 1937/38, p. 7-9, 23-25, 39-41, 56-58) ampleksan, tre interesan raporton pri sia vizito, sub la titolo „Angla SAT-ano en Sovetio". Kvankam Aldworth konkludis, ke „malgraŭ la mankoj, krudoj k ankoraŭa malriĉo de l' lando, estas io en USSR, kion ni jam devas konsideri kiel bazon k komenciĝon de granda k bela estonto" (p. 57), li estis pro sia malkaŝemo eksigita el la Brita Komunista Partio (*Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 3).

2. V. Kolĉinski, „Taskoj por hodiaŭ kaj taskoj por morgaŭ", *Sur Posteno* 1936, n-ro 44 (jul.), p. 1-2. – Vd. ankaŭ la publikan leteron de Kolĉinskij pri komuna agado de neŭtralaj kaj laboristaj organizaĵoj cele al la enkonduko de Esperanto en lernejoj: *Sur Posteno* 1936, n-ro 45/46 (aŭg./sept.), p. 4; *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 62-63.

revuo estis eble post 1935 sciiĝi pri la soveta movado. La informoj, sporadaj kaj magraj kiaj ili estis, ĉiuokaze respegulis kreskantan distanciĝon inter IPE kaj SEU.

Kiam en aŭgusto 1935 en Antverpeno okazis la Dua Kongreso de IPE, refoje mankis delegito de SEU, kio inter la malpli ol 100 partoprenantoj „elvokis sufiĉe amarajn rimarkigojn".[1] La nereprezentiĝo de SEU estis des pli bedaŭrata, ĉar sur la kongresa tagordo troviĝis la demando pri reunuecigo de la laborista Esperanto-movado. Tiu demando estis aktualigita per radikala ŝanĝo en la soveta politiko. Kompreninte ke la venko de la nazioj en Germanio ne estis efemera okazaĵo, Soveta Unio serĉis – per la sloganoj de kontraŭfaŝisma popolfronto kaj kolektiva sekureco – eblojn por larĝa alianco kontraŭ la faŝisma minaco. Ĝi strebis plibonigi siajn rilatojn kun la kapitalismaj registaroj de okcidenta Eŭropo kaj, pere de Komintern, ofertis komunan agadon al nekomunistaj laboristaj organizaĵoj, ĝuste al tiuj, kiuj ĝis nelonge antaŭe estis insultataj kiel „socialfaŝistoj". La nova taktiko ne restis sen efiko: Fine de junio 1935 en Parizo okazis impona Kongreso por la Defendo de Kulturo, en kiu multaj elstaraj intelektuloj el la tuta mondo manifestaciis kontraŭ la faŝismo, ne sciante aŭ ne ĝeniĝante pri tio, ke la kongreso aleksterе montranta sin neŭtrale-progresema fakte estis financita de Komintern.

Sub la impreso de signoj por novorientiĝo en la komunista movado jam komence de aŭgusto 1934 la 14a Kongreso de SAT en Valencia estis akceptinta rezolucion kun la dezirespriмo, ke restariĝu rilatoj kun la sovetaj esperantistoj, „kiuj nuntempe estas izolitaj de siaj tutmondaj fratoj".[2] SAT oficiale transsendis la rezolucion al IPE.[3] En sia polemikeca reago la IPE-centro en

1. *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 79. – Laŭ IPE, en Antverpeno ĉeestis ĉ. 90, laŭ SAT, ne pli ol 40 personoj.
2. *Sennaciulo* 10. 1933/34, p. 63. – La rezolucio, adresita al la soveta registaro kaj al ĉiuj laboristaj esperantistoj en la mondo, i.a. postulis, ke la ŝuldo de SEU al SAT estu almenaŭ parte likvidita kaj ke nuliĝu la malpermeso al eldonaĵoj de SAT en Soveta Unio.
3. En akompana letero (de 6-9-1934) SAT petis al IPE „bonvole konsideri la eblon pri reunuigo"; ĝi estis sendita al la IPE-oficejo en Amsterdamo kun kopio al „IPE-Moskvo": *Sur Posteno* (internacia eldono) 3. 1935, p. 133; kp. *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 27.

Leningrado insistis, ke unueca fronto jam estas efektivigata en la kadro de IPE.[1] Ĉar tiu respondo apenaŭ vidigis kompromisemon, la komencita kontakto inter SAT kaj IPE provizore interrompiĝis.[2]

Nur en somero 1935 denove leviĝis esperoj pri akordiĝo. La sinturno al la popolfronta taktiko estis oficiale proklamita de Georgi Dimitrov dum la Sepa Mondkongreso de Komintern, kiu malfermiĝis en Moskvo la 25an de julio.[3] Servoprete, la IPE-centro proponis al SAT jam fine de julio, ĵus antaŭ la kongresoj de SAT en Parizo kaj de IPE en Antverpeno, ke ambaŭ organizaĵoj rapide intertraktu pri starigo de unueca fronto kaj tiucele interŝanĝu reprezentantojn ĉe la kongresoj.[4] SAT respondis, ke ĝi ĝojas „pri la montrita unuecemo", sed aldonis la demandon, ĉu tiun ne malhelpas la programa ligiĝo de IPE al marksismo-leninismo; krome, SAT proponis restarigi la liberan korespondadon individuan inter sovetaj kaj alilandaj laboristoj.[5] La kongresa rezolucio de Parizo specife invitis la iamajn membrojn, kiuj „lastatempe malkonfesis k forlasis sian antaŭan sekteman taktikon", reveni en la sinon de SAT.[6]

1. Letero de IPE-centro al SAT, de 5-12-1934, en *Sur Posteno* (internacia eldono) 3. 1935, p. 133-134. – La letero argumentis, ke la ŝuldo jam estas repagita, nome al la „klaskonsciaj" SAT-anoj nun unuigitaj en IPE. Al ĝi estis aldonita longa memorando al la laboristaj esperantistoj, invititaj kolektiĝi por praktika agado ĉirkaŭ PEK: „Vivu la unueca fronto!", *Sur Posteno* (internacia eldono) 3. 1935, p. 131-132.
2. Komisie de la Plenum-Komitato, Lanti verkis ĉefartikolon, „Principoj de unueco", en *Sennaciulo* (11. 1934/35, p. 25-27), kiu estis transsendita al IPE kiel respondo de SAT; en tiu, Lanti memorigis pri la vojo kondukinta al skismo en la laborista Esperanto-movado kaj deklaris, ke forlaso de la supertendenca karaktero de SAT ne estas akceptebla.
3. E.H. Carr, *The twilight of Comintern, 1930-1935*, London 1982, p. 403 k. sekv.
4. Letero de IPE-centro al la SAT-kongreso, de 29-7-1935, en *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 62-63; *Sur Posteno* 1936, n-ro 39 (jan.), p. 2. – La letero atentigis, ke unuecfronta agado sur loka nivelo jam stariĝis inter anoj de IPE kaj SAT. Ĝi tamen postulis, ke en SAT ĉesu atakoj kontraŭ Soveta Unio kaj la propagando de sennaciismo.
5. Letero de SAT'(PK komisie de la kongreso) al IPE-centro (kopie al la IPE-kongreso), de 7-8-1935, en *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 63; *Sur Posteno* 1936, n-ro 39 (jan.), p. 2. – La letero ankaŭ ripetis la deziron de SAT, ke ĝiaj eldonaĵoj estu reallasataj en Soveta Unio, proponis publikigon de la interŝanĝitaj korespondaĵoj en la respektivaj organoj kaj indikis kiel preferon de SAT, ke la anoj de diversaj tendencoj efektivigu kadre de SAT komunan laboron pere de frakcioj.
6. *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 63-64.

La IPE-kongreso en Antverpeno, kiu okazis kelkajn tagojn post la SAT-kongreso en Parizo, diskutis tiujn proponojn, parte en ĉeesto de tri observantoj senditaj de SAT. Pri ŝanĝo de la statuta punkto pri dialektika materiismo la kongreso deklaris sin nekompetenta, sed pri la pli multaj proponoj de SAT ĝi esprimis sian konsenton aŭ faris promeson akceptigi ilin, ekzemple rilate la enirpermeson por SAT-eldonaĵoj en Soveta Unio.[1] La kongresa rezolucio deklaris ne plu valida tiun parton de la fonda deklaracio de IPE de 1932, kiu alvokis kontraŭbatali krom sennaciismo ankaŭ la socialdemokration, kiu subtenas la „imperialismajn rabadojn k militojn" kaj „plenumas la taskon deteni la laboristojn de klasbatalo k malhelpi la efektivigon de la ruĝa unueca fronto".[2] Por daŭrigi la traktadon kun SAT la kongreso elektis trimembran komisionon.[3]

La sinteno de la antverpena kongreso donis kialojn por optimisma pritakso de la ebloj de estonta akordiĝo, sed la okcidentaj IPE-anoj ne estis prenintaj en konsideron la pozicion de siaj sovetaj kamaradoj. La 1an de oktobro 1935 la leningrada IPE-centro komunikis al SAT la decidon de la antverpena kongreso. En akompana letero tamen ĝi faris aldonajn postulojn, kiuj, laŭ SAT, „forprenis ĉiun bazon por traktado"[4]: La IPE-centro deklaris malebla ĉian komunan agadon kun trockiistoj kaj „kun organizoj, kiuj kontraŭbatalas la fortikaĵon de la tutmonda proletaro Sovetunio".[5] Nemirige, SAT en sia respondo nomis tiujn postulojn neakcepteblaj.[6]

Inter la okcidenteŭropaj membroj de IPE, kiuj en Antverpeno ankaŭ estis admonintaj SEU „plej rapide restarigi sian organizan

1. „Protokolaro de la 2-a IPE-Kongreso", *Sur Posteno* (internacia eldono) 3. 1935, p. 180-182, 185-187; „Rezolucio pri la unueca laboro akceptita de IPE-Kongreso", *Sur Posteno* 1936, n-ro 39 (jan.), p. 2-3; vd. ankaŭ *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 79, 84; 12. 1935/36, p. 16. – La franca IPE-ano A. Berlo konsentis, ke IPE rezignu „sian statutan marksistan bazon"; li krome neis, ke IPE estas „filio de Moskvo" („Protokolaro...", p. 186).
2. „Rezolucio pri batalo por paco kaj kontraŭ faŝismo", *Sur Posteno* (internacia eldono) 3. 1935, p. 190; kp. *Internaciisto* 2. 1932, p. 85-86.
3. La membroj estis A. Berlo, Marcel Boubou kaj Pierre Malfère.
4. Tiel Barthelmess dum la 16a SAT-Kongreso en Manchester, en 1936: *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 73.
5. *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 83; *Sur Posteno* 1936, n-ro 41 (mar.), p. 2.
6. Letero de SAT al IPE-centro, de 9-11-1935, en *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 83-84; *Sur Posteno* 1936, n-ro 39 (jan.), p. 3.

laborkapablon"[1], kreskis sentoj de perplekso pro la sinteno de ilia soveta sekcio. La akriga letero el Leningrado, kiu haltigis la intertraktadojn kun SAT, estis malkaŝe kritikata kiel „mallertaĵo".[2] Kurioza estis la situacio de la „unuec-komisiono" elektita en Antverpeno: En letero al SAT ĝi emfazis sian legitimecon, argumentante ke kongreso estas en IPE „la suverena instanco".[3] Kiam SAT rifuzis rilati kun la komisiono, opiniante ke ĝia superulo estas la leningrada centro[4], la komisiono skribis tien por havigi konfirmon de sia mandato, sed je tio ĝi ne ricevis respondon.[5] Sub tiuj cirkonstancoj, SAT, kiu rimarkis, ke en IPE mankas „absoluta unueco"[6], des malpli emis daŭrigi traktadojn pri estonta kunlaboro aŭ reunuiĝo.

Kelkaj IPE-funkciuloj, furiozaj pro la malatento de la centro al la kongresaj decidoj, esprimis dubojn, ĉu entute ĝiaj gvidantoj estas komunistoj.[7] Fakte, skeptikon pri la saĝeco de SEU kreis en la vicoj de IPE jam informoj venintaj antaŭ la antverpena kongreso, kiuj supozigis, ke la soveta flanko interesiĝas pri normaligo de siaj rilatoj kun la neŭtrala Universala Esperanto-Asocio. Komence de 1935 la franca komitatano de UEA Pierre Petit montris sin esperplena, ke – analoge al la aliĝo de Soveta Unio al Ligo de Nacioj en septembro 1934 – baldaŭ SEU trovos la vojon al UEA.[8] La okcidentaj IPE-anoj, laŭ kies opinio la neŭtrala

1. *Informilo. Interna organo de la IPE-centro* 1935, n-ro 3 (dec.), p. 3. – SEU ankaŭ ne povis mone subteni IPE. Por ke la okcidentaj sekcioj povu „finance iomete ripozi", la belgaj IPE-anoj tial proponis, ke la sekvanta kongreso okazu en Soveta Unio: *Sur Posteno* (internacia eldono) 3. 1935, p. 164.
2. Tiel, en aprilo 1936, ĉe kongreso de la franca IPE-sekcio: „Raportaro de la Plenum-Komitato de SAT (1935-36)", *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 50.
3. Letero de la komisiono al SAT, de 15-12-1935, en *Sur Posteno* 1936, n-ro 39 (jan.), p. 3.
4. Letero de SAT al IPE-oficejo Londono, de 19-2-1936, en *Sur Posteno* 1936, n-ro 41 (mar.), p. 1.
5. *Proleta Esperantisto* (franca) 1936, aprilo; laŭ „Raportaro ...", p. 50.
6. Kiel noto 4.
7. „Malkonsentoj ĉe I.P.E.", *La Socialisto* 10. 1936, n-ro 4 (dec.), p. 6-7 (eltiraĵoj el cirkulero de Pierre Malfère).
8. P. Petit, „La aliĝo de ĉiuj landaj asocioj al U.E.A.", *Franca Esperantisto* 3. 1935, n-ro 13 (feb.), p. 23-24; kp. *Sennaciulo* 11. 1934/35, p. 35; vd. ankaŭ 12. 1935/36, p. 59. – Malkaŝante ke jam en aŭtuno 1932 UEA kaj SEU interrilatis pri reciprokeco de servoj, UEA en januaro 1934 signalis sian pluan pretecon pri kunlaboro kun SEU: H.J. (Hans Jakob), „La rilatoj kun U.S.S.R.", *Esperanto* 30. 1934, p. 13.

movado „toleras, eĉ subtenas faŝisman ideologion", rifuzis kredi, ke SEU aliĝos „al la reakcia UEA".[1] Sed baldaŭ de SEU mem venis konfeso, ke kunlaboron kun UEA ĝi konsideras ebla, ĉar fronte al la faŝisma minaco la proletaro devas principe kunlabori ankaŭ kun „la burĝa intelektularo". Ankaŭ komunan fronton kun iuj SAT-membroj ĝi nomis imagebla, tamen nur kun ĉiama memoro pri tio, ke „la nuntempa SAT estas estrata de danĝera, idealisma, kontraŭrevolucia ideologio".[2]

Tiu ĉi pozici-difino de SEU, kiu – ĉiam akorde kun la kominterna politiko – indikis malfermiĝon al la neŭtrala movado kaj samtempe helpis klarigi la kialojn, pro kiuj la IPE-centro sabotis la traktadojn kun SAT, estis la lasta pli longa komuniko de la Centra Komitato de SEU legebla en esperantlingva gazeto. Dum la jaro 1936 la kontakto de la okcidentaj IPE-anoj al la centro en Leningrado „fariĝis nenormale lama k fine tute ĉesis funkcii", kaj pri SEU, IPE notis en sia agad-raporto, ke ĝi „niascie faris nenian organizitan laboron".[3] Dum la Tria Kongreso de IPE, kiu okazis en aŭgusto 1937 en Parizo, Alberto Respe[4], la redaktoro de *Sur Posteno*, rezignacie deklaris: „Ni devas akcepti, ke sovetiaj k-doj havas malfacilojn, pri kiuj ni nur povas supozi, sed ne scii." Same neklarigita restis la silento de la IPE-centro, tiel ke la kongreso decidis starigi novan centron en Londono.[5]

1. A.R., „Per tuta forto por IPE", *Sur Posteno* (internacia eldono) 3. 1935, p. 155.
2. IPE-Centro k CK de SEU, „Proleta esperantistaro kaj la neŭtraluloj", *Sur Posteno* 1936, n-ro 40 (feb.), p. 1-2. – Tiu ĉi artikolo estis verkita verŝajne en la dua duono de 1935. La IPE-centro donis apartan instrukcion, ke IPE-grupoj „sin turnu al la neŭtralaj grupoj kun propono kooperi en laboro pro paco k kontraŭ faŝismo": *Informilo. Interna organo de la IPE-centro* 1935, n-ro 3 (dec.), p. 6.
3. *Sur Posteno* 1937, n-ro 54 (jun.), p. 3.
4. Respe estis kaŝnomo de la germana komunisto August Schwenk, fuĝinta al Francio. Li estis unu el la kvin membroj de la IPE-sekretariaro elektita en la fondkongreso; de julio 1932 li estis redaktoro de *Internaciisto*. Dum funkcis la IPE-oficejo en Nîmes (de novembro 1936), li estis ĝenerala sekretario.
5. Nikolao Ecert, „Konciza raporto pri la 3-a IPE-Kongreso", *Sur Posteno* 1937, n-ro 56 (okt.), p. 5. – En la kongreso, kiun partoprenis kelkdek membroj de IPE, ĉefe el Francio, Britio, Belgio kaj Nederlando, Respe nomis la statutan punkton pri dialektika materiismo „nenecesa", ĉar malutila al la „varba k unuecfronta laboro" de IPE. Al la kongreso venis aŭkoraŭ salutletero de SEU.

Sporade estis signoj, ke eble ankoraŭ ne malaperis ĉiuj esperoj pri restarigo de kontakto kun la sovetaj esperantistoj. Tro nekredebla ŝajnis la fakto, ke subite dissolviĝis organizaĵo, kiu fine de 1936 kalkulis 11 873 membrojn.[1] Komence de 1937 *Sur Posteno* raportis pri granda aktivado de SEU subtene al la kontraŭfaŝisma batalo en Hispanio; estis organizitaj pli ol 500 salutleteroj de sovetaj laboristaj kolektivoj al hispanaj kamaradoj kaj sendita Esperanta literaturo al esperantistoj batalantaj en la internaciaj brigadoj.[2] Eĉ venis ankoraŭ eldonaĵoj de SEU: En la unua duonjaro de 1937 aperis tradukoj de la nova soveta konstitucio kaj de du verkoj de Stalin.[3] En februaro 1938 *Sur Posteno* publikigis opiniesprimojn de sovetaj legantoj pri la revua enhavo[4], kaj en la posta numero sekvis iom mistera informo, ke SEU, nun kun Nekrasov kiel ĝenerala sekretario, „komencas sian laboron sur nova bazo"[5] – sen ia klarigo, kio okazis al Drezen.

Sed tiun ĉi informon pri kreo de „nova bazo" por SEU akompanis la sciigo, ke la nombro de ĝiaj membroj, inkluzive amikojn de Esperanto, atingis por 1937 nur 5 286. Ke mallumo kovris la Esperantan vivon en Soveta Unio, frape konsciigis la ĉesigo de esperantlingaj radio-elsendoj. Jam antaŭ decembro 1936 ĉesis la elsendoj el Minsk[6], kelkajn monatojn poste ankaŭ tiuj el Leningrado.[7] La soveta ambasadoro en Parizo, demandita pri la kialoj, unue nomis la ĉesigon „nur provizora"[8], sed poste donis al ĝi la stampon de definitiveco, klarigante ke la sovetaj radiostacioj ne plu dissendas en Esperanto „pro ‚teknikaj kaŭzoj', sed ankaŭ ĉar iliaj dissendoj jam okazas en pluraj lingvoj".[9] Esperanto iĝis

1. *Sur Posteno* 1937, n-ro 52 (apr.), p. 2.
2. „SEU k antifaŝista batalo en Hispanio", *Sur Posteno* 1937, n-ro 52 (apr.), p. 2.
3. *Konstitucio (Fundamenta Leĝo) de la Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj*; J. Stalin, *Pri projekto de Konstitucio de U.S.S.R.*; J. Stalin, *Paroladoj kaj intervjuoj, 1935-1936.* – Temis pri malampleksaj broŝuroj.
4. „Sovetiaj k-doj pri SP", *Sur Posteno* 1938, n-ro 59 (feb.), p. 6.
5. *Sur Posteno* 1938, n-ro 60 (mar./apr.), p. 2.
6. *Internacia S.O.S. Bulteno* 1936, n-ro 49 (dec.), p. 1.
7. *Internacia S.O.S. Bulteno* 1937, n-ro 54 (majo), p. 3, lastfoje indikas la leningradan stacion, jam kun la informo „programo nericevita".
8. *Internacia S.O.S. Bulteno* 1937, n-ro 58 (sept.), p. 2.
9. *Internacia S.O.S. Bulteno* 1938, n-ro 62 (jan.), p. 3; kp. *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 24.

superflua, do. Aperis en 1938 ankoraŭ kelkaj korespond-anoncoj de sovetaj esperantistoj en *Sur Posteno* kaj la hispana *Popola Fronto*. Tiam regis silento.

Falis la dua kolono de IPE – malpli ol kvin jarojn post la nazia bato kontraŭ ĝia germana sekcio. Per la malapero de SEU, IPE seniĝis de sia plej membroriĉa landa asocio kaj tiamaniere ŝrumpis al nur kelkcent-membra organizaĵo, el kies sekcioj jam antaŭe pli ol la duono agadis kontraŭleĝe. Restante en kompleta nescio pri la kaŭzoj de la silentiĝo de la Esperanto-movado en Soveta Unio, la konfuzitaj gvidantoj de IPE en okcidenta Eŭropo nur pene spitis la plenan paraliziĝon de sia malgranda Internacio. Neeviteble, la internaj diskutoj pli kaj pli turniĝis ĉirkaŭ la demando pri la senco de plua ekzisto.

4.2.8. *IPE en agonio*

Esperoj pri reunuiĝo de la laborista Esperanto-movado estis ankoraŭfoje ekflamintaj en 1936. En julio de tiu jaro, kvar monatojn post la restarigo de sindikata unueco en Francio kaj unu monaton post la formiĝo de la popolfronta registaro de Léon Blum, la asocio de franclingvaj SAT-anoj[1] kaj la franca IPE-sekcio[2] okazigis en Parizo komunan kongreson por kunfandiĝi al unueca organizaĵo.[3] Tio ĉi okazis kelkajn tagojn antaŭ la eksplodo de la Civila Milito en Hispanio, per kiu tutmonde multe kreskis la subteno al la ideo de popolfronta kontraŭstaro al la faŝismo. Kiam komence de aŭgusto malfermiĝis en Manchester la 16a Kongreso de SAT, ankaŭ tie ŝajnis blovi vento de unueco: La delegitoj permesis al reprezentanto de IPE, William Keable, fari dudekminutan paroladon, en kiu li varme rekomendis sekvi la modelon de la francoj ankaŭ internaciskale.[4] Kvankam ne estis akceptita propono pri starigo de unuec-prepara komisiono, la kongresa rezolucio, kiu invitis ĉiujn laboristajn esperantistojn

1. Fédération Espérantiste Ouvrière.
2. Fédération des Espérantistes Prolétariens.
3. Sub la nomo „Fédération Espérantiste du Travail"; aliĝis ankaŭ belgaj grupoj, sed ne la socialista grupo ESFIO. La nova federacio unuigis 2000 membrojn. – Raporto kaj la teksto de alvoko estas en *Sur Posteno* 1936, n-ro 45/46 (aŭg./sept.), p. 1.
4. „Protokolaro pri la XVI-a Kongreso de SAT en Manĉestro", *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 72.

kolektiĝi en SAT por „tutforta lukto kontraŭ la naciecan frenezon", ne plu entenis eksplicitajn kondiĉojn. Estis postulite, ke „la unueco devas okazi en la kadro de SAT", sed samtempe la kongreso ofertis forgesi pri pasintaĵoj kaj deklaris ĉiun klasbataleman esperantiston, senrigarde al antaŭaj faroj, bonvena en la vicoj de SAT.[1]

Tamen, se entute la alekstere montrita optimismo post Manchester havis bazon[2], SAT rapide ĝin perdis, observante kiel la francaj IPE-anoj senĝene klopodis regi la „modelan" unuecan asocion en sia lando kaj flankenŝovi la influon de SAT.[3] La Plenum-Komitato de SAT juĝis, ke la situacio en Francio „montras tre akre ĉiujn malfortajn flankojn de tiu intertendenca ‚paco' kiu estiĝis nur el defenda gesto kontraŭ la minaco de l' faŝismo, sed ne estas profunde bazita sur komuna idearo".[4] Tio aludis ankaŭ la staton de la popolfronto, kies partneroj pli kaj pli disiris. En junio 1937, per la abdiko de la ĉefministro Blum, komenciĝis procezo kondukanta al dissolviĝo de la popolfronta registaro en Francio; la socialistoj rifuzis la proponon de la komunistoj formi unuecan partion. Estis en tiu tempo, ke IPE perdis ĉian kredindecon en la okuloj de SAT.[5] Ĝi ankaŭ ne plu povis gajni per tio, ke en nova statuto, akceptita en 1937, fine estis forstrekita la

1. N. Bartelmes, „La leciono de sukcesplena kongreso", *Sennaciulo* 12. 1935/36, p. 62. – Teksto de la „Gvidrezolucio" samloke.
2. IPE kompreneble parolis pri venko de „sektismo" en Manchester: „La lasta SAT-kongreso kaj unueca fronto", *Sur Posteno* 1936, n-ro 47 (okt./nov.), p. 3. – La 20an de julio 1936, unu semajnon post la franca unuiĝkongreso, la sekretariaro de IPE, montrante al tiu evento, estis proponinta en leteroj al ISE kaj SAT novajn traktadojn cele al unuecigo kaj en letero al UEA „la starigon de certgrada kooperado". La leteroj, subskribitaj de H. Homo (Muravkin), estas presitaj en *Sur Posteno* 1936, n-ro 45/46 (aŭg./sept.), p. 2. Ili estas la lasta komuniko de la leningrada IPE-centro, publikigita en *Sur Posteno*.
3. H. Cachon, „La unueco en Francio", *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 42; „Raportaro de la Plenum-Komitato de SAT por la agadjaro 1937-38", samloke, p. 63-64; „Protokolaro pri la 18-a Kongreso de S.A.T. en Bruselo", samloke, p. 89 (raporto de Barthelmess).
4. „Raportaro de la Plenum-Komitato de S.A.T. (1936-1937)", *Sennaciulo* 13. 1936/37, p. 49. – Por povi denove defendi la starpunkton de SAT en la franclingvaj regionoj, ekde oktobro 1937 estis eldonita la monata bulteno *SAT-Amikaro*.
5. Krome, pro sia organiza malfortiĝo IPE komencis esti simple ignorata de SAT. En novembro 1936 dissolviĝis la nederlanda IPE-sekcio: *Sennaciulo* 13. 1936/37, p. 15; *Sur Posteno* 1936, n-ro 48 (dec.), p. 3.

postulo pri ligiĝo de la IPE-membraro al dialektika materiismo.[1]

Tiu ĉi decido tamen estis unuavice indiko pri tio, ke en IPE la diskuto pri „unueco" ŝanĝis la direkton. Ĝi jam apartenis al klopodoj prezenti IPE ne plu kiel organizaĵon, kiu serĉas revenigi SAT al „vera klasbatalo", sed bazi ĝian ekziston sur la nova tezo, ke ankaŭ laboristaj esperantistoj konsideru sin unue – esperantistoj. IPE, kiu naskiĝis sub la slogano, ke SAT, ĉesante subordigi Esperanton al klasbatalo, perfidis la tradicion de la laborista Esperanto-movado, kaj kiu ĉiam celis doni unuarangecon al la „peresperanta" PEK-laboro, komence de 1938 surprizis siajn membrojn per la admono, ke ili ne sensence babilu pri nure instrumenta utilo de Esperanto, sed konsciu sia tasko diligente propagandi kaj lerni la lingvon.[2] Per tio IPE eksplicite forlasis sian ĝistiaman linion: malemfazi la varbadon por Esperanto kaj kuraĝigi al praktika apliko de la lingvo por la specialaj celoj de la proletaro.

La rekonsciiĝo pri Esperanto kiel valoro per si mem ne signifis forpuŝon de ĝia serva karaktero; plue, IPE proklamis la neceson utiligi la lingvon kiel batalilon kontraŭ faŝismo kaj milita danĝero. Tamen, ĝuste rigarde al tiu celo IPE opiniis necese ne plu elstarigi sian prolet-interligan rolon, sed akcenti la komunan respondecon de la tuta Esperanto-movado, direktante inviton kunlabori al ĉiuj laboristaj organizaĵoj kaj „al ĉiuj seriozaj esp-istoj en la neŭtrala movado", kiuj pretas observi la minimuman antaŭkondiĉon – la batalon „kontraŭ faŝismo k por paco k demokrateco".[3]

Tiu ĉi „alvoko al unueco" aperis en la aŭgusta-septembra numero de 1938. Ĝi estis la lasta numero de *Sur Posteno*.[4] Malkovrinte esperantistecon kiel kunigan elementon, kelkaj gvidantoj de IPE nun rapide decidiĝis pri konsekvencoj, kiuj konformis

1. Gladis Keable, „Por forta IPE", *Sur Posteno* 1937, n-ro 5 (jul.), p. 1. – Teksto de la nova statuto: *Sur Posteno* 1938, n-ro 58 (jan.), p. 5-6; de la antaŭa statuto: *Internaciisto* 2. 1932, p. 90.
2. A.R., „Rimedo kaj celo", *Sur Posteno* 1938, n-ro 59 (feb.), p. 1-2.
3. Plenumkomitato de IPE, „Alvoko al unueco", *Sur Posteno* 1938, n-ro 63 (aŭg./sept.), p. 1.
4. La malaperon kaŭzis ĉefe, ke la franca sekcio kaj nederlandaj grupoj, krom BLEA la ĉefaj subtenantoj, en somero 1938 ĉesis fari pagojn: *Kunligilo. Interna organo de IPE-Centro k Plenumkomitato de IPE* (Londono), sen dato (ĉ. komence de 1939), p. 6.

al la logiko de ilia novorientiĝo. Nome, en la plua memstara ekzisto de sia organizaĵo ili vidis malhelpon al la aspirata unueco de ĉiuj esperantistoj.

Tiun starpunkton detaligis ampleksa cirkulero, kiun – anglalingve – en oktobro 1938 dissendis la ĝenerala sekretariino de IPE, Gladys Keable, „al ĉiuj komunistaj esperantistoj".[1] La cirkulero enkonduke parolas pri gravaj ŝanĝoj en la monda situacio, karakterizita per la antaŭenmarŝo de faŝimo: Sep monatojn antaŭe Hitler estis aneksinta Aŭstrion, fine de septembro la Munkena Konferenco sankciis la frakason de Ĉeĥoslovakio, kaj en Hispanio la respublikanoj jam troviĝis en senespera lukto kontraŭ la trupoj de Franco. Ĉi-kunlige, la cirkulero atentigas pri la persekutoj kontraŭ esperantistoj, ankaŭ „neŭtralaj", fare de la nazia reĝimo kaj pri la rezulte vastiĝanta konvinko, ke por savi Esperanton necesas kontraŭbatali faŝismon. Sekve, IPE devas komplete rekonsideri sian pozicion:

> Ni ne plu povas daŭrigi apliki linion, kiu taŭgis en 1932, aldonante tie kaj tie flikaĵon, por provi alĝustigi ĝin al la novaj cirkonstancoj de 1938. Ni fakte devas konfesi, ke ni grave eraris, daŭrigante tiun linion tiel longe sen pli serioze demandi pri ĝia ĝusteco.

La sama organizaĵo, kiu ankoraŭ malpli ol kvar jarojn antaŭe karakterizis la neŭtralan movadon bloke kiel reakcian, nun konfesis, ke en ties vicoj kreskas la proporcio de tiuj, kiuj estas „demokrataj kaj antifaŝistaj". Pro tio – laŭ la cirkulero – estis erare trakti la demandon de unueco nur kiel aferon inter SAT kaj IPE kaj ne konsideri ĝin en rilato al la movado kiel tuto. Sekve, ankaŭ la IPE-anoj prave meritus, akorde kun la eldiroj de Dimitrov en la Sepa Kongreso de Komintern, la epiteton „memkontentaj sektemuloj". Post tiu ĉi memkritiko la konkludo estis:

> ... la nura defendo de Esperanto mem en la nuna monda situacio estas batalo kontraŭ faŝismo, por demokratio kaj kulturo, por paco, libereco de ideoj, por rasa egaleco, por internaciismo...

Por plene enviciĝi en tiun batalon la komunistaj esperantistoj estis alvokitaj konsenti al la likvido de IPE kaj aliĝi, laŭ la landaj cirkonstancoj, al neŭtrala aŭ laborista Esperanto-asocio, en kiu ili – sub la gvido de internacia „Komunista Esperanto-Frakcio" –

1. La cirkulero, kiu evidente estis destinita unue por la britaj IPE-anoj, portas la daton de 20-10-1938; kopion de la kvin dense tajpitaj paĝoj afable disponigis s-ino Ethel Prent. Partan esperantlingvan version (tri paĝoj) mi dankas al s-ro Edward Ockey.

klopodu „iĝi la plej bonaj laborantoj". Por ornami la proponon pri likvido de IPE per oficiala sigelo Gladys Keable piednote atentigis, ke ŝia cirkulero estis ellaborita „kun la helpo kaj aktiva subteno" de la Brita Komunista Partio.[1]

Kvankam la cirkulero estis klasifikita kiel „privata", ĝia enhavo iĝis rapide konata.[2] La Plenum-Komitato de SAT, sciiĝinte pri la cignokanto de IPE, memorigis pri la tempo, kiam IPE pretendis reprezenti 25 000 laboristajn esperantistojn: „Hodiaŭ tiu sapveziko krevas!"[3] Preter iuj sentoj de malica ĝojo, multaj membroj de SAT ŝokiĝis pro la intenco de IPE dissolviĝi kaj transiri al la neŭtrala tendaro, ĉar al ili apenaŭ eblis dividi la pozitivan juĝon pri la „neŭtraluloj"[4], ĉar en la cirkulero SAT estis plue atakata[5], sed eble precipe ĉar la lini-ŝanĝo denove konfirmis tion, kio dekomence estis la ĉefa trajto de IPE: ĝia absoluta obeemo al la aktuale validaj direktivoj de Komintern.

Kiom ajn komprenebla estis la reago de SAT – surprizo estis, ke en IPE ĉi-foje ne efikis la komunista disciplino. Montriĝis, ke la britaj gvidantoj de IPE subtaksis la kapablon de siaj membroj

1. Proksimume du jarojn antaŭe la brita IPE-sekcio sendis peticion al Komintern „pri subteno kaj rekomendo de Esperanto kiel interligilo laborista", kun subskriboj de parlamentanoj kaj laboristaj gvidantoj: *Sur Posteno* 1936, n-ro 47 (okt./nov.), p. 1.
2. Eltiraĵoj aperis en *Sennaciulo* 15. 1938/39, p. 25-26. – Similan argumentadon havas la artikolo „Konstruu unuecon", en *Ruĝa Esperantisto* 1939, n-ro 79 (jan.), p. 1-2, 9.
3. Plenum-Komitato de SAT, „Ni staras fortaj", *Sennaciulo* 15. 1938/39, p. 25.
4. Oni ne povas nei, ke SAT subtaksis la progresemajn elementojn en la neŭtrala movado. La ŝajne pli realisma prijuĝo de IPE tamen venis tre malfrue (antaŭe ĝi agitis pli kontraŭ la „socialfaŝistoj" en SAT, ol por solidareco kontraŭ faŝismo) kaj krome estis troe diktita de taktikaj konsideroj. La tezo de Detlev Blanke („Internacio de Proleta Esperantistaro [IPE]", en: *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, Budapest 1978, p. 57), ke IPE „savis la moralan vizaĝon de la internacia Esperanto-movado" en la faŝisma epoko, pro tio ne estas akceptebla. Notinde, Blanke mencias nek la persekutojn kontraŭ SEU nek la dissolvo-debaton en IPE.
5. La cirkulero alvokis la komunistajn esperantistojn plenenergie daŭrigi sian batalon kontraŭ sennaciismo kaj entute zorgi, ke de la malapero de IPE ne profitu SAT. Krome, estis kvazaŭ atenco al la fondiĝa filozofio de la laborista Esperanto-movado, ke BLEA komence de 1939 deklaris: „Apartiĝo de laboristoj for de neŭtraluloj estas ne nur superflua, sed ĝi estas falsa k danĝera apartigo." Vd.: „Konstruu unuecon", *Ruĝa Esperantisto* 1939, n-ro 79 (jan.) p. 2; kp. *Sennaciulo* 15. 1938/39, p. 36.

kompreni la kialojn de la dissolvo-propono. Tiuj suspektis, ke „malantaŭ tiu propono estas pli, ol la membroj rajtas scii"[1], kritikis, ke ĝi baziĝas sur oportunismo kaj ignoro de klasbatalo[2], plendis pri provo reirigi la radon de la historio ĝis antaŭ la tempo, kiam laboristoj kaj burĝoj apartiĝis[3], kaj atakis „la etburĝan mentalecon de niaj gvidantoj".[4] La atakitoj, la estraranoj de Brita Laborista Esperanto-Asocio (BLEA)[5], el kiuj Gladys Keable samtempe plenumis la funkcion de ĝenerala sekretariino de IPE, tamen ne cedis. Al la jara konferenco de BLEA, kiu okazis en Glasgow dum la paskaj tagoj en aprilo 1939, ili submetis oficialan proponon, ke la asocio dissolviĝu kaj ĝiaj membroj aliĝu al la neŭtrala Brita Esperanto-Asocio; la propono invitis la IPE-anojn en aliaj landoj imiti la ekzemplon de siaj britaj kamaradoj.[6] Estis arda diskuto, je kies fino granda plimulto malakceptis la proponon de la estraro.[7] La venkitaj iniciatintoj de likvido de IPE sekve demisiis kaj en aparta deklaro anoncis sian volon „lojale" kunlabori en BEA kaj Internacia Esperanto-Ligo.[8]

Tiel fiaskis la provo dissolvi IPE. BLEA, sub la gvido de nova, ĉefe skota estraro, daŭrigis sian agadon. En Francio, kie same ne sukcesis likvidaj tendencoj[9], en majo 1939 reaperis la organo de

1. J. Thompson, en *Ruĝa Esperantisto* 1939, n-ro 80 (feb.). p. 9.
2. T.S. Boag, samloke, p. 2.
3. „Amendment to Leading Resolution", samloke, p. 8.
4. Leslie Edmondson, en *Ruĝa Esperantisto* 1939, n-ro 81 (mar.), p. 2.
5. Fine de 1938 BLEA havis 222 membrojn; fakte, post la malapero de SEU ĝi estis la plej aktiva sekcio de IPE.
6. Teksto de la propono (kiun la estraro nomis „rezolucio") en *Ruĝa Esperantisto* 1939, n-ro 79 (jan.), p. 9, kaj en *Kunligilo* (1939), p. 3. – Pli frue, en decembro 1938 jam likvidiĝis la belga sekcio: *Kunligilo*, p. 6.
7. 29 estis por likvido de BLEA kaj IPE, 117 kontraŭ: *Ruĝa Esperantisto* 1939, n-ro 82 (apr./majo), p. 1, 4.
8. *Ruĝa Esperantisto* 1939, n-ro 82 (apr./majo), p. 7-8; n-ro 83 (jun./jul.), p. 6-7. – La rezolucio, kiu ricevis la plimulton de la delegitaj voĉoj, alvokis por fortikigo de BLEA kaj IPE, sed ankaŭ parolis pri la ebleco de filiiĝo al BEA: *Ruĝa Esperantisto* 1939, n-ro 82 (apr./majo), p. 1. Pro aldonaj informoj mi dankas al s-ino Ethel Prent, brita membro de SAT, kaj al s-ro Arthur Nobes, estrarano de BLEA ĝis aprilo 1939. Vd. ankaŭ la broŝuron de Nobes, *Historio de la Brita Laborista Esperanto-Asocio kaj Internacio de Proleta Esperantistaro*, 1983.
9. *Sennaciulo* 15. 1938/39, p. 43; *Ruĝa Esperantisto* 1939, n-ro 82 (apr./majo), p. 2. – Krom la franca, la norvega kaj la – neleĝa – portugala sekcioj kondamnis la likvido-proponon. Ankaŭ estis kontraŭstaro inter svedaj membroj de IPE; vd. la memorojn de Jim Hornö, „Pri IPE kaj PEK-laboro", *Paco* 1981, GDR-eldono, p. 33.

Ĉesupre: Franca broŝuro, kiu de ekstreme naciisma, kontraŭjuda starpunkto atakas Esperanton (1907). ***Sube:*** Tiu ĉi broŝuro agitadis kontraŭ Esperanto, vidante en ĝi malhelpon al la tutmonda disvastiĝo de germana komerco (1915); sub ĝi, atako de brazila delegito en Ligo de Nacioj (1922); dekstre, strikte sekreta raporto de prokuroro pri la japana proleta Esperanto-movado (1939). ***Malsupre:*** "Kontraŭ burĝa kontrabandaĵo en la lingvoscienco" (1932): En ĉi tiu ruslingva libro unu artikolo kondamnas la teoriojn de la esperantologoj Spiridoviĉ kaj Drezen.

IPE sub la malnova nomo *Internaciisto*. Eldoniĝis tri numeroj. IPE ankoraŭ ĝisvivis la Hitler-Stalin-Pakton de la 23a de aŭgusto 1939 – kun ĝi do la kompletan kolapson de ĉiuj esperoj pri alianco de komunistoj, socialistoj kaj progresemaj burĝoj kontraŭ la faŝismo. Unu semajnon poste komenciĝis la Dua Mondmilito, dum kiu ĉesis la ekzisto de IPE.[1] Al la multaj viktimoj de milito kaj genocido apartenis ankaŭ du francaj ĉefaktivuloj de IPE, Marcel Boubou kaj Honoré Bourguignon, kiuj pereis en la naziaj koncentrejoj Auschwitz kaj Dachau.[2]

4.3. *SOCIALISMO KAJ LINGVO INTERNACIA*

Marksistoj-leninistoj ĉiam konsideris grava, ke ilia agado havu teorian bazon. Pro sia ĝenerala konvinko, ke la historia evoluo sekvas difinitajn leĝojn, ili zorgis teorie pravigi sian politikon kaj demonstri plenan harmonion inter teorio kaj praktiko. Por povi atingi komprenon pri la kialoj, pro kiuj post du jardekoj de oficiala tolero aŭ eĉ bonvolo estingiĝis la Esperanto-movado en Soveta Unio, ni sekve unue provu ĉi-sube analizi la rilaton inter socialismo kaj lingvo internacia. La demandoj estas: Ĉu la malapero de Esperanto en Soveta Unio estas klarigebla el la tradicio de socialismo, precipe de ĝia marksisma variaĵo? Ĉu la idearo de socialismo liveras teorian pravigon por la ekzisto de la Esperanto-movado? Kaj ankaŭ: Kiaj estis la klopodoj de sovetaj esperantistoj formuli teorian bazon por sia agado en Soveta Unio?

4.3.1. *Frusocialistaj revoj pri universala lingvo*

La temo de lingva interkompreniĝo de la homaro trans naciajn limojn jam okupis la menson de pensuloj, kiujn oni kalkulis inter

1. Anglalingva cirkulero de la estraro de BLEA en 1945 konstatis, ke IPE „devas esti konsiderata kiel mortinta".
2. Bourguignon aktivis ĉefe en IAREV kaj eldonis ekde 1934 la revuon *Infanoj sur Tutmondo*. Alia franca IPE-aktivulo, Georges Salan, kiel rezistanto estis en 1944 deportita al Germanio; sian verkon *La nuda vero. Originala raporto pri propraj travivaĵoj en naziaj koncentrejoj 1944-1945* (Nîmes 1975) li dediĉis al Boubou kaj Bourguignon.

la pioniroj de utopia socialismo.[1] Al ili apartenas la angla humanisto Thomas More (1478-1535), la itala monaĥo Tommaso Campanella (1568-1639) kaj la franca aŭtoro de vojaĝpriskribo al fikcia lando Denis Veiras d'Alais. En iliaj verkoj, *Utopia, Civitas Solis* kaj *L'Histoire des Sevarambes*[2], same kiel en aliaj fantaziplenaj projektoj de nova mondo ofte troviĝis aludoj pri la lingvo kiel faktoro helpanta aŭ baranta la realigon de la idealo de nova sociordo. Eĉ pli: Pluraj el tiuj verkoj ankaŭ faris proponojn kiel forigi tion, kion Voltaire priploris kiel „unu el la plej grandaj malfeliĉoj de la vivo"[3]: la lingvan dissplitiĝon de la homaro.

La plendo de Voltaire estis karakteriza por la klerismo de la 17a kaj 18a jarcentoj, direktita kontraŭ malvasta nacieca pensado kaj apelacianta por racio, moralo, jura ordo kaj interpopola harmonio. Ekde la komenco de la 17a jarcento, kiam disfloris la naciaj lingvoj kaj malfortiĝis la signifo de la latina kiel interligilo de la mondaj intelektuloj, multaj filozofoj kaj sciencistoj – inter ili Descartes, Comenius kaj Leibniz – dediĉis atenton al la ebleco krei tute novan lingvon. Ilia celo plej ofte ne estis nur akiri instrumenton por pli facila komunikado inter malsamlingvanoj, sed atingi lingvon, kiu, interrilatigante vortojn kaj konceptojn, plene respegulu la homan penson kaj tiel superu ĉiujn ĝisnunajn lingvojn. La universala lingvo, al kies planado celis kontribui pluraj skemoj de „filozofia" lingvo, estis rigardata kiel la logika kulmino de la senhalta progresado de la homa intelekto aŭ eĉ, kiel imagis pli mistike agorditaj pensuloj, promesis reiron al tiu stato, kiu ekzistis ĝis la konfuziĝo de lingvoj en Babel.[4]

Dum la 19a jarcento, en la epoko de nacia reviviĝo kaj romantiko, aperis pliaj projektoj de universala lingvo, kiuj – diference

1. Vd. la superrigardon de Rátkai Árpád, „Fruaj socialismaj konceptoj pri la lingva futuro de la homaro", en: Szerdahelyi István (red.), *Miscellanea Interlinguistica*, Budapest 1980, p. 107-121.
2. La laste nomita verko, kiu aperis kiel traduko el la angla (Paris 1677-79), donas detalan enkondukon en la – inventitan – lingvon de la sevaramboj.
3. Cit. BIL, p. 145.
4. James Knowlson, *Universal language schemes in England and France, 1600-1800*, Toronto, Buffalo 1975 (kp. la recenzon de Humphrey Tonkin, *Lingvaj Problemoj kaj Lingvo-Planado* 3. 1979, p. 76-85); M.M. Slaughter, *Universal languages and scientific taxonomy in the seventeenth century*, Cambridge 1982.

de la filozofiaj aŭ aprioraj lingvoj – klopodis pli multe ĉerpi el la strukturo kaj vortaro de ekzistantaj lingvoj. Daŭris ankaŭ la interesiĝo de reprezentantoj de utopia socialismo, kvankam ĝi ne alprenis la formon de pli aktiva subteno al la nova lingvoplanada tendenco, kiu ja celis al pli pragmata solvo. En siaj verkoj, la utopiaj socialistoj atentigis je la perspektivo de lingva unueco de la homaro sub la kondiĉoj de nova socia ordo, sed preterlasis doni detalojn pri la karaktero de la universala lingvo aŭ la procezo de ĝia formiĝo. La franco Etienne Cabet, kies romano *Voyage en Icarie* inspiris al eksperimentoj de komunisma kolonio, prezentis la plene regulan, racian kaj facile lerneblan lingvon de la ikarianoj kiel modelon de lingvo venkanta la progres-malhelpan varion kaj neperfektecon de la lingvoj.[1] Ankaŭ en la grandioza *Théorie de l'unité universelle* de la ekscentra franco Charles Fourier aperas racia universala lingvo, konvena al la perfekta socio; ĝia estiĝo estas prognozata – iom kontraŭdire – kiel la rezulto de kontaktoj inter la popoloj, t.e. kiel kunfandiĝo de la ekzistantaj „neraciaj" lingvoj.[2] Alia franca ĉefreprezentanto de la antaŭmarksa socialismo, Pierre-Joseph Proudhon, eĉ debutis per prilingva verko. Li kredis, ke la homaro iam havis komunan lingvon kaj revenos al tutmonda frateco per restarigo de la perdita lingva unueco.[3]

Pli rimarkinda estas la pritrakto de la temo de universala lingvo, kiun donas unu el la plej originalaj frusocialistoj, la germana tajloro kaj aŭtodidakto Wilhelm Weitling.Li konstatis:

> La diverseco de la lingvoj estas nenio sankta kaj bela nek io utila, ĝi estas potenca baro al la progreso en la sciencoj.

Weitling, kiu rekomendas „surtreti la stultan antaŭjuĝon de patriotismo kaj nacieco en la polvon", montrante al Leibniz opinias necesa kaj ankaŭ ebla „inventi tute novan, belan, bonsonan,

1. Etienne Cabet, *Voyage en Icarie*. 4a eld., Paris 1846, p. 2; vd. ankaŭ p. 80, 331, 369.
2. Charles Fourier, *Théorie de l'unité universelle*. 4 vol., Paris 1841-43; kp. Rátkai, p. 111.
3. *Essai de Grammaire générale*, aperinta kiel apendico al reeldono de Nicolas-Sylvestre Bergier, *Eléments primitifs des langues*, Besançon 1837; eltiraĵo en *Œuvres complètes de P.-J. Proudhon*. Vol. 15, Paris 1959, p. 82-84. – Proudhon jam en 1842 distancigis sin de sia eseo.

perfektan lingvon". Ke en la epoko de trajnoj kaj aviado plue ekzistu limoj kaj lingvoj, al li ŝajnas simple neimageble.[1] Kun tiu laŭtempa kompreno pri la praktika utilo de mondlingvo tamen kontrastas la maniero, per kiu Weitling mem klopodis pri solvo de la problemo: Lia verko *Allgemeine Denk- und Sprachlehre*, konata nur kiel eltiraĵo, konsistigas ambician provon eltrovi, laŭ la modelo de la grandaj filozofoj, perfektan sistemon por la kongruigo de penso kaj lingvo kaj tiel prezenti klasifikon de la tuta universo.[2]

Kiel ajn supraĵaj kaj ofte naivaj estis la skizitaj ideoj pri universala lingvo, ili ĉiuokaze formis konsistigan parton en la pensado de gvidaj reprezentantoj de la utopia socialismo. La revo pri solidara homaro, obeanta al la racio kaj forĵetanta ĉian superstiĉon, en kiu malaperis socia malegaleco kaj naciaj diferencoj, facile estigis la imagon, ke eblas revenigi kvazaŭ la paradizan prastaton ankaŭ en la sfero de lingva interkomunikiĝo.

4.3.2. *La problemo de antaŭrevolucia internaciismo ĉe Marx kaj Engels*

Kiamaniere do pluefikis tiu ĉi heredaĵo en la posta historio de socialismo? Kiel konate, la apero de la *Komunista Manifesto* (1848) inaŭguris evoluon, en kies paso pli fruaj fluoj de socialisma pensado fine devis cedi al la „scienca socialismo" fondita de Marx kaj Engels. Estis la marksismo, kiu – laŭ la formulo de Max Adler – „manifestas la realan kernon de tiu ĉi [utopia] revo kaj levas ĝin en la konscion de klaraj rimedoj kaj celoj, per kio el la revo de la jarmiloj iĝas la ekonomie maturiĝinta realeco de proksima estonteco".[3]

Unue, necesas noti, ke en la verkoj de Marx kaj Engels ne troviĝas ia atentigo pri lingva unueco de la homaro en komunismo.

1. Wilhelm Weitling, *Garantien der Harmonie und Freiheit* (1842). Red. Bernhard Kaufhold, Berlin 1955, p. 93, 94, 96, 99.
2. Tiu verko, nomata ankaŭ *Wahrheits- oder Universums-System*, estis finita verŝajne plej malfrue en 1849. La eltiraĵo, sendota al Alexander von Humboldt por ekzameno, portas la titolon *Klassifikation des Universums, zugleich Klassifikation der Universalsprache*: Wilhelm Weitling, *Klassifikation des Universums*. Red. Ernst Barnikol, Kiel 1931, p. 14, 19 k.sekv.
3. Max Adler, *Die Staatsauffassung des Marxismus*, Wien 1922, p. 310.

Nur sporadaj aludoj montras, ke ili almenaŭ sciis pri la foje ekzaltaj lingvo-utopioj de siaj antaŭuloj. Engels en 1853, montrante al propono de Weitling forigi la dativon kiel „aristokratan institucion"[1], mokas, ke la persa lingvo estus por Weitling la „langue universelle toute trouvée", ĉar en ĝi „la dativo kaj la akuzativo estas ĉiam identaj".[2] Kaj pri Proudhon ni konas komenton de Marx, ke tiu per sia „nematura verko pri la ‚Langue universelle'" aŭdacis trakti problemojn, „por kies solvo al li ankoraŭ mankis la plej elementaj scioj".[3]

Marksistaj esperantologoj kelkfoje konkludas el tiuj flankaj rimarkoj, ke Marx kaj Engels principe rekonis la gravecon de la problemo de universala lingvo kaj kritikis nur la netaŭgajn solvoproponojn de Weitling kaj Proudhon.[4] Ĉu tia interpreto estas akceptebla? Aŭ ĉu kun la transiro de utopia al scienca socialismo la problemo entute ŝoviĝis en malantaŭon?

Komprenon pri tio eble helpos alporti la ĝenerala teoriaro de Marx kaj Engels, precipe iliaj opiniesprimoj pri la rilato inter socialismo kaj nacieco. Ne estas dubo, ke la penso de Marx en fina konsekvenco estis direktita al la kreo de konkorda homaro.[5] Lia malŝato de naciismo montriĝas en multaj teoriaj eldiroj kaj ricevas apartan signifon per la tezo, ke la nacio estiĝis kune kun la formiĝo de la burĝ-kapitalisma mondo kaj malaperos post ties pereo. Kun la likvido de kapitalismaj propriet-rilatoj falas la lastaj naciaj antaŭjuĝoj, kaj: „Kun la kontraŭeco de klasoj interne de nacio falas la malamika interrilato de nacioj."[6] Marx ankaŭ atentigis, ke pri la forigo de malvastaj naciaj limoj jam zorgas la burĝaro mem, ĉar la kapitalismo strebas al ekonomiaj teritoriegoj kaj kreas sistemon de tutmonda interdependeco. Estas la

1. Letero de Engels al August Bebel, de 25-10-1888, MEW XXXVII 118.
2. Letero de Engels al Marx, de 6-6-1853, MEW XXVIII 261.
3. Letero de Marx al J.B. v. Schweitzer, de 24-1-1865, MEW XVI 25. – Tiun kritikon sekvas laŭdaj vortoj pri la fama verko de Proudhon, *Qu'est-ce que la propriété?*.
4. Ekzemple D. Blanke, „Pri la historio de la internacia laborista esperantomovado", *Paco* 12. 1969, n-ro 187/188 (GDR-eldono), p.34; N. Nekrasov, en EdE, p. 360.
5. Solomon Frank Bloom, *The world of nations. A study of the national implications in the work of Karl Marx*, New York 1941, p. 195.
6. "Manifest der Kommunistischen Partei", MEW IV 479.

tasko de la proletaro kompletigi la historian procezon kaj plue malaperigi limojn kaj konfliktojn inter la nacioj.

Tamen, kiam Marx kaj Engels alprenis starpunkton pri naciaj problemoj, ili plej ofte rilatis al difinitaj politikaj situacioj; ili preterlasis ellabori sisteman teorion de la „nacio". Ĉar malgraŭ sia internaciisma celado ili ne rifuzis al la nacioj la rajton je disvolviĝo, el tio sekvas aro da kontraŭdiroj. Ili asertas, ke post la proleta revolucio la naciaj limoj falas kune kun la klasaj baroj; sed antaŭe oni trapasas la demokratian revolucion, per kiu la nacieco estas grave akcelata. Kiel malaperu naciaj apartaĵoj, dum fortiĝas la ŝtata potenco, restas neklare. Estante tute fiksitaj al la unuarangeco de klasbatalo, Marx kaj Engels akceptas la fortikiĝon de nacioj kiel portantoj de la progreso kaj samtempe rigardas la asimiladon de pli malgrandaj popoloj kaj la sennaciigon de kolonioj per la tutmonda penetro de kapitalismo kaj eĉ militojn pli-malpli eksplicite kreskigantaj la maturiĝon de la revolucio.

Se do militoj kaj koloniismo akcelas la revolucion: ĉu, ekzemple, pacifismo ĝin ne proksimigas? Kvankam Marx kaj Engels estas konvinkitaj, ke la proleta batalo kondukos al unuiĝo de la mondo, ni trovas ĉe ili apenaŭ klarigojn pri tio, kiel la monda unuiĝo estu flanke de la proletaro akcelata antaŭ la revolucio aŭ antaŭ la kompletiĝo de la procezo de burĝa emancipiĝo. Ŝajnas, ke, laŭ ili, la burĝ-kapitalisma unueciĝo de la mondo ne estu ĝenata per antaŭaj internaciismaj strebadoj de la proletaro. La komunistoj ne estu „mondpliboniganto j"[1] kaj ne kredu pri la „ĥimero" de eterna paco[2] antaŭ la proleta revolucio. Marx avertas kontraŭ „la internacia fratiĝo de popoloj"[3], ĉar tiu ĉi burĝa frazo kaŝas la klasan antagonismon kaj deturnas atenton de la prioritato de klasbatalo. Kontraŭe, vere fratigi la naciojn kapablas nur la proletaro, kiu jam estas „esence homarana, kontraŭnacieca".[4] Kiel Engels skribis en 1885[5], la *Komunista Manifesto*

1. „Manifest", p. 474.
2. Engels, „Das Fest der Nationen in London", MEW II 614.
3. Marx, „Kritik des Gothaer Programms", MEW XIX 24.
4. Kiel noto 2.
5. Engels, „Zur Geschichte des Bundes der Kommunisten", MEW XXI 216.

konscie anstataŭigis la pli malnovan devizon „Ĉiuj homoj estas fratoj" per la nova batalvoko „Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!". Tiu alvoko al solidareco de agado unuavice celis al preparo por la revolucio. Alivorte: Antaŭ la revolucio ne povis ekzisti substanca internaciismo, kaj post ĝi ĉio kvazaŭ reguliĝus per si mem. Ni do povas resume konstati, ke la marksismo ja jesis la finan staton de tutmonda harmonio, sed meminiciate nenion faris por la interproksimigo de popoloj *antaŭ* la revolucio.[1]

Pro tio iĝas kompreneble, kial Marx kaj Engels ne nur malakceptis la klerisman strebadon al federalismo de la popoloj, sed proklamis decidan batalon ankaŭ al la eŭrop-federacia linio de sia socialista konkuranto Proudhon. Sian konstaton, ke la laboristoj ne havas patrujon[2], ili ne komprenis kiel inviton al nacia nihilismo. Tian radikalismon de la anoj de Proudhon Marx ridindigis, riproĉante al la francoj, ke ili komprenas „sub negacio de la naciecoj ilian absorbiĝon en la modelan nacion francan".[3] Marx kaj Engels celis al la forigo de baroj inter la nacioj, sed ne pensis pri dissolviĝo de naciaj kulturoj kaj lingvoj.[4] Karakterize, jam en 1845 ili akuzis Max Stirner pri la strebo anstataŭigi ĉiujn lingvojn per unu sola[5], kaj sendube ili ankaŭ samopiniis kun la kritikantoj de Weitling, kiuj pro ties pledo por universala lingvo timis, ke la komunistoj estos suspektataj pro ĝenerala strebo likvidi „nian belan germanan lingvon".[6]

Scenejo de la batalo de Marx kontraŭ liaj oponantoj estis la Unua Internacio, fondita en 1864, la „Internacia Laborista Aso-

1. Kp. Walter Lipgens, „Staat und Internationalismus bei Marx und Engels", *Historische Zeitschrift* 217. 1973, p. 583.
2. „Manifest", p. 479.
3. Letero de Marx al Engels, de 20-6-1866, MEW XXXI 229.
4. Kp. Michaël Löwy, „Marx et Engels cosmopolites: l'avenir des nations dans le communisme (1845-1848)", en: *Colloque sur: L'expérience soviétique et le problème national dans le monde (1920-1939), Paris, 6, 7, 8 décembre 1978. Actes. Tome I*, Paris 1981, p. 623-636.
5. „Die deutsche Ideologie", MEW III 412. – Moke ili skribas, ke temas pri la „sankta" hebrea lingvo.
6. August Becker, *Was wollen die Kommunisten?*, Lausanne 1844; eltirajo en: Frits Kool, Werner Krause (red.), *Die frühen Sozialisten*. Vol. 2, München 1972, p. 490. – Mem estante disĉiplo de Weitling, Becker citas tiun riproĉon al la komunistoj kaj esprimas la opinion, ke la nivelado de naciaj apartajoj ne tuŝos la lingvon („...trankviliĝu – neniam estiĝos tiu mondlingvo!").

io" (ILA), en kiu estis reprezentitaj la diversaj socialismaj tenlencoj inkluzive la anarkiistojn. La kongresoj de ILA, precipe iu en Bruselo en 1868, evidentigis la kreskantan influon de narksismo, ĝis en 1872 kun la eksigo de Miĥail Bakunin okazis nalkaŝa skismo inter la pledantoj por centrismo kaj revolucia)artio ĉirkaŭ Marx, unuflanke, kaj la anarkiistaj subtenantoj de pontanea, kontraŭ-aŭtoritata movado, aliflanke. Ĉi-lastaj dezi-is, ke ILA estu organizita laŭ la federalisma principo kaj tiama-niere jam liveru modelon de la estonteco. Marx kaj Engels kon-raŭe timis, ke la naciskale okazanta batalo de la proletaro mal-ortiĝus, se oni adoptus la imagojn, „kiujn kelkaj fantaziuloj aras al si pri nedifinita estonta socio".[1] Ili preferis „veran mova-lon" de la proletaro al internaciaj organizformoj, dum Bakunin :aj la proudhonistoj ligis al la programo de politika centrigo de la aboristoj ankaŭ la danĝeron, ke naciaj minoritatoj estos ignora-aj aŭ eĉ subprematai. La venko de Marx kontraŭ Bakunin signi-is, sekve, ke la monda revolucio estis komprenata kiel kunordi-ita agado de la proletaro de progresintaj landoj, ne plu kiel pontanea agado de la tutmonda laborista klaso. „La proleta nternaciismo per tio perdis sian origine universalan aŭ ‚tutplanel-lan', sed samtempe ankaŭ sian ofensivan karakteron."[2] La narksismo do malfortigis la tradician internaciismon de socialis-oj.

Dum la unuaj kongresoj de ILA la diskutoj ankoraŭ estis forte tampitaj per la pensaro de utopia socialismo. En Ĝenevo en 1866 la delegitoj havis antaŭ si memorandon de la pariza labor-sto Leneveux, kiu pledis por ortografia simpligo de la franca. En ezolucio la kongreso esprimis sian simpation ne nur al tiaj cela-loj, sed ankaŭ kuraĝigis ĉiujn, „kiuj klopodas krei universalan ingvon por multigi la rilatojn de homoj de diversaj naciecoj kaj ekundigi ilin por la feliĉo de la homaro".[3] Ankaŭ en la posta aro, dum la kongreso en Lausanne, sekve al raporto de la svisa

1. Engels, „Der Kongreß von Sonvillier und die Internationale", MEW XVII 477.
2. Miklós Molnár, „Internationalismus", en: C.D. Kernig (red.), *Sowjetsystem und demokratische Gesellschaft*. Vol. 3, Freiburg k.a. 1969, kol. 279.
3. *La première Internationale*. Recueil de documents publié sous la direction de Jacques Freymond. Vol. 1, Genève 1962, p. 83.

bakuninisto James Guillaume pri la malfacilaĵoj de la franca ortografio estis akceptita rezolucio pri la lingva problemo:

> La Kongreso opinias, ke universala lingvo kaj reformo de la ortografio estus ĝenerala bonfaro kaj potence kontribuus al la unueco de popoloj kaj al la frateco de nacioj.[1]

La starpunkto de Marx pri tiuj du rezolucioj ne estas konata, sed tute evidente ili, pro la popolinterfratiga retoriko kaj la kurioza kombino de universala lingvo kaj ortografiaj problemoj en la franca, ne akordis kun lia programo. Tial ankaŭ ne estas mirige, ke la rezolucioj, kiuj estis la lasta elpaŝo de utopia socialismo favore al universala lingvo, restis sensekvaj kaj rapide forgesiĝis.[2]

4.3.3. *Kautsky kaj la vojo al lingva unueco en socialismo*

La malfortiĝo de internaciismo en·la laborista movado de post la disrompiĝo de ILA kaj la silentado de Marx kaj Engels pri antaŭrevoluciaj rimedoj akcelantaj la mondan unuiĝon tamen ne signifis, ke la laboristaj amasoj ĉesis rigardi la naciismon kiel esprimon de la burĝa klasa socio aŭ ke ili transiris de malestima ignoro de la nacia demando al pli realisma konsidero de la nacio en sia politika batalo. Male, nelaste ĉar Marx ne prezentis koheran teorion pri la rilato inter nacio kaj socialismo, ĝis la unuaj jaroj de la dudeka jarcento la laboristoj persistis en la konvinko, ke ili estas malhelpitaj partopreni en la nacia kulturo kaj ke ili trovos plenan individuan disvolvon nur en unueca monda socio. Tiun sintenon la aŭstra teoriisto Otto Bauer nomis „naiva kosmopolitismo".[3]

Eĉ kiam la kreskantaj strebadoj pri aŭtonomio interne de la multnacieca Aŭstrio-Hungario montris la plenan eksplodforton de la nacia problemo, la reprezentantoj de ortodoksa marksismo ankoraŭ emis ĝin bagateligi, atentigante ke per la venko kontraŭ la burĝaro aŭtomate solviĝos la naciecaj konfliktoj. Ja pli kaj pli

1. Samloke, p. 142, 231. – Vd. ankaŭ Rátkai, p. 116-118.
2. Guillaume, kiel adepto de Bakunin, en 1872 estis eksigita el ILA.
3. Otto Bauer, *Die Nationalitätenfrage und die Sozialdemokratie*, Wien 1907, p. 265 k.sekv. – Pri la temo ĝenerale vd. Hans Mommsen, *Arbeiterbewegung und nationale Frage*, Göttingen 1978.

ofte necesis trakti la temon, sed plu superregis la esperigo pri la historie determinita unueco de la mondo. En tiu ĉi kunligo specialan intereson meritas artikolo de Karl Kautsky, kiu esence kontribuas al kompreno de la rilato inter marksismo kaj la ideo de internacia lingvo.

La artikolo portas la titolon „La moderna nacieco"[1], kaj en ĝi la german-aŭstra marksisto klopodas elmontri la historiajn kaj sociajn fundamentojn de naciismo. Malgraŭ kontraŭdiroj en sia argumentado, kiu, ekzemple, preskaŭ egalas rekonon de la fakto, ke ankaŭ la laboristaro havas naciecan intereson, li klare insistas pri internaciiga efiko de la kapitalo en la epoko de mondekspozicioj, limtranspaŝa trafiko kaj internaciaj kongresoj. Notinde estas en tiu ĉi kunligo, ke la lingvon, kies signifo en la formiĝ-procezo de nacio estas detale traktata, li same rilatigas kun la internaciigaj tendencoj. Kautsky skribas:

> Ju pli intensiĝas la internacia komunikiĝo, des pli sentiĝas ankaŭ la bezono de internacia komunikilo, de universala lingvo.

Tiun bezonon li nomas „simptomo de la bezono por unuiĝo de la nacioj de la moderna civilizacio en unusola ekonomia teritorio, por malkonstruo de la naciaj bariloj".

La apero de la artikolo koincidas kun evento grava lige kun nia temo: En 1887, la sama jaro, en kiu Kautsky prognozis la estiĝon de universala lingvo, Zamenhof publikigis sian projekton de internacia lingvo – ne malpli konvinkita, ke tio respondas kreskantan bezonon. Tamen, malgraŭ la tempa paraleleco la antaŭvidoj de Kautsky kaj Zamenhof fundamente diverĝis. Pri la solvo proponita de Zamenhof Kautsky ankoraŭ ne povis scii, sed li mencias Volapük por akcenti tuj, ke universalan lingvon „nature ne eblas arbitre inventi".[2] „Volapük apenaŭ transiros la

1. K. Kautsky, „Die moderne Nationalität", *Die Neue Zeit* 5. 1887, p. 392-405, 442-451 (citaĵoj p. 448). – Eltiraĵoj el tiu ĉi artikolo kaj el tiu de 1908 (vd. sube) estas, en franca traduko, konsulteblaj, en: Georges Haupt k.a., *Les marxistes et la question nationale, 1848-1914. Etudes et textes*, Paris 1974, p. 114-142.
2. Nelonge antaŭ la artikolo de Kautsky oni povis legi pri la sama temo, ankaŭ en *Die Neue Zeit*: „Tiu [la internacia komunikiĝo] nuntempe kvazaŭ avidas je internacia lingvo; por tio tamen arte inventitaj ‚mondlingvoj' kredeble neniom taŭgas, sed verŝajne evoluos al tio la angla..." (Guido Hammer, „Die Zersetzung der modernen Nationalitäten", *Die Neue Zeit* 5. 1887, p. 183).

rangon de sekreta lingvo por kelkaj malmultaj sciantoj. Pli ĝuste unu el la jam ekzistantaj lingvoj kredeble iĝos universala lingvo." Li poste daŭrigas:

> Por esti „klera", por povi plene partopreni en la moderna ekonomia kaj intelekta vivo, oni jam nun devas kompreni, laŭeble ankaŭ paroli, apud sia gepatra lingvo minimume ankoraŭ unu duan lingvon, unu mondlingvon. Tiu či neceso čiam pli kreskos; apud la mondlingvoj la naciaj lingvoj malaltiĝos al rango simila al tiu, kiun nuntempe okupas la dialektoj apud la skriba lingvo. La naciaj lingvoj estos pli kaj pli rezervataj al hejma uzo kaj ankaŭ tie čiam pli alprenos la rolon de malnova familia meblo, kiun oni konservas kun pietato, sed kiu ne plu havas grandan praktikan valoron. Ĉiam pli disvastiĝos la scio de la lingvoj, parolataj en la grandaj centroj de monda komunikiĝo, en Londono, Novjorko, Parizo, Berlino, kaj inter tiuj siavice unu venkos super la aliaj. Kiu lingvo estos tiu, oni kompreneble apenaŭ povas diri hodiaŭ; sed čiuokaze estos kaŭzoj ekonomiaj, kiuj venkigos ĝin, ne iuj konsideroj pri gramatiko aŭ muzikeco.

Precipe la pli malgrandaj nacioj sentas, laŭ Kautsky, la bezonon uzi komunan lingvon, ekzemple la germanan aŭ francan, kaj estas malavantaĝe, se tiun evoluon malhelpas nacia respektemo.

La opinion diritan en 1887 Kautsky konservis ankoraŭ multajn jarojn poste. En 1908 li skribis, ke en socialisma socio la homoj scipovos krom siaj naciaj lingvoj unu aŭ plurajn mondlingvojn: „... tiam estos ankaŭ la bazo por la iom-post-ioma malgraviĝo kaj plena malapero unue de la lingvoj de pli malgrandaj nacioj, por la fina kunigo de la tuta kultura homaro en unu lingvo kaj unu nacieco..."[1] Kaj en 1917 li ripetis: „Ne la diferenciĝo, sed la asimiliĝo de la naciecoj ... estas la celo de la socialisma evoluo." Kautsky akcentis, ke la amasproduktado postulas ne la konservon de multlingveco, sed la lingvan unuiĝon de la homaro: „Kontraŭagi al ĝi estas reakcie."[2]

Kautsky estis ĝis 1914 la plej aŭtoritata teoriisto de la Dua Internacio; liaj verkoj, precipe tiuj pri la problemoj de nacieco kaj internacieco, havis grandan influon je la tutmonda laborista movado. Same estis li, kiu unuafoje enkadrigis la demandon de

1. K. Kautsky, „Nationalität und Internationalität", *Die Neue Zeit* 26. 1908, *Ergänzungsheft* n-ro 1, p. 1-36 (citaĵo p. 17).
2. Karl Kautsky, *Die Befreiung der Nationen*. 4a eld., Stuttgart 1918, p. 47, 51. – En *Die Vereinigten Staaten Mitteleuropas* (Stuttgart 1916, p. 52) li montras komprenemon por la strebo al neŭtrala artefarita lingvo. Sed denove li pledas, ke unu el la naciaj lingvoj iĝu mondlingvo; la opozicio kontraŭ tio estos en socialisma socio malpli forta, ol „hodiaŭ".

mondlingvo en la marksisman teorion pri ekonomiaj evoluŝtupoj. Kio ĉe Marx kaj Engels estas rimarkebla nur ĝerme, kvankam facile deduktebla el la antaŭe skizitaj ideoj, tion prenis kaj teorie poluris Kautsky. Lian artikolon de 1887, sekve, oni povas konsideri kiel elirpunkton de la esence negativa sinteno de marksistoj al la demando de neŭtrala internacia lingvo – en tiu senco, ke ĝi ne nur forlasis la ideon pri supernacia, universala lingvo, kiu estis heredaĵo de la utopia, antaŭmarksa socialismo, sed samtempe rekte ekskludis la eblecon, ke lingva unueco kreiĝos per la vojo de artefarita lingvo. Prenante ĝin kiel tian, ni povus akcepti lian kontraŭstaron, ĉar skeptiko kontraŭ novkreita lingvo estis (kaj estas) multe disvastiĝinta ĝis inter rondoj, kiuj por tio ne bezonis bazi sin sur marksismo. Ankaŭ la ignoron de la fakto, ke Esperanto en vortaro kaj gramatiko, malsame kiel la aprioraj projektoj, ĉerpis el ekzistantaj lingvoj kaj deziris esti komunikilo por anoj de ĉiuj tavoloj, ne nur kleruloj, oni povas klarigi per pragmataj duboj pri ĝia vivkapablo kaj praktika sukceso, kio estis same tute kutima ekster la marksismo. Sed problema iĝas la marksisma teorio de mondlingvo, kiam oni konsideras, ke ĝi ne nur malagnoskas lingvan pluralismon, sed eĉ proklamas la forpuŝadon de pli malgrandaj lingvoj kiel neeviteblan rezulton de la ekonomia progreso. Tio estis radikala pozicio, kun kiu la plej multaj esperantistoj havis nenion komunan, ĉar ilia lingvo ja celis servi apud, ne anstataŭ la naciaj lingvoj. Kvankam Kautsky neniam pledis por la perforta asimilado de nacioj, sed imagis, ke la liberigita tutmonda proletaro frate interkonsentos rezigni la naciajn ligojn, lia ortodokse marksisma teorio montris malkomprenon de la aspiroj de pli malgrandaj nacioj. Tia sinteno en la praktiko povis inspiri al politiko de subpremo – al tio, kion la judo Zamenhof karakterizis kiel „englutemecon de nacioj kaj lingvoj fortaj kontraŭ nacioj kaj lingvoj malfortaj".[1] Celante nepre subordigi naciecan celadon al klasbatalo, Kautsky objektive proksimiĝis al lingva imperiismo.

Sed eĉ sendepende de la eksplicitaj vortoj de Kautsky, la marksisma teorio entenis signifan pravigon por la malakcepto de

1. „Pri la homaranismo. Responde al P-ro Dombrovski" (1906), PVZ VII 316.

Esperanto aŭ similaj lingvo-projektoj, malhelpante detalan diskuton pri la vojo al universala lingvo – ĉu pere de kunfandiĝo de nacioj aŭ pere de sennaciigo – surbaze de sia postulo, ke la proletaro ne provu labori por lingva unuiĝado antaŭ la deca tempo. Tia provo ŝajnis des pli suspektinda, se ĝi ligiĝis kun moralaj kategorioj: Ĉi-rilate Esperanto estis speciale eksponita al kritiko, ĉar Zamenhof kaj liaj disĉiploj daŭre parolis pri „popola interfratiĝo" kaj „mondpaco" kaj propagandis la estiĝon de homara mondo tiamaniere, ke apenaŭ restis loko por observi ekonomiajn evoluleĝojn kaj la specifan avangardan rolon de la proletaro. La retoriko de la esperantistoj ja havigis al Esperanto adeptojn ankaŭ inter la laboristoj.[1] Sed por la gvidantoj de la proleta movado, kies atento estis fiksita al la realaĵoj de klasbatalo, tio estis simptomo de tiu „naiva kosmopolitismo", al kiu la socialisma teorio multon ŝuldis, al kiu tamen nun, post la transiro de utopio al scienco, algluiĝis anakronismo.

4.3.4. *Unuaj reagoj al Esperanto kaj la opinio de Gramsci*

Jen kial la disvastigo de Esperanto dekomence renkontis malaprobon de influaj marksistaj gvidantoj. Kiam dum kongreso de la aŭstraj socialdemokratoj en 1897 kelkaj delegitoj pledis, ke en elementaj lernejoj apud la gepatra lingvo estu instruata „mondlingvo", la partia gvidanto Victor Adler kolere kondamnis tiun proponon kiel „volapukumadon".[2] Frua reago al Esperanto estas artikolo aperinta komence de la jarcento en *Právo lidu*, la organo de la socialdemokratoj en Bohemio. La nova lingvo estas rekonata kiel progreso kompare kun Volapük, sed pro la dubinda eblo „la vivajn, organe elkreskintajn lingvojn de la nunaj nacioj anstataŭ[ig]i per iu ajn arbitre konstruita lingvo" Esperanto fine ricevas la karakterizon esti „nura sporto".[3]

Malpli sinretenaj estis la opiniesprimoj flanke de germanaj socialdemokratoj. Kiel jam menciite en ĉapitro 1.6, ili malhelpis

1. Molnár, „Internationalismus", kol. 283.
2. *Protokoll über die Verhandlungen des Parteitags der sozialdemokratischen Partei in Österreich*, Wien 1897, p. 83.
3. *Právo lidu*, 14-9-1900; trad. en *Lingvo Internacia* 5. 1900, p. 126-127. – La gazeto registras ankaŭ la simpation de Tolstoj por la esperantistoj.

en 1907, ke franca iniciato favore al Esperanto estu metita sur la tagordon de la Internacia Socialista Kongreso en Stuttgart, argumentante ke la propono estas „antaŭtempa" kaj nematura.[1] Ĉar baldaŭ poste aperis Ido, la konkurenca projekto, la esperantistoj rezignis pri simila provo dum la Socialista Kongreso en Kopenhago (1910) por ne montri al la delegitoj la kverelon en la propra tendaro. Singardo ŝajnis des pli konsilinda, ĉar en septembro 1910 interveno favore al Ido estis akceptita de la partoprenantoj de la socialdemokrata parti-kongreso en Magdeburg kun ridoj kaj sekvigis „detruan" respondon de August Bebel.[2] En pli frua okazo *Vorwärts* kaj *Leipziger Volkszeitung* jam akre kritikis la propagandon de Esperanto inter laboristoj: Estas terura sensencaĵo postuli de laboristo lerni tian lingvon, ĉar ĝi unue estas por li tro malfacila kaj due ĉiuokaze ĉiam restos utopio.[3] Kvankam – kiel montris la fondiĝo de Germana Laborista Esperanto-Asocio en 1911 – tiaj avertoj ne estis plene efikaj, en la sekvaj jaroj la oficiala pozicio de la partio restis senŝanĝa: Lerni Esperanton estas superflue aŭ ridinde, se ne eĉ „etburĝa malsaĝaĵo". Malmultajn monatojn antaŭ la eksplodo de la Unua Mondmilito *Sächsisches Volksblatt* deklaris responde al demando de leganto, „ke ni ne sentas inklinon esti aparte fervoraj pri Esperanto. La valora tempo, kiun vi dediĉas al ĝi, estas uzebla en multe pli utila maniero por la urĝe necesa studo de la partia kaj sindikata historio".[4]

Se malgraŭ la desupra kontraŭstaro Esperanto atingis popularecon inter laboristoj, ni tion povas konsideri kiel unu esprimon

1. *Internacia Socia Revuo* 1. 1907, n-ro 10/11, p. 15; 3. 1909, p. 63.
2. „Der internationale Sozialisten-Kongreß in Kopenhagen, der Magdeburger Parteitag und das Esperanto", *Der Arbeiter-Esperantist* 1. 1910, n-ro 2 (sept.), p. 12-13. – En Magdeburg por Ido pledis la socialdemokrata redaktoro kaj eksesperantisto Heinrich Peus.
3. *Germana Esperantisto* 5. 1908, p. 20.
4. *Sächsisches Volksblatt* (Zwickau), 12-2-1914; cit. *Germana Esperantisto* 11. 1914, eldono A, p. 59. – Necesas aldoni, ke la Germana Socialdemokrata Partio havis aparte severan pozicion kaj ke antaŭ la Mondmilito estis ankaŭ socialistoj, kiuj esprimis sin favore pri Esperanto. Fine de 1911 la kongreso de la Bohem-Slava Partio rekomendis la varbadon por ĝi (*La Kulturo* 1. 1912, n-ro 1, p. 1). Britaj socialistoj subskribis deklaron de sia simpatio al Esperanto (*Das Esperanto ein Kulturfaktor*. Vol. 3, Stuttgart 1913, p. 68), kaj en Nederlando elstara apoganto estis Domela Nieuwenhuis.

de spontanea tendenco evoluigi kontraŭnaciecan subkulturon, kies portanto estas la proletaro. Eble pro tio la teoriisto Josef Strasser en 1912 distancigis sin de la kutima mokado pri Esperanto.[1] Sed kiam post la militeksplodo en 1914 la laboristoj tuj kuris al la standardoj de siaj naciaj regantoj, tio ĉi neeviteble pelis en fonon la interesiĝon pri internacia lingvo. La riproĉo, ke okupiĝi pri Esperanto estas anticipi la evoluon kaj malatenti la esencaĵojn, iĝis pli kredebla pro la nun observata nacieca rekonsciiĝo de socialistaj partioj. Kiu en tiu ĉi milito ankoraŭ kroĉiĝis al senpripensa supernaciismo, tiu ŝajnis esti kompreninta nenion – almenaŭ laŭ la opinio de tiuj marksismaj teoriistoj, kiuj zorgis iel harmoniigi la internaciecan celadon de la laborista klaso kun la persistado de naciecaj ligoj. Tiu baris, kiel ekzemple opiniis en 1917 la aŭstra marksisto Karl Renner, la strebadon al realisma politiko. Esperanto estis, laŭ Renner, elmontro de revado, kiu paralizas la laboristan klason:

> La naiva kosmopolitismo povis havi la infanan kaj latinlernantecan imagon, ke la problemo de la nacioj kaj de la paco devenas nur de du aferoj, la lingvo kaj la artefaritaj limoj.

Renner koncedis, ke liberkomercismo kaj mondlingvo povus reliefigi antagonismojn de naciaj interesoj kiel tiajn, kiaj ili estas sen „ideologia masko", nome antagonismoj de klasoj. Sed tiel ne eblas fari politikon:

> Certe, tiu senmaskigo nin pli rapide antaŭenigus, ĝi forigus miskomprenojn, sed ne havigus al ni realan progreson. Sen pozitiva tutorganizo de la mondo ne eblas malaperigi la prezentitajn antagonismojn kaj elimini militojn.[2]

Kvankam la teoriistoj estis devigitaj pli forte konsideri la realecon de nacioj, ili ne tute ĉesis pensi pri mondlingvo socialisma. Sed ĝia formiĝo ne ŝajnis imagebla laŭ alia maniero, ol prognozis

1. Josef Strasser, *Der Arbeiter und die Nation*, Reichenberg 1912, p. 29 (nova eldono, Wien 1982, p. 40). – Kvankam Strasser, kies verkon alte taksis Lenin, kontraŭis la perfortan asimiladon de naciaj minoritatoj, li, simile kiel Kautsky, antaŭvidis la estiĝon de unusola lingvo en la socialisma socio. Rilate Esperanton, li nomis prava la bazan ideon de ĝiaj pioniroj, „ke konscia lingvo-evoluigo devas esti ebla", sed riproĉis al la esperantistoj nekomprenon pri tio, ke unue necesas eltrovi la evoluleĝon de la lingvo.
2. Karl Renner, *Marxismus, Krieg und Internationale. Kritische Studien über offene Probleme des wissenschaftlichen und des praktischen Sozialismus in und nach dem Weltkrieg*, Stuttgart 1917, p. 383.

Kautsky. Krome, ĝi estis prokrastita al „tre malproksima" tempo, kiel diris unu el liaj interpretantoj, kiu aldonis, ke Kautsky pensas pri vivanta lingvo, kredeble la angla, kaj kompreneble ne pri „la stultaĵo de artefarita lingvo".[1]

Pri la demando de supernacia lingvo en la nuntempo ni disponas interesan kontribuon, kiun verkis unu el la plej gravaj marksismaj teoriistoj. Ĝi aperis komence de 1918, kaj ĝia aŭtoro estas Antonio Gramsci, la posta kunfondinto de Itala Komunista Partio. Sub la impreso de diskutoj inter socialistoj en Milano pri Esperanto[2] Gramsci provas liveri al siaj kamaradoj marksisme bazitajn konsilojn por ilia priesperanta pozicio. Li enkonduke konfesas, ke temas pri vera problemo, ne pri „sofistumado", kaj singarde esprimas komprenemon por la deziro plibonigi la interhoman komunikadon. Sed tuj poste li emfazas, ke por socialisto tio ne estas unuavica koncerno: Temas pri „zorgo *kosmopolita*, ne internacia, de burĝoj, kiuj vojaĝas por negocoj aŭ plezuro, de nomadoj pli, ol de civitanoj stabile produktantaj. Tiuj volus arbitre estigi *konsekvencojn*, por kiuj ankoraŭ ne ekzistas la necesaj *kondiĉoj*." La radikojn de la strebado al unueca lingvo Gramsci rimarkas en la klerismo de la 17a jarcento; pro la sama spiritostato oni siatempe deziris fondi falansterojn kaj feliĉajn koloniojn.[3]

Pro la malfacilaĵo normigi la lingvon eĉ nur naciskale Gramsci neas la eblecon, ke internacia lingvo, plene artefarita kaj mekanika, ne posedanta historian tradicion, literaturon kaj esprimriĉon, iam povus havi sukceson. Ankaŭ la argumenton, ke Esperanto celas esti nur helpa lingvo kaj ekzemple faciligas la laboron de internaciaj kongresoj, Gramsci malakceptas, ĉar la esperantistoj ĉiam restas, laŭ li, inter si kiel la surdmutuloj kaj aliaj ne sentos sin instigitaj transpreni ties specialan manieron de interkompreniĝado. La konkludo de Gramsci: „Esperanto, la ununura lingvo, estas nenio alia ol ĥimero, la iluzio de kosmopo-

1. Engelbert Pernerstorfer, *Zeitfragen*, Wien 1918, p. 46.
2. Al la gvidaj italaj socialistoj, kiuj pledis por Esperanto, apartenis la parlamentano Oddino Morgari (1865-1944); vd. lian broŝuron *La più internazionale delle internazionali*, S. Vito al Tagliamento 1915 (2a eld. 1921).
3. Falansteroj estas la komunumoj en la socia utopio de Charles Fourier. Per la „feliĉaj kolonioj" evidente Gramsci aludas al Cabet.

lita, homarana, demokrata mentaleco, ankoraŭ ne fekundigita, ankoraŭ ne senvualigita fare de historia kritikismo."

Sekve, Gramsci kontraŭstaras ĉian oficialan apogon de socialistoj al Esperanto. Li admonas siajn kamaradojn batali, „por ke estiĝu la ekonomiaj kaj politikaj kondiĉoj necesaj por la alveno de kolektivismo kaj de la Internacio". Tiam oni – en „libere kaj spontane" disvolviĝanta procezo – venos malrapide „al balancita interproksimiĝo de la arjaj-eŭropaj lingvoj kaj eble al ilia disvastiĝo en la tuta mondo pro la influpovo, kiun la nova civilizo havos al la mondo". Gramsci kategorie deklaras: „Nur laborante por la alveno de la Internacio socialistoj laboros por la ebla alveno de ununura lingvo."[1]

La artikolo de Gramsci konsistigas la tre kredeble plej profundan analizon de Esperanto laŭ marksisma starpunkto. Li koncentras argumentojn, kiuj alie en verkoj de marksistaj teoriistoj troveblas nur dise kaj alude, kaj definitive evidentigas, kial por konvinkitaj marksistoj serioza okupiĝo pri Esperanto ne estas akceptebla: unue, ĉar ĝi originas en utopiaj imagoj de la pasinteco kaj do tiusence estas anakronisma; due, ĉar ĝi celas venki la multlingvecon jam en la nuntempo kaj tiel per – same utopia – salto antaŭas la laŭordan pason de la aferoj. Kiel Kautsky, ankaŭ Gramsci fidas pri nehaltigebla tendenco al lingva unueciĝo dum la procezo de ekonomia koncentrado, en kiu Esperanto ne havas rolon. Li rifuzas atribui al Esperanto eĉ nur dumtempan rolon kiel helpa lingvo kaj rekte pridubas, ke en la subaj tavoloj estas vera bezono de internacia komunikado – kvazaŭ la laboristo aŭ kamparano ne rajtus de sia stablo aŭ terpeco ĵeti rigardon malproksimen: „La plej multaj civitanoj laboras stabile en fiksa loko kaj ne bezonas tro ofte havi leteran korespondadon kun eksterlando."[2] Kaj, tute sekvante la tradicion de siaj antaŭuloj, Gramsci senkaŝe predikas eŭrop-centrismon kaj favoras la forpuŝadon de pli malgrandaj lingvoj.

1. Antonio Gramsci, „La lingua unica e l'esperanto", *Il Grido del Popolo* (Torino), 16-2-1918; represita en *2000 pagine di Gramsci*. Vol. 1: *Nel tempo della lotta (1914-1926)*, Milano 1964, p. 271-275.
2. Montrante similan intelektulan arogantecon, Gramsci asertas ankaŭ, ke lingvo estas „esprimo de beleco, pli ol instrumento de komunikado".

4.3.5. *Lenin kaj la nacia problemo*

Pri la estonteco Gramsci nomis interalie la eblecon, ke ĉiujn ekzistantajn lingvojn superos la lingvo „de la unua lando, kiu konstruos la socialismon". Tiu ĉi rimarko estas notinda pro la fakto, ke la artikolo de Gramsci aperis nur kelkajn monatojn post la Oktobra Revolucio. La fondiĝo de Soveta Ruslando estis evento, kiu inspiris la komunistojn de ĉiuj landoj al la espero, ke la tutmonda revolucio ne plu estas malproksima. Kaj en tia atmosfero povis prosperi ankaŭ atendo, kiun en marto 1919, dum la Unua Kongreso de Komintern en Moskvo, jene formulis la franca delegito Jacques Sadoul:

> Kamaradoj! Mi devas multe pardonpeti, ke mi parolas nek la germanan, la lingvon de internacia socialismo, kiel ĝin hieraŭ nomis kamarado Zinov'ev, nek la rusan, la lingvon, kiu jam morgaŭ estos tiu de internacia komunismo. Mi regas iom flue nur la francan, kiu bedaŭrinde almenaŭ momente devas esti nomata la lingvo de iama revolucio.[1]

Per tio ni venas al pritrakto de la demando, kiel evoluis en Soveta Ruslando la rilato inter la marksisma teorio kaj la Esperanto-movado. Estas evidente, ke tiucele necesas unue konsideri la pozicion de Lenin.

Kiel antaŭe aliaj teoriistoj de socialismo, ankaŭ Lenin imagis kiel finan celon de socialismo la „unuiĝon, alproksimiĝon, intermiksiĝon de la nacioj"[2]:

> La celo de socialismo estas ne nur likvidi la etŝtatismon kaj ĉian sinapartigon de nacioj, ne nur interproksimigi la naciojn, sed ankaŭ kunfandi ilin.[3]

Li eksplicite bonvenigis la „asimiliĝ-procezon de la nacioj" kiel „potencan historian progreson"[4]; ĝi nome konsistigas „unu el la plej grandaj pelfortoj, kiuj transformas la kapitalismon en la socialismon".[5] Kiu kontraŭe – kiel la judaj bundistoj – parolis pri

1. *Der I. Kongreß der Kommunistischen Internationale. Protokoll der Verhandlungen in Moskau vom 2. bis zum 19. März 1919*, Hamburg 1921 (represo Erlangen 1972), p. 62. – Sadoul parolis en la dua tago (3-3-1919). Rilata eldiro de Zinov'ev ne troviĝas en la protokolo.
2. „Tezoj pri la nacia demando" (1913), en: Lenin, *Werke* XIX 241. Ni ĉisekve citas el la germanlingva eldono de la verkaro de Lenin (Berlin 1955-65).
3. „La socialisma revolucio kaj la rajto de la nacioj je memdecido (tezoj)" (1916), *Werke* XXII 148.
4. „Kritikaj rimarkoj pri la nacia demando" (1913), *Werke* XX 14.
5. Samloke, p. 13.

danĝero de asimilismo, tiu por Lenin estis nenio alia, ol „naciista etburĝo".[1] La marksismo ŝajnis al li neakordigebla kun ĉia naciismo:

> La marksismo metas en la lokon de ĉia naciismo la internaciismon, la kunfandiĝon de ĉiuj nacioj al pli alta unuo, kiu antaŭ niaj okuloj kreskas kun ĉiu fervoja kilometro, kun ĉiu internacia trusto, kun ĉiu (internacia laŭ sia ekonomia aktivado, sed ankaŭ laŭ siaj ideoj kaj strebadoj) laborista asocio.[2]

Aliflanke, Lenin konsciis – pli ol la aŭstraj teoriistoj – la eksterordinaran signifon de la nacia problemo por la revolucia strategio de marksismo. Lin koncernis precipe la situacio en la cara regno, kie la epoko de nacia (burĝ-demokrata) revolucio, karakteriza por la landoj de okcidenta Eŭropo, ankoraŭ ne estis finita kaj kie estis praktikataj aparte naŭzaj formoj de nacieca subpremo. Ĉar la naciaj minoritatoj ribelantaj kontraŭ la cara politiko de rusigo krome estis apenaŭ utiligata potencialo, Lenin opiniis neevitebla revizii la marksisman pozicion rilate al la nacia problemo. Unue, li subtenis limigitan kunlaboron kun la liberala burĝaro de Ruslando: Kiom tiu pledas por demokratia solvo de la nacia problemo, ĝi trovu apogon flanke de la partio de la proletaro. Due, li forte esprimis la tezon, ke la laborista klaso batalu por samrajteco de la nacioj, ke ĉia subpremo de naciaj minoritatoj malakordas kun la proleta demokratio kaj ke necesas garantii eĉ la rajton de subpremataj naciecoj je ŝtata secesio. La senkompromisa sinteno de Lenin kulminis en la fama frazo „Nenia privilegio por *ia* nacio, por *ia* lingvo!".[3]

La pozicio de Lenin en la nacia demando trovis interne de la marksista movado konsiderindan reziston. Rosa Luxemburg, en kies revolucia strategio nur la klasa konscio de la laborista klaso havis politikan signifon, kondamnis la „memdecidrajton por ĉiuj nacioj", en 1903 akceptitan en la programon de Rusa Socialdemokrata Partio, kiel „metafizikan frazon".[4] Responde, Lenin

1. Samloke, p. 13.
2. Samloke, p. 19.
3. „La laborista klaso kaj la nacia demando" (1913), *Werke* XIX 75.
4. Rosa Luxemburg, „Nationalitätenfrage und Autonomie" (1908), en: *Internationalismus und Klassenkampf. Die polnischen Schriften*. Red. Jürgen Hentze, Neuwied, Berlin 1971, p. 278. – Rosa Luxemburg aprobe citas la tezon de Kautsky pri „la fina kunigo de la tuta kultura homaro en unu lingvo kaj unu nacieco" (p. 248).

konfesis, ke tiurilate temas pri „*escepto* de nia ĝenerala premiso de centrismo", sed insistis, ke ĝuste tia escepto estas „absolute necesa konsidere al la grandrusa reakciega naciismo" kaj sekve devas esti principo valida almenaŭ en lia partio.[1]

Tamen, Lenin pledis por *internacia* revolucia leviĝo de la proletaro kaj uzis la propagandon de la rajto je memdecido kiel rimedon utilan por tiu celo, kaj en tio li tute sekvis la tradicion de Marx kaj Engels. Troa indulgo kontraŭ naciaj sentoj estis al li fremda. Li akre kritikis la esperojn de la aŭstroj Otto Bauer kaj Karl Renner pri paca, nerevolucia solvo de la nacia problemo. Laŭ li, per ties postulo pri „naci-kultura aŭtonomio", t.e. pri transdono de ekzemple la lernejoj en la manojn de unuopaj naciecoj, malfortiĝas la internacia batalforto de la laborista klaso kaj endanĝeriĝas la internaciisma fincelo de socialismo.[2] Anstataŭ kaptiĝi de iluzioj pri „la ‚nacia' unueco de proletaro kaj burĝaro"[3] la laboristoj kunligiĝu en unuecaj, ne laŭnaciece apartigitaj organizaĵoj.[4] Lenin forte oponis transigon de la principo de memdecido al la partio; kontraŭe, la strukturo de la partio nepre devas esti centrisma. La „kunfandiĝo de la laboristoj de ĉiuj naciecoj de ŝtato en unuecajn proletajn organizaĵojn"[5] servu kiel ia prototipo de la estonta komunisma ideala ŝtato. En tio ĉi evidentiĝas, ke por Lenin same kiel por Marx, eĉ se la unua havis pli da kompreno por naciaj aspiroj, prioritaton havis la kohereco de la socialisma movado kaj ke, post la venko de socialismo interne de la unuopaj naciecoj, tiuj ree devus – libervole – kunfandiĝi.

La 15an de novembro 1917, kelkajn tagojn post la Oktobra Revolucio, la nova soveta registaro gvidata de Lenin publikigis „Deklaron pri la rajtoj de la popoloj de Ruslando", kiu promesis al la nerusaj naciecoj „egalecon kaj suverenecon" kaj la rajton

1. „Letero al S.G. Ŝaumjan" (1913), *Werke* XIX 496. Pri la disputo de Lenin kun Rosa Luxemburg vd. precipe „Pri la rajto de la nacioj je memdecido" (1914), *Werke* XX 395-461.
2. „Tezoj pri la nacia demando", p. 236 k.sekv.; „Demoralizado de la laboristoj per subtila naciismo" (1914), *Werke* XX 289 k.sekv.
3. „Provo de platformo por la Kvara Partia Kongreso de la socialdemokratio de Latvio" (1913), *Werke* XIX 100.
4. „Tezoj pri la nacia demando", p. 239.
5. „Rezolucioj de la somera konsiliĝo de la Centra Komitato de RSDLP kun partiaj funkciuloj 1913", *Werke* XIX 420; kp. „Demoralizado", p. 288-289.

„je libera memdecido inkluzive la secesion kaj formiĝon de sendependa ŝtato".[1] La deklaro estis subskribita de Lenin kaj de lia popolkomisaro pri naciecaj aferoj, Stalin. Jam nelonge poste, en januaro 1918, tiu lasta malkaŝe proklamis, ke la memdecido devas esti rimedo en la batalo por socialismo kaj estu permesata nur laŭ postulo „de la laborulaj amasoj de la koncerna nacio".[2] Tiu ĉi interpreto, kiu ebligis kontraŭi deziron pri memdecido kvazaŭe nur esprimitan de la burĝaro, ja ne eniris la konstitucion de Rusa Socialisma Federativa Soveta Respubliko (de junio 1918); la federacia ideo venkis. Sed praktike la politiko de la partio rilate al la naciaj minoritatoj evoluis en tia maniero, ke Lenin observis ĝin ekde 1919 kun kreskanta malplezuro.

Ekestis forta disputo inter Lenin kaj Stalin, precipe pro la perforta reenpreno de Kartvelio. Kvankam fine de 1922 estis akceptita lia projekto de konstitucio de Unio de Socialismaj Sovetaj Respublikoj – kontraŭ la opozicio de Stalin, kiu volis konsenti al la aneksitaj respublikoj aŭtonomion nur interne de RSFSR, Lenin kredis sian vivoverkon minacata per la burokrat-centrisma starpunkto de Stalin. En tri notoj, publikigitaj nur en 1956, li esprimis sian zorgon, „ke la ‚libereco de eksiĝo el la Unio' ... montriĝos senvalora paperpeco", se la nerusaj naciecoj ne estas sufiĉe protektataj kontraŭ la „rusa aparato". Lenin admonis, ke oni zorge diferencigu „inter la naciismo de subpremanta nacio kaj la naciismo de subpremata nacio", kaj avertis ne subfosi la partian aŭtoritaton „eĉ nur per la plej malgranda bruteco kaj maljusto kontraŭ niaj propraj nerusaj popoloj".[3] Lenin ne lasis dubon pri tio, ke la grandrusan ŝovinismon li konsideras la ĉefa danĝero por la proleta internaciismo. Antaŭ ol li mortis en januaro 1924, li fojfoje ŝajnis malesperi pro la kontraŭdiroj inter teorio kaj praktiko en la nacia demando, tamen ne konsciigante al si, ke jam lia fido pri la integriga efiko de la revolucio implicis limigon de la rajto je secesio, ke li mem nomis la federacion eks-

1. Hans-Joachim Lieber, Karl-Heinz Ruffmann (red.), *Der Sowjetkommunismus. Dokumente* II, Köln, Berlin 1964, p. 87-88.
2. „Referaĵo pri la nacia demando dum la Tria Tutrusa Kongreso de Sovetoj, la 15an de januaro 1918", en: Stalin, *Werke* IV 27. (Ni citas el la germanlingva eldono de la verkaro de Stalin, Berlin 1951-55.)
3. „Pri la demando de la naciecoj aŭ ‚aŭtonomigo'" (30/31-12-1922), *Werke* XXXVI 590-596.

plicite „transira formo al la plena unueco de la laboruloj de diversaj nacioj"[1] kaj ke la sistemo de alcentrigita partia kontrolo, kreita de li, gardas kontraŭ kompreno de la memdecidrajto kiel invito al la naciecoj apartiĝi de la soveta regno kaj tiel do malakcepti la benojn de socialismo.

Malgraŭ ĉio, la egaleca ideologio restis viva ankaŭ post la morto de Lenin. La koncepto de samrajteco de nacioj kaj lingvoj ebligis al la nerusaj respublikoj emfaze akcenti, apogante sin sur Lenin, siajn proprajn politikajn, ekonomiajn kaj kulturajn interesojn. Multaj iam subpremataj minoritatoj fakte travivis kulturan renaskiĝon.

Kiom la partio klopodis pri solvo de la nacia problemo kaj kiajn praktikajn sekvojn havis la egaleca ideologio, sendube sur neniu alia kampo iĝis tiel evidente kiel sur tiu de la lingvo. Lenin ripete atentigis pri la eksterordinara signifo de tiu ĉi aspekto. Li pledis, ke la loĝantaro estu provizita per lernejoj, en kiuj la instruo okazas en la lingvo gepatra[2], kaj en februaro 1920 persone instrukciis al Stalin zorgi pri tio, ke en ĉiuj armeaj ĉefkomandejoj estu interpretistoj: „Tio estas nepre necesa – rilate la lingvon ĉia cedo kaj kiel eble plej granda samrajteco."[3] Tre akre li turnis sin kontraŭ „deviga ŝtata lingvo", do kontraŭ malkaŝe proklamata unuarangeco de la rusa.[4] Tiun ĉi pozicion li des pli decide defendis, ĉar samtempe li estis konvinkita, ke la loĝantoj de Ruslando, se liberigitaj de ĉia premo, mem ekkomprenos, kiajn avantaĝojn alportas al ili la scio de la rusa lingvo: "... la bezonoj de la ekonomiaj interrilatoj per si mem *decidigos* pri tiu lingvo de koncerna lando, kies scio pro la komercaj rilatoj estas *avantaĝa* por la plimulto."[5]

Kiam Lenin lige kun la lingva demando denove substrekis sian perspektivon de „kiel eble plej granda interproksimiĝo de la nacioj"[6], lia rigardo estis fiksita al la situacio interne de

1. „Origina provo de la tezoj pri la nacia kaj kolonia demando" (junio 1920), *Werke* XXXI 135.
2. „Rezolucioj de la somera konsiliĝo", p. 420.
3. „Telegramo al I.V. Stalin", *Werke* XXX 365.
4. „Demoralizado...", p. 289.
5. „Kritikaj rimarkoj pri la nacia demando", p. 5; „Letero al S.G. Ŝaumjan", p. 494-495.
6. „Demoralizado...", p. 289.

Ruslando. Li ne postlasis precizajn eldirojn pri tio, kiel kaj kien evoluos *en tutmonda skalo* la procezo de unueciĝo sur la kampo de lingvoj. La formiĝo de monda lingvo ne estas eksplicite traktita. La laste citita prognozo evidente rilatis nur al Ruslando. Sed ĝi ne ekskludas la interpreton, ke Lenin kalkulis pri simila, ekonomie diktita solvo de la problemo de internacia komunikado.

Fakte, ŝajnas, ke tiupunkte Lenin samopiniis kun Kautsky, kiom ajn li krome kondamnis ties grandŝtatisman pensadon. En skiza resumo de referaĵo pri la nacia problemo troviĝas tabelo, kiun Lenin evidente transprenis de Kautsky, pri la kreskanta signifo de la angla, iom malpli ankaŭ de la franca kaj germana; interkrampe estas aldonita la frazo: „Mondlingvo estos eble la angla, eble + la rusa".[1] Simile esprimiĝis Lenin kvar jarojn poste, kelkajn monatojn post la Oktobra Revolucio, kiam Carl Lindhagen, la urbestro de Stockholm, demandis lin, ĉu la soveta registaro pretus aliĝi internacian konvencion pri la enkonduko de mondlingvo (Lindhagen celis Esperanton) en ĉiujn lernejojn. „Ni jam havas tri mondlingvojn", lakone respondis Lenin, „kaj la rusa iĝos la kvara." Artefaritan lingvon Lenin ĉiuokaze ne prenis en konsideron.[2]

Ke en la teorio de Lenin ne estis loko por internacia lingvo kia Esperanto, eble plej klare montras lia priskribo de la karaktero de internacia kulturo. Okaze de kritiko de judaj socialistoj li substrekis en 1913, ke sub „internacia kulturo de la demokratismo kaj laborista movado tutmonda" li komprenas la kunigon de la demokratiaj kaj socialismaj elementoj de la unuopaj naciaj kul-

1. „Tezoj por referaĵo pri la nacia demando", *Werke. Ergänzungsband. 1896-Oktober 1917*, Berlin 1972, p. 319. – Lenin verkis la tezojn evidente post sia referaĵo en Parizo (23-1-1914). En sia artikolo „Nationalität und Internationalität" de 1908 (vd. supre), kiun Lenin vaste utiligis por siaj tezoj, Kautsky nomis kiel mondlingvojn la germanan, la anglan kaj francan; kiel kvara eble aldoniĝos, laŭ li, la rusa. Estas ankaŭ la ebleco, ke la angla iĝos „la sola universala lingvo" (p. 15). Sekvas nombro-indikoj pri la disvastiĝo de la angla, franca kaj germana, kiuj reaperas poste en la resumo de Lenin.
2. Carl Lindhagen, *I revolutionsland*, Stockholm 1918, p. 79. – Vd. ankaŭ *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 211; Walter Singer, „Carl Lindhagen, Bürgermeister von Stockholm, ein Vorkämpfer des Weltsprachegedankens", *Germana Esperantisto* 24. 1927, p. 105-106.

turoj, ne – kiel oni fuŝkomprenis – „sennacian kulturon, kiu rajtas esti nek rusa nek juda nek pola, sed nur simple kulturo". Interne de ĉiu nacia kulturo la batalo inter la burĝaj kaj proletaj elementoj okazas per la „indiĝena" lingvo. Sekve, malgraŭ la formiĝo de laboristklasa internaciismo la naciaj kulturoj kaj lingvoj pluekzistos.[1] Lenin neniam pensis pri kulturo tute senigita de nacieco, kies esprimilo eventuale estus Esperanto[2], kaj pro tio impresas kurioze, se fojfoje sovetaj esperantistoj klopodas prezenti lin kiel simpatianton de Esperanto.[3] Nedubeble, Drezen en 1934 estis pli bone informita, klare konstatante: „Lenin ne sciis internacian lingvon kaj neniam detale interesiĝis pri la movado por la internacia lingvo."[4].

Al tio konformiĝas ankaŭ eldiro de Lenin, kiun raportis iu E. Didrikil'. En somero 1913 dum prelego en Bern pri la nacia problemo Lenin, laŭ Didrikil', deklaris interalie:

> La revoj pri artefarita kreo de unusola internacia lingvo, de ia „Esperanto" aŭ „Volapük", estas utopio. Ne artefarite estos kreita la lingvo de la estonta socio. La problemo pri la lingvo povos esti solvita en unu el du specoj. Aŭ fariĝos universala por ĉiuj popoloj unu el la lingvoj de la grandaj kulturaj nacioj: la angla, germana, franca kaj eble rusa. Aŭ ĉiuj popoloj ellernos tri-kvar lingvojn kaj posedos ilin.[5]

La atesto de Didrikil' ŝajnas tute kredinda, des pli ĉar ĝi ne estas la sola, kiu aludas similecon inter la ideoj de Kautsky kaj Lenin pri la tutmondiĝo de grandaj naciaj lingvoj. Se temas pri la rilato

1. „Kritikaj rimarkoj..." p. 8; kp. „Provo de platformo...", p. 99-100, kaj „Tezoj pri la nacia demando", p. 237.
2. Kp. Alfred D. Low, *Lenin on the question of nationality*, New York 1958, p. 54.
3. S.N. Podkaminer, „Lenin kaj Esperanto", *Der Esperantist* 5. 1970, n-ro 42 (jun/aŭg), p. 2-8, 17-22; represita en: Detlev Blanke (red.), *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, Budapest 1978, p. 31-49.
4. E. Drezen, „La doktrino de Lenin en la praktika movado por internacia lingvo", *Sur Posteno* 1934, n-ro 150, p. 9 (ruslingva originalo: „Učenie Lenina v praktike dviženija za meždunarodnyj jazyk", *Meždunarodnyj jazyk* 11. 1933, p. 20-25).
5. *Molodaja gvardija* 3. 1924, n-ro 2/3, p. 66; cit. M. Kammari, „K voprosu o budušĉem vsemirnom jazyke" (Pri la demando de la estonta tutmonda lingvo), *Kommunist Estonii* 1964, julio, p. 69; vd. ankaŭ *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 353. – Lenin prezentis en Bern referaĵon pri la nacia problemo la 13an de julio 1913; ĝin kredeble Didrikil' aŭskultis. La bazo de entute kvar referaĵoj, prezentitaj de Lenin en julio 1913 sinsekve en Zürich, Ĝenevo, Lausanne kaj Bern, estis „Tezoj pri la nacia demando" de junio 1913.

de Lenin al Esperanto, lia fratino Maria Ul'janova karakterizis ĝin en 1928 kiel nete negativan:

> Vladimir Il'iĉ plurfoje parolis pri Esperanto kaj tre malfavore, konsiderante ĝin tro artefarita, simpligita, malviva. Ni plurfoje parolis pri lingvo, li estis granda scianto de lingvoj kaj volonte mergiĝis en vortarojn. Li nur esprimis la opinion, estis nelonge antaŭ lia malsano, ke devus esti enkondukita ĝenerala alfabeto, kio kompreneble ankaŭ okazos post la revolucio. Estas konsilinde, ke la kamaradoj argumentante favore al Esperanto prefere ne apogu sin sur Lenin, kies vidpunkto tiurilate estas al ili tute nekonata.[1]

La aktuala okazo por tiu ĉi admono estis la popularеco de Esperanto en la internacia laborista korespondado, al kiu Maria Ul'janova kontraŭmetis la pli grandan utilon de la uzo de naciaj lingvoj. Sed jam dum ankoraŭ vivis Lenin, la sovetaj esperantistoj ne faris al si iluziojn pri lia sinteno.[2] Ofte la varbado por Esperanto en partiaj rondoj eĉ nur pro tio ne trovis reeĥon, ĉar la verkoj de Lenin ne entenis opiniesprimon pri la temo.[3] Kaj pli malbone: Se gvidaj bolŝevikoj diris sian opinion pri Esperanto, la juĝo estis kondamna. Ekzemple, Nikolaj Buĥarin, la brila teoriisto, skribis en 1920:

> ... el la marksisma vidpunkto ekzistas 99,9% ŝancoj por ĝia realigo [de komuna lingvo] per komplete alia [ne artefarita] vojo. Provoj serioze starigi la demandon pri internacia lingvo estus plene analogaj al la provoj unuecigi rasajn trajtojn pere de formala devigo por membroj de Komunista Partio de la blanka kaj flava rasoj edzinigi negrinojn kaj papuaninojn.[4]

Alia, ne malpli eminenta partigvidanto, Grigorij Zinov'ev, en parolado antaŭ partiaj funkciuloj en Petrogrado (1923) ripročis al la adeptoj de Esperanto facilaniman aliron al la problemoj de lingvo kaj nacio:

---

1. M.I. Ul'janova, „Protiv iskusstvennogo meĵdunarodnogo jazyka", *Raboče-krest'janskij korrespondent* 1928, n-ro 21 (15 nov.); kp. *Sennaciulo* 5. 1928/29, p. 134. – Vd. supre, p. 251.
2. Tiel la pritakso de Lucien Laurat, kiu vivis en Moskvo de 1923 ĝis 1927. Li krome memoras: „Li [Lenin] certe ne estis absolute malamika – laŭ čio, kion mi scias, li simple malatentis Esperanton kiel utopiaĵon (‚neglektenda kvanteco') – ĉar en tia kazo neniam Béla Kun estus kuraĝinta intertrakti kun ni esperantistoj (kaj kun la idistoj) pri eventuala rekono fare de Komintern." (Persona komuniko de 10-12-1969.)
3. Bao Pu, „La movado de Esperanto en Rusujo", *La Verda Lumo* 3. 1923/24, p. 6. – La aŭtoro, čino, studis en Moskvo en 1922/23.
4. Letero al la esperantisto Oĥitovič, iama partiano; cit. Ė. Drezen, „Dialektika razvitija jazyka i protivniki esperanto" (Dialektiko de lingvoevoluo kaj kontraŭuloj de Esperanto), *Meĵdunarodnyj jazyk* 9. 1931, p. 249.

> Necesas kompreni, ke la nacia problemo estas ege pli granda problemo, de pli granda skalo, ol la problemo pri armeaj komitatoj, ĝi estas problemo esenca, problemo de homa komunvivado. Ekzemple vi ne neniigos la diferencon de lingvoj. Ekzistas tiaj stranguloj, kiuj diras, ke sufiĉas verki libreton je esperanto, en kiu unu vorto estas angla, kaj krome fuŝita, alia franca, tria rusa ktp. – kaj estas lingvo, kiun parolos la tuta mondo. Certe tiel povas paroli nur stranguloj. La samo rilatas al la nacia problemo. Ne estas eble la nacian problemon neniigi, ĝi ekzistos ankaŭ post konkero de la povo de la Proletaro dum jaroj kaj jardekoj, ĝi estas esenca problemo de la homa kunvivado.[1]

Ĉirkaŭ la sama tempo ankaŭ Nadeĵda Krupskaja, la edzino de Lenin, turnis sin eksplicite kontraŭ Esperanto. Ŝia elpaŝo estis malpli ideologie kolorita, sed konsistigis klaran malaprobon de ĉiaj „kulturrevoluciaj" eksperimentoj pri Esperanto ĝuste pro sia pragmata firmigo de la prioritatoj validaj en Soveta Ruslando:

> Estas sensence elspezi tempon por la lernado de Esperanto en lernejo. Oni devas ellerni la lingvojn de la progresemaj nacioj, kiuj tutmonde estas plej multe disvastigitaj, tiujn lingvojn, en kiuj estas verkita la plej multa scienca kaj socialisma literaturo. Tiaj lingvoj estas la angla, germana kaj parte franca.[2]

4.3.6. *Stalin, Marr kaj la praktika agado de SEU*

La soveta Esperanto-movado, se temis pri la teoria bazo de ĝia laboro, troviĝis do en kiel penseble plej malfavora elirpozicio. Drezen, la gvidanto de SEU, dekomence konsciis pri tio. Jam en 1922 li verkis broŝuron, kiun li nomis „provo de materiisma surbazigo de la problemo" de internacia lingvo.[3] Pro tiu ĉi provo Drezen rikoltis primokon de la anarkiisto Futerfas, kiu lin atentigis, ke li „havas kontraŭ si ĉiujn aŭtoritatojn de Marksismo".[4] Fakte, en tia situacio ŝajnis pli prudente (kion celis ankaŭ Drezen) rezoni pure pragmate kaj elstarigi la argumenton, ke Esper-

1. Raporto ĉe 18a Petrograda gubernia partia konferenco; laŭ *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-ro 2 (nov. 1923), p. 2. – Zinov'ev tiutempe estis ankaŭ la prezidanto de Komintern.
2. En artikolo pri fremdlingva instruado, en 1923; cit. Bernhard Schiff, *Entwicklung und Reform des Fremdsprachenunterrichts in der Sowjetunion*, Berlin 1966, p. 17. – Pri la sinteno de Krupskaja vd. ankaŭ *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 253. 296-297.
3. Ė. Drezen, *Problema meĵdunarodnogo jazyka. Opyt materialističeskogo obosnovanija voprosa*, Moskva 1922; parta traduko: „Pri la problemo de lingvo internacia", *Sennacieca Revuo* 5. 1923/24, n-roj 4 (45) ĝis 7/8 (48/49).
4. *La Nova Epoko* 1922, kol. 70-71. – Pri la ĉirkaŭaj eventoj vd. supre, p. 210.

anto estas same nemalhavebla helpilo kiel la telefono aŭ aviadilo kaj sekve tute ne bezonas eksplicite marksisman pravigon.[1]

Post kiam Drezen sukcesis elimini la adeptojn de neŭtralismo kaj la anarkiistojn (inter tiuj ankaŭ la kritikinton de sia broŝuro), la disvastiĝo de Esperanto, kiel konate, mirinde progresis en Soveta Unio. La lingvo servis kiel ŝatata rimedo por plifaciligi la kontaktojn kun la ekstera mondo, kaj inverse la esperantistoj profitigis sian „naivan kosmopolitismon" pli kaj pli al kreskigo de la prestiĝo de Soveta Unio inter siaj eksterlandaj samlingvanoj. La suspektemo de oficialuloj malkreskis tiugrade, kiel Esperanto montriĝis taŭga rimedo por plenigi per vivo la desupre akcelatan ideon de internacia laborista korespondado. Dum kelkaj jaroj SEU povis ankaŭ profiti de tio, ke la Partio permesis certan agliberecon en kulturaj aferoj kaj ne opiniis necesa aŭ oportuna ekzameni la diversajn formojn de arta kaj literatura aktivado daŭre pri tio, ĉu ili harmonias kun la doktrino.

Tio tute validas ankoraŭ por la unuaj jaroj de la regado de Stalin; fakte la prospero de SEU nur komenciĝis post la morto de Lenin. Ankaŭ la prioritat-ŝanĝo en la soveta politiko – de la espero pri revolucio en aliaj landoj al konstruo de socialismo enlanda – unue ne malfaciligis la laboron de la Esperantomovado. Male: Eĉ sur la tikla kampo de teorio okazis renverso de prioritato, kiu ŝajnis pli avantaĝa por la esperantistoj. Ĝin kaŭzis teoria elpaŝo de Stalin.

En sia traktaĵo „Marksismo kaj la nacia demando" de 1913 Stalin priskribis la estontecon de nacio kaj lingvo tute laŭ la senco de Marx (kaj Lenin), aprobe citante el la *Komunista Manifesto* frazojn kiel „la naciecaj apartiĝoj kaj antagonismoj de la popoloj pli kaj pli malaperas" kaj „la regado de la proletaro eĉ pli malaperigos ilin".[2] Sed la proksimeco de tiu ĉi vizio al la realo jam obskuriĝis en la unuaj jaroj post la Oktobra Revolucio, kiam la bolŝevikoj proklamis sian naciec-politikan programon kaj komencis sisteme akceli la kulturojn kaj lingvojn de la minoritatoj subpremitaj sub la cara reĝimo. Kvankam Stalin interpretis la

1. A. Jodko, „Esperanto de l' marksisma vidpunkto", *La Nova Epoko* 1922, kol. 161.
2. „Marksismo kaj la nacia demando", en: Stalin, *Werke* II 300.

rajton je nacia memdecido malsame kiel Lenin, la procezo de disfloro de la naciaj kulturoj daŭris ankaŭ dum lia regado.

La sekvo estis, ke Stalin vidis sin devigita esprimi starpunkton pri la demando, kiamaniere tiu procezo kontribuas al la komunisma fincelo de unueca ĝenerale homa kulturo. Li tion faris en majo 1925: Ambaŭ ne estas reciproke ekskluzivaj, ĉar „la nacia kulturo de la popoloj ne nuligas, sed kompletigas kaj riĉigas la ĝenerale homan proletan kulturon". Kontraŭdiron inter la programo de nacieca disvolvo kaj la komunisma fincelo li neis, starigante la faman formulon: „Proleta laŭ sia enhavo, nacia laŭ sia formo – tio ĉi estas la ĝenerale homa kulturo, kiun alproksimiĝas la socialismo."

Stalin, kiu samjare proklamis sian teorion de „konstruado de socialismo en unu lando", do pravigis la politikon de nacieca disvolvo kaj samtempe klopodis nebuligi sian teorian direktoŝanĝon per la aserto, ke la Partio gardanta pri la „proleta enhavo" sufiĉe garantias la vojon al kvazaŭe universala, fakte tamen nur tutsoveta komunaĵo. Pri la komunisma fincelo kiel priskribita de antaŭaj teoriistoj Stalin parolis malentuziasme:

> Oni parolas pri tio (kiel ekzemple Kautsky), ke en la periodo de socialismo estos kreita ĝenerale homa universala lingvo kaj ke ĉiuj aliaj lingvoj formortos. Mi malmulte kredas je tiu ĉi teorio de ĝenerala lingvo. La sperto ĉiuokaze ne favoras, sed kontraŭas tiun ĉi teorion. Ĝis nun estis tiel, ke la socialisma revolucio ne malmultigis la nombron de lingvoj, sed plimultigis ĝin, ĉar, ekskuante la plej profundajn malsuprojn de la homaro kaj levante ilin al la politika areno, ĝi vekas al nova vivo tutan aron da novaj, pli frue tute ne aŭ malmulte konataj naciecoj.[1]

Stalin unuafoje per tio aŭtoritate traktis temon, kiu kompreneble rekte tuŝis la sovetajn esperantistojn. Li forĵetis la ideon de universala lingvo, sed faris tion en kunteksto, kiu ne estis tiel malkuraĝiga por la esperantistoj, kiel eble ŝajnis unuarigarde. Nome, Stalin sin distancigis de Kautsky, kiu estis pensinta pri la universaliĝo de unu aŭ pluraj grandaj naciaj lingvoj, kaj li nomis la formiĝon de tutmonda lingvo samspeca kun la malapero de ĉiuj aliaj lingvoj, kion ĝuste ne celis la adeptoj de mondhelplingvo. Tial por la sovetaj esperantistoj ne estis malfacile aklami al Stalin pro lia malaprobo de ĉia asimilada forpuŝo de lingvoj kaj

1. „Pri la politikaj taskoj de la Universitato de Orientaj Popoloj", *Werke* VII 119-121.

laŭdi lin kiel antipodon de la proletkultura teoriisto Bogdanov, kies sinteno pri la evoluo de lingvoj estis same „grandpotenc-ŝovinisma" kiel tiu de Kautsky.[1]

Aliflanke, kvankam la deklaro de Stalin instigis la esperantistojn emfazi sian starpunkton, ke neniu nacia lingvo iĝu mondlingvo, kaj memorigi pri la rezisto de Lenin kontraŭ privilegiigo de iu lingvo, ne estis pretervideble, ke en ĝi tute mankis internacia perspektivo de la estonta evoluo de lingvoj kaj ke do tio, pri kio speciale zorgis la esperantistoj, estis komplete malkonsiderata. Tiu manko estas des pli atentinda pro la fakto, ke ĉirkaŭ la sama tempo la demando de mondlingvo estis metita, kun pozitiva tendenco, en la diskuton de alia flanko – de soveta lingvisto, kies nomo pli kaj pli ofte estis menciata en la sekvantaj jaroj: Nikolaj Marr.

En fakulaj rondoj Marr estis konata ekde 1908 pro sia t.n. jafetida lingvoteorio. Filo de skota patro kaj kartvela patrino, li asertis, ke la kaŭkazaj lingvoj kune kun la sumera kaj vaska lingvoj konsistigas la jafetidan lingvofamilion kaj ke la hindeŭropaj lingvoj estiĝis rezulte de transformo de tiuj jafetidaj lingvoj. Pli ĝenerale, Marr parolis pri unueca, laŭŝtupa lingvoevolua procezo, iranta de amaso da primitivaj dialektoj al ĉiam pli grandaj lingvo-unuoj; la diversajn ekzistantajn lingvojn li komprenis kiel diversajn ŝtupojn de unueca evoluo. Aparte fama iĝis la tezo de Marr, ke la vortoj de ĉiuj lingvoj originas en la kvar sonaj elementoj *sal, ber, jon* kaj *roŝ*. Krome, elirante de la konstato, ke la lingvo estas socia fenomeno, Marr konsideris ĝin parto de la superstrukturo, dependa de la ekonomia bazo en la socio. Li simple neis, ke ekzistas naciaj lingvoj, kaj insistis, ke la lingvo dekomence estas klasa.

Marr ne trovis grandan entuziasmon por sia teorio inter la lingvistoj. Parte pro ties kontraŭstaro aŭ ignoro li pli kaj pli prezentis sin avangarda batalanto kontraŭ la „burĝa hindeŭropa lingvokomparo". Dum komence lia teorio apenaŭ havis elementojn konsidereblajn kiel marksismajn, ekde ĉ. 1926 Marr nutris la interpreton, ke, ĉar liaj ideoj celas revoluciigi la lingvistikon, ili almenaŭ konformiĝas al la marksismo. Kaj ĉar la pensado pri

1. A. Tom (= Efim Spiridoviĉ), „Antipody – I. Stalin i A. Bogdanov", *Meĵdunarodnyj jazyk* 1926, n-ro 14 (40), p. 7-8.

laŭŝtupa evoluo de lingvoj kaj pri ilia dependeco de la ekonomio inkluzivis la kredon, ke sociaj revolucioj transformas ankaŭ la lingvojn, ne estas surprize, ke li traktis ankaŭ la demandon, kio estas la fina celo de lingva evoluo – pli precize, kia estas la lingva rezulto de la tutmonda establiĝo de socialismo. Tiurilate Marr estis konvinkita, ke la evoluprocezo kulminos en unulingveco.[1] Li deklaris:

> La estonta unueca, universe esprimpova, lingvo – estas senevita postulo de la estonta senklasa kaj sennacieca unueca komunhoma socio.

Marr do proklamis perspektivon, kiu ĉe Stalin ne aperis kiel reala ebleco; samtempe li disvolvis ideojn pri la karaktero de la procezo de unueciĝo, kiuj ne harmoniis ĝuste kun la samaj tezoj, kiujn Stalin kondamnis por bazi sur tio sian diferencan, principe malaproban sintenon pri universala lingvo. Marr, nome, tute ne pensas pri iu el la ekzistantaj lingvoj:

> Apartaj lingvoj, kiom ajn ili estu imperialisme disvastigitaj, neniam fariĝos tiu estonta unueca lingvo. Falis ĉiuj antaŭe estintaj mondlingvoj, falos ankaŭ ĉiuj nun florantaj aŭ proksimiĝantaj al plena disfloro, grandaj kaj malgrandaj, laŭ la nombro da parolantaj en ili homamasoj, lingvoj, sendepende ĉu ili estas kreaĵoj de superaj soci-tavoloj, ĉu pli potencaj produktaĵoj de la amasoj mem.

La amasoj, laŭ Marr, mem havas la eblon kaj kapablon rapidigi la procezon de lingva unueciĝo per intervenoj en la ekzistantajn lingvojn aŭ eĉ sendepende krei la „perfektan universalan lingvon de la homaro". Tiu ĉi starpunkto – la jesado de artefarita intervenado en lingvon – ŝajnis tre proksima al tiu de la esperantistoj. Tamen, Marr aldonis, ke unue la scienco devas esti en pozicio gvidi la amasojn kaj direkti ilian strebadon al lingva unueco en la ĝustajn vojojn. Esperanton li konsideris maksimume indico pri tio, ke la tendenco al mondlingvo funde jam kuŝas en la amasoj:

> La vivo certe ne atendas kaj aperas diversaj surogatoj, simile al Esperanto, Ido, ktp.[2]

---

1. Pri la teorio de Marr vd. L.L. Thomas, *The linguistic theories of N. Ja. Marr*, Berkeley, Los Angeles 1957; J.-B. Marcellesi, *Langage et classes sociales. Le marrisme*, Paris 1977 (*Langages*, n-ro 46); Gisela Bruche-Schulz, *Russische Sprachwissenschaft. Wissenschaft im historisch-politischen Prozeß des vorsowjetischen und sowjetischen Rußland*, Tübingen 1984.
2. Citaĵoj laŭ Voldetero, „Pri kelkaj scienculaj deklaroj", *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 10 (62), p. 6 (interalie el N. Ja. Marr, *Osnovnye dostiženija jafetičeskoj teorii*, Rostov n/D 1925). – Vd. ankaŭ G. Dem (Demidjuk), „Akademik N. Ja. Marr", *Mežđunarodnyj jazyk* 1925, n-ro 1 (27), p. 9-10.

La tezoj de Marr pri estonta universala lingvo, disvastigitaj ankaŭ per la populara gazetaro, ekzemple la revuo *Ogonëk*, multe pli forte ekscitis la atenton de la sovetaj esperantistoj, ol la ĉiuokaze ne publike diskutebla elpaŝo de Stalin. Ilia kerna argumento reage al Marr estis: „Ni ... ne pretendas ... ‚sciencecon' en nia lingvo, ni zorgas kaj celas nur, ke nia lingvo servu al niaj bezonoj, ke nian lingvon uzu la amasoj, ĉar ĝuste dum la amasa uzado efektiviĝos la kreo-procedo de l' estonta mondlingvo, ĉar ĝuste per tiu vojo de la amasa lingvo-uzado ni akcelas la senevitan historian procedon."[1]

Tia sinteno estis karakteriza por la esperantistoj esence jam de la tempo de Zamenhof. Reage al tiuj sciencistoj, kiuj opiniis Esperanton reformenda aŭ entute kontestis ĝian vivkapablon, oni emfazis la unuavican neceson sukcese elprovi la lingvon en la praktiko; ju pli da adeptoj akiros Esperanto, des pli rapide estos malpravigitaj la teoriaj postuloj de la lingvistoj. Tio estis saĝa taktiko, kaj ĝin sekvis ankaŭ SEU, kiam ĝi, vidante la malfacilaĵon teorie pravigi Esperanton sur marksisma bazo, donis prioritaton al fortikigo de la propra organizaĵo kaj demonstris la praktikan valoron de la lingvo.

Tiel longe, kiel Esperanto estis plejparte ignorata de lingvosciencistoj[2] kaj kiel la Partio ne esprimis ideologian malfidon, tiu taktiko ŝajnis promesi sukcesojn. Skeptikuloj kiel Lunaĉarskij, la popola komisaro pri klerigo, konfesis en 1926, ke „la faktoj parolas por Esperanto".[3] Sed kiam pro la tezoj de Marr la problemo de estonta mondlingvo eniris la publikan diskuton, SEU pli-malpli frue devis demandi sin, ĉu ĝi ne ŝuldas al sia intertempe atentinda organiza forto respondajn atingojn ankaŭ sur teoria kampo.

1. Voldetero, „Pri kelkaj scienculaj deklaroj", p. 6.
2. Tiel estis jam en antaŭrevolucia Ruslando, kun la tamen grava escepto de Jan Baudouin de Courtenay.
3. En sia salutmesaĝo al la Sesa SAT-Kongreso en Leningrado: *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 46 (98/99), p. 4. – En 1912 Lunaĉarskij estis kritikinta „konsekvencajn kosmopolitojn, kiuj pensas, ke la estonteco alportos plenan unuigon de la homa raso, unusolan komunan lingvon kaj unusolan komunan kulturon": cit. Ivan Dzyuba, *Internationalism or russification? A study in the Soviet nationalities problem*, London 1968, p. 47.

4.3.7. *Por la konstruo de marksisma lingvistiko*

Fakte, de 1926 notinde kreskis la teoria interesiĝo. Tiujare en la ŝtata eldonejo aperis, sub redakto de Drezen, artikol-kolekto pri Esperanto.[1] De oktobro 1926 SEU publikigis plian revuon, kies kontribuaĵoj temis ĉefe pri teoriaj demandoj de internacia lingvo.[2] Jam ĝia unua numero respegulis konsiderindan memfidon de la asocio: Riproĉojn kontraŭ la „oficiala lingvoscienco", kiu malatentas la fenomenon de disvastiĝo de internacia lingvo, sekvis la alvoko por kreo de „nova lingvoscienco libera je ajna fetiĉismo". Kaj en tiu tasko precipe kunlaboru la proletaj esperantistoj, por ke Esperanto ricevu teorian apogon per la nova, marksisma lingvoscienco.[3]

La aŭtoro de la menciita enkonduka artikolo, la belorusa ĵurnalisto kaj universitata docento Efim Spiridoviĉ, poste publikigis serion da artikoloj pri la teorio de lingva evoluo. En tiuj, li diferencigis inter kvar epokoj: Post la epoko de popolaj dialektoj evoluis la naciaj literaturaj lingvoj, sekvas la epoko de mondhelplingvo, kaj je la fino de tiu ĉi evoluo estos la universala lingvo de la homaro en la epoko de komunismo. De epoko al epoko, laŭ Spiridoviĉ, montriĝas la lingva progreso: de disigiteco al unueco, de nekonscia (natura) al konscia (arta) lingvokreo, de komplikeco al simpleco en la strukturo kaj de malriĉo al riĉo en la lingva esprimpovo.[4]

Rilate la estontan lingvo-evoluon, kiu lin plej multe interesas, Spiridoviĉ malakceptas la eblecon, ke la lingvoj sub la influo de la ekonomia evoluo „nature" atingos sian unuecon. Ja okazas kreskanta internaciiĝo de ekonomio, kulturo kaj penso; ankaŭ multiĝas la nombro de internaciaj terminoj, komunaj al la naciaj

1. *Na putjaĥ k meĵdunarodnomu jazyku* (Sur la vojoj al internacia lingvo), Moskva 1926.
2. La revuo, aperanta foje monate, foje dumonate, nomiĝis unue *Izvestija C.K. SÉSS* resp. *SÉSR* (*Informilo de C.K. SEU*), de januaro 1929 *Meĵdunarodnyj jazyk* (*Internacia Lingvo*). La kontribuaĵoj aperis preskaŭ ekskluzive en la rusa.
3. E. Spiridoviĉ, „Za novoe jazykoznanie" (Por la nova lingvoscienco), *Izvestija C.K. SÉSS* 5. 1926/27, p. 1-5.
4. E. Spiridoviĉ, „La skemo de lingva evoluo" [3], *Sennacieca Revuo* 4 (8). 1926/27, p. 105-106; originalo: „Shema razvitija jazyka", *Izvestija C.K. SÉSR* 5. 1926/27, p. 241-242.

lingvoj. Sed restas granda kontraŭdiro: Pro sia „arkaika strukturo" la naciaj lingvoj ne kapablas plene respeguli la internacian karakteron de la moderna pensado. Por solvi tiun kontraŭdiron necesas lingva revolucio, nome „la konscia enmiksiĝo de la racio".[1]

Aktuale, la kontraŭdiro estas plej evidenta en Soveta Unio, kie akorde kun la deklaroj de Lenin la lingvoj de iam subpremataj popoloj evoluas al literaturaj lingvoj, dum aliflanke estas kreskanta bezono pri unueca lingvo. Ne aludante la eblecon de alternativo, ekzemple per la rusa, Spiridoviĉ asertas, ke tiun kontraŭdiron venkas la „helpa lingvo internacia". Ĝi estas la lingvo de la „transira epoko", dum kiu la nacioj interproksimiĝas, kaj samtempe preparas la vojon al la epoko de komunismo, de la „kunfluiĝo de nacioj", kiam ekzistos la – plene artefarita – universala lingvo.[2]

Pri la soveta Esperanto-movado Spiridoviĉ emfazas, ke ĝi jam tiagrade fortiĝis, ke oni ne plu rajtas kontentiĝi per nura propagando kaj la praktika apliko de Esperanto, sed ke nun necesas transiri ankaŭ al teoria ofensivo.[3] Tiurilate li kulpigas la lingvistojn pri tio, ke ili ĝis nun neglektis esplori la epokojn de lingva evoluo. Ili ne rimarkis, ke en la Esperanto-movado komenciĝas nova epoko de la lingvoscienco, kies ĉefa karakterizaĵo estas, „ke *la masoj mem prenas sur sin* la aferon pri la konstruado kaj plua progresigo de sia ĉefa ilo – lingvo".[4] Eĉ reformuloj en la lingvistiko kiel Marr rifuzas agnoski tiun ĉi fenomenon. Tial, konkludas Spiridoviĉ, necesas plene rekonstrui la lingvosciencon kaj atingi, ke la nova, marksisma lingvoscienco firme enkadrigu la teorion de internacia helpa lingvo.

La diskuto iniciatita de Marr pri la origino kaj estonteco de la lingvo do konsciigis la sovetan Esperanto-movadon pri ĝia postrestado sur la kampo de teorio kaj inspiris Spiridoviĉ disvolvi sian

1. E. Spiridoviĉ, „La skemo de lingva evoluo" [2], *Sennacieca Revuo* 4 (8). 1926/27, p. 76-79; originalo: „Processy internacionalizacii jazyka", *Izvestija C.K. SĖSR* 5. 1926/27, p. 161-165.
2. E. Spiridoviĉ, „La skemo..." [3], p.107-109; *Izvestija*, p. 244-245.
3. E. Spiridoviĉ, „La skemo..." [3], p. 109; *Izvestija*, p. 246.
4. E. Spiridoviĉ, „Esperanto kaj lingvoscienco", *Sennacieca Revuo* 4 (8). 1926/27, p. 153; originalo: „Ėsperantskoe dviĵenie i jazykoznanie", *Izvestija C.K. SĖSR* 5. 1926/27, p. 308.

kuraĝan skemon de lingva evoluo. Sed lin ankoraŭ superis kiel teoriisto la gvidanto de SEU mem, Drezen. Komence de 1928 en la Ŝtata Eldonejo de Moskvo aperis ampleksa libro, en kiu Drezen priskribis la historion de la provoj krei mondlingvon – prezentitaj estis 217 projektoj aperintaj antaŭ Zamenhof kaj 245 poste estiĝintaj – kaj nomis Esperanton la krono de la multjarcenta serĉado por internacia lingvo.[1] Kio estis aparte notinda: Por tiu ĉi verko Marr skribis enkondukon. En ĝi li plendas, ke la demando de artefarita universala lingvo estas priridata ĝuste en sciencaj rondoj aŭ en plej bona okazo elvokas „nemerititan indiferenton". Laŭ Marr, la libro de Drezen konfirmas la korektecon de la jafetida tezo pri „artefarita origino de la sona lingvo ĝenerale" kaj krome kontribuas „al la kolekto de materialoj por adekvata trakto de la problemo de universala lingvo".[2]

Tio ŝajnis indiko, ke Marr modifis sian pli fruan skeptikon pri Esperanto. En la sama jaro li publikigis detalan enkondukon en la jafetidan teorion, kiu enhavis eldirojn pri la estonta mondlingvo, tute akcepteblajn por esperantistoj. Marr parolas pri „demando, eĉ ne minuton prokrastota, de la nova internacia socia konstruado"; oni devas liberigi sin „de la limigitaj, kvazaŭ naturaj rimedoj, kiujn ni disponas". Estas necese

> ne paroli pri multnombraj internaciaj, vivaj kaj mortaj, tradiciaj, ĉiam ligitaj al klasa kulturo, kaj ĉiam neeviteble imperiismaj lingvoj, sed pri unu artefarita tuthomara lingvo – kaj ne paroli pri ĝi utopie kaj amatormetiiste laŭ la gusto kaj kun la subteno de la eŭropa imperiismo, sed en vere tutmonda skalo konsiderante la lingvokutimojn kaj interesojn ne nur de la malvastaj supraj tavoloj, sed de la laborulaj amasoj de ĉiuj lingvoj kaj landoj...

La jafetida teorio povas kompreni la estontan lingvon de la homaro nur kiel artefaritan lingvon. Laborante por ĝi, „neniu nacia lingvo, neniu triba lingvo povas esti malkonsiderata, kiom ajn forlasita ĝi ŝajnas esti, ĉar en ili, eĉ la izolaj kaj plene soleciĝintaj, konserviĝis por ni ege valoraj, pro la socia agordo de la pasinteco perditaj postrestaĵoj de la atingoj de tutaj epokoj de ĝenerale homa kreado en monda skalo".

---

1. E. Drezen, *Za vseobŝčim jazykom. Tri veka iskanij*, Moskva, Leningrad 1928. – Reviziita Esperanta traduko: *Historio de la mondolingvo. Tri jarcentoj da serĉado*, Leipzig 1931 (represo Oosaka 1967).
2. N. Marr, „K voprosu ob edinom jazyke" (Al la demando de unueca lingvo), en: Drezen, *Za vseobŝčim jazykom*, p. 9.

Marr neniam precizigis kiel praktike efektivigi tiun grandegan lingvan konstrulaboron, sed li nun almenaŭ konfesas, ke eblas profiti el ĝisnunaj spertoj sur la kampo de lingvokreo:

> Tio [la neceso koni la jafetidan teorion] certe ne signifas, ke ni forgesas la fruajn provojn pri kreo de artefaritaj internaciaj lingvoj, la ekziston de artefarita internacia lingvo, kiel la vaste sukcesa Esperanto kaj la lingvo Ido, kvankam tiu nur lastatempe vekis grandan interesiĝon de la esplorantoj. Tio ne signifas, ke ni forturnas nin de ili kiel *quantité négligeable*, kiel fenomenoj ne meritantaj atenton.[1]

La anonco de Marr, ke li revenos al ĉi-lasta temo, lia pledo por artefariteco de la estonta mondlingvo kaj lia rifuzo akcepti la eblecon, ke iu nuna, nacia lingvo ludos la rolon de universala lingvo en la estonta senklasa socio, donis al parto de la sovetaj esperantistoj sufiĉe da kialoj por rigardi Marr preskaŭ aliancano, por citi lin kiel ĉefatestanton pri la historia praveco de siaj propraj celadoj. Esperantlingva broŝuro, eldonita de SAT, eĉ klopodis popularigi la ideojn de Marr inter la esperantistoj en eksterlando.[2]

Tamen, ne estis tiel, ke la soveta Esperanto-movado havis unuecan pozicion rilate al Marr. Ankaŭ ne regis unuanimeco pri la sinteno al la lingvoscienco ĝenerale. Spiridoviĉ mem, pro sia bloka atako kontraŭ la lingvoscienco, devis aŭskulti kritikon el la propraj vicoj. La juna lingvisto Evgenij Bokarev[3] instruis lin en la revuo de SEU, ke la lingvoscienco neniel entute rilatas malamike al internacia lingvo; tio validas nur por kelkaj skoloj kaj

1. N. Ja. Marr, *Jafetičeskaja teorija. Obŝčij kurs učenija o jazyka* (La jafetida teorio. Ĝenerala kurso de instruo pri la lingvo), Baku 1928. – Germana traduko en: Tasso Borbé, *Kritik der marxistischen Sprachtheorie N. Ja. Marr's*, Kronberg/Ts. 1974, p. 87-88, 91-92.
2. A.P. Andreev, *Revolucio en la lingvoscienco. Jafetida lingvoteorio de akademiano N. Marr*, Leipzig 1929; ruslingva eldono: *Revoljucija jazykoznanija. Jafetičeskaja teorija akademika N. Ja. Marra*, Moskva 1929. – Tiu ĉi supraĵe verkita, multrilate erariga broŝuro havis konsiderindan influon; vd. precipe: Ivo Lapenna, *Retoriko*. 3a eld., Rotterdam 1971, p. 44-49.
3. Evgenij Alekseeviĉ Bokarev (1904-71), specialisto pri kaŭkazaj lingvoj, post la milito ludis gravan rolon en la revivigo de la soveta movado (vd. sube, precipe ĉap. 4.5.4.). En lia nekrologo estis notite: „Li firme trapasis malfacilajn jarojn de esperanta movado, neniam perfidante siajn konvinkojn." (*Paco* 18. 1971, n-ro 2, soveta eldono, p. 9.) Vd. ankaŭ M.I. Isaev, „E.A. Bokarev i interlingvistika", en: *Problemy interlingvistiki*, Moskva 1976, p. 5-11.

direktoj, ekzemple la romantikistoj, la reprezentantoj de la natura-historia direkto kaj la jungramatikistoj. Sed ju pli terenon gajnas la koncepto, ke la lingvo estas socia interkomunikilo, kaj tiamaniere detruiĝas pli frue regantaj metafizikaj opinioj pri la lingvo, des pli da intereso trovos ankaŭ la ideo de internacia lingvo. Ĝuste la plej grandaj reprezentantoj de la sociologia skolo fondita de Ferdinand de Saussure[1] jesis la bezonon kaj eblon de artefarita lingvo. Konstatante laŭgradan alproksimiĝon de la lingvoscienco al la Esperanto-movado, Bokarev decide kontestis la tezon de Spiridoviĉ, ke Esperanto akiros rajtan rekonon nur per kompleta reorganizo de la lingvoscienco.[2]

En sia respondo Spiridoviĉ insistis, ke la esperantistoj neniel esperu pri subteno flanke de la burĝa, kaduka lingvoscienco, kaj polemike demandis Bokarev, ĉu li, evidente apartenante al la sociologia direkto, volas „nei la neceson konstrui la lingvoscience sur la bazo de marksismo".[3] Fakte, Bokarev ne estis esprimînta starpunkton pri la demando de marksisma lingvistiko. Tion li faris preskaŭ unu jaron poste, publikigante novan artikolon, „Lingvoscienco kaj marksismo", kiun karakterizis la klopodo peri inter la kontraŭaj pozicioj.

Bokarev deklaris, ke la marksismo estas la sola metodologia kaj filozofia bazo por la lingvoscienco. Sed ankoraŭ tute ne okazas konstruo de marksisma lingvistiko. La klasikuloj de marksismo, Engels, Pleĥanov, Kautsky, Lafargue kaj Buĥarin, postlasis nur ĝeneralajn eldirojn pri la lingvo. „Pro tio la lingvistikaj verkoj, pretendantaj la nomon marksisma, facile deglitas al vulgarigo kaj deformado de la marksisma metodo." Ankaŭ la jafetida teorio de Marr,. kiun la publiko ofte identigas kun marksisma lingvoscienco ĝenerale, nur kontribuas al la okazonta konstruo; multaj pensoj de Marr ne estas originalaj, lia teorio

1. Bokarev nomas tie ĉi i.a. Max Müller, Hugo Schuchardt, Antoine Meillet, Jan Baudouin de Courtenay, Otto Jespersen, Edward Sapir kaj Marr.
2. E. Bokarev, „Meĵdunarodnyj jazyk i nauka o jazyke" (Internacia lingvo kaj scienco pri la lingvo), *Izvestija C.K. SĖSR* 6. 1928, p. 129-135. – Krome, Bokarev admonas la esperantistojn plibonigi sian laboron sur ĝenerale lingvistika kampo.
3. E. Spiridoviĉ, „‚A vsë-taki vertitsja!' Po povodu stat'i tov. Bokareva" („Kaj tamen ĝi moviĝas!" Okaze de artikolo de k-do Bokarev), *Izvestija C.K. SĖSR* 6. 1928, p. 136-139.

enhavas gravajn metodologiajn erarojn, kaj krome lin ĉefe interesas unu aspekto, nome la paleontologio de parolo. Por marksistaj lingvistoj estas pli grave utiligi la atingojn de la sociologia skolo, kiujn Spiridoviĉ vane provas ignori. Bokarev esprimas sian fidon, ke la marksisma lingvistiko dediĉos apartan atenton al la Esperanto-movado, „kiu devos iĝi serioza momento en la nuntempa lingvopolitiko". Per tio siavice la esperantistoj estos instigitaj aktive partopreni en la konstruo de marksisma lingvoscienco, ĉar, kiel opiniis ankaŭ Bokarev: „Nur ĝi kapablas doni al la internacia lingvo stabilan teorian bazon."[1]

Drezen ne rekte enmiksiĝis en la disputon inter Bokarev kaj Spiridoviĉ. Sed li zorgis, ke la membroj de SEU ricevu orientiĝhelpon pri la esencaj teoriaj fundamentoj de sia laboro. Fine de julio 1928 la Kvara SEU-Kongreso akceptis tezojn verkitajn de Drezen pri la „vojoj de formiĝo kaj disvastiĝo de la lingvo internacia".[2] En tiuj estis deklarite, ke la Esperanto-movado ŝuldas sian forton sole al si mem kaj ke ne estas celkonforme „planti" Esperanton desupre. La esperantistoj plue direktu sian esperon „precipe sur la iniciaton de malsupre, sur la kreemon de la reprezentantoj el la vastaj homaramasoj". Samtempe – postulis la tezoj – necesas, ke „la kreema marksisma penso" faru konkludojn el la sukcesa praktiko de la Esperanto-movado kaj ne plu „preterpasu la problemon pri la lingvo internacia per silento".[3]

4.3.8. *Kultura revolucio kaj la dialektiko de Stalin*

Fine de la 1920aj jaroj la tempo ne ŝajnis malfavora por ligi la estontecon de Esperanto kun la konstruo de marksisma lingvistiko, ĉar tiutempe la tuta kultura vivo de Soveta Unio travivis periodon de profunda transformiĝo. Dum la Unua Kvinjarplano (1928-1933), kiu gigantpaŝe antaŭenpuŝis la industriigon, la lando spertis novan kulturan revolucion. Ties ĉefa celo estis kon-

1. Evgenij Bokarev, „Jazykoznanie i marksizm", *Mejdunarodnyj jazyk* 7. 1929, p. 203-206.
2. E. Drezen, *La vojoj de formiĝo kaj disvastiĝo de la lingvo internacia*, Leipzig 1929; ruslingva originalo: „Puti oformlenija i rasprostranenija mejdunarodnogo jazyka", *Izvestija C.K. SÈSR* 6. 1928, p. 1-11.
3. Drezen, *La vojoj*, p. 39-40.

duki akriĝintan klasbatalon ankaŭ en la kultura vivo kaj tiamaniere estigi kondiĉojn, por ke la edukado, literaturo, arto kaj scienco povu esti plene metitaj en la servon de socialisma konstruado. La Partio pli forte uzis la kulturon kiel politikan kaj ekonomian potencfaktoron, ĉesigante per tio plurjaran periodon de relativa trankvilo en la sfero de kulturo.[1]

Tamen, la kultura revolucio dankis sian elanon ne nur al la gvido de la Partio: Ĝi samtempe inkluzivis elementojn de spontanea ribelado kontraŭ ĉiuj restaĵoj de la pasinteco kaj kontraŭ supozeblaj misevoluoj post la Oktobra Revolucio. La membroj de Komsomolo, ekzemple, vidis en sia „kultura kampanjo", komencita per la batalo kontraŭ analfabetismo, ankaŭ ŝancon por kontentigi proprajn avanc-dezirojn, farante celtabulo de sia agitado prefere alte salajratajn specialistojn kaj privilegiitajn oficistojn. La kontraŭaŭtoritata karaktero de la kultura revolucio estis aparte reliefa en la kampo de sciencoj, kie junkomunistoj furiozis kontraŭ la nerompita, laŭ ili, monopolo de pli aĝaj sciencistoj ankoraŭ kroĉiĝantaj al burĝaj tradicioj. Per la postulo al „proleta hegemonio" estis ĉesigita la armistico ĝis tiam ekzistanta inter komunistaj kaj nekomunistaj sciencistoj. Ankaŭ sur la kampo de literaturo la „toleremon pri ideologiaj transir-formoj", proklamitan de la Partio en 1925, anstataŭis la kalumniado de dekstraj kunvojaĝantoj. La beletro estis de nun komprenata kiel rimedo por politike reeduki la amasojn – celado, kiun radikalaj „proletaj verkistoj" jam propagandis antaŭ la komenciĝo de la vera kultura revolucio.

Aldone al tio, dum la kultura revolucio havis renesancon pli malnovaj vizioj pri la estonta komunisma socio. La jura teoriisto E.B. Paŝukanis jam de 1924 argumentadis, ke en socialismo tute malaperos la malnova, burĝa juro kaj estos anstataŭigita per sociaj principoj. Analoge, la „maldekstraj pedagogoj" ĉirkaŭ V.N. Ŝul'gin propagandis estontan formorton de la lernejo, kien la ĉiam pli proksima interligiĝo de lernado kaj produktiva laboro en fabriko kaj kolĥozo preparas la vojon. Multaj el tiuj utopiaj ideoj, al kiuj apartenis ankaŭ projektoj de „socialisma urbo",

1. Vd. Sheila Fitzpatrick, „The ‚soft' line on culture and its enemies: Soviet cultural policy, 1922-1927", *Slavic Review* 33. 1974, p. 267-287.

trovis de post 1928 oficialan favoron kaj subtenon flanke de la Partio, kio tamen ne malofte estis pli sekvo, ol kaŭzo de ilia altirforto je la amasoj mobilizitaj al la konstruado de socialismo. Ne nur premo, ankaŭ vera entuziasmo pelis la homojn al plenumo de la fiksitaj celoj. La grandegaj sociaj ŝanĝoj tra kolektivigo kaj industriigo refreŝigis la malnovan esperon, ke la formorto de la ŝtato, kiel prognozis Marx kaj Engels, baldaŭ fariĝos realeco. En tiu senco la heroa, suferdona lukto en la jaroj de la Unua Plano akcelis la kredon pri pli bona estonteco en komunismo, kaj kiu ajn opiniis sin kapabla kontribui al konkretigo de la utopio, tiu sentis sin speciale stimulita en la aŭrora atmosfero de la kultura revolucio.[1] Per tia sento kaptiĝis ankaŭ la sovetaj esperantistoj: Al ili ŝajnis esti destinita la tasko pentri tiun aspekton de la estonteco, kiu koncernis la problemon de lingva interkompreniĝo.[2]

Neatendite baldaŭ estis okazo, kiu nutris inter la sovetaj esperantistoj la opinion, ke iliaj ĝis tiam modestaj teoriaj ekzercadoj ne nur plene konformas kun la postuloj de la tempo, sed eĉ jam promesas porti fruktojn: En la mezon de la vigla diskutado pri konstruo de marksisma lingvistiko trafis refoja deklaro de Stalin pri la problemoj de nacio kaj lingvo en socialismo.

En raporto al la 16a Kongreso de KPSU, meze de la jaro 1930, Stalin lanĉis atakon kontraŭ tiuj „deflankiĝuloj", kiuj apogante sin sur Lenin opinias, ke „venis la tempo ĉesigi la politikon, kiu konsideras la naciajn apartaĵojn de la popoloj de USSR, kaj transiri al la politiko de asimilado en la intereso de ... internaciismo". Por pravigi sian malaprobon de tia politiko Stalin asertis, ke „Lenin neniam diris, ke la naciaj diferencoj devas malaperi kaj la naciaj lingvoj devas kunfandiĝi en unu komunan lin-

1. Vd. la interesan artikol-kolekton: Sheila Fitzpatrick (red.), *Cultural Revolution in Russia, 1928-1931*, Bloomington, London 1978.
2. Laŭ eldonaĵo de SEU, tiu problemo estos solvita dum la kultura revolucio „definitive kaj revolucie" – „ne per ia decido de aŭtoritata instanco, sed surbaze de la kreema elano de la laborulaj amasoj mem": P. Kirjušin, *Meĵdunarodnaja rabočaja svjaz' na esperanto*, Moskva 1930, p. 31. – Ĉar inter la pioniroj de la kultura revolucio estis, krom la proletaj verkistoj, komsomolanoj (precipe en provinco) kaj la Unio de Militantaj Ateistoj, estas notinde, ke de ĉ. 1929 proksimiĝis la rilatoj inter SEU kaj tiuj grupoj. La oficiala organo de la ateistoj publikigis ampleksajn resumojn en Esperanto, *Militanta Ateismo* (1931) kaj *Antireligiulo* (1932). Aperis ankaŭ pluraj kontraŭreligiaj broŝuroj en Esperanta traduko.

gvon en la limoj de *unu* ŝtato, *antaŭ la venko* de socialismo *en tutmonda skalo*". Kiu tion forgesas, diris Stalin, tiu estas kulpa pri grandrusa naciismo, „kaŝata per la masko de internaciismo kaj per la nomo de Lenin". Stalin lerte atentigis pri la dialektiko de la historiaj procezoj. Por la nuntempo, t.e. la periodo de socialisma konstruado en Soveta Unio, estas karakteriza la „florado de naciaj kulturoj", dum nur en la estonteco okazos ilia kunfandiĝo „en unu komunan socialisman (laŭforme kaj laŭenhave) kulturon, kun unu komuna lingvo". Validas, laŭ Stalin, la jena formulo:

> Florado de naciaj kulturoj (kaj lingvoj) en la periodo de proleta diktaturo en *unu* lando, kun la celo prepari la kondiĉojn por ilia formortado kaj kunfandiĝo en unu komunan socialisman kulturon (kaj en unu komunan lingvon) en la periodo de tutmonda venko de la socialismo.[1]

Sed Stalin estis trotaksinta la konvinkoforton de sia dialektiko. Dum la kongreso delegitoj demandis lin, kiel lia nuna deklaro akordiĝas kun la parolado de 1925, en kiu li kondamnis la teorion de universala lingvo.[2] Klopodante plipreciziĝi sian pozicion, Stalin neis, ke io estas malklara; li insistis, ke tute ne estas kontraŭdiro inter la du eldiroj: La „naci-ŝovinisman" teorion de Kautsky, laŭ kiu „ĉiuj nacioj, ni diru en USSR", kunfandiĝos „en unu komunan *grandrusan* nacion kun unu komuna *grandrusa* lingvo", li kondamnis kaj ankoraŭ kondamnas. Nome, la demando de formorto de naciaj lingvoj kaj ilia kunfandiĝo ne estas demando interne-ŝtata, sed internacia; dum la konstruado de socialismo en unu lando la naciaj lingvoj neniel formortas, sed plene disvolviĝas kaj ekfloras. Stalin diris, ke rilate tiun punkton li daŭre akceptas la koncepton de Lenin, same kiel rilate la „pli malproksiman perspektivon",

> ke en la periodo de la *mondskala* venko de socialismo ... la naciaj lingvoj neeviteble devos kunfandiĝi en unu komunan lingvon, kiu kompreneble estos nek la grandrusa nek la germana, sed io nova.[3]

1. „Politika raporto de la Centra Komitato al la 16a Partia Kongreso" (27-6-1930), *Werke* XII 317-318, 322-323; kp. J. Stalin, *Kulturo nacia kaj internacia*, Leipzig 1930, p. 16-17, 22-23.
2. Laŭ artikolo de Stalin de marto 1929, li jam pli frue devis respondi kritikantojn, kiuj atentigis pri kontraŭdiroj inter lia parolado de 1925 kaj la koncepto de Lenin. Sed tiu artikolo estis publikigita nur en 1949: „La nacia demando kaj la leninismo", *Werke* XI 298-317.
3. „Konkluda parolado pri la politika raporto de la CK al la 16a Partia Kongreso" (2-7-1930), *Werke* XIII 3-4, 6; kp. Stalin, *Kulturo nacia kaj internacia*, p. 26-27, 29-30.

Eĉ se Stalin tion neis, oni ne povas pretervidi, ke lia opinio tra la jaroj ŝanĝiĝis. En 1925 li emfazis ekskluzive la floradon de nacioj kaj lingvoj akcelatan per la socialisma revolucio kaj malakceptis la eblecon de estonta komuna lingvo. Lia posta provo apogi sin tiurilate sur Lenin havis malfortan bazon, ĉar la tezo de Lenin, kiun Stalin citis en la kongreso de 1930, ke „naciaj kaj ŝtataj *diferencoj* inter la popoloj kaj landoj ... estos ekzistantaj ankoraŭ *tre, tre longe eĉ post* la efektivigo de proleta diktatoreco en la skalo *tutmonda*"[1], estis proklamita en 1920 – jam sub premo de la postrevoluciaj realaĵoj. Antaŭe Lenin – kaj same ankaŭ Stalin en 1913 – ĉiam deklaris, ke la socialismo rapidigos la procezon de asimilado ekirintan jam sub kapitalismo. Krome, la dialektiko de Stalin ne povas trompi pri tio, ke en 1925 li tute ne diferencigis inter la cirkonstancoj *antaŭ* kaj *post* la tutmonda venko de socialismo – ke do lia parolado en 1930 estis provo vuali per retroira interpreto sian pli fruan, por marksisto preskaŭ herezan oponadon kontraŭ la estonta kunfandiĝo de nacioj kaj lingvoj.[2]

Nun, en 1930, Stalin opiniis necesa ja konfirmi sian kontraŭstaron al politiko de rapida asimilado, sed kombini ĝin kun revivigo de la internacia perspektivo. Tio ĉi el la vidpunkto de la sovetaj esperantistoj signifis progreson: Donante sian apogon al la ideo de universala lingvo, Stalin samtempe klare senigis tiun ideon de trajtoj, kiuj de la tempo de Kautsky kompromitis ĝin en la okuloj de esperantistoj kaj batalantoj por la rajtoj de pli malgrandaj nacioj. Nome, li ne prezentis la evoluon al universala lingvo kiel procezon de tutmondiĝo de nacia lingvo, sed unuafoje prognozis la tuthomaran lingvon kiel „ion novan", kiel lingvon de nova tipo. Kvankam ties karaktero ne estis detaligita, estis evidente, ke Stalin adoptis starpunkton, kiu almenaŭ tre similis al tiu de Marr.

4.3.9. *Skrypnyk kontraŭ esperantigo*

Nemirige do, ke la sovetaj esperantistoj estis ekscititaj per la

1. „Politika raporto...", p. 318; *Kulturo nacia kaj internacia*, p. 17.
2. Pri tio kp. Elliot R. Goodman, „World state and world language", en: Joshua A. Fishman (red.), *Readings in the sociology of language*, The Hague, Paris 1970, p. 720 (temas pri ĉapitro antaŭe aperinta en la verko de Goodman, *The Soviet design for a world state*, New York 1960).

parolado de Stalin.[1] Sed antaŭ ol ni traktos ilian reagon je la nova elpaŝo, ni devas konsciigi al ni, en kia situacio SEU troviĝis meze de la jaro 1930. Unue, kiel ni jam scias, ĝiaj rilatoj kun SAT ĝuste tiam estis ekstreme streĉitaj kaj moviĝis en la direkto al definitiva rompo. Due, la esperantistojn trafis en la propra lando neatendite forta atako flanke de alta partia funkciulo. Tiun ĉi same jam menciitan intervenon necesas iom pli detale atenti.

Tuj antaŭ la komenciĝo de la Partia Kongreso estis publikigita parolado de la ukraina popolkomisaro pri klerigo, Mykola Skrypnyk.[2] Li kritikis en ĝi la esperantistojn „pri la celado krei apartan sennacian popolon kun aparta sennacia kulturo kaj ideologio, substituante per ĉio ĉi la celadon de apartaj nacioj konstrui siajn proprajn naciajn kulturojn".[3] Skrypnyk, malnova bolŝeviko, estis konsiderata ne nur kiel subtenanto de kultura aŭtonomio de Ukrainio, sed nerekte kvazaŭ advokato de ĉiuj nerusaj komunistoj, kiuj timis troan superpezon de la rusoj en Soveta Unio. Li ĉiam apogis sin sur la linio de Lenin, ke la klasbatalo estas internacia fenomeno kaj ke naciecaj sentoj kaj antagonismoj malhelpas la antaŭenmarŝon de la proleta revolucio. Pro tio li konsekvence kontraŭstaris la rusan ŝovinismon, precipe en Ukrainio, kiel ankaŭ la ukrainan naciismon, se tiu minacis malfortigi la solidarecon de la sovetaj respublikoj.[4] Li aparte malfidis la politikon de Stalin rilate la nacian problemon; jam en 1923 li riproĉis, ke Stalin per la samrangigo de du naciismoj, t.e. „de la reganta grandpotenca naciismo kaj de la naciismo de la iam subprematai naciecoj", neglektas la unuavice gravan batalon kontraŭ la „grandrusa ŝovinismo" kaj emas realigi la „deziron de niaj sovetaj aparatoj pri la ‚unueca, nedisigebla'".[5]

---

1. Al tio eble kontribuis ankaŭ la onidiro, ke Stalin iam lernis Esperanton. La aserton (pli malfrue disvastigitan de Trockij) faris rusa elmigrinto komence de 1928. Ĝi ne estas tre kredinda.
2. Vd. supre. p. 269.
3. E. Drezen, „Antaŭparolo", en: Stalin, *Kulturo nacia kaj internacia*, p. 5.
4. Kp. James E. Mace, *Communism and the dilemmas of national liberation. National communism in Soviet Ukraine, 1918-1933*, Cambridge, Mass. 1983.
5. *Dokumenty ukraïns'koho komunizmu*, New York 1962; tradukita eltiraĵo en: Hans-Joachim Lieber, Karl-Heinz Ruffmann (red.), *Der Sowjetkommunismus. Dokumente* II, Köln, Berlin 1964, p. 115-116.

Kiam fine de 1920 la „Unio por Liberigo de Ukrainio" estis malkovrita kaj kulpigita pri ŝtatperfido[1], tio kreskigis la zorgon de Skrypnyk, ke ankaŭ lia programo de ukrainigo, kvankam ĝi restis ĉiam kadre de lojaleco al la tutsoveta socialisma patrolando, povus esti denuncata kiel incito al naciisma opozicio. En tiu lumo ni devas rigardi liajn atakojn kontraŭ difinitaj aspektoj en la propagando de la esperantistoj, kiuj, laŭ Skrypnyk, celas enkonduki en lernejojn anstataŭ la ukraina Esperanton kaj ĝenerale propagandas sian lingvon kiel liberigon de naciaj lingvoj, kiel anstataŭigon de la naciaj lingvoj per unu sola, internacia lingvo. Precipe la sennaciismajn teoriojn de la esperantistoj Skrypnyk kondamnis kiel etburĝan deflankigon de la vera komunisma nacieca politiko.

Aliflanke, Skrypnyk, kies sekretario estis esperantisto, tute ne vokis al principa kontraŭbatalo de Esperanto. Li agnoskis, ke la lingvo havas sian signifon kiel rimedo de internacia komunikado, atentigis pri tio, ke per Esperanto eksterlanden penetris informoj pri la kultura progreso de Ukrainio[2], kaj eĉ promesis subtenon al la Esperanto-movado, se ĝi restos „volontula". Fakte, konsiderante la konfliktojn, kiuj tiutempe karakterizis la naciecan politikon, pli specife la rilatojn inter la rusa nacio kaj la minoritataj naciecoj, oni devas entute dubi pri tio, ĉu vere estis danĝeroj flanke de la esperantistoj en malvasta senco, kiuj instigis Skrypnyk al la averto kontraŭ „sennaciismo". Pli verŝajne estas, ke lia atako kontraŭ „la celado transsalti senpere al unueca lingvo" estis kaŝa bataldeklaro al la grandrusa ŝovinismo, kiu ŝajnis pli ol iam antaŭe minaci la ukrainan identecon. Kiom aktuala li konsideris tiun temon, montras la fakto, ke la parolado de Skrypnyk estis publikigita nur kelkajn tagojn antaŭ la malfermo de la 16a Partia Kongreso.

Dum tiu kongreso Stalin deklaris, ke la grandrusa ŝovinismo estas la pli danĝera formo de naciisma deflankiĝo. Ĉiuj, kiuj opiniis la tempon matura bremsi la procezon de florado de nacioj kaj

1. La „konspiro" de la Unio (Spilka Vyzvollenja Ukraïny) estis falsaĵo de la sekreta polico.
2. Jam de 1926 regule aperis esperantlingva resum-folio, *La Vojo de Klerigo*, pri la ĉefaj kontribuaĵoj de la monata revuo *Ŝljaĥ osvity* (ruse *Put' prosveŝčenija*), eldonata de la ukraina popolkomisarejo pri klerigo.

transiri al „internaciismo", estis kulpigitaj pro malobservo de la instruoj de Lenin. Ĉi-okaze memorigante ankaŭ pri la lenina refuto de „sennacia kulturo", Stalin tiamaniere klopodis kvietigi la nerusajn partianojn, kiuj pro centralizaj kaj asimilaj tendencoj sentis maltrankvilon. Kaj efektive ankaŭ la timoj de Skrypnyk dumtempe ŝajnis esti forpelitaj.

Ke estis ia ligo inter la averto de Skrypnyk kontraŭ „esperantigo" kaj la opono de Stalin al tro frua internaciismo, baldaŭ evidentigis ankaŭ la sovetaj esperantistoj. Ankoraŭ samjare aperis broŝuro, kiu entenis esperantigitajn eltiraĵojn el la kongresaj paroladoj de Stalin pri la nacieca problemo.[1] En antaŭparolo por tiu ĉi broŝuro Drezen tuj enkonduke citas Skrypnyk kaj tiras el ties riproĉoj kaj el la parolado de Stalin la instruon por la sovetaj esperantistoj, ke ne eblas kontraŭmeti Esperanton al la naciaj lingvoj kaj trakti ĝin kiel lingvon „jam nun povantan formigi iun apartan sennacian kulturon". SEU, kiu lige kun sia konflikto kun SAT estis kritikinta la specifan interpreton de sennaciismo fare de Lanti, nun deklaris batalon al tiu koncepto entute. Pri Esperanto, Drezen klarigis, ke ĝi ne pretendas ion plian, ol esti helpa rimedo de internaciaj rilatoj, „taŭga nur por la nuna tempo".[2]

Malgraŭ la ŝoko, kiun la elpaŝo de Skrypnyk kaŭzis inter la esperantistoj, ilia reago tamen ne havis nur defensivan karakteron, ĉar Stalin ja ĉirkaŭ la sama tempo estis submetinta fantaziinstigan prognozon pri la estonteco de lingvoj kaj nacioj. Post la tezoj de Marr, kiuj jam stimulis al propraj klopodoj sur teoria kampo, ili per la tute simile sonantaj deklaroj de Stalin sentis sin alvokitaj kontribui ankoraŭ pli intense al klarigo de la demando, kiel disvolviĝas la procezo al universala lingvo. Tiurilate Drezen konstatis, ke la laboro de la revoluciaj esperantistoj „akcelas akumuladon de teknika sperto por estonta kunfandiĝo de ekzistantaj lingvoj en unu komunan lingvon".

Kvazaŭ kontraŭdirante sian neon de pli vastaj pretendoj de

1. J. Stalin, *Kulturo nacia kaj internacia*. Trad. G. Demidjuk, Leipzig 1930.
2. Drezen, „Antaŭparolo", p. 5, 7. – Tio ĉi klare kontraŭis opiniojn, kiuj estis popularaj inter sovetaj esperantistoj de tiu tempo. Ekzemple, unu el ili emfazis en februaro 1930, ke Esperanto „iĝos sola mondlingvo" kaj ke ĝi „estas ne helpa, sed natura lingvo, t.e. lingvo de venanta socialismo": M. Krjukov, „Kulturtaskoj", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 226.

Esperanto, li asertis, ke pluevoluigita Esperanto sendube havos influon je la estonta universala lingvo kaj ke ĉiuokaze preparlaboroj por tiu estonta lingvo devas esti farataj jam en la periodo antaŭ la tutmonda starigo de socialisma sociordo.[1]

Aparte decidaj tezoj pri la estontec-direktitaj taskoj de Esperanto estis prezentitaj de Spiridoviĉ. Je la tempo, kiam Stalin kaj Skrypnyk faris siajn deklarojn, la teoria organo de SEU ĵus aperigis el lia plumo artikol-serion pri la teorio de internacia lingvo[2], kiu libroforme aperis en la sekvanta jaro.[3] Spiridoviĉ nun rekte nomis kriterio de vere marksisma lingvistiko, ĉu tiu kontentiĝas per ŝanĝo de la lingvosciencaj metodoj aŭ konscias pri tio, „ke same, kiel la burĝaro iam devis krei lingvon de nova epoko – la nacian literaturan lingvon –, hodiaŭ, ĉe la sojlo de proleta monda revolucio, la proletaro frontas la taskon krei la lingvon de sia epoko".[4] Dum la ĉefa celo de la burĝa lingvistiko estis agi por „la asimilado de ‚popoloj kaj triboj'"[5], la proletaro komencis evoluigi la lingvojn de subpremitaj popoloj al naciaj literaturaj lingvoj kaj nun bezonas la lingvistikon „precipe kiel sciencon pri la kreo de internacia lingvo".[6]

Pri Marr, Spiridoviĉ skribas, ke li, kontraŭbatalante la grandpotencan pensadon de la hindeŭropa lingvoscienco, eniris novan vojon, sed ke li ne plupaŝis konsekvence. Eĉ tute ekster la „nebuleco de la koncepto de klasa lingvo en la jafetida teorio", Marr pro sia prefero al buŝaj lingvoj, servontaj kiel materialo por liaj paleontologiaj studoj, malatentas la historie ne plu retroigeblan evoluŝtupon de la naciaj literaturaj lingvoj.[7] Plej multe pezas, laŭ

1. Drezen, „Antaŭparolo", p. 8, 10. – SEU parolis en 1931 pri la neceso, ke ĝia Lingva Komisiono aperu „kiel publika faktoro" en la diskuto komencita sekve de la prognozo de Stalin, menciante ankaŭ, ke ĝi celas la establon de esperantologiaj katedroj en specialaj superaj lernejoj: „Nova etapo en agado de Lingva Komisiono", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 81.
2. E. Spiridoviĉ, „Oĉerki teorii vspomogatel'nogo meĵdunarodnogo jazyka" (Skizoj pri teorio de helpa lingvo internacia), *Meĵdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 22-30, 95-107, 189-205, 274-306.
3. E.F. Spiridoviĉ, *Jazykoznanie i meĵdunarodnyj jazyk* (Lingvoscienco kaj lingvo internacia), Moskva 1931.
4. Samloke, p. 4.
5. Samloke, p. 9.
6. Samloke, p. 13.
7. Samloke, p. 40-41.

Spiridoviĉ, ke Marr imagas la evoluon al tutmonda lingvo kiel „grandegan salton"; la vojo tien restas tute malklara, por ne paroli pri tio, „ke por la akademiano Marr eĉ ne ekzistas la problemo de transira lingvo, de internacia helplingvo".[1] Se li aldone al ĉio kritikas la „individuan" kreadon de artefarita lingvo kaj komplete ignoras, ke Esperanto dankas sian sukceson ĝuste al kolektiva kreado[2], oni povas konkludi nur jene: „Kvankam la jafetida teorio donis grandan kontribuon al la marksisma lingvoscienco, ĝi ne povas esti *bazo* de tiu scienco."[3]

Spiridoviĉ fakte opinias la marksisman prilaboron de la lingvoscienco esence jam finita kaj per tio celas la lingvan revolucion inaŭguritan per Esperanto.[4] La „genia lingvisto" Zamenhof[5] intuicie komprenis la bezonojn de la epoko kaj starigis la teoriajn fundamentojn de la proleta movado por internacia lingvo. La principo de simpleco „por la nekleruloj" ebligis la aliron de la „plej vastaj amasoj" al Esperanto, kaj rezignante pri siaj aŭtoraj rajtoj Zamenhof kreis la kondiĉojn por „viva kolektiva kreado de la amasoj".[6] Intertempe Esperanto jam iĝis „portanto de nova kulturo, la kulturo de la proletaro".[7] En la epoko de transiro al komunismo la lingvo ĉiam pli perfektiĝos, dum paralele al tio kaj per „interefikado" pluevoluos la kreo de naciaj literaturaj lingvoj de la postrestintaj popoloj.[8] Spridoviĉ aldonas, ke en la arta kreado de tiuj lingvoj oni ne rajtas malatenti la „baldaŭan unuecigon" de ĉiuj lingvoj; estas signo de naciisma miopeco, se la kreantoj de naciaj literaturaj lingvoj rifuzas allasi internaciajn, eĉ teknikajn vortojn. Akorde kun la tezo de Stalin, ke la florado de nacioj kreas la kondiĉojn por ilia formortado, Spiridoviĉ argumentas, ke „la vasta evoluo de la naciaj lingvoj en tiu ĉi epoko estas nur dialektika premiso por la unueca lingvo de la estonteco,

1. Samloke, p. 43.
2. Samloke, p. 53 k.sekv.
3. Samloke, p. 57.
4. Samloke, p. 3, 81.
5. Vd. ankaŭ E. Spiridoviĉ, „Genia lingvisto venkita de etburĝeco. Fundamentaj momentoj en la lingva teorio de Zamenhof", *La Nova Etapo* 1. 1932, p. 23-31; reaperinta en broŝura formo (Kioto 1976).
6. Spiridoviĉ, *Jazykoznanie*, p. 67-68, 82.
7. Samloke, p. 81.
8. Samloke, p. 95-96, 98.

de la *baldaŭa estonteco*".[1] Laŭ li, la revolucia transiro de la buŝaj dialektoj al naciaj literaturaj lingvoj estas nur transira etapo sur la vojo al eĉ pli granda lingva revolucio, nome la „kreo de unueca universala lingvo por la sennacia socio de la komunisma epoko".[2] Kompletigi tiun duan lingvan revolucion tial devas esti la „vera bataldevizo" de marksisma lingvoscienco.[3]

4.3.10. *La miskalkulo de Jazykfront*

Kiom ajn aŭdace impresas la provo de Spiridoviĉ asigni al la esperantistoj la rolon de revolucia avangardo en la lingvoscienco – li troviĝis en spirita klimato, kiu tute favoris tiajn ideojn. La diskuto pri marksisme bazita lingvistiko intertempe atingis sian kulminon. Baldaŭ post la Partia Kongreso grupo de junaj lingvistoj, nomanta sin „Jazykovednyj front", t.e. Lingvoscienca Fronto (mallongigite „Jazykfront"), alpaŝis la publikon, vokante al pli akra batalo „por la kreo de vere dialektik-materiisma lingvoscienco". La grupo turnis sin kaj kontraŭ la „senprincipa eklektikismo" de la hindeŭropa skolo kaj, interese, kontraŭ la „mekanikaj tendencoj" de la jafetida teorio. Ĝi asertis, ke nur, kiam ĉi-ambaŭ direktoj estos venkitaj, la lingvistiko povos respondi la postulojn, kiujn starigas la konstruo de socialismo kun la „entiro de la multmilionaj amasoj de Soveta Unio parolantaj malsamlingve".

Al la fondaj membroj de Jazykfront apartenis apud pli konataj lingvistoj kiel G.K. Danilov, T.P. Lomtev kaj Jānis Loja ankaŭ Drezen.[4] Tial ne surprizas, ke SEU reagis favore je la unua alvoko de Jazykfront, kvankam tiu, menciante la „studon de la laŭleĝeco de la lastaj etapoj en la lingva evoluo", ne rekte tuŝis la demandon de unueca lingvo. La alvoko aperis en la teoria organo de SEU kune kun komento, en kiu la redakcio plene solidarigis sin kun ĝi.[5] Tio signifis, ke SEU nun oficiale subtenis strebadojn konstrui marksisman lingvistikon en konkurenco kun la jafetida

1. Samloke, p. 96.
2. Samloke, p. 98.
3. Samloke, p. 99.
4. Ankaŭ Loja (1896-1970), latvo kiel Drezen, estis malnova esperantisto.
5. „Obraŝĉenie gruppy ‚Jazykovednyj front'" (Deklaro de la grupo „Lingvoscienca Fronto"), *Meĵdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 177-178.

skolo de Marr. Drezen persone enviciĝis en fronton de kontraŭuloj de Marr – de tiu homo, kiu nur du kaj duonan jarojn antaŭe estis skribinta antaŭparolon al verko de Drezen. Post kiam la tradicia lingvistiko malhelpis al Esperanto precipe per prisilentado kaj ankaŭ Marr, la profeto de estonta artefarita mondlingvo, montriĝis neentuziasma simpatianto, Drezen nun, ekipita per la nova tezo de Stalin, volis ekataki la malamikojn de Esperanto, kulpigante ilin pri ignoro de dialektikaj vojoj en la lingva evoluo.[1] Jam liginte la sorton de Esperanto kun la konstruo de marksisma lingvistiko, li fidis, ke tiu sukcesos helpe de Jazykfront.

Dum kelka tempo efektive ŝajnis, ke tiu espero plenumiĝos. Adeptoj de Jazykfront komencis konkeri katedrojn en universitatoj, sciencajn institutojn kaj revuojn. Akra polemiko klopodis malkovri la malfortojn de la jafetida teorio de Marr: la skeman konsideron de lingva evoluo, la provon rekte interrespondigi lingvon kaj sociekonomiajn kondiĉojn kaj ankaŭ la neglekton de aktualaj problemoj favore al troa okupiĝo pri la pasinteco kaj estonteco de la lingvo. Krome, Jazykfront komprenigis, ke ĝi ne intencas forĵeti ĉiujn atingojn de la ĝistiama lingvoscienco, precipe tiujn de la sociologia direkto.

Sed Jazykfront miskalkulis. Nome, jam en la daŭro de la jaro 1932 evidentiĝis, ke Marr kaj liaj disĉiploj disponis apogon en la Partio, kiun la junaj lingvistoj de Jazykfront ne plu kapablis skui. La kariero de Marr ĝuste je tiu tempo proksimiĝis al la zenito: En 1930 li avancis al vicprezidanteco en la Soveta Akademio de Sciencoj, kaj por ties politike motivita reorganizo la Partio bezonis lian helpon. Kiugrade la jafetida teorio meritis la epiteton marksisma, tio ŝajnis duaranga konsidere ĝian nekontesteble revolucian karakteron kaj la fakton, ke Marr prezentiĝis kiel pli senkompromisa kontraŭulo de la malnova, burĝa lingvoscienco. Se Jazykfront favoris „venki la tradician lingvistikon sen bloke

1. Kp. la klarigojn de Drezen pri la teoria laboro de SEU: „Dialektika razvitija jazyka i protivniki esperanto" (Dialektiko de lingvoevoluo kaj kontraŭuloj de Esperanto), *Mefdunarodnyj jazyk* 9. 1931, p. 247-252; „SESR na jazykovednom fronte" (SEU en fronto lingvo-scienca), *Mefdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 291-294.

malakcepti ĉiujn ĝiajn rezultojn"[1], ĝi ĝuste pro tiu „meza pozicio" elmetis sin al la akuzo, ke en efektiveco ĝi estas grupo de kaŝaj hindeŭropistoj. De tio tiam ne plu estis longa vojo al la detrua verdikto, ke Jazykfront estas „la standardo de maskitaj reakciuloj en la lingvoscienco, la standardo de niaj malamikoj".[2]

Unu el la ĉefaj kialoj por la fiasko de Jazykfront estis, laŭ Lawrence L. Thomas, la fakto, ke Stalin kaj Marr samopiniis pri la demando de estonta universala lingvo.[3] Nedubeble, la pozicion de Marr helpis firmigi, ke Stalin en 1930 donis perspektivon, kiu ludis gravan rolon en la teorio de Marr. Sed aldoniĝis unu plia kongruaĵo: Ambaŭ proklamis tre malproksiman rezulton de la tutmonda socialisma revolucio, sen ke ili priskribis pli ol per ĝeneralaj formuloj la procezon kondukontan al la kunfandiĝo de lingvoj. Kaj estis ĝuste tiu malprecizo, sur kiu la esperantistoj stumblis.

La esperantistoj delonge koncentris siajn riproĉojn kontraŭ Marr al la punkto, ke li limigas sin al „nuraj deklaracioj pri la tutmonda lingvo de la komunisma socio" kaj ne donas „gvidon al agado".[4] La kongresa parolado de Stalin kreskigis ilian fervoron kulpigi Marr pri nekonsekvenceco kaj pasiveco, ĉar nun la teorio de novtipa mondlingvo, ĝis tiam ne multe priatentata ekster akademiaj rondoj, oficiale eniris la dogmaron de komunismo. Sed dum la jaroj 1931-32 iĝis ĉiam pli klare, ke Marr estis malfortigebla nek per la atakoj de Jazykfront nek per atentigoj pri la manko de „gvido al agado". La kaŭzo estas, ke ĝuste la nedeviga karaktero de lia teorio akordiĝis kun la intencoj de Stalin. Alivorte: Se Marr, surbaze de sia instruo pri la origino kaj estonteco de la lingvo, estus provinta formuli decideman lingvopolitikan

1. Wolfgang Girke, Helmut Jachnow, *Sowjetische Soziolinguistik. Probleme und Genese*, Kronberg/Ts. 1974, p. 53.
2. F.P. Filin, „Der Kampf um eine marxistisch-leninistische Sprachwissenschaft und die Gruppe ‚Jazykfront'" (tradukita el *Protiv burfuaznoj kontrabandy v jazykoznanii*, Leningrad 1932), en: Wolfgang Girke, Helmut Jachnow (red.) *Sprache und Gesellschaft in der Sowjetunion*, München 1975, p. 43.
3. Lawrence L. Thomas, „Some notes on the Marr school", *The American Slavic and East European Review* 16. 1957, p. 341-344.
4. E. Spiridoviĉ, „Akademik Marr i vsemirnyj jazyk buduŝĉego" (Akademiano Marr kaj unueca lingvo de l' estonto), *Meĵdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 137, 138.

programon, tio tre rapide estus evidentiginta la malharmonion inter la internaciismo de la jafetida teorio kaj la realaj evolutendencoj en Soveta Unio. Ju pli intense oni diskutis pri la vojo al universala lingvo, des pli akre minacis sentiĝi la kontraŭdiroj regantaj inter teorio kaj praktiko.

4.3.11. *Diskuto pri la rusa lingvo*

Kiel ni vidis, jam dum la kongreso ne estis facile por Stalin komprenigi al la delegitoj la dialektikan rilaton inter la florado de nacioj en la nuntempa Soveta Unio kaj ilia kunfandiĝo en la tutmonda komunisma sistemo de la estonteco. La konfuzo ankoraŭ pligrandiĝis pro la kontraŭdiroj, kiuj montriĝis eĉ en la nuntempa Soveta Unio, interne de tiu procezo, kiun laŭdire precipe karakterizis la „florado de nacioj". Ke la naciaj kulturoj ne disvolviĝos tute sen iaj limigoj, tion Stalin jam aludis per sia formulo „nacia laŭforme, socialisma laŭenhave"; la nacia elemento atingis limon tie, kie io ŝajnis minaci la unuarangecon de socialismo. Tamen, la zorga distingo inter „nacia formo" kaj „socialisma enhavo" komencis perdi sian konvinkipovon, se la konturoj forviŝiĝis – se la „socialisma enhavo" pleniĝis per naciaj simboloj. Kaj ĝuste tia evoluo kristaliĝis ekde la fino de 1931: La „socialisman enhavon", devigan por la popoloj de Soveta Unio, pli kaj pli plenigis rusaj karakterizaĵoj. Al tiu aspekto ni nun devas turni nian atenton.

La pozicio de la rusa lingvo estas temo, kiun la disponeblaj skribaĵoj de sovetaj esperantistoj preskaŭ ne mencias. Tio ĉi estas des pli notinda, ĉar pri la rilato inter la principo de samrajteco de la lingvoj kaj la bezono je supernacia komunikado ili prezentis tezojn, kiuj kvazaŭ provokis al pritrakto de la rolo de la rusa. Anstataŭe, la diskuto preskaŭ ekskluzive turniĝis ĉirkaŭ la rilato inter *ĉiuj* naciaj lingvoj unuflanke kaj Esperanto aliflanke. Ekzemple, el la aserto de Stalin, ke la naciaj lingvoj interproksimiĝas surbaze de sia komuna socialisma enhavo, Drezen konkludis, ke fina kunfandiĝo *sen* influo al la naciaj lingvoj flanke de „internacia helpa lingvo" ne estas imagebla, ĉar tiu helpa lingvo, do Esperanto, respondanta la nunan bezonon je internacia komunikado, jam estas bazita sur la naciaj lingvoj, formas kun ili

unuecon „surbaze de la leksika materialo de la moderna internacia scienco kaj tekniko" kaj tiamaniere kondukas ilin al kunfandiĝo.[1] Pli frue Drezen eĉ deklaris, ke „tendencoj al ekposedo de supernacia socialisma enhavo" estas en Esperanto, „lingvo uzata speciale de plej progresemaj soci-tavoloj,... pli klaraj, pli okulfrapantaj, ol en la lingvoj naciaj".[2] Nek Drezen nek Spiridoviĉ ĉirilate atentigis, ke en la nerusaj lingvoj de Soveta Unio la scienc-teknikaj terminoj plej ofte estis prenitaj el la rusa.

Tia nekonsidero surprizas, ĉar la faktoj estas tute klaraj. Kiel akcentas George P. Springer, neniam Esperanto estis oficiale konsiderata kiel akceptebla interkomunikilo *interne* de Soveta Unio, kvankam objektiva vido tute bone estus povinta allasi tian eblecon, ekzemple pro la konata kontraŭstaro de Lenin al privilegiigo de la rusa lingvo.[3] Male, la celo de la Partio estis, ke la multnombraj naciecoj de Soveta Unio uzu por sia interkompreniĝo la rusan, kaj ili pli kaj pli spertis premon lerni tiun lingvon. Al Esperanto restis nur la rolo servi kiel ligilo (kaj propagandilo) kun eksterlando.

Alia demando estas, ĉu la sovetaj esperantistoj ĉiam povis distingi inter la du sferoj de komunikado – interne de kaj ekster Soveta Unio. Estas kelkaj indicoj pri tio, ke la esperantistoj de nerusaj naciecoj inklinis rigardi Esperanton certagrade kontraŭpezo al la superrego de la rusa lingvo, dum aliflanke inter rusaj esperantistoj estis observebla la tendenco konsideri la disvastiĝon de la rusa interne de Soveta Unio kiel antaŭŝtupon al la mondskale per Esperanto akcelata procezo de „sennaciiĝo".[4] Tiuj lastaj ideoj ne plu ŝajnis laŭtempaj, post kiam Skrypnyk publike avertis kontraŭ tro fervora „esperantigo" de Ukrainio[5],

1. Drezen, „Dialektika razvitija..." , p. 250.
2. Drezen, *Historio de la mondolingvo*, p. 229.
3. George P. Springer, *Early Soviet theories in communication*, Cambridge, Mass. 1956, p. 13, 31.
4. Tiun tendencon havis precipe la konvinkitaj SAT-anoj, kaj Lanti ankaŭ post la skismo esprimis sian subtenon al la rusiga politiko de Stalin.
5. Pri la esperantistoj en Ukrainio mankas detala scio, kiel ili rilatis al sia denaska lingvo. Necesas atentigi, ke en Ukrainio la rusa estis vaste parolata en urboj, dum en la provinco superregis uzo de la ukraina. Ĉar la esperantistoj koncentriĝis en urboj, ili kredeble ne estis liberaj de la kutima antaŭjuĝo, ke ĉefe la malpli kleraj homoj preferas paroli ukraine.

kaj se Stalin, same en 1930, kondamnis la favorantojn de komuna lingvo en Soveta Unio, ĉar „ili celas esence restarigon de la *privilegioj* de la antaŭe superreganta lingvo, nome de la *grandrusa*"[1], tio donis portempe stimulon ĝuste al tiuj, kiuj volis propagandi Esperanton kvazaŭ garantion por egalrajta florado de la nacioj en Soveta Unio.

Tamen, ĉirkaŭ la sama tempo unu incidento malkaŝis, ke estis riske lanĉi diskuton pri Esperanto en ligo kun la lingva problemo interne de Soveta Unio. Iom antaŭ la Partia Kongreso la ukraina esperantisto S. Sinickij demandis kelkajn verkistojn de sia hejmlando pri ilia opinio pri Esperanto. El la publikigitaj eldiroj aparte interesa estis tiu de la populara poeto Volodymyr Sosjura[2]:

> Mi tre miras, ke Esperanto ne estas instruata en niaj lernejoj. Tio rapidigus, paralele al la organizado de rondetoj en la amasoj, la preparon de la anstataŭigo de la rusa lingvo per Esperanto kiel ŝtata lingvo de USSR. Tio nin helpus pli rapide kaj pli sukcese batali kontraŭ la tiel nomataj lokaj naciismoj per ilia likvido. Tio metus la rusan lingvon en la saman lokon kiel la lingvoj de la aliaj respublikoj, kaj la grandrusa ŝovinismo sur la linio de kulturo estus nur loka naciismo. Esperanto – lingvo kreita surbaze de scio pri la evoluo de lingvoj – nin helpas iri ne blinde en la grandega maro de lingvoj al la tutmonda kulturo. Miaopinie necesas, fine, enkonduki Esperanton en la praktikan vivon de niaj respublikoj, kiel lingvon, kiu fariĝos ŝtata lingvo de USSR kaj poste de la tuta mondo.[3]

Tiuj ĉi herezaj tezoj de Sosjura estis publikigitaj en la teoria organo de SEU – tamen kune kun redakcia noto, kiu atentigis pri „lia tute malĝusta, kontraŭmarksisma starpunkto". Sosjura estis kulpigita, ke li batalas kontraŭ la naciaj formoj de la lingvoj kaj forgesas la ĉefan aferon, la socialisman enhavon. Por kontraŭbatali naciismojn – admonis la redakcio – „oni devas forigi ties kla-

---

Letero de ukraina esperantisto de la speco poste atakota de Skrypnyk al Lanti (de 2-12-1927) informas, ke Krupskaja, la vidvino de Lenin, publike atakis sennaciismon kaj Esperanton kaj ke „ukrainaj naciistoj" ĉesigis lekciaron pri Esperanto en la radiostacio de Harkovo, post kiam tie estis parolo pri la formiĝo de tutmonda kulturo kaj la formorto de naciaj lingvoj: E. Lanti, *Manifesto de la sennaciistoj*. 2a eld., Parizo 1951, p. 22-23.

1. „Politika raporto...", p. 319; kp. ***Kulturo nacia kaj internacia***, p. 18.
2. Sosjura (1898-1965) en la 1920aj jaroj estis multe ŝatata inter la junularo de Ukrainio.
3. S. Sinickij, „Ukrainskie pisateli ob esperanto", *Mefdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 267; kp. Sergio Sinickij, „Ukrainiaj verkistoj pri esperanto", *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 164.

sajn radikojn, sed neniel la lingvon. En nia lando ne ekzistas privilegioj de ia unuopa ŝtata lingvo: La lingvoj de ĉiuj popoloj de Soveta Unio estas inter si egalaj." La propono de Sosjura enkonduki Esperanton kiel ŝtatan lingvon sekve devas esti konsiderata „nenecesa kaj malutila fantaziaĵo, ‚maldekstre-radikala' kvazaŭa antaŭenpaŝo".[1]

La tezoj de Sosjura baze similis konceptojn, kiuj estis validaj en la Esperanto-movado jam longe antaŭ la fondiĝo de Soveta Unio; la t.n. „Deklaracio pri Esperantismo", akceptita dum la Unua Kongreso en Boulogne-sur-Mer en 1905, enhavis interalie la celdifinon, ke Esperanto „povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo".[2] Ke por esperantistoj la propono de Sosjura ne sonis neortodokse kaj ke tiaj, certe nerealismaj ideoj havis grundon eĉ interne de la membraro de SEU, montras la reago de la intervjuinto Sinickij je la redakcia kritiko kontraŭ Sosjura. Tute ne estas vero – skribis Sinickij –, ke Sosjura proponis „neniigi la naciajn lingvoformojn per la lingvo Esperanto". Male, Esperanto havu sian lokon apud la naciaj lingvoj – kiel „ŝtata lingvo de USSR, helpa lingvo, dua lingvo post la nacia, la gepatra lingvo" – kaj devas „forpuŝi la rusan lingvon el la nuna privilegia pozicio", por ke tiamaniere estu observita la principo de Lenin. Ĉar „ne vidi kaj nei", kiel faris la redakcio, „ke la rusa lingvo per sia privilegia pozicio kontraŭas la leninan principon ‚nenia privilegio por ia nacio, por ia lingvo', aspektas evidente kontraŭleninisme".[3]

Sinickij kuraĝe provis spiti la realan evoluon kaj uzi Esperanton kiel batalilon por reveno al la principoj de Lenin. Konsciante la politikan danĝerecon de tiu provo, la redakcio nun rebatis pli akre. Ĝi akuzis Sinickij, ke li falis „en klasan pozicion malamikan al la proletaro", ĉar li ignoras la artikolon 34 de la soveta konstitucio, laŭ kiu la rusa ne plu ĝuas „la privilegiojn kiel ŝtata lingvo ekzistintajn en la kapitalisma ordo". Evidente li ne konas ankaŭ

1. *Mefdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 267; kp. R. Nikolskij, „Ĉu Esperanto povas esti ŝtata lingvo", *Internaciisto* 1931, n-ro 27/28 (nov.) p. 224.
2. EeP, p. 418-419. – Pri tio kp. Michel Duc Goninaz, *Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko*, Liège 1974, p. 30-31.
3. S.P. Sinickij, „Pis'mo v redakciju" (Letero al la redakcio), *Mefdunarodnyj jazyk* 9. 1931, p. 124-125.

la vortojn de Lenin: „Ni kompreneble estas por tio, ke ĉiu loĝanto de Ruslando havu la eblon lerni la grandan rusan lingvon." La redakcio demandis al Sinickij, ĉu do li eble volas malhelpi la deziron de la laboruloj de la naciaj respublikoj legi en originalo la verkojn de Lenin kaj Stalin kaj ĉiujn partiajn decidojn kiel ankaŭ ilian strebadon alproprigi al si la teknikan scion peratan de la rusa lingvo. Ne komprenante, „ke la tutaĵo de la klasaj interesoj estas pli grava ol la naciaj diferencoj", Sinickij turnas sin ne specife „kontraŭ la lingvo de la rusaj bienposedantoj, kapitalistoj, popoj, policistoj, sed kontraŭ la rusa lingvo ĝenerale". Se tiamaniere li kontraŭas, ke la nerusaj laboristoj kaj kamparanoj de Soveta Unio lernu la lingvon de siaj rusaj samklasanoj, li celas al laŭnacieca apartigo kaj faras „kontraŭrevolucian laboron". Konklude la redakcio ankoraŭ notis, ke la starpunkto de Sinickij estas „klara ekzemplo pri tio, kiel malforte la sovetaj esperantistoj estas armitaj per la marksisma-leninisma metodo".[1]

Post tiu ĉi severa riproĉo, al Sinickij kaj Sosjura restis nur fari ampleksan memkritikon. Ambaŭ konfesis, ke ili kulpas pri „kruda politika eraro", ne diferenciginte inter „lernado kaj instruado" de la rusa lingvo kaj subtaksinte „la signifon de la studo de la rusa por la proletaro de USSR".[2]

Kiel prijuĝi la polemikon, unikan en la organo de SEU, pri la pozicio de la rusa lingvo? Rimarkinde estas, kiom malmulte en ĝi temis pri Esperanto: La redakcio detale traktis la progreseman karakteron de la lernado de la rusa kiel „granda paŝo antaŭen al la kunfandiĝo de nacioj en pli altan unuon" kaj ne menciis ian ĉirilatan kontribuon de Esperanto. Male, Sinickij estis kulpigita, ke lia difino de la rolo de Esperanto nur helpas la izolitecon de nacioj. Kvankam en sia memkritiko Sosjura timeme varbis por la

1. „Priznat', a ne uglubljat' ošibku" (Konfesi, sed ne pliprofundigi la eraron), *Mejdunarodnyj jazyk* 9. 1931, p. 125-128. – Ĉi-kuntekste estas notinda ankaŭ la postulo de Nikol'skij (dum la 5a SEU-Kongreso) „starigi antaŭ ni pli serioze la studon de problemoj pri marksismo-leninismo. Precipe grava estas la tasko bone kompreni la nacian politikon de la komunista partio...": *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 133.
2. S. Sinickij, V. Sosjura, „Priznaĕm svoju ošibku" (Ni konfesas nian eraron), *Mejdunarodnyj jazyk* 9. 1931, p. 252-253.

tutmonda lingvo, „de kiu Esperanto formas kaj formos elementon", kaj la redakcio ne ekskludis la eblecon de deviga instruado de Esperanto, „kie estas ĉiuj necesaj kondiĉoj", tute mankis en la longa atako kontraŭ la du ukrainoj la antaŭe tiel ofte, precipe de Spiridoviĉ farita interrilatigo de naciaj lingvoj, internacia helpa lingvo kaj estonta tutmonda lingvo.

Eĉ la prognozo de Stalin pri universala lingvo ne estis menciita je tiu ĉi okazo – kaj tio fakte ne estas surpriza: Rilatante al la epoko post la tutmonda venko de komunismo, ĝi ne taŭgis por doni teorian apogon al la aktuala soveta politiko. Stalin ja estis deklare certiginta la estontecon de internaciismo, sed por la nuntempo klare donis prioritaton al la „florado de nacioj" kaj ligis kun tiu principo sian kritikon kontraŭ „grandpotenca ŝovinismo". Li do varbis por fido ĝuste inter la nerusaj naciecoj de Soveta Unio. Tamen – kaj tio devis konfuzi kaj seniluziigi la sovetajn esperantistojn – rapide kreskis la kontraŭdiroj inter la oficiala teorio kaj la praktiko. Nome, ili devis konstati, ke Stalin ne nur neniel kuraĝigis al preparlaboroj por la estonta lingvo de komunismo, sed ke li en la nuntempo praktike pli kaj pli malproksimiĝis ankaŭ de tiu principo de egalrajteco de ĉiuj nacioj en Soveta Unio, kiu povis servi kiel favora grundo por Esperanto. Fine de 1931 Stalin komencis pliseverigi sian politikon kontraŭ la nerusaj minoritatoj – kaj ĉirkaŭ la sama tempo la diskuto pri la funkcio de Esperanto interne de Soveta Unio, lanĉita de Sosjura, alportis flanke de la gvidantoj de SEU la konfeson, ke la esperantistoj devas ankaŭ batali „nepacigeble kontraŭ kiuj ajn elmontroj de loka naciisma deflankiĝo". Kaj oni povas aldoni, ke tiu diskuto iom post iom konsciigis al la esperantistoj, ke senvalidiĝis la skemo prezentita de Spiridoviĉ, laŭ kiu ne la – ne eksplicite menciita[1] – rusa lingvo, sed Esperanto kontribuas al la unueciĝo de lingvoj en socialismo.

1. Nekutime malkaŝa estis konstato, kiun faris en 1930 la lingvisto (kaj esperantisto) Lev Ĵirkov: „... rusa lingvo – lingvo de la revolucio – neniel povas fariĝi internacia, nur tial, ke ĝia gramatika strukturo estas tro malsimpla kaj enhavas ecojn de granda arkaismo." (L. Ĵirkov, *Kial venkis Esperanto? Studo*, Leipzig 1931, p. 37; originalo: L. Ĵirkov, *Počemu pobedil jazyk esperanto?*, Moskva 1930, p. 30.)

4.3.12. *Letero de Stalin kaj „Tezoj pri internacia lingvo"*

Stalin mem pli kaj pli konsciis, ke esperoj vekiĝintaj dum la kultura revolucio minacas la politikon de la Partio. En oktobro 1931 li faris sekvoriĉan kontribuon al la demando pri la ĝusta rilato inter teorio kaj praktiko. En letero al la redakcio de la revuo *Proletarskaja revoljucija* Stalin protestis kontraŭ la aperigo de artikolo, en kiu la historiisto A. Sluckij traktis la sintenon de Lenin al la germana socialdemokratio antaŭ la mondmilito. La temon, ĉu Lenin subtaksis la danĝeron de oportunisma centrismo, Stalin arbitre misprezentis kiel kvazaŭan argumentadon pri tio, ĉu Lenin estis vera bolŝeviko aŭ ne. Kolere li riproĉis la historiistojn, ke pri demandoj, kiuj estas aksiomoj de bolŝevismo, oni ne rajtas diskuti, kaj ĉi-okaze kondamnis entute la inklinon de komunistaj intelektuloj senfrukte teoriumadi. Ne sufiĉas, laŭ Stalin, fidi sole al „paperaj dokumentoj": „Kiu, krom arkivaj ratoj, ne komprenas, ke partiojn kaj gvidantojn necesas ekzameni unuavide surbaze de iliaj *agoj* kaj ne nur surbaze de iliaj deklaroj?"[1]

La letero de Stalin ekmovis ondon de memkritiko ne nur inter la historiistoj, sed inter ĉiuj marksistaj sciencistoj kaj teoriiste aktivaj intelektuloj. Unu el la rezultoj estis la formado de brigadoj, kiuj interalie devis kontroli la ekzistantan literaturon pri trajtoj de la „putra liberalismo" brulmarkita de Stalin. Tra la tuta lando partiaj kunvenoj diskutadis pri la instrua leciono donita en la letero.

Ankaŭ la Esperanto-movado sentis sin pelita al malagrabla ideologia pentofaro. Komence de 1932 longa, principa artikolo anoncis, ke ĉe la Centra Komitato de SEU estis fondita brigado[2] kun la tasko „unufoje por ĉiam elbalai per fera balailo de memkritiko" ĉiujn erarojn, kripligojn kaj deflankiĝojn ekzistantajn inter la sovetaj esperantistoj. Akorde kun la atako de Stalin kontraŭ la „duonmenŝevika kaĉo", t.e. la subtakso de la nacia problemo, estis proklamita ankaŭ pli forta batalo kontraŭ restaĵoj de

1. „Pri kelkaj demandoj de la historio de bolŝevismo", *Werke* XIII 76-91.
2. La brigadanoj estis G. Burljagov, A. Lobaĉev, M. Paŝĉenko kaj S. Podkaminer.

sennaciisma pensado. Aparte notinda estis la konkludo, kiun faris SEU pri la nuntempa rolo de Esperanto. Ĝi ne nur ripetis, ke Esperanto volas esti nur helpa lingvo, sed unuafoje klare komprenigis, ke al teoriaj konsideroj pri la lingva problemo ne plu eblas atribui multe da graveco. Rekte tuŝante la tezojn de Spiridoviĉ, SEU nun distancigis sin de lia „devizo de batalo", ke „en la centro de marksisma lingvoscienco ... devas stari la lingvo de nova, proleta epoko – la lingvo internacia". Elstaran signifon kontraŭe havas la „procedo de ekflorado de ‚kulturoj naciaj laŭforme kaj socialismaj laŭenhave'", dum „la devizo pri lingvo internacia povas esti nature nur akcesora".[1] Pli klara konfeso, ke la „historia letero" de Stalin de 1931 obsoletigis la entuziasmon vekitan per lia kongresa parolado de la antaŭa jaro, apenaŭ estas imagebla.

La teoria diskuto ankoraŭ daŭris dum iom da tempo, kvankam ĝi nepretervideble portis signojn de retiriĝo kaj lasta spitado. Kun la celdifino gardi interalie pri la „materialism-dialektika trakto de la lingvo" fine de 1931 estis fondita, laŭ iniciato de SEU, „Internacia Sekretariaro de la Landaj Proletaj Esperantaj Lingvo-Komisionoj" (ISLK).[2] Tiu funkciis kiel kuneldonanto[3] de *La Nova Etapo*, revuo ekaperanta komence de 1932, en kiu la debato pri teoriaj demandoj de internacia lingvo havis sian lastan kulminon.

En la tria kajero de *La Nova Etapo* aperis la Esperanta traduko de dokumento, kiun SEU nomis „grandega venko", ĉar per ĝi la marksisma lingvoscienco unuafoje donis seriozan atenton al Esperanto.[4] Temas pri dek-unu „Tezoj pri internacia lingvo", kiujn akceptis la Scienc-Esplora Instituto de la Lingvo en Moskvo.[5] Tiu ĉi instituto, kiu estis ligita al la Popolkomisarejo

1. „Per fajro de senindulga memkritiko ni kontrolu la tutan fronton de nia laboro", *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 13-14.
2. Teksto de la provizora statuo de ISLK: *Al la nova etapo*, Leipzig 1932, p. 53-55.
3. La alia eldonanto estis Internacia Asocio de Revoluciaj Esperanto-Verkistoj (IAREV).
4. „Krupnejšaja pobeda" (Grandega venko), *Mejdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 97-99; „Marksisma lingvoscienco turnas sin vizaĝe al la problemo pri lingvo internacia", *La Nova Etapo* 1. 1932, p. 115-116.
5. „Tezisy o mejdunarodnom jazyke", *Mejdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 99-102; Esperanta traduko: „Tezoj pri internacia lingvo", *La Nova Etapo* 1. 1932, p. 116-118.

pri Klerigo, servis kiel centro de la adeptoj de Jazykfront[1]; estas verŝajne, ke Drezen, unu el la fondintoj de Jazykfront, almenaŭ influis la ellaboron de la Tezoj.

Valoras doni iom pli detalan atenton al la Tezoj. Ili klare nomas la uzon de internacia helpa lingvo necesa kaj la lingvistikan pritrakton de Esperanto legitima. Al la avantaĝoj de Esperanto apartenas, ke „ĝi ne estas ligita kun iu respektiva nacio kaj estas por ĉiuj ‚fremda'", dua lingvo kaj ke ĝi jam estas sukcese uzata „por intensigo kaj firmigo de internaciaj rilatoj de la revolucia proletaro". Sekve, oni ne rajtas ignori Esperanton nek prezenti ĝin, kion provas fari iuj „gildaj lingvistoj", „kiel mortenaskitan produkton, ekskluzive kiel etburĝan utopion, kiu elvaporiĝos kune kun la likvido de la ĝin naskintaj kontradikciaj kondiĉoj de la burĝa socio". Tamen, samtempe la dokumento fiksis tre malvaste la limojn, en kiuj subtenon meritas la plua disvastigo de Esperanto en Soveta Unio. Kiel konfesis SEU, la Tezoj „signalas pri tiuj malfortaj lokoj de nia teoria fronto, kiuj ĝis la lasta tempo restis sen sufiĉa atento kaj sur kiuj pro tio povis elmontriĝi kaj ekflori fremdaj kaj malutilaj ideoj". Unuavice temis pri tio, ke la sovetaj esperantistoj lasis sin erare inspiri de Stalin: La Tezoj substrekis, ke en Soveta Unio „aktuala tasko estas la batalo por ĉiuflanka disvolvigo de ĉiuj senescepte naciaj lingvoj en la klasbatalo de proletaro por ilia unueca socialisma enhavo" kaj ke „ĉiuj provoj, starigi la demandon pri la komuna universala lingvo nunmomente kiel vican aktualan taskon, estas antaŭtempaj kaj tial utopiaj". Eĉ estas pridubata ia signifa kontribuo de Esperanto al la kreo de estonta tuthomara lingvo: „La kunproksimiĝo de naciaj lingvoj, kiu kondukos al unu monda lingvo, okazas sendepende de esperanto."

Estante jam reduktita al la rolo de modesta helpilo en la nuntempo, Esperanto ankoraŭ estis submetita en la Tezoj al tuta aro da ideologiaj admonoj. Ekzemple, estas eraro prezenti ĝin kiel nuran interkomunikilon, „simile al tiu aŭ alia internacia teknika kodo", ĉar per tio oni neas ĝian superstrukturan karakteron.

1. La direktoro de la instituto, Boĉaĉer, kaj speciala reprezentanto de Jazykfront, Ivanov, salutparolis en la SEU-Kongreso fine de novembro 1931: *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 131.

Esperanto „naskiĝis en la burĝa medio", kaj tie radikas ankaŭ ĝia kvazaŭa „internaciismo":

> La belanimaj celadoj de d-ro Zamenhof kaj de l' esperantistaj burĝaj propagandistoj al frateco de popoloj kaj al tutmonda harmonio objektive estis, kiel ĉiuj etburĝaj iluzioj, helpilo de imperialismo.

Sekve, necesas rekonstrui la ideologian enhavon de Esperanto. La aliĝo de klaskonsciaj laboristoj ja plifortigis la gravecon de proletaj elementoj en la lingvo kaj kondukis al diverĝo inter la „sociaj dialektoj" de Esperanto, sed la sovetaj esperantistoj devas ankoraŭ „pliintensigi la laboron en la klasa diferencigo de esperantista movado, kiel ekstere, tiel same ankaŭ interne de USSR".

Apartan atenton, fine, meritas la fakto, ke la Tezoj, klopodante zorge diferencigi inter aktualaj kaj estontecaj taskoj en la lingva politiko, direktis atakojn kaj kontraŭ Marr kaj kontraŭ Spiridoviĉ.[1] Marr (implicite mallaŭdata pro sia neatento al Esperanto) konsideras baza problemo de lingvistiko la problemon de lingvo-deveno, dum Spiridoviĉ, „simbolo de la plimulta parto de sovetiaj esperantistoj dum la lastaj jaroj", asertas, ke la „baza problemo de lingvistiko estas la konstruo de la estonta lingvo": Ambaŭ tiamaniere deturnas la atenton de taskoj aktualaj en la nuntempo. Pri Spiridoviĉ la Tezoj aldonas:

> Tiu ĉi formulo, maldekstrume deprenanta la problemojn de la transira tempo, kiam ĉiuj niaj fortoj devas esti uzitaj por helpo al „plena ekfloro de naciaj lingvoj, naciaj laŭ-forme kaj socialismaj laŭ-enhave", – fakte agas por grandŝtatismanoj.

Se iuj esperantistoj, malĝuste interpretante la elpaŝon de Stalin dum la 16a Kongreso, celas prezenti Esperanton „se ne jam kiel pretan tutmondan lingvon de l' homaro, do kiel solan embrion de ĉi tiu lingvo", necesas energie kontraŭstari al tia provo, ĉar ĝi „estas nenio alia ol reakcia etburĝa utopiismo, sin akomodanta al la kondiĉoj de la diktaturo de proletaro".

Malgraŭ kritiko pri iuj detaloj, SEU deklaris sin plene solidara kun la Tezoj. Sendube superregis sento de kontento pri tio, ke el la vicoj de la longtempe privarbata lingvoscienco fine venis serioza diskuta kontribuo pri Esperanto. Ĝuste tion ja esperis

1. Kritikon kontraŭ Marr same kiel kontraŭ Spiridoviĉ jam aŭdigis la du lingvistoj, kiuj salutis la kongreson de SEU (vd. la antaŭan noton).

Drezen, kiam li aliĝis al la kritikantoj de Marr. Nun li nomis la Tezojn „kolosa atingo" kaj fiere parolis pri turnopunkto en la lingvoscienca pensado, „pri kiu antaŭ tri jaroj oni eĉ ne kuraĝis revi".[1]

Spiridoviĉ, tamen, rifuzis kunkanti la ĥoron de aprobo. Li ja agnoskis la „konstruktivan karakteron" de la kritiko entenita en la Tezoj kaj ankaŭ konfesis, ke en liaj propraj verkoj troviĝas „krudaj eraroj". Ekzemple, li jesis, ke li „tute ĉirkaŭiris la problemon pri klasa, proleta karaktero de la konstruataj de proletaro naci-literaturaj lingvoj" – kio estis nerekta rekono, ke li ne donis atenton al la progresema influo de la rusa lingvo je la vortaro de la iam postrestintaj minoritataj lingvoj. Sed entute la respondo de Spiridoviĉ egalis pravigon de lia centra argumento, ke la sinorientado pri la celo de tutmonda venkigo de komunismo devas validi ankaŭ por la lingvoscienco kaj ke sekve ties plej grava tasko estas konstrui la estontan lingvon de la komunisma socio. Apogante sin sur citaĵo de Lenin, Spiridoviĉ insistas, ke la tuta laboro de la proletaro devas sin direkti al la „definitiva celo", kio ne deprenas de ĝi la dialektikan kapablon „starigi kaj solvi la akutajn taskojn *en kondiĉoj de ĉiu konkreta momento*". Tion ne komprenis la verkintoj de la Tezoj, kulpigante lin, Spiridoviĉ, pri „maldekstruma" fuĝo antaŭ la postuloj de la transira periodo. Ili evidente konsideras la floradon de nacioj kaj lingvoj *„ne kiel etapon dum konstruado de komunismo* sed kvazaŭ ion memsufiĉan", dum por li tiu procezo estas *„necesa ŝtupo por konstruado de la estonta mondlingvo*".

Spiridoviĉ daŭrigas, ke lia „formulo" celas insiste rememorigi pri la „definitiva celo". Pri nesufiĉa kompreno por la nuntempe gravaj taskoj oni ne kulpigu lin, ĉar ĉiam kaj ĵus denove, en komento pri verko de Skrypnyk, li postulis de la proletaj esperantistoj „esti antaŭ ĉio aktivaj batalantoj por realigo de marksleninisma nacipolitiko, batalantoj por la plej vasta disvolvo de la naciaj kulturoj kaj lingvoj, se ili deziras resti en la vicoj de l' *efektivaj* konstruantoj de la unueca estonta mondolingvo".[2] Ĉiu

1. É. Drezen, „SÈSR na jazykovednom fronte" (SEU en fronto lingvoscienca), *Meĵdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 294.
2. Tie ĉi Spiridoviĉ citas el sia enkonduko al la Esperanta traduko de broŝuro de Skrypnyk, *Zblyfennja i zlyttja nacij za doby socijalizmu* (Interproksimiĝo kaj kunfluo de nacioj dum la tempo de socialismo), Ĥarkovo 1932.

komprenu, konkludis Spiridoviĉ, ke la batalon por plena disvolvo de la naciaj lingvoj li „traktas dialektike kiel batalon por konstruo de la estonta unueca lingvo".[1]

Kun la pledo de Spiridoviĉ, ke oni ne forgesu la estontecan perspektivon, praktike ĉesis la teoria diskuto pri la tutmonda lingvo de komunismo. Dum okaze de la Tezoj Spiridoviĉ frontis homojn, kiuj same kiel li mem sin distancigis de Marr, li samjare spertis novajn atakojn. Tiuj ĉi-foje venis de adeptoj de Marr kaj estis direktitaj ne nur kontraŭ Spiridoviĉ, sed ankaŭ kontraŭ Drezen kaj la tuta Jazykfront. En libro publikigita de la Akademio de Sciencoj la verkoj de Drezen kaj Spiridoviĉ estis tre akre kritikitaj. La aŭtoroj demandas retorike: „Ĉu en la epoko de la proleta diktatoreco tia formalismo kaŝanta sin per la revolucia frazo pri Esperanto kiel lingvo de la proletaro entute rajtas esti tolerata?" Ili kontestas al la argumentado de Drezen kaj Spiridoviĉ kiun ajn konformecon kun marksismo, samspire akuzante ambaŭ kaj pro etburĝeco kaj pro maldekstra radikalismo. La internacia lingvo evoluos, laŭ la aŭtoroj, nur sur la bazo de unueca mondekonomio en la epoko de disvolviĝinta komunismo kaj estos lingvo de tute nova kvalito, „kiu estos enkorpiginta ĉiujn grandajn atingojn de la naciaj lingvoj".[2] Ĉia pretendo de Esperanto esti „lingvo de la proletaro" estas rifuzata: „Ke proletoj per ĝi korespondas internacie, ankoraŭ ne faras ĝin proleta." La verkoj de Drezen kaj Spiridoviĉ (ties „marksisma frazeologio" evidente sonis aparte provoke) estas konsideritaj kiel damaĝaj, „ĉar ili konsistigas atakon de la klasa malamiko en la lingvistika kampo de la ideologia fronto".[3]

Niascie tiu traduko ne plu aperis, evidente pro la nova kampanjo kontraŭ Skrypnyk komencita en septembro 1932.

1. E. Spiridoviĉ, „La ‚vera devizo por batalo' en la marks-leninisma lingvoscienco", *La Nova Etapo* 1. 1932, p. 157-160. – Originalo: „‚Istinnyj lozung bor'by' v markso-leninskom jazykoznanii", *Meĵdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 338-342.
2. La fakto, ke Esperanto estas facile lernebla, ne impresis la aŭtorojn, ĉar laŭ ili „la demando de facileco de lingvo ne havos decidan signifon sub la kondiĉoj de maksimuma kultura evoluinteco en la komunisma socio".
3. G.I. Gorbaĉenko, N.P. Sinel'nikova, T.A. Ŝub, „Vylazka burĵuaznoj agentury v jazykoznanii" (Atako de la burĝa agentejo en la lingvoscienco), en: *Protiv burĵuaznoj kontrabandy v jazykoznanii* (Kontraŭ burĝa kontrabandaĵo en la lingvoscienco), Leningrad 1932, p. 129-140.

Kontraŭ tiaspecaj akuzoj apenaŭ eblis defendi sin. Fine de 1932 la teoria organo de SEU jam ne plu montris multe da fido, ke la Esperanto-movado povas atendi profiton el la disputo inter la lingvistoj. Kiel skribis A.P. Andreev, nek Marr sukcesis ĝis nun estigi „vere marksisman, krean *teorion*" nek kapablis tion Jazykfront, malgraŭ la „*„revoluciaj*' lozungoj en sia lingvistika pakaĵo". Andreev esprimis la esperon, ke la Partio decide intervenos por ĉesigi la malunuecon de la lingvistoj – simile al siaj nelonge antaŭe entreprenitaj paŝoj sur la kampo de literaturo kaj arto. Ĉu tamen organiza unueciĝo de la sovetaj lingvistoj helpos teorie pliklarigi la demandojn, pri kiuj aparte interesiĝis la esperantistoj, tion Andreev evidente ne kredis. Li ĉiuokaze konstatis tute sobre, ke la demando de evoluo al universala lingvo estas „pli politika, ol strikte lingvistika" problemo.[1]

4.3.13. *La vana teoriumado*

Aludante pri „arbitracia rolo" de la Partio, Andreev rilatis al decido de la Centra Komitato de la 23a de aprilo 1932, per kiu estis dissolvita la Rusa Asocio de Proletaj Verkistoj (RAPP). Tiu ĉi evento markis gravan etapon en la procezo de „stabiligo" post la kultura revolucio. Dum la komencaj jaroj de la Unua Kvinjarplano RAPP, kiel instrumento de la Partio, metis la literaturon en la servon de socialisma konstruado, sed samtempe konservis gradon de memfido, kiu pli kaj pli malplaĉis al la Partio. Maldekstraj kritikantoj de la estraro de RAPP formis en aŭgusto 1930 la grupon „Litfront", kiu propagandis pure agitan literaturon kaj baldaŭ trovis ankaŭ partian apogon. En aprilo 1932 fine, dissolvante kaj RAPP kaj „Litfront", la Partio metis finon al la disputo.[2]

RAPP, kiu ĝislaste insistis pri sia proleta, klasa starpunkto, ne plu konvenis al la tempo je la fino de la Unua Kvinjarplano.

1. A.P. Andreev, „Sovetskoe jazykoznanie za 15 let" (Soveta lingvoscienco dum 15 jaroj), *Mefdunarodnyj jazyk* 10. 1932, p. 289-290. – Jam pli frue la sama aŭtoro („Lingvo internacia laŭ la marksisma vidpunkto", *La Nova Etapo* 1. 1932, p. 79) esprimis la opinion, ke la soveta Esperanto-movado dume apenaŭ povas atendi oficialan subtenon: „Precipa malhelpo estas en la nunaj politikaj cirkonstancoj, kiuj ne ebligas libere okupiĝi pri niaj ideologiaj ‚superkonstruaĵoj'."
2. En aŭgusto 1934 estis fondita nova, unueca asocio de verkistoj.

Ĉirkaŭ la jaro 1932 la situacio en Soveta Unio estis esence ŝanĝiĝinta. La ekonomio nun estis transformita sur la bazo de kolektivismo, ĉia opozicio estis neniigita. La Partio estis fortikiginta sian regadon tiagrade, ke ĝi nun povis permesi al si distanciĝi de la slogano pri akriĝinta klasbatalo. Elstarigi la „proletaron" ne plu necesis, post kiam la popolo sub giganta viktimigo, sed ne sen propra entuziasmo pri la konstruata progreso, estis kunfandita en unuecan sovetan popolon. En edukado, la direkto ŝanĝiĝis jam en aŭtuno 1931, ne plu lasante lokon al la teorio de „formorto de la lernejo"; politeknikigon kaj aliajn radikalajn eksperimentojn sekvis la evoluo al aŭtoritateca lernfabriko. Reformoj enkondukitaj en 1932/33 alportis „lernejigon" ankaŭ en la universitata sistemo. Infanoj de neproleta deveno ricevis multe pli facilan aliron al supera edukado. Kaj dum la marksistaj, altgrade politikigitaj intelektuloj perdis influon, denove avancis la „kunvojaĝantoj": La burĝaj specialistoj reakiris gvidajn postenojn en la ekonomia aparato. Administra kapablo, kombinita kun lipaj konfesoj pri ideologia fideleco, havis pli da kurza valoro, ol kulturrevolucia fervoro kaj scioj pri la marksisma teorio.

Fonen iris utopioj radikantaj en la tradicio de marksismo; ili ŝajnis al la Partio malhelpaj al la aktualaj taskoj. Jam en 1930, dum la 16a Kongreso, Stalin malkuraĝigis la esperantojn pri baldaŭa „formorto de la ŝtato", proklamante la formulon, ke la ŝtato unue devas maksimume fortikiĝi „kun la celo prepari la kondiĉojn *por* la formorto de la ŝtata potenco".[1] Unu jaron poste, la restinta ideo pri formorto de la lernejo ankaŭ ne plu konformis kun la celo de la Partio uzi la edukan sistemon kiel fortikigilon de la ŝtato. Sendube, la memoro pri la komunisma utopio, en kiu formortos la ŝtato, ankoraŭ konsistigis fonton de entuziasmo por la socialisma konstrulaboro; ĝi helpis konsoli pri la penegaj streĉoj de la nuntempo, havigi al la suferoj ian sencon kaj igi pli eltenebla la penson pri pluaj mizeroj. Samtempe tamen la utopio ĉiam entenis ĝermon malkvietigan, ĉar ĝi permesis mezuri la nuntempon laŭ marksismaj celdifinoj. Ĝuste tiun ĉi danĝeron Stalin

1. „Politika raporto de la Centra Komitato al la 16a Partia Kongreso" (27-6-1930), *Werke* XII 323. – Tiu ĉi dialektika formulo rekte antaŭis la tezon cititan supre (p. 355), ke la florado de naciaj kulturoj celas prepari la kondiĉojn por ilia formorto kaj kunfandiĝo.

rimarkis kaj tial en aŭtuno 1931 senigis la kulturan revolucion de partia apogo, kondamnante en sia letero al la revuo *Proletarskaja revoljucija* la vanan teoriumadon de komunistaj intelektuloj.

Post tio daŭris ankoraŭ pli ol unu jaron, ĝis ankaŭ la sovetaj esperantistoj definitive venis al la konkludo, ke ne plu estas konsilinde elpaŝi per teoriaj kontribuoj.[1] Ke ili kvazaŭ ligis sian sorton al Jazykfront, montriĝis miskalkulo; estis avertsignalo, ke la dumtempe premata jafetida skolo sukcesis konservi la bonvolon de la Partio. Plian, eble eĉ pli gravan kialon por silenti donis la novaj evolutendencoj en la nacieca politiko de Soveta Unio. Kvankam Stalin ankoraŭ dum la kongreso de 1930 el la naciismaj deflankiĝoj nomis ĉefa danĝero la grandrusan ŝovinismon, jam de 1931 la batoj de la moskva gvidantaro ekskluzive direktiĝis kontraŭ la alia formo de deflankiĝo – la loka naciismo.

Tiu loka naciismo minacis revigliĝi, kiam pro la industriigo la nerusaj respublikoj ĉiam pli elmetiĝis al centraliza kontrolo. Simbolan signifon alprenis ĉi-rilate la evoluo en Ukrainio, kie la malnova bolŝeviko Skrypnyk ĉiam estis energie plediinta por malcentralizo kaj kultura aŭtonomio. Fine de 1931 li iĝis celtabulo de fortaj atakoj, sed rifuzis memkritikon, eĉ post rekta postulo flanke de la Politika Buroo de la Ukraina Partio en marto 1932, ke li konfesu siajn erarojn. Duonan jaron poste komenciĝis kampanjo kontraŭ la Popolkomisarejo pri Klerigo, kiun estris Skrypnyk. Fine de februaro 1933 li eksiĝis el tiu ofico. En junio la Centra Komitato denove postulis, ke li publike maladoptu sian naciisman deflankiĝon. Skrypnyk plue rifuzis, sed fine, pro la daŭrantaj atakegoj, elektis kiel lastan eliron la sinmortigon.[2] Postmorte Skrypnyk estis denuncita kiel helpanto de naciisma kontraŭrevolucio, sekvis grandskala purigado en la kampo de klerigo kaj kulturo en Ukrainio, kaj, kvazaŭ tute konsekvence, dum la 17a Kongreso en januaro 1934 Stalin simple inversigis la leninajn principojn pri la unuarangaj danĝeroj en la nacieca problemaro:

1. En 1933 ankoraŭ aperis, kiel eldonaĵo de SEU, la artikol-kolekto *Novye problemy jazykoznanija* (Novaj problemoj de lingvoscienco), Moskva 1933; kontribuaĵoj de Drezen, Spiridoviĉ, Loja, Ĵirkov k.a.
2. La 7an de julio 1933. – Vd. la nekrologon en *Sennaciulo* 9. 1932/33, p. 108.

Montrante al la devio de Skrypnyk, li nomis Ukrainion la precedenta kazo de ĉefa danĝero minacanta flanke de la loka naciismo por la paca kunvivado de la sovetaj popoloj.[1]

La malapero de Skrypnyk estis precipe por la esperantistoj de Ukrainio grava bato, ĉar el ĉiuj sovetaj gvidantoj li estis la sola, kiu konsideris Esperanton serioze[2] kaj – malgraŭ sia kritiko kontraŭ la troa fervoro de esperantistoj – klare jesis ĝian rajton pri disvastiĝo en Soveta Unio. Pli ĝenerale, la morto de Skrypnyk kaj la nova puŝdirekto de Stalin kontraŭ la loka naciismo drame lumigis, kiom ŝanĝiĝis la pozicio de la Partio pri la nacieca problemo – dum tiuj malmultaj jaroj post la averto de Stalin kontraŭ la grandrusa ŝovinismo, per kiu la timoj de Skrypnyk estis portempe eliminitaj.

Ekster la menciita ŝanĝo de prioritatoj, tamen, Stalin ne reformulis la principojn de la soveta nacieca politiko. Restis valida lia diraĵo, ke en Soveta Unio devas flori la naciaj kulturoj kaj lingvoj, por ke tiel kreiĝu la kondiĉoj por ilia kunfandiĝo en la komunisma monda socio. Stalin ne juĝis oportuna adapti la oficialan teorion al la nova realaĵo, kvankam ne nur delonge paliĝis la vizio pri la estonteco, sed ankaŭ ŝanĝiĝis tio, kio gravis en la nuntempo – nome, ne plu la egalrajteco de nacioj, sed tutsoveta patriotismo, kiu ĉiam pli pleniĝis per rusaj simboloj.

Sub tiuj cirkonstancoj la klopodoj de la sovetaj esperantistoj akiri profilon kiel revolucia avangardo en la batalo por la estonta universala lingvo trafis en vakuon. Same kiel la tezo pri „formorto de la ŝtato" ne havis gravecon por la nuntempo, tiel ankaŭ la unuiĝo de nacioj kaj lingvoj estis afero de la malproksima estonteco. La celado asigni al Esperanto estontec-preparajn taskojn ne konformis kun la politikaj realaĵoj, kaj la provo propagandi ĝin kiel helplingvon necesan apud la „florantaj" naciaj lingvoj estis same vana peno, ĉar la funkcion de lingvo de inter-

1. Stalin deklaris: „La ĉefa danĝero estas tiu, kontraŭ kiu oni ĉesis batali kaj kiun per tio oni lasis kreski al kontraŭŝtata fenomeno." (Raporto al la 17a Partia Kongreso", *Werke* XIII 317.)
2. Vd. ankaŭ „Tov. Skrypnik ob ėsperanto", *Meĭdunarodnyj jazyk* 9. 1931, p. 216 (eltiraĵo el artikolo en *Bil'šovyk Ukrainy*, n-ro 8, 1931). – Certe ne estis hazardo, ke post la ekskomisariĝo de Skrypnyk ĉesis aperi la Esperantaj resum-folioj *La Vojo de Klerigo*.

popola komunikiĝo en Soveta Unio pli kaj pli efike plenumis la rusa.

Fakte, memorigante pri la fina celo de komunismo kaj siamaniere substrekante la egalecon de ĉiuj lingvoj, la esperantistoj tuŝis danĝerajn tabuojn, ĉar ili – neintence – atentigis, kiom disiĝis teorio kaj realeco en la nacia demando kaj ĝia rilato al socialisma internaciismo. Ĉu do tie ĉi ni vidu jam la rektan kialon por la pereo de la Esperanto-movado en Soveta Unio? Tio estas dubinda, ĉar la Partio, kiel dirite, ne donis teorian precizigon de la stalinaj eldiroj pli konforman al la nuntempo nek, laŭ nia scio, la esperantistoj estis oficiale riproĉitaj, ke ili interpretis Stalin malĝuste kaj sekve kulpas pri deviado. Kontraŭe, la situacio fine de 1932 estis iom paradoksa: Ke Drezen turnis sin kontraŭ Marr, ne donis frukton; li vane, ĉar tro frue, klopodis trovi kompromison inter la teorio de tutmonda lingvo kaj la praktikaj prioritatoj en la transira periodo. Kaj la adeptoj de Marr, triumfante super Jazykfront, povis teni sian pozicion, kvankam ilia internaciisma sinteno ne estis akordigebla kun la komenciĝanta subpremo de la nerusaj popoloj.

Marr nelonge antaŭ sia morto en 1934 estis konfirmita kiel nekontestata papo de la soveta lingvistiko. Tio montras, ke la revoluciaj lingvistoj, malsame kiel la proletaj verkistoj kaj la maldekstraj pedagogoj, ne viktimiĝis en la stabiliga procezo post la kultura revolucio. Ke la jafetida teorio akiris superregon en la soveta lingvistiko en la sama tempo, kiam ekokazis la persekutoj de la reĝimo kontraŭ la „loka naciismo", certe prezentis paradokson, ĉar oni distordus la konceptojn de Marr, se oni konsiderus lin teoriisto kaj apologiisto de la subprema politiko, al kiu transiris Stalin spite de siaj deklaroj de 1930: Fakte, Marr forte oponis ĉian imperiismon, inkl. la rusan; la rolon de naciaj malplimultoj en la monda historio li emis kelkfoje eĉ troige pentri[1]; kaj, ne forgesende, li emfaze diris, ke la universala lingvo de la estonteco ne povos esti iu nacia lingvo, tiom malpli unu el la multe disvastigitaj mondlingvoj.[2] Daŭris preskaŭ du jardekojn, ĝis Stalin

1. Kp. Jindrich Kucera, „Soviet nationality policy. The linguistic controversy", *Problems of Communism* 3. 1954, n-ro 2, p. 27.
2. Marr, *Jafetičeskaja teorija* (germana traduko: Borbé, p. 89). – Marr, al kiu precipe Spiridovič riproĉis nekonsekvencan sintenon, konfirmis en

publike konfesis, ke la teorio de Marr ne taŭgas por la soveta nuntempo.

Se temas pri la esperantistoj, kiel tujan sekvon de la diskuto pri konstruo de marksisma lingvistiko ni unuavice povas noti ilian ekkomprenon, ke ne plu utilas partopreni en tiu diskuto, ke povus esti riske insisti pri „lingva revolucio". La esperantistoj komprenis, sur kia varmega tereno ili moviĝas, diskutante pri la formo kaj enhavo de estonta universala lingvo kaj proklamante rilate al la praktika, nuntempa politiko postulojn, per kiuj Esperanto estus metita en pozicion kontraŭan al la rusa. El la diskuto ne rezultis teoria pravigo de subpremo de Esperanto; valida restis teorio, kiu, kiam prezentita en 1930, ŝajnis disponigi al la esperantistoj pli favoran bazon por ilia agado ol iam antaŭe. Sed la politikaj realaĵoj malvastigis la eblecojn por la esperantistoj memstare interpreti tiun teorion kaj adapti ĝin al siaj celoj, tiel ke fine ili preferis eviti pluan diskutadon kaj la minacantan kunpuŝiĝon de utopio kaj realeco.

Longa kaj pena estis la vojo, kiun – sub la ŝarĝo de marksisma tradicio ne doninta lokon al neŭtrala, internacia lingvo – iris la sovetaj esperantistoj por elbatali por Esperanto teorian ekzistorajton. Post la „ŝveba stato" en la 20aj jaroj ili kredis en 1930, ke venis la trarompiĝo: Esperanto ŝajnis havi la ŝancon trovi lokon en la nove difinita komunisma utopio. Sed la esperantistoj estis seniluziigitaj, ĉar tre baldaŭ montriĝis, ke la Partio ne favoris spontanean alproksimiĝon al la utopio. Per tio ili praktike repuŝiĝis al la elirpunkto de siaj klopodoj: Necesis konformigi la Esperanto-movadon kun la postuloj de la nuntempo. Tamen, konservi agadon konforman al la cirkonstancoj en Soveta Unio post 1930 iĝis pli kaj pli malfacile.

1933 la seniluziiĝon de la esperantistoj konstatante, ke Esperanto estis starigita „de supre", sen konsidero de la materia bazo; cit. Jindrich Kucera, *Language policy in the Soviet Union*, doktora disertacio, Harvard-Universitato 1952, p. 334.

4.4. *KIALOJ DE LA PEREO DE ESPERANTO EN SOVETA UNIO*

4.4.1. *Kio okazis en 1937/38?*

Kio, do, okazis al la soveta Esperanto-movado en la jaroj 1937/38? En antaŭa ĉapitro ni jam priskribis la finon de SEU tiel, kiel ĝi prezentiĝis al SAT kaj la ekstersovetaj membroj de IPE. La tiutempaj revuoj, precipe *Sur Posteno*, liveris pri SEU bildon de malrapida, sed nehaltigebla degenero: Ĉiam malpli ofte aperis Esperantaj eldonaĵoj en Soveta Unio, rompiĝis la regulaj kontaktoj, kaj fine eĉ ne plu venis leteroj de individuaj esperantistoj. Poste dum preskaŭ dudek jaroj mankis kiuj ajn informoj pri Esperanta vivo en Soveta Unio.

El la lando mem ĝis hodiaŭ ne venis oficiala konfirmo, ke Esperanto estis subpremata, des malpli atingis nin deklaro, kiu klarigus la kaŭzojn de la mistera malapero de la soveta Esperanto-movado. Maksimume jen kaj jen troviĝas mencio, ke la movado „longe stagnadis", kaj pri la kialoj ankoraŭ lastatempe soveta esperantisto donis la jenan „klarigon":

> En la fino de la 30aj jaroj okazis malaktiviĝo de la movado. Tion kaŭzis unuavice la katastrofa malboniĝo de internaciaj rilatoj, kiu manifestiĝis en faŝismiĝo de Eŭropo, la dua mondmilito, kiun sekvis deko da jaroj de „malvarma" milito ktp.[1]

Kontribuoj de sovetaj kaj orienteŭropaj esperantistoj nur sporade donas imagon pri tio, ke la vero estis alia kaj pli terura, ol kredigas la simpliga aludo al eksteraj cirkonstancoj. Biografiaj skizoj abrupte ĉesas je difinita punkto.[2] La iama sekretario de la Urala Komitato de SEU rakontas, ke de 1938 ĝis 1957 li nenion legis kaj skribis en Esperanto.[3] Kaj ni ekscias sen pliaj detaloj pri la poeto Miĥal'skij, ke li „tragedie mortis" en 1937[4], aŭ pri alia poeto, Vladimir Sutkovoj, ankaŭ „tragike pereinta".[5]

---

1. Boris G. Kolker, „Landa movado nun sur nova nivelo", *esperanto* 72. 1979, p. 163.
2. Vd. la memor-artikolojn de W. Vildebrand pri Muravkin kaj Batta en *Der Esperantist* 4. 1968, n-ro 22/23 (jun.), p. 11; 5. 1969, n-ro 28/29 (feb./mar.), p. 10-11.
3. Jakov Vlasov, „Ĉe la luna lumo", *Bulgario* 1. 1964, n-ro 7, p. VII.
4. N. Ŝtejnberg, „Eugen Miĥalski", *Nuntempa Bulgario* 1968, n-ro 6, p. 45.
5. Aleksandro Logvin, *Sur la vivovojo. Poemoj*, La Laguna 1964, p. 56.

Kompreneble, jam frue cirkulis onidiroj pri arestiĝo de sovetaj esperantistoj. Lanti en oktobro 1936 specife menciis la kazon de la malnova bolŝeviko kaj radikala sennaciisto Maksim Krjukov, kiu estis malliberigita aŭ eĉ mortpafita, ĉar li „kuraĝis eldiri sian opinion".[1] Internacia Esperanto-Ligo komunikis en aprilo 1941, ke la soveta registaro en 1937 „malfondis ĉiujn memstarajn klerigajn asociojn, do ankaŭ la Esperanto-organizaĵojn"[2], sed meze de la milito tiu informo ne povis trovi atenton. Ivo Lapenna, estrarano de UEA, ankoraŭ en 1947 publike kontraŭdiris asertojn, ke en Ŝoveta Unio la Esperanto-movado estas malhelpata.[3] La nerefuteblan mankon de kontaktoj ĉeĥoslovaka esperantisto klopodis klarigi en 1949 per tio, ke la sovetaj esperantistoj pro sia konstrulaboro ne havas tempon por korespondado kun eksterlando.[4]

Kvankam la organo de francaj komunistaj esperantistoj jam en 1950 malkaŝis, ke SEU estis disigita de la registaro pro „interna sekureco"[5], nur en la poststalina, „degela" periodo pli da detaloj iĝis konataj. En 1956 la sveda esperantisto Erik Ekström eksciis dum vizito al Soveta Unio, ke „laŭleĝe" SEU „neniam estis nuligita", sed samtempe unuafoje alportis sciigon pri la sorto de Drezen: „Li estis arestita de la beria-banditoj[6] – kiel oni diris – kaj mortis en malliberejo."[7] Orienteŭropaj esperantistoj povis kompreni, pri kio temis, kiam en *Pola Esperantisto* ili legis pri la Esperanta poeto Georgij Deŝkin, ke en 1938 „li estis nevole forŝirita de la esperanta movado por 18 jaroj kaj loĝis en Siberio".[8] Iom post iom penetris, tra diversaj kanaloj, konster-

1. *Leteroj de E. Lanti*, p. 129.
2. „Bulteno de I.E.L.", *Esperanto Internacia* 5. 1941, p. 37.
3. Dum kongresa laborkunsido en Bern: *Esperanto* 40. 1947, p. 133.
4. Zdeněk Řezáč, en *La Esperantista Laboristo*, n.s. 1950, n-ro 19 (jan./feb.), p. 6.
5. Amo, „Konspirado de l' silento", *La Esperantista Laboristo*, n.s. 1950, n-ro 21 (majo/jun.), p. 6.
6. Aludo al Lavrentij Berija, kiu estris la sekretan policon dum 15 jaroj. En 1953, post la morto de Stalin, li estis eksigita kaj mortpafita.
7. Erik Ekström, „Kiel esperantisto-turisto en Sovet-Unio", *La Espero* 44. 1956, p. 115.
8. „Georgo Deŝkin", *Pola Esperantisto* 38. 1958, n-ro 1 (jan./feb.), p. 5. – Vd. ankaŭ: Georgo Deŝkin, „Aŭtobiografio", *Pola Esperantisto* 41. 1961, n-ro 1 (jan./feb.), p. 8 („... pro okazintaĵoj de 1938 j. ... pereis tuta mia esp-a havaĵo"). Simile, iama SAT-ano raportis, ke post 1936 li perdis

naj informoj pri la sorto de la soveta Esperanto-movado, multe pli terura, ol oni ĝis tiam estis imaginta. En 1965 la unua atestanto de la persekutoj sukcesis fuĝi al okcidento: la rusa aktoro Nikolaj Ryt'kov, konata per sia ludado de la rolo de Lenin. Intervjuo kun li kaj buŝaj informoj de sovetaj esperantistoj al okcidentaj vizitantoj helpas almenaŭ parte rekonstrui la trapason de la eventoj en la jaroj 1937/38.

Grave estas noti, ke la arestojn ne preparis rektaj atakoj kontraŭ Esperanto en la sovetaj amaskomunikiloj (kiuj, tamen, estis plenaj de informoj pri popolaj malamikoj, eksterlandaj spionoj kaj publikaj procesoj) kaj ke tial apenaŭ povis ekregi klara konscio, ke nur la kono kaj apliko de Esperanto jam estas danĝeraj. Male: Ĝuste meze de la 30aj jaroj la sovetaj esperantistoj, same kiel multaj ordinaraj homoj[1], sentis ioman reduktiĝon de la premo por „klasa atentemo" kompare kun la tempo de la Unua Kvinjarplano, kion eble plej trafe ilustras la menciita pledo de Evgenij Blinov, ke oni jam ĉesu deklinacii „ĉie kaj ĉiam la vortojn: kapitalismo kaj proletaro" kaj rekonsciiĝu la eblecon esprimi per Esperanto ankaŭ „amajn sentojn". Kvazaŭ komenciĝus paŭzo por spirado, la esperantistoj ne sen optimismo rigardis al pli trankvila periodo, en kiu sendepende de ideologiaj konsideroj estos rekonita la praktika utilo de Esperanto. Nehazarde, la ĉefa teoria kontribuo de SEU tiutempe estis la eldono de metodiko de la Esperanta instruado – verko, kiu aparte akcentis la propedeŭtikan valoron de Esperanto por la pli facila lernado de fremdaj lingvoj.[2]

Ankaŭ Drezen, verŝajne kun sento de malŝarĝiĝo, tute forlasis ekskursojn sur la kampon de marksisma teorio kaj de post 1932 koncentris sin al esploroj pri la internacia normigo de teknikaj terminoj. Li helpis popularigi en sia lando la pioniran verkon pri tiu temo, publikigitan en 1931 de la aŭstra terminologo Eugen Wüster, kiu – esperantisto de sia junaĝo – argumentis favore al

---

ĉiun esperantaĵon: Michel Potokin, „Letero el Siberio", *Sennaciulo* 28. 1957, n-ro 4, p. 3.

1. Kp. Leonhard Schapiro, *Die Geschichte der Kommunistischen Partei der Sowjetunion*, Frankfurt a.M. 1961, p. 428-429.
2. G.M. Filippov, *Metodika prepodavanija esperanto*, Moskva 1935.

vasta utiligo de Esperanto por la internacia lingvonormigo[1], kaj mem ankaŭ verkis programecan libron pri la normigo de scienc-teknikaj terminoj.[2] Kiel prezidanto de la terminologia fako de la Normiga Komitato de USSR, Drezen ellaboris projekton pri la starigo de internacia terminologia kodo bazita sur la ĉefaj principoj de Esperanto. Tiun raporton[3] la Normiga Komitato prezentis en septembro 1934 al la konferenco de Internacia Federacio de naciaj Normig-Asocioj (ISA) en Stokholmo, kiu ĝin unuanime aceptis, komisiante al la soveta komitato daŭrigi la esplorojn. En la posta jaro eldoniĝis rusa traduko de la verko de Wüster[4], kaj sur la sovetaj normfolioj pri elektrotekniko kaj metrologio komencis aperi subtitoloj en Esperanto.

La komuna interesiĝo, ke Esperanto havu lokon en la diskutoj pri internacia lingva normigo, ekde 1934 ankaŭ proksimigis la rilatojn inter Drezen kaj la neŭtrala movado.[5] Fakte, dum IPE nomis aŭgurojn pri aliĝo de SEU al UEA trompaj, Drezen jam regule korespondis kun gvidantoj de UEA.[6] Li ne volis, ke la

1. Eugen Wüster, *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik. Die nationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung*, Berlin 1931 (3a eld. Bonn 1970). – E. Drezen, „Normigo de la teknika lingvo dum kapitalismo kaj socialismo", *La Nova Etapo* 1. 1932, p. 161-168 (recenzo pri la verko de Wüster).
2. E.K. Drezen, *Standartizacija naučno-tehničeskih ponjatij, oboznačenij i terminov* (Normigo de scienc-teknikaj konceptoj, simboloj kaj terminoj). 2a eld., Moskva, Leningrad 1934. – Esperanta traduko de la fina ĉapitro, „Perspektivoj en la kampo de internacia normigo de scienc-teknikaj terminoj kaj simboloj", kun antaŭrimarko de Wüster, en *Lingva Kritiko* (aldono al *Heroldo de Esperanto*) 1. 1934, n-ro 25 (jun.), p. 1-2; n-ro 26 (okt.), p. 1-2; ankaŭ en *Sur Posteno* 1934, p. 83-87.
3. De la raporto aperis Esperanta traduko: E. Drezen, *Pri problemo de internaciigo de science-teknika terminaro. Historio, nuna stato kaj perspektivoj*, Moskvo, Amsterdam 1935 (represo Saarbrücken 1983).
4. Eugen Wüster, *Mežunarodnaja standartizacija jazyka v tehnike*, Moskva 1935. La verko de Wüster aperis ankaŭ en mallongigita Esperanta traduko: *Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko*, Budapest 1936 (represo Åbyhøj 1975). – En germanlingva artikolo publikigita en 1973 Wüster mallonge traktas siajn rilatojn kun Drezen: „Normigaj kaj vortaraj principoj", en: Eugen Wüster, *Esperantologiaj studoj*. Memorkolekto editorita de Reinhard Haupenthal, Antverpeno, La Laguna 1978, p. 247, 252.
5. Marcel Delcourt, Jean Amouroux, „Wüster kaj Drezen", *esperanto* 71. 1978, p. 197-198.
6. Interalie li korespondis kun Robert Kreuz, la direktoro de UEA, kaj kun la prezidanto de la Akademio de Esperanto, Théophile Cart, estante membro de la Lingva Komitato ekde 1929.

rilatoj iĝu publikaj, sed klare komprenigis sian deziron trakti kun la neŭtrala movado pri „multaj problemoj", ankaŭ ekster la temo de terminologio. La 15an de marto 1936 li skribis „persone" al la prezidanto de UEA, generalo Bastien, por peti „iujn sugestojn utilajn por nia komuna laboro":

> En nia lando supozeble proksimtempe revigliĝos laboro de SEU sur supozeble iom nova bazo. Interalie verŝajne estos ebla nia aliĝo al UEA. SEU ... akceptos eniron en UEA sub kelkaj formalaj deklaroj pri neceso propagandi kaj uzi Esperanton, utiligi ĝin kulturcele kaj defendi kontraŭ la nacia ŝovinista reakcio. Neniujn aliajn specialajn politikajn postulojn – SEU starigos. Krampe dirate ni certe ne povus tion fari, se en UEA (kiel siatempe en „Heroldo") montriĝus iuj tendencoj propagandi aŭ defendi la aŭtokratajn faŝismajn reĝimojn. Vi vidas, ke mi skribas tute malkaŝe (kvankam por komuna utilo – konfidencie) por ke vi povu doni al mi viajn konsilojn kaj opiniojn.

Responde, Bastien atentigis Drezen, per letero de la 30a de marto, pri artikolo 4 de la Statuto de UEA: „UEA estas neŭtrala rilate al religio, nacieco, politiko kaj sociaj demandoj." La publikigon de deklaroj „kontraŭ la nacia ŝovinista reakcio" flanke de UEA Bastien rifuzis. La artikolojn en *Heroldo* li nomis „truditaj kvazaŭdevigaj": „... mi mem, kiu ne aprobis ilin, ne kuraĝus mallaŭdi la eldoniston. Esperantistoj vivas en ĉiuj landoj, havas ĉiuspecajn opiniojn; sed, kiam ili agas esperantiste, ili ĉiuj estas nur esperantistoj." Bastien donis al Drezen ja la esperon, ke eble UEA povus fari kun SEU interkonsenton pri komuna agado, sed apenaŭ tiun, ke SEU povus esti akceptita kiel Asocia Membro. Sendube memorante la antaŭan, tiom agitecan karakteron de la agado de SEU, Bastien esprimis la malfidan opinion, „ke viaj membroj ne akceptas esti membroj de Asocio, kiu enskribis en sian statuton plenan neŭtralecon".

Post kiam Bastien estis komisiita de la estraro de UEA daŭrigi la intertraktadon kun Drezen[1], li petis, la 30an de aprilo, ke SEU precizigu, kion ĝi komprenas sub „nacia ŝovinista reakcio" kaj ĉu temos nur pri deklaro de la flanko de SEU. Li konfirmis, ke UEA rifuzas fari tian deklaron, sed pretas „kunlabori pri problemoj, kie komuna agado povas esti utila, kondiĉe ke ni konservu nian neŭtralecon". La respondo de Drezen je la du leteroj de Bastien

1. Protokolo de la Paska Kunveno de la Estraro de UEA en la Centra Oficejo. Ĝenevo, 11-12 aprilo 1936. Tajpita kopio (en la arkivo de UEA), p. 8.

konsistigis nur mallongan poŝtkarton, de la 8a de majo, kies enhavo tamen ŝajnis tute esperiga. Drezen skribis:

> Mi bone notas ĉiujn viajn konsiderojn. Reciproka informado kaj certa kunagado estas utila. Kiel sidejo de UEA – London estas certe bona.[1] Mi ne povas dume komuniki al vi iujn oficialajn konsiderojn rilate la kunagadon de UEA kaj SEU. Tamen tuj post solvo de kelkaj fundamentaj problemoj koncernantaj esp. laboron de SEU – ankaŭ tiu problemo estos oficiale starigota. Persone mi opinias, ke la kruda vivo mem kondukos la esperantistaron al neceso – plipreciziĝi siajn celojn kaj agadon. Espereble dum unu el la proksimaj Esp-kongresoj ni povos pridiskuti tiun temon.[2]

Konservante sian optimismon pri kreo de „nova bazo" por SEU, Drezen restis ankaŭ okupita per siaj diversaj organizaj kaj esploraj laboroj. Ekzemple, kun Wüster li vigle korespondis, precipe en ligo kun speciala komisiono por la ellaboro de terminologiaj kaj leksikografiaj principoj („ISA 37"), starigita de ISA en 1936 laŭ propono de la Soveta Normiga Komitato. La 28an de januaro 1937 Wüster demandis al Drezen, ĉu Soveta Unio estos reprezentita en konferenco de la komisiono, antaŭvidita por junio en Parizo, kaj krome gratulis lin „pro tio, ke oni komisiis al vi la ĉefan redaktadon de la plurlingvaj teknikaj vortaroj".

Ĉirkaŭ tiu tempo la aferecan kunlaboron ĝenis mencio de la nomo Wüster en ligo kun politika proceso en Moskvo; akuzito konfesis, ke dum vojaĝo en Germanio li estis dungita de iu inĝeniero Wüster por spiona agado.[3] Vidinte raporton pri tio en la organo de UEA, kiu levis la demandon, ĉu temas pri la aŭstra terminologo, Drezen petis al sia korespondanto, ke li respondu al la demando.[4] Tion Wüster faris per deklaro, de la 22a de marto 1937, en kiu li neis identecon kun la menciita persono[5]; samtage li sendis al Drezen kopion de sia deklaro. La antaŭa letero de Drezen al Wüster portis la daton de la 9a de marto.[6] Ĝi estis la lasta:

1. Komence de 1936 la Komitato de UEA decidis transloki la Centran Oficejon de Ĝenevo al Londono, pro financaj konsideroj.
2. S-ro Jean Amouroux dankinde disponigis al mi, el kolekto de korespondaĵoj de generalo Bastien, kopiojn de la leteroj de Bastien kaj Drezen. Retajpaĵo de la poŝtkarto de Drezen de 8-5-1936 estas en la arkivo de UEA.
3. *Neue Zürcher Zeitung*, 27-1-1937, laŭ *Esperanto* 33. 1937, p. 12.
4. Persona komuniko de Eugen Wüster, de 20-2-1969.
5. „Ĝustigo de D-ro Wüster pri ‚spion-agado'", *Esperanto* 33. 1937, p. 28.
6. Wüster, kiu afable donis detalojn pri sia korespondo kun Drezen, ne povis retrovi ties leteron de la 9a de marto 1937, sed tre kredeble ĝi enhavis la peton al Wüster pri ĝustiga deklaro.

Je siaj leteroj de la 22a de marto, 27a de marto, 22a de aprilo, 22a de majo kaj postaj Wüster ne plu ricevis respondon de sia soveta kolego.

Kredeble jam en marto 1937 aŭ iom poste Drezen estis arestita.[1] Ni ne scias, ĉu la konfuzo pri la identeco de Wüster ludis rolon, kaj oni ankaŭ povas demandi, ĉu la malliberigo de Drezen estis farita unuavice pro lia gvida pozicio en la Esperanto-movado: Kiel neruso, iama carisma oficiro kaj frutempa aktivulo en la Ruĝa Armeo, universitata profesoro, estrarano de Tutsoveta Societo por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando (VOKS), kunfondinto de Jazykfront kaj, nelaste, kiel homo ofte vojaĝinta eksterlanden, li liveris tutan bukedon da kialoj por suspektiĝo kiel „spiono". Sed – kiel ni klopodos montri sube – ne estas dubo, ke la aŭtoritatoj faris, kredeble antaŭ la aresto de Drezen, principan decidon pri SEU – kaj ke tiu decido signifis verdikton pri perforta silentigo de la Esperanto-movado en Soveta-Unio.

La verdikto komencis esti plenumata, kiam startis la Granda Purigo de 1937/38. Post la arestiĝo de Buĥarin kaj Rykov en januaro aŭ februaro 1937, la Centra Komitato, kunsidanta de la 23a de februaro ĝis la 5a da marto, faris la vojon libera por eklanĉo de la ofensivo de Stalin kontraŭ ĉiuj veraj kaj supozataj opoziciuloj, kaj jam en junio la terurita popolo eksciis, ke marŝalo Tuĥaĉevskij kaj aliaj gvidantoj de la Ruĝa Armeo estis mortpafitaj.

Ke decido enmetanta SEU en la vicon de ekstermotaj malamikoj ne estis publikigita – ke regis necerteco, ĉu Esperanto restas tolerata kiel nura ŝatokupo, tute konformis al la taktiko de la sekreta polico. La purigoj dankis sian efikon ĝuste al la fakto, ke ili grandparte pasis sen akompana bruo – ke la individuoj ne estis avertitaj kaj ne povis scii antaŭe, ĉu la sorto, kiu trafis najbaron, trafos ankaŭ ilin. Tial SEU estis senvivigita malrapide – per la iom-post-ioma malaperigo de siaj funkciuloj. Post Drezen sekvis aliaj membroj de la Centra Komitato de SEU: Demidjuk, iam amiko de Lanti, sed dum kaj post la skismo lojala defendanto de

1. Utilas noti tie ĉi, ke en marto 1937 estis ankaŭ arestita la lingvisto E.D. Polivanov, konata kiel kritikinto de la teorio de Marr. Li mortis en januaro 1938 kaj estis rehonorigita nur en 1973.

Drezen kontraŭ la atakoj de SAT; Nikolaj Incertov, kiu precipe aktivis por la disvastigo de Esperanto en la kontraŭreligia movado; Nikol'skij, redaktoro de *Meĵdunarodnyj jazyk* kaj unu el la plej revoluciemaj aktivuloj de SEU, kiu iam substrekis la internacian, laborist-unuigan karakteron de la Ruĝa Armeo per la klarigo, ke ĝiaj „pafceloj estas burĝulaj ventraĉoj".[1] Malliberigitaj estis ankaŭ la estro de la ekspedejo de SEU, Petr Gavrilov, kune kun siaj teknikaj helpantoj, kaj eĉ la desegnisto Evgenij Gurov, kiu en 1932 projektis glumarkon kun la teksto „Subtenu la eldonon de Lenin-verkaro en Esperanto".[2] Same, ne eskapis la arestadon eksterlandaj esperantistoj elmigrintaj al Soveta Unio. La hungaroj Sándor Szatmári, frutempa membro de la CK de SEU, József Batta[3], ĝis la nazia potencpreno redaktoro de la IPE-organo *Internaciisto* en Berlino, kaj Ferenc Robicsek, filo de la vic-popolkomisaro pri poŝto en la Hungara Konsilantara Respubliko de 1919[4], estas la plej konataj; el ili nur Szatmári transvivis. Germana esperantisto, Friedrich Köhncke, translogĝinta al Soveta Unio en 1931 pro senlaboreco, estis en 1937 arestita kiel spiono kaj post sepmonata turmentoplena mallibereco ekstradiciita al – Gestapo.[5]

De la plej multaj esperantistoj, kiujn trafis malliberigo, mankas detaloj pri ilia fina sorto. Drezen estis, laŭ Ryt'kov, mortpa-

1. R. Nikolskij, „Esperanta movado en la ruĝa armeo", *Sennaciulo* 2. 1925/26, n-ro 29 (81), p. 6. – La ruĝarmeano Nikol'skij poste proponis, ke SAT starigu militistan sekcion; tio ne sukcesis pro la kontraŭstaro de Lanti.
2. *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 64.
3. Li estis arestita en 1937. Lia edzino poste eksciis de Demidjuk, ke li estis kondamnita al morto. Ŝi mem pasigis ok jarojn en koncentrejo ĝis 1946. (Letero de Margareta Batta, Budapeŝto, de 1-8-1982, en *Internaciisto*, n.s. 8. 1982, n-ro 9/10, p. 2.)
4. Pál Robicsek, la patro, mortis pro akcidento en 1931.
5. Leteroj al Kurisu Kei, de 29-9-1955 kaj 28-10-1955, publikigitaj en *Nia Korespondo*. Organo de Esperanto-Koresponda Studrondo (Tokio) 1955, n-ro 4 (okt.), p. 5-8, 12; 1956, n-ro 6 (feb.), p. 9-12. – En la organo de SEU Köhncke estis admoninta eksterlandajn kamaradojn dezirantajn labori en Soveta Unio, ke ili havu komprenemon por la „malfacilaj kondiĉoj" kaj ne venu kun la atendo je „jam tutplene realigita socialisma paradizo": *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 40-41. – En letero de 21-6-1973 Köhncke skribis al la aŭtoro: „Kiam mi lernis Esperanton (1925), ĝi estis parto de mia komunista mondkoncepto, mian politikan idealismon mi intertempe perdis, do mi eĉ ne povas diri pro kio esti esperantisto." Li mortis en Hamburgo la 2an de majo 1974.

Supre: Varba glumarko por Esperanta eldono de la verkoj de Lenin. La traduko neniam aperis. Apude, la aktoro Nikolaj Ryt'kov — ĉi tie en la rolo de Lenin — pro Esperanto suferis preskaŭ 18-jaran malliberecon. *Maldekstre:* Muntaĵo el Leningrado (1936): En la soveta gazetaro regule aperis tradukoj el Esperantaj leteroj, skribitaj de eksterlandanoj. *Sube:* Ekde septembro 1929 aperis gazetara servo.

fita jam en 1937; laŭ aliaj informoj, li pereis en mortotendaro. La ĵurnalisto Nikolaj Nekrasov, riĉiginta la literaturon de Esperanto, ankaŭ li komence amiko, poste kontraŭbatalanto de Lanti, pereis en 1939 en siberia punlaborejo.[1] Samjare mortis „post longa nekuracebla malsano"[2], nur 35jara, Viktor Kolĉinskij, kiu en 1936 estis kuraĝe protestinta kontraŭ malrapidigo de la soveta Esperanto-movado. En iu ekstermejo malaperis ankaŭ Vladimir Varankin, aŭtoro de *Teorio de Esperanto* (1929) kaj de la originala romano *Metropoliteno* (1933), kiu en 1926 estis helpinta lanĉi la utiligon de Esperanto en la internacia laborista korespondado. La ukraina verkisto Volodymyr Kuzmyĉ, kiu verkis ankaŭ esperantlingve, mortis en mallibereco en Alma-Ata en oktobro 1943.[3] Sed pri la plej multaj konataj esperantistoj, al kiuj apartenas ekzemple Spiridoviĉ, mankas informo, kio okazis al ili.

La malliberigo de la gvidantoj trenis post si ĉiam pli multajn viktimojn: ne nur funkciulojn sur loka nivelo, sed fine ankaŭ la grandegan nombron de ordinaraj membroj. Semen Podkaminer, kunorganizinto de la SAT-kongreso en Leningrado, kiu eskapis arestiĝon, sed estis elpelita el la Partio, memoras: „El la leningradaj esperantistoj estis en 1937 arestitaj 14 gravuloj, kaj ni sidis hejme tremante, atendante nian vicon."[4] Kvankam tiu ĉi atesto aludas pri disvastiĝanta timo, ĝis la lasta momento troviĝis esperantistoj, kiuj, plene fidante la justecon de la reĝimo, naive plu praktikadis la lingvon, korespondis kun eksterlandaj amikoj aŭ, kiel faris Ryt'kov ankoraŭ fine de 1937, akceptis en sia hejmo gaston el kapitalisma lando. Ryt'kov raportas, ke, kiam Drezen kaj la IPE-respondeculo Muravkin estis arestitaj, multaj subpremis sentojn de maltrankviliĝo, konsciigante al si, ke la latvo Drezen parolis la rusan lingvon kun fremda akcento kaj ke Muravkin longe studis en Germanio[5] kaj portis iom tro kvalitajn vestojn –

1. Okaze de la 50jara jubileo de Esperanto, ĝuste en 1937, Nekrasov rigardis „tre optimiste" al la sekvantaj kvin jardekoj, dum kiuj malgraŭ la persekutoj fare de „reakciaj fortoj" Esperanto fine helpos venkigi la ideon pri „interhoma frateco": V. Bleier, E. Cense (red.), *Ora Libro de la Esperanto-movado, 1887-1937*, Warszawa 1937, p. 213-214.
2. S. Ŝtejn, „Viktor Kolĉinski", *Paco* 24. 1977, n-ro 2, p. 11.
3. *Who was who in the USSR*, Metuchen, N.J. 1972, p. 332.
4. Buŝa informo; laŭ komuniko de Eduard Borsboom, de 15-7-1973.
5. Muravkin akiris en Berlino doktorecon pri fiziko.

konkludante do, ke ili eble fakte havis rilatojn kun „kontraŭsovetaj elementoj". Nur kiam Gavrilov kaj Robicsek, liaj intimaj amikoj, estis arestitaj, Ryt'kov „komprenis, ke okazas io maljusta", sed eĉ tiam li ne ĉesis okupiĝi pri Esperanto.

Kortuŝaj dokumentoj pri la nezorgemo de la ordinaraj sovetaj esperantistoj troviĝas en la revuo *Sur Posteno* de februaro 1938, kiam ankoraŭ daŭris la plej terora fazo de la Purigoj. La redakcio (tiam en Parizo) publikigis leterojn de sovetaj legantoj, petitaj esprimi sian opinion pri la gazeto. J. Mironov el Leningrado eldiris deziron, kiu, laŭ la redakcio, ofte venis el Soveta Unio: „... presigu pli multe da diversaj enigmoj k problemoj." Alia leningradano petis, ke la solvojn de enigmoj oni aperigu ne en la sekvanta, sed en la postsekvanta numero, ĉar tra la adreso de SEU li ricevas la revuon ĉiam malfrue. Ankaŭ de Ryt'kov venis reago: Li kritikis, ke „la ŝaradoj, kiuj aperis en n-o 54 estas tro facilaj k sekve seninteresaj".[1]

La giganta aresta maŝino silente, sed nehaltigeble englutis ankaŭ la simplajn esperantistojn. Eĉ tiam ili ne tuj konsciis, kio terura ilin atendas. Kiam Ryt'kov estis arestita en la nokto de la 21a/22a de marto 1938 – la sekretaj policanoj konfiskis ankaŭ kofron kun liaj leteroj ricevitaj el eksterlando –, li serioze kredis, ke oni venigas lin al Lubjanka pro traduklaboroj. La veran kialon li eksciis post alveno en tiun fifaman turmentejon de Moskvo. Kiel ĉiu arestita esperantisto li aŭdis la jenan stereotipan akuzon: „Vi estas aktiva membro de internacia spiona organizaĵo, kiu sin kaŝis sur la teritorio de USR sub la nomo de Sovetrespublikara Esperantista Unio."

Dum la pridemandado oni montris al Ryt'kov la protokolon de unu el liaj sortofratoj. Li rekonis la subskribon de Roman Nikol'skij, kiu, en 1926 en Smolensk, estis lia instruisto de Esperanto. Laŭ la protokolo, Nikol'skij konfesis, ke li planis mortpafi Stalin dum akcepto en Kremlo. De aliaj, jam kondamnitaj esperantistoj Ryt'kov vidis atestojn, en kiuj li mem estis nomita – kiel membro de la spiona organizaĵo SEU. Hazarde, en koridoro li

1. „Sovetiaj k-doj pri SP", *Sur Posteno* 1938, n-ro 59 (feb.), p. 6. – Ryt'kov krome esprimis sian admiron pro aperinta rakonteto, „Fidela hundo", kaj anoncis: „Baldaŭ mi recitados ĝin."

renkontis sian amikon Gavrilov, kiu, jam rompiĝinte pro la torturoj, flustris (en Esperanto): „Pardonu min, mi denuncis vin, vi povas same fari kontraŭ mi. Almenaŭ vi tiam ne multe suferos. En ĉiu okazo ni ĉiuj estos senditaj al koncentrejo."[1] Ryt'kov ne tiris iun post si, rifuzante denunci esperantistan amikon, sed nun komencis kompreni, ke li ne povas elsaviĝi. Post kvar monatoj, en somero 1938, Ryt'kov estis transportita per vagonaro al Vladivostok, kie li revidis la glumark-desegniston Gurov. Ilia komuna restadejo iĝis la teritorio Kolyma, la plej terura loko en la ekstrema nordoriento de Soveta Unio.

La plua sorto de Ryt'kov ne estas tie ĉi detaligenda[2]; ĝi similas la golgoton, kiun devis trairi, kaj plej ofte ne transvivis, multnombraj aliaj viktimoj de la stalina teroro. Kiel Ryt'kov, miloj da membroj de SEU, inter ili ankaŭ homoj, kiuj pro antaŭtimo jam estis ĉesintaj aktivi por Esperanto, suferis multjaran pezan punlaboron en siberiaj koncentrejoj. La preciza nombro verŝajne neniam estos konata: Laŭ Ryt'kov, 30 000 sovetaj esperantistoj estis arestitaj, el kiuj kelkdeko estis mortpafita; miloj mortis poste, kaj nur tre malmultaj revenis.[3]

Nur 24jara, kiam li estis arestita, Ryt'kov liberiĝis en novembro 1955. Li aŭdis, ke li estis senkulpe malliberigita kaj ke li bonvole pardonu tion; kiel kompenson li ricevis dumonatan salajron kaj senpagan restadon en kaŭkaza sanatorio. Ĉirkaŭ la sama tempo liberiĝis ankaŭ Demidjuk[4]; alia gravulo, kiu trans-

1. Laŭ Ryt'kov, Gavrilov estis liberigita dum la milito por iri al la fronto, sed mortis pro stomak-malsano.
2. Ĝis 1943 Ryt'kov laboris kiel orfosisto. Poste, memorante lian aktoran profesion, oni donis al li la taskon partopreni distrajn programojn en diversaj koncentrejoj de norda Kolyma. Ekde 1946 li ne plu estis koncentrejano, sed anstataŭe ricevis „poreternan ekzilon" en Norilsk, urbo trans la polusa cirklo; tie li, en 1949, komencis denove aktori, „en la plej norda teatro de la mondo". – Dum la pli ol 17jara malliberecо la ligoj al Esperanto ne tute rompiĝis: En sia ekzila loko Ryt'kov foje malkovris en iu subtegmentejo ekzempleron de *Fundamenta Krestomatio* de Zamenhof – meze inter anatemitaj libroj de Trockij kaj Buĥarin.
3. Laŭ takso de komunistaj esperantistoj en GDR, entute pereis 2000.
4. Pri li vd. Detlev Blanke, „Renkontiĝo kun Grigorij Demidjuk", *Der Esperantist* 20. 1984, p. 5-7. – Demidjuk mortis, 90jara, en novembro 1985.

vivis ĉ. 18 jarojn da punlaboro, estis Pavel Ŝumilov.[1] Ryt'kov baldaŭ reprenis sian aktivadon por Esperanto (kaj la aktoran profesion) kun la sama entuziasmo, kiun li havis ĝis la nokto de sia arestiĝo.[2] En la Esperanto-klubo de Moskvo li regule renkontis esperantiston, de kiu li, Ryt'kov, estis siatempe denuncita, tamen ne montrante al li tiun sian scion. Iom post iom reaperis aliaj homoj, kiuj dum du jardekoj aŭ eĉ pli longe estis forŝiritaj de la Esperanto-movado, sed nun komencis reaktivi. Al ili apartenis la ukraino Aleksandr Logvin: En liaj poemoj ĝis 1934 konantoj rimarkis multpromesan talenton; dudek kvin jarojn poste Logvin revenis al la Esperanta literaturo, profitante la antaŭzorgon de sia patro, kiu „dum la tempo malfavora por Esperanto" estis kaŝinta la junaĝajn poemojn de sia filo en abelujo.[3]

Post jaroj da sufero aŭ timo, ne ĉiuj tuj fidis la degelan veteron: Kiam eksterlandanoj malkovris en 1961 la esperantistecon de Stepan Titov, patro de la kosmonaŭto German Titov, kaj la Universala Kongreso, kiu tiujare okazis en la angla urbo Harrogate, sendis al li gratul-telegramon pro la sukceso de lia filo, Titov komence estis grave ŝokita. Nur iom post iom li konvinkiĝis, ke fine ĉesis la periodo, kiam oni persekutas homojn pro la scio kaj uzo de Esperanto.

---

1. Ŝumilov finis en 1920 kiel komandanto servadon en la Ruĝa Armeo. Poste li estis ministeria funkciulo; la soveta registaro honoris lin per la ordeno „Ruĝa Stelo". Li mortis en 1972. La nekrologo aludis liajn longajn suferojn jene: „Dum sia tuta vivo li restis fidela al la lingvo internacia kaj la proleta internaciismo tra ĉiuj tempestoj kaj neĝblovaj ventegoj de nia malkvieta epoko." Vd. N. Sulje, „Veterano forpasis", *Paco* 20. 1973, n-ro 1 (ĉeĥoslovaka eldono), p. 12.
2. Ekde 1956 Ryt'kov reaktoris en la Teatro Lenin-Komsomol kaj rolis en sovetaj filmoj, radio kaj televido En 1965, veninte al Eŭropa Esperanto-Konferenco en Vieno, li decidis resti en okcidento. Poste li, kiel antaŭe en Moskvo, ludis la rolon de Lenin en okcidentgermana televido kaj en brita teatraĵo. Dum Universalaj Kongresoj li deklamis i.a. el la verkoj de Solĵenicyn. En siaj lastaj jaroj li laboris en la rusa sekcio de BBC. Li mortis en Londono la 1an de septembro 1973 pro stomaka kancero.
3. Ferenc Szilágyi, „Renkonto sur la vivovojo", en: Aleksandro Logvin, *Sur la vivovojo. Poemoj*, La Laguna 1964, p. 11. – Logvin, antaŭ la milito konata sub la pseŭdonimo Liljer, jam en 1930/31 pro politikaj kaŭzoj estis ekzilita al Arĥangelsk, de kie li revenis malsana (EdE, p. 340). Li inklinis al anarkiismo kaj ankoraŭ en 1933 publike deklaris sian ligiĝon al SAT kaj la sennaciismo (*Sennacieca Revuo*, n.s. 1. 1933/34, p. 145).

4.4.2. *Esperantistoj en la Granda Purigo*

La esperantistoj kompreneble ne havis la kalibron de malnovaj bolŝevikoj aŭ ruĝarmeaj altranguloj. Ili apartenis, laŭ la formulo de Solĵenicyn, al la „modestaj, persistaj riveretoj", kiuj preskaŭ perdiĝis „sub la superbordiĝantaj torentoj" de homoj fluantaj en la stalinajn koncentrejojn.[1] Oni ne faris bruon pri la sovetaj esperantistoj, kiuj, kiel ni vidis, ĝislaste ne suspektis, ke prepariĝas detrua atako. Sed hodiaŭ ni scias, ke ili ne simple malaperis, kvazaŭ sennome, kune kun milionoj da viktimoj de la teroro, sed ke la reĝimo eksplicite kaj laŭplane destinis ilin al elimino. Restas fari la provon rekonstrui la manieron, laŭ kiu la persekutado de la esperantistoj estis organizita.

La Granda Purigo, vastskale lanĉita en marto 1937, ne nur celis la likvidon de malnovaj bolŝevikoj, kiujn Stalin rigardis kiel obstaklon kontraŭ sia strebo al persona diktaturo, sed volis per amasa arestado kaj deportado komplete renversi la sovetan socion. Tiucele speciala departemento de NKVD[2] havis listojn, en kiuj suspektindaj personoj estis grupigitaj laŭ jenaj kategorioj:

AS = kontraŭsovetaj elementoj
Ts = aktivaj membroj de eklezio
S = membroj de religia sekto
P = ribeluloj – t.e. ĉiu, kiu en la pasinteco estis iel entirita en kontraŭsovetan agadon
SI = civitanoj kun kontaktoj al eksterlando[3]

Ke en tiu lasta kategorio troviĝis la esperantistoj, supozigas informo donita de la aŭstra komunisto Alex Weissberg, kiu, laborante en Soveta Unio kiel fizikisto, estis arestita en marto 1937:

> Estis Stalin mem, kiu donis al Eĵov [la estro de NKVD] siajn instrukciojn por la Granda Purigo. Estis Stalin mem, kiu indikis la grupojn, kiujn necesas detrui:

1. Alexander Solschenizyn, *Der Archipel GULAG* I, Reinbek 1978, p. 64; estas tie menciita ankaŭ la fakto, ke Stalin persekutis la esperantistojn en la sama tempo kiel Hitler. Aliloke (vol. 2, p. 82), Solĵenicyn citas oficialan fonton, laŭ kiu jam en 1933 esperantistoj apartenis al la laborfortoj por konstruo de la Blankmara-Baltikmara Kanalo je la nomo de Stalin.
2. La sekreta polico nomiĝis de 1917 ĝis 1922 Ĉeka, poste GPU kaj OGPU. Ekde 1934 pri la ŝtata sekureco respondecis la Popolkomisarejo pri Internaj Aferoj (NKVD).
3. Robert Conquest, *The Great Terror. Stalin's purge of the thirties*, Toronto 1968, p. 283.

(5) Ĉiuj, kiuj vivis en eksterlando kaj konas proprasperte la antaŭmilitan periodon, kaj ĉiuj, kiuj havas amikojn kaj parencojn en eksterlando kaj korespondas kun ili; la poŝtmark-kolektantoj kaj la esperantistoj.
...[1]

Weissberg ne indikis sian fonton, sed tre simila kategoriigo aperas en la solaj dokumentoj de NKVD, kiujn ni disponas. Temas pri dokumentoj, kiuj estis kaptitaj de germanaj trupoj dum la okupo de Litovio kaj poste falis en la manojn de usonanoj. Ili estas sekretaj instrukcioj eldonitaj en ligo kun la perforta aparteno de la baltaj ŝtatoj al USSR en 1939.

Plenumante ordonon n-ro 001223 de NVKD de USSR de la 11a de oktobro 1939, la Popolkomisaro pri Internaj Aferoj de Litova SSR, Guzevičius, postulis per „strikte sekreta" ordono n-ro 0054 de la 28a de novembro 1940, ke estu registritaj – pro la „granda infektiĝo" de Litovio per ili – ĉiuj „kontraŭsovetaj kaj socie fremdaj elementoj". Li indikis entute 14 kategoriojn, interalie:

j) Personoj, kiuj havas personajn kontaktojn kaj korespondadon kun eksterlando, kun eksterlandaj legacioj kaj konsulejoj, esperantistoj kaj filatelistoj.[2]

Tiu registrado devis esti finita sur provinca nivelo ĝis la 10a de februaro 1941, kiel vidiĝis el instrukcio de la NKVD-ĉefo en Biržai de la 30a de januaro, cetere relistiganta la diversajn kategoriojn.[3]

Tre baldaŭ sekvis la ŝtupo de arestoj surbaze de la preparitaj listoj. La taskon forigi la „kontraŭsovetajn elementojn" el la baltaj respublikoj al malproksimaj regionoj de Soveta Unio havis la vicĉefo de la soveta NKVD, Ivan Serov. La deportado komenciĝis la 6an de junio 1941, atingis sian kulminon en la nokto inter la 13a kaj 14a de junio kaj tiam estis interrompita pro la germana invado la 22an de junio. La nazioj daŭrigis la laboron laŭ sia

1. Alexander Weissberg-Cybulski, *Hexensabbat*, Frankfurt/M. 1977, p. 378 (angla traduko: *Conspiracy of silence*, London 1952, p. 504). – Estas listigitaj entute 16 kategorioj.
2. *Lithuanian Bulletin* (New York) 7. 1949, n-ro 7/12, p. 18. – Vd. ankaŭ Arthur Koestler, *Der Yogi und der Kommissar. Auseinandersetzungen*, Frankfurt/M. 1974, p. 223; Seppo Myllyniemi, *Die baltische Krise 1938-1941*, Stuttgart 1979, p. 143.
3. *Lithuanian Bulletin* 7. 1949, n-ro 7/12, p. 19.

maniero. Inter la esperantistoj, kiujn ili mortigis, estis la verkistino Helmi Dresen, kiu post la sovetigo de Estonio iĝis urbestraranino de Tallinn, kaj la ministro pri sociaj aferoj de Estona SSR, Neeme Ruus.[1]

Sed tiuj viktimoj de la nazioj estis spertintaj la finon de organizita Esperanto-movado jam antaŭ la germana invado. En novembro 1940 la sveda Esperanto-gazeto *La Espero* estis raportinta la bonan novaĵon, ke en la sovet-estona parlamento 15% de la deputitoj estas esperantistoj kaj ke simpatianto de Esperanto, la verkisto J.J. Vares-Barbarus, iĝis nova ĉefministro[2]; krome, oni eksciis, ke la nova trafikministro de Litovio, Jonas Masiliunas, estas esperantisto.[3] Nur kelkajn monatojn poste, tamen, en aprilo 1941 (kiam NKVD devis esti jam fininta sian registradon en Litovio kaj, supozeble, ankaŭ en Latvio kaj Estonio), *La Espero* sciigis, ke ĉesis aperi la estona Esperanto-revuo.[4] Kaj ankaŭ el atesto de Rein Kapper, eksprezidanto de Estona Esperanto-Asocio, kiu en 1944 sukcesis fuĝi al Svedio, konfirmiĝas la fakto, ke la malpermeso de Esperantaj radio-elsendoj kaj fermo de Esperanto-grupoj okazis jam antaŭ „la plej terura, satana nokto, la 13-14 de junio 1941".[5]

Detaloj pri la nombro de arestitaj esperantistoj en la baltaj ŝtatoj kaj pri ilia fina sorto sub la soveta reĝimo estas apenaŭ konataj. Sed la jena kazo ne estis ununura: En 1954 oni eksciis, ke la iama prezidanto de Litova Esperanto-Asocio, la konata pacifisto Balys Giedra, kiu kompilis Esperanto-litovan vortaron kaj la verskolekton *Violetoj*, mortis „ie en Siberio", verŝajne en marto 1953 – do, post pli ol 10jara deviga ekzilo.[6]

1. Neeme Ruus estis aktiva membro de SAT.
2. *La Espero* 28. 1940, p. 99. – Poemojn de Barbarus tradukis en Esperanton Hilda Dresen (*Horizontoj*, Tallinn 1931). Li sinmortigis en 1946.
3. *Heroldo de Esperanto*, militeldono n-ro 1 (1-12-1940), p. 4.
4. *La Espero* 29. 1941, p. 26. – Laŭ la latva esperantisto Teodors Arbergs, en lia lando en 1941 la Esperanto-grupoj „likvidiĝis kune kun aliaj privataj societoj": *La Pacdefendanto* 1955, n-ro 48 (dec.), p. 5.
5. Rein Kapper, „Memoroj kaj impresoj de estona rifuĝinto", *Malgranda Revuo* 2. 1944, n-ro 4, p. 12.
6. *Esperanto* 48. 1955, p. 12. – Inter la litovaj esperantistoj, kiuj transvivis multjaran malliberecon, estas la instruisto Eduard Levinskas, populariginto de la ideoj de Tolstoj en Litovio, kiu en 1945 kun sia tuta familio estis ekzilita al Taĝikio kaj rajtis reveni nur en 1955, kaj la antropologo

Se „socie fremdaj elementoj" ne estis toleratajn en la baltaj landoj, oni evidente ilin ne toleris, kaj pli frue forigis, en Soveta Unio mem. Pro tio la grupigo de Weissberg verŝajne posedas altgradan aŭtentikecon. Ĝi ŝajnas kredinda ne nur pro sia simileco kun la litovaj dokumentoj, sed ankaŭ pro du aliaj kongruaĵoj. Unue, la supozo, ke la esperantistoj troviĝis en la sama kategorio kiel la filatelistoj, estas apogata per la atesto de Ryt'kov, kiu memoras, ke, kiam SEU estis disbatata, tiu sama sorto trafis la asocion de filatelistoj. Ankaŭ la historiisto Roj Medvedev mencias la persekutojn kontraŭ poŝtmark-kolektantoj kaj esperantistoj en la sama kunteksto.[1]

Sed la alia kongruaĵo estas ankoraŭ pli interesa: La nomo de Eĵov, la instrukciito de Stalin, jam en la decida tempo mem estis menciita en ligo kun Esperanto. Iom antaŭ la mezo de la 1930aj jaroj Nikolaj Incertov, membro de la CK de SEU, skribis al sia japana kamarado Kurisu Kei, ke Eĵov komencis esplori la situacion de Esperanto en Soveta Unio; kiel rezulton de tiuj esploroj Incertov atendis, ke dank' al interveno de Eĵov pliboniĝos la pozicio de SEU.

La sciigo de Incertov estis nek la unua nek la sola indiko pri tio, ke Esperanton ekzamenis gvidaj sovetaj instancoj. Fakte, SEU ekde 1930 plurfoje informis pri klopodoj havigi al si pli da subteno de la aŭtoritatoj – klopodoj, kiujn igis akutaj la konscio, ke la agado de SEU tro ofte puŝiĝas kontraŭ baroj, ĉar mankis eksplicita agnosko de ĝia utilo flanke de la Partio.

Jam meze de 1930 Drezen esprimis tiurilate la konvinkon, ke SEU baldaŭ atingos decidan turnopunkton. En la sama tempo, kiam la rilatoj kun SAT komencis rapide malboniĝi, li informis la membrojn en longa artikolo, ke, ĉar „estas studata la tuta sistemo de diversaj publikorganizoj en Sovetio", SEU povas atendi

---

Antanas Poška (Paškevičius), kiu pasigis plí ol dek jarojn en koncentrejoj. Konata estona esperantisto, kiu kun sia familio devis restadi multajn jarojn en Siberio, estas la instruisto Henrik Seppik. La latva poetino Ludmila Jevsejeva en 1957 rajtis reveni al sia hejmlando post 16jara ekzilo. Ne transvivis la multjara prezidanto de Latva Esperanto-Societo, Talivalds Indra, kiu mortis ie ĉe la polusa cirklo en 1942.

1. Roy A. Medvedev, *Let history judge. The origins and consequences of Stalinism*, New York 1972, p. 352.

konkretajn proponojn kiel pli bone adapti siajn agadojn kaj organizon al la „sociaj bezonoj". Skizante principojn de reorganizo de SEU, prezentotajn al la instancoj, kiam venos al la tagordo la demando de la estonta statuso de SEU, Drezen preparis la membrojn je pluraj alternativoj, inter kiuj troviĝis ankaŭ la ebleco, ke SEU dissolviĝos kaj ke ĝian lokon transprenos Esperanto-centroj ĉe sindikatoj sur tutunia kaj loka niveloj.[1]

Por povi sekvi la proponojn pri nova organizformo SEU plurfoje prokrastis la okazigon de sia Kvina Kongreso, origine planita por julio 1930. Sed la atendita direktivo ne venis. Kiam la kongreso fine okazis, en novembro 1931, SEU mem donis al si novan statuton kaj enkondukis la kategorion de „amikoj", t.e. simpatiantoj, kiuj ne devis lerni Esperanton, por ke la asocio estu „pli proksime ligita kun la produktado, kun la amasoj".[2] La unua paragrafo de la nova statuto tekstis:

> Sovetrespublikara Esperantista Unio (asocio de l' amikoj de la internacia laborista interligo kaj de la lingvo internacia) estas volontula proleta organizaĵo, celante sur bazo de progresigo, disvastigo kaj praktika apliko de la lingvo internacia esperanto, akceli la organizadon de la vastaj laborular-amasoj de USSR por aktiva kaj ĉiurilata internacia interligo, kiel unu el la ĉefaj momentoj de la edukado de la laboruloj en spirito de proleta internaciismo, kaj helpi praktike per internacia laborista interligo la konstruadon de socialismo.

Aprobinte la statutŝanĝon, la kongreso komisiis al la CK „definitivan konfirmon de la nova statuto post ĝia konformigo ĉe la respektivaj ŝtataj leĝinstancoj".[3] Drezen anoncis, ke SEU „denove" prezentos la demandon de Esperanto al la Centra Komitato de la Komunista Partio.[4]

En la sekvaj jaroj SEU atendadis la rezulton de siaj klopodoj atingi opini-esprimon de la Partio. Se pli frue ĝia agado kontentige disvolviĝis eĉ sen desupra apogo, nun pli kaj pli ĝuste tiu foresto de rekono negative influis la regulan funkciadon de la orga-

1. E. Drezen, „La vojoj de SEU – organizo kaj evoluo", *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 117-122.
2. Formulo de Incertov dum plenkunsido de la CK de SEU en julio 1931, kiu diskutis la preparatan statutŝanĝon: *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 87.
3. „5-a Kongreso de Sovetrespublikara Esperantista Unio", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 140.
4. Samloke, p. 135. – Je tiu ĉi okazo Drezen menciis la negativan efikon de la opinioj de Buĥarin, Krupskaja kaj Ul'janova, kiuj „malhelpas al ni gajni la gazetaron".

nizaĵo. SEU ne nur devis barakti kun tiel fundamentaj problemoj kiel la havebligo de papero por siaj eldonaĵoj, sed konsternite konstatis ankaŭ, ke inter ĝiaj membroj ekregas „malmobiliziĝo" – ke oni neas la eblecon varbi por Esperanto, ĉar ĝi „ne estas oficiale agnoskita de sovetiaj aŭtoritatoj".[1] Cetere estis jam timigaj precedentoj. En septembro 1932 estis dissolvita la Societo por Proleta Kinematografio kaj Fotografio, kio ŝajnis atesti pri ĝenerala intenco de la Partio malmultigi la nombron de „volontulaj" asocioj.

Kiel fragila estis la pozicio de SEU, kun malofta klareco vidiĝas el raporto donita en 1935 al la Dua Kongreso de IPE en Antverpeno. En ĝi la organizaj problemoj de SEU estas rekte rilatigitaj al la neekzisto de vojgvida decido de la plej superaj instancoj:

> Por kompreni la specifajn kondiĉojn, en kiuj disvolviĝas SEU, la malregulecan aperon de gazetoj, la malgrandiĝon de eldonagado ktp necesas scii la pozicion de esp-movado en soveta socia vivo. La esp-movado estas tiel nomata „volontula movado", do ne ŝtate subtenata. Neniu centra instanco sin okupis serioze pri la problemo k tial ankaŭ ne subtenis ĝenerale k principe la laboron de esp-istoj. Certe, unuopaj regionaj komitatoj de la komunista junularo, de Ruĝa Helpo k de la sindikatoj subtenis la PEK-laboron, je kiom ĝi donis okulfrapajn rezultojn. Eĉ ekzistas konforma rekomendo de CK de ukraina komjunularo k de l' kultura fako de l' tutsovetia sindikata unio. Kelkaj el konataj k-doj, kiel Lozovskij k Manuilskij[2] rilatas simpatie al nia movado, sed tio ne sufiĉas. La foresto de principa decido aŭ rekomendo flanke de la centraj instancoj certe malhelpas al la laboro sur la lokoj, ĉar la lokaj instancoj ofte mem ne kuraĝas transpreni la iniciaton k tial ankaŭ multo dependas de la ŝanĝiĝantaj funkciuloj. De tio ankaŭ dependas la provizado de SEU-eldonejo per papero, kiu ja estas centrigita por ĉiuj organizoj. Ni ricevas responde al taksiĝo kiel triagrava organizo paperon nur en tre malgrandaj kvantoj.

La raporto informas, ke SEU nun batalas por tio, ke la „principa decido" estu farita. Konsciante ke la tasko estas malfacila, „ĉar ni antaŭe devas pruvi, ke nia problemo estas aktuala, ni devas refuti la kontraŭargumentojn de diversaj pseŭdomarksistaj kontraŭuloj de esp-o", SEU tamen esprimis optimismon pri fina sukceso:

1. „Pli da atento al membrovarbado", *Bulteno de CK SEU* 12. 1933, p. 17.
2. A. Lozovskij (= Solomon Abramoviĉ Dridzo, 1878-1952) estis altrangulo en Ruĝa Sindikata Internacio kaj, dum la milito, vicministro pri eksteraj aferoj; en 1949 arestita pro „cionismo", ekzekutita en 1952. – Dmitrij Zaĥaroviĉ Manuil'skij (1883-1959), i.a. membro de la prezidantaro de Komintern 1924-1943, estis unu el la malmultaj malnovaj bolŝevikoj, kiuj transvivis la Purigojn.

> En la proksima tempo oni atendas principan k pli ĝeneralan solvon pri problemoj de nia movado, kiu donos nun fine la bazon por rapida progreso.[1]

En sia lukto por aŭtoritata decido SEU mobilizis ankaŭ malnovan amikon de la revolucia Esperanto-movado, la francan verkiston Henri Barbusse, kiu meze de 1935 restadis en Moskvo. En interparolo kun du reprezentantoj de SEU kaj IPE[2] Barbusse promesis verki artikolon pri Esperanto por *Pravda* kaj fari sian eblon kontraŭ „niaj malfaciloj, la ignoro kaj nekompreno, kiun ni ofte renkontas en la instancoj de la internacia kaj landa laborista movado".[3] Sed Barbusse ne plu povis plenumi sian promeson, ĉar unu monaton post la renkontiĝo kun la esperantistoj li mortis.

SEU malgraŭ ĉio ne perdis kuraĝon. En decembro 1935, kelkajn monatojn post la antverpena kongreso kaj la interparolo kun Barbusse, la interna informilo de la IPE-centro en Leningrado malkaŝis iom pri la maniero, kiel SEU traktis kun la aŭtoritatoj. Nome, kiam pro la nericevo de paperprovizo ĉesis la ebleco eldoni lernolibrojn kaj organon, la asocio prezentis al la aŭtoritatoj la netan alternativon, ke „aŭ ĝi likvidiĝu, aŭ ĝi estu organizo subtenata", por tiamaniere rapidigi decidon.

Informante pri tiu sia taktiko, SEU asertis, ke fakte, post kiam ĉe la CK de la Partio estabiiĝis fako pri volontulaj asocoj, „nia problemo fariĝis pli atentata", ke pluraj instancoj, interalie la CK de Komsomolo, jesis la ekzistorajton de SEU kaj ke, sekve, jam „neniuokaze oni povas pensi pri SEU-likvido aŭ morto". Sciante ke ĝia peto „jam troviĝas en esplorstadio", SEU supozis, ke „eble post unu-du monatoj" la aŭtoritata, definitiva decido venos. Kaj ĝi ne dubis, ke la decido estos pozitiva.[4]

Dum SEU atendis, Drezen sondis ĉe generalo Bastien pri kunlaboro kun UEA, kiun li opiniis dezirinda kaj ebla, tuj post kiam,

1. *Sur Posteno* (internacia eldono) 3. 1935, p. 184-185. – La raporto pri SEU formis parton de la „organiza raporto de la IPE-centro", kiun al la kongreso prezentis A. Respe, la ĝenerala sekretario de IPE.
2. Ili estis Herbert Muravkin kaj Vladimir Varankin.
3. Homo (= Muravkin), „Henri Barbusse mortis", *Sur Posteno Klasbatala* 1936, p. 2. – Barbusse estis, sen ĉeesto, Honora Prezidanto de la IPE-kongreso en Antverpeno.
4. „Pri nuna stato de SEU-movado", *Informilo. Interna organo de la IPE-centro* 1935, n-ro 3 (dec.), p. 14.

„proksimtempe", estos solvitaj „kelkaj fundamentaj problemoj" koncerne la laboron de SEU. Simile kiel Incertov, kiu kredis la aferon de Esperanto ĉe Eĵov en bonaj manoj, Drezen evidente fidis, ke baldaŭ, rezulte de la okazanta procedo de ekzamenado, SEU akiros novan, pli firman bazon por sia agado, kiu ankaŭ ŝanĝos ĝian reprezentiĝon en la internacia movado.

La monatoj pasis, kaj ne venis la sopirata decido. Sed ni ne povas dubi pri tio, ke la ekzamenantoj dum la tuta tempo okupiĝis pri SEU, eĉ se malrapide. Ŝajnas, ke ili faris sian laboron tre zorge. Lev Kopelev, kiel lernanto entuziasma SAT-ano, sed poste iom perdinta sian interesiĝon pri Esperanto, iun tagon ricevis la instrukcion reaktivigi ĝin. Devante pruvi sian „klasan atentemon", Kopelev, tiutempe studento en la Fremdlingva Instituto de Moskvo, havis la taskon iri al la kunvenejo de esperantistoj kaj konstati, kiuj tie regule ĉeestis. Al tio, kio precipe interesis la komisiintojn de Kopelev, apartenis la raportado pri ricevataj poŝtaĵoj el eksterlando.[1]

Tio ĉi estis en 1936 aŭ iom poste. Pri la jaro, en kiu Incertov sendis sian esperplenan leteron pri la esplorlaboroj de Eĵov, Kurisu ne plu memoras ekzakte. Sed ni scias, ke, post kiam komence de 1933 estis proklamita la neceso plene ekzameni la partian membraron, Eĵov iĝis membro de la puriga komisiono. La postan jaron, dum la 17a Kongreso en januaro/februaro 1934, li estis nomita vic-estro de la Partia Kontrol-Komisiono, kaj en februaro 1935, malpli ol tri monatojn post la mortigo de la leningrada parti-sekretario Kirov, li tute transprenis la gvidadon de la Kontrol-Komisiono. Nun tre rapide multiĝis la signaloj de intensiĝanta teroro: Meze de 1935 estis dissolvitaj la Asocio de Malnovaj Bolŝevikoj kaj la Asocio de Iamaj Ekzilitoj (kies aktojn havigis al si Eĵov por trastudo), proksimume samtempe Komsomolo estis draste reorganizita kun la celo elimini „malamikojn" de la Partio, kaj en 1936 la Komunista Akademio, centro de marksistaj sciencistoj, estis fermita.

1. Lew Kopelew, *Aufbewahren für alle Zeit!* München 1979, p. 234-235. – Iun tagon la partia sekretario de la instituto diris al Kopelev: „Vi ne plu bezonas iri al la esperantistoj. Iliaj gvidantoj estas arestitaj kiel popolaj malamikoj kaj la tuta butiko fermita." (Persona komuniko de Kopelev, de 15-4-1984.)

La 26an de septembro 1936 Eĵov avancis al la posteno de popolkomisaro pri internaj aferoj, estante komisiita de Stalin plirapidigi la senmaskigon de trockiistoj kaj zinovevistoj. Li nun, kiel ĉefo de NKVD, zorgis, ke la sekreta polico estu taŭga instrumento de la teroro. En la komenco de 1937 la preparlaboroj por la Granda Purigo estis finitaj. Ankaŭ estis farita, fine, „principa decido" pri SEU. Kia ĝi estis, la esperantistoj eksciis nur, kiam ili estis jam arestitaj. En la kelo de Lubjanka ili aŭdis la verdikton: „Vi estas aktiva membro de internacia spiona organizaĵo..."

4.4.3. *La evoluo al soveta patriotismo*

Antaŭ ol veni al fina analizo de la kaŭzoj, pro kiuj la sovetaj esperantistoj estis selektitaj por „purigo", ni unue devas ankoraŭfoje reveni al la rilato inter socialismo kaj internacia lingvo. Kiel ni detaligis en antaŭa ĉapitro, la esperantistoj ĉesis ĉirkaŭ la jaro 1932 partopreni la mallongvivan, sed viglan teorian diskuton pri la estonteco de la lingvo en komunismo, ĉar ili rimarkis, ke ili senelire implikiĝis en la sentiva tereno de la nacia problemaro. Jam ilia pretendo esti vojpretigantoj por la malproksima celo de universala lingvo malhavis rilaton al la praktika politiko, kiu direktiĝis al „florado" de la nacioj en la transira periodo. Tiel longe, kiel Stalin apogis sin sur la tezo de Lenin, ke unuavice la grandrusa ŝovinismo minacas la kunvivadon de la popoloj de Soveta Unio, kaj kiel do plena egalrajteco de ĉiuj nacioj kaj naciecoj ŝajnis esti kerna punkto de la soveta politiko, la Esperanto-movado almenaŭ povis sin vidi kuraĝigita partopreni en la diskuto de la evidenta demando kiel trovi kompromison inter la principo de lingva egalrajteco kaj la neceso de internacia komunikado. Tamen, kiam la socialisma, kvazaŭe „supernacia" enhavo pleniĝis per rusaj karakterizaĵoj kaj Stalin komence de 1934 nomis pli granda danĝero la „lokan naciismon", por la esperantistoj ne plu estis utile uzi oficiale ankoraŭ validajn teoriojn kiel pravigon por sia agado, ja ŝajnis al ili eĉ danĝere kroĉiĝi al tiuj teorioj kaj per tio kvazaŭ demonstri malkaŝan ignoron de la aktualaj politikaj prioritatoj.

La malakordo inter teorio kaj praktiko iĝis eĉ pli profunda dum la Granda Purigo, kiam la premo kontraŭ la nerusaj popoloj

atingis sian kulminon. Tiu premo eble sentiĝis nenie pli klare, ol sur la kampo de la lingvo. Necesas doni atenton al tiu aspekto por kompletigi la bildon de kontraŭdiroj inter teorio kaj praktiko en la politiko de multnacia Soveta Unio.

En la 1920aj jaroj oni konsideris unuaranga tasko havigi al se eble ĉiuj popoloj de Soveta Unio propran literaturan lingvon. Kiel ties bazo servis la latina alfabeto, kiun alprenis ankaŭ naciecoj jam posedantaj propran skriban tradicion. En tio ĉi, krom praktikaj konsideroj ludis rolon la vidpunkto, ke la latinigo kondukos al interproksimiĝo de la popoloj, ĉar la latina alfabeto samtempe reprezentis la ideon de tutmonda revolucio. Ĝi estis nomata ne nur „potenca instrumento de kultura revolucio" en Soveta Unio, sed ankaŭ la „alfabeto de monda komunisma socio"[1], kaj por la nerusaj popoloj simbolis la liberiĝon el grandrusa subpremo.

Pri lingvopolitikaj aktivadoj en la nerusaj respublikoj nemirige la esperantistoj montris grandan interesiĝon. Kelkaj mem iĝis aktivuloj sur la kampo de alfabetigo kaj lingvoplanado. En Azerbajĝano, kie en 1922 estis iniciatita la movado por latinigo[2], unu el la reformuloj provis krei skribon surbaze de la Esperanta alfabeto, ĉar tiu estas – kiel li skribis en *Izvestija* – „la plej racia el ĉiuj alfabetoj".[3] Poste, esperantistoj partoprenis en la kreo de novaj vortoj aŭ la ellaboro de alfabetoj, ekzemple en Armenio[4], en Turkmenio[5] kaj en norda Kaŭkazo.[6] Komence de 1930, kiam ĉe la popoloj uzintaj araban skribon estis finita la transiro al la latina alfabeto, la teoria organo de SEU aperigis pri la temo de skribreformo plurajn artikolojn, en kiuj kun kulturrevolucia fer-

1. M.I. Isayev, *National languages in the USSR: Problems and solutions*, Moscow 1977, p. 244, 249.
2. Samloke, p. 238.
3. R. Mencel, „Esperanta alfabeto kaj orientaj lingvoj", *Esperanto* 18. 1922, p. 176-177 (pri artikolo de Mamed Ŝaĥaĥtinskij en *Izvestija*).
4. La armena lingvisto Gurgen Sevak, membro de Akademio de Esperanto de 1971 ĝis sia morto en 1981.
5. La SAT-ano A.P. Poceluevskij estis membro de la Regna Scienca Konsilantaro de Turkmenio: S. Bojev, „Latina alfabeto en Turkmenio", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 144, p. 5.
6. La lingvisto L.I. Ĵirkov: Isayev, p. 245.

voro estis postulita la enkonduko de la latina alfabeto ankaŭ por la ukraina lingvo.[1]

Sed en 1934 subite komencis aperi, interalie en *Pravda*, artikoloj malfavoraj pri la latinigo.[2] En aŭgusto 1936 la Tutunia Komitato por la Nova Alfabeto estis kritikata pro nesufiĉa atento pri la kreskanta signifo de la rusa kiel tutsoveta interkomunikilo; precipe akre estis kondamnita la opinio, „ke la rusa alfabeto portas en si restaĵojn de feŭda kaj patriarka karaktero".[3] En februaro 1937 la Soveto de Naciecoj decidis enkonduki la cirilan alfabeton por la lingvoj de la nordaj popoloj. Per tio estis haltigita la latiniga kampanjo, kaj en la postaj tri jaroj la transiron al la cirila alfabeto devis plenumi la plej multaj nerusaj popoloj, inter ili multaj, kiuj nur kelkajn jarojn pli frue estis adoptintaj, post longaj preparlaboroj, la latinan alfabeton.

Por pravigi tiun ĉi lingvopolitikan direktoŝanĝon estis eksplicite dirite, ke por fortikigi la komunan socialisman enhavon de la lingvoj de Soveta Unio necesas faciligi la alproprigon de teknikaj-sciencaj terminoj el la rusa kaj ke anstataŭ la komunikiĝ-malhelpa latina alfabeto[4] devas esti kreitaj pli bonaj antaŭkondiĉoj por la ellerno de la rusa lingvo. Dum la kongreso de la Komunista Partio de Kirgizio en 1937 la scio de la rusa estis nomita antaŭkondiĉo por la plena integrado de la kirgizoj en la tutsovetan kulturon, kaj same estis admonataj la uzbekoj, ke ili lernu la rusan, „la lingvon de bolŝevismo, la rimedon de komunikado kun la aliaj popoloj".[5] La kulmino de tiu evoluo estis dekreto de la Partio kaj registaro, kiu deklaris la rusan lingvon deviga fako en ĉiuj lernejoj de Soveta Unio.

1. E. Ĉiĥaĉev, „Latinskuju azbuku ukrainskomu jazyku" (Latinan alfabeton por ukraina lingvo), *Meĵdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 36. – Vd. ankaŭ D. Sneĵko, „Ĉu esperanta alfabeto povas esti akceptata kiel internacia?", *Sennaciulo* 6. 1929/30, p. 241; V. Kolčinskij, „Za issledovanie ‚iskusstvennosti' v jazykaĥ SSSR" (Por esploro de „artefariteco" en la lingvoj de Sovetunio), *Izvestija C.K. SĖSR* 6. 1928, p. 328-330.
2. Guy Imart, „La politique linguistique soviétique et les langues minoritaires nationales", en: *Colloque sur: L'expérience soviétique et le problème national dans le monde(1920-1939), Paris, 6,7,8, décembre 1978. Actes* I. Paris 1981, p. 567.
3. Isayev, p. 250.
4. Samloke, p. 268.
5. Samloke, p. 263-264.

La dekreto estis publikigita la 13an de marto 1938 – la saman tagon, kiam Buĥarin kaj Rykov estis kondamnitaj al morto. Eĉ se tiu koincido eble estis hazarda: la persekuto de nerusaj partiaj gvidantoj, paralele iranta kun la rusiga politiko, konsistigis esencan parton de la Purigo. La batalo kontraŭ „naciismaj deflankiĝoj" furioziĝis ekde proksimume la mezo de 1937; laŭ konata modelo, la kritikon de la kulpigitoj baldaŭ sekvis ilia eksigo, akuzo kaj ekzekuto, kaj en la publika proceso kontraŭ Buĥarin ankaŭ aro da gvidantoj de nerusaj parti-organizaĵoj ludis rolon.[1] La novaj partiaj funkciuloj enoficigitaj de Stalin en la uniaj respublikoj komencis sian agadon per kampanjo por la rusa lingvo. De nun nerusa komunisto celis pruvi sian lojalecon al Moskvo per rego de la rusa.

Okazis precize tio, kion Spiridoviĉ jam en 1930 time antaŭsentis. Responde al Skrypnyk li atentigis, ke la Esperanto-movado „povas progresi nur sur bazo de la plej larĝa disvolviĝo de naciaj kulturoj kaj lingvoj". Konsenti, ke la evoluo pasu alimaniere, „tio signifus ekstari sur la vidpunkton de l' asimiligo de la nacioj kaj sekve ankaŭ de iliaj lingvoj el la flanko de pli potencaj nacioj". Kaj, se estus tiel, „tiam malnecesiĝus la bezono pri internacia helpa lingvo".[2]

Ok jarojn poste tiu stato estis atingita: En Ukrainio, kie Skrypnyk aparte konsekvence estis batalinta por observo de la prinaciecaj principoj de Lenin kaj kie unue sentiĝis la transiro al politiko de perforto kontraŭ la nerusaj popoloj, estis vokita en 1938 al senindulga batalo kontraŭ la „burĝaj, naciistaj, trockiistaj kaj buĥarinistaj malamikoj", kiuj provis „forpeli la grandan rusan lingvon el niaj lernejoj kaj universitatoj". Per likvido de la sekvoj de tiu „malamika perfido en la instruado de la rusa lingvo" estis fortikigota la frata amikeco de la ukraina popolo kun la „granda rusa popolo".[3]

1. Schapiro, *Die Geschichte*, p. 502.
2. E.S., „Esperantizacija vytekaet iz ukrainizacii" (Esperantigo devenas el ukrainigo), *Mefdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 222; trad. laŭ E. Spiridoviĉ, „La ‚vera devizo por batalo' en la marks-leninisma lingvoscienco", *La Nova Etapo* 1. 1932, p. 159.
3. *Kommunističeskaja Partija Ukrainy*, Kiev 1958; cit. Hans-Joachim Lieber, Karl-Heinz Ruffmann (red.), *Der Sowjetkommunismus. Dokumente* II, Köln, Berlin 1964, p. 124.

Tiamaniere plian subtenon ricevas la jam eldirita supozo, ke Skrypnyk, kritikante la esperantigon = sennaciigon, celis kaŝe ataki la tendencojn al rusigo kaj centralizo. Krom Spiridoviĉ, ankaŭ Drezen aludis pri tia kunligiteco, konfesante ke li ne vidas diferencon inter la anstataŭigo de la ukraina lingvo en la lernejoj per Esperanto kaj la subpremo de la ukraina per la rusa lingvo.[1]

Nek Skrypnyk nek Drezen, kredeble ankaŭ ne Spiridoviĉ, ĝisvivis la tempon, kiam en Ukrainio komenciĝis intensa instruado de la rusa lingvo. La evoluo al tutsoveta patriotismo, pli forte propagandata ekde 1934 kaj akcentanta la komunan intereson de ĉiuj popoloj de Soveta Unio pri la konstruado de socialismo kaj la venko kontraŭ internaj kaj eksteraj malamikoj, ne plu estis haltigebla en 1937/38. Dum la nerusaj popoloj devis akcepti drastajn limigojn de siaj naciaj proprajoj, la rusa lingvo estis levita al la rango de komuna lingvo de ĉiuj sovetaj popoloj. Ĝi nun estis oficiale konsiderata „la lingvo de granda popolo, kiu kreis la tutmonde plej riĉan socialisman kulturon kun ĝia plej alta atingaĵo, la leninismo". Tion skribis *Pravda* meze de 1938, kaj kiel la lokon de mondrevoluciaj atendoj prenis naciece-grandruse kolorita soveta patriotismo, tiel ankaŭ sur la kampo de lingvopolitiko ne

1. E. Drezen, „Al esperantistoj!", *Meĵdunarodnyj jazyk* 9. 1931, p. 271. – Tiutempe Drezen ankoraŭ kredis (aŭ kredigis), ke Stalin kaj Skrypnyk ne malsamopinias. Cetere, la interpreto, ke Skrypnyk opiniis rusan ŝovinismon kaj sennaciismon kvazaŭ ideaj fratoj pro ilia komuna malrespekto de indiĝenaj kulturoj kaj lingvoj, ricevas konfirmon ankaŭ per eldiroj de Lanti. Plene fiksiĝinte al la fincelo de sennaciismo, Lanti salutis la asimiliĝ-procezon en Soveta Unio per vortoj, kiuj objektive proksimiĝis al teoria pravigo de la stalinisma subpremo de neakordiĝemaj minoritatoj. En 1935, en „Publika letero al la adeptoj k simpatiantoj de l' sennaciismo", konstatante ke „la bolŝevista regado, same kiel la cara, celas rusigi la tutan popolon sovetian", li ne sentis bezonon riproĉi pro tio la sovetajn gvidantojn (*Herezulo* 1935, p. 54-55; repr. *Leteroj de E. Lanti*, p. 246). Male, jam fine de 1931 li nomis la pozicion de Stalin rilate al la grandrusa naciismo „defendebla k iel prava", ĉar, kvankam rusigo ne signifus sennaciigon, ĝi „nepre okazos, tial ke la rusa lingvo reprezentas pli altan gradon da kulturo ol ekzemple la ĉuvaŝa, la turkmena k.a. samnivelaj lingvoj" („Publikaj leteroj al multaj SAT-anoj", *Sennaciulo* 8. 1931/32, p. 128; repr. *Leteroj*, p. 44). Pri la altrudo de la rusa lingvo kiel oficiala lingvo de Soveta Unio Lanti komentis, ankaŭ en 1931: „Ni kompreneble ne kritikas tiun lingvan imperiismon. Tute male, ni preferas vidi la superregadon de unu sola lingvo sur vasta teritorio ol konstati la vekiĝon de patriotaj sentoj en Ukrainio, en Blankrusio k alie." (*Manifesto de la Sennaciistoj*, 2a eld., Paris 1951, p. 21-22.)

rajtis ekzisti internaciismaj tradicioj, kiuj kontraŭis la novdifinitan rolon de la rusa: „La rusa iĝos la internacia lingvo de la socialisma kulturo, kiel la latina estis la internacia lingvo de la superaj tavoloj de la frumezepoka socio kaj la franca la internacia lingvo de la 18a kaj 19a jarcentoj."[1]

Oni ne povas nei, ke la malapero de Esperanto samtempe kun la hegemoniiĝo de perrusa soveta kulturo donas sencon. En la sistemo de tutsoveta patriotismo, kiu forigis eĉ la „revolucian" latinan alfabeton, ne plu povis havi lokon neŭtrala, internacia lingvo. Stalin „grandŝtatisme" ĉesis toleri la liberan evoluon de lingvoj kaj nacioj dum la t.n. transira periodo, kaj li „forgesis" la gravan aksiomon de Lenin, ke la kunfandiĝo de nacioj devos okazi libervole, ke estas nepacigebla konflikto inter socialismo kaj nacia subpremo kaj ke neniu lingvo havu ian privilegion. Kaj la esperantistoj, kiuj fieris estis avangarda trupo en la formiĝprocezo de tutmonda komunismo, kiuj nelacigeble penadis varbi por la modelaj akiraĵoj de Soveta Unio, kiuj fidoplene registris la profetaĵon de Stalin pri tutmonda lingvo, kiuj salutis Eĵov kvazaŭ savanton: ili meze de tiu evoluo estis senprepare, sendiskute, silente forbalaitaj; ili sen ia jura bazo kaj sen la eblo defendi sin kontraŭ konkretaj akuzoj estis simple deportitaj al neniigejoj, se ne tuj mortigitaj, kune kun, ekzemple, la ŝatantoj de tia sendanĝera hobio, kia estas la kolektado de poŝtmarkoj. La grandaj cerbostreĉoj, per kiuj Drezen kaj aliaj provis meti Esperanton en la servon de proleta internaciismo, ne alportis al la esperantistoj ian privilegian traktadon, kiam Stalin decidis entrepreni la Grandan Purigon kontraŭ ĉiuj „malamikoj de la ŝtato".

Ĉio ĉi okazis, dum oficiale restis valida la internacia ideologio de la bolŝevika revolucio, tiu „ekstreme favora bazo por progresigo de la esperanto-movado".[2] Kvankam la esperantistoj rezignis pri la provo plifirmigi sian pozicion per sinapogo je la teorio de unulingva estonteco en komunismo, tiu teorio mem ne estis modifita, nek trafis la esperantistojn eksplicita postulo, ke ili reduktu sian agadon kaj ĉesu fari nedecajn konkludojn el la

1. *Pravda*, 7-7-1938; cit. Erwin Oberländer (red.), *Sowjetpatriotismus und Geschichte. Dokumentation*, Köln 1967, p. 26-27.
2. Drezen, *Historio de la mondolingvo*, p. 221.

elpaŝo de Stalin favore al universala lingvo. Male, se antaŭe la soveta movado ne dependis de lingvopolitikaj gvidlinioj de la Partio, ĝi post sia mallonga, sed entuziasma ekskurso al la kampo de teorio povis konservi la fidon, ke la praktika disvastigo kaj apliko de la lingvo akorde kun la sovetaj kondiĉoj kondukos al sukcesoj.

Se la movado, akcentante la praktikan flankon de Esperanto, konsiderinde progresis dum la 20aj jaroj kaj ne malofte rikoltis elmontrojn de oficiala bonvolo, ĝi povis vidi ŝancojn daŭrigi sur tiu vojo kaj, kiel ni vidis, post 1932 efektive plue kapablis demonstri la vivantan Esperanton. Ne mankis optimismaj rigardoj de SEU al la estonteco, nek okazoj de oficiala subteno al ĝi, ekzemple flanke de la sindikatoj. Kaj meze de la 30aj jaroj la membroj eĉ sentis sin kuraĝigitaj rekonsciiĝi pri la plezuro, kiun donas la uzo de Esperanto laŭ persona plaĉo. Post preskaŭ du jardekoj, dum kiuj konstante kreskis la premo al politika alkonformiĝo, subite iĝis eble emfazi la estetikan flankon de Esperanto kaj uzi la vortojn „revolucio" kaj „proletaro" en senco ironia.

Tamen, nelonge post tiu ŝajna mildiĝo de ekstera premo venis la mortiga bato kontraŭ SEU. Kiel klarigi tiun abruptan kruelan finopunkton de ĝia ekzistado?

Por atingi komprenon pri la kaŭzoj ni ankoraŭfoje devas direkti nian atenton al la karaktero de la multjara agado de SEU.

4.4.4. *Sukcesoj kaj limoj de la internacia korespondado*

Estis unu formo de aktivado, al kiu kun granda energio SEU dediĉis sin preskaŭ de sia establiĝo: Temas pri la internacia korespondado. Por esperantistoj ĝenerale, la korespondado ĉiam estis aparte ŝatata maniero de praktika apliko de Esperanto, sed en Soveta Unio ĝi havis specifan gravecon pro sia duobla funkcio: Tie estis eble kunligi la tradician ŝaton de esperantistoj al korespondado kun la desupre proklamita neceso de internaciisma eduko. Diference de esperantistoj en multaj aliaj landoj, kiuj povis uzi Esperanton ankaŭ dum vojaĝoj aŭ en internaciaj renkontiĝoj, la sovetaj esperantistoj trovis preskaŭ eksklузive en korespondado la praktikan utilon de sia lingvo. Interŝanĝi leterojn donis kontentigon al la individuoj, kiuj tiamaniere lernis

pri vivkondiĉoj en aliaj landoj kaj sentis emocian tuŝon pro la konkrete spertata internaciismo. Sed ĉar la korespondado samtempe estis oficiale rekomendata kiel kontribuo al la tutmonda solidareco de la laboristoj, la esperantistoj ankaŭ povis sin senti en akordo kun la ĝenerale elmetita principo levi la internacian edukon de la sovetaj amasoj. Ili sekve pli kaj pli konvinkiĝis, ke Esperanto, estante tre efika ilo por la liverado de perkoresponde akiritaj informoj al gazetoj, okupos rekonatan lokon en la soveta socio.

Ni do povas diri, ke korespondado fakte konsistigis la ekzistokialon de la soveta Esperanto-movado.[1] Multaj lokaj sukcesoj kaj pluraj simpati-deklaroj de centraj aŭtoritatuloj stimulis la konvinkon de la esperantistoj, ke ili plenumas valoran agadon por la tuta lando. Pri negativa aŭ indiferenta sinteno de partiaj gvidantoj ne ŝajnis necese multe zorgi: Ju pli da leteroj el eksterlando diskoniĝis per murgazetoj, kiuj aklamis al la konstruado de socialismo en Soveta Unio, des pli kreskis la esperoj de la esperantistoj, ke ilia ĉefa handikapo – la foresto de mondlingva perspektivo en la marksisma teorio – malgraviĝos kaj fine malaperos sub la forto de la faktoj.

Daŭrigi sur tiu vojo antaŭkondiĉis, unue, ke la korespondado celanta al internacia edukado plue estu oficiale patronata, due, ke la esperantistoj plue havu la eblon efike partopreni en ĝi, gajni prestiĝon kiel liverantoj de interesaj raportoj kaj tiel altiri pli da atento al Esperanto. Se temas pri la unua antaŭkondiĉo, la subteno de partiaj aŭtoritatoj al pliproksimigo de laboristoj per korespondado transdaŭris la ŝanĝojn de politikaj prioritatoj, pli precize tiun ŝanĝon, kiu estis karakterizita per la celdifino „konstruado de socialismo en unu lando". La transiro de Stalin al politiko, kiu pli kaj pli ĉesis dependigi sin de la atendoj je monda revolucio, ne signifis redukton de internaciismaj sloganoj nek rezignon ekspluati la kvazaŭ naturan simpation de alilandaj komunismaj movadoj por Soveta Unio. Kiam en 1930 la 16a Partia Kongreso denove substrekis la gravecon de internaci-eduka

1. La korespondado estas „bazo de nia tuta laboro", diris delegito dum la 5a SEU-Kongreso: *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 134.

laboro[1], la esperantistoj, kiuj plurloke jam „fariĝis kvazaŭ monopolistoj" en tiu laboro[2], per tio estis stimulitaj ankoraŭ pliintensigi siajn fortostreĉojn.

Malpli facile estis daŭre plenumi la alian antaŭkondiĉon, nome efike demonstri la utilon de Esperanto. Unu malhelpa faktoro estis, ke la soveta movado ŝajnis multe pli rapide kreski, ol tiu en la cetera mondo; jam frue oni parolis pri la danĝero, ke en Soveta Unio „stariĝos tro multe da esperantistoj kompare al la korespondkapablo ekster Sovetio".[3] Sed eĉ pli da problemoj havis sian fonton en la enhavo de la korespondaĵoj mem.

Sendube, la korespondado estis dekomence tiel diversa kaj varia, ke ĝi rezistis ĉian provon doni al ĝi unuecan direkton. La idealo estis, ke la okcidentaj kamaradoj raportu pri la revolucia batalo en sia lando kaj ke iliaj sovetaj korespondantoj donu informojn pri la postrevoluciaj atingoj de Soveta Unio – ke do la interŝanĝo de leteroj servu al reciproka stimulado persisti en la komuna lukto por liberiĝo de la proletaro. Sed en la praktiko la temo-gamo de la interŝanĝataj leteroj estis multe pli vasta kaj diferenciĝinta. La korespondantoj ĉiuokaze ne limigis sin al reciproka entuziasmigado. Sovetianoj komprenigis, ke ilia ĉiutaga vivo ne estas tute plenigita per agoj de heroeco, kaj konfuzis siajn leteramikojn per raportoj, laŭ kiuj la sindikatoj en Soveta Unio ne plu konas la rimedon de striko, la salajroj kaj vivtenkostoj estas sur pli malalta nivelo, ol en la okcidenteŭropaj landoj plagataj de ekonomia krizo, kaj, entute, regas ankoraŭ krudaj neperfektaĵoj en la prolet-kamparana ŝtato. Se do kontraŭdiroj interne de Soveta Unio, kiujn partiaj deklaroj klopodis kamufli, ne estis egale kaŝeblaj en la korespondado, siavice la eksterlandaj korespondantoj liveris al sovetianoj nefiltritan priskribon de la vivkondiĉoj en siaj landoj, kiuj supozeble konfirmis politikan premon de la regantaj klasoj kaj socian maljuston, sed ne ĉiam taŭgis por apogi la propagandan tezon, ke kapitalismo staras sur la sojlo de kolapso.

1. N.I., „Antaŭ grava etapo", *Bulteno de CK SEU* 9. 1929/30, p. 171.
2. A. Marti, „Dnepropetrovsk ne povas resti trankvila", samloke, p. 10; vd. ankaŭ p. 170 (pri Moskvo).
3. L. Revo, „Kelkaj rimarkoj pri malproporcio en nia movado", *Sennaciulo* 3. 1926/27, n-ro 133/134, p. 9.

Ekde ĉ. 1928 problemoj estiĝintaj en ligo kun la korespondado komencis esti publike konataj. Al Soveta Unio iris insistaj demandoj pri politikaj persekutoj kaj ekonomia krizo, kaj el ĝi venis pli da informoj, kiuj konsciigis al la eksterlandanoj, ke ne ĉio, kion raportas la burĝa gazetaro, estas simple mensogo. Sekve, SEU konfesis publike, ke en la korespondado okazis misuzo, kaj avertis siajn membrojn kontraŭ tiu danĝero. Dezirante ne perdi la pozitivajn rezultojn atendatajn de la perkoresponda utiligo de Esperanto, SEU pli kaj pli akcentis la bezonon transiri al kolektiva korespondado, ĉar ĝi – ne malprave – opiniis, ke „nekalkulebla risko" kuŝas en la amase praktikata individua korespondado.

En eksterlando jam fine de 1927 cirkulis onidiroj pri la ekzisto de ŝtata Esperanto-oficejo, kiu cenzuras aŭ eĉ preparas la leterojn elirontajn el Soveta Unio.[1] Eĉ se SEU dementis tion: Post kiam la oficiala organo de la laborist-kamparanaj korespondantoj aperigis atakon kontraŭ la disvastigo de mensogoj per Esperanto kaj la forta influo de etburĝoj en la movado, ĝi estis devigita meminiciate plifortigi la kontrolon kaj lanĉi kampanjon por laboristigo, kiu garantiu la ideologian purecon de ĝiaj membroj. Por akceli la kolektivan korespondadon fine de 1929 estis organizita la sistemo de „Proleta Esperanto-Korespondanto" (PEK), laŭ kiu en ĉiu grupo iu respondeculo zorgu pri tio, ke la enhavo de la leteroj senmakule respegulu la regantan opinion – ke la respondo al la demandoj faritaj el eksterlando estu plene konforma al tio, kion la Partio deziris, ke oni tie eksciu. Krome, tiu sistemo celis havigi „plene fidindajn adresojn", nome de eksterlandaj komunistoj, kun kiuj la sovetaj esperantistoj povos korespondi sen la risko esti influataj de neortodoksa pensado.[2]

Tute konsekvence, SEU komencis ĉirkaŭ la sama tempo ankaŭ rekte preskribi la temojn, kiuj dominu en la korespondado de ĝiaj membroj kun eksterlando. Ili estis instrukciitaj transdoni la kreskociferojn de la soveta industrio dum la Kvinjarplano kaj

1. Kun tio eble estas ligita la observo de J. Batta (en letero al Lanti, de 25-5-1927), ke socialdemokratoj „ne tre volonte korespondadas" kun sovetaj esperantistoj.
2. Jakov Vlasov, „Pli da klasbatalo en nian laboron", *Kunligilo* 1. 1929/30, p. 4.

raportojn pri la sukcesa batalo kontraŭ „detrimentistoj" kaj kulakoj kaj havigi de siaj korespondantoj unuavice informojn pri teknikaj atingoj de la evoluintaj kapitalismaj landoj, helpantajn antaŭenigi la konstruadon de socialismo.

La sukceso de tiuj provoj tute reglamenti la korespondadon estis limigita. La peto liveri teknikan scion estis por la okcidentaj kamaradoj tro nekutima kaj plej ofte transiris ilian kapablon. En raporto pri sia agado en 1932 la esperantistoj de Stalino konfesis, ke tiu parto de ilia laboro, kiu portis la devizon „importo de avangarda amerika kaj eŭropa tekniko", malsukcesis. Rilate la alian parton, t.e. „eksporto de nia sperto de revolucia batalo kaj socialisma konstruado", la sama raporto notis „aron da sukcesoj" [1], sed pri tio la ricevantoj evidente havis alian opinion. Nome, pli kaj pli eĉ inter ekstersovetiaj komunistoj, kiuj ja deziris profiti de revoluciaj spertoj, disvastiĝis kritiko kontraŭ la nova, produktad-orientita formo de korespondado, plendoj pro la agiteca enhavo de leteroj el Soveta Unio kaj sento de furiozo pri tio, ke la sovetaj kamaradoj liveras statistikojn aŭ delonge konatajn faktojn.

Se eĉ la okcidentaj PEK-laborantoj estis konfuzitaj, des malpli la multaj ordinaraj korespondantoj en eksterlando povis esti adaptitaj al la bezonoj fiksitaj de SEU por la korespondado – bezonoj, kiuj siavice estis diktitaj al ĝi sub la kondiĉoj de la „akriĝinta klasbatalo". Daŭre venis el eksterlando demandoj, fontantaj el natura scivolo, sed kaŭzantaj embarason al tiuj, kiuj estis demanditaj: la sovetaj esperantistoj. Kvazaŭ por armi sian membraron per argumentoj, SEU eldonis la flugfoliojn *La vero pri Sovetio*, aldonotajn al leteroj. Sed tio ĉi kaj rektaj petoj de la membroj al SEU pri konsiloj ne multe solvis la problemon. Plue, de eksterlandanoj venis demandoj, „pri kiuj eĉ ne ĉiu komunisto povas respondi", tiel ke – por eviti gravajn politikajn erarojn en la korespondado – montriĝis necese aranĝi konsultajn rilatojn kun lokaj partiaj komitatoj. Kiom ĝenaj estis la demandoj, ilustras ankaŭ la fakto, ke ĉiam pli ofte okcidentaj korespondantoj spertis, ke soveta korespond-anoncinto ne reagis je la unua ricevita letero.

1. A. Jurgensen, „Internacia korespondado estas parto de la socialisma konstruado", *Bulteno de CK SEU* 12. 1933, p. 10.

La zorgon de SEU konformi al la partiaj gvidlinioj ekde 1930 akompanis la timo, ke granda parto de ĝiaj membroj, kutimiĝintaj utiligi la servojn de SAT por trovi korespondantojn eksterlande, ne senproteste akceptos la fortrancitecon de tiu organizaĵo. La skismo en la laborista Esperanto-movado ne nur signifis organizan kaj ideologian disiĝon de SAT kaj SEU, sed ankaŭ profunde influis la personajn rilatojn inter ekstersovetiaj SAT-anoj kaj la sovetaj esperantistoj, precipe tiuj, kiuj, estante samtempe membroj de SAT, fakte konsistigis la plej aktivan (kaj lingve plej kompetentan) kernon de SEU.

La gvidantoj de SEU mem estis longe timintaj la danĝeron de skismo, sed kiam ĝi okazis, ili ne hezitis – pro la premo de la eksteraj cirkonstancoj kaj ankaŭ pro la provo de SAT konstrui fendon inter gvidantoj kaj membroj – rigore defendi sian aŭtoritaton kaj silentigi oponantojn. La instrukciojn pri la dezirinda enhavo de korespondaĵoj sekvis post la skismo pli alta ŝtupo: la apliko de premo kontraŭ tiuj sovetaj esperantistoj, kiuj konservis rilatojn kun SAT. Ili estis submetitaj al esplordemandado de la CK[1]; depende de la rezulto ilin trafis admono, eksigo kaj publika pilorio. Nun eĉ la fakto, ke iu korespondis nur individue, igis la koncernaton suspektinda.

Tiu procedo de ĉiam pli fortiĝanta kontrolo kaj de minacoj kontraŭ deviantoj fine kulminis en arestoj. Vokante al la eliminado de lakeoj kaj renegatoj el siaj vicoj, SEU klare indikis, kian modelon ĝi intencas sekvi:

> Laborista klaso de Sovetio malkovris komplotan laboron de „Industria Partio", de menŝevika centro, per la mono de II-a Internacio kaj franca imperiismo plenuminta detrimentan (malutiladan) laboron.
> Laborista esperantistaro en Sovetio same sukcese malkovras kaj ĝuste taksos la „informan" laboron de „Sovetiaj SAT-anoj", helpantaj al ĉanti venenigi ekstersovetian laboristaron per duboj, profitaj nur al kapitalismo.[2]

Per tio SEU celis unuavice al tiuj personoj, kies leteroj, kritikaj kontraŭ Drezen kaj la CK, estis anonime publikigitaj en *Sennaciulo* sub la titolo „Voĉoj el Sovetio". Kelkajn el ili ĝi povis iden-

1. „Fragmento el protokolo de kunsido de la sekretariaro de CK de SEU, la 18-an de aprilo 1931", *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 303.
2. „Sovetio sukcese plenumas kvinjarplanon", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 18.

tigi kaj, nemirige, kondamnis kiel perfidulojn kaj spionojn. Al ili apartenis la seruristo Viktor Djatlov, kiu estis liverinta al SAT i.a. tradukon de la interna protokolo de la CK-kunsido de la 7a de aŭgusto 1930. Li estis eksigita el SEU kaj fine juĝita al malliberigo.[1] Pri aliaj, kiujn pro ligoj kun SAT trafis la verdikto pri kontraŭrevolucia sinteno, ni scias nur, ke ili de la jaro 1931 silentis. La lasta vivsigno de unu el ili estis malespera helpovoko: „Mi vin petas, se estas eble ĉe okazo de mia arestigo, ... helpu al mi. Aliel mi devos fari ‚viziton' al sufiĉe malproksimaj lokoj en USSR. Mi ne volas tie perei."[2]

Post la skismo, nur kun granda singardo povis esti konservataj la kontaktoj inter SAT kaj kelkaj iamaj membroj en Soveta Unio. Lanti mem donis al okcidenteŭropaj SAT-anoj konsilojn pri la korespondado, ekzemple kiel ĉirkaŭiri la cenzuron. Li rekomendis, ke oni faru „tute precizajn demandojn":

> Se vi estas sufiĉe paciencaj k persistemaj, mi certigas vin, ke post unu aŭ du jaroj vi estos kolektintaj materialon per kiu vi havos tute alian bildon pri la vivo de laboristoj en Sovetio ol tiun, kiun disvastigas grandskale k multekoste la Stalina propagandaparato tra la tuta mondo. Tiel vi praktike utiligos la lingvon.[3]

Estante liberigita de respondeca funkcio en SAT, Lanti nun ne plu hezitis diskonigi leterojn ricevitajn el Soveta Unio. Komence de 1935 li fondis, kiel organon de la Sennaciista Frakcio, la revuon *Herezulo*[4], en kiu li konfesis, ke lin delonge atakas „konsciencripročoj", ĉar dum multaj jaroj li, celante konservi la unuecon de SAT, „toleris la publikigadon de blufaj artikoloj pri Sovetio k metis flanken tiujn, kiuj eldiris la simplan veron".[5] Lanti komencis aperigi en la nova revuo aktualajn leterojn el Soveta Unio, kiuj, laŭ li, donis nefiltritan bildon pri la situacio tie.

La leteroj entenis, ekzemple, informojn pri salajroj kaj prezoj en Moskvo, al kiuj Lanti apudmetis la koncernajn indikojn pri

1. N. In-ov (Incertov), „Por ke SEU estu forta necesas forigi el niaj vicoj la fremdulojn", *Bulteno de CK SEU* 10. 1931, p. 13. Laŭ *Sur Posteno Klasbatala* (1935, p. 9), Djatlov estis kondamnita, ĉar li „ŝtelis skribmaŝinon kaj librojn el la ejo de CK SEU" kaj petis „perletere monon ĉe alilandaj esperantistoj". Vd. ankaŭ sube piednoton 3 en paĝo 420.
2. Letero de N.G. Ŝĉegolev, Barnaul, al Lanti, de 29-3-1931.
3. E. Lanti, *Absolutismo*, Paris, Amsterdam 1934, p. 16.
4. Subtitolo: „Sendependa revuo por batalado kontraŭ ĉiajn dogmojn". *Herezulo* aperis, trimonate, dum du jaroj.
5. E.L., "Ĉu ‚Herezulo' estas necesa?", *Herezulo* 1935, p. 17.

Parizo.[1] Tiu komparo de vivkostoj kondukis unu sovetan korespondanton al la konkludo, ke „francaj laboristoj vivas kvazaŭ en paradiza lando".[2] Alia skribis, ke la pli malaltan vivnivelon en Soveta Unio li eĉ ne konsideras la ĉefa malbono. Lin pli afliktis la manko de „parol- k kunvenlibero" kaj, plej multe, la observo, ke la homoj jam komencis kutimiĝi al tiu manko: „... verdire – k tio eble estos por vi la plej terura ekscio – pli k pli ĉi tie la homoj perdas la emon al libero; la nova generacio eĉ ne komprenas tion, kio estas por mi k por vi libero."[3] Ĉiuj publikigitaj leteroj draste priskribis la politikan-socian situacion sub la rego de Stalin: ke nedenuncado sekvigas punon per 10jara malliberigo; ke la polico per torturado elpremas konfesojn; ke laŭ nova dekreto eĉ 12jaraj junuloj povas esti mortkondamnataj[4]; ke formiĝis „nova klaso da privilegiuloj, da ekspluatantoj", dum „la socialisma ideologio iom post iom ĉesas ludi rolon".[5]

La leteroj donis do tre negativan karakterizon de la soveta realeco. Ili pentris bildon de subpremo, timo kaj mizero – de „tombefika ortodoksejo", en kiu la iam liberigotajn laboristojn sklavigas altgrade perfektigita sistemo de ŝtatkapitalismo.[6] Skribis la leterojn homoj, kiuj mem batalis kontraŭ la cara reĝimo kaj esperis de la revolucio la ĉesigon de ekspluatado, sed nun vidis sian idealon kruele detruita. Kun ŝirita koro ili konfesis, ke kontraŭ la sistemo de teroro, instalita de „niaj nuntempaj ŝakalojregantoj", paliĝas eĉ la persekutoj de la cara reĝimo kaj ke la liberiga batalo de la laborista klaso „trafis en senelirejon".[7]

Lanti, kiu plej malfrue meze de 1933 perdis la reston de sia kredo, ke Soveta Unio „estas ankoraŭ revolucieca faktoro en la batalo de l' proletaro por sia emancipiĝo"[8], konsideris la leterojn

1. *Herezulo* 1935, p. 63-64.
2. Letero al la francino S. Brun, de 6-4-1936, en *Herezulo* 1936, p. 48.
3. Letero al Lanti, de 15-11-1935, en *Herezulo* 1935, p. 60.
4. La dekreto, celanta kontraŭbatali krimajn agojn de neplenaĝuloj, estis publikigita la 7an de aprilo 1935.
5. Letero al Lanti, de 20-5-1935, en *Herezulo* 1935, p. 20-21.
6. Letero al Lanti, de 15-11-1935, en *Herezulo* 1935, p. 59, 62.
7. Letero, subskribita de „Ruĝa Ribelulo", al Lanti, en *Herezulo* 1935, p. 11, 13.
8. Letero al J.V.M., de 30-6-1933, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 64. – La opinio ŝanĝon influis ne nur leteroj, sed ankaŭ la atesto de personoj, kiuj vivis dum jaroj en Soveta Unio; ekzemple, komence de 1934 revenis post pli ol

konfirmo de sia opinio, ke la aserto pri konstruado de socialismo en Soveta Unio estas mito, kiun necesas disbati.[1] Laŭ li, la tiean regosistemon eblis karakterizi nur kiel „ruĝan faŝismon".[2]

Estis nur Lanti, kiu publikigis leterojn, en kiuj „revoluciaj esperantistoj"[3] donis malkaŝan priskribon de la cirkonstancoj en Soveta Unio. Sed estas certe, ke multajn en okcidento – homojn, kiuj ne estis tiel eksponitaj kiel Lanti – atingis similaj korelverŝoj de seniluziigitoj.

Unu skribis, ke la komunistoj en eksterlando tre mirus, se ili scius pri la vero en Soveta Unio: „Nur k-doj kun bone pagata ofico povas tiel entuziasme skribi pri Sovetio sed la plejmulto mizeras kaj ne kuraĝas ion skribi pri sia vera stato."[4] Aparte interesan sperton, ankaŭ pri la risko, kiun skribinto prenis sur sin, havis la japana IPE-ano Kurisu Kei. Li estis skribinta leteron al SEU, en kiu li esprimis sian admiron pro la socialisma konstruado en Soveta Unio, priskribis sian malfacilan vivon sub la atentemaj okuloj de la japana polico kaj krome petis, ke SEU peru al li taŭgajn sovetajn esperantistojn por korespondado. SEU konigis la leteron de Kurisu; rezulte atingis lin kelkaj leteroj – kaj ankaŭ pakaĵeto, kiu entenis malnovan franclingvan lernolibron de Esperanto.[5] Malfermante la libron, Kurisu trovis, ke soveta esperantisto estis skribinta mesaĝon en ĝi. Nome, tra la tuta 165paĝa libro sur ĉiu paĝo kun malpara nombro troviĝis, en la maldekstra marĝeno proksime al la bindaĵo, krajone skribitaj frazoj. La manskribaĵo estis nur pene deĉifrebla:

> Tre kara k-do, Viaj bonaj opinioj pri nia lando estas nur bela sonĝo kaj memtrompiĝo. Nenia feliĉo estas. Libero kaj sato ekzistas nur sur papero. Fakte oni same kiel en ĉiuj landoj de la mondo malsatas, suferas kaj estas kruele, eĉ pli kruele ol en kapitalistaj landoj ekspluatata de novaj sinjoroj. ...

10jara restado la franca SAT-ano Robert Guihéneuf (letero al V. Ŝt., de 19-2-1934, en *Leteroj*, p. 111).

1. Vd. ankaŭ E. Lanti, M. Ivon (= Guihéneuf), *Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?*, Paris 1935 (represo Laroque Timbaut 1982).
2. „La ruĝa faŝismo", *Herezulo* 1936, p. 8-10.
3. Letero de „Ruĝa Ribelulo", en *Herezulo* 1935, p. 13.
4. Letero de Jean Wutte, Strasbourg, al Lanti, de 28-9-1930 (Wutte citis el letero de soveta esperantisto).
5. Temas pri: *Langue internationale „Esperanto". Manuel complet avec double dictionnaire*, traduit sur l'ouvrage russe du Dr. L. Zamenhof par L. de Beaufront. Troisième édition, Paris 1897.

Ĉi tie oni tre premadas la esperantan movadon, por ke ne doni al rusa laboristaro senpere rilatiĝi kun eksterlandaj laboristoj. ... Delegitoj kiuj alveturas de eksterlando, estas jam antaŭe elektitaj de s[oveta] registaro kaj alveninte ĉi tien oni senpage vojaĝas en ĉiuj banlokoj kaj ricevas diversaj[n] donacoj[n]. Neniu eksterlanda laboristo povas senpere sen ĉeesto de maskitaj agentoj paroli kun rusaj laboristoj kaj laboristinoj. ...

Kara k-do kaj amiko mi tute komprenas vian teruran situacion en kapitalistaj landoj sed kredu, ke tie-ĉi ne estas pli bone. Mi mem estis treege aktiva kiel ruĝgvardiano kaj de tuta koro dum multegaj jaroj batalis por laboristaro, sed nun ĉio absolute šanĝiĝis. ...

Kara amiko mi skribas tiuj[n] ĉi linioj[n] per mia laborista sango. Se nun vi ekkredos al mi por vi estos terura malreviĝo. ... mi fariĝis kiel la plej malfeliĉa kompatindulo. ... Mi batalis kontraŭ malveron, sed kion mi akiris. Nenion, nenia espero. K-do mia karega mi tre bedaŭras vin sed kredu al miaj sangvortoj. Viaj feliĉaj opinioj pri Sovetio estas nur bela sonĝo, same kiel revoj de religiulo pri paradizo. Kie oni devas serĉi la feliĉon por laboristaro mi ankoraŭ ne scias.[1]

Ni devas supozi, ke ne estis nur malmultaj, kiuj kuraĝis senkaŝe skribi pri la stalinismaj ekscesoj en leteroj al siaj eksterlandaj korespondantoj; pri tio aludas ankaŭ la konstato farita dum kunsido de la CK de SEU en septembro 1934, ke „en la organizaĵon penetris kontraŭrevoluciaj elementoj, kiuj aranĝis koncernan informadon al eksterlando".[2] Ne necesas akcenti, ke tiu korespondado estis danĝera: Lanti mem en 1932 spertis, ke du el liaj korespondantoj estis persekutataj, ĉar la soveta cenzuro eltrovis, de kiu venis la ricevitaj poŝtaĵoj.[3] Sed danĝeron entenis la korespondado ankaŭ pro faktoro, kiun la sovetaj skribantoj verŝajne ne estis enkalkulintaj. Tio estas aparte malluma ĉapitro.

Kiel ni menciis, SEU jam fine de la 20aj jaroj publike priparolis temojn, kiuj estis traktitaj en korespondaĵoj de sovetaj esperantistoj kun eksterlando. Ofte pri tiuj temoj la membroj mem sin turnis al SEU por peti konsilojn kiel argumenti. Sed ankaŭ okazis, ke eksterlandanoj rekte petis de SEU konfirmon, ĉu estas ĝusta, kion iliaj korespondantoj rakontis pri la rolo de sindikatoj, pri la sekvoj de la agrikultura kolektivigo aŭ pri la distribuo de salajroj. Kiam sub la kondiĉoj de evoluinta stalinismo multiĝis la nombro de politike tiklaj temoj, tiu ĉi praktiko de informiĝo ĉe

1. Laŭ la memoro de Kurisu, la libron kun la mesaĝo li ricevis de latvo, vivanta eble en Moskvo, proksimume fine de 1933 aŭ komence de 1934.
2. „Plenkunsido de CK SEU", *Sur Posteno Klasbatala* 1934, p. 130 (diskutkontribuo de Kosuškin).
3. Letero al H.B., de 23-5-1932, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 97-98.

SEU, origine eble ĉefe fontinta el komprenebla scivolo de la okcidentaj kamaradoj, kaŭzis ne nur kreskantan embarason al la gvidantoj, sed pli kaj pli ankaŭ malagrablaĵojn al la membroj, kies korespondaĵoj iĝis konataj.

La danĝero estis malpli antaŭvidebla, ol tiu, kiu rezultis el la atentemo de la cenzuro. Pri kio temis – nome, pri la risko esti denuncata el eksterlando, tion klarigis Lanti en parolado antaŭ nederlandaj laboristaj esperantistoj. Farante konsilojn kiel daŭrigi la korespondadon kun sovetaj esperantistoj sub la malfaciliĝintaj kondiĉoj, li atentigis, ke „necesas plie, ke vi akiru ilian fidon; ili devas esti certaj, ke iliaj leteroj ne estos transsendataj al CK de SEU, kiel jam okazis fare de k-doj, kiuj sendube opiniis, ke tiujn leterojn skribis danĝeraj kontraŭrevoluciuloj".[1] Komence de 1936 Lanti tuŝis la vundan punkton ankoraŭ pli klare, kvankam nepublike:

> Pripensu, ke okazis, ke ekstersovetiaj K-doj kaŭzis la enkarcerigon de siaj sovetiaj korespondantoj per tio, ke, ricevinte leterojn, kiuj diris la veron, tiuj K-doj opiniis, ke nur „kontraŭ-revoluciuloj" povas skribi tiajn leterojn. Ili komunikis al C.K. de S.E.U. tiujn skribaĵojn k neniam plu oni aŭdis de aŭ pri tiuj kompatindaj korespondantoj.[2]

Lanti ne troigis. En 1931 leteroj de du sovetaj SAT-anoj, senditaj al Parizo, estis faksimile aperigitaj en la ruslingva organo de SEU.[3] Demandante sin, kiel tio povis okazi, SAT esprimis la suspekton, ke unu el la tri membroj de sia propra Kontrol-Komitato rompis la skriban promeson, ke al neniu li sciigos la nomojn de sovetaj korespondantoj. Nome, la Kontrol-Komitato ricevis de SAT dosieron kun leteroj de sovetaj esperantistoj, ĉar ĝi havis la taskon trakti la plendon de Drezen kontraŭ „malhonorigo" fare de la Direkcio de SAT.[4] La suspekto esti perfidinta ĝuste homojn, kiuj akuzis Drezen pri diktatoreco, falis sur la belgan

1. Lanti, *Absolutismo*, p. 16.
2. Letero al Raymond Laval, de 2-2-1936, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 119. – Simile: Letero al J.V.M., de 30-6-1933, samloke, p. 68.
3. „Dvurušnikov – k otvetu!" (Duvizaĝulojn – al respondo!), *Meĵdunarodnyj jazyk* 8. 1930, p. 274. – La malkovritaj personoj estis Aleksandr Lapovenko kaj Viktor Djatlov. La koncerna numero aperis en aprilo 1931, sed Lanti jam en februaro eksciis, ke Djatlov estas en danĝero, ĉar SEU akiris fotoreproduktaĵojn de skribaĵoj liaj.
4. „Kiu rompis sian honorvorton?", *Sennaciulo* 7. 1930/31, p. 336; vd. ankaŭ la klarigojn de Lanti: *Protokolaro ... Amsterdamo*, p. 25.

komuniston Henri Jeanneret, kiu fine de decembro 1930 eksiĝis el sia funkcio kiel membro de la Kontrol-Komitato kaj transiris al la tendaro de la opozicio.[1]

Dum la amsterdama kongreso la komunistaj opoziciuloj eksplicite pravigis la promesrompon[2] kaj cetere kutimis kvitanci la laŭtlegadon de anonimaj leteroj el Soveta Unio per vokoj kiaj „Tio estas blankruso! Tio estas kontraŭrevoluciulo!"[3] Konsiderante tiun spiritostaton, ni ne bezonas multe da fantazio por imagi, kiel reagis fidelaj adeptoj de Soveta Unio en okcidento, kiam sovetaj esperantistoj de tempo al tempo elverŝis sian koron kaj raportis faktojn, kiujn la ekstersovetia partiano ne povis (aŭ ne volis) kredi. Ankaŭ Kurisu memoras, ke li neniel volis kredi la surmarĝenajn notojn de sia korespondanto kaj ke nur pro instinkta sento li ne skribis pri ili al SEU. Eĉ pluraj legantoj de *Herezulo*, do membroj de la Sennaciista Frakcio de SAT, akceptis la ŝokan enhavon de la publikigitaj leteroj kun pridubo; laŭ Lanti, ili „emas pensi, ke nur ‚blankuloj', ‚kontraŭrevoluciuloj' povas tiele paroli pri ‚la patrio de l' tutmonda laboristaro'".[4]

La malkaŝemo de sovetaj kaj la ortodoksemo de okcidentaj partneroj do kaŭzis, ke rompiĝis korespondaj rilatoj. Pri la malbona sorto, kiu atendis tiujn, kies leteroj estis el okcidento resenditaj al Soveta Unio, bedaŭrinde ne estas dubo, ĉar la CK de SEU, kien trafis la leteroj, ne miskompreneble deklaris sian pretecon plenumi la taskojn, kiujn la Partio postulis de ĉiu soveta civitano. Kiom servema ĝi estis, montriĝis en ĝia Esperanta lingvaĵo, kiu elspiris la regantan pensmanieron de plej militema stalinismo:

---

1. *Internaciisto* 1. 1930/31, p. 73. – Jeanneret estas rekte kulpigita en letero de Lanti al la parizaj gekamaradoj, de oktobro 1936, en *Leteroj de E. Lanti*, p. 129. – Post kvar monatoj eksiĝis ankaŭ la sekretario de la Kontrol-Komitato, Léon Bergiers, same belgo. En la daŭro de kverelo, kies detalojn ne necesas doni tie ĉi, li minacis publikigi la nomojn de ĉiuj sovetaj informintoj (*Protokolaro ... Amsterdamo*, p. 14), sed ne estas informo, ke li tion efektive faris. En junio 1932 li estis eksigita el SAT.
2. *Protokolaro ... Amsterdamo*, p. 25.
3. Samloke, p. 20; vd. ankaŭ p. 29, 58.
4. „El k pri la ruĝa faŝistejo", *Herezulo* 1936, p. 22. – Aliaj jesis la eblecon, ke la raportoj estas veraj, sed esprimis timon, „ke ilin utiligas reakciuloj por kontraŭbatali la komunismon": samloke, p. 57.

> Ni devas plialtigi nian klasan atenton. Uzante esperanton por la celoj revoluciaj, ni malebligu al kulakaj agentoj uzi esperanton por la celoj kontraŭrevoluciaj. Ni eltiru tiujn agentojn de la monda kapitalo el iliaj kaŝtruoj, ni frakasu ĉe ili la deziron daŭrigi sian laboron, en esenco direktita al preparado de kapitalisma milito kontraŭ Sovetio. Ni laŭte deklaru al laborista esperantistaro tutmonda: jen vidu, kiel kontakte kun premeganta kaj ekspluateganta vin kapitalistaro laboras renegato Lanti kaj liaj amikoj-agentoj en Sovetio.[1]

Sed okazis ankaŭ inverse: Koresponda kontakto same povis rompiĝi pro tio, ke estis ne transpontebla fendo inter okcidentaj korespondantoj, kiuj, estante socialistoj, malaprobe juĝis pri la evoluo en Soveta Unio, kaj sovetaj esperantistoj, kiuj senŝancele defendis sian landon kontraŭ ĉia kritiko. Kiel tiamaniere eĉ multjara perletera amikeco povis veni al abrupta fino, montras la jena ekzemplo. La franco F.A. Chavenon, en Clermont-Ferrand[2], longe korespondis kun sovetiano, kies patro pereis en la civila milito, batalante kontraŭ la „blankuloj", kaj kiu mem „ĉiam estis fervore sindonema al soveta reĝimo". Lin regule Chavenon sciigis pri „malbonfamoj" ekzistantaj en Francio pri Soveta Unio, kaj li responde fervore komunikis al sia franca amiko la „veron". Dum certa tempo la sovetiano estis „maljuste" enkarcerigita, sed ankaŭ tiam ne ŝanceliĝis lia lojaleco al la reĝimo.

En oktobro 1936 Chavenon sendis al sia „karega amiko" poŝtkarton kun la jena teksto:

> Ambaŭ niaj registaroj estas kapitalistaj, ĉu ŝtata, ĉu privata, sed same premantaj al la popolo, tial ili ne povas subteni la hispanan proletaron, kies venko estus mortbato al kapitalismo. ... Oni diras, ke Stalin malsanas; li povas morti, li jam faris sufiĉan malbonon, perfidante la Oktobran Revolucion.

Post kelkaj semajnoj venis la respondo. Chavenon estis titolita „sinjoro" kaj legis en la ricevita letero interalie la jenon:

> Dum kelkaj jaroj de nia konatiĝo vi diris al mi, ke vi estas socialisto, sed laŭ la enhavo de viaj leteroj mi sentis, ke en vi estas tre malmulte da socialista, k hodiaŭ finfine mi komprenis, ricevinte vian poŝtkarton, ke vi estas trockisto.

Sekvas detalaj klarigoj pri la sinteno de Soveta Unio en la hispana civila milito, kiuj klopodas pruvi, ke fakte estas nur ĝi, kiu donas al la hispana popolo efikan helpon. La sovetiano konsilas

1. G.D., „Pri iu ‚amiko de Sovetio' kaj liaj amikoj el Sovetio", *Bulteno de CK SEU* 12. 1933, p. 38.
2. Chavenon, eksĝendarmo, kiu fariĝis anarkiisto, post sia emeritiĝo laboris kiel noktogardisto (komuniko de Raymond Laval, de 25-11-1981).

al Chavenon pli ofte legi *L'Humanité* – „tiam vi havos pli veran vidpunkton" – sed tuj poste jam rezignas esprimi la esperon, ke Chavenon ŝanĝos sian opinion. La letero finiĝas tiel:

> ... laŭ via malamikeco al nia amata K-do Stalin mi povas konkludi, ke vi kun via kapo dronis en la malpura marĉo de l' trockismo; tial vi estas en la vicoj de l' faŝistoj, en vicoj de la malamikoj de paco.
> Ni povas batali kune kun socialistoj, anarkistoj, eĉ katolikaj laboristoj por paco unuecfronte, sed kun trockistoj ni ne povas unuiĝi, k ĉiujn trockistojn ni devas pafmortigi kiel furiozajn hundojn.[1]

4.4.5. *La fino de korespondado*

Ne estas malfacile kompreni, ke en la korespondado inter Soveta Unio kaj eksterlando meze de la 30aj jaroj iĝis pli kaj pli maleble, kaj danĝere, trakti temojn de politik-ideologia karaktero. Malgraŭ la uzo de ĉirkaŭvojoj, ankaŭ la kontakto de Lanti kun sovetaj korespondantoj de post 1935 estis nur sporada.[2] Sed restas demandi sin, ĉu korespondaj rilatoj ĉesis nur pro la malkaŝemo de sovetianoj, la provokaj demandoj de okcidentaj socialistoj kaj la denuncoj de ekstersovetiaj komunistoj. Alivorte: Ĉu ni devas atribui la pereon de la soveta Esperantomovado unuavice al tio, ke en la korespondado akiris superregon rekte kontraŭsovetaj tendencoj?

Ne estas dubo, ke ekde la komenco de la 1930aj jaroj aro da personoj estis arestita, pro la enhavo de leteroj, kiujn ili sendis eksterlanden, kaj eble ankaŭ pro korespondaĵoj kun „neortodoksa" enhavo, kiujn ili ricevis.[3] Sekve de tio ege altiĝis la atentemo de la sovetaj esperantistoj. Restis al ili, rilate la korespondadon, esence tri manieroj de sinadapto.

Unu ebla reagoformo estis eviti ĉian riskon kaj simple rezigni pri plua korespondado. Jam pli frue eksterlandanoj ofte spertis, ke eĉ sovetiano, kiu anoncis sian korespond-deziron, ne respondis la unuan alskribon. Tio ĉi povis havi diversajn kaŭzojn, sed en la 1930aj jaroj evidente multiĝis la okazoj, ke malskribemo ŝuldiĝis al embarasiĝo pro la trudaj demandoj de la eksterlandano.

1. Chavenon, „Fruktoj de korespondado", *Sennaciulo* 13. 1936/37, p. 22.
2. „El k pri la ruĝa faŝistejo", *Herezulo* 1936, p. 22.
3. Laŭ Lanti, en la urbo Simferopol esperantistoj estis malliberigitaj „nur pro tio, ke ili ricevis el eksterlando neortodoksajn esperantaĵojn": *Herezulo* 1935, p. 67.

Aliflanke, korespondado estis nedisigeble ligita kun la esperantisteco kaj tial ne facile rezignebla. Krome, SEU konsideris la partoprenon en la kolektiva korespondado devo de siaj membroj. Kiam venis plendoj, ke la provoj interligi sovetajn kaj alilandajn fabrikojn kaj organizaĵojn fiaskis, ĉar el Soveta Unio ne venis respondo al la demandoj faritaj de ekzemple germanaj laboristoj, SEU severe admonis siajn membrojn ne perfidi la laboron: „Ni atentigas, ke nerespondo al la demandoj de alilandaj korespondantoj estas granda politika krimo, neniel pardonebla!"[1] Kaj kiam en 1933 SEU ricevis agnoskon de la Tutsoveta Intersindikata Komitato pri la valoro de la uzo de Esperanto en la „interfabrika korespondado internacia", ĝi atingis eĉ la garantion, ke la sindikatoj disciplinos tiun esperantistan fabrikanon, kiu neglektas siajn taskojn en la organizado de korespondado.[2] Certe, tio ĉi montras, kiom malfortiĝis la iama elano de la entuziasme lanĉita koresponda agado; admonoj kaj minacoj simptome atestis, kiel peza fariĝis la tasko ellabori enhave senriproĉan respondon al ekstersovetiaj laboristoj. Sed restas la fakto, ke korespondado, precipe se kolektiva, plue konsistigis gravan parton de la laboro de SEU kaj ke ĝi, kvankam laŭ konfeso de Drezen en 1932 malkreskis ĝia relativa graveco, ankoraŭ povis kalkuli pri la subteno de oficialaj instancoj.

Ĉar do mankis oficiala malinstigo, multaj sovetaj esperantistoj bonkonscience povis elekti la alian eblecon: daŭrigi la korespondadon. La plue valida principo de internacia eduko de la laboristoj kuraĝigis ilin konservi siajn rilatojn kun eksterlandanoj kaj tiamaniere demonstri al la aŭtoritatoj, kiel bone Esperanto daŭras servi al la interproksimigo de la tutmonda proletaro. La pagenda prezo por tio estis la zorgemo moviĝi strikte nur en la kadro de tiuj esprimformoj, kiujn la stalina reĝimo preskribis al siaj civitanoj. La rezulto tiam estis la jam menciita fenomeno, ke la leteroj, kiujn skribis sovetaj esperantistoj al eksterlando, alprenis ĉiam pli stereotipan karakteron. Plenigis la leterojn entuziasmaj raportoj pri la kvinjarplanaj atingoj, laŭdego al la

1. „Kial iuj sovetiaj kamaradoj perfidas la laboron", *Bulteno de CK SEU* 11. 1932, p. 17.
2. „Pli da disciplineco en niaj vicoj", *Bulteno de CK SEU* 12. 1933, p. 33.

Partio kaj ĝia amata gvidanto Stalin kaj flamaj esprimoj de la konvinko, ke Soveta Unio estas „la plej forta, plej potenca ŝtato en la mondo" kaj ke „ni vivas en bona kolorriĉa vivo, sed la estonto estos ankoraŭ pli bona".[1]

Tiu ĉi formo de korespondado povis sukcesi nur, se ankaŭ el eksterlando venus adekvataj respondoj – respondoj, kiujn eblus diskonigi en Soveta Unio kiel frapan pruvon pri la valoro de Esperanto kiel peranto de admiraj voĉoj. Tiaspecan reeĥon oni atendis de la aparato de PEK, kaj sendube ĝi sukcesis produkti rezultojn en la dezirata direkto. Tamen, ni jam scias, ke la pacienco de eĉ plej bonvolaj PEK-laborantoj estis metita al severaj elprovoj pro la kutimo de la sovetaj korespondantoj komuniki sukcesraportojn kaj statistikojn, sed ne tion, kio interesis iliajn okcidentajn kamaradojn pli multe. Tiuj plue preferis skemon de „labordivido", kiu iam ŝajnis esti tute normala en la korespondado inter Soveta Unio kaj eksterlando, nome ke unu priskribu la postrevoluciajn atingojn kaj la alia sian porrevolucian batalon. En 1936, PEK-filio en Ĉeĥoslovakio ankoraŭfoje precizigis, kion oni atendas de la kamaradoj en la kapitalistaj landoj: ili „skribu pri sia batalo, kreo de unueca fronto, strikoj, mallibereja vivo, senlaborula vivo ..., militpreparoj kaj batalo kontraŭ ĝi..." Je la sama okazo estis formulitaj tre precizaj demandoj, kiujn estis respondontaj la sovetianoj:

> Kiel vivis laboristoj iam, kiel hodiaŭ? Loĝado iama k nuna. Kiom da horoj laboras la laboristoj, ĉe kiaj kondiĉoj? Kia estas diferenco inter la salajro de la junularo, viroj kaj virinoj. Ĉu ricevas la laboristoj karbon senpage? Kiom? Kia estas ilia socia asekuro, kiu pagas ĝin? Kiom da subteno ricevas malsanaj laboristoj? Ĉu por ĉiuj tagoj de malsaneco? Kiom da subteno ricevas malkapablulo pro invalideco aŭ maljuneco? Kiom ricevas la vidvinoj kaj orfoj ĉe mortigo de siaj edzoj kaj patroj? Ĉu okazas oftaj malfeliĉoj en fabrikoj? Kiel longa estas forpermeso de la laboristoj, kiel ili ĝin pasigas? Kiel laboristaro pasigas liberan tempon? Kiel estas punataj en la fabrikoj laboristoj, majstroj, inĝenieroj, ktp.? Kiel rilatas majstroj, inĝenieroj al laboristoj? Kiaj estas eblecoj de studado? Kion manĝas laboristo? (Por nia laboristaro tre grava). Pri beligo de urbo, naciminoritoj, ktp., ktp...

1. Pluraj tiaspecaj leteroj de sovetaj esperantistoj, precipe el la jaroj 1935 kaj 1936, estas presitaj en *Kolekto de Esperanta internacia korespondado*, kompilita de Ganglin kaj Kroji, 2 vol., Ŝanhajo 1936; citaĵoj en vol. 2, p. 43, 45. – Aliaj specimenoj de stereotipaj leteroj: *Arbeiter-Esperantist* 18. 1932, n-ro 5, p. 3; *Arbeider-Esperantisten* (Oslo) 13. 1937, n-ro 7, p. 4-5; *La Laborista Esperantisto* (Manchester) 1936, jan./mar., p. 9-11.

Per tio ankoraŭ ne elĉerpiĝis la scivolo de la ĉeĥoj. Ili eble trotaksis la gradon de socia progreso en Soveta Unio, sed ĉiuokaze ne ĉesis pensi. Montrante al la kampanjo lanĉita post la miraklaj laborsukcesoj de la ministo Aleksej Staĥanov en 1933, ili aldonis la jenajn demandojn:

> ... kial oni okazigas staĥanovajn tagojn? (Se ĝi estas metodo, sistemo. Se unufoje oni tion faris, do oni tiel devus labori daŭre, diris al ni iu kdo). Ĉu staĥanovanoj laborgajnos tiom, kiom ili perlaboros, produktos? Ĉu oni ne malaltigos al ili salajron kiel ĉe ni estas farate?[1]

Ni ne scias, ĉu la ĉeĥa PEK-filio ankoraŭ sukcesis ricevi respondon kaj, kiel ĝi intencis, transdoni ĝin al ĉeĥaj laboristaj gazetoj por tiamaniere imprese demonstri sian kapablon doni dank' al Esperanto aŭtentikan enrigardon en la ĉiutagan vivon de sovetaj laboristoj. La ŝabloneca karaktero de korespondaĵoj tiutempe senditaj de sovetaj PEK-aktivuloj igas nin dubi, ke venis kontentiga respondo, ĉar ĝuste la socian staton, la ĉiutagajn vivkondiĉojn en Soveta Unio jam ĉirkaŭis sekretumado kaj tabuemo, nur pene kaŝataj de klišaj frazoj kaj bombastaj ciferoj.[2]

Se entute ili venis, la leteroj el Soveta Unio estis plenaj de tiuj „ĝeneralaĵoj", kiujn eĉ komunistoj malfacile digestis. Fojfoje, konkreta demando estis respondita, sed en maniero, kiu limis la absurdon. Meze de 1935, bazante sin sur informo publikigita en *Izvestija* de la 9a de majo, laŭ kiu iu ukraina laborejestro ricevas monatan salajron de 3 300 rubloj, la franco Raymond Laval skribis al la PEK-perantino en Minsk por peti klarigojn. Jen ŝia respondo:

> ... Via demando: ĉu estas vero? Respondo: Ne, ne estas vero. Mi trarigardis la Isvestia de la tuta monato k ne trovis. Unue ne estas vero, due, tio ne povas esti. Ne ekzistas tiu granda salajro laŭ sovetaj leĝoj...[3]

Resume do, ankaŭ la plua partopreno de la sovetaj esperantistoj en la kvazaŭ oficiala korespondado ne asekuris ilin kontraŭ risko. Ili konstante frontis la neekstermeblan scivolon de eksterlandaj korespondantoj, kies delikatajn demandojn eblis res-

1. *Sur Posteno* 1936, n-ro 42 (apr./majo), p. 3.
2. Pri tio kp. Arthur Koestler, *Der Yogi und der Kommissar. Auseinandersetzungen*, Frankfurt/M. 1974, p. 159, 178, 193.
3. La letero, de 20-7-1935, estas presita en *Herezulo* 1936, p. 11. – Vd. ankaŭ: *Herezulo* 1935, p. 20; *Leteroj de E. Lanti*, p. 115, 117-119 (al Laval); Valo (= Laval), *Sepdek jaroj sub la verda stelo*, Laroque Timbaut 1980, p. 49-50.

pondi, fine, nur per mallertaj elturniĝoj aŭ propagandecaj lozungoj – aŭ kvitanci per silento.

Sed restis al la sovetaj esperantistoj ankoraŭ tria ebleo de sinadapto: Ili povis konscie eviti ĉian enplektiĝon en diskuton pri temoj ekster Esperanto mem aŭ hobioj facile kombineblaj kun ĝi, ekzemple poŝtmarkkolektado. Fakte, la emo dediĉi sin al tute senpolitikaj, eĉ banalaj temoj neniam mankis en la korespondado, sed dum kelkaj jaroj ĝi almenaŭ oficiale apenaŭ estis tolerata. Meze de la 1930aj jaroj, tamen, kiam la reĝimo proklamis la klasbatalon ne plu necesa kaj surface iom mildiĝis la premo al revolucieca konduto, ankaŭ la esperantistoj, kiel montras la ekzemploj de Blinov kaj Ryt'kov, ekopiniis denove legitima la amuz-celan aplikon de Esperanto.

Al la eksterlandaj admirantoj de Soveta Unio same ne plaĉis tiu maniero de korespondado. Ekzemple, la PEK-filio en Madrid plendis, ke ofte la sovetaj PEK-laborantoj ne respondas „al seriozaj socipolitikaj demandoj pri sovetia vivo. Ekzistas eĉ unuopuloj, kiuj preferas pli poŝtkartojn kaj filatelion ol seriozajn temojn."[1] Sed kompreneble ekzistis eksterlande ankaŭ komprenemo por la sovetaj korespondantoj, kiuj, konsciante la riskon de serioza opini-interŝanĝo, eskapis al banaleco. La informilo de la svisaj laboristaj esperantistoj rekte konsilis al okcidentaj korespondantoj, ke ili bremsu sian scivolon, se entute ili volas konservi kontakton kun la kamaradoj en Soveta Unio – ke de la „ĝeneralaj demandoj pri tekniko, literaturo kaj eĉ pri la vetero" ili prefere ne transiru „al demandoj politikaj, prireĝimaj", ĉar el tio povus rezulti la ĉesigo de la korespondado.[2]

Fakte, iĝis rimarkate en okcidento, ke la korespondaj rilatoj kun Soveta Unio pli kaj pli misfunkciis. Ne temis nur pri tio, ke sovetaj esperantistoj libervole ĉesis skribi; kelkaj post deviga paŭzo tuj rekomencis korespondi, kiel montris letero el Voroneĵ kun la dato de 1a de decembro 1936, sendita al sveda esperantisto:

> En januaro 1933 mi estis arestita kaj kondamnita al kvinjara malliberigo pro aroganta letero adresita al M. Gorkij. En septembro de

1. *Sur Posteno* 1934, p. 4.
2. „La interkorespondado kun kamaradoj en diktatore regataj landoj", *La Semanto* 1937, n-ro 39 (okt.), p. 1.

kuranta jaro mi liberiĝis kaj revenis hejmen. Kiel malliberigito mi laboris ĉe konstruejo de kanalo Moskvo-Volgo. El tiea vivo mi rememoras interesajn momentojn, sed mi ankoraŭ ne riskas skribi pri tio. Ĉiujn miajn esperantaĵojn, kiujn mi kolektis en daŭro de 20 jaroj, mi perdis pro kaŭzo dirita supre.[1]

En tiu ĉi okazo la kaŭzo de la arestiĝo ne ŝajnas esti ligita kun Esperanto. Sed ni scias ankaŭ pri la jena sperto de sveda esperantisto, farita proksimume en la sama tempo. Lia soveta korespondanto, kiu ĉiam preferis „skribi pri ĝeneralaj, ĉiutagaj aferoj", estis subite eksilentinta. Iun tagon li denove skribis. Montriĝis, ke la ruso estis kondamnita al dujara restado en Siberio, kaj pri la kaŭzo la svedo suspektis, ke „la sola ‚krimo' de li farita estis lia esperanto-korespondado kun homoj el eksterlandoj". Atentemo ne plu helpis: La svedaj amikoj devis konstati, ke, kvankam „ni evitis ĉiun enmikson da politiko en niaj leteroj", iom post iom ĉesis veni korespondaĵoj el Soveta Unio.[2] En oktobro 1937 – la sama monato, en kiu la svisa informilo avertis kontraŭ endanĝeriga scivolo – ankaŭ la anglo Thomas Aldworth, kiu la antaŭan jaron estis vizitinta Sovetan Union, raportis, ke ĉiuj liaj korespondantoj silentas: Liaj leteroj al Leningrado kaj Moskvo revenis kun la surkoverta indiko „nekonata".[3] Kaj ĉifoje ne temis pri dumtempa paŭzo en la korespondado. La silento estis, en la plej multaj okazoj, porĉiama.

1. Kopion de tiu letero afable disponigis s-ro Pelle Persson, Farsta (Svedio). La leteron skribis Andrej Sidorov, kiu en decembro 1927 estis plendinta por realec-konforma raportado en *Sennaciulo*. Komence de 1956 Sidorov reanoncis sin – kun la informo, ke li nenion scias pri la Esperanto-movado dum la pasintaj 18 jaroj: *La Pacdefendanto* 1956, n-ro 50 (feb.), p. 4.
2. „Kio okazas al niaj amikoj en Ruslando?", *Laboristo. Organo por esperantistoj senŝtatanoj* (Stokholmo) 3. 1936, n-ro 27 (nov.), p. 1-2. – Samloke estas donita aparte kortuŝa ekzemplo de ĵus spertita interrompo de korespondado: „Iu k-do el nia grupo ĉi tie ricevis karton el Ruslando. Estis rusa amiko, kiu dum transporto al Siberio sukcesis kaŝe sendi lastan saluton al sia sveda amiko. La karto estis preskaŭ nelegebla, ĉar, ĉu pro skuado en la vagono aŭ pro frostrigido en la fingroj aŭ grandega emocio, la teksto estis tiel treme skribita, ke estis penego eltiri la enhavon el ĝi. Nun tiu esperantisto silentiĝis, – ĉu por ĉiam, aŭ nur por mallonga tempo? Al tio oni ne ricevas respondon. La rusa registaro silentas k Siberio ankaŭ silentas pri ĉiuj siaj viktimoj."
3. *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 3. – Aldworth supozis, ke lia artikolserio pri la vizito al Soveta Unio „alportis malbonon" al la esperantistoj, kiuj lin helpis dum lia restado.

VIKTIMOJ DE LA PERSEKUTOJ EN SOVETA UNIO:

E. Drezen

N. Nekrasov



E. Spiridoviĉ

R. Nikol'skij

V. Varankin

V. Kuzmyĉ

E. Miñal'skij

J. Batta

T. Indra

Eksterlandanoj do devis konstati, ke iliaj korespondaj rilatoj kun sovetaj esperantistoj interrompiĝis eĉ, kiam ambaŭ flankoj klopodis eviti la pritrakton de tiklaj temoj. La singardo ne plu utilis, ĉar fine la esenca problemo estis ne kiel korespondi, sed ĉu korespondi entute.

Ke tie ĉi troviĝis la problemo, montris la sorto, kiun havis la verŝajne lasta granda kampanjo lanĉita por akceli la internacian laboristan korespondadon per Esperanto. En februaro 1937 la organo de Brita Komunista Partio, *Daily Worker*, komencis varbi, sub la slogano „Manojn trans la maron", por la interligo de britaj kaj sovetaj laboristoj per korespondado. En la gazeto aperis adresoj de korespondemuloj el Soveta Unio, parte liveritaj de Brita Laborista Esperanto-Asocio (BLEA), kiu tuj entuziasme ofertis siajn servojn en la perado kaj tradukado de leteroj. Jam delonge farinte similan laboron en la kadro de PEK, la asocio vidis en la kampanjo unikan ŝancon por rekomendi sin al la partio kiel nemalhaveblan ĵelpanton. Fakte, en la evoluanta korespondado Esperanto estis pli ofte uzata, ol la angla, kaj *Daily Worker*, kiu ĉiusemajne aperigis angulon kun adresoj kaj raportoj pri la stato de la kampanjo, konfesis, ke la sukceso superas ĝiajn atendojn.[1]

Sed post malpli ol unu jaro la kampanjo estis haltigita – sen publika klarigo. Aldworth raportis pri tio en *Sennaciulo* unuafoje. Pri la kaŭzoj de la ĉesigo li skribis:

> ... la korespondado ĝenis la kontrolintojn de la korespondaĵaro. Venis tro da insistaj demandoj pri kondiĉoj, salajroj, ktp, k kiel ĉiu esp-isto scias, la rusaj korespondantoj skribas nur pri ĝeneralaĵoj. Kiam oni postulas detalojn, la korespondado ĉesas.[2]

Post tio sekvis ankaŭ provo de BLEA klarigi la aferon. Ĝi indikis la jenajn du kaŭzojn:

> Unue, la brita kompartio opiniis, ke ĝi jam sufiĉe starigis la korespondadon k bezonas la uzitan spacon por aliaj celoj. Due, k pli grave, ekzistas akordo inter la sovetia registaro k la angla, ke unu ne propagandu en la lando de la alia; k la brita kompartio ne deziris doni al la britaj reakciuloj ŝancon diri ke la Sovetia registaro rompas la akordon per la publikigado en angla ĵurnalo de leteroj de sovetiaj civitanoj.[3]

1. *Ruĝa Esperantisto* 1938, n-ro 68 (jan.), p. 2.
2. *Sennaciulo* 14. 1937/38, p. 43.
3. Samloke, p. 59. – La klarigojn de BLEA transdonis E.P. Ockey. En *Ruĝa Esperantisto*, la organo de BLEA, kiu ĝis januaro 1938 regule raportis pri la kampanjo, ne aperis informo pri ĝia ĉesigo.

Tiu ĉi lasta argumento neintence malkovras la kernon: Ĝi asertas, ke korespondado egalas propagandon, devas submetiĝi al politikaj konsideroj kaj, senrigarde al sia enhavo, alportas ĝenon al ŝtataj interesoj. Per aliaj vortoj: la problemo ne estas misuzo de korespondado, sed la korespondado en si mem. La korespondado kiel tia estas ĝena kaj tial ĉesigenda: Tion la argumento tute klare esprimas, kaj erariga ĝi estas nur pri tiu, kiu ne deziris la korespondadon. Tiu estis ne la brita, sed la soveta registaro.

Ĉu tiun deziron de la soveta registaro konsciis la esperantistoj, antaŭ ol ili multnombre malaperis en labortendaroj? Tion kompreneble oni povas malfacile pruvi per konkretaj faktoj. Kiel raportis post la milito iamaj sovetaj civitanoj al usona esploranto, fine de la 1930aj jaroj iĝis konate en Soveta Unio, ke estas riske daŭrigi Esperantan korespondadon; laŭ ili, Esperanto „silente kaj kviete" mortis, ĉar ne plu eblis private korespondi kun esperantistoj en Eŭropo kaj Ameriko.[1] Sed pli rimarkinda estas, kion spertis la brita komunista esperantisto E.A. Evans: Li transsendis en 1937 leteron de Kurisu Kei, elkontrabanditan el japana karcero, al ties korespondanto en Ĥarkovo, Abram Klimovskij. Evans mem interŝanĝis dum kelkaj monatoj leterojn kun Klimovskij, sed: „Tiam li min informis, ke li ne povas korespondi plu. Amikoj miaj kiuj korespondis kun aliaj Sovetanoj ricevis leterojn samsence. Ŝajnis, ke la Soveta Esperanto-Asocio konsilis al siaj anoj ke korespondado kun alilanduloj devas ĉesi." [2]

Pri korespond-malpermeso parolis ankaŭ hungaro ekzilita al Novjorko, Ralph Bonesper, kiu, kiel aliaj samurbanoj, antaŭ 1937/38 havis pli ol cent korespondantojn en Soveta Unio. La kontakto ĉesis, laŭ Bonesper, ne nur pro la cenzuro, sed ĉar de tiu tempo estas „100%a (aŭ preskaŭ 100%a) malpermeso por korespondi kun eksterlandanoj". Li precizigis, ke tiu malpermeso koncernis la korespondadon en ĉiuj lingvoj, ne nur la esperantlingvan, ke tamen „Esperanto mem estas distinge mal-

1. George P. Springer, *Early Soviet theories in communication*, Cambridge, Mass. 1956, p. 14, 32.
2. Kurisu, kiu estis arestita de la japana polico en majo 1937, eksciis pri la afero nur post la milito, per letero de Evans de 13-5-1948 (el kiu estas la citaĵo); kp. Kurisu Kei (T. Kurisu), *Onazi taiyô ga sekai o terasite iru (La sama suno lumigas la mondon)*, Kyôto 1949, p. 132.

favorata".[1] Efektive: Se korespondado estis malpermesita, tio devis trafi Esperanton plej multe, ĉar, kiel atentigis, certe apenaŭ troigante, la franca eksmembro de la CK de SEU, Lucien Laurat, Esperanto estis praktike la sola fremda lingvo, per kiu sovetaj laboristoj povis facile interrilati kun eksterlandanoj.[2]

Per tio ni venas al la konkludo: Esperanto iĝis en 1937/38 ne plu tolerata, ĉar ĝi estis efika ilo en la perkoresponda komunikado de sovetaj civitanoj kun eksterlando, kaj tiu iam oficiale subtenata korespondado perdis la favoron de la soveta reĝimo, ĉar ĝi laŭ ĉiuj siaj aspektoj entenis riskojn:

- La korespondado ne plenumis sian celon: servi al la interesoj de Soveta Unio, kiaj ilin difinis la Partio.
- La korespondaĵoj, kiuj venis el eksterlando al Soveta Unio, origine bonvenaj, se stimulaj por la konstruantoj de socialismo, alportis tro da informoj pri la vivo en la kapitalismaj landoj, kiuj, anstataŭ pozitive stimuli, invitis al komparoj nefavoraj por la soveta reĝimo.
- La korespondaĵoj de eksterlandanoj entenis tro da ĝena scivolo pri la reala politika-socia situacio interne de Soveta Unio, kiun zorge klopodis kaŝi la oficiala propagando.
- Ne plu eblis utiligi la korespondadon por la priskribo de la socialismaj atingoj de Soveta Unio. Eĉ organizita korespondado rezistis plenan unuformecon, ĉar el leteroj ne estis eliminebla la elemento de spontaneo.
- Ankaŭ la pure hobia formo de korespondado ne donis garantion kontraŭ la malobservo de tabuoj, ĉar korespondado, kiu akorde kun la iam proklamita principo de internaciisma eduko

1. Letero de Ralph R. Bonesper al Boris I. Sokolov, de 30-3-1954, en *Informilo de Esperanto-Koresponda Studrondo* (Tokio) 1955, n-ro 3 (sept.), p. 11. – La franca komunisto William Gilbert skribis en 1952, ke „el 100 esperantistoj en nia lando, 95 estas tute certaj, ke fakta malpermeso [de la Esperanto-movado] ekzistas en Sovjetio". Li observis ankaŭ, ke en komunistaj gazetoj „neniam oni trovas anoncetojn por korespondado, nek ruslingve nek franclingve aŭ alilingve": *La Pacdefendanto* 1952, n-ro 11, p. 1.
2. Lucien Laurat, *Staline, la linguistique et l'impérialisme russe*, Paris 1951, p. 85. – Germana esperantisto notis la jenan eldiron de soveta oficiro (esperantisto) en la orienta zono de Germanio: „Ne la lingvo mem estas leĝe malpermesita, sed nur la eksterlanda korespondado." (Sepp Hönig, „Trans la kurteno", *Heroldo de Esperanto* 25. 1949, n-ro 10 [1107], p. 1.)

de la amasoj estis rigardata kiel politika instrumento, ne povis esti simple reduktita al la rango de hobio.

Pro la fakto, ke ĝenerale la riskoj de korespondado estis superregaj, necesis malebligi la korespondadon entute. Per tio la Esperanto-movado, kiu vivis per korespondado, perdis sian ekzistorajton.

La soveta registaro neniam oficiale klarigis, kial ĝi subpremis la Esperanto-movadon. Sed helpas komprenon de ĝiaj motivoj, se ni citas provon de analizo, kiun publikigis Drezen en 1932:

> ... fariĝas kompreneble, ke la burĝaro en la tutmondo komencas ĉiel malhelpi penetron de Esperanto en la laboristaj amasoj. Ĉiu eĉ novebakita, laborista esperantisto, eĉ se aliĝinta al Esperanto per helpo de iu katolika aŭ „sennaciista" organizaĵo, ĝuste per helpo de Esperanto riskas kleriĝi, kompreni la esencon de klasbatalo, aktive aliĝi al la internacia laborista korespondado, kiu troviĝas plene en manoj de klaskonsciaj proletoj; kaj tiamaniere, rezulte, li riskas fariĝi aktiva, organizita kontraŭulo de la nuntempa sociordo.[1]

Drezen trafe atentigis, ke ekzistas registaroj, kiuj turnas sin kontraŭ Esperanto, ĉar civitanoj helpe de tiu lingvo „riskas kleriĝi" kaj forlasi la fiksitan kadron de lojaleco. Sed li ne povis antaŭvidi, ke kvin jarojn poste al la sama konkludo venos registaro, al kiu li mem kaj miloj da sovetaj esperantistoj, inter ili „klaskonsciaj proletoj", montris fidon ĝis la fino.

4.5. *POST LA DUA MONDMILITO*

4.5.1. *La Granda Silento en orienta Eŭropo*

En la landoj de orienta Eŭropo, kun la escepto de Ĉeĥoslovakio, la Esperanto-movado troviĝis inter la du mondmilitoj en preskaŭ senĉesa lukto kontraŭ la malfavoro aŭ eĉ persekutoj de la aŭtoritatoj. Tio validis precipe por laboristaj Esperanto-unuiĝoj, plej ofte devigitaj agi duonlegale aŭ tute subtere. Poste, la antaŭenmarŝo de la nazi-germanaj armeoj ekstermis komplete la Esperantan vivon en Pollando kaj minacis estingi ankaŭ en la

1. E. Drezen, *Problemo de la internacia lingvo en nuna etapo de ĝia evoluo*, Moskvo 1932, p. 51.

ceteraj landoj tiun modestan restaĵon de neŭtrala movado, kiun pretis toleri la dekstraj registaroj. Multaj esperantistoj, precipe en Bulgario kaj Jugoslavio, donis sian vivon en partizana batalo kontraŭ la en- kaj eksterlanda faŝismo.

Pro tio estas tute kompreneble, ke la fino de la milito liberigis la korojn de multaj esperantistoj en orienta Eŭropo de peza ŝarĝo. La frakaso de faŝismo ŝajnis signali novan aŭroron ankaŭ al la idealo de komuna lingvo. Pluraj antaŭe persekutataj laboristaj esperantistoj transprenis gravajn funkciojn en la novestablitaj socialismaj ŝtatoj, esperante malfermi per sia respondeca pozicio senprecedence pli favorajn perspektivojn por la Esperanto-movado.

Plej rapide rekomenciĝis la agado por Esperanto en Bulgario. Tuj post la starigo de kontraŭfaŝisma registaro, la 9an de septembro 1944, renaskiĝis lokaj grupoj de esperantistoj, ĝoje sekvante la alvokon, ke ili denove kolektu ĉiujn kaŝitajn Esperantajn librojn kaj gazetojn.[1] Jam en aŭgusto 1945 ekaperis la monata revuo *Internacia Kulturo*, kiel organo de Bulgara Esperantista Asocio (BEA). En ĝia unua numero la redaktoro Asen Grigorov, malnova veterano de la laborista Esperanto-movado[2], plezure konstatis, ke „dank' al la potenca apogo de la Ruĝa Armeo" la Esperanto-grupoj „denove estas centroj de bolanta kultura vivo" kaj ke, „kvankam ankoraŭ daŭras serio da malhelpoj en la internaciaj interrilatoj, kvankam la landlimoj ne estas malfermitaj por senbara trafiko de homoj, gazetoj kaj leteroj, jam la unuaj hirundoj de la alpaŝanta esperanta printempo montriĝis: Oni plene permesis korespondadon inter Bulgario kaj Jugoslavio, kun Sovjetio, lasttage – kun Rumanio kaj pluraj landoj."[3]

Kiam oni konsideras, ke Grigorov kaj liaj kamaradoj ĝis 1934 estis tre vigle partoprenintaj la internacian laborist-kamparanan korespondadon, ne surprizas la fakto, ke la unua postmilita kongreso de bulgaraj esperantistoj, komence de septembro 1945 en

1. Kr. Sofroniev, *80 jaroj Esperanto-movado en Plovdiv*, Sofio 1980, p. 47.
2. Grigorov verkis, sub la pseŭdonimo Marin Ljubin, jam antaŭ la milito revoluciajn poemojn kaj novelojn en Esperanto. De la fino de 1945 li dum kelka tempo estis sekretario de Georgi Dimitrov.
3. Asen Grigorov, „Nia kongreso", *Internacia Kulturo* 1. 1945/46, n-ro 1, p. 3.

Sofio, akceptis apartan rezolucion pri internacia korespondado. Baziĝante sur la konvinko, ke „la internaciaj rilatoj neeviteble demokratiiĝos", la rezolucio asignas al Esperanto esencan rolon:

> ... por ke la internaciaj komunikiĝoj fariĝu facilaj kaj amasaj, krom la malhelpoj kaŭzataj de la tutmonda plutokratio kaj reakcio, ekzistas ankoraŭ seriozaj malhelpoj de teknika karaktero. La landlimoj malrapide kaj malfacile malfermiĝas, por doni vojon al libera kaj intensa interŝanĝo de homoj, varoj, kulturvaloraĵoj, politika sperto kaj ideoj. *Grava malhelpo por la kreo de amasaj komunikiĝoj inter la popoloj estas ankaŭ la manko aŭ la neutiligado de facila internacia helplingvo.*[1]

La bulgaraj esperantistoj estis alvokataj enlande kaj internaciskale konduti kiel pioniroj de demokratio kaj kontraŭfaŝismo.[2] La nova BEA pretendis, ke la antaŭa laŭklasa apartiĝo de esperantistoj en neŭtralan kaj laboristan organizaĵojn ne plu necesas, ĉar ĝi nun signifus dissplitiĝon kaj „do utilus nur al la reakciuloj".[3] En sia entuziasmo pri la nova politika ordo, ŝajne garantianta favoran klimaton por Esperanto, la gvidantoj de la bulgara Esperanto-movado iris eĉ tiel malproksimen, ke ili identigis la venkon de la komuniste kontrolata Patrolanda Fronto kun la plej intimaj deziroj de la esperantistoj, minace nomante tiun, kiu ne apogas la „popolan registaron", „malamiko de Esperanto":

> ... se troviĝas esperantisto, kiu ne estus adepto ankaŭ de la vere demokratia P.F. registaro, li estas adepto de la faŝista reakcia reĝimo, adepto de la ideo por la likvido de nia demokratia internacia lingvo Esperanto, kiel „danĝera" lingvo, – li do, ne rajtas nomi sin esperantisto.[4]

La saman principon de kontraŭfaŝisma unuecfronto BEA klopodis aplikigi ankaŭ en la internacia Esperanto-movado. Tiucele ĝi jam frue donis atenton al kunordigita agado de la landaj asocioj en la popoldemokratioj. Ekde la numero de majo/junio 1946 *Internacia Kulturo* subtitole nomis sin „Kultura revuo de balkan-

1. *Internacia Kulturo* 1. 1945/46, n-ro 2 (okt. 1945), p. 10. – Vd. ankaŭ lian artikolon „La kolektiva korespondado internacia", *Internacia Kulturo* 1. 1945/46, n-ro 8 (apr. 1946), p. 3.
2. Vitali Julzari, „La esperantistoj – antaŭposteno en la antifaŝisma batalado", *Internacia Kulturo* 1. 1945/46, n-ro 7 (mar. 1946), p. 3.
3. Nikola Aleksiev, „El la historio de la laborista Esperanto-movado en Bulgario", *Internacia Kulturo* 1. 1945/46, n-ro 7 (mar. 1946), p. 12.
4. M. Conkovski, „La esperantistoj kaj la balotoj", *Internacia Kulturo* 1. 1945/46, n-ro 1 (aŭg. 1945), p. 13. – Por simila alvoko sur loka nivelo vd. Sofroniev, p. 51-52.

landaj Esperanto-asocioj"[1], kaj fine de aŭgusto delegitoj el Bulgario, Rumanio kaj Jugoslavio kunvenis en Asenovgrad por Balkana Esperanto-Konferenco. Je tiu okazo Internacia Esperanto-Ligo kaj Universala Esperanto-Asocio estis kritikitaj pro „nekonsekvence demokratia" sinteno („pasiva, neŭtrala sinteno al faŝismo kaj reakcio").[2] La kampanjo daŭris, dum IEL kaj UEA traktis pri sia reunuiĝo[3], kaj nelonge post kiam, en aprilo 1947, estis starigita la nova UEA kiel unueca organizaĵo de la neŭtrala movado, ok landaj asocioj[4] prezentis al la 32a Universala Kongreso en Bern fine de julio projekton de rezolucio, kiu, krom la emfazo pri demokratio kaj kontraŭfaŝismo, postulis de ĉiuj esperantistoj „senĉese plej energie kontraŭbatali la restaĵojn kaj la novajn fajrujojn de faŝismo" kaj „senmaskigadi la preparantojn kaj provokantojn de nova milito; aktive subteni ĉiujn demokratajn, pacajn tendencojn".[5]

La rezolucio estis malakceptita kun plimulto de proksimume tri kvaronoj.[6] Eĉ tiuj esperantistoj, kiuj konsentis, ke post la sperto de la faŝisma malamikeco kontraŭ Esperanto la antaŭa

1. Tiuj asocioj komence estis la bulgara, jugoslava kaj rumana. Poste aliĝis la hungara, pola, aŭstra kaj ĉeĥoslovaka. Ili delegis reprezentantojn en la redaktan komitaton de *Internacia Kulturo*, kies subtitolo en septembro 1948 estis ŝanĝita al „Kultura kaj socia revuo de la danubregionaj Esperanto-asocioj".
2. „Decidoj de la Unua Balkana Esperanto-Konferenco...", *Internacia Kulturo* 1. 1945/46, n-ro 9/10 (majo/jun. 1946), p. 19.
3. Vd. precipe la artikolojn de Ivo Lapenna, „Neŭtraleco kaj ‚neŭtraleco'", *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 3 (nov. 1946), p. 3-5 (ankaŭ en *Esperanto Internacia* 11. 1947, p. 24-26); „Al unueco", *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 6/7 (feb./mar. 1947), p. 3-4; „La organizproblemo", *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 9 (majo 1947), p. 3-4. – Vd. ankaŭ la rezoluciojn de la Dua Balkana Esperanto-Konferenco kaj de la jara ĉefkunveno de Jugoslavia Esperanto-Federacio, ambaŭ en Varaždin komence de junio 1947: *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 10 (jun. 1947), p. 13-14.
4. La asocioj de Jugoslavio, Bulgario, Rumanio, Hungario, Ceĥoslovakio, Pollando, Aŭstrio kaj Palestino.
5. Teksto de la rezolucio: *Esperanto* 40. 1947, p. 132-133, kaj *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 13/14 (sept./okt. 1947), p. 3.
6. *Esperanto* 40. 1947, p. 134; Ivo Lapenna, „Je pripensado kaj prijuĝo de la tutmonda demokrata esperantistaro!", *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 13/14, p. 18. – Vd. ankaŭ la kritikon de Ernfrid Malmgren, la prezidanto de UEA, kontraŭ la sinteno de Lapenna, lia estrara kolego, kiu estis prezentinta la rezolucion: *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 16 (dec. 1947), p. 13.

kompreno de neŭtraleco bezonas revizion, voĉdonis kontraŭ rezolucio, kiu praktike estus kateninta la Esperanto-movadon al unu flanko en la komenciĝinta Malvarma Milito, nome al la politiko de Soveta Unio.[1]

Malgraŭ la malsukceso en Bern daŭris la klopodoj de bulgaraj kaj jugoslavaj esperantistoj plifortigi la kunlaboron inter la Esperanto-asocioj en la balkanaj landoj kaj krei komunan agadon por la „demokratigo" de UEA. Paralele, okcidentaj komunistoj, kiuj apartenis al SAT, estis admonataj forlasi tiun organizaĵon de „anarko-trockistoj kaj etburĝaj elementoj" kaj aliĝi al UEA por povi influi ĝin „progresive". Tion ekzemple fine de 1947 Grigorov rekomendis al la dano Poul Thorsen, petante lin ankaŭ provizi informojn pri la karaktero de la dana movado kaj la politika sinteno de ĝiaj gvidantoj.[2] Thorsen ne faru – skribis Grigorov – vanan laboron per la restarigo de Komunistema Frakcio en SAT, sed anstataŭe tenu konstantan kontakton kun *Internacia Kulturo*. Pri tiu revuo Grigorov malkaŝis, ke ĝi „iom post iom devas fariĝi fakte vera centra organo de la movado, fariĝi kultura, ideologia kaj socia ... revuo, ĝis kiam vere demokrataj samideanoj transprenos la estradon de UEA".[3]

Apenaŭ estis farita progreso en tiu direkto. Tio ŝuldiĝis ne nur al la rezisto aŭ malinklino de la plej multaj esperantistoj ekster la popoldemokratioj, sed ankaŭ al esenca handikapo, kiun dekomence havis la orienteŭropaj protagonistoj de kontraŭfaŝisma UEA: la neekzisto de movado en Soveta Unio. En 1947 *Internacia Kulturo* ja menciis la ricevon de kelkaj leteroj de sovetaj esperantistoj, sed tiuj evidente ne entenis iujn atentindajn informojn.[4] Samjare disvastiĝis sciigoj pri malhelpoj kontraŭ la Esperanto-movado en la soveta zono de Germanio[5], kio dum la

1. Estas interese, ke ankoraŭ pli ol tridek jarojn poste Lapenna esprimas fieron pri la rezolucio, kies projekton li ellaboris; el ĝia enhavo li tamen mencias nur la omaĝon al la viktimoj de naziismo: *Horizonto* 5. 1980, p. 23-24.
2. Unu el la demandoj estis: „Kia homo estas ekz. s-ano N...? Ĉu reakcia? Ĉu demokrata?"
3. Letero de Grigorov al Thorsen, de 15-12-1947.
4. *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 13/14 (sept./okt. 1947), p. 32.
5. *Heroldo de Esperanto* 23. 1947, n-ro 16 (1075), p. 2; *Sennaciulo* 18. 1947, n-ro 10, p. 7.

diskuto en Bern kontribuis al la negativa reago je la rezoluci-projekto.[1] Eĉ en komunistaj medioj ekster la popoldemokratioj montriĝis malfavoro al Esperanto, kiel raportis franca SAT-ano komence de 1947. Indikante plurajn faktojn pri la sinteno de la Franca Komunista Partio, ekz. pri malpermeso organizi kurson en kvartala sekcio de la partio en Parizo, li sciigis, ke „la partiaj instancoj bojkotas nian agadon", ĉar ili „tute ne deziras, ke la proletoj povu libere rilati kun alilandaj laborfratoj".[2]

La jaro 1948 alportis akriĝon de la Malvarma Milito inter Usono kaj Soveta Unio. En februaro ankaŭ en Ĉeĥoslovakio la Komunista Partio transprenis la potencon, per kio nun la tuta orienta Eŭropo falis sub la influon de Soveta Unio. Rezulte alarmiĝis la okcidentaj ŝtatoj pri la danĝero de plua komunisma antaŭenmarŝo, des pli kiam, en junio, Soveta Unio blokadis la surterajn ligojn inter okcidenta Berlino kaj la okcidentaj zonoj de Germanio. La kreskanta atentemo en okcidento siavice instigis Moskvon plidensigi sian kontrolon super la popoldemokratioj. Fine de junio Jugoslavio, kiu rezistis la sovetan kuratorecon, estis eksigita el Kominform. Por eviti similan malobeon en la aliaj landoj, regataj de Komunista Partio, sekvis intensa kampanjo kontraŭ ĉiuj veraj aŭ supozataj devioj de la postulata lojaleco al Soveta Unio. Jam en aŭgusto Władysław Gomułka, malfidata pro sia inklino al naci-komunisma koncepto, estis malŝarĝita de sia posteno kiel unua sekretario de la partio en Pollando. En septembro estis arestita albana partia gvidanto, Koçi Xoxe, sub la akuzo esti titoista agento. Kelkajn monatojn poste publika proceso kontraŭ li finiĝis per morto-verdikto, kaj la sama sorto ekde 1949 sinsekve trafis funkciulojn ankaŭ en Bulgario, Hungario, Rumanio kaj Ĉeĥoslovakio.

Dum en orienta Eŭropo disvastiĝis la sufoka atmosfero de stalinismo, ankaŭ la Esperanta printempo, apenaŭ ekflorinta, jam venis al sia fino. La malvarma vento unue ekblovis en la orienta zono de Germanio, tiutempe ankoraŭ rekte kontrolata de soveta militista registaro. Tie la fakta malpermeso organiziĝi por la disvastigo de Esperanto, spertita jam en diversaj lokoj, estis oficiale

1. *Esperanto* 40. 1947, p. 133.
2. [Hector Cachon], „La komunistoj k Esperanto", *Sennaciulo* 18. 1947, n-ro 3, p. 2.

konfirmita per dekreto de la Germana Administracio de Internaj Aferoj „pri la transigo de popolartaj grupoj kaj popolklerigaj asocioj en la ekzistantajn demokratajn amasorganizaĵojn", de la 12a de januaro 1949; en la direktivoj por plenumo de la dekreto, la ciferoj 6 kaj 7 postulis la malfondon de „artlingvaj grupoj" kaj la tujan ĉesigon de Esperanto-rubrikoj en la gazetaro.[1] Klarigon pri tiu rigora paŝo liveris kvin monatojn poste *Neues Deutschland*, la organo de Socialista Partio de Unueco. Laŭ ĝi, la espero je interpopola fratigo per Esperanto malhelpas al multaj homoj ekkonscii la verajn kaŭzojn de militoj, krizoj kaj politikaj konfliktoj, dum fakte la dispartigon de la mondo eblas forigi ne per mondlingvo, sed nur per la klasbatalo kaj la fina venko de la laboristaro.[2] Tion ĉi skribis la sama partia organo, kiu komence de 1947 estis memoriginta pri la glora tradicio de Germana Laborista Esperanto-Asocio kaj alvokinta la esperantistojn rekolektiĝi sub la verda stelo.[3]

Simile mallongviva estis la reekfloro de la movado en Rumanio. En 1947 la rumanaj esperantistoj ĝoje raportis pri „historia momento". Temis pri tio, ke Rumana Esperanto-Societo, fondita en 1907, ĵus akiris por la unua fojo rekonon kiel jura personeco.[4] Sed jam en la sekvanta jaro ekregis „profunda silento" en Rumanio[5], kaj ĝis hodiaŭ la Societo ne estis restarigita.

Venis la vico al la bulgaroj. Malbonon kvazaŭ aŭguris la intensiĝantaj klopodoj de BEA disciplini sian membraron. Ĝia junulara sekcio en aŭgusto 1948 postulis „ĝisfine disbati la vivantajn ankoraŭ en iuj Esperantistoj sensencajn ideojn pri ‚nova sento', ‚interna ideo', aŭ iu speciala dia misio de Esperanto".[6] La sekvojn de la premo por interna kohero kiel unua spertis SAT, kies

1. *Zentralverordnungsblatt* (Berlin) 1949, n-ro 7 (10 feb.), p. 67-68.
2. *Neues Deutschland*, 15-6-1949; laŭ *La Estonto Esperantista* 2. 1949, n-ro 8, p. 2.
3. *Neues Deutschland*, 29-1-1947; laŭ *Komunikoj. Monata informilo de la Kolektivo de Germanaj Esperanto-Organizoj* 2. 1947, n-ro 2, p. 4.
4. „La movado en Rumanio", *Internacia Kulturo* 2. 1946/47, n-ro 11/12 (jul./aŭg. 1947), p. 17.
5. *Heroldo de Esperanto* 25. 1949, n-ro 6 (1103), p. 4.
6. N. Nikolov, „3-a konferenco de la Junulara Fako ĉe Bulgara Esperanto-Asocio", *La Estonto Esperantista* 1948, n-ro 6 (okt.), p. 44; kp. „Niaj pozicioj", *Internacia Kulturo* 5. 1950, n-ro 1/2, p. 25.

bulgara peranto fuĝis al okcidento; lia posteulo estis arestita.[1] *Internacia Kulturo* devis forstreki la jugoslavajn membrojn de sia redakta komitato, inter ili Ivo Lapenna.[2] Sed tio paliĝis apud la bato, kiu trafis la bulgarajn esperantistojn en la eventoplena somero 1949. (Komence de julio mortis Georgi Dimitrov; en septembro Bulgario devis rompi sian amikecan kontrakton kun Jugoslavio.) En majo BEA estis serene anoncinta, ke la 32a Bulgara Esperanto-Kongreso, okazonta en Vraca de la 21a ĝis 23a de aŭgusto, „promesas esti grandioza manifestacio de la esperantomovado".[3] Tiujn atendojn la kongreso neniam povis plenumi, ĉar lastminute ĝi estis nuligita.[4]

Ĉirkaŭ la sama tempo ankaŭ la hungaroj spertis malagrablan ŝanĝon de la eksteraj cirkonstancoj. Ilia agado post la milito estis simile multpromese komenciĝinta kiel tiu de la bulgaroj. Reaperis la revuo *Literatura Mondo*, kiu en la 1920aj kaj 1930aj jaroj ludis elstaran rolon en la evoluigo de Esperanta kulturo. En decembro 1947 la tradici-riĉaj Hungarlanda Esperanto-Societo (HES) kaj Hungaria Esperantista Societo Laborista (HESL) kunfandiĝis al unueca organizaĵo. En printempo 1948 la instruministro permesis la instruadon de Esperanto kiel nedeviga fako en elementaj lernejoj, sekve de kio 104 parlamentanoj, inter ili 34 komunistaj, subtenis etendiĝon de la dekreto ankaŭ al mezlernejoj.[5] Tre sukcesa konferenco de delegitoj de la danubregionaj Esperanto-asocioj okazis en julio en Budapeŝto; la delegitoj aŭskultis kuraĝigajn vortojn de partiaj kaj registaraj reprezentantoj kaj solenajn promesojn pri plua subteno de la movado. La prezidanto de la hungara parlamento, Imre Nagy, deklaris, ke „Esperanto devas leviĝi el la sekta vivo kaj oni devas ĝin disvastigi inter la larĝaj popoltavoloj"[6], kaj Mátyás Rákosi, la gvidanto

1. *Sennaciulo* 20. 1949, n-ro 7, p. 1. – La nomo de la fuĝinta peranto estis indikita kiel Ĝumakov.
2. Ili lastfoje aperis en la aŭgusta numero de 1949.
3. *Internacia Kulturo* 4. 1949, n-ro 5, p. 16.
4. Ivan Sarafov, *Skizo de la historio de bulgara Esperanto-movado*, Sofio 1971, p. 37. – *Internacia Kulturo* prisilentis la nuligon.
5. *Heroldo de Esperanto* 24. 1948, n-ro 7 (1085), p. 1; *Internacia Kulturo* 3. 1948, n-ro 8, p. 11.
6. *Internacia Kulturo* 3. 1948, n-ro 10, p. 19.

de la partio, diris dum akcepto de la konferencaj delegitoj, ke li ne bezonas interpreton, ĉar li mem iam lernis Esperanton.[1]

Pri la budapeŝta konferenco raportis eĉ usonaj gazetoj, kies formulo „la komunistoj uzas Esperanton en la Danuba baseno"[2] estas prenebla kiel priskribo de la grandaj perspektivoj, kiuj malfermiĝis al la hungaraj esperantistoj. Sed nur kelkajn monatojn poste ili mem donis multe malpli optimisman analizon de la situacio. Membrokunsido de HES konstatis komence de 1949, ke la movado „troviĝas en krizo", ĉar ĝi „ne fiksis por si programon identan kun interesoj de la nacio". Laŭ maniero jam observita en Bulgario, la kulpo estis donita al la ideologia postrestado de la membroj, kiuj, sekve, estis admonataj „flankenŝovi la senutilan neŭtralecan politikon, ... rezigni pri la pacifista idearo" kaj perfektiĝi en la socialisma ideologio.[3] La postaj etapoj en la evoluo de la hungara movado pasis paralele kun la stalinisma purigo de la partio: En majo László Rajk, la ministro pri eksterlandaj aferoj, estis arestita pro „naciisma devio" kaj „spionado por imperiismo"; post sia julia/aŭgusta numero ĉesis aperi *Literatura Mondo*, oficiale „pro financaj malhelpoj"[4]; kaj en oktobro, kiam Rajk estis ekzekutita, ĉesis la Esperantaj elsendoj de Radio Budapeŝto. HES ne tuj perdis la esperon; dezirante aliĝi al la Popola Fronto kaj ricevi organizan helpon de la sindikatoj, ĝi preparis novan statuton. Sed la 6an de aprilo 1950 okazis ĝia lasta komitatkunsido. Al la 15 ĉeestantoj estis prezentita propono, laŭ kiu „la Esperanto-socieo provizore interrompu sian agadon". Post intensa diskuto ili voĉdonis: 10 akceptis la proponon, 3 kontraŭis ĝin, 2 sindetenis.[5] Per tio komenciĝis periodo, kiun la hungaroj poste nomis „La Granda Silento".

1. „Danubregiona Esperanto Konferenco en Budapest", *Internacia Kulturo* 3. 1948, n-ro 8, p. 12. – Nelonge poste la lasta prezidanto de HESL, István Kossa, eniris la registaron kiel ministro pri industrio.
2. *New York Herald Tribune* kaj *Time*; laŭ William Solzbacher, „It happened in Prague", *American Esperanto Magazine* 66. 1952, p. 37.
3. „Landa kunsido de HES", *Hungara Esperantisto* 4. 1949, n-ro 1 (jan./mar.), p. 5-6.
4. *Sennaciulo* 21. 1950, n-ro 2 (537), p. 7. – Samtempe ĉesis aperi ankaŭ *Hungara Esperantisto*.
5. „Ĝustigo", *Hungara Esperantisto* 7. 1967, n-ro 3, p. 15.

Plej longe rezistis subpremon la ĉeĥoslovakoj. Inter la du mondmilitoj la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio apartenis al la plej fortaj en Eŭropo. Persekutoj neniam trafis ĝin, krom dum la nazia okupo. Sekve, kiam en tiu lando, havanta spertojn pri la funkcipovo de burĝa demokratio, la regopotenco transiris al la Komunista Partio, tio ĉi efikis al la Esperanto-movado alimaniere, ol ekzemple en Bulgario kaj Hungario. Ne troviĝis forta laborista Esperanto-movado, hardita en ilegala batalo kaj per tio akirinta certagradan prestiĝon ĉe la partio, kaj tial sub la nova politika reĝimo la gvido de la movado ne estis transprenita de laboristaj esperantistoj, sed restis en la manoj de la reprezentantoj de la forta neŭtrala movado. Kiel aldone klarigis Rudolf Burda, malnova veterano de SAT, la laboristaj esperantistoj post februaro 1948 ja „havis konvenan okazon por forigi la neŭtralulojn el la centro de Praha, sed ni tion ne faris, konsciante ke per tia ago ni frapus samtempe la ankoraŭ ne tro fortan esp. movadon".[1]

Estis do la tasko de la ĝisnuna estraro de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko (EAĈSR) adapti sian laboron por Esperanto al la ŝanĝiĝintaj politikaj cirkonstancoj. Dum la unua jaro sub la komunista rego ŝajnis, ke ne nur kontentige pluevoluos la movado, sed ke ankaŭ restos la tradicie favora sinteno de la aŭtoritatoj. EAĈSR havis komence de 1949 pli ol 3 000 membrojn. Ĝia prezidanto Adolf Malík partoprenis la 34an Universalan Kongreson en Bournemouth kiel oficiala delegito de la Ministerio pri Informado kaj Klerigo, dum bulgaroj, hungaroj kaj rumanoj jam ne plu estis reprezentitaj – pro „tro severaj reguloj" de la registaroj, kiel plendis la organo de EAĈSR.[2] La Ministerio ankaŭ subtenis la eldonadon de propaganda gazeto, *Esperanto-Servo*, dissendita en kelkmil ekzempleroj al eksterlando.[3]

Aliflanke, jam de la fino de 1948 ne plu eblis pagi eksterlanden por la individua membreco en UEA aŭ la akiro de Esperantaj

1. R. Burda, „Pri la Ĉeĥosl. neŭtralaj esperantistoj", *Sennaciulo* 21. 1950, n-ro 7 (542), p. 7.
2. O. Ginz, „Nia kongreso en Bournemouth", *Esperantista* 4. 1949, p. 49.
3. Tiu ĉi „aktuala informa bulteno el Praha" (subtitolo) ekaperis en oktobro 1948. Ĝin redaktis Adolf Malík, kiu akiris ankaŭ la funkcion de afergvidanto de Esperanta subsekcio ĉe la Ministerio pri Informado kaj Klerigo.

libroj.[1] Klopodante solvi tiujn problemojn, EAĈSR sentis sin devigita pli eksplicite emfazi sian lojalecon al la reĝimo, kio inkluzivis – laŭ skemo jam observita en aliaj popoldemokratioj – insistajn alvokojn de la estraro al ideologia konformeco de la membroj. Tiuj alvokoj estis direktitaj ne nur kontraŭ la tradicia „neŭtralismo", sed ankaŭ kontraŭ la idearo de SAT, kiun subtenis konsiderinda nombro de laboristaj esperantistoj. Komence de junio 1949 rezolucio akceptita dum la 7a Ĉeĥoslovaka Esperanto-Kongreso en Liberec proklamis kiel devon de la esperantistoj „senindulge senmaskigi nestojn de la reakcio kaj de faŝismo kaj irigi kun ni ĉiujn, kiuj algluiĝis al ‚Esperanto por Esperanto'", t.e. kiuj „faras el Esperanto nuran amuzilon", kaj samtempe atakis „tendencon de kapitalista internacia reakcio misuzi tutmondan esperantistan movadon por trompaj imperialistaj celoj kaŝataj sub falsa devizo de kosmopolitismo".[2] Al la SAT-anoj, kiuj mem ĉiam malaprobis la „memcelan" uzon de Esperanto, estis klare, ke la atako kontraŭ „kosmopolitismo" celis ilin. Burda amare konstatis, ke „la severe neŭtralaj gesinjoroj", kiuj antaŭ februaro 1948 „kolektis belajn poŝtmarkojn k insultis nin ‚komunistaj esperantistoj'", nun por demonstri sian fidelecon al la reĝimo kalumnias la SAT-anojn „kosmopolitaj k kontraŭŝtataj".[3] Tuja sekvo de tiu kalumnio estis nuligo de jam donita permeso al pli ol 100 ĉeĥoslovakoj partopreni en la 22a SAT-Kongreso en Parizo.[4]

Dum iom da tempo ŝajnis, ke la oportunismo de iamaj „neŭtraluloj" certigos la pluekziston de la movado. Fine de majo 1950 la 8a Kongreso en Brno havis la rekordan nombron de preskaŭ mil partoprenantoj. Aŭtoritatuloj adresis kuraĝigajn vortojn, kaj Malík, kies kongresa parolado entenis fortajn atakojn kontraŭ kosmopolitismo, donis tre optimisman prijuĝon de la situacio: „Ankoraŭ neniam ni havis en nia Respubliko tian eblecon de disvolviĝo kiel en la Respubliko vere demokratia, popola, kiun ni

1. *Esperantista* 4. 1949, p. 4.
2. *Esperantista* 4. 1949, p. 42; *Internacia Kulturo* 4. 1949, n-ro 8, p. 14.
3. Burda, „Pri la Ĉeĥosl. neŭtralaj esperantistoj", p. 7. – Vd. ankaŭ *Sennaciulo* 22. 1951, n-ro 6 (553), p. 2.
4. *Sennaciulo* 20. 1949, n-ro 10 (533), p. 1; n-ro 11 (534), p. 6. – La nuligo de la permeso estis atribuita al la influo de Malík.

devas tutkore ami, ĉar la laboro por nia Respubliko estas samtempe laboro por la Esperanto-movado..."[1] Du monatojn poste, tamen, dum la Universala Kongreso en Parizo, en kies tagordon EAĈSR postulis meti la demandon de batalo por tutmonda paco[2], Ĉeĥoslovakio ne estis reprezentita. Granda bato sekvis: La 17an de septembro, precize kvin jarojn post sia starto, ĉesis la popularaj Esperanto-elsendoj de Radio Praha.[3] Kaj fine de 1950 EAĈSR nuligis sian asocian membrecon en UEA, ĉar tiu „estas tro videble influata de reakcia politiko imperiista kaj de Titoismo".[4]

Post kiam rompiĝis la rilatoj kun eksterlando, la situacio de EAĈSR iĝis enlande ĉiam pli kriza. La manko de lernolibroj kaj literaturo sekvigis drastan malkreskon de la membronombro, redakcioj rifuzis aperigi artikolojn de la Gazetara Servo de EAĈSR, kaj malpli ofte okazis kursoj de Esperanto. Aliflanke iom da espero donis letero de la Komunista Partio, kiu rekomendis, „ke ni daŭrigu nian sukcesan laboron laŭ la ĝisnuna maniero", tiel ke meze de junio 1951 Malík deklaris dum la asocia kongreso en Praha: „... la situacio ne estas tiom malluma, kiom ŝajnas al kelkaj. Sole malgrandaj animetoj suferas pro timo."[5]

En la dua duono de 1951 la stalinisma penetriĝo de la politika vivo en Ĉeĥoslovakio atingis sian kulminon: En septembro Rudolf Slánský, la ĝenerala sekretario de KPĈ, estis eksigita el la

1. *Esperantista* 5. 1950, p. 42; traduka eltiraĵo en *Esperanto-Servo* 3. 1950, n-ro 6/7, p. 1.
2. Letero de EAĈSR al UEA, de 17-4-1950. – UEA rifuzis la proponon: Letero de Malmgren al EAĈSR, de 7-5-1950.
3. *Esperantista* 5. 1950, p. 62.
4. Adolf Malík, „Sur novan vojon!", *Esperantista* 6. 1951, p. 2. – La leteroj de EAĈSR al UEA, de 31-12-1950 (eksiĝ-deklaro) kaj de 5-5-1951, indikis kiel kialon de la decido eksiĝi precipe la rifuzon de UEA „aktive" labori por paco. Vd. ankaŭ: „Eksiĝo de E.A.Ĉ.S.R.", *Esperanto* 44. 1951, p. 130-131. Artikolo en *Esperantisto Slovaka* (6. 1951, p. 1) konfesis, ke la decido estis farita „kun peza koro", memorigante interalie pri „la simpatioj, kiujn UEA montris al ĈSR dum la german-naziista okupado". La eksiĝo okazis laŭ konsiloj de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, buŝe peritaj de Malík: Stanislav Kamarýt, *Historio de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio*, Praha 1983, p. 177.
5. „Agado de la asocia kongreso 1951 en Praha", *Esperantista* 6. 1951, p. 91.

partio; en novembro li estis arestita, sub la jam ne plu originala akuzo esti kaŝa agento de imperiismo kaj titoismo.[1] Je la fino de tiu jaro la ĉeĥoslovaka Esperanto-movado spertis plian eskaladon de siaj malfacilaĵoj: La organo de EAĈSR, *Esperantista*, la revuo *Esperantisto Slovaka* kaj la propaganda gazeto *Esperanto-Servo* devis ĉesigi sian aperadon. La esperantlingve donitaj klarigoj por tio estis, ke oni „ne ricevis por 1952 la bezonatan kvanton da papero"[2] kaj ke la ministerio „reorganizis planon de eldonado de gazetoj"[3], sed la ĉeĥlingva frontartikolo de Malík en la lasta numero de *Esperantista* asertis: „La ebleco, ke niaj Esperantaj eldonaĵoj povus esti eksterlande misuzataj por malamika propagando, kaŭzis, ke la ĉeĥoslovakaj esperantistoj ne plu havos sian propran gazetaron." Eĉ nun Malík demonstris grandaniman memkontenton. Laŭ li, la malapero de la gazetoj „signifas, ke la batalo por interkompreniĝo inter la nacioj kaj por mondpaco nun surpaŝas sian plej altan ŝtupon – la amason, al kiu nia eta laboro jam ne sufiĉas".[4]

Tio ĉi aludis al la fakto, ke EAĈSR fine de 1951 jam troviĝis en stato de malorganiziĝo. Ĝiaj lokaj grupoj en 1950 komencis dissolviĝi kiel memstaraj unuoj kaj grandparte transformis sin en Esperanto-rondetojn ĉe entreprenaj kulturaj kluboj de Revolucia Sindikata Movado (ROH), distriktaj klerigaj asocioj aŭ lokaj grupoj de Ĉeĥoslovaka Junulara Asocio. EAĈSR celis analogan aranĝon sur tutlanda nivelo, nome sian akceptiĝon kiel sekcio de la kultura fako de ROH.[5] Ekde decembro 1951 speciala komisiono traktis kun partiaj kaj registaraj instancoj pri la demando kiel daŭrigi la organizitan laboron por Esperanto en Ĉeĥoslovakio. La 10an de julio 1952 la komisionanoj aŭdis dum kunsido en la Centra Komitato de KPĈ la rekomendon „ne propagandi kaj ne instrui Esperanton, eĉ se ĝi helpas al la pacbatalo kaj socialismo, ĉar la popoloj same ankaŭ sen internacia lingvo en tiuj aferoj interkompreniĝas kaj estas unuecaj". La partia reprezentanto krome konstatis „la danĝerecon de Esperanto", ĉar ĝi ebli-

1. En decembro 1952 Slánský estis ekzekutita.
2. „Ni dankas", *Esperantisto Slovaka* 6. 1951, p. 178.
3. *Esperantista* 6. 1951, p. 137.
4. A. Malík, „Končíme" (Ni finas), *Esperantista* 6. 1951, p. 133.
5. „Raporto pri agado de EAĈSR en 1950", *Esperantista* 6. 1951, p. 28.

gas al klasaj malamikoj subfosan agadon.[1] Tio estis klara avizo pri la definitiva decido de la partio, kaj efektive, la 19an de aŭgusto Malík estis vokita al la Ministerio pri Internaj Aferoj por ricevi la buŝan ordonon, ke EAĈSR „libervole" likvidu sin.[2] La 6an de septembro la asocia komitato kunvenis por eksterordinara kunsido. Malík pledis por akcepto de la ministeria ordono, ĉar nur tiam eblos individue daŭrigi la laboron por Esperanto. Lia propono estis akceptita per 23 voĉoj; 18 sindetenis. Burda kaj du aliaj voĉdonis kontraŭ la memlikvido de EAĈSR, ĉar ili preferis atendi devigan dissolvon de la asocio.[3]

La sentojn, kiujn kredeble havis la plej multaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj post la likvidiĝo de sia asocio, unu el ili redonis jene:

> Se ne estus fakto, ke tiel okazis, mi ne kredus! Neniam en mia vivo mi estus imaginta, ke foje venos tempo kaj la Esperanto-movado estos likvidota – de socialista registaro.[4]

Esperanto en Ĉeĥoslovakio ne plu estis dezirata eĉ por konigi la verkon de „nacia heroo" en eksterlando. La Esperanta traduko de *Raporto desur la eŝafodo* de la ĉeĥa komunisto Julius Fučík, ekzekutita de la nazioj, estis jam finkompostita en 1951, sed sub la premo de la aŭtoritatoj ne plu atingis la formon de libro.[5]

Ĉeĥoslovakio estis la lasta el la popoldemokratioj eŭropaj, kiu transprenis la modelon de Soveta Unio ankaŭ en rilato al la Esperanto-movado.[6] Kiam ĉesis la vivo de EAĈSR, restis nur unu lando en la soveta influsfero provizore indulgata de la ondo de malfavoro kontraŭ Esperanto: Ĉina Popola Respubliko. Kun la ĉeesto de registaraj reprezentantoj en marto 1951 estis fondita en Pekino Ĉina Esperanto-Ligo (ĈEL), kies prezidanto iĝis la veterana esperantisto Hujucz. Estante estro de la Eldona Admi-

1. R. Burda, „Uzu fiakriston, ĉar aŭtomobilo estas burĝa", *La Pacdefendanto* 1952, n-ro 8 (aŭg.), p. 3.
2. „Ĉu la batalo fin[iĝ]is", *La Pacdefendanto* 1952, n-ro 10 (okt.), p. 1.
3. Samloke, p. 1-2; kp. Kamarýt, p. 177-178.
4. Letero de Hejda, *La Pacdefendanto* 1952, n-ro 11, p. 4.
5. Krome, EAĈSR intencis eldoni libron pri la naziaj kruelaĵoj en la vilaĝo Lidice; ankaŭ ĝi ne aperis „pro teknikaj malfacilaĵoj": *La Pacdefendanto* 1952, n-ro 5, p. 5. – La traduko de la verko de Fučík aperis nur en 1979, sub la titolo *Riporto skribita en la pendumila maŝo*.
6. En Albanio ŝajne ne necesis oficiala paŝo kontraŭ Esperanto, ĉar tie movado praktike ne ekzistis.

nistracio, Hujucz povis atingi, ke jam en majo 1950, iom pli ol duonan jaron post la fondiĝo de Ĉina Popola Respubliko, la Fremdlingva Eldonejo komencu eldoni monatan revuon en Esperanto, *El Popola Ĉinio*. Apud ĝi, aperis – unue kiel organo de Ŝanhaja Esperantista Ligo, poste kiel tiu de ĈEL – la revuo *Popola Mondo*, kiu estis dediĉita al la disvastigo de Esperanto en Ĉinio.

Sed jam en januaro 1952 ĉesis aperi *Popola Mondo*, tiel ke restis nur, por konsumado en eksterlando, la propaganda revuo *El Popola Ĉinio*. Dum iom da tempo ĝi estis la sola esperantlingva periodaĵo, per kiu la esperantistoj en orienta Eŭropo povis kontentigi sian legemon. En Ĉeĥoslovakio la revuo havis ĉ. 1000 abonantojn, kiuj pretis eĉ pagi duobligitan abonprezon, post kiam ĝian distribuadon transprenis ŝtata entrepreno.[1] Sed baldaŭ „ia miopa interveno kaŭzis la ĉesigon de la sendado al nia lando", kiel formulis Rudolf Burda[2]; la poŝtoficejoj en GDR rifuzis akcepti la ĉinan revuon kiel „nedezirinda propagando de kosmopolitismo".[3] Sekve, la ĉinoj juĝis minimume neoportuna la pluan eldonadon de *El Popola Ĉinio*. Fine de 1953 ĝi anoncis sian adiaŭon al la legantoj, klarigante ke la ekzisto de periodaĵoj kaj libroj en naciaj lingvoj „ebligas al la diverslandaj legantoj rekte kaj pli bone kompreni Ĉinion".[4] Kiun komunikilon ĝi konsideris pli taŭga por tiu celo, la eldonejo manifestis per tio, ke ĝi sendis al la abonintoj en la popoldemokratioj (kaj eĉ en Usono) la ekvivalentan revuon en rusa lingvo.[5]

Kiel jam delonge en Soveta Unio, tiel do en ĉiuj landoj tiutempe rigardataj kiel ĝiaj satelitoj la esperantistoj perdis ĉian eblecon por publika agado. Tamen, la subpremo de Esperanto ne estis absoluta en la komunisma bloko; ĝi variis de lando al

1. Rud. Burda, „Necesas disvastigi nian movadon!", *Paco* 1954, n-ro 4 (feb.), p. 2.
2. Rudolf Burda, „Pri la esperantista pacmovado en Ĉeĥoslovakio", *Paco* 1954, n-ro 3 (jan.), p. 12.
3. *TKKE Informas* 1956, n-ro 2, p. 3 (aldono al *Bulteno de Esperantista Klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2*, 1956, n-ro 34/35 (jan./feb.).
4. „Adiaŭ", *El Popola Ĉinio* 4. 1953, p. 287.
5. Letero de Ralph R. Bonesper al Boris I. Sokolov, de 30-3-1954, en *Informilo de Esperanto-Koresponda Studrondo* (Tokio) 1955, n-ro 3 (sept.), p. 10.

lando. En Rumanio kaj Hungario la movado estis preskaŭ komplete haltigita. En Bulgario la situacio ne estis multe pli bona: Jam kun reduktita eldonkvanto, la revuo *Internacia Kulturo* post ankoraŭ kvar numeroj en 1950 interrompis sian aperon[1]; en printempo 1952 ĉesis la Esperantaj elsendoj de Radio Sofia.[2] Sed Bulgara Esperanto-Kooperativo povis, eĉ se modeste, plufunkcii. En Germana Demokratia Respubliko malgraŭ tre severa kontrolo de la aŭtoritatoj multaj esperantistoj sekrete kunvenis, faris komunajn ekskursojn por ekzerci sian lingvoscion kaj konservis perletere la kontakton kun esperantistoj en Federacia Respubliko kaj en eksterlando.[3] Relative bonŝancaj estis la ĉeĥoslovakaj esperantistoj, ĉar sur loka nivelo ili povis pluagi en la kadro de sindikataj aŭ klerigaj kluboj. Regule okazis someraj kursoj kaj junularaj tendaroj. Subtila formo de varbado por Esperanto estis ekspozicioj, kie materialoj akiritaj per Esperanto raportis pri strikoj en okcidento; esperantistoj organizis ankaŭ monkolektojn por persekutataj pacdefendantoj en kapitalismaj landoj, ekz. Japanio. Aperis, formale kiel eldonaĵoj de lokaj neesperantistaj organizaĵoj, kelkaj stencilitaj bultenoj, kiuj servis – fakte, duonlegale – kiel interligiloj de la esperantistoj en tutlanda skalo. Krom *Bulteno de Esperantista Klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2* lanĉita en marto 1953[4], aparte grava estis la bulteno *La Pacdefendanto*, aperanta en Plzeň jam ekde januaro 1952 kaj redaktata de Rudolf Burda, kies signifo poste sentiĝis ankaŭ ekster la limoj de Ĉeĥoslovakio.[5]

Malplej striktaj estis la limigoj en Pollando. Kvankam en aŭgusto 1950 ĉesis la Esperantaj elsendoj de Pola Radio kaj unu post la alia likvidiĝis la lokaj filioj (el 30 restis nur la filioj en Varsovio kaj Wrocław), Asocio de Esperantistoj en Pollando (AEP)

1. Post pli ol unujara interrompo, en januaro 1952 aperis ankoraŭ unu numero de *Internacia Kulturo*, kiu estis definitive la lasta.
2. *Heroldo de Esperanto* 28. 1952, n-ro 7 (1159), p. 4.
3. P.G. „Raporto el Saksio", *Heroldo de Esperanto* 29. 1953, n-ro 17 (1187), p. 2; E-er (= Ewald Ebmeier), "Esperanto vivas malantaŭ la Fera Kurteno", *Esperanto-Post* 6. 1953, p. 113, 124.
4. Osvětová beseda estas la ĉeĥlingva nomo de ŝtate subtenataj klerigaj kluboj en Ĉeĥoslovakio.
5. Pri tio vd. ĉap. 4.5.4. – Krome, povis regule aperi la brajle presita revuo *Aŭroro* en Praha, fondita en 1920 por blindaj esperantistoj.

konservis sian oficejon kaj eldonis, sub la formo de „ekzercara materialo al Koresponda Kurso", tre modestaspektan informilon *Tra la Mondo kaj Literaturo*. Sed AEP ne rajtis publikigi pagitajn anoncetojn pri sia koresponda kurso, kaj nur okaze de la datreveno de la morto de Zamenhof du varsoviaj ĵurnaloj aperigis pagitajn nekrologojn en nigra kadro pri okazonta renkontiĝo ĉe la tombo de la kreinto de tiu lingvo, kiu nun en lia propra patrujo estis kvazaŭ anatemita.[1]

4.5.2. *Stalin kontraŭ Marr*

Ĉirkaŭ la sama tempo, kiam en la popoldemokratioj silentiĝis la Esperanto-movado, en Soveta Unio ekokazis diskuto pri lingvistikaj demandoj, kiu trovis konsiderindan atenton ankaŭ en okcidento. La 9an de majo 1950, *Pravda* komencis aperigi aron da artikoloj pri la situacio de la soveta lingvistiko, en kiuj, surprize, la jafetida teorio de Marr estis forte kritikata. Kaj tre baldaŭ venis ankoraŭ pli granda surprizo, ĉar la 20an de junio tute neatendite Stalin mem enmiksiĝis en la diskuton. Per tio la unuavide pure lingvistika disputo estis subite levita al plej alta politika nivelo.

Stalin klare partianiĝis – kontraŭ Marr. La esencajn principojn de ties „nova instruo" li simple deklaris senbazaj. Dum por Marr la lingvo – kiel la arto – estis kategorio de la ideologia superstrukturo kaj ĉiuj ŝanĝoj en la lingvo dependas de la ŝanĝoj en la ekonomio, Stalin decide neis, ke la lingvo apartenas al la superstrukturo. Laŭ li, la lingvo estas io memstara kaj pli daŭra, ol superstrukturo aŭ bazo; la sfero de ĝia efiko transiras vaste tiun de la superstrukturo, ĉar ĝi estas rekte ligita kun la produkta agado de la homo.

Ankaŭ rilate la klasan karakteron de la lingvo Stalin deturnis sin de la ĝis tiam valida instruo. Marr estis elmetinta la tezon, ke lingvo estas ĉiam klasa lingvo kaj ke ne ekzistas nacia lingvo unuiganta la diversajn klasojn de socio. Tion Stalin kontestis, insistante pri la ekzisto de unueca nacia lingvo. Laŭ li, la lingvon de la

1. „Al niaj legantoj", *Pola Esperantisto* 37. 1957, n-ro 1 (sept./okt.), p. 1; I. Dratwer, „Strato Marszałkowska 81", *Pola Esperantisto* 42. 1962, n-ro 5/6 (sept./dec.), p. 13; letero de Isaj Dratwer, *Esperanto* 61. 1968, p. 85.

tuta popolo apenaŭ influas la unuopaj klasoj, kaj krome estus malutile, se la klasbatalo limigus la lingvan unuecon:

> Sen lingvo komprenebla al la socio kaj komuna por ĝiaj membroj la socio ... haltigas sian produktadon, disfalas kaj ĉesas ekzisti kiel socio. En tiu senco la lingvo kiel ilo de komunikiĝo estas samtempe ilo de batalo kaj socia evoluo.[1]

Stalin do eltiris la lingvon el la skemo de bazo kaj superstrukturo, atribuis al ĝi klastranscendan karakteron kaj akcentis ĝian signifon kiel ligilo de la socio tra multaj epokoj. Kontraŭe al Marr, kiu estis tute fiksita al la klasa karaktero de lingvoj kaj komprenis la lingvan evoluon, kiel la socian evoluon, laŭŝtupa, Stalin klarigis, ke la lingvo servas kaj al la burĝa kaj al la socialisma kulturo, konsistigante la neŝanĝiĝantan nacian formon de la enhave ŝanĝiĝanta kulturo. Per aliaj vortoj: La intereso de nacio rangas super tiu de klaso.

La konsekvenco, kiun havis la rompo kun la teorio de Marr, aparte klare montriĝis rilate la demandon de estonta unueca lingvo de la homaro, kio lige kun nia temo estas plej interesa. En 1930 Stalin – tute simile kiel Marr – estis asertinta, ke en la epoko de komunismo la naciaj lingvoj kunfandiĝos en unu komunan lingvon, kiu „estos nek la grandrusa nek la germana, sed io nova". Sed dudek jarojn poste Stalin skribis en *Pravda*:

> Estus tute malĝuste pensi, ke rezulte de la kruciĝo de ekzemple du lingvoj estiĝas nova, tria lingvo, kiu similas neniun el la krucitaj lingvoj kaj kvalite diferencas de ĉiu el ili. Fakte, en la kruciĝo unu el la lingvoj kutime elmergiĝas kiel venkinto, konservas sian gramatikon kaj bazan leksikon kaj plue evoluas laŭ la internaj leĝoj de sia propra evoluo, dum la alia lingvo iom post iom perdas sian kvaliton kaj iom post iom formortas.
>
> Do, la kruciĝo ne rezultigas novan, trian lingvon, sed restigas unu el la lingvoj...
>
> Tamen, okazas ia riĉigo de la vortaro de la venkinta lingvo koste de la venkita lingvo, sed per tio ĝi ne estas malfortigata, sed kontraŭe fortigata.

Laŭ tiu ĉi prognozo, la lingva evoluo ne estas tia, ke la diversaj lingvoj egalrajte „floras" kaj reciproke sin riĉigas por fine kunfluiĝi en unuecan lingvon – kiel Stalin estis proklaminta en 1930. Validis nun la tezo, ke ĉiam, kiam lingvoj renkontiĝas, ili komencas fortan batalon, kiu povas finiĝi nur per venko aŭ malvenko.

1. J. Stalin, *Der Marxismus und die Fragen der Sprachwissenschaft*, Berlin 1951, p. 26-27.

Stalin tuj donis ankaŭ ekzemplon por la venko de unu lingvo super alia:

> Tiel okazis ekzemple ĉe la rusa lingvo, kun kiu en la daŭro de la historia evoluo kruciĝis la lingvoj de aro da aliaj popoloj kaj kiu ĉiam elmergiĝis kiel venkinto.

En tiu procezo estis riĉigita la vortaro de la rusa lingvo, sed ĝia „nacia individueco" eĉ ne spertis „la plej etan damaĝon".[1]

La interveno de Stalin en lingvistikan diskuton estis konsiderata en kaj ekster Soveta Unio kiel sensacia unuavice pro tio, ke la ĝenerala sekretario de KPSU elpaŝis kontraŭ Marr, kies aŭtoritato kiel kreinto de nova, materiisma lingvoscienco ŝajnis esti ĝis tiam netuŝebla. Al tiuj, kiuj registris la detronigon de Marr kun aparta interesiĝo, apartenis la esperantistoj. Ĉar esperantlingvaj verkoj pli frue kaj denove en 1950 asertis proksimecon inter la instruo de Marr kaj la celoj de la Esperanto-movado[2], ne estas malfacile kompreneble, ke oni supozis rilaton inter la artikoloj de Stalin en *Pravda* kaj la malfacilaĵoj, kiujn havis la esperantistoj en la landoj sub soveta influo. La distanciĝo de la internaciisma skolo de Marr malebligis, laŭ tiu vidpunkto, la pluan disvastigadon de Esperanto en la orienteŭropaj popoldemokratioj.[3]

Lasante flanken la fakton, ke tia argumentado (implicanta, ke Esperanto nur tiumomente iĝis neakordigebla kun la oficiala lingva politiko) evidente ne klarigas la multe pli frue okazintan malaperon de la soveta movado kaj ties kialojn, ni tamen dediĉu atenton al la demando, ĉu ĝi almenaŭ faciligas komprenon pri tio, kio okazis post la milito.

Kronologio de la eventoj montras, ke la malakceptiĝo de la teorioj de Marr sekvis, kaj ne antaŭis, la malhelpojn al la Esperanto-movado en la popoldemokratioj. La orienteŭropaj esperantistoj estis jam malorganiziĝintaj aŭ antaŭsentis, ke tia sorto atendas ilin, minimume unu jaron antaŭ ol Stalin surprizis la publikon per sia reapero, unuafoje post 1938, sur la scenejo kiel teoriisto. Ĝenerala gvidlinio, ke ĉesu ĉia ŝtata subteno al la

1. Samloke, p. 35-36.
2. Ivo Lapenna, *Retoriko*, Parizo 1950, p. 20-25.
3. Lucien Laurat, *Staline, la linguistique et l'impérialisme russe*, Paris 1951, p. 79-86.

Esperanto-movado, verŝajne estis decidita plej malfrue en aŭtuno 1949 – pli ol duonan jaron, antaŭ ol komenciĝis la diskuto en la kolumnoj de *Pravda*. Kiam la 2an de oktobro 1949 Lajos Kökény kiel kutime iris al la studio de Radio Budapeŝto, li aŭdis tie, ke ekde tiu tago la stacio ne plu disaŭdigos Esperantajn elsendojn. „De nun tio estas la linio", oni diris al li.[1]

Tiu ĉi „nova linio" certe ankaŭ ne estis antaŭsigno de preparata atako kontraŭ la marristoj kaj iliaj kvazaŭaj aliancanoj. Eĉ tute male: Ĝuste meze de 1949 ĉesis mallonga periodo karakterizita per timemaj provoj eliri la rigidiĝintan framon de la jafetida teorio. Jam en oktobro 1948 la adeptoj de Marr refirmigis sian pozicion, lanĉante vastskalan atakon kontraŭ ĉiuj deviantoj de la instruo de sia majstro. Fakajn kolegojn, kiuj, ekzemple, pledis por revivigo de la kompara metodo en lingvistiko, la marristoj kulpigis esti sub la influo de „reakciaj kaj idealismaj fluoj de la eksterlanda burĝa lingvistiko". Krome, per okazaj aludoj al la disputo kun Jazykfront komence de la 1930aj jaroj la marristoj indikis, ke ili celas – same kiel tiutempe – restarigi sian absolutan monopolon en la soveta lingvistiko, kaj efektive la 21an de julio 1949 la Akademio de Sciencoj per oficiala deklaro konfirmis la pluan validon ekskluzivan de la teorioj de Marr.[2]

Ĉu estas nur hazardo, ke Esperanto iĝis nefavorata en la orienteŭropaj landoj ĝuste, kiam la marristoj troviĝis en simile zenita pozicio kiel en la mezo de la 1930aj jaroj, plene ĝuante oficialan apogon kaj ĵus venkinte siajn kritikintojn? Estis unu el la gvidaj marristoj, T.P. Lomtev[3], kiu deklaris jam komence de 1949:

> La nuntempaj apologiistoj de la imperiismo faras vastan propagandon por la kosmopolitismo, reakcia ideologio de la imperiista burĝaro. Ili utiligas kiel ideologian armilon la ideojn de la renegato Kautsky, koncerne ultra-imperiismon, kunfandiĝon de la nacioj kaj iliaj lingvoj en la

1. Lajos Kökény, „Esperanto en Hungario, 1945-1949", *Hungara Vivo* 10. 1970, n-ro 2, p. 19.
2. Lawrence L. Thomas, „Some notes on the Marr school", *The American Slavic and East European Review* 16. 1957, p. 347; René L'Hermitte, „La linguistique soviétique", en: R. L'Hermitte (red.), *La linguistique en U.R.S.S.*, Paris 1969, p. 8.
3. Lomtev antaŭe estis ano de Jazykfront

epoko de kapitalismo kaj imperiismo, kreon, en la nuna epoko, de unu sola lingvo universala.[1]

Al tiu linio klopodis sin adapti la bulgara esperantisto Atanas Lakov, kiu skribis en decembro 1949:

... la estonta komuna lingvo de la komunismo kondukas tra evoluado de naciaj lingvoj dum socialismo. Provoj eligi naciajn lingvojn per enigado de esperanto okazigos nur kulturan malprogreson por la nacioj, kiuj estas subpremataj dum kapitalismo. Provo trudi esperanton en la nuna tempo kiel universalan lingvon, en ĝia nuna precipe eŭropa formo signifas perfortan likvidon de kulturoj kaj lingvoj de ekstereŭropaj popoloj, signifas starigon de esperanto kiel ilo de imperiisma ekspluatado.[2]

Kia estu la lingva politiko en la nuna tempo, tion proklamis sovetaj lingvistoj kaj verkistoj jam antaŭ la elpaŝo de Stalin kontraŭ Marr. En sia novjara numero de 1949 *Literaturnaja gazeta* ripetis, kion *Pravda* estis skribinta jam en 1938: Al ĉiu historia epoko estis rilatigita unu „mondlingvo" – al la antikva tempo la latina, al la feŭda epoko la franca, al la kapitalisma la angla kaj, fine, al la epoko de socialismo la rusa.[3] Kiel en novembro 1949 precizigis la akademiano N.T. Jakovlev, la fina perspektivo jam validas en la nuntempo, ĉar la rusa lingvo „ne estas nur la lingvo de USSR, sed ankaŭ la internacia lingvo de la popoldemokratioj".[4] Kaj Lomtev faris pluan paŝon, nomante la rusan lingvon „la instrumento de la plej progresinta civilizacio, de la socialisma civilizacio, de la plej progresema scienco" kaj „la lingvo de la paco kaj progreso".[5]

Tia laŭdado de la rusa lingvo, kiu komenciĝis meze de la 1930aj jaroj kaj atingis kulminon fine de la 1940aj jaroj, neniel konformis kun la tezo de Marr, laŭ kiu ĉiun lingvon formas la klaso, ne la nacio. Marr ĉiam rifuzis trakti lingvojn („t.n. naciajn lingv-

1. T.P. Lomtev, „I.V. Stalin o razvitii nacional'nyh jazykov v epohe socializma" (J.V. Stalin pri la evoluo de naciaj lingvoj en la epoko de socialismo), *Voprosy filosofii* 1949, n-ro 2; cit. Laurat, p. 80-81.
2. A. Lakov, „Josif Visarionovič Stalin", *Internacia Kulturo* 4. 1949, n-ro 12, p. 4.
3. David Zaslavskij, „Velikij jazyk našej epohi" (La granda lingvo de nia epoko), *Literaturnaja gazeta*, 1-1-1949; cit. Jindrich Kucera, „Soviet nationality policy. The linguistic controversy", *Problems of Communism* 3. 1954, n-ro 2, p. 25. – Kp. „Ekspansio de la rusa lingvo", *Sennaciulo* 21. 1950, n-ro 2 (537), p. 7.
4. *Vestnik Akademii Nauk SSSR* 1950, n-ro 2; cit. Laurat, p. 80.
5. Cit. Laurat, p. 73.

ojn") kiel tuton, kiel nacian heredaĵon, sed konsideris ilin kombinaĵo de diversaj klasaj lingvoj aŭ de restintaj elementoj de klasaj lingvoj. Laŭ li, kun la ekonomia kaj politika progreso kaj la malapero de klasaj diferencoj tiuj lingvoj intermiksiĝos kaj fine, en la tutmonda senklasa socio, cedos sian lokon al tute nova, universala lingvo. Tio ĉi ne allasis la eblecon, ke unu el la nunaj lingvoj leviĝos kiel venkinto el interlingva batalo. Male, Marr tute senkaŝe deklaris, ke la novaj metodoj de lia teorio, „kiu donas egalan konsideron al ĉiuj lingvoj, disrompos la pseŭdo-sciencan, ideologian principon de la aŭtokratio de la rusa lingvo".[1]

Malgraŭ tiu klara starpunkto de Marr, Soveta Unio sub Stalin sekvis politikon de rusigo, kaj la jafetidologio, kiu restis la gvida skolo en la soveta lingvistiko, devis servi al tiu politiko, kiel ajn ĝi malproksimiĝis de la originaj ideoj de Marr (mortinta en 1934). Se la disĉiploj de Marr ne disponigis sin al la reĝimo dekomence kiel obeemaj iloj, ili rapide estis malhelpitaj tiri el la teorio konkludojn, kiuj kontraŭis la politikon de la Partio.

Fine tamen Stalin komprenis – sendube, mirige malfrue –, ke por pravigi politikon, kiu celkonscie akcelis nacian lingvon, la rusan, kaj kiu utiligis nacian tradicion, la rusan, cele al forĝado de soveta patriotismo, ne plu taŭgis la sinapogo al la teorio de Marr. La kontraŭofensivo de la marristoj en 1948/49 eble liveris la aktualan okazon: Iliaj atakoj kontraŭ la uzo de tradiciaj lingvistikaj metodoj, precipe ilia rifuzo akcepti la tradiciojn de la burĝa rusa lingvistiko, estis agmaniero preskaŭ hereza, kiam oni konsideras, ke samtempe la ŝtata propaganda aparato elstarigis la gvidan rolon de ĉio rusa kaj la kontinuecon de la rusa scienco. Tial do Stalin persone intervenis. Kun sia aŭtoritato kiel plej supera direktanto de la Partio li fiksis, ke la lingvo ne estas klasa fenomeno kaj ne apartenas al la superstrukturo. Pruvcele li atentigis, ke de la tempo de Puŝkin la rusa lingvo restis „en ĉio esenca" sen ŝanĝo, servante kiel komuna nacia lingvo al ĉiuj klasoj de la sinsekvaj feŭda, kapitalisma kaj socialisma epokoj.

Certe, la forigo de la malharmonio inter la teorio de Marr kaj la grandruse kolorita tutsoveta patriotismo ne estis la sola motivo, pro kio Stalin suriris la scenejon de lingvoscienco. Ke la

1. Cit. Kucera, p. 27.

soveta lingvistiko tiom dependis de la jafetida teorio, estis kondukinta al aro da negativaj fenomenoj. Tiu dependeco ĝenis pli efikan lingvo-instruadon en lernejoj, kaŭzis stagnadon en la rusa filologio kaj pro la malakcepto de la kompara metodo baris kontraŭ historiaj esploroj pri la rilatoj inter la rusa kaj aliaj slavaj lingvoj. Sed kiel ajn utile estis ŝovi al la marristoj nun la plenan kulpon pri ĉiuj preterlasoj kaj eraroj en la soveta lingvistiko: La signifo de la verdikto de Stalin kontraŭ Marr troviĝas unuavice en tio, ke estis forigita unu el la lastaj restaĵoj de la revolucia romantikismo el la pionira periodo de la soveta ŝtato. La vojo estis libera por la senhalta disvolviĝo de la „granda rusa lingvo".

Tiun ĉi prijuĝon de la motivoj de Stalin ankaŭ ne ŝanĝas la fakto, ke en la daŭro de la lingvistika debato Stalin relativigis sian tezon pri „venkinta lingvo". Kiel montras lia respondo al la kamarado A. Ĥolopov, aperinta en *Pravda* de la 2a de aŭgusto 1950, li estis demandita pri la akordigeblo de tiu tezo kun sia formulo de 1930. Stalin reagis je la demando per tio, ke li neis kiun ajn kontraŭdiron. Tute simile kiel tiutempe, kiam li estis memorigita pri sia pli frua (en 1925) malaprobo de la prognozo de Kautsky, Stalin „solvis" la kontraŭdiron tiamaniere, ke li diferencigis inter la malsamaj epokoj, al kiuj rilatas liaj eldiroj.

La formulo pri venko de pli forta lingvo rilatas, klarigis Stalin, al la epoko antaŭ la tutmonda venko de socialismo –

> kiam la ekspluatantaj klasoj estas la reganta forto en la mondo, kiam restas valida la nacia kaj kolonia subpremo, kiam la nacia izoliĝo kaj la reciproka malfido de la nacioj estas firmigitaj per la interŝtataj diferencoj, kiam ankoraŭ ne ekzistas nacia egalrajteco, kiam la kruciĝo de lingvoj okazas laŭ la vojo de batalo pri la rego de unu el la lingvoj, kiam ankoraŭ ne ekzistas kondiĉoj por la paca kaj amika kunlaboro de la nacioj kaj lingvoj, kiam sur la tagordo estas ne la kunlaboro kaj reciproka riĉigo de la lingvoj, sed la asimilado de unuj kaj la venko de la aliaj lingvoj.

Dum sub tiaj kondiĉoj povas esti nur venkintaj kaj venkitaj lingvoj, tute alie estos en la epoko post la venko de socialismo en tutmonda skalo, nome

> kiam jam ne plu ekzistas monda imperiismo, kiam la ekspluatantaj klasoj estas faligitaj, la nacia kaj kolonia subpremo estas forigita, la nacia izoliĝo kaj la reciproka malfido de la nacioj estas anstataŭigitaj per reciproka fido kaj la interproksimiĝo de la nacioj, kiam la nacia egalrajteco estas realigita, kiam la politiko de subpremo kaj asimilado de lingvoj estas likvidita, kiam la kunlaboro de la nacioj estas establita kaj kiam la naciaj lingvoj havas la eblon libere riĉigi unu la alian laŭ la vojo de kunlaboro.

Tiam povos efektiviĝi tio, kion li, Stalin, celis per sia formulo proklamita en 1930, nome „la kunfandiĝo de la lingvoj en unu komunan lingvon". En la epoko de socialismo tute ne plu temos pri la venko aŭ malvenko de lingvoj:

> Tiam ni ne havos du lingvojn, el kiuj unu suferas malvenkon, dum la alia elmergiĝas kiel venkinto el la batalo, sed centojn da naciaj lingvoj, el kiuj rezulte de longa ekonomia, politika kaj kultura kunlaboro de la nacioj elmergiĝos unue la plej riĉiĝintaj unuecaj zonaj lingvoj kaj poste la zonaj lingvoj kunfandiĝos en unu komunan internacian lingvon, kiu kompreneble estos nek la germana nek la rusa nek la angla, sed nova lingvo, kiu absorbis la plej bonajn elementojn de la naciaj kaj zonaj lingvoj.[1]

Tiel do ankoraŭfoje refreŝigante la mondrevolucian perspektivon, Stalin tamen ne prezentis solvon de la jena kontraŭdiro: Kiamaniere okazu paca kunfandiĝo de la lingvoj, se unue ili estis senkompate interbatalantaj?

La respondo estas, ke Stalin simple apenaŭ interesiĝis pri tio, kio okazos en fora estonteco. Li unuavice celis doni teorian pravigon al la evoluo en Soveta Unio. Pro tio li kondamnis la internaciismo doktrinon de Marr, akcentis la klastranscendan rolon de la rusa kaj nomis la forpuŝon de pli malgrandaj lingvoj signo de la historia progreso. Lia dirajo pri estonta mondlingvo, dume, impresas kvazaŭ alkroĉita[2]: Per la klaŭzo „en tutmonda skalo" li malhelpis, ke al lia profetajo povu esti kontraŭmetita la nuntempa realeco de Soveta Unio, en kiu ja la socialismo jam venkis kaj „la reciproka malfido de la nacioj" delonge estis likvidita. Post ĉio, en la kunteksto de la lingvistikaj tezoj de Stalin la prognozo de estonta eksternacia mondlingvo ŝajnas preskaŭ nekonsiderinda, ĉar ĝi ja premisus, ke la rusa lingvo ne atingus „finan venkon". Pli kredeble, laŭ la eldiroj de Stalin, estas, ke la rusa lingvo, ĉiam venke trapasinta la batalojn de la pasinteco kaj ser-

1. Stalin, *Der Marxismus*, p. 62-64. – La tezo pri formiĝo de „zonaj lingvoj" kiel antaŭŝtupo al la estiĝo de mondlingvo aperis jam en la artikolo de Stalin, „La nacia demando kaj la leninismo" (*Werke* XI 305-312). Tiu ĉi artikolo estis publikigita en 1949 – kun noto, ke Stalin ĝin verkis jam en 1929. Tio ŝajnas apenaŭ kredinda, kiam oni konsideras la fakton, ke en sia kongresa parolado de 1930 Stalin tute ne parolis pri zonaj lingvoj (kp. Thomas, „Some notes...", p. 343, noto 77).
2. Kp. Ernst Nolte, *Deutschland und der Kalte Krieg*, München, Zürich 1974, p. 342.

vanta al la popoloj de Soveta Unio kiel unuigilo, daŭrigos sian venkiron, pligrandigos sian terenon ankaŭ ekster Soveta Unio kaj donos, kiel potenca zona lingvo, esencan influon sur la estontan mondlingvon.[1] Tiun ĉi interpreton de la rolo asignita al la rusa apogas la fakto, ke ankaŭ en la popoldemokratioj ĝi estis propagandata kiel „internacia lingvo de socialismo" kaj ke sovetaj lingvistoj samtempe furioze polemikis kontraŭ la angla, la lingvo de la „uson-anglaj imperiistoj".[2]

Ekster konsidero restis, kial sub la kondiĉoj de la fido reganta inter la popoloj de Soveta Unio la rusa lingvo plue pligrandigu sian uzosferon koste de aliaj lingvoj kaj kial oni ne komencu jam fari preparlaborojn por la estonta supernacia lingvo. Stalin mem ne klare esprimis sin pri tio, ĉu iel eblas akceli la procezon de lingva unuiĝo, sed tion faris lia samlandano, la kartvela lingvisto Arnold Ĉikobava, kiu per sia maja artikolo en *Pravda* estis lanĉinta la diskuton. Kritikante Marr, li celis ankaŭ ties tezon pri komuna lingvo de la estonta homaro. Unuavide, skribis Ĉikobava, Marr tiurilate kongruas kun la marksismo-leninismo, sed fakte lia sinteno estas „falsa, nemarksisma" ankaŭ en tiu okazo. Citante la postulon de Marr, ke „la homaro proksimiĝanta al ekonomia unueco kaj al senklasa socio ne povas ne apliki artefaritajn, science ellaboritajn metodojn por la rapidigo de tiu monda procezo", Ĉikobava konstatis kun sinapogo al pli fruaj eldiroj de Stalin:

> Kiel konate, la marksistoj havas pri tio alian komprenon. Ili opinias, ke la procezo de formorto de la naciaj lingvoj kaj de kreiĝo de unu komuna mondlingvo okazos iom post iom, sen iaj „artefaritaj metodoj", kiuj „plirapidigu" tiun procezon.
> La apliko de tiaj „artefaritaj metodoj" signifus la uzon de perforto kontraŭ la nacioj, kion la marksismo ne povas permesi.[3]

1. Jam en 1945 la lingvisto Vinogradov malkaŝe diris, ke la privilegia pozicio de la rusa en Soveta Unio „kreas taŭgajn kondiĉojn, kiuj en la estonteco mallongigos la vojon al unu sola lingvo por la tuta homaro": V.V. Vinogradov, *Velikij russkij jazyk* (La granda rusa lingvo), Moskva 1945; cit. Kucera, „Soviet nationality policy", p. 29.
2. Edward F. James, „Soviet linguistic policy and the international language movement", *International Language Review* 1. 1955, n-ro 1 (okt./dec.), p. 10-12; Goodman, „World state and world language", p. 723-724.
3. A.S. Ĉikobava, „O nekotoryh voprosah sovetskogo jazykoznanija" (Pri kelkaj demandoj de la soveta lingvoscienco), *Pravda*, 9-5-1950; germane en: Wolfgang Steinitz (red.), *Beiträge aus der sowjetischen Sprachwissenschaft. Folge I*, Berlin 1952, p. 17.

Kvankam eble la ĉefa intenco de Ĉikobava estis ŝovi al la marristoj la kulpon pri mallertaĵoj en la alfabetigo kaj normigo de nerusaj lingvoj en Soveta Unio[1], la tezo, kondamnita de li kiel „nemarksisma", estis ĝuste esenca punkto en la instruo de Marr, kiun la esperantistoj uzis antaŭ marksismaj instancoj por pravigi sian agadon.

La atako de Ĉikobava kontraŭ provoj rapidigi la formiĝon de la tuthomara lingvo per artefaritaj metodoj estis sankciita de Stalin, kiam kelkajn semajnojn poste li enmiksiĝis en la diskuton, ĵetante anatemon sur Marr. Ne ĉiuj tuj komprenis la plenan sencon de la elpaŝo de Stalin; ankaŭ kelkaj esperantistoj lasis sin mistifiki de li. La fakto, ke li parolis pri estonta eksternacia mondlingvo, elvokis inter la prematajn esperantistoj en la popoldemokratioj dumtempe la esperon, ke eblas oferti Esperanton kvazaŭ „provo de la mondlingvo profetita de Stalin".[2] Sed tia estis la reago de esperantistoj elkreskintaj en burĝa tradicio, kiuj ne orientiĝis en la dialektiko de Stalin kaj kredeble eĉ ne sciis pri la teoriaj diskutoj en Soveta Unio komence de la 1930aj jaroj. Pli da senso por la tikleco de la temo havis la komunistaj esperantistoj de Bulgario, al kiuj jam antaŭ la diskuto estiĝinta en 1950 estis klare, ke la vojo al la unueca lingvo povas konduki nur tra la evoluo de la naciaj lingvoj; ili eksplicite avertis kontraŭ la iluzio, ke Esperanto „povas esti la estonta lingvo de la homaro (t.e. de la komunismo)".[3] La saman konkludon faris post 1950 la partiaj ideologoj en orienta Eŭropo, vokitaj al interpreto de la lingvistika kontribuo de Stalin: Ili klarigis pri la karaktero de la estonta, nova mondlingvo, „ke ĝi ... ne estos Esperanto aŭ Ido aŭ iu alia arte elpensita lingvo, sed nova vivanta lingvo, kiun kreos la

1. Cetere, la opinion de Ĉikobava kontraŭis alia lingvisto, kiu argumentis, ke ekzistas nur artefaritaj literaturaj lingvoj kaj ke „artefaritaj metodoj" ne nepre devas signifi „uzon de perforto": L. Bulaĥovskij, „Na putjaĥ materialističeskogo jazykovedenija" (Sur la vojo al materiisma lingvoscienco), *Pravda*, 13-6-1950; germane en Steinitz, p. 76.
2. P. Balkanyi, „La Stalina lingvoscienco kaj Esperanto", *La Esperantista Laboristo*, n.s. 1951, n-ro 26 (mar./apr.), p. 1. – Laŭ Balkányi, „multaj esperantistoj salutis kun ĝojo kaj atendemo la esprimojn de Stalin". Partoj de la kontribuaĵoj de Stalin estis tradukitaj Esperanten: *Esperantista* 6. 1951, p. 10-12, 33; *Internacia Kulturo* 5. 1950, n-ro 7/8, p. 13-14.
3. Lakov, „Josif Visarionoviĉ Stalin", p. 4.

popolamasoj de la socialismaj nacioj en sia komuna laboro pri la disvolvo de la komunisma socio".[1]

Jam antaŭ 1950 ne estis loko por Esperanto en la evoluprocezo kondukanta al universala lingvo. En tiu senco la interveno de Stalin alportis nenion novan. Ĝi liveris, malfrue, la teorian bazon por la glorado de la rusa lingvo, la subpremo de minoritatoj kaj la delonge praktikata diskriminacio kaj persekuto kontraŭ la supernacia lingvo-kolektivo de la esperantistoj. Tamen, per tio, ke Stalin, nun rezignante sian tezon pri la egalrajta florado de nacioj, prezentis fundamente novan formulon pri la kondiĉoj regantaj antaŭ la tutmonda venko de socialismo, la situacio de la esperantistoj estis aldone komplikita. Ĉar, se Stalin por la nuntempo nomis karakteriza, ke naciaj lingvoj interbatalas por eltrovi, kiu estas la pli forta, tio ĉi implicis por ĉiuj civitanoj de la ŝtatoj sub soveta influo, do ankaŭ por la esperantistoj, ke ili devis kunhelpi por venkigi la rusan lingvon. Tiel nuliĝis espero, ankoraŭ restinta post kompreno pri la teorie malsekura pozicio de Esperanto – la espero, nome, ke per la modesta redukto de Esperanto al „taskoj nur de kondiĉa helplingvo por internacia komunikado de personoj posedantaj tiun lingvon"[2] povos transvivi la movado en orienta Eŭropo.

4.5.3. *La bezonoj de la nuntempo*

Vidi la problemon de Esperanto unuavice en ligo kun la disputo inter lingvistikaj teorioj facile kondukas al konfuzo kaj nebuligo de la politika fono, kiu ne plu permesis poresperantan laboron. La decida punkto estas: Se la movado estis subpremita en Soveta Unio mem, pli-malpli frue devis ĉesi ĝia ebleco transvivi en landoj sub ties influo, kaj ju pli fortiĝis la soveta influo, des pli energie la reĝimoj en tiuj landoj zorgis elimini ĉion, kio estis kontraŭa al la soveta modelo.

Kiam en somero 1949 la Esperanto-movado en la popoldemokratioj ekfrontis seriozajn obstaklojn, la premo de Soveta Unio

1. Fred Oelssner, *Die Bedeutung der Arbeiten des Genossen Stalin über den Marxismus und die Fragen der Sprachwissenschaft für die Entwicklung der Wissenschaften. I. Teil*, scienca suplemento de *Forum*, kajero 15 (3-8-1951), p. 11.
2. Lakov, p. 4.

kontraŭ supozataj aliancanoj de Tito-Jugoslavio, eksigita en junio 1948 el la komunisma tendaro pro sia malobeo al la gvida rolo de Moskvo, jam troviĝis sur sia kulmino, aparte draste manifestiĝante en la sinsekva malkovrado kaj likvidado de „malamikoj de la partio". Samtempe en tiuj landoj ruliĝis furioza kampanjo kontraŭ la t.n. „kosmopolitismo". Tiu ĉi estis interpretata kiel „instrumento por la realigo de la monda hegemoniemo de la usona imperiismo", sed efektive servis kiel kolektiva termino por kondamni ĉiujn nedeziratajn ideojn el okcidento, kiuj ŝajnis subfosi la suverenecon de la socialismaj ŝtatoj. La averto kontraŭ kosmopolitisma danĝero estis utila preteksto por malkuraĝigi la civitanojn pri kiuj ajn kontaktoj kun eksterlando.

En Soveta Unio, la gvida partia funkciulo pri kulturaj aferoj, Andrej Ĵdanov, en aŭgusto 1946 komencis, kvazaŭ mezepoka inkvizitoro, enkatenigi la intelektan kaj kulturan vivon, strebante reestabli la partian kontrolon ĉie, kie estis simptomoj de moliĝo sekve de la dummilita alianco kun kapitalismaj ŝtatoj. Artistaj kaj intelektulaj medioj, en kiuj dumtempe ekblovis freŝa vento, estis akuzataj pro „rampado" antaŭ la burĝa kulturo de okcidento, pro „senpatruja kosmopolitismo" kaj nesufiĉa respekto al tradiciaj rusaj atingoj. Fine de 1948, komence de 1949, la kontraŭkosmopolitisma kampanjo riĉiĝis je aparte malagrabla komponanto, nome je antisemitismo, maskita kiel atako kontraŭ „cionistoj" komplotantaj kun la okcidentaj milit-instigantoj. Oni malpermesis ĉiujn publikaĵojn en la jida lingvo, kaj eĉ asimilitaj judoj estis persekutataj.[1]

Post la akriĝo de la Malvarma Milito (en aprilo 1949 fondiĝis NATO) kaj de la konflikto kun Jugoslavio, Soveta Unio insistis, ke la popoldemokratioj senprokraste transprenu tiun kampanjon kaj severe riglu sin kontraŭ influoj de la ekstera mondo. Kaj tio ankaŭ havis konsekvencojn por la Esperanto-movado.

Kiel ni scias, la soveta modelo ne antaŭvidis vivrajton por Esperanto. La fakto, ke la lingvo iĝis tiel populara en la orient-

1. Kp. Benjamin Pinkus, „Soviet campaigns against ‚Jewish nationalism' and ‚cosmopolitism', 1946-1953", *Soviet Jewish Affairs* 4. 1974, n-ro 2, p. 53-72. – Ĝis la interveno de Stalin en 1950, ankaŭ la marristoj denuncis siajn oponantojn kiel kosmopolitojn.

eŭropaj landoj kaj ke eĉ partiaj kaj ŝtataj instancoj subtenis la movadon, sekve ne povis elvoki ĉe la sovetaj kontrolistoj senfaran spektadon. Ankoraŭ malpli ŝatinde, eĉ rekte provoke estis, ke danubregionaj Esperanto-asocioj decidiĝis pri intima kunlaboro ekster la kontrolo de Moskvo, ke ĉeĥoslovakoj alvokis por korespondaj kaj vojaĝaj kontaktoj per Esperanto inter sialandaj kaj sovetaj laboristoj[1], ke sovetaj esperantistoj eskapintaj la persekutojn legis en *Internacia Kulturo* pri vigle pulsanta Esperanta vivo en la novaj socialismaj ŝtatoj[2] aŭ ke leningradano apelaciis en la sama revuo al la tutmonda esperantistaro, ke ĝi helpu revivigi la Esperanto-movadon en Soveta Unio, superŝutante la sovetan eldonejon de alilingva literaturo per deziroj pri esperantlingvaj eldonaĵoj.[3]

Necesis bremsi tiun evoluon kaj forviŝi individuecajn trajtojn en la orienta bloko eĉ sur tia ŝajne relative sensignifa kampo, kia estis la Esperanto-movado. En decembro 1945, ĵus reveninte el la moskva ekzilo, Georgi Dimitrov estis avertinta sian esperantistan sekretarion gardi sin „kontraŭ provoj de provoka kaj spiona karaktero". Tiu admono estis aldonita al ĝenerale kuraĝigaj vortoj por la utiligo de Esperanto kiel „neŭtrala kanalo" por informado pri la „nova demokrata Bulgario".[4] Sed malpli ol kvar jarojn poste ne plu superregis pozitivaj aspektoj: Nun la unuaranga faktoro estis la timo pri nekontroleblaj kontaktoj pere de Esperanto – same kiel en 1937/38 en Soveta Unio kaj en 1941 en la baltaj ŝtatoj. Kio instigis la reĝimojn limigi aŭ malpermesi la disvastigon de Esperanto, do malpli estis la fideleco al ia oficiala lingva doktrino, ol politikaj konsideroj: la zorgo pro interna sekureco.

1. William Solzbacher, „It happened in Prague", *American Esperanto Magazine* 66. 1952, p. 36.
2. Dum mallonga tempo, en 1947/48, kelkaj Esperanto-leteroj el Soveta Unio alvenis eksterlanden, eĉ okcidenten: *Heroldo de Esperanto* 23. 1947, n-ro 13 (1072), p. 2; *Sennaciulo* 19. 1948, n-ro 11, p. 5; 20. 1949, n-ro 4, p. 2.
3. Anatol Syromjatnikov, „Kreu amasan kulturan kontakton kun Sovjet-Unio!", *Internacia Kulturo* 3. 1948, n-ro 4, p. 16.
4. Assen Grigorov, „Tri interparoloj kun Georgi Dimitrov", *Internacia Kulturo* 4. 1949, n-ro 7, p. 5. – En la sama numero aperis nekrologo pri Dimitrov, kiu subite mortis komence de julio 1949 en Moskvo. Vd. ankaŭ Nikola Aleksiev, „Georgo Dimitrov pri la Esperanto-movado", en: Petra Radenkova, *Georgo Dimitrov. Konciza biografio*, Sofio 1982, p. 5-9.

Por pravigi la paŝojn rezultantajn el tiu timo taŭge servis la slogano pri batalo kontraŭ kosmopolitismo. La malpermeso de la Esperanto-grupoj en la soveta zono de Germanio estis motivita per tio, ke tiuj estis utiligataj „por kosmopolitikaj strebadoj kaj agentaj agadoj de la usona imperialismo".[1] Komence de novembro 1949 la registaro de la ĵus fondita Germana Demokratia Respubliko konfirmis la malpermeson jene:

> Estas fakto, ke kontraŭuloj al nia demokratio provas ĝeni niajn laborojn per helpo de esperantogrupoj.
> Per gazetoj aperantaj eksterlande kaj per tiel nomata internacia societo kun sidejo en München[2] oni provas sub preteksto de kultura neceso gajni anojn, per kies helpo oni volas malbonfamigi nian demokratan ordon.[3]

Unu jaron poste la sidejo ŝanĝiĝis, sed la danĝero restis la sama: Partia gazeto en GDR skribis, ke la kosmopolitismo propagandata de Usono, celante paralizi la proletan internaciismon, „sin servas de la tiel nomata mondlingvo (Esperanto), kies centro kaj sidejo estas en Ameriko".[4]

Esperanto tamen ne malaperis en orienta Eŭropo per unu bato. La rapidecon kaj intensecon de la subpremo oni devas rilatigi kun la malsamaj internaj kondiĉoj en la popoldemokratioj. Kie la sovetaj aŭtoritatoj devis malplej atenti lokan aŭtonomion, tie ili povis plej frue realigi siajn dezirojn. Tio klarigas, kial en orienta Germanio, tiutempe ankoraŭ regata de soveta militista administracio, malpermesa dekreto estis eldonita jam komence de 1949, kun argumentoj, kiuj plej nete paŭsis la sovetan starpunkton, kaj kial la cirklo fermiĝis en fora Ĉinio plej laste, nome en la fino de 1953, kiam ĉesis aperi la revuo *El Popola Ĉinio*. En Bulgario kaj Ĉeĥoslovakio, la esperantistoj plej longe kontraŭstaris la tendencon esti subite identigataj, nur pro sia scio de Esperanto, kun cionistoj kaj kosmopolitoj, ĉar ili povis facile

1. E-er, „Esperanto vivas malantaŭ la Fera Kurteno", *Esperanto-Post* 6. 1953, p. 113 (cito el informo de la Ministerio pri Popola Klerigo).
2. Evidente aludo al Germana Esperanto-Asocio, kiu tiutempe havis sian sidejon en Munkeno.
3. Letero de la registaro de GDR al Unuiĝo de la Persekutitoj de la Nazia Reĝimo, de 4-11-1949; cit. S. Engholm, „Kie oni malhelpas esperanton", *Malgranda Revuo* 8. 1950, n-ro 1, p. 28-29.
4. *Leipziger Volkszeitung*, 1-12-1950; cit. *Heroldo de Esperanto* 26. 1951, n-ro 1 (1136), p. 2.

dokumenti sian kontraŭfaŝisman sintenon; aldone al tio, en Bulgario iamaj gvidantoj de la ilegala laborista Esperanto-movado troviĝis en altaj partiaj kaj ŝtataj pozicioj. Ne pli malbonaj antaŭkondiĉoj ekzistis en Hungario, sed tie, eble eĉ nur sekve de buŝa rekomendo de partia altrangulo „forlasi tiun senbezonan movadon"[1], la vicprezidantino de HES, kiu samtempe estis partia veteranino, tuj obeeme puŝis la komitatanojn al voĉdono por sia propono provizore ĉesigi la funkciadon de la societo, ĉar „nun estas precipe por la partianoj multe pli gravaj taskoj kaj estas dece ĉesigi la agadon".[2]

Simila sorto minacis ankaŭ al la bulgara movado. La Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio iun tagon juĝis, ke Bulgara Esperantista Asocio apartenas al la nenecesaj, superfluaj organizaĵoj kaj ke sekve ĝi devas sin likvidi. Tiun inviton la plej fervoraj sekvantoj de la partia linio efektive pretis plenumi, aplikante premon je la CK de BEA.[3] Sed la prezidanto kaj kelkaj aliaj reagis je tio per la taktiko de prokrastado, argumentante ke pri dissolvo de la asocio povas decidi nur kongreso. Kaj en tio ili fakte sukcesis, ĉar BEA formale pluekzistis.[4] Ĝis 1955, tamen, ia publika agado por Esperanto estis komplete ne ebla, ĉar ankaŭ la esperantistoj en Bulgario devis submetiĝi al la oficiala gvidlinio, ke necesas nun dediĉi sin al pli urĝaj taskoj, ol la flegado de internacia lingvo – ke dum la konstruado de socialismo simple ne estas loko por Esperanto.

Per tio ni venas al alia argumentaro por la pravigo de la kontraŭesperanta sinteno, kiu estis malpli kruda, ol la kulpigo pri kosmopolitismo kaj „agentaj agadoj". Temas pri la tezo, ke la okupiĝo pri Esperanto logas la atenton for de la unuarangeco de socialisma konstruado. Ĝi paralelis la kampanjon kontraŭ kosmopolitismo kaj komencis baldaŭ superpezi ĝin, restante valida

1. Persona komuniko de s-ro Ervin Fenyvesi, de 10-5-1981.
2. Paŭlo Balkányi, „El Budapeŝto", *l'omnibuso* 10. 1973, n-ro 5 (57), p. 11.
3. Kvankam en Pollando la premo de la ŝtato kontraŭ la movado estis malplej forta, ankaŭ tie troviĝis esperantistoj, kiuj – sensukcese – konsilis al la estraro de Asocio de Esperantistoj en Pollando dissolvi la organizaĵon: Bogdan Sadowski, „Dek jaroj de la Esperanto-movado en Popola Pollando", *Bulteno de Asocio de Esperantistoj en Pollando* 1955, n-ro 12, p. 2.
4. A.D. Atanasov, *Kelkaj rememoroj*, nepublikigita manuskripto, p. 5-6.

ankaŭ dum la unuaj jaroj post la morto de Stalin, kiam malkreskis la fortimiga efiko de la propagando pri malamikoj en eksterlando.

Tiun argumentaron bone resumas dokumento el Ĉeĥoslovakio. Ĝi estas tripaĝa anglalingva letero, „Respondo al japana amiko", verkita laŭdire de – nenomita – ĉeĥa esperantisto[1] kaj aldonita al letero (22-9-1953) de doktorino E. Carminová, sekciestrino pri rilatoj kun Japanio en la ĉeĥoslovaka Ministerio pri Kulturo. La dokumento celis doni respondon al Kurisu Kei, kiu direktis al la ministerio la demandon, kial Esperanto estas subpremata en lando, kies literaturo estis konigita en Japanio pere de Esperanto kaj kies esperantistoj organizis solidarecan helpon al japanaj kamaradoj suferantaj en malliberejoj. Ĉar la ministerio evidente kredis ne povi simple ignori la starpunkton de Kurisu pro ties pozicio – li estis tiutempe la plej aktiva diskoniganto de la ĉeĥa literaturo kaj kulturo en Japanio[2] –, ni hodiaŭ disponas raran ekzemplon de detala oficiala klopodo pravigi la kontraŭesperantan politikon de stalinisma reĝimo.

Unue, la letero eksplicite senkulpigas la ĉeĥoslovakajn esperantistojn de akuzo kutima en Soveta Unio kaj orienta Germanio:

> Estas vere, ke esperantistoj en Ĉeĥoslovakio montriĝis patriotoj, kiuj uzis Esperanton en progresema maniero. Ne estis unu kazo, ke ĝi estis uzata kontraŭ la interesoj de la popolo kaj ŝtato. Tio ŝuldiĝis al la konscia kaj patriota gvidado de la esperantistoj, kiuj montris kiel uzi Esperanton por la bono de lia ŝtato. Nia popolo suferis grandegan malĝojon en sia nacia tragedio dum la hitlera okupado. La esperantistoj ne trompis la esperojn de la nacio kaj metis sian scion de Esperanto en la servojn de la lando. Iliaj aktivadoj estis favore juĝitaj de la registaro. Iliaj modestaj klopodoj donis bonan frukton.

Post tia laŭdo ne ŝajnas facile pravigi, kial nuntempe Esperanto ne plu povas servi al la popolo, sed per pensakrobataĵoj la ministerio venas al la konkludo, ke sub la ŝanĝiĝintaj kondiĉoj tiuj modestaj, kvankam sukcesaj, klopodoj de la esperantistoj ne plu povas kontentigi la grandajn taskojn difinitajn de partio kaj

1. Laŭ la supozo de Kurisu, la leteron verkis Adolf Malík, la lasta prezidanto de EAĈSR.
2. Kurisu krome estis membro de la Centra Komitato de Nova Japana Literatura Asocio (Sin Nihon Bungaku Kai). Tiu ĉi organizaĵo de maldekstraj, progresemaj literaturistoj havis interkonsenton kun koncerna instanco de Ĉeĥoslovakio pri reciproka tradukado kaj eldonado de literaturaj verkoj ambaŭlandaj.

registaro. La novaj sociaj bezonoj kaŭzis kvazaŭ naturan morton de la Esperanto-movado: En 1950 estis publikigita nova leĝo pri asocioj, laŭ kiu ili devus aliĝi al unu el la grandaj amasorganizaĵoj.[1] Tion EAĈSR klopodis fari, sed neniu volis akcepti ĝin, „ĉar ĝi ne konformiĝis al la kadro de agado" de iu amasorganizaĵo. „La tempolimo fiksita de la leĝo por aliĝo pasis, tiel ke la asocio de esperantistoj disrompiĝis. Ne estas la kulpo de la ŝtata administracio, ke la asocio de esperantistoj ĉesigis sian agadon, sed temas pri la fakto, ke la leĝo por novregistrado de asocioj ne estis observita."

Substrekinte ke „Esperanto ne estas bezonata en la pli alta fazo de la evoluo de internaciaj rilatoj", la letero fine rimarkigas:

> En la kapitalismaj landoj, en la manoj de progresemaj homoj, ĝi [la Esperanto-movado] ankoraŭ havas gravan funkcion kaj devus labori man-en-mane kun la pacdefendantoj. Se tio ne okazas, tiam ĝi fariĝas kosmopolitismo „por eksporto", kaj tial la ĉeĥoslovaka popolo kaj ŝtato devas sin protekti pro kialoj de sia propra ekzisto.

Ke la uzado de Esperanto en kapitalismaj landoj por „progresemaj" celoj ne povas esti tre efika, se mankas ebleco por interkomunikiĝi kun pacdefendantoj en la socialismaj landoj, evidente estis ekster la imagopovo de la ministerio.

Kion signifas „pli alta fazo de la evoluo de internaciaj rilatoj"? Tion la aŭtoritatoj preferis detaligi nur en la enlanda uzo, al kiu apartenis pli sincera lingvaĵo. La 5an de septembro 1952, unu tagon antaŭ la „memlikvidiĝo" de EAĈSR, Rudolf Burda sendis protestan leteron al la ĉefministro Antonín Zápotocký, petante klarigon, kial Esperanto – lingvo, kiun laŭ la opinio de Burda subtenis eĉ Lenin – nun ne plu estas tolerata. Al la respondo de la oficejo de Zápotocký (24-10-1952) oni ne povas riproĉi nesufiĉan konkretecon:

> De la tempo, kiam kamarado Lenin akcentis la signifon de Esperanto por la laborista klaso, pasis tre multe da tempo. Intertempe estis konstruita la granda patrujo de socialismo, Soveta Unio, kaj la konstruado de socialismo disvastiĝis al ĉiam pli da landoj, kiuj vidas en Soveta Unio sian modelon kaj abunde ĉerpas el ĝiaj spertoj. El tiu motivo centmiloj da laboristoj en tiuj landoj, eĉ ekster ili, lernas la gepatran lingvon de la pioniroj de socialismo – la rusan. Dum tia amasa disvastiĝo de la rusa lingvo, nature malantaŭeniras en fonon la signifo de Esperanto, kiu ĉiuokaze estas lingvo artefarita kaj tial eĉ ne estas lingvo en la vera senco de la vorto...

1. Pri tiu leĝo kp. Kamarýt, p. 177-178.

> Ni opinias, ke en la nuna tempo efektive multe pli utilas meti tiujn fortojn, organizajn rimedojn kaj energion, kiuj estas dediĉataj al Esperanto, en la servon al plia disvastigo de la scio de la rusa lingvo.
> Ne temas pri ia oficiala malpermeso de Esperanto, kiel vi aludas en via letero. Temas nur pri tio, ke ĉiuj kamaradoj konsciiĝu pri la ŝanĝita situacio kaj el ĝi rezultanta malaltiĝo de la signifo de Esperanto.

Eĉ kiam oni konsideras, ke fakte Lenin neniam sin esprimis favore al Esperanto, estas rimarkinde, ke la ĉeĥoslovaka aŭtoritatulo, tute ne provante kontesti tian diron de la plej multe citata – apud Stalin – teoriisto de soveta komunismo, pretis senskrupule ignori ĝian validon por la nuna tempo. Tie ĉi senvuale dokumentiĝas, ĝis kiu grado oni pretis oportunisme surpaŝi la ŝajne ĉiam sanktan teorion favore al la aktuala tagordo – en plena koncentriĝo al la penso kiel plej fidele plenumi tiun gvidlinion de la stalina politiko, kiu estis diktita por la nuntempo.

La demando de la rilato inter teorio kaj praktiko revenigas nin al la lingvistika diskuto de 1950. Kiam *Pravda* donis spacon al ampleksa pritrakto de problemoj de la lingvistiko, en kies daŭro Stalin, tute neatendite, kondamnis la teoriojn de Marr, la evoludirekto por la Esperanto-movado en la popoldemokratioj estis jam klare fiksita: La esperantistoj devis submetiĝi al la postulo dediĉi ĉiujn siajn fortojn al la konstruado de socialismo. Kaj sur la lingva kampo, kiu koncernis ilin pli specife, tiu fortostreĉo devis celi unuavice la antaŭenigon de la rusa lingvo[1], kiel jam komence de 1949 formulis orientgermana instanco:

> Ni rekomendas al vi meti vian grupon en la servon al la dujara plano kaj direkti viajn filologiajn interesojn al mondlingvo, kiu akcelas nian konstrulaboron multe pli, ol la eksperimentoj de lingva sintezo.[2]

En tiu ĉi direkto nenio ŝanĝiĝis per la elpaŝo de Stalin kontraŭ Marr. Eĉ se kelkaj esperantistoj dum iom da tempo eble kovis esperojn pro la ripetita profetaĵo pri universala lingvo, ili tre rapide devis kompreni, ke tiu elpaŝo ilin ne helpas, sed ke ĝi esence konsistigis la klopodon reharmoniigi – malfrue – teorion kaj praktikon en la lingva politiko de Soveta Unio. Esperanto

1. Antaŭ la rompiĝo de la rilatoj kun Soveta Unio en 1948, la entuziasmo de partiaj funkciuloj pri la rusa kiel lingvo de socialismo malhelpis ankaŭ la agadon de la esperantistoj en Jugoslavio: Peter Zlatnar, „Ideoj kaj agoj de esperantistoj en Jugoslavio", en: Franjo Vokoun (red.), *Honore al ili. Memorlibro pri falintaj esperantistoj 1941-1945*, Zagreb 1976, p. 19.
2. Letero de la saksa Ministerio pri Popola Klerigo, de 24-1-1949.

restis malŝatata kaj praktike malpermesita, ne pro la dominado de tiu aŭ alia lingvoscienca skolo, sed pro politikaj konsideroj – pro la deziro protekti post la sovetaj ankaŭ la orienteŭropajn esperantistojn kontraŭ nedogmeca internaciisma pensmaniero.

Aliflanke, nun la aŭtoritatoj povis utiligi la eldirojn de Stalin por pli efike raciigi sian starpunkton kontraŭ Esperanto, ol per nebulaj avertoj kontraŭ „internacia ŝovieto en Munkeno" aŭ simile. Citante la vortojn de Stalin pri la ligiteco de lingvo al nacio, oni nomis Esperanton „artefarita kosmopolita ĵargono" [1], kiu ne havas radikojn en nacio aŭ socio, kaj atakis la esperantistojn pro ilia „erara supozo, ke per la transsaltado de lingvaj baroj la nacioj kunligiĝos en spirito de interfratiĝo".[2] Same, la aŭtoritata ĉeĥa lingvisto František Travníček, interpretante la pensojn de Stalin, atribuis al Esperanto „senesperajn perspektivojn".[3] Kaj se iu ankoraŭ malcertis pri la reganta opinio, sufiĉis simple konsulti la Grandan Sovetan Enciklopedion, kiu aplombe asertis:

> La plej disvastigita el la artefaritaj lingvoj, Esperanto, estas stranga surogato de la latinidaj lingvoj.
> La ideo de artefarita lingvo, komuna por la tuta homaro, estas per si mem utopia kaj nerealigebla. ... tiaj projektoj havas kosmopolitan karakteron kaj tial estas malvirtaj laŭ principo. La utopieco de artefaritaj lingvoj estas aparte klara post la publikigo de la verkoj de I.V. Stalin, „La nacia demando kaj la leninismo" (1949) kaj „La marksismo kaj la demandoj de lingvoscienco" (1950), en kiuj estas prezentitaj la realaj perspektivoj de la evoluo de la naciaj lingvoj kaj de la formiĝo de la estonta unueca lingvo de la homaro. [4]

Prokuroro en GDR, kiu bezonis apogon por sia verdikto, ke „la lernado de artefaritaj lingvoj havas nenian kulturan kaj popolklerigan karakteron", ankoraŭ du jarojn post la morto de Stalin utiligis ties nomon por eldiri stultaĵojn aŭtoritate:

> Artefaritaj lingvoj ne konsistigas nacian lingvon kaj sekve, konforme al la instruo de la neforgesebla J.V. Stalin pri problemoj de la

1. „Fino de unu asocio", *Heroldo de Esperanto* 29. 1953, n-ro 5 (1175), p. 2.
2. En la ĉeĥoslovaka dokumento „Respondo al japana amiko".
3. Samloke. – Vd. klopodon refuti la argumentojn de Travníček: William Gilbert, „Esperanto kaj la rusa lingvo", *Paco* 1955, n-ro 23 (okt.), finna eldono, p. 4-5.
4. „Iskusstvennye jazyki" (Artefaritaj lingvoj), *Bol'šaja sovetskaja enciklopedija*. Dua eldono, vol. 18, Moskva 1953, p. 504-505. – Vd. ankaŭ la artikolon „Vsemirnyj jazyk" (Tutmonda lingvo), vol. 9, 1951, p. 306-307.

marksismo en la lingvoscienco, ne havas sciencan aŭ kulturan bazon, ĉar ili posedas nek bazan vortprovizon nek propran gramatikon.[1]

Konsiderante tiun ĉi tute malamikan oficialan teorion, ni devas rigardi konsola la fakton, ke esperantistoj en orienta Eŭropo ne estis, laŭ nia scio, senditaj en punlaborejojn, kiel pli frue spertis iliaj sovetaj kaj baltlandaj samlingvanoj. Certe, okazis arestoj: Ekzemple, Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio, kiu havis multajn aktivajn membrojn en la orienteŭropaj landoj, menciis en sia jarraporto 1951/52, ke „ĵurnalistoj, al kiuj ni sendis TEĴA-Informilon kaj membrokarton tuj estis arestitaj".[2] Kaj en uzino de la ĉeha urbo Děčín la membroj de Esperanto-rondeto estis maldungitaj pro tio, ke ili rifuzis instrui anstataŭ Esperanto la rusan lingvon.[3] Sed plej ofte sufiĉis apliki pli subtilajn metodojn por deteni de poresperanta aktivado. Ĉar necesis anonci ĉian kunvenon al la polico kaj provizi ĉiun presitan aŭ multobligitan tekston per registrita numero, la fakta malpermeso de la Esperanto-movado povis esti sekurigita per ordinaraj administraj preskriboj arbitre aplikeblaj, sen ke la aŭtoritatoj bezonis ĉiufoje detale ekspliki la motivojn por siaj agoj. En Hungario ekzemple, kie Esperanto ne estis eksplicite malpermesita, la esperantistoj, precipe en la provinco, retiriĝis kun timo, aŭ kredante ke estas ĝenerala malpermeso, aŭ simple ne sciante, kio en rilato kun Esperanto estas ankoraŭ tolerata kaj kio ne plu.[4]

Socia ostracismo estis ofte preskaŭ same timata kiel rektaj punoj. Partianoj, kiuj plue propagandis Esperanton, riskis eksigon el la partio – kun la neeviteblaj negativaj konsekvencoj por sia profesia kariero. Tial en GDR, „por ne esti konsideritaj kiel opoziciuloj", iamaj funkciuloj de GLEA aŭ IPE kaŝis sian scion de Esperanto[5], kaj en Hungario la partia veteranino Borbála

1. Letero de „Der Staatsanwalt der Deutschen Demokratischen Republik" al Max Hirsch, Bonnewitz apud Pirna, de 17-3-1955. – La leteron subskribis la prokuroro Reizmann.
2. *Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio 1952. Dua parto*, p. 32.
3. Václav Růžička, „Iom pri nia situacio en Děčín", *La Pacdefendanto* 1955, n-ro 37 (jan.), p. 5. – La esperantistoj deklaris sin nekompetentaj instrui la rusan lingvon.
4. Persona komuniko de s-ro Ervin Fenyvesi, de 10-5-1981.
5. Letero de Ludwig Schödl, mem eksaktivulo de GLEA, en *La Pacdefendanto* 1955, n-ro 39 (mar.), p. 5 (parte represita en *Sennaciulo* 26. 1955, n-ro 5 [600], p. 3). – Schödl ankaŭ mencias pri eksigo de partianoj, kiuj varbis por Esperanto.

Szerémi-Tóth eĉ „entuziasme agadis por bremsi" la Esperanto-movadon.[1] Sed estis ankaŭ partianoj, kiuj propravole eksiĝis, vidante ke la partio timas doni „revolucian klerigan rimedon al laboristoj pensemaj"[2]; unu hungara esperantisto, kiu estis vokita al siaj partiaj superuloj kaj al la politika polico pro sia „kosmopolita" aktivado, kuraĝe respondis, ke oni unue montru al li leĝon, kiu malpermesas korespondi en Esperanto.[3] Aliaj registris kun abomeno, ke iuj esperantistaj gvidantoj „rapidis forĵeti sian dumjardekan esperantistecon kaj tuj iĝis vervaj lernantoj-propagandistoj de la rusa lingvo".[4] Se tia estis la modelo de kelkaj el la antaŭaj gvidantoj, ne estas mirige, ke ofte la „ordinaraj" esperantistoj, el kiuj cetere certe nur malplimulto apartenis al la partio, preferis „ĉesigi eĉ la simplan korespondadon".[5] Tiuj, kiuj deziris konservi almenaŭ la rajton kunveni, devis fari neeviteblajn cedojn: En Hradec Králové, ekzemple, la esperantistoj atingis tiun permeson sub la kondiĉo, ke ili aranĝu krome kurson de la rusa lingvo.[6]

4.5.4. *Reviviĝo de la movado*

En majo 1952, la du ĉefaj organizaĵoj de la internacia Esperanto-movado, Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), alprenis komunan, oficialan starpunkton pri la subpremo de de Esperanto en la popoldemokratioj. Tio estis farita en formo de „nefermita letero" al Stalin.[7]

1. J. Reininger en *Sennaciulo* 37. 1966, p. 91.
2. „SAT restas por mi la sola organizo subteninda", *Sennaciulo* 28. 1957, n-ro 2 (621), p. 3. – Temas pri artikolo de GDR-ano, kiu ĉeestis en la fondkongreso de SAT (1921); li subskribis kiel „*S*incera *O*ferema *S*ocialisto".
3. Persona komuniko. (La hungaro daŭrigis la korespondadon.)
4. „Laborista esperantismo kaj SAT-aneco", *Sennaciulo* 28. 1957, n-ro 5 (624), p. 7. – Kiam tiu ĉi artikolo estis denove aperigita kvin jarojn poste, la redakcio malkaŝis, ke ĝia aŭtoro estis la hungaro Imre Baranyai (1902-1961), sub la pseŭdonimo Emba konata kiel proleta Esperanto-verkisto: *Sennaciulo* 33. 1962, p. 46.
5. Samloke.
6. *Heroldo de Esperanto* 29. 1953, n-ro 9 (1179), p. 2.
7. „Nefermita letero. Al J.V. Stalin, Moskvo", *Esperanto* 45. 1952, p. 163-165; *Sennaciulo* 23. 1952, n-ro 6 (565), p. 5-6. – La instigo al tiu letero, kiu cetere estis la unua komuna deklaro de UEA kaj SAT, venis de la pola esperantisto Antoni Czubryński: Cirkulero de E. Malmgren al la estraranoj de UEA, de 18-9-1951 (Malmgren unue hezitis sekvi la rekomendon).

Citante eldirojn de Stalin kaj de sovetaj lingvistoj, la letero atentigis pri la kontraŭdiro inter la profetaĵoj pri kunfandiĝo de lingvoj kaj nacioj, unuflanke, kaj la praktika utiligo de la rusa kiel „progresema" internacia lingvo, aliflanke, kaj krome pri la kontraŭdiro inter la neo de klasa karaktero de lingvo – ĝia karakterizo kiel „socia fenomeno" – kaj la implicita postulo, ke „la Internacia Lingvo devus atendi *ad infinitum* ian ‚novan bazon' kaj ian ‚novan superstrukturon' por formiĝi kaj ekesti". Kvankam la letero enhavis malfortojn[1] – ĝi ne klare distingis inter la estonta supernacia lingvo kaj la nuna helplingvo Esperanto kaj ankaŭ tute silentis pri la delonga neekzisto de movado en Soveta Unio –, ne estu subtaksate, ke per ĝi la internacia movado decide forlasis la pozicion de neŭtralismo kaj senhelpa spektado, tiel ofte spertitaj, kiam Esperanto kaj ĝiaj parolantoj suferis persekutojn.[2]

Sed, kion tiutempe la subskribintoj de la letero de UEA kaj SAT apenaŭ povis antaŭvidi: la diskut-instiga elpaŝo de Stalin[3] havis en ankoraŭ alia rilato grandan signifon por Esperanto. Studantoj de la moderna soveta historio hodiaŭ ĝenerale interkonsentas, ke eble la plej grava kaj sekvoriĉa eldiro en la longa, teda diskuto pri lingvistiko estas la fina konkludo de Stalin (en la letero al Ĥolopov): „La marksismo estas malamiko de ĉia dogmismo."[4] Sendepende de la motivoj de Stalin – li evidente sin

---

Pri reeĥo ekster la movado vd. André Pierre, „Les espérantistes ont adressé une lettre ouverte à Staline", *Le Monde*, 26-6-1952.

1. Vd. la ekstreme polemikan diskuton inter Ivo Lapenna, la fakta verkinto de la letero, kaj William Solzbacher, kiu i.a. riproĉis al Lapenna facilaniman adopton de la ideoj de Marr: William Solzbacher, „Ĉarlatana lingvoscienco. Marr-Drezen-Stalin-Ĉikobava-Lapenna", *American Esperanto Magazine* 71. 1957, p. 53-59, 83-90, 119-121, 152-157; 72. 1958, p. 24-26; Ivo Lapenna, „Kelkaj lingvistikaj demandoj. Okaze de la politika burleskaĵo kaj lingvoscienca ĉarlatanaĵo de D-ro W. Solzbacher", *Belarto* (suplemento al la revuo *Esperanto*), n-ro 1, apr. 1958, p. 51-63.
2. Vd. ankaŭ la paroladon de Lapenna en la Universala Kongreso en Parizo, 1950, „La Internacia Lingvo kiel esprimo kaj antaŭeniganto de universalismaj tendencoj", represita en: Ivo Lapenna, *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*, Rotterdam 1966, p. 11-17.
3. Ni scias ankaŭ pri soveta esperantisto, kiu kuraĝis skribi rekte al Stalin, kritikante lian kontraŭesperantan starpunkton. Temis pri Jakob Kokuŝkin, malnova bolŝeviko: Kimura Hirosi, *Rosia bungaku no syûhen* (Ĉirkaŭ la rusa literaturo), Tôkyô 1971, p. 307-308. (Kokuŝkin ne ricevis respondon.)
4. Stalin, *Der Marxismus*, p. 65.

esprimis tiamaniere por havigi al si plenan liberecon de agado kaj trovi eliron el la ĉiamaj kontraŭdiroj inter la internaciisma tradicio de socialismo kaj la praktika politiko, kiu donis nepran preferon al la naciaj interesoj de la soveta ŝtato – oni retrospektive devas konstati, ke la elstarigo de kontraŭdogma marksismo ne nur kondukis la sovetan lingvistikon, paralizitan per la influo de Marr, el danĝera izoliteco, sed malrapide, precipe post la morto de Stalin, ebligis „senstalinismiĝon" ankaŭ sur aliaj kampoj. Kaj al tiuj, kiuj profitis de tiu evoluo, apartenis ankaŭ la esperantistoj.

Kiel iom post iom reviviĝis la Esperanto-movado en orienta Eŭropo, inkluzive de Soveta Unio, estas unu el la plej interesaj ĉapitroj en la historio de Esperanto. Ĝi estas modelkazo de esperantista celkonscio, kontraŭaŭtoritata obstino kaj saĝa kaj lerta agado ĉe la „bazo".

Elirpunkto de la procezo, kiu kondukis al renaskiĝo de la Esperanto-movado en la socialismaj landoj, estis la kuraĝo de manpleno da esperantistoj, kiuj eĉ dum la plej malfavoraj jaroj rifuzis silenti. Sendube la plej kuraĝa estis la jam menciita Rudolf Burda en Ĉeĥoslovakio[1], kiu ne laciĝis nomi la silentigon de la movado en sia lando abisma maljustaĵo neharmoniigebla kun la principoj de komunismo (aŭ kun lia idealisma kompreno de komunismo). Kvankam Burda ankaŭ furioze atakis la „neŭtralulojn-oportunistojn", kiuj „uzurpis" la gvidpostenojn en la ĉeĥoslovaka movado, kalumniis la laboristajn esperantistojn kiel kosmopolitojn por savi la asocion kaj fine cedis al la premo por „libervola" likvidiĝo, li ne lasis dubon pri tio, ke la malfavoro al Esperanto ŝuldiĝas unuavice al pli superaj politikaj konsideroj. Li ne timis publikigi en sia bulteno *La Pacdefendanto* longan leteron de Kurisu Kei, tre kritikan kontraŭ la subpremo de Esperanto en Soveta Unio kaj la popoldemokratioj, en kiu oni povis legi interalie la jenan aŭdacaĵon:

> Se oni volas likvidi Esp.-asocion, oni faru tion malkaŝe, publikigante la kialon, sed ne hipokrite agu kvazaŭ timante publikan juĝon. Estas ne tolereble, ke registaro, kiu sin nomas popoldemokrata aŭ socialista apliku faŝist-similan metodon![2]

1. Burda (1902-68) estis membro de SAT ekde ĝia fondiĝo. Kiel komunisto, li pasigis ses jarojn en la nazia koncentrejo Buchenwald.
2. Letero de T. Kurisu (Kurisu Kei), de 25-1-1953, en *La Pacdefendanto* 1953, n-ro 16 (apr.), p. 3.

Estis publikigita ankaŭ letero de la franco William Gilbert, kiu deklaris, ke li – eĉ je la risko ne esti konsiderata „bona komunisto" – ne povas submetiĝi al la partia disciplino, se ĝi postulas de li akcepti absurdaĵon, kia estas la batalo kontraŭ Esperanto.[1]

Sed Burda ne nur protestis. Li frue nomis ankaŭ la kialojn, kiujn la aŭtoritatoj preferis kaŝi. Per citaĵo el parolado de Klement Gottwald, en kiu la rusa lingvo estis glorata kiel „internacia lingvo de la progreso, de la batalo por nacia kaj socia liberigo, lingvo de la batalo por la paco", li instruis al siaj legantoj, kial „Esperanto estas en nia lando nedezirata".[2] Eĉ pli, li donis lokon al senvuala reliefigo de la fundamenta problemo, kies simptomo estis la malamikeco al Esperanto. Nome, Gilbert en sia letero diris ankaŭ:

> Estas nun pruvite, ke la kompartioj akceptas la internaciajn rilatojn en sia propagando, sed vere ne intencas ilin realigi, kaj tio ankaŭ estas politika hipokriteco. Miaopinie tiu afero jam superpaŝas la problemon de Esperanto mem.[3]

La proteston kaj provon de analizo paralelis la celado kuraĝigi la esperantistojn. Tio okazis unue per konsiloj kiel transvivi la subpremon. Burda aperigis kvazaŭ aktualan raporton pri la kaŝa agado de komunistaj esperantistoj en faŝismaj landoj, kie ili, ekzemple, „fariĝis ŝakistoj aŭ filatelistoj kaj sub tiu firmao [= ŝildo]... daŭrigas la esperantistan vivon". En kamufla formo li tiamaniere alvokis la ĉeĥoslovakajn esperantistojn resti fidelaj al sia idealo kaj spiti la malfavoron kaj ĉikanojn de la aŭtoritatoj.[4] Tamen, je la sama tempo Burda ankaŭ jam liveris al la esperantistoj argumentojn, kiuj celis al ŝanĝo de la situacio: Li ne hezitis fari provon kontraŭbatali la superregan pozicion de la rusa lingvo – kaj kiel rimedo por tio servis al li ĝuste la tezoj de Stalin! Per tre propra interpreto li klopodis ekspluati ilin favore al Esperanto. En aŭgusto 1952, duonan jaron antaŭ la morto de Stalin, Burda skribis:

1. „Eĥo el eksterlando", *La Pacdefendanto* 1952, n-ro 11 (nov.), p. 1.
2. R. Burda, „Internacia rusa lingvo", *La Pacdefendanto* 1953, n-ro 22 (okt.), p. 2. – Burda citas el *Rudé právo* de 5-10-1953. Gottwald, la estro de KPČ kaj prezidanto de la respubliko, mortis en marto 1953.
3. „Eĥo el eksterlando", *La Pacdefendanto* 1952, n-ro 11, p. 1.
4. R. Burda, „Esperanto en la ilegaleco", *La Pacdefendanto* 1952, n-ro 8 (aŭg.), p. 4.

> Kelkaj vulgaraj kaj erarigitaj marksistoj ankaŭ nuntempe asertas, ke Esperanto estas lingvo burĝa, kosmopolitika, kiun ne eblas instrui al socialistoj, kiuj ja havas sian proletan, socialistan lingvon, la lingvon de niaj genioj, Stalin kaj Lenin, la rusan! Stalin tamen klare diris, ke la internacia lingvo ne povas esti la rusa, nek alia nacilingvo, ĉar tio signifus altrudi lingvon de pliforta nacio al plimalfortaj, kio estus tute ne marksista kaj reakcia.

Citante la diron de Stalin, ke lingvo devas servi al la tuta nacio kaj ke ne ekzistas burĝa kaj proleta nacia lingvo, Burda daŭrigas:

> ... ni povas trankvile apliki tiun ĉi tezon ankaŭ por la lingvo internacia, kiu jam sendube ekzistas kaj vivas, por Esperanto. ... Laŭ k-do Stalin lingvo servas al ĉiuj, sekve ankaŭ Esperanto povas servi al ĉiuj. ... Falsa estas la opinio, ke ni devas krei proletan lingvon aŭ uzi socialistan lingvon, kiu diferencus de la burĝa. ... Aliokaze ni konstruus baron inter la proletoj de kapitalistaj landoj, kiuj eble lernos, aŭ estos devigataj lerni Esperanton, kaj en la popoldemokrataj landoj oni instruus lingvon tute alian, eble la rusan,...[1]

Per sia protesto, la malkovrado de la kaŭzoj, pro kiuj Esperanto estis malfavorata, kaj la utiligo de vortoj de Stalin, Burda certe ne povis konvinki, eĉ apenaŭ atingis, la aŭtoritatojn, sed minimume povis eviti, ke inter la esperantistoj disvastiĝu paraliza rezignacio. Se temis pri la celo revivigi la movadon, progreso en tiu direkto dependis de la eksteraj cirkonstancoj. Kaj fakte tiuj evoluis ekde 1953 je la avantaĝo de la esperantistoj en orienta Eŭropo. La 5an de marto 1953 mortis Stalin.[2] Liaj posteuloj, la novaj gvidantoj de Soveta Unio, transiris al almenaŭ laŭforme pli fleksebla politiko. Jam en junio, dum konferenco en Budapeŝto, la Monda Pac-Konsilantaro, fondita en 1950 kiel instrumento de la soveta eksterlanda politiko, akceptis nekutime vortumitan rezolucion:

> Ĉiu popolo havas la rajton libere decidi pri sia vivmaniero kaj devas respekti la vivformon, kiun libere elektis aliaj popoloj. Tio ebligas la necesan pacan kunekzistadon de diversaj sistemoj, kaj la rilatoj inter la popoloj povas disvolviĝi avantaĝe por ĉiuj...[3]

Post kiam fine de julio per armistico estis ĉesinta la milito en Koreio, la Monda Pac-Konsilantaro vokis al „internacia reamikiĝo", nomante grava faktoro en tio la vastan kreskigon de kultu-

1. R. Burda, „Uzu fiakriston, ĉar aŭtomobilo estas burĝa", samloke, p. 1-3.
2. Vd. la omaĝon de W. Gilbert, „Stalin mortis", *La Esperantista Laboristo*, n.s. 1953, n-ro 38 (mar./apr.), p. 1, 8.
3. Cit. Jörg K. Hoensch, *Sowjetische Osteuropa-Politik 1945-1975*, Kronberg/Ts. 1977, p. 57.

raj interŝanĝoj.[1] Kiam tiu rezolucio estis akceptita (dum kunsido de la Konsilantaro en Vieno fine de novembro 1953), Burda kaj kelkaj liaj kunagantoj jam estis trovintaj manieron kiel utiligi la ŝanĝiĝintan politikan klimaton por la plibonigo de la situacio de la orienteŭropaj esperantistoj. En kunlaboro kun Burda, la kataluno Anton Balague, vivanta en aŭstria ekzilo, organizis la 4an-6an de septembro „Internacian Renkontiĝon de Esperantistaj Pacdefendantoj" en la urbeto St. Pölten. La du-tri dekoj da partoprenantoj, inter ili aŭstraj pacifistoj kaj komunistaj esperantistoj el Francio, sed neniu el orienta Eŭropo, interkonsentis pri la fondo de „Mondpaca Esperantista Movado" (MEM). La nova organizaĵo proklamis kiel sian celon instigi la esperantistojn al pacbatalo, konforme al la gvidlinioj de la Monda Pac-Konsilantaro. Burda iĝis la unua prezidanto de MEM, dum Balague transprenis la ĝeneralan sekretariecon. En novembro 1953 komencis aperi organo de MEM, la monata revuo *Paco*, kies karakterizaĵo estis, ke ĝiaj numeroj eldoniĝis alterne en diversaj landoj.

Kvankam MEM atakis en sia fondiĝa manifesto la internaciajn Esperanto-organizaĵojn pro ilia neŭtraleco rilate al la pacbatalo (laŭ sia formulo, „neŭtraleco rilate pacon kaj militon") kaj akuzis la tutmondajn kapitalistojn pri preparoj por nova hombuĉado, la pli granda parto de la manifesto elspiris malpli la lingvaĵon de komunistoj, ol tradiciajn aspirojn de la esperantistoj pri la kontribuo de Esperanto al paco. Estis vokite: „Helpu, ke nia kara lingvo estu ilo de vera amo kaj monda paco!" Kaj pri la vojo irota de MEM troviĝis eĉ la frazo: „Ni evitu, ke ĝi falu sub la disciplinon de politika partio."[2] La intenco estis evidenta: Per la devizo „Per Esperanto por mondpaco" MEM volis demonstri la utilon de tiucela apliko de la lingvo kaj legitimigi la agadon de la esperantistoj en la popoldemokratioj kiel unu agnoskindan formon de tiu ĝenerala batalo por paco, kiun la reĝimoj proklamis

1. *Paco* 1954, n-ro 3 (jan.), sveda eldono, p. 4. – Ankaŭ la budapeŝta konferenco de la Pac-Konsilantaro jam estis farinta alvokon por vasta kultura interŝanĝo; kp. P. Balkanyi, „Pri la konferenco de la Pac-Mondkonsilantaro en Budapest", *La Esperantista Laboristo*, n.s. 1953, n-ro 40 (jul./aŭg.), p. 1-2.
2. „Manifesto. Al la esperantistoj pacamantoj de la tuta mondo!", *La Esperantista Laboristo*, n.s. 1953, n-ro 41 (sept./okt.), p. 1-2.

kiel devon de ĉiu civitano. Tial Burda publikigis en la ĉeĥoslovakaj numeroj de *Paco*, kiel ankaŭ plue en *La Pacdefendanto*, artikolojn, en kiuj li atentigis la esperantistojn, ke, ĉar la porpaca laboro kongruas kun rezolucioj de la Monda Pac-Konsilantaro, „ne eblas vin persekuti pro la plenumo de ties decidoj", kaj en kiuj li admonis ilin zorgi „ne lasi sin puŝi en ilegalecon".[1]

Intime ligita kun la klopodoj malfortigi ideologian kontraŭstaron al Esperanto per la demonstro de ĝia praktika servado al la paco estis daŭrigo de la jam pli frue komencita strategio pruvi per citaĵoj de Stalin, ke la glorado de la rusa lingvo originis ĉe la faligita Marr kaj sekve nun estas anakronisma:

> ... ĉiuj, tiuj frazoj de „Lingvo de la progreso", „la lingvo de la paco" nur estas la heredaĵo de la longjara „marksisma lingvoscienco" de Marr kaj de Meŝĉaninov[2], kies ĉefa eraro estis la doktrino, ke ekzistas „klasolingvoj". Ke tiu falsa doktrino kaj la malsato de Esperanto – kies patro estis ankaŭ Meŝĉaninov – tiel obstine restas, nun post la majstra verko de Stalin ..., estas mirige. Jen mi citas: „Formiĝis izolita grupo de ‚seneraraj' gvidantoj, kiuj, ŝirminte sin kontraŭ ĉiu ebleco de kritiko, aŭtoritative agis kaj fiagis." Ĝuste tiu figrupo da „scienculoj" kun Meŝĉaninov kiel gvidanto nun ankoraŭ daŭras efiki.[3]

Ankoraŭ pli eksplicite, *Paco* nomis „sensencaĵo" la uzon de la rusa kiel internacia lingvo[4] kaj krome ridindigis tiujn, kiuj, anstataŭ kompreni la utilon de Esperanto kiel interpopola ligilo, „volas atendi la evoluon kaj kunfandiĝon de la lingvoj, por uzi ilin kiel ‚ponton'".[5]

La senlaca klopodado de Burda doni al la esperantistoj novan memfidon kaj reinstigi ilin al organizita agado ne restis sen efiko, ankaŭ ekster Ĉeĥoslovakio. En Hungario la ekzemplon de Burda provis sekvi la bankoficisto Pál Balkányi, ekspoziciante „pac-afiŝojn" akiritajn per Esperanta korespondado kaj zorgante pri la distribuo de *La Pacdefendanto* en sia lando. Komence preskaŭ sen ia helpo de aliaj hungaraj esperantistoj[6],

1. Rud. Burda, „Necesas disvastigi nian movadon!", *Paco* 1954, n-ro 4 (feb.), p. 1.
2. La lingvisto kaj arkeologo Ivan Meŝĉaninov (1883-1967), akademiano ekde 1932, estis dum longa tempo subtenanto de Marr.
3. L. Schödl, „For kun la marr- kaj meŝĉaninovismo!", *La Pacdefendanto* 1954, n-ro 28 (apr.), p. 2.
4. Willy Nielsen, „Opinio el Danlando", *Paco* 1954, n-ro 4 (feb.), p. 3.
5. A. Balague, „Malferma letero al esperantista pacamiko X en Polio", *Paco* 1954, n-ro 12 (okt.), p. 8.
6. Balkányi skribis al Burda: „... aliaj s-anoj ne skribas al mi, ne renkontas min, retiriĝas kaj ne volas montri sin." *Paco* 1954, n-ro 4 (feb.), p. 8.

Balkányi akiris kuraĝon per longaj leteroj, kiujn skribis al li Burda.[1] Sed kvankam li ricevis de la Hungara Pac-Konsilantaro principan apogon al sia porpaca laboro, oni ne klare respondis lian demandon, ĉu konvenas utiligi Esperanton en la interŝanĝo de „pac-materialoj"[2], kaj foje Balkányi ankaŭ estis admonita de policanoj, ke li faru sian agadon por la paco „en iu ajn lingvo, nur ne en Esperanto".[3]

Iom pli bone evoluis la situacio en Ĉeĥoslovakio, kie la 1an de septembro 1954 estis ricevita letero de la oficejo de la respublika prezidanto, en kiu al Esperanto-rondeto ĉe iu fabrika klubo en Olomouc estis esprimitaj bondeziroj pro ĝia pac-serva laboro.[4] Baldaŭ ankaŭ ne plu sufiĉis la eldonkvanto de *Paco* por kontentigi ĉiujn petojn pri ricevo. Sed en la plimulto de la popoldemokratioj apenaŭ okazis progreso. Multaj preferis atendi, ke de supre venu permeso, aŭ timis la konsekvencojn de tio, kio povus esti konsiderata ago kontraŭ la partia disciplino. Kvankam Burda nomis tion malkuraĝa sinteno kaj konstante admonis, ke oni ne atendu, sed agu por la paco (per Esperanto), li bone konsciis, kiel gravaj estas la obstakloj, – kaj li same sciis, kie ili fontis.

Unu el tiuj esperantistoj, kiuj skeptike rilatis al la vojo de MEM, motivis sian hezitemon jene: „... ĝis kiam la Esp.-movado denove ne troviĝos en la Sovjetunio, kiel iam antaŭe, ni ne sukcesos ion fari."[5] Ankaŭ Burda kaj liaj kunagantoj ofte spertis, ke partiaj instancoj malaprobas la uzon de Esperanto en la porpaca batalo kun la argumento, ke por tio ne ekzistas vojmontra signalo el Moskvo. Sed iliaj konkludoj estis aliaj, ol tiuj de la atendemuloj: Vidante ke la ĉefa obstaklo estas la mankanta modelo de floranta Esperanto en Soveta Unio, ili konvinkiĝis pri la neceso fari klopodojn por reveki la delonge mortintan movadon tie.[6]

1. Kiel Burda iom poste rakontis, li devis oferi multajn leterojn kun instigoj, riproĉoj kaj kuraĝigoj por fine konvinki Balkányi, „ke porpaca laboro per Esperanto en Popoldemokratioj ne bezonas oficialan permeson". *La Pac-defendanto* 1956, n-ro 49 (jan.), p. 10.
2. *Paco* 1954, n-ro 4 (feb.), p. 8.
3. Paŭlo Balkányi, „El Budapeŝto", *l' omnibuso* 10. 1973, n-ro 5 (57), p. 13.
4. *TKKE Informas* 1956, n-ro 2, p. 4 (aldono al *Bulteno de Esperantista Klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2*, 1956, n-ro 34/35, feb./mar.).
5. Cit. A. Balague, „Malferma letero al esperantista pacamiko X en Polio", *Paco* 1954, n-ro 12 (okt.), p. 7.
6. R. Burda, „Batalo ĉirkaŭ la laŭroj", *Paco* 1956, n-ro 29/30 (apr./majo), p. 3.

Rudolf Burda, ĉefe helpe de *La pacdefendanto*, batalis por la revivigo de Esperanto en orienta Eŭropo kaj Soveta Unio.

La lingvisto E.A. Bokarev kuraĝe pledis por restarigo de la soveta Esperanto-movado.

En la jaro 1954 tio ne plu ŝajnis esti senespera revo, ĉar Soveta Unio komprenigis, ke post preskaŭ dudekjara izoliĝo ĝi pretas revigligi siajn kulturajn kontaktojn kun eksterlando. Signifoplena komenco estis, en aprilo, ĝia aliĝo al Unesko, do al la gvida internacia kultura organizaĵo. Tuj la esperantistoj en la popoldemokratioj ligis al tiu paŝo la esperon, ke ne nur vaste malfermiĝos la pordoj al mondskala kultura interŝanĝo, sed ke ankaŭ la Esperanto-movado profitos de la novorientiĝo de la soveta kultura diplomatio.[1]

En aŭgusto 1954, oficiala soveta institucio rompis la silenton pri Esperanto – por la unua fojo post tre longa tempo. Responde al demando el Kanado, la vicprezidanto de la Sekcio de Pedagogiaj Sciencoj en Tutsoveta Societo por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, V. Esipov, prezentis la starpunkton de Soveta Unio pri artefaritaj lingvoj. Ĝi, ne mirige, estis tute negativa, sed lia esprimmaniero tamen donis „iom luman perspektivon", kiel sagace rimarkis la japana esperantisto Miyake Sihei. Esipov skribis:

> La ĉefa refuto de sovetaj sciencistoj estas la jeno: Esperanto kaj similaj lingvoj baziĝas sole sur la lingvoj de malgranda parto de la homaro, kaj komplete ignoras la lingvojn de la granda plimulto de la popoloj – la popoloj de orienta Eŭropo, Azio, Afriko kaj Oceanio, ktp.
> Malgraŭ tre vasta propagando dum 50 jaroj, Esperanto estas uzata de ekstreme malgranda malplimulto eĉ de la homoj parolantaj eŭropajn lingvojn.

Laŭ la informo de Esipov, la lernado de Esperanto ne estas malpermesita en Soveta Unio, nek la sovetaj sciencistoj asertas, ke „mondlingvo" ne povas disvolviĝi; sed ili opinias, ke ĝi povus disvolviĝi nur en la malproksima estonteco, kiel sekvo de longa kaj vasta komunikiĝo inter la popoloj.[2]

Kvankam do la sinteno de tiu ĉi soveta reprezentanto restis nefavora, estas rimarkinde, ke Esipov ne levis ideologiajn akuzojn kontraŭ la esperantistoj, sed esprimis pragmatan dubon pri la kvalitoj de la lingvo kaj la venkoŝancoj de la movado. Liaj argumentoj, kiuj similis la rezon-manieron de konservativaj kontraŭuloj de Esperanto, estis kuraĝiga elemento: Esperanto ne

1. *Paco* 1954, n-ro 7 (majo), p. 8.
2. *News-Facts about Soviet Union To-day* (Kanado) 1954, n-ro 48 (aŭg.); cit. *La Revuo Orienta* 36. 1955, p. 53.

plu estis simple prisilentata, kaj la esperantistoj ne plu estis denuncataj kiel burĝaj kosmopolitoj (akuzo, kontraŭ kiu apenaŭ eblis sin defendi).

En decembro 1954 okazis en Montevideo la Oka Ĝenerala Konferenco de Unesko. Universala Esperanto-Asocio estis akceptita kiel organizaĵo, kun kiu Unesko havas konsultajn rilatojn. Eĉ pli grave, la Konferenco akceptis rezolucion, kiu „notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo" kaj „rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko". En la voĉdono pri tiu rezolucio la delegacioj de Soveta Unio kaj ĝiaj aliancanoj surprize sindetenis.[1]

La fakto, ke Soveta Unio ne kontraŭis rekonan deklaron pri Esperanto, verŝajne decide influis la postan evoluon. Per tio la esperantistoj en la popoldemokratioj estis ekipitaj per argumento uzebla kontraŭ sabotaj intencoj de la aŭtoritatoj[2] kaj kuraĝigitaj pliintensigi la ĝis tiam tre sporadajn kontaktojn kun sovetaj esperantistoj, kiuj transvivis la persekutojn kaj, precipe per leteroj de Balkányi, iom post iom informiĝis, ke entute ankoraŭ ekzistas Esperanto-movado en la ekstera mondo. Kun granda ĝojo estis registrite, ke fine de decembro 1954 Balkányi ricevis respondon de esperantista gravulo el Soveta Unio – de Evgenij Bokarev, kunlaboranto en la Instituto de Lingvoscienco de la Akademio de Sciencoj, kiu en 1928, kiel juna lingvisto, estis partopreninta en la serĉado de marksisma lingvoscienco kaj la ebla loko de Esperanto en ĝi.[3] Kvazaŭ intertempe ne estis aliaj prioritatoj, Bokarev raportis al Balkányi, ke „Esperanto ludos gravan rolon en procedo de finfina realiĝo de tuthoma lingvo de estonto. Pro tio la marksisma lingvoscienco havas inter siaj studobjektoj ankaŭ Esperanton."[4]

1. Ulrich Lins, „25 jarojn post la venko de Montevideo", *esperanto* 72. 1979, p. 201-204.
2. R. Burda, „Al niaj popoldemokrataj gek-doj!", *La Pacdefendanto* 1955, n-ro 38 (feb.), p. 1. – Je tiu ĉi okazo Burda insistis, montrante al la agado de MEM, ke ne la rusa lingvo, sed Esperanto estas la lingvo de la tutmondaj pacdefendantoj.
3. Vd. la skizon pri lia agado en la nekrologo: A.D. Duličenko, „E.A. Bokarev", *Scienca Revuo* 23. 1972, p. 113-116.
4. Paŭlo Balkányi, „Kun malĝojo pri Bokarev", *La Pacaktivulo* 1971, n-ro

Kiel Bokarev poste agnoskis, Balkányi estis la unua, kiu instigis lin repreni la agadon por Esperanto.[1] Sekvis pliaj leteroj el Soveta Unio, kaj baldaŭ en *Paco* kaj *La Pacdefendanto* aperis la unuaj korespond-deziroj de sovetaj esperantistoj, je kiuj la reeĥo el aliaj landoj estis tiel granda, ke la anoncintoj ne povis respondi al ĉiu. Same, kvankam de *La Pacdefendanto*, dank' al kiu ekzemple leningradaj esperantistoj eksciis unu pri la alia[2], centoj da numeroj estis ekspeditaj al Soveta Unio, tio ne sufiĉis por kontentigi la interesiĝon de malnovaj kaj novaj esperantistoj tie. Kaj kiam Bokarev raportis komence de julio 1955, ke laŭ la iniciato de influaj sovetaj lingvistoj[3] komenciĝis preparoj por la fondo de Soveta Esperanto-Asocio funkcionta kadre de la Akademio de Sciencoj kaj ke la esperantistoj „ĉie renkontas aprobon kaj helpon"[4], la glacio ŝajnis rompita. En oktobro Burda triumfe notis la rezultojn de laboro, kiun li retrorigarde priskribis kvazaŭ militiron kontraŭ la malamikoj de Esperanto: Per la servigo de la lingvo al la pacbatalo tiuj malamikoj estis „senarmigitaj", tiel ke eblis reorganizi la movadon „en la pli facile akireblaj bastionoj", kaj per firmigo de la pozicioj en la popoldemokratioj estis kreita la antaŭkondiĉo por „ataki la por ni gravan centron"; povante montri al Esperanto kiel „grava faktoro en la Monda Pacmovado" la sovetaj esperantistoj nun povas daŭrigi la „ofensivon" por definitive faligi la lastan bastionon de la malamikoj de Esperanto.[5]

La optimismo, kiun Burda esprimis en tiel batalema lingvaĵo, ne estis senbaza, precipe kiam oni rekonsciigas al si la historian

89, p. 13-14. – La letero de Bokarev, el kiu citas Balkányi, portas la daton de 27-12-1954.

1. Letero de Bokarev al Balkányi, de 26-6-1955; cit. R. Burda, „Batalo ĉirkaŭ la laŭroj", *Paco* 1956, n-ro 29/30 (apr./majo), p. 2.
2. „Leningradanoj interkonatiĝas trans Ĉeĥoslovakio", *La Pacdefendanto* 1956, n-ro 50 (feb.), p. 3. – Pri N. Cvetkova kaj S. Podkaminer.
3. Bokarev indikis la nomojn de V.V. Vinogradov, V.N. Jarceva, L.I. Ĵirkov, K.E. Majtinskaja kaj B.A. Serebrennikov. El tiuj almenaŭ Ĵirkov kaj Majtinskaja mem estis esperantistoj.
4. Letero de Bokarev al konferenco de ĉeĥoslovakaj esperantistoj en Otrokovice, de 3-7-1955, en *La Pacdefendanto* 1955, n-ro 43/44 (jul./aŭg.), p. 1-2. – Bokarev raportis, ke la decido pri fondo de asocio estis farita dum kunsido de la fako pri literaturo kaj lingvoj ĉe la Akademio (18-6-1955).
5. R. Burda, „Ĉirkaŭita estas la lasta bastiono", *La Pacdefendanto* 1955, n-ro 46 (okt.), p. 1-2.

fonon. Komence de junio 1955 la sovetaj gvidantoj Nikita Ĥruŝĉev kaj Nikolaj Bulganin per sia „kanosa iro" al Beograd aranĝis la repaciĝon kun Jugoslavio, kio ŝajnis sekvigi pli da respekto flanke de Soveta Unio ankaŭ por la suvereneco de la popoldemokratioj. En julio, dum konferenco en Ĝenevo, la registaraj estroj de Usono, Soveta Unio, Britio kaj Francio interkonsentis vastigi la kulturajn rilatojn inter okcidento kaj oriento. La „ĝeneva spirito" inspiris la organon de UEA paroli pri la komenciĝo de nova epoko ankaŭ por la tutmonda Esperanto-movado, anonciĝanta interalie per la „ĝojigaj informoj", kiuj venas de oriento.[1] Ili estis, krom la novajo pri revivigo de Esperanto en Soveta Unio, la reaktiviĝo de Bulgara Esperantista Asocio, la fondo de Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista (TKKE) en Ĉeĥoslovakio kaj la re-aliĝo de la pola asocio al UEA. Ankaŭ povis okazi, komence de aŭgusto 1955, la unua renkonto de esperantistoj el okcidento kaj oriento post la Malvarma Milito – dum la Kvina Monda Festivalo de Junularo en Varsovio. Partoprenis preskaŭ 150 esperantistoj el 15 landoj (inter kiuj ne estis Soveta Unio).[2]

En retrospektivo pri la jaro 1955 la ĉeĥoslovakaj esperantistoj notis, ke ĝi „signas gravan ŝanĝon en la opinio de aŭtoritatoj kaj instancoj pri la Internacia Lingvo [en orienta Eŭropo]: la oficiala malfavoro iom post iom forvelkas kaj aperas signoj pri surpriza favoro kaj pri senantaŭjuĝa konsidero pri la rolo de Esperanto".[3] Kaj post kiam Ĥruŝĉev dum la 20a Kongreso de KPSU malkovris la terurajn krimojn faritajn dum la regado de Stalin, tio ankoraŭ plikreskigis la esperojn de la antaŭe persekutataj kaj diskriminaciataj homoj. La 5an de marto 1956, nur dek tagojn post la finiĝo de la kongreso, la soveta novaĵ-agentejo TASS diskonigis, ke en Soveta Unio kreiĝas esperantistaj rondetoj.[4] La 1an de julio, la hungara Ministerio pri Popola Klerigo oficialigis Hungarlandan

1. Ivo Lapenna, „Sur la sojlo de nova epoko", *Esperanto* 48. 1955, p. 273-274.
2. Michel Duc Goninaz, „Mi estis en Varsovio", *La Juna Vivo* 1955, n-ro 3/4 (nov./dec.), p. 14-15, 18.
3. Jar. Maŕík, Jos. Vítek, „De malsukcesoj ni lernas", *TKKE Informas* 1956, n-ro 2, p. 2.
4. J. Tilindris, „Trairita vojo", *Horizonto de Soveta Litovio* 1979, n-ro 4, p. 36. – Laŭ tiu ĉi artikolo, la 3an de majo 1956 en Litovio formiĝis „iniciata grupo" de esperantistoj el diversaj lokoj.

Esperanto-Konsilantaron, fonditan en septembro de la antaŭa jaro[1]; per tio la persistaj klopodoj de Balkányi, Lajos Márton, Julio Baghy kaj aliaj „burĝaj" esperantistoj fine montris frukton.[2] Ankaŭ komence de julio, post okjara interrompo okazis, en Sofio, denove Bulgara Esperanto-Kongreso, dum kiu la reprezentantoj de la movadoj de Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Rumanio deklaris sian apogon al la laboro de UEA kaj pledis por senprokrasta aliĝo de la restarigitaj asocioj al la neŭtrala mond-organizaĵo.[3] Kelkajn semajnojn poste, en la Universala Kongreso en Kopenhago, aperis delegitoj el Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando kaj Ĉinio.[4]

Aparte notinda estis la partopreno de jugoslavia delegitaro en la Bulgara Kongreso. Ĝia estro, Ivo Borovečki, faris en la unua labor-kunsido paroladon, kiu preskaŭ ĉiufraze estis aplaŭdata de la entuziasmigitaj aŭskultantoj, ĉar ĝi entenis malkaŝan pritrakton de la situacio de Esperanto en Soveta Unio kaj la popoldemokratioj. Borovečki, malantaŭ kies dorso pendis granda portreto de Stalin, ankaŭ eldiris klarvoĉe, vorton post vorto, la nomon de tiu, kiun li trovis kulpa pri la subpremo de Esperanto:

1. Teksto de la oficialiga dekreto: *TKKE Informas* 1956, n-ro 7, p. 11 (aldono al *Bulteno de Esperantista Klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2*, 1956, n-ro 41, sept.).
2. La funkciulo Borbála Szerémi-Tóth, kiu siatempe pledis por la dissolvo de HES, ĉar „oni devas uzi ĉiujn fortojn por la ekonomia kaj politika rekonstruo", poste mem konfesis, ke la revivigo de la movado en Hungario ŝuldiĝas al la „burĝaj esperantistoj": B. Szerémi, „1918-1958", *Bulteno. Cirkulero de la Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro* 1958, p. 78.
3. La bulgara asocio aliĝis al UEA en 1956, la hungara en 1963. La aliĝo de la ĉeĥoslovakoj prokrastiĝis ĝis 1970.
4. Paradokse, dum tiu sama kongreso okazis la kulmino de kelkjara konflikto inter UEA kaj ĝia usona landa asocio, Esperanto-Asocio de Norda Ameriko (EANA). En la atmosfero de makartiismo, precipe inter 1954 kaj 1956, EANA lanĉis kampanjon kontraŭ „komunista enfiltrado en la Esperanto-movadon", interpretante la reviviĝon de Esperanto en orienta Eŭropo kiel ruzan manovron de Moskvo kaj atakante UEA pro ĝia favora reago je tiu reviviĝo. Ivo Lapenna, la ĝenerala sekretario de UEA, estis eĉ denuncita ĉe alilandaj sekurecaj servoj. En Kopenhago, la Komitato de UEA konfirmis la pli frue deciditan eksigon de la ĝenerala sekretario de EANA, G.A. Connor, kaj krome iniciatis la proceduron por eksigi EANA el UEA. Tiu eksigo ne okazis, ĉar EANA mem eksiĝis. Vd. interalie: „Komunista enfiltrado en la Esperanto-movadon", *American Esperanto Magazine* 73. 1960, p. 3-13 (traduko el la svisa *Bulletin des Nationalen Informations-Zentrums*); *Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio 1956. Dua parto*, p. 80-94; EeP, p. 582-584.

„Iosif Vissarionoviĉ Stalin" – sed tiam la aplaŭdo mortis en konsternita silento. La denunco de la krimoj de Stalin estis ankoraŭ tro freŝa evento, ol ke la bulgaraj esperantistoj, ankoraŭ ne provizitaj per direkto-montra deklaro de sia partio, kuraĝus aklami al tia senprecedence sincera nomado de longe kaŝita vero.[1] En Pollando, kontraŭe, la esperantistoj povis aŭdi de sia propra asocia prezidanto vualŝirajn vortojn pri la pasinteco. Kiam fine de oktobro – la monato, en kiu la lando travivis danĝeran politikan krizon – okazis en Varsovio la 13a Pola Esperanto-Kongreso, Andrzej Rajski faris inaŭguran paroladon, en kiu li salutis la novan parti-gvidanton Gomulka kaj akuzis unuspire Hitler, Franco kaj Stalin pro la persekuto de Esperanto, deklarante: „Demokratio kaj evoluo de Esperanto estas ne disigeblaj."[2]

Nur proksimume duonan jaron post la 20a Kongreso de KPSU, la „senstalinismiĝo" manifestiĝis ankaŭ en la soveta lingvoscienco. *Voprosy jazykoznanija*, la ĉefa lingvistika revuo de Soveta Unio, en sia julia/aŭgusta numero de 1956 prezentis grandan surprizon, enkonduke kritikante Stalin kaj je la fino laŭdante Esperanton.[3] La unua artikolo, kiu traktis aktualajn problemojn de la nuntempa soveta lingvistiko[4], skurĝis la „sterilajn diskutojn" kaj „abstraktan teoriumadon" de la pasinteco kaj specife kulpigis Stalin, ke li paralizis sendependan teorian laboron en la ĝenerala lingvistiko. Samtempe la redakcio distancigis sin de la „vulgaraj marksismaj konceptoj" de Marr, kvankam li estis parte defendata kontraŭ la stalinaj atakoj. Memkritikon pro la antaŭa akcepto de ĉiu eldiro de Stalin kiel „netuŝebla dogmo" akompanis la konfeso, ke la sovetaj lingvistoj povas multon lerni de siaj eksterlandaj kolegoj, kaj la promeso radikale plibonigi la laboron de la lingvosciencaj institucioj kaj de la propra revuo.

Kvazaŭ por substreki la seriozecon de la intenco fundamente ŝanĝi la manieron de prilingvaj esploroj, la sama numero publiki-

1. A.D. Atanasov, *Kelkaj rememoroj*, nepublikigita manuskripto, p. 7; persona komuniko de d-ro Ivo Borovečki, de 26-10-1975.
2. *Bulteno de Asocio de Esperantistoj en Pollando* 1956, n-ro 10/11, p. 5.
3. Kp. „Esperanto in the ups and downs of Moscow linguistics and politics", *American Esperanto Magazine* 71. 1957, p. 5.
4. „O nekotoryh aktual'nyh zadačah sovremennogo sovetskogo jazykoznanija", *Voprosy jazykoznanija* 1956, n-ro 4, p. 3-13.

gis raporton pri sesio, okazinta la 24an de januaro 1956 en la Instituto de Lingvoscienco, kiu estis dediĉita al la nuna stato de la demando de internacia helpa lingvo.[1] La raporto grandparte konsistis el resumo de referaĵo, kiun faris Bokarev[2] en la sesio. Estis redonita interalie la jena starpunkto:

> Ekzistas nenia dubo, ke ĉiuj provoj perforte altrudi iun el la gvidaj naciaj lingvoj al ĉiuj popoloj en la mondo estas komplete senesperaj. Ili havas nenion komunan kun la marksisma-leninisma koncepto pri nacia evoluo kaj devas esti forĵetataj kiel nepre fiaskontaj.

Por solvi la problemon de faciligo de la internacia komunikado, laŭ Bokarev, „plej grandan intereson" meritas la provoj de artefarita lingvo, el kiuj nur Esperanto atingis signifan disvastiĝon kaj praktikan valoron.

Kiel plue diris la raporto, en la diskuto pri la referaĵo de Bokarev estis speciale notita „la neceso de teoria studo de Esperanto kaj ĝia signifo kiel kolektiva lingvistika eksperimento".[3] Fakte, jam en la postsekvanta numero de *Voprosy jazykoznanija* aperis artikolo pri „internacia helpa lingvo kiel lingvistika problemo".[4] Tiu artikolo, kiu donis superrigardon pri la teoriaj demandoj estiĝintaj en la ĝisnunaj esploroj de internacia helpa lingvo kaj konklude esprimis bedaŭron, ke la sovetaj lingvistoj ne sufiĉe priatentis tiujn demandojn, estis verkita en tute trankvila, senemocia stilo. Sed ĝi ne preterlasis fari unu atentigon, kiu evidente

1. V.P. Grigor'ev, „V Institute jazykoznanija AN SSSR", *Voprosy jazykoznanija* 1956, n-ro 4, p. 158-159. – Esperanta traduko: *Bulteno de Bulgara Esperantista Asocio* 2. 1956, n-ro 10, p. 3-4. Angla traduko: *American Esperanto Magazine* 71. 1957, p. 6-8.
2. La teksto de la referaĵo, „Sovremennoe sostojanie voprosa o meĵdunarodnom vspomogatel'nom jazyke. Fakty ob ėsperanto" (La nuntempa stato de la demando de internacia helpa lingvo. Faktoj pri Esperanto), aperis en: M.I. Isaev (red.), *Problemy interlingvistiki*, Moskva 1976, p. 12-20.
3. La raporto mencias el la diskuto ankaŭ la starpunkton, ke „la demandon de la nepra utileco de Esperanto en nia epoko necesas apartigi de la ĝenerala demando de internacia helpa lingvo en la estonteco, kiam Esperanto – kiel produkto de la hindeŭropa lingvogrupo – devos cedi sian lokon al alia helpa lingvo, kiu konsideros ankaŭ la radikvortojn de la aziaj lingvoj."
4. O.S. Ahmanova, E.A. Bokarev, „Meĵdunarodnyj vspomogatel'nyj jazyk kak lingvističeskaja problema", *Voprosy jazykoznanija* 1956, n-ro 6, p. 65-78. – Esperanta traduko: „La internacia helplingvo kiel lingvistika problemo", *Paco* 1979, n-ro 4, p. 6-8; n-ro 5, p. 9-11; n-ro 6, p. 9-11.

celis senkreditigi la oponantojn de Esperanto: Estis citita la opinio de la germana lingvisto Gustav Meyer, kiu en 1891 kontestis la ekzistorajton de artefarita lingvo kaj subtenis la tezon, „ke la grandaj mondlingvoj pli kaj pli vastigas la amplekson de la al ili subigita teritorio, tiel ke la nombro de la partoprenantoj en la batalo pri hegemonio estas ĉiam pli reduktata".[1] Ne necesis eksplicite instrui al la legantoj de la soveta lingvistika organo, kiom similas tiu opinio al la „zonlingvaj" tezoj, formulitaj de Stalin en 1950.

Ŝajnis nur demando de tempo, kiam en Soveta Unio denove eblos fari organizitan laboron por Esperanto. Fine de 1955 estis informite, ke la sovetaj esperantistoj „ĉiutage atendas la legaligon" de la movado[2]; estis fondita, sub la prezido de Bokarev, „Iniciata Grupo de Sovetaj Esperantistoj".[3] Tamen, atingi la permeson por tutsoveta Esperanto-asocio montriĝis multe pli malfacile, ol komence kredis Bokarev kaj liaj kunagantoj. Dumtempe estis espero restarigi SEU, kiu oficiale neniam estis malfondita.[4] Sed al tiu provo la Partio tre decide metis finon.

Ankaŭ en la popoldemokratioj la novkomenco ne iris ĉie glate; la grado de reaktiviĝo konsiderinde variis de lando al lando. La poloj povis tiel rapide rekolekti siajn fortojn, ke ili povis en 1959 – cent jarojn post la naskiĝo de Zamenhof – organizi en Varsovio la 44an Universalan Kongreson. Iom antaŭ ĝi Pola Radio komencis disaŭdigi ĉiutagajn elsendojn en Esperanto. La bulgaroj lanĉis en januaro 1957 monatan esperantlingvan revuon, *Nuntempa Bulgario*, ĉefe destinitan diskonigi la atingojn de la socialisma

1. Aĥmanova kaj Bokarev citas i.a. la opinion de Meyer, ke estas „bedaŭrinda sekvo de la nacia ŝovinismo de niaj tagoj", ke la „plej malgrandaj nacietoj" deziras aperigi sciencajn verkojn nur en sia gepatra lingvo. La eseo de Meyer, „Weltsprache und Weltsprachen", estas represita en: Reinhard Haupenthal (red.), *Plansprachen. Beiträge zur Interlinguistik*, Darmstadt 1976, p. 27-45 (precipe p. 40, 43); kp. Aĥmanova/Bokarev, p. 66.
2. Informo de Simon Mkrtiĉjan, Erevan, en *La Pacdefendanto* 1955, n-ro 48 (dec.), p. 5.
3. Informo de S.V. Saryĉev, sekretario de la Iniciata Grupo, en *Paco* 1956, n-ro 29/30 (apr./majo), p. 7.
4. La 32a Kongreso de Bulgaraj Esperantistoj ricevis salutleteron de „Organiza Komitato de Sovetrespublikara Esperantista Unio" (21-6-1956): *Bulteno de Bulgara Esperantista Asocio* 2. 1956, n-ro 8, p. 7-8.

konstruado en eksterlando[1], kaj Bulgara Esperantista Asocio, kiu estas membro de la Patrolanda Fronto, ricevis en 1967, okaze de sia 60jara jubileo, altan ŝtatan ordenon pro sia „popolutila kulturagado"; havante ĉ. 5 000 membrojn, ĝi estas unu el la plej fortaj landaj asocioj de UEA. La hungaroj trovis sian definitivan organizan bazon en 1960, per la fondo de Hungara Esperanto-Asocio; en 1961 ekaperis *Hungara Vivo*, kiu hodiaŭ estas nekontesteble la plej alloga esperantlingva periodaĵo de orienta Eŭropo. Eĉ en Norda Vjetnamio, verŝajne ne senrilate al la esperantista revigliĝo en la popoldemokratioj, en decembro 1956 estis fondita „Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio", al kiu sian apogon donis ministroj kaj konataj intelektuloj. Kaj ankaŭ en Ĉinio ĉesis la deviga paŭzo: Ĉina Esperanto-Ligo komencis denove funkcii en marto 1957, kaj ankoraŭ samjare reaperis, dumonate, la propaganda revuo *El Popola Ĉinio*.

Sed estis ankaŭ seniluziigoj. Ili trafis ĝuste tiujn, kiuj plej brave eltenis dum la malfacilaj jaroj: la ĉeĥoslovakoj. Unu monaton antaŭ tutŝtata esperantista konferenco en Olomouc, dum kiu estis fondota landa asocio, la provizora TKKE ricevis de la Ministerio pri Instruado kaj Kulturo la informon, ke la konferenco devos esti prokrastita „je nedifinita tempo".[2] Burda, kiu atribuis la nuligon al la atendado de la aŭtoritatoj je oficialigo de Esperanto en Soveta Unio, kelkajn semajnojn poste devis kontraŭvole rezigni pri plua aperigo de sia bulteno. Ĉirkaŭ la sama tempo, kiam sovetaj tankoj frakasis la ribelon en Hungario kaj la internacia situacio aldone streĉiĝis pro la konflikto ĉe Suez, subite lin vizitis ano de la ŝtata sekureca servo, kiu postulis tuj ĉesigi la eldonon de *La Pacdefendanto*. La oficiala kialo estis, ke la Esperanto-rondeto de Plzeň, kiu redaktis kaj multobligis la bultenon, perdis sian patronan organizaĵon, la klubon de poŝtistoj, kaj ne sukcesis trovi novan.[3] Sed Burda supozis, ke al la ĉesiga

1. Ĝi aperis ĝis 1970 (en 1964-65 sub la nomo *Bulgario*).
2. *Paco* 1956, n-ro 34/35 (sept./okt.), p. 14. – En 1957, ministeria letero ĉesigis la agadon de TKKE: Kamarýt, p. 183.
3. Formale, *La Pacdefendanto*, kiu fine havis pli ol 3 000 abonantojn en Ĉeĥoslovakio, estis eldonata de diverslokaj institucioj, laste de la Esperanto-sekcio de Distrikta Pac-Komitato en Mikulov. Ties respondeculo estis la katolika pastro kaj kanoniko Alfred Macek, kiu sola, laŭ Burda,

ordono kontribuis ankaŭ la fakto, ke li ne plu apartenis al la partio.[1]

Sekvis alia malagrabla surprizo. En septembro 1957 la ĉeĥoslovakaj esperantistoj eksciis, ke la aŭtoritatoj decidis funkciigi Ĉeĥoslovakan Esperanto-Komitaton (ĈSEK) kaj ke ili nomis prezidanto de tiu komitato Adolf Malík – ĝuste tiun homon, kiu en 1952 estis plenuminta la likvidan ordonon kaj kiu poste plurfoje deklaris, ke la esperantistoj ĉesu okupiĝi pri Esperanto, sed lernu la rusan. La nomigo de Malík, kiun la Esperantista Klubo de Praha estis eksiginta el siaj vicoj, nemirige konsternis la esperantistojn, sed ili ne povis malhelpi, ke en ĈSEK, starigita kiel filio de la Kleriga Instituto en Praha[2], Malík meze de 1958 iĝu sekretario. Li tuj montris sin servema al la unuaranga deziro de la aŭtoritatoj: kontroli la esperantistojn, precipe iliajn ligojn kun eksterlando, rekomendante la ĉesigon de la eldonado de regionaj bultenoj kaj de la abonado de okcidentaj Esperanto-gazetoj.[3] En februaro 1959 la ĉeĥoslovaka sekcio de MEM devis kunfandiĝi kun ĈSEK[4], per kio Burda perdis la eblon iel esence influi la pluan direkton de la movado en Ĉeĥoslovakio.[5] Kvankam la

---

havis la kuraĝon transpreni komence de 1956 la distribuon de la ne plene legala bulteno: *La Pacdefendanto* 1956, n-ro 55 (jul.), p. 2.

1 Rudolf Burda, „La Pacdefendanto' ĉesas aperi", *La Pacdefendanto* 1956, n-ro 58/59 (nov./dec.), p. 3-4. – Laŭ Burda, en ĉiuj aliaj lokoj la esperantistoj daŭre havis la eblecon organizite labori kadre de klerigaj aŭ sindikataj kluboj.

2. La Ministerio pri Instruado kaj Kulturo interkonsente kun la sindikatoj kreis la komitaton kiel kunordigan centron de la Esperanto-rondetoj ekzistantaj ĉe diversaj institucioj. La fondo de memstaraj Esperanto-grupoj restis malpermesita.

3. La aŭtoritatoj klarigis, ke ili ne celas vastigi la nombron de esperantistoj, sed registri kaj „eduki kaj instrukcii pri la ĝusta konceptado" la ekzistantajn esperantistojn: Ivo Lapenna, *Hamburgo en retrospektivo*. Dua eld., Kopenhago 1977, p. 17. – La populara bulteno de la klubo en Praha reaperis post duonjara paŭzo en septembro 1958, etformate kaj kun „sensignifaj sciigoj": „Esperanto-novaĵoj el Ĉeĥoslovakio", *Sennaciulo* 30. 1959, n-ro 11 (654), p. 4. (Laŭ tiu ĉi fonto, kelkaj esperantistoj estis eĉ malliberigitaj; laŭ Lapenna, p. 20, al tiuj apartenis Jaroslav Šustr, la prezidanto de la klubo en Praha kaj ĉefdelegito de UEA.)

4. *Paco* 6. 1959, n-ro 64/65 (mar./apr.), ĉs. eldono, p. 7. – En marto 1959 komencis aperi *Zprávy Československého esperantského výboru / Informoj de Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato*.

5. Pri Burda, kiu en 1959 perdis ankaŭ la prezidantecon de MEM, la aŭstra pacdefendanto Adolf Halbedl menciis „la sendankan konduton de rikoltantoj de lia semaĵo": *Paco* 8. 1961, n-ro 86 (jan.), sveda eldono, p. 3. – En

ĉeĥoslovakaj esperantistoj per sia fortà opozicio fine atingis, ke Malík malaperu de la scenejo[1], nur en 1961 povis aperi la urĝe bezonata lernolibro de Theodor Kilian, *Cvičebnice esperanta* (Esperanta ekzercaro), kies eldono prokrastiĝis kvar jarojn pro politik-ideologiaj motivoj. Poste iom post iom pliboniĝis la kondiĉoj labori por Esperanto en Ĉeĥoslovakio[2], sed nur en marto 1969 – sekve de traktadoj faritaj dum la mallongviva politika „printempo" de 1968 – estis fondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio, nelonge antaŭ la definitiva falo de Alexander Dubček.[3]

En GDR, la Esperanto-movado dum multaj jaroj eĉ pli multe postrestis, ol tiu en Ĉeĥoslovakio. Tio ne ŝuldiĝis al manko de kuraĝo ĉe la orientgermanaj esperantistoj. Ili sendis leterojn kaj peticiojn al partiaj kaj registaraj instancoj, en kiuj estis emfazita ne nur la kontribuo de Esperanto al la paco, sed ankaŭ persiste levita la argumento, ke la malpermeso formi grupojn ne akordiĝas kun la konstitucio de GDR, laŭ kiu ĉiuj civitanoj havas la rajton kuniĝi „paceme kaj nearmite". Unu esperantisto skribis al prokuroro kun la peto zorgi, „ke nian konstitucion ankaŭ respektu la polico"[4], kaj kiam tiu rifuzis agnoski la malpermeson de Esperanto-grupoj kontraŭkonstitucia, turnis sin al la ministro pri justico kun la postulo, ke li eksigu la prokuroron.[5]

Observante ke la aŭtoritatoj evitis trakti la juran staton, sed preferis rezonadi pri la lingva netaŭgeco aŭ kultura nevaloro de Esperanto, la esperantistoj pli elstarigis la praktikan utilon de sia

---

1962 Burda mem publike bedaŭris, ke la organo de MEM aperas „plej parte nur kun parti-politika enhavo": „Kie restas M.E.M.? Nefermita letero de la eks-prezidanto de MEM al la Movado", *Al la Paco* (bulteno de la itala MEM-sekcio) 1962, n-ro 22 (nov./dec.), p. 5.

1. „Esperanto-novaĵoj el Ĉeĥoslovakio", p. 4. – Tamen, ankoraŭ en 1962/63 Malík estas indikita kiel respondeca redaktoro de la ĉeĥoslovakaj numeroj de *Paco*.
2. Notinde, en la jaroj 1960 ĝis 1962 estis aranĝitaj tutŝtataj seminarioj por la funkciuloj de la Esperanto-rondetoj – „precipe kun ideologia enhavo": Oldřich Kníchal, „Mallonge pri la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio", en: *Tridek jaroj. Faktoj pri Ĉeĥoslovakio*, Praha 1976, p. 38.
3. En majo 1969 estis fondita „Asocio de Esperantistoj en Slovaka Socialisma Respubliko". Ambaŭ asocioj aliĝis al UEA.
4. Letero de W. Ranft, Radebeul, en *La Pacdefendanto* 1953, n-ro 22 (okt.), p. 2.
5. „La Esperanto-movado en Meza Germanio" (raporto de Walter Ranft), *Germana Esperanto-Revuo* 9. 1956, p. 2.

lingvo en la servo de la paco. Jam ricevinte, en marto 1955, konfeson, ke Esperanto mem ne estas malpermesita kaj ke oni rajtas private okupiĝi pri ĝi[1], ili sukcesis atingi kelkajn monatojn poste ankaŭ deklarojn de la Centra Komitato de la partio, ke ili povos kunlabori en la pacmovado kaj ke korespondado, kiu servas al la paco pere de Esperanto, ne estos malhelpata.[2] La praktikaj sekvoj de tiuj deklaroj tamen restis limigitaj, ĉar en la distriktoj Dresden kaj Leipzig la unuaj provoj de la esperantistoj organiziĝi en la kadro de la pacmovado estis ĉesigitaj.[3]

Kiam iĝis konate, ke en la ĉefa soveta lingvistika revuo aperis tre favora prezento de Esperanto, la aktivuloj en GDR estis provizitaj per nova municio. Unu el ili raportis: „Nun komencis vera atako kontraŭ la ankoraŭ hezitantaj instancoj. La efiko estas kaosa." Nome, iuj aŭtoritatoj plue asertis, ke helpe de Esperanto agentoj kaj malamikoj de la ŝtato havas la eblon enpenetri kaj veneni la politikan vivon de GDR, dum aliaj konvinkiĝis pri la taŭgeco kaj valoro de Esperanto[4] (aŭ preferis salti sur la vagonaron, al kiu nun ŝajne Moskvo donis verdan lumon). Pli peza restis la influo de la kontraŭstarantoj: La esperantistoj ofte ricevis de oficialaj instancoj respondojn, kiuj estis „tiom elturniĝaj, serpentumaj, sensencaj ..., ke oni sin kredas esti idioto".[5] En 1958 la Ministerio pri Popola Klerigo eksplicite pravigis la postrestadon de GDR: Al plendinto, kiu atentigis pri la ebleco publike varbi por Esperanto en aliaj socialismaj landoj, ĝi donis la respondon, ke la speciala politika situacio de GDR postulas apar-

1. Kurt Kessler, „Pri la situacio en la Germana Demokrata Respubliko", *La Pacdefendanto* 1956, n-ro 55 (jul.), p. 4.
2. Du leteroj de la Centra Komitato, de 15-11-1955 kaj 18-1-1956, publikigitaj en Esperanta traduko en *Paco* 3. 1956, n-ro 29/30 (apr./majo), p. 15. Pli frue la sveda MEM-sekcio skribis leteron al la parlamento de GDR kun plendo pro la konfisko de sveda numero de *Paco*: *La Pacdefendanto* 1955, n-ro 42 (jun.), p. 5-6. – Vd. ankaŭ *Sennaciulo* 27. 1956, n-ro 1 (608), p. 3 (negativa respondo de partia instanco), kaj *Germana Esperanto-Revuo* 10. 1957, p. 6 (informo de F. Tischer, i.a. pri la sinteno de la Pac-Konsilantaro).
3. Komuniko de Helmut Moesner, Leipzig, de 7-5-1957, en *Bulteno de Esperantista Klubo ĉe Osvětová beseda en Praha 2*, 1957, n-ro 47 (majo/jun.), p. 16.
4. Curt Kessler, „La evoluo kaj nuna stato de l' Esperanto-movado en la Germana Demokrata Respubliko", *Paco* 5. 1958, n-ro 51/52 (feb./mar.), ĉs. eldono, p. 8.
5. Letero el GDR, *Sennaciulo* 29. 1958, n-ro 2 (633), p. 4.

tajn regulojn.[1] Ankoraŭ en 1962 la laborist-movada veterano Ludwig Schödl amare konstatis, ke en GDR regas „fanatika kontraŭeco kontraŭ Esperanto".[2]

En 1961, la dekreto de 1949 estis oficiale nuligita.[3] Tio ebligis al la esperantistoj fari laboron sub la prizorgo de Germana Pac-Konsilantaro, sed ne ŝanĝis la malpermeson de organiziĝo kaj publika varbado. Fine, ankaŭ tiu plej grava baro estis forigita: En februaro 1965 la „Kulturligo", unu el la t.n. amas-organizaĵoj, decidis doni al la esperantistoj de GDR organizan hejmon; en ĝia kadro fine de marto estis fondita „Centra Laborrondo de la amikoj de Esperanto".[4]

Plej hezite estas malkonstruataj la limigoj kontraŭ libera aktivado de la esperantistoj en Rumanio. Unu el la kaŭzoj estas la negativa sinteno de la aŭtoritata lingvisto Alexandru Graur kontraŭ artefaritaj lingvoj.[5] Post sennombraj petskriboj, la esperantistoj atingis en 1969, ke la Ŝtata Komitato por Arto kaj Kulturo aprobis la fondon de Esperanto-grupoj kadre de kulturaj domoj, sed ne estis eble starigi tutlandan centron por koordini la surlokan aktivadon.[6] Ankaŭ ne multe helpis la permeso (en novembro 1973) okazigi kursojn en popolaj universitatoj[7], ĉar mankis lernolibroj de Esperanto; gramatiko aperinta en novembro 1974 havis eldonkvanton de nur 2 500 ekzempleroj.

Fine de majo 1978 en la Universitato de Timişoara estis fondita „Kolektivo Esperanto-Interlingvistiko" kiel sekcio de Rumana Akademio de Sociaj kaj Politikaj Sciencoj. La kolektivo metis la

1. *Sennaciulo* 29. 1958, n-ro 6 (637), p. 7.
2. Ludwig Schödl, „Esperanto kaj pacpolitiko de Germana Demokrata Respubliko", *Paco* 9. 1962, n-ro 108 (nov.), sveda-dana eldono, p. 5.
3. *Gesetzblatt der Deutschen Demokratischen Republik*, parto II, n-ro 64 (15 sept. 1961), p. 425. – La decido estas de 17-8-1961.
4. En 1981 ĝi ŝanĝis sian nomon al „Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR". Ekde 1976 la esperantistoj de GDR estas reprezentitaj en UEA.
5. Laŭ la maniero de konservativaj lingvistoj, Graur (i.a. en sia verko *Studii de lingvistică generală*, 1960) komparis lingvojn kun vivantaj organismoj kaj sekve konkludis, ke Esperanto, kiel sinteza lingvo, „prezentas neniun avantaĝon": Kp. „Kial la movado ne vivas en Rumanujo", *Esperanto* 57. 1964, p. 82-83.
6. Rumana Kunordiga Esperanto-Komitato, fondita en aŭgusto 1970, neniam estis oficiale agnoskita kaj leĝe registrita.
7. „Aprobita instruado", *esperanto* 67. 1974, p. 83.

akcenton je la scienco kaj universitatnivela instruado de Esperanto. En pluraj filologiaj fakultatoj de rumanaj universitatoj Esperanto komencis esti instruata kiel nedeviga studobjekto, kaj krom lernolibroj kaj vortaroj aperis ankaŭ lingvistikaj studoj pri Esperanto.[1] Dum iom da tempo estis la espero, ke la kolektivo povos funkcii kiel kvazaŭa landa organizaĵo. Sed, tute kontraŭe, sekvis nova regreso. Ekde 1982 estis likviditaj la lokaj kluboj de esperantistoj, fine ankaŭ la kolektivo. Laŭ informoj ricevitaj en 1986, nenia organizita agado por Esperanto, inkluzive la okazigon de kursoj, estas permesita en Rumanio.

4.5.5. *Orienta Eŭropo: progreso kun problemoj*

Kun la escepto de Rumanio, ĉiuj orienteŭropaj landoj aliancitaj kun Soveta Unio estas nuntempe reprezentitaj en UEA kaj do havas organizan ligon kun la tutmonda movado. La Esperanto-asocioj de tiuj landoj dank' al sia membronombro formas konsiderindan proporcion en la Komitato de UEA: El 84 komitatanoj, ne malpli ol 26 venas el Pollando, GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Bulgario. Esperanto-asocioj en okcidentaj landoj kun envio notas tiun forton, kiu montriĝas ankaŭ en tio, ke la orienteŭropaj asocioj ricevas ŝtatajn subvenciojn kaj povas permesi al si pagatajn oficistojn.[2]

La evoluo montris, ke la decido de la aŭtoritatoj ĉesigi la staton de praktika malpermeso signifis por la Esperanto-movado en orienta Eŭropo ne simple, ke ĝi de tiam estas tolerata, sed alportis al ĝi eĉ pli, nome rektan agnoskon kaj oficialan subtenon. Komence ŝajnis, ke por la rajto organiziĝi la esperantistoj devos akcepti tre striktan kontrolon de supre.[3] Tion indikis en Ĉeĥoslovakio la eventoj ĉirkaŭ Malík. En Hungario, kie la Esperanto-movado estas sub prizorgo de la sindikatoj, kiel sekretario de

1. sm, „Kio nova en Rumanio?", *esperanto* 71. 1978, p. 183; Mioara Dobre, „2300 movadanoj en Rumanio", *esperanto* 74. 1981, p. 47-48; Mioara Dobre, „Tamen iom da rumanaj novaĵoj!", *esperanto* 75. 1982, p. 202; Detlev Blanke, „Modelo de sciencista poresperanta agado", *Der Esperantist* 20. 1984, p. 132-134.
2. Kp. Detlev Blanke, „Pri specifaĵoj de la Esperanto-movado en kelkaj eŭropaj socialismaj landoj", *Der Esperantist* 22. 1986, p. 121-125.
3. Kp. M. Arco (= Marek Wajsblum), „Sur la marĝeno de libero", *The Worker Esperantist* 1959, n-ro 118 (jul.), p. 44, 47-48.

HEA estis nomita sindikata funkciulo, kiu apenaŭ sciis Esperanton.[1] En GDR, komisiita gvidi la esperantistojn estis persono, kiu eĉ tute ne sciis la lingvon. Sed tiuj makuloj estis nur portempaj. La hungara sekretario montriĝis persono, kiu pledis unuavice por la intereso de la esperantistoj, malpli por tiuj de la supera instanco, kaj jam fine de la 1960aj jaroj HEA reakiris, nelaste dank' al li, tiom da aglibereco, ke ĝi povis senigi sin de sia prezidantino – de tiu partia veteranino, kiu en 1950 estis proponinta haltigon de la movado. Simile estis en GDR. Tie la lokon de la neesperantisto jam en 1968 prenis la juna aktivulo Detlev Blanke.

Hungario kaj GDR nun apartenas al la landoj, kie la Esperanto-movado aparte bone prosperas. La revuo *Hungara Vivo*, fondita kiel ŝtata propaganda periodaĵo, pli kaj pli alprenis trajtojn, kiuj faras ĝin daŭriganto de la tradicio de *Literatura Mondo*, samkiel la vigla verka kaj eldona agado de hungaraj esperantistoj memorigas la heredaĵon de la antaŭmilita Budapeŝta Skolo. La Kleriga Ministerio de Hungario ebligis la enkondukon de Esperanto, kiel fakultativa studobjekto, en diversgradajn lernejojn, kaj en la Budapeŝta Universitato Eötvös Loránd oni povas studi la fakon „Esperanto – lingvo kaj literaturo" kaj doktoriĝi pri esperantologia temo. En GDR, la esperantistoj atingis, ke lingvistoj donas al Esperanto atenton en grado, pri kiu iliaj samlingvanoj en la Federacia Respubliko nur povas revi.[2] Similaj raportoj pri sukcesoj venas ankaŭ el Pollando, Ĉeĥoslovakio kaj Bulgario. Multnombraj korespond-deziroj el orienta Eŭropo atestas pri tio, kiom penetris Esperanto en ĉiujn socitavolojn kaj kiom da atendoj por kontaktoj kun la ekstera mondo ligiĝas kun la lernado de la lingvo – atendoj, kiujn la esperantistoj en okcidento kvante ne ĉiam povas adekvate respondi. Kaj kiam Universalaj Kongresoj okazas en orienta Eŭropo, laste en Sofio (1963), Budapeŝto (1966 kaj 1983) kaj Varna (1978), tiuj estas ne nur imponaj manifestacioj de reakirita memfido de la esperantistoj

1. Temas pri Antal Koós (1911-1976).
2. La plej impona atingo ĝis nun estas la pli ol 400paĝa verko de Detlev Blanke, *Internationale Plansprachen. Eine Einführung* (Berlin 1985), kiu aperis en prestiĝa lingvoscienca serio.

en la socialismaj landoj, sed ankaŭ nova fonto de inspiro por gastoj el la tuta mondo.

Evidente, Esperanto havas allogon por granda nombro de civitanoj en la orienteŭropaj landoj. Pro tio la movado tie montras nelaciĝantan vivforton. Rekono de tiu ĉi vivforto estis la decido de la reĝimoj ne plu limigi la agadon por Esperanto. Ili tion apenaŭ faris pro tio, ke ili malkovris la utilon de la lingvo por propagandi eksterlande siajn socialismajn atingaĵojn (kvankam tia uzo ja okazas), sed ĉar ili komprenis, ke permesi kaj legalizi la Esperanto-movadon estas pli prudente, ol subpremi ĝin kaj per tio nutri potencialon de malkontento.

Siavice, por ne perdi la ŝtatan fervoron, la esperantistaj gvidantoj ne nur evitas ĉion, kio povus malplaĉi al la aŭtoritatoj, sed ankaŭ plurokaze rekte demonstras sian fidelecon al la reganta politiko – en grado, tamen, kiu varias laŭ la landoj. La organoj de la asocioj en Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj GDR dediĉas konsiderindan parton de sia enhavo al esperantlingva interpreto kaj popularigo de la partia politiko, dum tiuj en Hungario kaj Pollando kutime kontentigas sin per pli malgranda dozo da politike koloritaj artikoloj. Sed la asocioj ĉiuj intensigis la kunlaboron inter si, precipe de 1969, kiam komenciĝis ĉiujaraj konferencoj („konsultiĝoj"), kiuj servas al koordino de la agado, ankaŭ rilate la pozici-difinon de la socialismaj landoj en la tutmonda Esperanto-movado.[1] Ili kunlaboras ankaŭ en la kadro de MEM, kvankam tiu delonge perdis la signifon, kiun destinis al ĝi la fondinto, Rudolf Burda. MEM, kiu en 1973 subskribis interkonsenton pri kunlaboro kun Monda Pac-Konsilantaro, nun plene servas, per regule publikigataj rezolucioj kaj deklaroj, kiel Esperanta laŭtparolilo de la eksterlanda politiko de Soveta Unio. Ankaŭ la revuo *Paco* perdis sian iom heterogenan karakteron, de kiam ĝi, en 1974, dank' al subvencio de Bulgara Komunista Partio[2] transiris al nova eldonsistemo.[3]

1. En la konsultiĝoj kutime partoprenas reprezentantoj de la soveta, pola, orientgermana, ĉeĥa, slovaka, hungara kaj bulgara asocioj, foje ankaŭ de la vjetnama kaj kuba.
2. „Festparolado de Béla Berceli dum la 25. Hungarlanda Esperanto Kongreso", *Eszperantó magazin* 14. 1974, n-ro 8, p. 9.
3. Ekde 1974 aperas en Bulgario ĉiujare ses numeroj de regula serio de *Paco*. Aperas krome, precipe en GDR, Ĉeĥoslovakio, Hungario kaj Japanio, eksterseriaj numeroj.

De tempo al tempo tamen aperas signoj, ke inter partiaj gvidlinioj kaj la pensoj de la esperantistoj estas malharmonio. Aparte notinda ekzemplo estis protesta deklaro, kiun Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato kaj la ĉeĥoslovaka sekcio de MEM aperigis post la invado de sovetaj kaj aliaj trupoj en sian landon. En tiu deklaro estis defendata la politika evoluo en Ĉeĥoslovakio post januaro 1968, kun mencio ankaŭ pri tio, ke la demokratiiga procezo ebligis al la ĉeĥoslovakaj esperantistoj post preskaŭ dudek jaroj agadon „sen eksteraj burokrataj intervenoj kaj limigoj".[1] Krome, la ĉeĥoslovakoj publikigis Esperantan tradukon de la reforma programo de KPĈ[2] kaj malgrandan broŝuron pri MEM, kies grandparte ortodoksa enhavo estis subtile kontraŭpezita per kuraĝaj pacifismaj karikaturoj de konataj ĉeĥoslovakaj satiristoj.[3] Estas ankaŭ menciinde, ke en 1981, nelonge antaŭ la starigo de armea reĝimo en Pollando, loka filio de „Solidareco" komencis per esperantlingva bulteno konatigi la celojn de tiu aŭtonoma sindikato.

Sed ne nur temas pri tiuj malkaŝaj ekzemploj de opozicio. Ili ĉiuokaze estas maloftaj. Pli notinde estas, ke, kiel plej bone ilustras admonoj de la asociaj gvidantoj al la membroj, interne de la movado bolas latenta rezistemo. En GDR, ekzemple, montriĝis, ke multaj rifuzis aliĝi al la Kulturligo, ĉar agadon en ties kadro ili ne konsideris plenumo de la espero pri memstara organizaĵo de la esperantistoj; ili ankaŭ plendis pri la manko de „demokrateco" en la Kulturligo. Menciante tiun sintenon de esperantistoj en GDR, la veterano Ludwig Schödl direktis al ili la minac-tonan admonon: „Kiuj nun restas ekster niaj vicoj pro malsimpatio al Kulturligo, do simple perfidas la progreseman, humanisman sintenon de niaj viktimoj..."[4] Eĉ pli da problemoj estis en Ĉeĥoslo-

1. Teksto de la deklaro (de marto 1969): *Germana Esperanto-Revuo* 22. 1969, p. 39. – En oktobro 1969 la ĉeĥoslovakaj esperantistoj estis devigitaj nuligi la deklaron: *Starto* 1969, n-ro 6 (nov./dec.), p. 3.
2. *Agadprogramo de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio akceptita en Plenkunsido de la CK de KPĈ la 5-an de aprilo 1968*, Praha 1968.
3. La broŝuro, *Kio estas MEM*, estas ekstra represo de aldono al la ĉeĥoslovaka eldono de *Paco* (n-ro 173, apr. 1968).
4. Ludwig Schödl, „Esperanto-movado, IFA – Kulturligo de GDR", *Der Esperantist* 9. 1973, n-ro 61/62, p. 12. – En la posta numero la „nemembriĝintaj esperantistoj" estas pli milde adresitaj: D.B., „Ĉu membri en KL aŭ ne?", *Der Esperantist* 10. 1974, n-ro 63/64, p. 15.

vakio, kie la nova ĈEA sukcesis organizi nur duonon de la preskaŭ 4 000 membroj, kiujn havis la antaŭa ĈSEK. La estraro pro tio riproĉis, ke la flankestarantoj „daŭrigas praktiki ian ‚kaŝludon' bojkotante"[1], ke ili „anakronisme" defendas „sian hobiulan, sektecan starpunkton" kaj el Esperanto faras „nur objekton de sia persona distro"[2] anstataŭ celkonscie meti la lingvon en la servon de la aktualaj, ĝenerale-politikaj kampanjoj.[3]

Kiel pruvas tiuj admonoj, la suspektemo de la aŭtoritatoj pri ideologie nefidindaj elementoj inter la esperantistoj ne malaperis. Precipe kiam intensiĝas la oficialaj kampanjoj por „ideologia batalo", celantaj ŝirmi la civitanojn kontraŭ la entrudiĝado de „kontraŭsocialismaj" ideoj, tio ne restas sen influo je la Esperanto-movado. En Bulgario, unu el la plej fortaj bastionoj de Esperanto en orienta Eŭropo, la Centra Komitato de BEA vidis sin alvokita averti sian membraron pri danĝeroj ligitaj kun la malstreĉiĝo, ĉar tiu principe salutinda procezo ankaŭ malfermas al okcidentaj ideologioj novajn, pli subtilajn influeblecojn. En raporto al la nacia kongreso en 1972 la CK memkritike konfesis nesufiĉon de sia ideologia laboro, de la edukado de la esperantistoj en la spirito de socialisma patriotismo kaj proleta internaciismo. Kelkaj frazoj el tiu raporto estas citindaj:

> Precipe sentemaj estas la manifestiĝoj de la ideologia diversio de la imperiismo sur la internacia areno. Laŭ sia karaktero la agado de la esperantistoj ofte esprimiĝas en diversaj internaciaj forumoj... Tial ni devas esti pretaj gvidi batalon kontraŭ la portantoj de kaŝa aŭ malkaŝa diversio, kontraŭ la misinformado rilate la socialismajn landojn kaj pli speciale – nian landon.
>
> Niaj internaciaj komitatoj altrudas al la bulgaraj esperantistoj doni helpon al la esperantistoj precipe el la kapitalismaj landoj pri ilia ĝusta orientiĝo kaj efektivigi ideologian reziston al la neĝustaj kaj malutilaj komprenoj kaj agoj.
>
> ...
>
> Ankoraŭ parto de la esperantistoj, kiuj veturas al internaciaj aranĝoj en eksterlando, ne estas sufiĉe aktivaj en sia komunikiĝo kun la eksterlandanoj kaj ne trovas pli elastajn formojn por senmaskigo de la mensogoj kaj kalumnioj pri nia lando. Ne estas plene kontentiga ankaŭ la laboro de CK de la Asocio rilate la instruktadon de la forirantoj al eksterlando, kiel ankaŭ ĉe la selektado de la personoj kaj grupoj, kiuj faras paŝojn por forveturo eksterlanden.[4]

1. „Kun klara perspektivo", *Starto* 1972, n-ro 3/4, p. 2.
2. „Ĉu ‚nur' politiko?", *Starto* 1974, n-ro 3/4 (41/42), p. 1.
3. F. Sviták, „Ne nur dum la jubilea jaro", *Starto* 1975, n-ro 2 (48), p. 3.
4. *La taskoj de la bulgara esperantista movado en la tutpopola batalo por*

Foje, la retoriko malagrable memorigas pri la lingvaĵo, kiu estis kutima en la tempo de la malvarma milito, ekzemple kiam „nacia nihilismo, abstrakta internaciismo, senpatruja kosmopolitismo" estas nomataj „ne malofta fenomeno en la esperantistaj vicoj, eĉ kun pretendo de progresemeco".[1] La organo de BEA raportis fine de 1974 pri strebadoj en distrikto „likvidi la memcelan lernadon de Esperanto, kontraŭstari tendencojn malamikajn al la socialismo, plifortigi la ateisman edukon de la esperantistoj".[2] Aperas alvokoj por „kanaligo, regula organizado kaj ide-politika alceligo de la internacia korespondado" de la bulgaraj esperantistoj, kiuj korespondu ne nur individue. sed ankaŭ kolektive, detenu sin de „malvasta praktikismo"[3] kaj faru pli, ol nur „esprimi siajn personajn pensojn kaj sentojn" en leteroj al eksterlando.[4]

Ĉio ĉi ŝajnas esti la prezo, kiun BEA devas pagi por la larĝa subteno ricevata de la sialandaj aŭtoritatoj. Nemirige, ke ĈEA rigardas, propradire, la bulgaran modelon kun envio[5], ĉar ĝi per siaj similaj alvokoj por membrara disciplino devas ankoraŭ pli serĉi ol repagi la favoron de la oficialaj instancoj. La Dua Kongreso de ĈEA, kiu devis okazi jam en aprilo 1972, estis dufoje prokrastita, ĉar la ideologia firmigo, postulata de la postdubĉeka reĝimo, nekontentige progresis inter la ĉeĥaj esperantistoj. Nova sekretario de ĈEA, nomita en 1973, poste parolis pri „komplika procezo" kaj „pri intence provokitaj krizaj momentoj, kalumnioj pri la ŝtatpotencaj organoj kun la tendenco maksimume misordigi la situacion, veki malfidon ĉe la asocia membraro kaj kompromiti la gvidajn funkciulojn".[6] La kongreso povis okazi nur en

---

konstruo de evoluinta socialisma socio. Raporto de CK de Bulgara Esperantista Asocio antaŭ la 38-a Nacia Esperantista Kongreso (urbo Smoljan, 3-an - 4-an de julio 1972), hektografita tajpaĵo, p. 10, 18.

1. Nikola Aleksiev, „Georgi Dimitrov pri la patriotismo kaj la internaciismo", *Bulgara Esperantisto* 41. 1972, n-ro 1, p. 1.
2. Maria Dičeva, „En Smoljan-distrikto oni vigle rekonstruas la ideedukan E-laboron", *Bulgara Esperantisto* 43. 1974, n-ro 10/11, p. 15.
3. „Rezolucio de la 38-a Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio...", *Bulgara Esperantisto* 41. 1972, n-ro 9, p. 4-5.
4. „Al obstina laboro!", *Bulgara Esperantisto* 43. 1974, n-ro 5, p. 2.
5. Sviták, „Ne nur dum la jubilea jaro", p. 4.
6. Z. Křimský, „Fundamento por nia agado", *Starto* 1976, n-ro 4/5 (55/56), p. 3.

1976, kiam la asocio akceptis ankaŭ agad-programon, kiu, promesante interalie, ke ĈEA „en la estonteco senkompromise kontraŭstaros kaj preventos danĝerajn inklinojn al esperantista ‚sektismo'"[1], sendube respondis la atendojn de la normaliga reĝimo en Ĉeĥoslovakio.

Entute, ne estas pretervideble, ke la ideaj aspektoj de Esperanto ofte kaŭzas kapdolorojn al la oficialaj reprezentantoj de la movado en orienta Eŭropo. Kosmopolitismo kaj pacifismo ludis de la tempo de Zamenhof signifan rolon inter la adeptoj de Esperanto. Ĉar tiu idealisma heredaĵo kolizias kun la pretendo de la partiaj ideologoj, ke nur ili donas la ĝustan interpreton de internaciismo kaj pacbatalo, la membroj ofte devas aŭdi de siaj gvidantoj instruojn pri la anakronisma karaktero de tio, kio ekde Zamenhof nomiĝas la „interna ideo" de Esperanto. Kvankam nuntempuloj certe konsentas, ke la pensado de Zamenhof havis iluziajn, utopiajn trajtojn, la menciita eduka kampanjo tamen montras la tendencon troigi la naivecon de Zamenhof kaj atribui al la esperantistoj pli da mistikemo, ol ili fakte havas. La orientgermano Detlev Blanke ekzemple, lerte emfazante la memkompreneblaĵon, ke lingvo estas instrumento kaj nenio pli, prezentas la tradician emon de la esperantistoj konsideri sian lingvon helpilo por pli paca mondo kiel naivan kredon, ke Esperanto per si mem interfratigas la homojn, por povi tiamaniere des pli draŝe ataki la falsan fidon pri mistera interna forto kaj panaceaj kvalitoj de Esperanto.[2]

Tiaspeca argumentado nur pene vualas, kio estas la vera kerno de la problemo: Kiel montras plendoj pri modernigo de la „interna ideo" en formo de „humaneca internaciismo", la zorgo koncernas ne tiom la sektecan adoron de la lingvo, sed estas direktita unuavice kontraŭ ĉiuj provoj interpreti la idealojn, kun kiuj Esperanto ligiĝas, en maniero diferenca de la reganta koncepto pri proleta internaciismo. Tiu koncepto ne permesas, ke la esperantistoj en la socialismaj landoj sentu primaran lojalecon al

1. *Programo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio por la jaroj 1976-1980*, hektografita tajpaĵo (de 8-2-1976), p. 5.
2. Detlev Blanke, „Pri la ‚interna ideo' de Esperanto", en: sama (red.), *Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado*, Budapest 1978, p. 182-208.

tuthomaraj idealoj, al internacia pensmaniero transcendanta la interesojn de socialismo – tute egale ĉu temas pri la „interna ideo", pri la pacifismo aŭ pri la „kontaktoj inter homoj" kaj „plibonigo de interŝanĝo de informoj" laŭ la Fina Akto de Helsinki.

Estas dubinde, ĉu la instruoj, grandparte destinitaj asekuri la movadon kontraŭ malfavoro de la aŭtoritatoj, multe efikas ĉe la esperantistoj en la orienteŭropaj landoj. La alvokon, ke ili aktive batalu por la paco kaj tiel pruvu sian nesektecon, ili povas respondi per la malfacile kontestebla argumento, ke estante esperantistoj ili certe ne apartenas al la militinstigantoj kaj tial ne bezonas admonojn aparte demonstri sian porpacan sintenon. Krom tio, al pli forta premo estas metita limo per tio, ke la gvidantoj, celantaj disvastigi Esperanton, dependas de la idealismo de siaj membroj kaj verŝajne mem pli-malpli konscie troviĝas sub ĝia influo.[1]

La menciita ĉeĥa agad-programo akcentas ankaŭ, ke en sia kunlaboro kun eksterlando ĈEA donas prioritaton al la rilatoj kun MEM kaj la asocioj en la frataj landoj; nur en posta loko estas krome menciita la kunlaboro kun UEA, al kiu ĈEA estas aliĝinta. Kvankam dum la lastaj jaroj plifortiĝis la oficialaj rilatoj kun UEA, multaj esperantistoj en orienta Eŭropo restas malhelpitaj tiri plenan profiton el la universaleco de la Esperanto-movado.[2] La organo de UEA kaj aliaj eldonaĵoj dum multaj jaroj estis regule konfiskataj de la poŝtaj aŭtoritatoj de GDR. En Ĉeĥoslovakio, numeroj de *esperanto* mistere ne alvenis[3], kaj kiam ĉeĥaj abonintoj plendis ĉe la cenzura poŝtoficejo Praha 120, demandante ĉu tiu nepolitika gazeto troviĝas sur la listo de malpermesitaj presaĵoj, ili eĉ ne ricevis respondon. En Bulgario kutime ne alvenas *Plena Ilustrita Vortaro*, kaj Rumanion ne atingas *Esperanto en perspektivo*.

1. Eble kun la escepto nur de kelkaj oportunistoj-karieristoj. Interesan provon esplori la demandon, ĉu partianeco kaj esperantisteco estas akordigeblaj, faris la iama IPE-aktivulo Georges Salan; vd. lian broŝuron *UEA kaj la neŭtraleco* (Nîmes 1978).
2. Kredeble al tio aludis la estraro de UEA, kiam ĝi konstatis en sia jarraporto pri 1976/77: „... en pluraj ŝtatoj regas cirkonstancoj, en kiuj kontaktoj kun eksterlando estas io malfavorata de la registaro." (*esperanto* 70. 1977, p. 113.)
3. Kp. *Starto* 1973, n-ro 7 (37), p. 5.

Kompreneble, tie ĉi temas pri malhelpoj, kiuj trafas la plimulton de la civitanoj egale, ne nur la esperantistojn. Krom konfiskado kaj cenzuro necesas mencii ankaŭ la devizajn barojn, kiuj bremsas la abonadon al eksterlandaj gazetoj, la mendadon de libroj, la pagadon de membrokotizoj al internaciaj organizaĵoj kaj, plej senteble, la amasan turismon. Pro tio ne ĉiam eblas klare distingi inter ĝeneralaj limigoj de la civitana libereco kaj specifa diskriminaciado de la esperantistoj. La fakton ekzemple, ke la okazigo de komuna kongreso de katolikaj kaj protestantaj esperantistoj dufoje estis malpermesita[1], oni povas atribui unuavice al la suspektemo de la aŭtoritatoj kontraŭ la eklezio. Al la sama kategorio apartenas ankaŭ la jena okazaĵo en Ĉeĥoslovakio: Post „Libertempa Esperanto-Tendaro" en Herbortice en julio 1977, dum kiu okazis subĉielaj mesoj kaj religiaj diskutoj, la respondeculoj, la inĝeniero Miloslav Šváček kaj la pastro Vojtěch Srna, estis akuzitaj pro kontraŭleĝa religia aktivado; la proceso kontraŭ ili finiĝis per kondamnoj (kun prokrasto de plenumo) al dekkvin-monata resp. unujara malliberecо.[2] Jam antaŭ la verdikto ĈEA eksigis Šváček el siaj vicoj, ĉar la permeson aranĝi la tendaron li misuzis por aliaj celoj, ol la instruado de Esperanto[3], kaj alia sekvo de la afero estis, ke fine de 1978 ĈEA decidis malfondi la IKUE- kaj KELI-fakojn ĉe sia MEM-sekcio, kun la interesa klarigo, ke tiuj du internaciaj organizaĵoj de katolikaj kaj protestantaj esperantistoj „ne povas plenumi la neŭtralecon de UEA".[4]

Sed ankoraŭ pli pezas aliaj malhelpoj, kiuj pli specife tuŝas la movkapablon de granda nombro de esperantistoj. Ekzemplojn pri tio denove liveras precipe Ĉeĥoslovakio. Kiam en 1974 okazis elektoj de novaj komitatanoj de UEA, la gvidantoj de la ĉeĥoslovaka movado dissendis al la delegitoj de UEA en sia lando strikte

1. Temis pri planoj kongresi en Brno (ČSSR) en 1970 kaj en Pécs (Hungario) en 1973: *Heroldo de Esperanto* 49. 1973, n-ro 10 (1545), p. 2.
2. Akuza akto: *Espero Katolika* 76. 1979, p. 62-66. Teksto de la verdikto: *Eĥo* 51. 1979, p. 65. – Pri la kazo okupiĝis Amnestio Internacia; vd. krome *Horizonto* 2. 1977, p. 117; 3. 1978, p. 142-143; 4. 1979, p. 117.
3. *Starto* 1978, n-ro 3 (67), p. 17. – Srna restis membro de ĈEA: *Starto* 1980, n-ro 1 (77), p. 15.
4. *Espero Katolika* 76. 1979, p. 30.

konfidencan cirkuleron, kiu indikis la nomojn de tiuj kandidatoj, por kiuj ili voĉdonu – kun la insista atentigo, ke „ne temas pri via privata opinio ĉe voĉdonado", kaj la fina formulo: „Ni kredas, ke vi discipline obeos."[1] Simila premo estis aplikita kontraŭ individuaj membroj de UEA en Ĉeĥoslovakio. Montrante al valutaj limigoj, ĈEA faris en 1979/80 paŝojn por rearanĝi la sistemon tiel, ke ĝi mem decidu, kiu rajtas esti individua membro kaj delegito de UEA.[2] Por la ĉeĥoslovakaj esperantistoj tiu malhelpo de ilia rekta ligiteco kun UEA eĉ ne estis tute surpriza, ĉar jam pli frue ili spertis, ke, kio en la plej multaj partoj de la cetera mondo estas kompreneblaĵo, en ilia lando elvokas suspekton: Esperantisto, kiu en 1973 havis gastojn el okcidento, poste eksciis de sia labordonanto, ke tiu estis informita de la sekreta polico pri liaj Esperantaj kontaktoj kun eksterlando; ankaŭ aliaj esperantistoj spertis, ke la polico detale demandesploris ilin kaj informis ilian laborejon pri iliaj internaciaj rilatoj.

Eĉ se oni estas preta kontraŭmeti al tiuj obstakloj, kiuj cetere apenaŭ ekzistas en Hungario kaj Pollando, la ĝeneralan prosperon de la movado en orienta Eŭropo kaj rekoni, ke ne estas malhelpoj kontraŭ lernado de la lingvo aŭ la varbado por ĝi, restas tamen la fakto, ke ne tute malaperis politik-ideologiaj faktoroj, kiuj negative efikas je la pozicio de Esperanto. Okazaj aludoj, ekzemple ke „ĉe kelkaj maljunaj marksistaj funkciuloj" ankoraŭ restas skeptiko kontraŭ Esperanto[3], atestas pri la influo de la stalinisma heredaĵo, sed eble eĉ pli karakterize estas, ke pri la historio de persekutoj kutime regas silento, kaj ke, se okcidentanoj rompas tiun silenton, oni reagas je tio kun ekstrema sentemo.

Post kiam la revuo de UEA en 1968 publikigis artikolon pri „Persekutoj kontraŭ la Internacia Lingvo"[4], la SEU-veterano Podkaminer lanĉis en la unua soveta numero de *Paco* furiozan

1. Ĉeĥlingva cirkulero de aprilo 1974, subskribita de la prezidantoj de ĈEA kaj AESSR kaj de la ĉefdelegito de UEA; vd. ankaŭ Lapenna, *Hamburgo*, p. 60.
2. Pri pli frua postulo, ke ĉiu delegito registriĝu ĉe la aŭtoritatoj: *Horizonto* 4. 1979, p. 20-21; 5. 1980, p. 34.
3. Detlev Blanke, „Informado kaj argumentado", *Der Esperantist* 16. 1980, p. 105.
4. *esperanto* 61. 1968, p. 14-15, 34-35, 84-85, 101.

atakon, parolante pri „kruda kaj aĉa falsverko el iel altiritaj faktoj, onidiroj, senhontaj elpensaĵoj kaj malkaŝaj kalumnioj".[1] Kaj kiam en 1973 iĝis konate, ke en la preparata verko *Esperanto en perspektivo* aperos detala ĉapitro pri la historio de persekutoj, la Esperanto-asocioj de la socialismaj landoj sendis al UEA leteron, en kiu ili protestis „kontraŭ la memcela aperigo" de tiu ĉapitro, ĉar la aŭtoritatoj kaj la esperantistoj en tiuj landoj konsideros tion „kiel antisocialisman manovron", kiu „povos nur malutili al nia estonta agado".[2]

Tiu protesto, kiu cetere ne havis rezulton, estas signo de tabuemo persiste konservata. El la socialismaj landoj nur Ĉinio malkaŝe klarigas, kiel kaj kial Esperanto estis en malfavoro: La haltigo de la aktivado de Ĉina Esperanto-Ligo en la komenco de la 50aj jaroj estas atribuata al la tiutempa neceso sekvi la modelon de Soveta Unio, dum pri la periodo de la Kultura Revolucio estas dirite, ke „la ultramaldekstra pensfluo" preskaŭ tute subpremis la Esperanto-movadon kaj permesis la uzon de la lingvo nur por propagando eksterlanden.[3] En la orienta Eŭropo, kontraŭe, la maksimumo estas preterpasaj mencioj pri „stagnado" de Esperanto dum la „periodo de personkulto"[4] aŭ pri „malfeliĉaj eraroj de Stalin".[5]

1. S. Podkaminer, „Kaj ankoraŭfoje pri ‚neŭtralismo'", *Paco* 15. 1968, n-ro 178/179, soveta eldono, p. 39. – Podkaminer eĉ nomis la artikolon „rekta defendo de la aŭtentika imperiismo kaj agreso".
2. Ulrich Lins, „Ni sentabuigu la historion de la Movado", *esperanto* 68. 1975, p. 186.
3. Hou Zhiping, „La Esperanto-movado en Ĉinio", *El Popola Ĉinio* 1982, n-ro 4, p. 19-20. – Varba agado por Esperanto kaj personaj kontaktoj kun eksterlando iĝis danĝeraj en Ĉinio ekde 1966. Pluraj esperantistoj estis enkarcerigitaj. La poeto Armand Su, ekzemple, kiu ofte aperigis tekstojn en eksterlandaj Esperanto-revuoj, estis en 1968 arestita kaj poste kondamnita al 20 jaroj de malliberecо; li estis liberigita nur en 1979. Vd. liajn memorojn: „23 jaroj per kaj por Esperanto", *El Popola Ĉinio* 1979, n-ro 10, p. 27-29; n-ro 11, p. 40-43. Kp. ankaŭ: Ikso, „Post la ‚kvarpersona bando'", *esperanto* 72. 1979, p. 23-24.
4. Represante artikolon pri la fondo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj el la revuo de UEA, *Esperantisto Slovaka* (1979, p. 33) ellasis frazon pri la „stalina pogromo" kontraŭ SEU (kaj tiel igis nekomprenebla la postan frazon). – En 1976 la brita IPE-veterano Bill Keable postulis rompi la silenton: „Marksismo-leninismo bezonas *ĉiujn* faktojn", *La Verda Kolombo* 1976, n-ro 45, p. 9-13; n-ro 46, p. 11-14.
5. Ervin Fenyvesi, „Revuo de revuoj", *Hungara Vivo* 23. 1983, n-ro 1, p. 23.

Kun la historia tabuemo kongruas la latenta necerteco kaj maltrankvilo pri la politik-ideologiaj implicoj de la laboro por Esperanto. Kelkajn ekzemplojn pri tio ni jam donis: Admonoj kontraŭ sektismo kaj por „socia engaĝo" evidente celas konvinki la aŭtoritatojn pri la civitana lojaleco de la esperantistoj, kaj provoj preskribi la enhavon de korespondado fontas el la konscio, ke la partio ĵaluze gardas, ke ĝia informa monopolo ne estu minacata. Entute, estas rimarkinde, ke la argumentadon por Esperanto ofte akompanas defensiva tono.[1] Komence de oktobro 1972, la tiutempa prezidanto de MEM, la bulgaro Nikola Aleksiev, vidis la bezonon publike distancigi sin de „nekorektaj konceptoj kaj ‚teorioj'" disvastiĝintaj en la Esperanto-movado. En Moskvo li uzis konferencon de reprezentantoj de societoj por amikeco kun Soveta Unio kiel forumon por kritiki difinitajn aspektojn de la kampanjo kontraŭ „lingva imperiismo". Kio lin afliktis, estis la fakto, ke la uzantoj de tiu populara slogano, estiĝinta en la okcidenta Esperanto-movado, ne diferencigas inter la superrego de la lingvoj de la grandaj imperiismaj ŝtatoj, unuflanke, kaj la pozicio de la rusa en Soveta Unio, aliflanke – ke ili ne komprenas, „ke la rusa lingvo estas egalrajta kun ĉiuj lingvoj de la nacioj de l' socialisma komuneco" kaj ke la popoloj de Soveta Unio libervole elektis ĝin „rimedo por internacia interkompreniĝo sen kiu ajn malprofito por naciaj lingvoj kaj kulturoj de ĉiuj ceteraj nacioj".[2] La elpaŝo de Aleksiev ne estis unika. Simile, en 1975 la ĝenerala sekretario de MEM, William Gilbert, deklaris, ke ne estas akcepteble fari izolitan kampanjon kontraŭ „lingva imperiismo" kaj neglekti la batalon kontraŭ la „sociaj, ekonomiaj, militaj misagoj" de imperiismo, kompare kun kiuj „la lingva problemo estas tute akcesora".[3]

1. En 1977 MEM enkondukis novan insignon, sur kiu ne plu troviĝas la slogano „Per Esperanto por mondpaco", ĉar „por kamaradoj iom misfidaj pri la esperantista aktiveco, ĝi povas soni kiel pretendo defendi la pacon NUR aŭ ESENCE *per Esperanto*, kio estus evidente utopia": *La Pacaktivulo* 1977, n-ro 107, p. 10.
2. N. Aleksiev, „Pri unu aspekto de la interŝtataj rilatoj en la socialisma komuneco de nacioj", *Paco* 1974, soveta eldono, p. 24-25.
3. William Gilbert, „Esperanto kontraŭ naciaj lingvoj?", *Paco* 1979, GDR-eldono, p. 27. – Pli frue, Gilbert havis iom alian opinion, ne vidante diferencon inter la superrego de la angla kaj franca lingvoj en okcidenta Eŭropo kaj tiu de la rusa en Soveta Unio: *La Pacdefendanto* 1952, n-ro 11, p. 2.

Pri tiuj eldiroj de du gravaj komunistaj esperantistoj estas, ĝenerale dirite, rimarkinde, ke ambaŭ tuŝas en ligo kun Esperanto lingvopolitikajn problemojn de pli vasta signifo kaj ke ilia rigardo estas direktita al Soveta Unio.

4.5.6. *Soveta Unio: inter esperoj kaj duboj*

La reviviĝo de Esperanto en Soveta Unio malfermis eblecojn de agado, kiujn la esperantistoj entuziasme uzis, kvankam ne plenumiĝis iliaj esperoj pri tuja starigo de asocio. Komence de aŭgusto 1957, kadre de la Sesa Tutmonda Junulara Festivalo en Moskvo, okazis renkontiĝo de 250 esperantistoj el 26 landoj – kiu estis entute la unua internacia Esperanto-aranĝo organizita en la soveta ĉefurbo.[1] Tuj antaŭ ĝi aperis la unua esperantaĵo post dudek jaroj: modesta lernolibreto[2] en eldonkvanto de 95 000 ekzempleroj, kiu – same kiel estona lernolibro – tuj disvendiĝis. Fine de 1959 estis fondita Moskva Internacia Esperanto-Klubo en la Centra Domo de Medicinistoj[3], kaj simile en aliaj lokoj la esperantistoj organiziĝis en la kadro de sindikataj kluboj kaj kulturdomoj.[4] Someraj tendaroj, kiuj ekde 1959 okazis ĉiujare en la baltaj respublikoj, poste ankaŭ en aliaj partoj de Soveta Unio, helpis firmigi la kontakton inter la dise laborantaj aktivuloj.

La alia flanko de la medalo estis, ke en 1959, cent jarojn post la naskiĝo de Zamenhof, neniu soveta esperantisto povis partopreni la Universalan Kongreson en Varsovio. De la revuo *Armena Esperantisto* aperis, en 1958, nur unusola numero, kaj

1. Vd. la raportojn de partoprenintoj: *Esperanto* 50. 1957, p. 172; 51. 1958, p. 12-13; *Germana Esperanto-Revuo* 10. 1957, p. 125. – Dum la okcidentgermanaj esperantistoj-festivalanoj spertis suspekton flanke de sialandaj aŭtoritatoj pro sia vojaĝo al Moskvo, en Moskvo necesis venki provojn de burokratoj malhelpi renkontiĝon inter eksterlandanoj kaj moskvaj esperantistoj-nefestivalanoj.
2. N.D. Andreev, *Mežđunarodnyj vspomogatel'nyj jazyk esperanto. Kratkaja grammatika i slovar'-minimum*, Leningrad 1957.
3. A. Ĥarkovskij, „La Moskva Internacia...", *Bulgara Esperantisto* 44. 1975, n-ro 3/4, p. 23-24.
4. En aŭgusto 1959 estis decidite, ke Esperanto-rondetoj povas ricevi monhelpon el la buĝeto de la lokaj filioj de Sindikatoj kaj Komsomolo: S. Sariĉev, „La movado en USSR progresas", *Nuntempa Bulgario* 4. 1960, n-ro 1, p. 42.

kiam foje aperis lernolibro de Esperanto, ĝi havis ridinde malaltan eldonkvanton kaj neniel povis kontentigi la interesiĝon.[1]

En 1963, fine, post pli ol kvaronjarcento, oficiala delegitaro de sovetaj esperantistoj povis denove vojaĝi eksterlanden; ĝi partoprenis en la 48a Universala Kongreso en Sofio, post kiam la Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio estis avertinta la sovetan Partion pri la malbona impreso, kiun farus nereprezentiĝo de Soveta Unio en tiu granda internacia manifestacio.[2] Samjare estis nuligita ankaŭ la malpermeso de eldonaĵoj en Esperanto[3], sekve de kio povis ekaperi serio da broŝuroj – teknike tre modestaj propagandaj kajeroj sub la titolo *Por la paco*, sed ankaŭ tradukoj el la rusa literaturo. Pli impona atingo estis 536paĝa Rusa-Esperanta Vortaro kompilita de Bokarev, kiun en 1966 publikigis la eldonejo „Soveta Enciklopedio" en eldonkvanto de 50 000 ekzempleroj.[4]

En 1962 estis fondita „Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj" apartenanta al „Unio de Sovetaj Societoj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj". Ĝian prezidon transprenis Bokarev. Sed la Komisiono ne estis landa asocio de sovetaj esperantistoj; ĝi ne havis la kompetenton aŭ rajton disvastigi Esperanton en Soveta Unio, nek kunordigi la agadon de la lokaj esperantistaj kluboj. Tiun vakuon iom post iom klopodis plenigi la junaj agantoj, jam kreintaj la tradicion de regule okazantaj tendaroj. Ili iniciatis en 1965 Sovetan Esperantistan Junularan Movadon (SEJM), kiu en 1969 akiris la strukturon de tutlanda organizaĵo kaj dum la posta jardeko elkreskis al forta tutsoveta asociiĝo de Esperanto-grupoj, zorgante pri tio, kion la Komisiono ne faris: varbado, instruado kaj organizado de renkontiĝoj. SEJM regule eldonis ankaŭ periodaĵojn, pri kio ekster Soveta Unio oni longe ne sciis.[5]

1. La lernolibro de I.V. Sergeev, *Osnovy esperanto* (Moskva 1961), aperis en 50 000 ekzempleroj, aliaj en eĉ pli malalta kvanto.
2. De tiam sovetaj esperantistoj venis, eĉ se malmultnombre, ankaŭ al Universalaj Kongresoj en okcidento. La kongreson de Varna (1978) partoprenis pli ol 100.
3. *Hungara Esperantisto* 4. 1964, n-ro 11, p. 6.
4. En 1974 sekvis, en kvanto de 40 000 ekzempleroj, Esperanta-Rusa Vortaro, ankaŭ de Bokarev, kiu finis la laboron por ĝi ĵus antaŭ sia morto en 1971.
5. S.M., „Asocio por tergloba sesono", *esperanto* 72. 1979, p. 81-82. – Pri-

Paralele al tiu ĉi junulara aktivado daŭris la scienca okupiĝo pri Esperanto, precipe en la Instituto de Lingvoscienco ĉe la Akademio de Sciencoj, kie Bokarev meze de la 50aj jaroj estis farinta sian kuraĝan novkomencon.[1] Al kiu celo estis dediĉitaj tiuj sciencaj aktivadoj, klarigis en 1968 artikolo en *Literaturnaja gazeta*, kiu, donante faktojn pri la grandega multiĝo de scienc-teknikaj informoj en ĉiam pli da lingvoj, venis al la konkludo, ke necesas interkonsenti pri internacia lingvo de la scienco kaj ke tian rolon povos transpreni ne iu nacia lingvo, sed nur planlingvo.[2] Tiu ĉi provo substreki la aktualecon de bezono, pri kiu delonge atentigis la esperantistoj, ne estis hazarda aŭ efemera, ĉar en oktobro 1973 – Bokarev estis intertempe mortinta – la Akademio de Sciencoj oficiale decidis „esplori la problemon de helpa lingvo por la internacia komunikiĝo kaj ĝiajn aplikeblojn sub la nuntempaj kondiĉoj". Plenumante tiun decidon, oni fondis en majo 1974 „Probleman Grupon pri la demando de internacia helpa lingvo" ĉe la Instituto de Lingvoscienco; inter la listigitaj esplortemoj troviĝis ankaŭ „strukturo kaj funkcio de Esperanto kiel internacia helpa lingvo".[3] La gvido de la grupo estis konfidita al la socilingvisto Magomet Isaev, kiu estis samtempe la posteulo de Bokarev kiel prezidanto de la Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj.

Pri la celoj de la Problema Grupo Isaev klarigis, ke surbaze de ĝiaj esploraj laboroj oni volas prepari dokumentojn submetotajn al „la superaj politikaj organoj".[4] Tio ĉi permesas la konkludon,

---

skribon de n-ro 13 de literatura almanako, aperinta en nur kelkaj ekzempleroj, donas *Bulgara Esperantisto* 47. 1978, n-ro 11, p. 12-13.

1. Vd. la superrigardon de A.D. Duličenko, „Obzor vaĵnejših interlingvistiĉeskih izučenij v SSSR" (Revuo de la plej gravaj interlingvistikaj esploroj en Soveta Unio), en: *Interlinguistica Tartuensis* 3. 1984, p. 3-39. – Utila bibliografio estas: A.D. Duličenko, *Sovetskaja interlingvistika. Annotirovannaja bibliografija za 1946-1982 gg.*, Tartu 1983.
2. A. Berg, D. Armand, E. Bokarev, „64 jazyka ... i eŝče odin" (64 lingvoj ... kaj ankoraŭ unu), *Literaturnaja gazeta*, 28-8-1968; Esperanta traduko en *Internacia Ĵurnalisto* 13. 1969, n-ro 3 (jul./sept.), p. 1-2; n-ro 4 (okt./dec.), p. 1-2; germana traduko en *Der Esperantist* 10. 1974, n-ro 3/4 (65/66), p. 24-27.
3. Teksto de la decido (de 18-10-1973) en: Detlev Blanke (red.), *Esperanto. Lingvo, movado, instruado*, Berlin 1977, p. 128-129.
4. M.I. Isaev, „Pri bazaj metodologiaj problemoj de interlingvistiko", *Der Esperantist* 11. 1975, n-ro 3 (71), p. 15.

ke estas la intenco de la esperantistoj konstrui per zorgaj teoriaj esploroj solidan, science bazitan argumentaron, kiu helpu forigi la postrestaĵojn de politik-ideologie motivitaj kontraŭstaroj kaj venigi oficialan subtenon al la organizita agado por Esperanto. Sed por kompreni la signifon de tiu klopodado kaj taksi la ŝancojn de sukceso ni devas unue konsideri la fonon, sur kiu la sovetaj esperantistoj provis rekomenci sian agadon post la teruraj persekutoj. Tiurilate nin plej multe interesas la evoluo de la nacia kaj lingva problemo en Soveta Unio.

Kiam Ĥruŝĉev en sia fama parolado de 1956 diskonigis la krimojn de Stalin, li nomis inter tiuj ankaŭ la krudan malobservon de leninaj principoj en la nacieca politiko, kiu estis kondukinta, ekzemple, al la amasa deportado de minoritatoj. Tiu malkaŝo de maljustaĵoj kaj la fakto, ke la Partio unuafoje publikigis notojn de Lenin, en kiuj li kritikis la aneksemon de Stalin kaj avertis kontraŭ la subpremo de la nerusaj naciecoj[1], ŝajnis signali pli tolereman politikon rilate la naciajn kulturojn en Soveta Unio – kaj sendube ankaŭ la esperantistoj ĝoje registris la rememorigon pri la postulo de Lenin, ke neniu lingvo havu ian privilegion.

Tamen, eble ĝuste pro troe kreskintaj atendoj de la nerusaj popoloj kaj pro la timo de la regantoj en Moskvo, ke post la eventoj en Pollando kaj Hungario en 1956 denove leviĝos nacikomunismaj celadoj, la rado post nelonge turniĝis refoje en la direkto de centralizo. En aŭgusto 1958 la teoria organo de la Partio aperigis ampleksan artikolon de la historiisto B.G. Gafurov, kiu memorigis pri la komunisma fincelo de „interproksimiĝo" kaj „kunfandiĝo" de la nacioj, implicite komprenigante ke ilia „florado" estas nur portempa fenomeno.[2] Tri jarojn poste, dum la 22a Kongreso de KPSU en 1961, la nova partia programo esence adoptis tiun pozicion: Ĝi proklamis la baldaŭan transiron al komunismo kaj lige kun tio direktis al la popoloj de Soveta Unio la postulon, ke ili per ĉiam pli da interproksimiĝo preparu sin por

1. „Pri la demando de la naciecoj aŭ ‚aŭtonomigo'" (1922), *Werke* XXXVI 590-596.
2. B. Gafurov, „Uspeĥi nacional'noj politiki KPSS i nekotorye voprosy internacional'nogo vospitanija" (Sukcesoj de la nacia politiko de KPSU kaj kelkaj problemoj de la internacia eduko), *Kommunist* 1958, n-ro 11 (aŭg.), p. 10-24.

la venonta plena unueco. La programo konstatis, ke jam „evoluas internacia kulturo komuna al la sovetaj nacioj", kaj aparte atentigis pri la kreskanta signifo de la rusa lingvo (Ĥruŝĉev nomis ĝin „dua gepatra lingvo"), kiu ebligas al la nerusaj popoloj ankaŭ la aliron al la monda kulturo.[1]

La programo signifis malkuraĝigon por la strebado de la nerusaj popoloj refirmigi kaj pluevoluigi sian kulturan identecon, ĉar tion la Partio konsideris disiga celado, kontrastanta kun la solidara lukto de ĉiuj sovetaj civitanoj por la atingo de ilia unueco en komunismo. Kaj nefavorajn implicojn la nova politika direkto havis ankaŭ por la esperantistoj. En sia vojmontra artikolo de 1958, Gafurov estis deklarinta, ke lige kun la transiro de socialismo al komunismo „nin ne povas ne interesi" ankaŭ la formiĝo de unueca lingvo. Li ne kaŝis, kia li ĝin imagis. Nome, li refreŝigis la tezon, ke survoje al sia fina kunfandiĝo la naciaj lingvoj unue kuniĝos en zonajn lingvojn. Ni jam scias, ke tiu koncepto, proklamita de Stalin kaj praviganta la formiĝon de la rusa „zonlingvo", servis kiel teoria bazo por la subpremo de la Esperantomovado, kaj estas sekve nemirige, ke Gafurov klare sin esprimis kontraŭ Esperanto.[2] La sovetaj esperantistoj, kies gvidanto Bokarev en 1956 estis liginta la zonlingvan tezon kun lingva imperiismo, evidente suferis malprogreson.

La partia programo mem ne tuŝis la demandon de tuthomara lingvo. Sed tion faris aŭtoritataj teoriistoj pri la nacia problemo, kiuj cetere tute senĝene propagandis la rusan kiel tutsovetan lingvon. Unu el ili, K.Ĥ. Ĥanazarov, same repopularigis la stalinan tezon pri la konkurado inter zonlingvoj, el kiuj unu venkos kaj transformiĝos en la unuecan mondlingvon, kaj ankaŭ li aldonis malaprobajn vortojn pri Esperanto.[3] Similan pozicion reprezentis la filozofo M.D. Kammari, al kiu ni krome dankas aparte detalan klarigon pri tio, kial Esperanto devas esti kontraŭbatalata. Kammari fiere nomis sin „arda kontraŭulo de Esperanto" kaj indikis la jenajn du kialojn por sia starpunkto:

1. Leonard Schapiro (red.), *The U.S.S.R. and the future. An analysis of the new program of the CPSU*, New York, London 1963, p. 82, 302.
2. Gafurov, p. 17; vd. ankaŭ *Paco* 6. 1959, n-ro 63 (feb.), islanda eld., p. 4.
3. K.Ĥ. Ĥanazarov, *Sblijenie nacii i nacionl'nye jazyki v SSSR* (La interproksimiĝo de la nacioj kaj naciaj lingvoj en USSR), Taŝkent 1963, p. 224-225.

... unue tial, ke la esperantistoj altrudas sian lingvon kiel estontan lingvon de la senklasa socio, dum la lingvo, kreita de unusola persono, ne marksisto, antaŭ 75 jaroj, ne povas kontentigi nin hodiaŭ. Samtempe disvolviĝas batalo inter la angla kaj rusa lingvoj pri la rolo de la estonta reganta lingvo de komunismo. Tial Esperanto povas en plej bona okazo troviĝi en la malantaŭa loko de tiu batalo. ...
Due, el ricevitaj leteroj absolute evidentiĝas, ke kelkaj pasiaj esperantistoj celas anstataŭigi la rusan lingvon en Soveta Unio per Esperanto kaj devigi la sovetajn respublikojn interrilati per Esperanto. ... Tio estas por ni fremda, de ni frakasita ideologio de burĝa naciismo, kiu nuntempe ree levas la kapon sub la standardo de Esperanto. Sekve, Esperanto, nutranta sin per sukoj de burĝa naciismo, estas por ni danĝera venena kreaĵo.[1]

Tio ĉi estas rara ekzemplo, ke soveta teoriisto traktis Esperanton en ligo kun la lingva situacio interne de Soveta Unio. Ĝi montras, ke Esperanto – prave aŭ malprave – estis timata kiel batalilo en la manoj de homoj, kiuj rifuzis submetiĝi al la oficiala varbado por la rusa kiel la komuna lingvo de ĉiuj sovetaj civitanoj.

La ŝanĝo de la partia politiko fakte ne restis sen kontraŭstaro. Inter la nerusaj popoloj, precipe la ukrainoj[2], disvastiĝis multe da malkontento, baziĝanta sur la suspekto, ke la Partio, sub la masko de internaciismo, celas al rapidigita asimilado. Kaj tiu kontraŭstaro ne malhavis efikon: Post la falo de Ĥruŝĉev en oktobro 1964 baldaŭ estis observebla malfortiĝo de la propagando por kunfandiĝo de la sovetaj popoloj, kaj denove povis leviĝi pledoj defende al la konservo de pluralismo de nacioj kaj lingvoj. En Kartvelio, ekzemple, la verkisto I.V. Abaŝidze memorigis en 1966, ke estis la „renegato" Kautsky, kiu iam prognozis la kunfandiĝon de popoloj kaj lingvoj en unu nacion kun unu lingvo, kaj konteste atentigis, ke la preskaŭ 50jara soveta sperto pri kultura disvolviĝo tute ne konfirmas tiun prognozon.[3] Kuraĝigon al la aspiroj de nerusoj donis la demografia evoluo, ĉar popolnombrado en 1970 montris, ke, dum malkreskis la proporcio de rusoj

1. Protokolo de 14-5-1964; vd. sube, p. 510, n. 1. – Pri la pozicio de Kammari vd. ankaŭ liajn artikolojn „Stroitel'stvo kommunizma i razvitie nacional'nyh jazykov (La konstruado de komunismo kaj la evoluo de la naciaj lingvoj), *Političeskoe samoobrazovanie* 1960, n-ro 4, p. 66-76; „K voprosu o budušĉem vsemirnom jazyke" (Pri la demando de estonta tutmonda lingvo), *Kommunist Estonii* 1964, julio, p. 66-71.
2. Vd. Ivan Dzyuba, *Internationalism or Russification? A study in the Soviet nationalities problem*, London 1968.
3. V. Stanley Vardys, „Altes und Neues in der sowjetischen Nationalitätenpolitik seit Chruschtschows Sturz", *Osteuropa* 18. 1968, p. 83.

inter ĉiuj sovetaj popoloj (de 54,8% al 50,5%), la sudaj kaj orientaj popoloj spertis konsiderindan nasko-„eksplodon" kaj ke nur iom pli ol la duono de la nerusa loĝantaro indikis bonan scion de la rusa lingvo.[1]

Sub la impreso de tiuj faktoj, kiuj ŝancelis la vizion de kunfandiĝo, kaj de pli spitema sinteno de nerusoj la Partio meze de la 60aj jaroj rezignis la trudan varbadon por la rusa kiel dua gepatra lingvo kaj anstataŭe deklaris, ke en la „dialektika" procezo de samtempaj interproksimiĝo kaj florado de la nacioj la rusa alprenis la rolon de „ilo en la internaciaj rilatoj".[2] Plue estis akcentata la internaciisma unueco de la sovetaj popoloj, por kiu en 1971 oni trovis la formulon „nova historia komunaĵo de homoj – la soveta popolo", kaj el la ideologio ne malaperis la fina celo de kunfandiĝo de la nacioj. Kontraste kun la epoko de Ĥruŝĉev, tamen, la atingo de tiu kunfandiĝo estis ŝovita al malproksima estonteco. En la 70aj jaroj la Partio observis mezan linion en sia nacia politiko: jen subteni la procezon de interproksimiĝo de la sovetaj popoloj, jen ne superflue maltrankviligi la nerusojn per la propagando de baldaŭa kunfandiĝo. Breĵnev mem diris en 1972, ke la interproksimiĝon, kiel objektivan procezon, ne necesas arte rapidigi, dum estas same neakcepteble malhelpi al tiu procezo aŭ arte firmigi naciecan izoliĝon[3]. Estas interese, ke kiam en 1977, post longaj diskutoj, estis akceptita nova konstitucio de USSR, ĝia teksto ne entenis ian mencion de kunfandiĝo de nacioj.

1. Hélène Carrère d'Encausse, *Risse im roten Imperium. Das Nationalitätenproblem in der Sowjetunion*, Wien k.a. 1979, p. 63-75, 179-185; Gerhard Simon, „Die nichtrussischen Völker in Gesellschaft und Innenpolitik der UdSSR", *Osteuropa* 29. 1979, p. 460.
2. *50-a datreveno de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio. Tezoj de Centra Komitato de KPSU*, Moskvo 1967, p. 45.
3. L.I. Breĵnev, *Pri kvindekjara datreveno de Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj*, Moskvo 1973, p. 19. La ĉi-supra prezento baziĝas, krom sur la jam cititaj verkoj, ĉefe sur: Kenneth C. Farmer, *Ukrainian nationalism in the post-Stalin era. Myth, symbols and ideology in Soviet nationalities policy*, The Hague 1980, p. 46-77.

Ni devas nun esplori, kiajn konsekvencojn por la sovetaj esperantistoj havis la fakto, ke post la falo de Ĥruŝĉev la Partio moderigis la antaŭan ekstreme „asimilisman" aliron al la nacia kaj lingva problemaro.

En majo 1964, en la Konsilantaro pri Cibernetiko ĉe la Akademio de Sciencoj estis okazinta grava diskut-kunveno pri Esperanto[1], kiun partoprenis elstaraj membroj de la Akademio kaj de diversaj institutoj ligitaj al ĝi.[2] La kunveno estis organizita de la akademiano Aksel' Berg, kiu estis la estro de la soveta skolo de sciencistoj laborantaj en la kampo de cibernetiko – de fako, kiun la stalina ideologio kondamnis kiel pseŭdosciencon de imperiismo, kiu tamen ekde ĉ. 1959 estis popularigata kiel scienco de la estonteco. Post enkonduka parolado de Berg, kiu starigis la demandon, ĉu Esperanto povos solvi la lingvan problemon en scienca informado, la aliaj ĉeestantoj esprimis siajn starpunktojn. La pozicion de la kontraŭuloj de Esperanto reprezentis la filozofo Kammari, kies eldirojn ni jam citis supre. Kontraŭ li Berg argumentis, ke la diskuto ne koncernas la estontan lingvon de la homaro, sed nur la nunan utilon de helpa lingvo precipe por la scienco. Pri tia praktika uzo de Esperanto Kammari ne esprimis malaprobon, sed li insistis, ke la esperantistoj volas pli kaj ke ili ĝenas la batalon por la komuna lingvo de la senklasa socio.[3] Kvankam Kammari eĉ neis la fakton, ke Esperanto estis persekutata, li poste mildiĝis, aŭdinte ke la ĉinoj vaste uzas la lingvon en sia kontraŭsoveta agitado, kaj fine aliĝis al unuanima decido, kiu entenis ok proponojn por la estonta vigligo de la Esperanto-movado en Soveta Unio.

---

1. Esperantlingva protokolo (kvar tajpitaj paĝoj) de tiu kunsido de 14-5-1964 atingis okcidenton; eltiraĵoj en *Sennaciulo* 36. 1965, p. 30. – Kredeble pri la sama kunsido traktas la artikolo N. Danovskij, „Scienco, sciencisto kaj Esperanto", *Internacia Ĵurnalisto* 20. 1981, n-ro 2 (majo/jun.), p. 3.
2. Ĉeestis A.I. Berg, B.A. Serebrennikov, Ju.D. Deŝeriev, M.D. Kammari, V.N. Jarceva, V.A. Vasil'ev, V.P. Grigor'ev, A.G. Spirkin, B.A. Uspenskij, C.C. Miĥajlov, M.I. Isaev, K.M. Gusev, Zolotarev kaj N.F. Danovskij.
3. Kammari diris: „... se oni donas al esperantistoj nur fingropinton, ili kaptas la tutan manon."

Tiuj proponoj, kiuj inkluzivis la rekomendon eldoni lernolibrojn kaj vortarojn kaj fondi asocion de esperantistoj, ne havis tujan sekvon. Sed estis fondita ĉe la Instituto de Lingvoscienco sekcio pri interlingvistiko, kaj la lingvisto Viktor Grigor'ev, kiu dum la kunveno estis rakontinta, ke artikolojn de li jam kompostitajn oni ne publikigis, ĉar en ili estis mencio pri Esperanto, povis en 1966 aperigi en la revuo *Voprosy jazykoznanija* longan, argument-riĉan artikolon „Pri kelkaj demandoj de interlingvistiko".[1] En tiu, li nomis kontraŭscienca la atendon de Gafurov kaj Kammari, ke la estonta lingvo kreiĝos nature, spontanee per laŭgrada interproksimiĝo de la naciaj lingvoj, kaj prezentis sian tezon, ke la universala lingvo povos esti atingita nur per konscia kreado – „per artefarita internacia helpa lingvo – iaspeca ‚lingvistika sputniko'".

Grigor'ev celis unuavice liveri argumentojn kontraŭ la „nepravigebla malamikeco al interlingvistiko". Similan manieron de argumentado uzis Isaev, alia partopreninto de la diskut-kunveno. En artikolo verkita kunlabore kun la kirgizo M.S. Dĵunusov, kiu iĝis konata per siaj avertoj kontraŭ asimileca internaciigo, Isaev (kiu estas oseto), turnante sin kontraŭ la kunfandiĝa teoriisto Ĥanazarov, zorge diferencigis inter la estonta homara lingvo kaj la nuna artefarita lingvo uzata kiel helpilo apud la naciaj lingvoj.[2]

Tio estis dirita en la kadro de relative malkaŝa, vigla diskutado, kiu okazis en fakaj revuoj kaj libroj inter la jaroj 1966 kaj 1970 kaj kies temo estis la rilato inter nacio kaj socialismo. Estis en la sama periodo, ke aperis la vortaro de Bokarev kaj ke la registaro de Litovio decidis ebligi, ekde la lernjaro 1968/69, la fakultativan instruadon de Esperanto en mezgradaj lernejoj. La esperantistoj ĉerpis novan esperon, ke ilia movado progresos, eĉ se malrapide.

1. V.P. Grigor'ev, „O nekotoryh voprosah interlingvistiki", *Voprosy jazykoznanija* 1966, n-ro 1, p. 37-46; itala kaj angla tradukoj en *Pensiero e linguaggio in operazioni / Thought and Language in Operations* 2. 1971, n-ro 5, p. 3-16 kaj 17-30.
2. M.S. Dĵunusov, M.I. Isaev, „Sociologiĉeskie voprosy razvitija nacional'nyh jazykov" (Sociologiaj demandoj de la evoluo de naciecaj lingvoj), *Izvestija Akademii Nauk SSSR. Serija literatury i jazyka* 24. 1965, p. 433-437; germana traduko en: Wolfgang Girke, Helmut Jachnow (red.), *Sprache und Gesellschaft in der Sowjetunion*, München 1975, p. 306-314 (precipe p. 309-310).

Unu el la kontribuoj al la menciita diskutado estis libro, kiu portis la titolon „Kiel estiĝos universala lingvo?". Ĝian aperon aŭspiciis la Instituto de Filozofio ĉe la Akademio de Sciencoj.[1] La aŭtoro estas Ėrmar Svadost, kiu dediĉis pli ol du jardekojn al siaj esploroj kaj devis atendi dum 13 jaroj, ke aperu lia prespreta manuskripto.[2] Lia libro, mallonge dirite, jesas la eblecon atingi sciencan sintezon de la lingvoj de la homaro kaj akcentas, ke necesas havi je dispono, ĝustatempe antaŭ la starigo de tutmonda komunisma socio, kiel eble plej perfektan universalan lingvon, kiu siatempe tute transprenu la funkciojn de la naciaj lingvoj.

Svadost alvenis al tiu konkludo post analizo de aliaj teorioj pri la vojo al universala lingvo. Li kritikas kaj la teorion de Kautsky, Bogdanov, Ĥanazarov kaj aliaj, ke el la naciaj lingvoj eliĝos la universala lingvo, kiun li nomas neakordigebla kun la principo de Lenin pri nacia egalrajteco, kaj la teorion pri tutmonda kunfluiĝo de lingvoj, al kies ĉefa reprezentanto N. Ja. Marr li atestas kontraŭdirojn kaj „mirindan malkonsekvencecon"; same, Svadost malakceptas la koncepton de Stalin pri la anticipa estiĝo de zonaj lingvoj.

La pledo de Svadost por konscia lingvo-kreado estas farata grandparte per argumentoj, kiuj similas tiujn de la esperantistoj. Tamen, li klare konstatas, ke Esperanto ne povas servi kiel kerno por la kreo de la estonta tutmonda lingvo, ĉar ĝi estas „individua" kreaĵo kaj fluas „senkontrole". Negative estas prijuĝata la pia pacifisto Zamenhof kaj la influo de liberalaj burĝoj en la Esperanto-movado. Interese, Svadost riproĉas al la esperantistoj ankaŭ, ke ili ne starigis al Esperanto la celon iĝi tutmonda lingvo anstataŭanta la naciajn lingvojn; pri ilia pli modesta pretendo disvastigi nur internacian helpan lingvon li diras, ke tiu koncepto

1. Ė. Svadost, *Kak vozniknet vseobščij jazyk?*, Moskva 1968; vd. ankaŭ lian artikolon „Filosofija i sociologija jazyka", *La Monda Lingvo-Problemo* 4. 1972, p. 34-37 (el: *Za nauku v Sibiri*, 20-8-1969). – Enhav-resumon de la libro de Svadost donas Ekaterina Mihajlova, *Scienca Revuo* 20. 1969, p. 53-62. Recenzoj kaj replikoj estas de N. Nanov, *Internacia Ĵurnalisto* 12. 1968, n-ro 4 (okt./dec.), p. 3-4; de Jan Průcha, *La Monda Lingvo-Problemo* 1. 1969, p. 182-187; de Ljubomir Miĥajlov, *Bulgara Esperantisto* 38. 1969, n-ro 7/8, p. 27-28; kaj de D.L. Armand, *Scienca Revuo* 28. 1977, p. 149-154.
2. „Nekrologo. Ermar Svadost (1907-1971)", *La Monda Lingvo-Problemo* 4. 1972, p. 52. – La esplorlaborojn interrompis „erara ekzilo en Siberio".

ne povas enkadriĝi en la marks-leninisma ideo pri interproksimiĝo de la naciaj lingvoj.

Pri la libro de Svadost estas notinde, ke ĝi malaprobis la teoriojn de Marr kaj Stalin, samtempe kritikante la kutimajn antaŭjuĝojn kontraŭ artefarita lingvo. Sed ĉe la esperantistoj ĝi devis elvoki miksitajn sentojn pro la klara, ĉefe ideologie motivita kontraŭstaro de Svadost al Esperanto. En sia rebato, ili emfazis, ne mallerte, lian riproĉon, ke la esperantistoj havas limigitajn pretendojn kaj ne volas forpuŝi la naciajn lingvojn, kaj esprimis bedaŭron pri la perspektivo de „tre malgaja estonteco por la homaro", se ĉiujn popolojn kaj kulturojn oni tondus per la sama kombilo.[1] La demandon de universala lingvo ili nomis por la nuntempo tute ne grava kaj anstataŭe akcentis la aktualan, urĝan bezonon de helpa lingvo.[2] Krome, al la kritiko de Svadost kontraŭ la esperantista principo: unue disvastigi kaj uzadi la lingvon kaj poste perfektigi ĝin, ili respondis per la argumento, ke lia insistado pri la inversa ordo, pri „maksimuma perfekteco" de la uzota lingvo, estas prokrastemo, kiu dume favoras la lingvan imperiismon de grandaj naciaj lingvoj.[3]

Ni ne bezonas tamen trotaksi la signifon de la verko de Svadost, ĉar ĝi estas nur unu kontribuaĵo de ne aparte influa teoriisto. Estas ankaŭ menciinde, ke Bokarev, unu el la redaktoroj de la libro, povis en antaŭparolon enmeti siajn rezervojn precipe kontraŭ la lingvistika pritrakto de Esperanto fare de la aŭtoro.[4]

Ĉiuokaze, pri la demando de estonta lingvo estis multaj aliaj opinioj, kvankam malofte tiel detale prezentitaj kiel en la libro de Svadost. Verŝajne plej influa restas la grupo de tiuj, kiuj asertas, ke iu nacia lingvo iĝos universala[5]; krom Gafurov kaj Ĥana-

1. D.L. Armand, „Disputo pri libro far E.P. Svadost ‚Kiel aperos universala lingvo?'", *Scienca Revuo* 28. 1977, p. 153.
2. Laŭ la antaŭparolo al la libro de Svadost, tia estis ankaŭ la starpunkto de Bokarev.
3. Stojan Ĝuĝev, „Interlingvistika utopiismo", en: Violin Oljanov (red.) *Interlingvistiko, esperantologio*, Sofio 1985, p. 21.
4. Alia redaktoro estis Kammari.
5. La sekvanta grupigo baziĝas sur A.T. Baziev, M.I. Isaev, *Jazyk i nacija*, Moskva 1973, p. 215 k.sekv. (parta Esperanta traduko en: Blanke, *Esperanto. Lingvo, movado, instruado*, p. 1-12; vd. ankaŭ M.I. Isayev, *National languages in the USSR: Problems and solutions*, Moscow 1977, p. 383 k.sekv.

zarov, al ili apartenas la lingvisto A.A. Reformatskij, ankaŭ li kontraŭulo de Esperanto.[1] Iliaj starpunktoj estas esence asimilismaj kaj pli-malpli klare akordiĝas kun teoriistoj pri la nacia problemo, kiuj konsideras la kunfandiĝon de pli malgrandaj popoloj kun la grandaj socialismaj nacioj necesa akompanaĵo de la ekonomia evoluo.[2] La teoriisto M.I. Kuliĉenko, ekzemple, substrekas, ke la interproksimiĝo nepre devas konduki al kunfandiĝo kaj ke malpravas tiuj, kiuj, ne povante bone imagi la en fora estonteco okazontan kunfandiĝon, turnas sin kontraŭ la interproksimiĝo de nacioj en la nuntempo aŭ eĉ publikigas tezojn, en kiuj la internaciismo estas reduktita al la florado de nacioj.[3] Alia grupo inklinas al la opinio, ke la estonta lingvo de la homaro povas esti artefarita lingvo, riĉigita per la naciaj lingvoj[4], kaj donas – kiel Svadost – nepran preferon al tia solvo. Denove aliaj antaŭvidas ambaŭ eblecojn: tiun de artefarita lingvo kaj tiun de kunekzistado de tri-kvar altevoluintaj naciaj lingvoj, mem ne indikante klaran preferon.[5] Al ĉiuj ĉi teoriistoj, kiuj interkonsentas pri la celo de lingva unueco, kontraŭan pozicion okupas V.A. Avrorin. Li esprimas dubon, ĉu oni entute okupiĝu pri la demando, kiel formiĝos unueca lingvo, aŭ eĉ nur faru prognozon pri tia afero de malproksima estonteco. La dominan tendencon, kiu ne bedaŭras la malaperon de malgrandaj lingvoj, Avrorin klopodas senkreditigi, atribuante ĝin al Kautsky. Fakte, li argumentas, estas tiel, ke la vivkapablo de lingvoj spitas la unueciĝon de la kultura enhavo sub la kondiĉoj de socialismo kaj ke, se lingvoj evidente tre obstine rezistas procezojn de koncentrado, ankaŭ la estiĝo de unueca lingvo apenaŭ estas imagebla.[6]

1. A.A. Reformatskij, *Vvedenie v jazykovedenie* (Enkonduko en la lingvosciencon), Moskva 1967; kp. Baziev/Isaev, p. 216, kaj István Szerdahelyi, „Esperanto kaj la moderna lingvoscienco", *Hungara Vivo* 10. 1970, n-ro 3, p. 22.
2. A.G. Agaev, en *Socializm i nacii*, Moskva 1975; germana traduko: *Sozialismus und Nationen*, Berlin 1976, p. 240.
3. M.I. Kuliĉenko, samloke, p. 77-79, 82.
4. V.G. Kostomarov, *Programma KPSS o russkom jazyke*, Moskva 1963; kp. Baziev/Isaev, p. 217.
5. Tiel i.a. S.T. Kaltaĥĉjan, Ju.D. Deŝeriev kaj I.F. Protĉenko; kp. Baziev/Isaev, p. 218.
6. Kp. Baziev/Isaev, p. 219; Jonathan Pool, „Soviet language planning: Goals, results, options", en: Jeremy R. Azrael (red.), *Soviet nationality policies and practices*, New York 1978, p. 243.

Se oni klopodas difini la pozicion de la sovetaj esperantistoj en tiu ĉi diskuto, apenaŭ estas dubo, ke ili inklinas al la opinio de la malplimulto de teoriistoj, kiu pledas favore al kiel eble plej libera evoluo de la ekzistantaj lingvoj en Soveta Unio. Por ili gravas, ke temoj kiel interproksimiĝo kaj kunfandiĝo, asimilado de nacioj kaj konkurado de grandaj lingvoj ne tiom superregu, ke ili estas metitaj en la embarason klarigi, ĉu kaj kiel Esperanto akordiĝas kun la preparlaboroj por la kunfandiĝo de lingvoj. Elirante de la pozicio, ke interne de Soveta Unio la lingva problemo estas solvita kaj ke pri universala lingvo nun ne necesas zorgi, ili elstarigas la nuntempan internacian komunikadon kaj strikte ligas Esperanton al tiu bezono. „Nia principo devas esti ‚kaj-kaj', sed ne ‚aŭ-aŭ'", skribis Isaev, klarigante ke sub tio li komprenas la paralelan ekzistadon de multnombraj naciaj lingvoj, de la interpopolaj lingvoj, de la mondaj lingvoj (rusa, angla, franca, hispana, araba, ĉina) kaj de la „internacia helplingvo".[1] Tiamaniere Esperanto prezentiĝas kiel la nuntempe utila helplingvo, kiu ne kolizias kun la aktuala pozicio (kaj estontaj pretendoj) de la rusa kiel interpopola lingvo en Soveta Unio kaj kiel konkuranto de aliaj „grandaj lingvoj" en tutmonda skalo.

La fakto, ke la Partio ŝanceliĝas inter sia deziro pri centralizado kaj la zorgo ne provoki grandskalan malkontenton de la nerusaj popoloj, evidente permesas al la esperantistoj aŭdigi sian voĉon. Grava kadro, en kiu ili povas prezenti siajn diskut-kontribuojn, estas la „Scienca Konsilantaro pri la Kompleksa Problemo ‚Leĝecoj de la Evoluo de Naciaj Lingvoj en Ligo kun la Evoluo de Socialismaj Nacioj'".[2] Al tiu Konsilantaro, kies fondo en 1969 ŝajnis havi sian originon en ioma malcerteco de la aŭtoritatoj kiel trovi eliron el la naci-problema dilemo[3], estis ligita la jam funkcianta (ĉe la Instituto de Lingvoscienco) sekcio pri

1. M.I. Isaev, „Pri bazaj metodologiaj problemo de interlingvistiko", *Der Esperantist* 11. 1975, n-ro 3 (71), p. 13.
2. „Naučnyj sovet po kompleksnoj probleme ‚Zakonomernosti razvitija nacional'nyh jazykov v svjazi s razvitiem socialističeskih nacij'". Ĝi estas ligita al la Akademio de Sciencoj.
3. Hélène Carrère d'Encausse, „Determinants and parameters of Soviet nationality policy", en: Azrael, *Soviet nationality policies and practices*, p. 56.

interlingvistiko. Sub la aŭspicioj de la Konsilantaro okazis en somero 1974 en Moskvo konferenco pri la „scienc-teknika revolucio kaj la funkciado de lingvoj en la mondo", dum kiu diskutobjekto estis ankaŭ la demando de helpa lingvo por la scienco; la referaĵoj, interalie de Isaev, aperis poste libroforme.[1] Eĉ pli grava eldonaĵo el la vidpunkto de la esperantistoj estis artikolkolekto preparita de la interlingvistika sekcio ĉe la Konsilantaro, kiu kunigis gravajn kontribuaĵojn pri la tipologio kaj evoluo de Esperanto kaj aliaj planlingvoj.[2] La libro, kiun redaktis Isaev, estas dediĉita al la memoro de Bokarev.

Kiel montras ankaŭ la artikoloj en tiu ĉi eldonaĵo[3], la ĉefa celo, kiun la sovetaj esperantistoj ligas al sia pledo por Esperanto, estas fari kontribuon al solvo de la akre sentata problemo de multlingveco en diversaj medioj, precipe en scienco. Tiurilate ilia argumentaro estas esence pragmata kaj fakte apenaŭ diferencas de tiu, kiun uzas esperantistoj en okcidento. Ankaŭ se temas pri la efiko de la varbado por Esperanto surbaze de tia argumentaro, ni rimarkas similecojn inter Soveta Unio kaj la okcidentaj landoj. Nome, la progreso estas malrapida. Aliflanke, la Esperanto-movado ne dependigas sian ekzistokialon de tio, ĉu la publiko montras larĝan komprenemon por racia solvo de la lingva problemo. Ĝi, kontraŭe, disvolvas sian propran dinamikon kaj ĉerpas vivforton el la plezuro, kun kiu ĝiaj membroj praktikas la lingvon, el la deziro de individuoj komunikiĝi trans landlimojn per facila instrumento. Kiom ajn malproksima tio restas de plenumo de la origina celo konvinki la eksteran mondon pri la avantaĝoj de Esperanto kiel dua lingvo por ĉiuj, Esperanto en multaj landoj vivas simple pro tio, ke ĝiaj parolantoj trovas ĝin utila en vojaĝoj, internaciaj kongresoj kaj korespondado.

1. I.K. Beloded, Ju.D. Deŝeriev (red.), *Naučno-tehničeskaja revoljucija i funkcionirovanie jazykov mira*, Moskva 1977. Vd. ankaŭ: G.J. Korotkevič, N.F. Danovskij, „En la forumo de la lingvosciencistoj", *Paco* 1974, n-ro 6, p. 13-14.
2. M.I. Isaev (red.), *Problemy interlingvistiki. Tipologija i evoljucija meĵdunarodnyh iskusstvennyh jazykov*, Moskva 1976. – Kp. la detalan recenzon de Detlev Blanke en *Paco* 1977, GDR-eldono, p. 22-27.
3. Precipe D.L. Armand, „Čelovečestvo i okean informacii", *Problemy interlingvistiki*, p. 55-59; Esperanta traduko: „La homaro kaj oceano de informado", *Scienca Revuo* 28. 1977, p. 113-117.

Tamen, ĝuste tiuj okazoj, precipe la uzo de Esperanto en eksterlando, grandparte mankas al la sovetaj esperantistoj. Krom korespondi, ili praktikas la lingvon preskaŭ nur inter si – interne de Soveta Unio, kie estas uzata la rusa kiel „interpopola" komunikilo, en lando do, en kiu, strikte dirite, ne estas bezono por „internacia" helplingvo. Kvazaŭan konfirmon pri tio, ke tia bezono mankas en Soveta Unio, donis esperantista funkciulo mem, nome Anatolij Berëza, la respondeca sekretario de la Komisiono, kiu, kiam en 1976 li transprenis tiun oficon, ankoraŭ ne sciis Esperanton.[1] Kiel deklaris Berëza en letero al soveta esperantisto, „laŭ la opinio de la aktivuloj de nia komisiono, Esperanton ne eblas konsideri internacia lingvo, ĉar neniu konfirmis ĝin en tia rolo. Iuj nomas ĝin helpa lingvo. Kvankam esperantistoj troviĝas en diversaj landoj, ilia nombro ĝis nun ne estas konsiderinde granda. Inter la amaso da turistoj vizitantaj nian landon E-parolantaj estas relative malmultaj. Despli ke en nia lando sufiĉas homoj regantaj fremdajn lingvojn de diversaj popoloj..."[2]

Kvankam tiu vidpunkto verŝajne ne estas reprezenta por la gvidaj esperantistoj, apenaŭ eblas kontesti la fakton, ke la uzo de Esperanto interne de Soveta Unio, precipe flanke de nerusoj, havas delikatajn implicojn kaj plue riskas estigi suspektojn kiel esprimitajn de Kammari pri malgravigo de la rolo de la rusa. Se ekzemple la litova Ministerio pri Klerigo en sia programo por la fakultativa instruado de Esperanto substrekas, ke „la socio bezonas egalrajtan kaj paralele kun la nacia lingvo ekzistantan lingvon, kiu povas estiĝi rimedo por komunikado inter ĉiuj nacioj"[3], tia formulo havas en Soveta Unio aliajn kunsignifojn, ol la praktike identaj, tradiciaj varb-sloganoj por Esperanto en okcidento. En tiu ĉi rilato, bone kompreniĝas ankaŭ la signifo de la citita averto de Aleksiev.

---

1. *esperanto* 69. 1976, p. 156.
2. B. Kolker, „Kelkaj malkaŝaj vortoj", *Internaciisto* 4. 1977, n-ro 9, p. 5.
3. *Užsienio kalbų ir esperanto kalbos fakultatyvinių užsiėmimų programos*, Kaunas 1968, p. 32; cit. V. Grigaitis, „Esperanto en litovaj lernejoj", *Paco* 1971, n-ro 2, p. 44. – En la antaŭa frazo estas dirite: „La lingvo Esperanto ne havas celon anstataŭi la ekzistantajn lingvojn kaj fariĝi sola mondlingvo."

La zorgemo akcenti unuavice la utilon de Esperanto por la faciligo de sciencaj interŝanĝoj kaj kiom eble flankenlasi la tiklan nacian problemaron de Soveta Unio tial kontrastas kun la establita praktiko, nome la fakto, ke miloj da sovetaj esperantistoj inter si uzadas la lingvon kaj, anstataŭ konsideri ĝin perilo de sciencaj informoj, ligas al ĝi idealismajn sentojn, kiuj havas longan tradicion (sed estas ankaŭ adapteblaj al la aktualaj politikaj kampanjoj por paco kaj amikeco). Sekve, la skemo de Isaev, kiu antaŭvidas klarajn limojn inter la uzosferoj de diversaj lingvotipoj, rilate la efektivan rolon de Esperanto ne povas esti observata. Kaj la interlingvistaj teoriistoj mem ne tute sukcesas atenti tiujn limojn, ĉar ili ne povas aŭ volas nei, ke ilin plue interesas la demando, kia estas la lingva situacio en la estonteco. En intervjuo kun hungara ĵurnalisto Isaev diris, ke neniu nacia lingvo, ankaŭ ne la rusa, povas fariĝi universala lingvo nek eblas ia „natura" kunfandiĝo de ĉiuj lingvoj en unu, tiamaniere aludante ke la pretendoj de Esperanto ne limiĝas al la nuntempo.[1] Ke estu ekzamenata la „kandidateco" de Esperanto, kiam la socialisma socio sentos la bezonon por unueca internacia komunikilo, eĉ rekte postulas Grigor'ev. Tiu cetere ne hezitas rekomendi Esperanton kiel batalilon kontraŭ la „lingva imperiismo" de anglosaksoj kaj francoj, per tio surpaŝante terenon, kiun la bulgara aktivulo jam diagnozis tro risko-hava.[2]

La klopodoj ŝirmi la esperantistojn kontraŭ ideologiaj akuzoj per tio, ke estas akcentata la bezono de „racia solvo" de la problemo de internacia komunikado, ne povas do malhelpi la enplektiĝon de Esperanto en la ekstreme sentivan kampon de la interpopolaj rilatoj en Soveta Unio, nek estas eble eskapi la dilemon de idealismo. Eĉ pli: la soveta Esperanto-movado, renaskiĝinta post perforta silentigo, plue de tempo al tempo rekte kun-

1. András Sugár, „Ĉe komenco de nova, rapida progreso. Interparolo kun la prezidanto de la sovetaj esperantistoj en Moskvo", *Hungara Vivo* 15. 1975, n-ro 4, p. 14; ankaŭ en *Paco* 1976, GDR-eldono, p. 24. – Oni notu ankaŭ la admonon de Detlev Blanke (*Paco* 1977, GDR-eldono, p. 24) ne forgesi preparlaborojn por novaj solvoj de la internacia lingva komunikado, eventuale kondiĉitaj per ŝanĝitaj internaciaj rilatoj.
2. V.P. Grigor'ev, „Iskusstvennye vspomogatel'nye meĵdunarodnye jazyki kak interlingvistiĉeskaja problema" (Artefaritaj internaciaj helplingvoj kiel interlingvistika problemo), *Problemy interlingvistiki*, p. 53.

puŝiĝas kun sekurec-politikaj konsideroj de la aŭtoritatoj. Pro nekonataj kaŭzoj, en 1973 tendaro de esperantistoj okazonta en Vilnius estis malpermesita.[1] Esperantaj eldonaĵoj el okcidento estas ofte konfiskataj, ekzemple la libro *La kaŝita vivo de Zamenhof*, kiu interalie priskribas la ĉikanojn de la cara cenzuro[2], sed ankaŭ la bulteneto de komunistaj esperantistoj en Aŭstrio.[3] Okaze ŝajnas eĉ trarompiĝi la malnova timo, ke Esperanto servas kiel kanalo por spionado. Post kiam en aprilo 1965 estis arestita en Moskvo angla lektoro pri la rusa lingvo, Gerald Brooke, la akuzistoj indikis „internacian esperantistan organizaĵon", kiu peris kontaktojn inter la ekzila ligo NTS en Parizo kaj sovetaj konatoj de Brooke.[4] La sama NTS estis denove menciita en ligo kun Esperanto komence de 1981, kiam la semajna aldono de *Izvestija* en longa duparta artikolo kulpigis la redaktorinon de *Heroldo de Esperanto*, ke ŝi aranĝis renkontiĝojn inter sovetaj esperantistoj kaj elmigrintaj rusoj cele al kontraŭsoveta agado.[5] Se je la fino de la artikolo estas skribite: „Por labori kun sovetaj esperantistoj necesas koni ne nur Esperanton, sed ankaŭ la karakteron de la sovetaj esperantistoj, kiuj ĉiam estis, estas kaj estos patriotoj", tiu formulo sonas kiel laŭda konstato, sed certe estas interpretebla ankaŭ kiel vualita averto.

En la lumo de tio oni povas kompreni, kial la pozicio de Esperanto en Soveta Unio estas tiom kontraŭdira. Unuflanke, oni taksas la nombron de esperantistoj je pli ol 10 000, el kiuj pli ol 3 000 estas konsideataj „aktivuloj". Esperanto-kluboj funkcias en 110 urboj kaj vilaĝoj. La agado, kiun disvolvis SEJM kun siaj pli ol 2 500 membroj en 44 urboj, estas aparte notinda[6]: ĝiaj ten-

1. *Heroldo de Esperanto* 49. 1973, n-ro 14 (1549), p. 2.
2. Kurisu Kei, en *Esuperanto no sekai / La Mondo de Esperanto* 4. 1978/79, p. 929. – La nuntempajn cenzuristojn evidente ĝenis la pritrakto de la rilato inter Zamenhof kaj la cionismo.
3. *Internaciisto* 7. 1981, n-ro 1/2, p. 13, 16; 9. 1983, n-ro 7/8, p. 24.
4. *Algemeen Dagblad* (Rotterdam), 23-7-1965.
5. V. Barsov, L. Sergeev, „Za kulisami diversij. Operacija suprugi" (Malantaŭ la kulisoj de sabotadoj. Operacio geedzoj), *Nedelja* 1981, n-ro 4, p. 10; n-ro 5, p. 18. – Vd. la dementon de s-ino Fighiera: *Le Travailleur Espérantiste* 1982, n-ro 74 (okt.), p. 1.
6. La ĉi-supraj nombroj laŭ: Semjon Podkaminer, „La sovetaj esperantistoj", *Bulgara Esperantisto* 48. 1979, n-ro 2, p. 12.

daroj ĝuis grandan popularecon.[1] Aliflanke, ĝuste tiu junulara agado portis fortajn trajtojn de neoficialeco: SEJM tute distancigis sin de la Komisiono en Moskvo[2], kiun ĝi verŝajne konsideris nura elpendaĵo eksteren direktita kaj neantaŭeniganto de la movado interne de Soveta Unio.

Malgraŭ sia kvazaŭa ilegaleco, SEJM ne estis subpremita, kredeble ĉar la aŭtoritatoj ne juĝis tion oportuna. Ne estis ignoreble, ke SEJM kreis faktojn kaj ke paralele la apogo de la Akademio al interlingvistikaj esplorlaboroj efikis favore al Esperanto. Sub tiuj cirkonstancoj ŝajnis preferinde plilarĝigi la oficialan kadron de la Esperanto-movado kaj neŭtraligi la tension inter la senpova Komisiono kaj la vigla, sed neoficiala desuba movado de la gejunuloj. Pro tio en decembro 1978, la „Unio de Sovetaj Asocioj de Amikeco kaj Kulturaj Ligoj kun Eksteraj Landoj", en kies kadro funkciis la Komisiono, kune kun la Sindikatoj kaj Komsomolo, ĉe kies lokaj kluboj, kulturdomoj kaj komitatoj ekzistis esperantistaj rondetoj, faris decidon por la fondo de nova organizaĵo: Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE).

En marto 1979 okazis en Moskvo la fonda konferenco de tiu asocio, kiu ŝajnis esti la plenumo de multjara revado. ASE prenis la lokon de la Komisiono, sed restis ligita al la Unio. Samtempe dissolviĝis SEJM, kies gvidantoj eniris la estraron de la nova asocio, iĝante kolegoj de Isaev kaj Berëza, kiuj restis prezidanto resp. respondeca sekretario, kaj de relative granda nombro de neesperantistaj estraranoj.

En sia raporto al la fonda konferenco, Isaev substrekis la ligitecon de la Esperanto-movado kun la scienco kaj memorigis je tiu okazo pri la esperantologoj Drezen[3] kaj Bokarev. Post aludo je la ekzisto de kontraŭuloj de Esperanto kaj, lige kun tio, pledo por „skrupula esplora laboro" Isaev nomis la principojn, sur kiuj baziĝu la teoria kaj praktika agado de la sovetaj interlingvistoj:

1. Vd. la tre vivecan priskribon de unu tia tendaro en Latvio, precipe de ĝia distra-amuza karaktero: Volodja Ebelj, „XV-a Junulara Tutsovetia", *Bulgara esperantisto* 42. 1973, n-ro 9, p. 12-13.
2. *Starto* 1978, n-ro (68), p. 9.
3. Pri la interlingvistikaj teorioj de Drezen intertempe aperis la studo de A.D. Duličenko, „Koncepcija mejdunarodnogo i vseobŝčego jazyka E.K. Drezena" (La koncepto de la internacia kaj tutmonda lingvo ĉe E.K. Drezen), *Interlinguistica Tartuensis* 2. 1983, p. 89-121.

En USSR pasis la epoko de persekutoj kontraŭ Esperanto. Tion atestas i.a. la fakto, ke oficiala soveta institucio, la novaĵ-agentejo Novosti, de tempo al tempo uzas la lingvon en siaj eldonaĵoj.



Esperantistoj sur la Granda Muro. Pekino en 1986 gastigis Universalan Kongreson.

> La interlingvistiko kiel scienca branĉo ĉe ni disvolviĝas sur la firma bazo de marksisma-leninisma metodologio kaj lenina nacilingva politiko. Baziĝante sur la marksisma-leninisma tezo pri plena egalrajteco de ĉiuj lingvoj, ni starigas la „artefaritan" helpan lingvon kontraŭ nek interpopolaj, nek tiel nomataj „mondaj", nek des pli naciaj lingvoj. Ne temas pri anstataŭigo de unuj per aliaj.

Pli rekte rilatante al Esperanto, Isaev konfesis, ke ofte esperantistoj „troigas la signifon de tiu lingvo en la socia evoluo", kaj sekvigis admonon similan al tiuj, kiujn ni jam konas el GDR kaj Bulgario:

> Ankoraŭ kaj refoje indas emfazi, ke la lingvo Esperanto, same kiel ajna alia lingvo, estas ilo, ilo por komunikado. Per si mem ĝi portas nenian ideon (en socia signifo de la vorto) ŝarĝon. Oni povas uzi ĝin tiel por bono, kiel por malbono. La plejmulto de sovetiaj esperantistoj kaj interlingvistoj antaŭe kaj nun baziĝis sur tiu fundamenta marksisma-leninisma difino de lingvo. Kaj en sia estonta agado la esperantistoj devas konstante memori pri tio, por ne allasi domaĝajn erarojn.[1]

Isaev promesis, ke ASE, diference de la Komisiono, ne okupiĝos nur pri la internaciaj rilatoj de la sovetaj esperantistoj, sed ankaŭ pri la agado interne de la lando. Sed ĉi-lasta unuavice signifis ideologian edukadon de la sovetaj esperantistoj. Pri tio malkaŝe sin esprimis la enlanda periodaĵo *Amikeco*:

> Ofte oni rigardas esperantistojn kiel strangulojn, kiuj uzas la lingvon nur por akiri eksterlandajn poŝtmarkojn kaj bildkartojn, por amuzi sin per fremdlingva babilado kun najbaro (alilandanoj ja ne ĉie abundas!) aŭ kiuj adore postkuras eksterlandajn turistojn. Ne estas sekreto, ke dank' al tiu impreso multaj respondecaj altranguloj konsideras ideologian bazon kaj socian rolon de esperantistoj sufiĉe dubinda.[2]

La verkinto konkludis post ĉeesto en la fondkunveno, ke oni „ne vidu la ĉefan taskon de ASE en disvastigo de Esperanto, sed en plialtigo de kvalito de la movado". Efektive, la estraro de ASE baldaŭ dissendis al la lokaj kluboj leteron, en kiu estis postulite: „Ne zorgu pri kresko de la kvanto da esperantistoj, zorgu pri kresko de ilia lingva kaj ideologia kvalito".[3] Kaj tre simile, sindikata funkciulo admonis: „Ĉe organizo de laboro kun esperantistoj apartan atenton necesas koncentri sur kvalita, sed ne kvanta

1. Mahomet Isajev, „Pri la stato kaj pliefikigo de laboro de sovetiaj esperantistoj kaj plibonigo de iliaj internaciaj ligoj", suplemento al *Moscow News* 1979, n-ro 16 (2848), 22 apr., p. 1; represita en *esperanto* 72. 1979, p. 84.
2. L. Laanest, „Antaŭprintempo 1979", *Amikeco* 1979, n-ro 32, p. 1. – De la periodaĵo *Amikeco*, kiu estis destinita „nur por enlanda uzado", ĝis 1983 aperis 50 kajeroj.
3. „Pri la nuna stato de la Esperanto-movado en U.S.S.R.", *Horizonto* 6. 1981, p. 30.

konsisto de Esperanto-movado, sur ordigo de ĝia agado kaj altigo de la nivelo de politikaj scioj en Esperanto-organizaĵoj."[1]

La unuaj jaroj de ASE ne montris signifan progreson de la Esperanto-movado en Soveta Unio. Nenomita soveta esperantisto jam komence de 1981 parolis pri „perfiditaj esperoj", kulpigante ASE, ke ĝi „eĉ bremsas tiujn personojn, kiuj volas ion fari".[2] La plej grava manko estas tiu de lerniloj; lernolibro de Esperanto por ruslingvanoj, anoncita jam por 1978, fine aperis en 1984 – en eldonkvanto de nur 30 000 ekzempleroj.[3] En nur kelkcent ekzempleroj eliras la informa bulteno de ASE, kies enhavo estas plejparte ruslingva. Prokrastiĝis la delonge anoncita dua artikol-kolekto de la interlingvistika sekcio[4], kaj ankaŭ ne aperis la soci-politika revuo en Esperanto, kiu, laŭ decido de la fonda konferenco, estis destinita demonstri la utilon de Esperanto „kiel unu el iloj por disvastigi la veron pri nia soveta realeco". Nur en la baltaj landoj daŭras la eldonado de kelkaj bonaspektaj libroj en Esperanto. Kontraŭ ĉies atendo ASE ĝis nun ankaŭ ne aliĝis al UEA.

Ne estas facile klarigi, kial necerteco kaj limigoj restas. Plue atenton meritas la interligiteco kun la nacia problemo en Soveta Unio. En la nova konstitucio (de 1977) nun aperas la nocio „soveta popolo". De post ĝia publikigo plifortiĝis la propagando por dulingveco de ĉiuj sovetaj civitanoj. Evidente ĝuste pro tio, ke malkreskis la procentaĵo de rusoj en la tuta loĝantaro kaj ke la nerusaj popoloj montras kreskantan nacian memfidon, la Partio opinias des pli necesa, ke pli multe disvastiĝu la scio de la rusa lingvo kaj tiel ankaŭ fortikiĝu la interna kohero de Soveta Unio. Kvankam al la rusigo estas metitaj iuj limoj per tio, ke ĝiaj kontraŭuloj povas utiligi la eldiron de Lenin kontraŭ privilegiigo de lingvo kiel batalilon, ne estas pretervidebla la tendenco ŝovi la

1. P.T. Pimenov, „V sekretariate VCSPS", *Informacionnyj bjulleten'* 1980, n-ro 2/3 (3/4), p. 12.
2. „Pri la nuna stato...", p. 28, 30. – Nemirige, sovetaj esperantistoj akre protestis kontraŭ la malprioritato donita al disvastigo de Esperanto. Eble en ligo kun tio Berëza devis en 1982 rezigni sian postenon de sekretario de ASE. Kp. *Monato* 4. 1983, n-ro 2, p. 25; n-ro 4, p. 4.
3. Z.V. Semenova, M.I. Isaev, *Učebnik jazyka esperanto*, Moskva 1984.
4. Nova libro de Isaev (*Jazyk esperanto*, Moskva 1981) kurioze aperis en serio pri lingvoj de Azio kaj Afriko.

nerusajn lingvojn en la privatan sferon, ne plu uzi ilin ekzemple kiel perilon de scienco kaj tekniko kaj tiamaniere lasi al ili nur duarangan pozicion post la rusa. Vojmontran karakteron tiurilate havis granda konferenco okazigita en majo 1979 en Taŝkent, kiu – sub la moto „La rusa lingvo – lingvo de amikeco kaj kunlaboro de la popoloj de USSR" – estis dediĉita al la intensigo kaj plibonigo de la instruado de la rusa lingvo inter la nerusaj popoloj.[1] De 1982 oni parolas ankaŭ denove pli ofte pri la kunfandiĝo. Kiam Jurij Andropov fine de 1982 iĝis la posteulo de Breĵnev, li memorigis pri la fincelo de kunfandiĝo de la nacioj kaj avertis kontraŭ provoj malhelpi la procezon kondukantan al ĝi.[2]

Ĉiam, kiam estis akcentita la perspektivo de kunfandiĝo, tio estis malavantaĝa por la esperantistoj. Aldoniĝas politik-ideologiaj kaŭzoj por suspektado transirantaj la nacian problemaron. Nome, la disvastiĝon de Esperanto daŭre malhelpas la malfido, kiun la aŭtoritatoj havas kontraŭ senperaj kaj tial malfacile kontroleblaj kontaktoj kun eksterlando. Malgraŭ la oficiala propagando por paco kaj interpopola amikeco la Partio firme sekvas la principon, ke la flegado de internaciaj rilatoj estas tro grava por esti senkontrole lasata al la sovetaj civitanoj. Ĝis hodiaŭ regas la opinio, ke al eksterlandaj kontaktoj estas rajtigitaj nur speciale trejnitaj, jam elprovitaj personoj – homoj, kiuj pro siaj oficaj taskoj „kompetentas" kaj havas ŝtatan komision pri tiaj kontaktoj. Ankoraŭ restas preskaŭ neimagebla la penso, ke ne nur malmultaj privilegiitoj, sed miloj da ordinaraj sovetaj civitanoj interrilatas kun eksterlando. Tiel ne estas mirige, ke la esperantistoj restas suspektataj, ĉar ili, ne dependante de interpretisto, povas rapide uzi sian Esperanton – la lingvon, kies „danĝereco" fontas el tio, ke ĝi estas multe pli facile lernebla ol la angla kaj franca lingvoj.[3]

1. Pri tio vd. diversajn kontribuaĵojn en: Isabelle Kreindler (red.), „The changing status of Russian in the Soviet Union", *International Journal of the Sociology of Language* 1982, n-ro 33, p. 65, 109, 115.
2. Walker Connor, *The national question in Marxist-Leninist theory and strategy*, Princeton 1984, p. 407.
3. Tian konstaton de sekretario de la Centra Komitato de KPSU citas Aleksandr Ĥar'kovskij, „„...i byl na vsej zemle odin jazyk'" („... kaj estis sur la tuta tero unu lingvo"), *Novyj amerikanec* (Novjorko) 1982, n-ro 113, p. 21.

Ĉu daŭros tiu oficiala malfido, permesanta al ASE tre limigitan agliberecon, aŭ ĉu la tezo de la pioniro Podkaminer, ke nur „en la socialisma socio estas kreataj ĉiuj objektivaj kondiĉoj por la venko de la internacilingva ideo"[1], iam transformiĝos en fakton, tion devos montri la estonteco.

1. Semjon N. Podkaminer, „Socialismo kaj Internacia Lingvo", en: Blanke, *Socipolitikaj aspektoj*, p. 222. Vd. ankaŭ la kritikon kontraŭ la tezoj de Podkaminer: Ervin Fenyvesi, „Revuo de revuoj", *Hungara Vivo* 18. 1978, p. 64.

KONKLUDO

En la historio ne mankas ekzemploj pri malhelpoj al lingvo. Estis eĉ klopodoj perforte estingi la vivon de lingvoj. Precipe la lingvojn de etnaj minoritatoj kaj de koloniigitaj popoloj trafis malpermeso de instruado kaj de publika uzo. Kutime tio estis motivita de timoj flanke de la superrega ŝtata potenco, ke la nedezirata lingvo servas al siaj uzantoj kiel rimedo por politika-socia devojiĝo aŭ eĉ por plena apartiĝo de la ŝtato, en kiu ili konsistigas malplimulton.

La stampado de Esperanto kiel „danĝera lingvo" kaj la persekutoj de ĝiaj adeptoj kompreneble multrilate diferencas de aliaj kazoj de lingva diskriminacio. La parolantaro de Esperanto estis (kaj restas) disĵetita tra la tuta mondo; ĝi ne konis malantaŭ si la apogon de iu ŝtato nek de supernacia organo; ĝi nur malrapide ekkonstruis la ĝermon de propra kulturo, kaj – se mezuri laŭ la nombro de organizitaj membroj – ĝi neniam eĉ nur proksimiĝis al la karaktero de amasmovado. Krome, la sopiro pri la transsalto de naciaj limoj, kiu estis la ĉefa motoro de la internacia disvastiĝo de Esperanto, sola ne sufiĉis por konsiderinde malfortigi la ligitecon de la esperantistoj kun la respektiva nacio.

Tamen, Esperanto devis fronti malamikecon preskaŭ ekde tiu momento, kiam ĝi naskiĝis. Kvankam Zamenhof emis kaŝi sian motivon – la proteston kontraŭ la diskriminacio de homoj pro ilia lingvo – jam frue leviĝis la suspekto, ke li celas pli, ol la disvastigon de praktika interkomprenilo. La ruslandaj aŭtoritatoj timis ligiĝon de la esperantistoj kun Tolstoj, baldaŭ aliancon ankaŭ kun veraj revoluciuloj. Tute simile la naciista gazetaro en Germanio jam antaŭ la Unua Mondmilito akuzis la junan Esperantomovadon, ke malantaŭ ĝi kaŝiĝas kontraŭgermanaj, internaciistaj fortoj.

Tiaj timoj aŭ avertoj apenaŭ havis realan bazon, kaj la plej multaj esperantistoj efektive tre zorgis ne tiriĝi en politikajn movadojn. Sed Esperanto estis atakata ankaŭ tiam, kiam ligoj al pacifismo kaj socialismo tute ne estis evidentaj. Esperanto estis nur lingvo; la movado deklaris sin strikte neŭtrala. La Deklaracio de Bulonjo estis fiksinta, ke ĉiu rajtas uzi la lingvon laŭ sia plaĉo.

Sed la kontraŭuloj prenis Esperanton kiel simptomon de internaciismo. Ne efikis, kiam la esperantistoj, celantaj al oficiala agnosko, klopodis eviti ĉion, kio povus suspektigi Esperanton en la okuloj de la aŭtoritatoj. Decidajn kontraŭulojn tio ne impresis – ĝuste ankaŭ pro tio, ke ne estis kaŝeble, ke la pioniroj de Esperanto kaj la plej multaj postaj adeptoj sentis sin ligitaj al la idealo de paco kaj homa frateco kaj do ne vere estis plene neŭtralaj. Multaj esperantistoj fakte modeste demonstris en la praktiko tion, kion liberalaj kaj socialistaj teoriistoj de nova mondordo utopie imagis kiel idealon, la esperon je unueca homaro.

La debatoj pri Esperanto en Ligo de Nacioj kaj, pli draste, la persekutoj kontraŭ laboristaj esperantistoj en la 20aj jaroj klare montris, kiom serioze kontraŭuloj prenis la potencialon de Esperanto. La malfavoraj diplomatoj en Ĝenevo kaj la aŭtoritatoj en diktatoraj ŝtatoj avertis kontraŭ la „sennaciigaj" kaj „revoluciaj" celadoj de la esperantistoj, apenaŭ kaŝante, ke al tio ili kalkulas jam la soifon de vilaĝanoj al klerigo. Temis pri kontraŭstaro al interhomaj translimaj kontaktoj, kiuj eskapis la kontrolon de elitemaj intelektuloj kaj de sekurec-konsciaj registaroj. La 20aj jaroj montris aliflanke ankaŭ, ke la esperantistoj, tute konvinkitaj pri sia neprovoka karaktero, estis malmulte preparitaj por defendi sin kontraŭ atakoj pro politikaj-ideologiaj motivoj.

Tio komencis ŝanĝiĝi, kiam Esperanto en la Tria Regno iĝis objekto de celkonscia detruemo. La nazioj estis senprecedence danĝera malamiko. Ili lerte mobilizis tradiciajn antaŭjuĝojn pri la artefariteco de la lingvo kaj ĝia populareco inter maldekstruloj, sed samtempe asertis, ke esence ĉiuj esperantistoj estas malamikoj de la ŝtato, servantaj per sia lingvo al judaj-internaciaj celoj. Ili neis eĉ al nepolitikemaj personoj la rajton disvastigi Esperanton. La persekutoj sub Hitler instruis, ke ekzistis malamikoj, kiuj ne batalis nur kontraŭ politika „misuzo" de Esperanto, sed kondamnis la tutan idealisman bazon de Esperanto, la eĉ nur abstraktan paroladon pri paco kaj interpopola amikeco. La sinteno de la nazia reĝimo detruis ĉian iluzion, ke eblos distingi inter la porlingva propagando kaj la idea fono (la „juda origino") de Esperanto kaj tiamaniere transvivi.

Tio estis por la esperantistoj alarma leciono. Ili ekkonsciis pri la neeblo, eĉ dangeroj de absoluta neŭtraleco – nome, de neŭtraleco, kiu ne klare distingis inter ideoj favoraj al plua disvastigo de Esperanto, kaj ideologioj, kiuj – kiel la faŝismo – prezentis minacon al la tuta homaro. Tia koncepto de neŭtraleco ignoris ankaŭ la propran idealisman tradicion de la Esperanto-movado. Al multaj el tiuj, kiuj malkovris la detruan karakteron de faŝismo, sekve ŝajnis necese rezigni la sindetenemon de politikaj agadoj kaj viciĝi en kontraŭfaŝisman fronton.

Sed ĝuste tiam okazis evoluo, kiu estis nekomprenebla por ĉiuj tiutempaj observantoj kaj krome plej dolora por „progresemaj" esperantistoj: En Soveta Unio la movado pereis en 1937/38 – preskaŭ en la samaj jaroj, kiam la nazioj klopodis ekstermi Esperanton en Germanio. La amplekso de la persekutoj en Soveta Unio superis eĉ tiun de la nazioj. Tiuj persekutoj estis tiom pli ŝokaj pro du kialoj: unue, ĉar ilin kulpis reĝimo, kies reganta ideologio kelkrilate ŝajnis harmonii kun la ideo de Esperanto; due, ĉar la viktimoj estis komunistaj esperantistoj – homoj, kiuj frue senigis sin de malnovtipa utopiismo, primokis nur hobiecan aplikon de Esperanto kaj entuziasme elstarigis la valoron de la lingvo por la internaciisma eduko de la sovetaj civitanoj. Tiaj homoj estis en Soveta Unio arestitaj kiel „spionoj" – akuzo ankoraŭ pli absurda, ol la naziaj atakoj kontraŭ la „lingvo de judoj kaj komunistoj", sed komprenebla, se oni atentas kiel ĝian esencon la profundan malfidon, kiun la regantoj havis pro la vasta korespondado de sovetaj esperantistoj kun eksterlando. La esperantistoj malatentis la informan monopolon de la Partio. Ilia korespondado ebligis komparojn inter la ĉiutaga vivo en Soveta Unio kaj la vivcirkonstancoj en eksterlando, perante sciojn, kiuj estis des pli „dangeraj", ĉar ne eblis ilin simple klasifiki kiel produktojn de la propagando de la klas-malamiko. Al la pretendo de Esperanto esti facila komunikilo – pretendo, kiun en Ligo de Nacioj oni rifuzis, asertante ke la popolamasoj ne bezonas rektan komunikadon, kaj kiun la nazioj atakis kiel esprimon de „judaj popolinterfratigaj iluzioj" – en Soveta Unio estis metita perforta fino, kun neimageblaj suferoj por la viktimoj.

Estis diversaj gradoj de subpremo, kaj malsamaj estis ankaŭ la malamikoj de Esperanto, sed la komuna karakterizaĵo de la kon-

traŭesperanta batalo estas, ke ĝi direktiĝis kontraŭ lingvo, kiu unike simbolas la strebadon al egalrajta komunikado inter la homoj senrigarde al raso, lingvo kaj religio. La batalo celis pli ol nur lingvon. La sorto de la Esperanto-movado kvazaŭ servas kiel barometro, kiu ebligas mezuri la rekonon, kiun en la mondo trovas desuba internaciismo, spontanea celado al kontakto kun eksterlando, la klopodo kleriĝi ekster preskribitaj naciaj aŭ ideologiaj formoj kaj entute senantaŭjuĝa komunikiĝemo.

Tio nin fine kondukas al la demando, kiom agnoskita estas hodiaŭ la valoro de personaj interrilatoj en la tutmonda politiko. Esperantistoj estas nuntempe nur malofte subpremataj.[1] Sed la lingvo ankoraŭ havas mondskale nur relative malgrandan anaron. La legitimeco de supernaciaj organizaĵoj apenaŭ plu estas malakceptata, kaj neniu registaro kuraĝas esprimi sin malŝate pri celoj kiel paco kaj interpopola kompreniĝo. Sed ĉiam ankoraŭ ni povas observi, ke per alekstera sinfermo, vojaĝaj malhelpoj, kontakt-malpermesoj, per ideologia kuratoreco kaj unuflanka kultura propagando konstruiĝas baroj, kiuj kontraŭas la deziron de la homoj je renkontiĝo, dialogo kaj edukiĝo.

Oni povas konstati, ke en la lastaj jaroj kreskis la konscio pri la signifo de homaraj faktoroj en la internacia politiko. Tion ekzemple montras la rezultoj de la Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo. Inter politikistoj hezite gajnas terenon la kompreno pri tio, ke kunlaboro ne povas esti efika kaj long-

1. En kelkaj islamaj ŝtatoj de tempo al tempo leviĝas suspektoj kontraŭ Esperanto pro ĝia juda origino. En februaro 1980 la iraka ĵurnalo *Al-Thawra* publikigis longan artikolon, kiu nomis la Esperanto-movadon „kaŝita vizaĝo de cionismo". Estas informoj, ke en Irako pro „malŝato al internaciismo" Esperanto estas preskaŭ oficiale malpermesita: *Sennaciulo* 52. 1981, p. 27; vd. ankaŭ 50. 1979, p. 75 (pri persekuto de esperantisto). En Irano, kie la nombro de lernantoj de Esperanto tre atentinde kreskis ekde 1975, post la revolucio la esperantistoj dumtempe (1982) spertis malfacilaĵojn sekve de artikoloj atakantaj Esperanton kiel rimedon de bahaismo kaj cionismo. Sed ĉar aliaj influaj ĵurnaloj sin esprimis tre favore pri Esperanto, la irana movado ĝis hodiaŭ povas daŭrigi sian laboron: „Esperanto-ŝoko, kaj kontraŭ-ŝoko. Historia skizo pri la Esperanto-movado en Irano: 1910-1984", *La Brita Esperantisto* 81. 1985, p. 91-93; 82. 1986, p. 106-108; vd. ankaŭ Giorgio Silfer, "Esperanto en Irano: la rolo de bahaismo", samloke 82. 1986, p. 131-132. Kiel lando, en kiu la aŭtoritatoj obstine rifuzas doni al la Esperanto-movado agliberecon, unikan pozicion havas Rumanio.

daŭra, se ĝi restas limigita al rilatoj inter ŝtatoj kaj eta elito de lingvokapablaj intelektuloj kaj ne inkluzivas kontaktojn inter la ordinaraj civitanoj de la ŝtatoj kaj la interŝanĝon de informoj trans la limojn. Estas progreso, ke en internaciaj konferencoj de ŝtatestroj kaj ĉefministroj al la temoj apartenas la demando kiel transplanti la malstreĉiĝon en la ĉiutagan vivon de la popoloj, kiel partoprenigi la amasojn en la procedo de internacia proksimiĝo.

La leganto de tiu ĉi libro memoras, ke la postulo antaŭenigi la malstreĉiĝon per rektaj kontaktoj fakte tiriĝas kiel ruĝa fadeno tra multaj deklaroj de aŭtoritataj reprezentantoj de la Esperanto-movado – ekde tiu „benata" tago antaŭ pli ol okdek jaroj, kiam Zamenhof kortuŝite konstatis, ke „inter la gastamaj muroj de Bulonjo-sur-Maro kunvenis ne francoj kaj angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj".[1] Estis sendube signo de klarvido, kiam Hector Hodler atentigis en 1919, ke „vivpova estos tiu Ligo [de Nacioj] nur, se ĝi kunigas ne sole registarojn per juraj aranĝoj, sed ankaŭ kaj ĉefe popolojn per spirito de reciproka kompreno".[2] Kaj en 1960 la multjara prezidanto de UEA, Ivo Lapenna, formulis, kion intertempe komencis trovi necesa ankaŭ politikistoj: „... malmulto estis kaj estas farata por interkompreniĝo sur nivelo plej malalta, sed plej grava, la nivelo de la ordinaraj homoj. ... Ĉiam temis kaj temas nur pri la kunekzistado de la ŝtatoj kaj multe malpli, aŭ eĉ neniom, pri la amika, paca kunvivado de la popoloj, de la ordinaraj homoj."[3]

Pro sia kredo je tiu simpla vero kaj pro siaj – foje naivaj – klopodoj agi laŭ ĝi, la parolantoj de Esperanto suferis mokadon, persekutadon kaj mortigon. Nun delonge jam pasis la tempo de sangaj persekutoj; okaze estas eĉ provoj forgesigi ilin.[4] La esperantistoj ĝuas senprecedence liberajn eblojn por agado. Ili intertempe ankaŭ pli klare konscias, kian politikan implicon posedas ilia celado fontanta el origine nepolitika-morala protesto. Sed la „venko" ŝajnas ankoraŭ tre malproksima. Paradokse, la pledan-

1. PVZ VII 143.
2. *Hector Hodler. Lia vivo kaj lia verko*, Genève 1928, p. 88.
3. Ivo Lapenna, *Elektitaj paroladoj kaj prelegoj*, Rotterdam 1966, p. 66.
4. Vd. mian artikolon „Ni sentabuigu la historion de la Movado", *esperanto* 68. 1975, p. 186-187.

toj por tutmonda komunikilo plue troviĝas en la rolo de iom deviaj eksteruloj. Kvankam lingvaj problemoj finance troŝarĝas la laboron de internaciaj organizaĵoj kaj malhelpas mondskalan opini-interŝanĝon, pro konsideroj de nacia prestiĝo la ŝtatoj ne sukcesas akordiĝi pri la solvo, kiun ofertas Esperanto. Ŝajnas, ke multaj registaroj ne deziras, ke estu plene utiligata la potencialo de Esperanto, ĉar malgraŭ ĉiuj lipaj deklaroj favore al internacia solidareco ili volas plue mem decidi pri la formoj, en kiuj iliaj civitanoj flegu la transliman kontakton.

Oni povas konsideri progreso, ke al la homaj rajtoj lastatempe estis aldonita „rajto je komunikado". Unesko en siaj raportoj pri nova monda inform-ordo turnas sin kontraŭ unuflanka fluo de informoj, kultura hegemonio kaj malhelpoj al komunikado. Aliflanke, en la preskaŭ 300paĝa raporto de la tiel nomata MacBride-Komisiono (1980) la lingva problemo ricevas pritrakton sur malpli ol sep paĝoj.[1] Ankaŭ Unesko ne volas riski, ke ofendiĝu la registaroj pro deklaroj pri la lingva aspekto de la internacia komunikado, kiuj estus pli ol nur tute ĝeneralaj. Sed espero restas: Esperanto vivas. Ĝia ekzisto servas kiel admono, ke en teknike kuntiriĝanta kaj pli kaj pli raciigita mondo la pli bona kompreniĝo inter la homoj ne bezonas resti utopio.

1. Kp. Brian Weinstein, *The civic tongue. Political consequences of language choices*, New York, London 1983, p. 181.

1. La libro de la okcidentgermana historiisto, politologo kaj japanologo Ulrich Lins estas eksterordinara. Ĝi estas la ĝis nun plej profunda kaj plej ampleksa studo pri fenomeno, unika en la kulturhistorio de la homaro, studo pri la subpremo, persekutado, eĉ neneigado de adeptoj de internacia neetna lingvo. Unu el la multaj pruvoj, ke la planlingvo Esperanto ne estas nur projekto sed vera lingvo, estas ĝiaj sociaj funkciado kaj rolo. Mi ne legis ion rimarkindan pri persekutado de volapukistoj, idistoj aŭ interlingua-anoj. Oni ne persekutas ion, kio ne funkcias, ĉe kio oni ne vidas realan aŭ potencialan funkciadon. Krome, kiel Lins en sia libro klare montris, la persekutoj celis ĉefe la fenomenon de demokratia internacia komunikado, la sendiskriminacian samrajtan transnacian kontaktadon inter diverslingvuloj. Priskribante tiujn malhelajn aspektojn de la historio de la Esperanto-movado, la aŭtoro fakte ankaŭ pledas por pli klara agnosko de la rolo, kiun Esperanto povus ludi en la klopodoj por nova internacia komunika ordo. Li pledas por tio, ĉar al la bezonoj de la nuntempo ne respondas persekutado kaj subpremo, sed agnosko kaj ĉiuflanka subtenado de Esperanto kiel unu (ne la sole ebla) rimedo de internacia dialogo por reciproka fido, por malkonstruo de antaŭjuĝoj kaj por interpopola amikeco, kiu ne funkcios sen intensivaj interindividuaj rilatoj.

Ke okazis persekutoj kontraŭ Esperanto kaj esperantistoj, ni jam sciis antaŭ apero de la libro. Sed la unuan fojon ni havas antaŭ ni sisteman superrigardon pri tre granda, sendube ŝoka, amplekso de tiuj persekutoj. Neniu sincera homo povas esti netuŝita de tiuj kruelaj faktoj. Per sia kolosa laboro, kiun la aŭtoro dum pli ol 20 jaroj investis en la temon, li detruis ĉiujn eblecojn tabuligi ĝin. Kaj - ni estu sinceraj, forpreno aŭ ignoro de tiaspecaj temoj fojfoje nutris la iluzion, ke

eble tamen la persekutoj ne estis tiom grandaj kiel asertite, ke eble tamen oni nur troigis kaj ĝeneraligis unuopajn kazojn.

Ne - oni ne povas eviti la temon. Eĉ kontraŭe, por regajni aŭ konservi la konfidon de multaj homoj, esperantistoj, kiuj tro longe silentis, devas esti inter la unuaj, kiuj helpu malkaŝi la tutan veron, sen troigoj, sen bagateligoj. Por tio estas tre laŭdinda la decido de la eldonejo "Progreso" represi la verkon de Ulrich Lins, kiu aperis en la jaro 1988 ĉe Eldonejo Bleicher en Gerlingen FRG. Digna donaco al la 100-jariĝo de Esperanto.

2. Pro kio, do, ni bezonas la libron de Lins? Certe, por lerni el la historio! Sed kion? Ĉu lerni, ke la Esperanto-movado ne engaĝu sin por sociaj celoj? Tiam ĝi estus kondamnita al sensignifa sekto. Ĉu estis malĝuste, ke komunistaj kaj laboristaj esperantistoj volis utiligi Esperanton por siaj idealoj? Se oni konkludas ke jes, oni, laŭ nia opinio, malĝuste konkludas. La dogmiĝo de Marksismo-Leninismo en formo de Stalinismo, ties multaj teoriaj distordoj kaj akrobataĵoj neniel estas kulpo de tiuj homoj, kiuj sincere kredis al la idealoj de la komunismo kaj laborista movado kaj batalis por ili. Kaj tiuj idealoj ne malaperis! Do, kion lerni? Ĉiu leganto trovos sian respondon. Sendube, la kulturhistoriisto kaj lingvopolitikisto konfirmos la ĝeneralan rezulton de la libro, ke la rilato de Ŝtato al la Esperanto-movado kaj ties idealoj certagrade estas esprimo pri la funkciado aŭ nefunkciado de enlanda demokratio.

La libro ankaŭ bone montras, ke estas absurde identigi lingvon kun difinita ideologio. Aserti, ke difinita lingvo estas la lingvo de amikeco, de imperiismo, de socialismo, de kosmopolitismo, ke lingvo estas progresema aŭ reakcia k.s. estas tute absurde. Nur iom da dialektiko sufiĉas, por tion kompreni. Ĉu la germana estas la lingvo de la socialismo? Jes, ĝi estis la gepatra lingvo

de la klasikuloj de la marksismo. Aŭ ĉu ĝi estas la lingvo de la faŝismo? Jes, ankaŭ tio. Do, absurda alternativo. Kaj tamen, similspeca etikedado ankaŭ nuntempe fojfoje estas trovebla por difinitaj lingvoj. Kompreneble, kaj ankaŭ tion montras la libro, la adeptoj, la disvastigantoj de Esperanto, per sia engaĝo por ĝuste tiu ĉi lingvo ja esprimas certan socipolitikan sintenon, lingvopolitikan elekton, la elekton de alternativa modelo por pli efika, samrajta internacia komunikado. Sed tio ne aŭtomate faras Esperanton lingvo de paco kaj amikeco. La konkreta uzado decidas.

Sed ni bezonas la libron ankaŭ pro alia kialo: Se jen aŭ jen Esperanto ankoraŭ estas subpremata kaj persekutata, la studo de Lins povas liveri argumentojn kaj helpi al ni averti, por ke oni lernu el la historio. Krome, fojfoje, estas bone montri al antaŭjuĝemaj homoj, kiuj eble nur pro siaj antaŭjuĝoj, ignorado kaj miopeco estas kontraŭuloj de Esperanto, ke ekzistas morala devo antaŭ la Esperanto-movado ripari, kion la persekutoj detruis (se oni tion entute povas "ripari"). Ankaŭ pro tio estas tre bonvene, ke la libro aperis, kvankam koncizigita, en nacia lingvo (la germana: Die gefährliche Sprache. Die Verfolgung der Esperantisten unter Hitler und Stalin. Gerlingen: Bleicher-Verlag 1988, 326 p.). Tradukoj en aliajn lingvojn, inkluzive la rusan, estus tre bonvenaj.

3. Se ni ja tre decide substrekis la grandan valoron de la libro, tio tamen ne signifas, ke ni ne devus fari kelkajn rimarkojn kaj atentigojn, prezentante nian propran vidpunkton.

3.1. Neniu havas la kompletan veron. Ankaŭ la historiisto estas (nur) daŭra serĉanto. Ulrich Lins tre skrupule serĉis. Lia ŝajne unua parta ampleksa studo pri la temo de persekutoj jam aperis antaŭ pli ol 20 jaroj: en 1966/67 en "Germana Esperanto-Revuo" pub-

likiĝis lia profunda eseo "Esperanto dum la Tria Regno", kiun ni enprenis en nian antologion "Socipolitikaj aspektoj de la Esperanto-movado" (Budapest, Hungara Esperanto-Asocio, 1978, 1986). Ekde tiu tempo li daŭrigis la kolektadon de dokumentoj kaj amasigis nekredeble ampleksan materialon, kiun li nun prezentas al ni tre sisteme kaj klare. Kompreneble, li ankaŭ tre dependis de tiu materialo, kiun li sukcesis atingi. Je pli ol 70 % la libro traktas la sorton de Esperanto sub la cara reĝimo kaj [aparte] en Soveta Unio. Kaj ĝuste multajn sovetiajn fontojn, kiuj necesus por vere objektiva prezento, li ne povis konsulti. Legante la libron oni pro tio ofte havas la impreson, ke la sovetia movado daŭre nur manovris, ke ĝiaj gvidantoj pseŭdoscience teoriumadis kaj baraktis por iel transvivi. Ŝajnas al mi, ke tiu impreso estus tro unuflanka kaj ke tre necesas pliaj precizigaj esploroj flanke de sovetiaj historiistoj surbaze de dokumenta materialo. Kompreneble, kaj pri tio la aŭtoro ja avertis en la antaŭparolo, li ne traktis la internan historion de la Esperanto-movado, sed nur difinitajn aspektojn de ĝi. Grandega manko, kiu malfaciligas la ĝustan taskon de la multaj prezentitaj faktoj, estas la malesto de historia verko pri la sovetia Esperanto-movado. Por Lins la ĉefa, kvankam ne la sola, fonto-materialo kaj ties interpreto venas el la direkto de SAT kaj ties fondinto Lanti. Ne mirige, ke tial ekz. la personeco de E.K.Drezen devas aperi tro nigra, kion ni ne povas akcepti. Ni scias pri la profundaj konfliktoj inter SAT kaj SEU, kaj tiuj konfliktoj ne nur estis reflekto de stalinismaj reprezalioj. Marksisme-leninisme orientitaj esperantistoj havis la rajton pri propraj vidpunktoj kaj tial iam ja devis konflikti kun teoriuloj de Lanti, kiuj ja ludis gravan rolon en la politiko de SAT, kvankam tiu organizaĵo sin deklaris supertendenca. Ni do atendas seriozan kritikan analizon de la materialo koncernanta SEU-n flanke de sovetiaj historiistoj-esperantistoj, kiuj bone orientiĝu i.a. en la sfero de la

lingvo-politiko. Kompreneble necesus alirebleco al koncernaj sovetiaj arkivoj kaj dokumentaj fontoj.

3.2. Ampleksan ĉapitron la aŭtoro dediĉas al la temo "Socialismo kaj lingvo internacia", kunmetante vere interesan materialon. Tamen, por trakti tian temon ne sufiĉas baziĝi sur citaĵoj kaj vidpunktoj ĉefe de Marx, Engels, Lenin, Kautsky kaj Gramsci. Bedaŭrinde tro ofte ĉe multaj aŭtoroj "marksisma" traktaĵo estis kunmeto de kelkaj citaĵoj de la klasikuloj kaj Stalin kun kuraĝa kaj foje fantazia interpretado. Por ke studo estu marksisma ne sufiĉas nomi ĝin tia... Ĉefe gravas apliki la metodojn de la marksismo, do la metodojn de la dialektika kaj historia materiismo.

Bela ekzemplo estas la italo Antonio Gramsci, kies artikolo laŭ Lins "konsistigas la tre kredeble plej profundan analizon de Esperanto laŭ marksisma starpunkto" (p. 332). Nu - Gramsci simple ne komprenis la problemon de Esperanto kaj, kiel multaj ĉi-rilate suprajaj kaj arogantaj intelektuloj, juĝis laŭ antaŭjuĝoj, miskomprenoj kaj influoj de tute nemarksismaj antaŭuloj. Li ekz. transprenis la siatempe modan koncepton pri la lingvo kiel organismo. Ĉu Gramsci do "marksisme" kaj "profunde" analizis?!

Ni ankaŭ ne trovas justa la traktadon de la eventualaj rilatoj de Lenin al Esperanto (ĉu pozitivaj, ĉu negativaj aŭ neŭtralaj), per kiu la aŭtoro forvišante per unu gesto la ĝis nun plej bonan kaj detalan studon de S.N.Podkaminer pri la temo, kvazaŭ šajnigas, ke Podkaminer elpensis iun fantaziaĵon. Tion li ne meritas. Lins opinias, ke "impresas kurioze, se fojfoje sovetiaj esperantistoj klopodas prezenti lin (Lenin - D.B.) kiel simpatianton de Esperanto" (p. 339). Tion i.a. faris Ints Čače per tre dubindaj elpensaĵoj (ekz. en "Esperanto" 2/1969), sed ne Podkaminer.

Šajnas al mi, ke estonte estus pli fruktodone investi sian energion prefere en la aplikon de la mark-

sisma metodaro anstataŭ citi marksismajn teoriulojn, kiuj, eĉ se brilaj, tamen estis laikoj pri la temo de internacia planlingvo. Vere uzebla kaj profunda studo pri socialismo kaj internacia lingvo ankoraŭ mankas. Almenaŭ tri alireblecoj ŝajnas al mi fruktodonaj: a) la optimisma prognozo de la marksismo pri demokratia monda socio de la estonteco, b) la signifo de la konscia elemento en la sociaj procezoj (kaj ankaŭ lingvo estas socia fenomeno) kaj c) la leninisma koncepto pri samrajteco inter nacioj kaj lingvoj. Cetere, la aktivan, do ankaŭ modifopovan, rilaton de la homo al sia lingvo jam substrekis Marx kaj Engels en "La Germana Ideologio".

3.3. Ni ne estas konvinkitaj, ke la prezento de la laborista korespondado estas tute ĝusta (p. 410 k.s.). Sendube ekzistas multaj rigidaĵoj, pri kiuj la aŭtoro prave atentigas. Sed ankaŭ estas fakto, ke multaj korespondaj ligoj inter sovetiaj kaj ekz. germanaj laboristaj esperantistoj estis tre viglaj, fruktodonaj kaj tute ne ŝablonecaj. Ili tre kontribuis al la politika klerigo kaj evoluo de multaj germanaj esperantistoj, kiel esprimis multfoje veteranoj de Germana Laborista Esperanto-Asocio, ankoraŭ vivantaj en GDR. Ĉi-rilate ni bonvenigus pli profundan analizon, kiu eluzu pli da konkreta lefermaterialo kaj krome intervjuojn kun veteranoj. Anonimaj leteroj el Sovetunio, publikigitaj en "Sennaciulo" (kp. p. 415/416) ne povas esti seriozaj fontoj, des pli, ĉar la fontoj denove estas SAT-materialoj.

3.4 La postmilita evoluo de la Esperanto-movado en la socialismaj landoj estis tre kontraŭdira. Vere, ne sufiĉas prezenti nur la stalinismon kiel kialon por la "Granda silento en orienta Eŭropo" (p.433). Evidente tre influis la Malvarma Milito, kiu malfavorigis ĉiun ajn internacian aktivadon inter la blokoj, ne nur es-

perantan. Kaj tiu Malvarma Milito ne estis nur sovetia afero!

Lins tute ĝuste prezentas multajn faktojn pri stalinisma (sed pseŭdomarksisma) argumentado kontraŭ Esperanto. Nescio (vola aŭ nevola), ignorado, antaŭjuĝoj, misprezentoj kaj fantaziaj asertoj, kiuj ofte estis en respondoj de institucioj al esperantistoj, povis pli facile aperi kaj rezisti en la klimato de Malvarma Milito kaj en etoso, kiu estis sekvo de la detruo de la sovetia Esperanto-movado.

En la Sovetia Okupita Zono de Germanio (1945 - 1949) simple decidis la ordono de oficiroj. Ĝi ekz. malestigis la daŭrigon de la esperanta laboro, en kelkaj regionoj komenciĝinta ankaŭ en la kadro de la jam en 1945 fondita Kulturligo por Demokratia Renovigo de Germanio. Tamen oni devas ankaŭ konfesi, ke la restarigon de la esperantista agado ofte forte negative kuninfluis naive troigita argumentado de superentuziasmaj esperantistoj pri la ĉionsava rolo de ilia lingvo. Tio, ekz., jam ĝenis Gramsci, kaj ĝi estis unu el la kaŭzoj de lia negativa rilato al la lingvo. Kaj tio ankoraŭ hodiaŭ ĝenas en ĉiu ajn socia medio, krom en la "verda".

3.5. La aŭtoro bone prezentas i.a. la rolon de la unua prezidinto de MEM Rudolf Burda el Ĉeĥoslovakio, por la relegitimigo de Esperanto. Sendube MEM prezentis eblon por engaĝigemaj esperantistoj ligi pacbatalon kun Esperanto, tiel demonstrante ankaŭ la socian utilon de Esperanto. Tio estis grava argumento por MEM, sed ne la sola. Bedaŭrinde Lins ne mencias, ke ĝuste en la kadro de la siatempa UEA (kaj tio validis ĝis 1974) ne eblis esprimi sin pri aktualaj tutmondaj politikaj aferoj rilatantaj al paco aŭ milito. MEM ĉi-rilate ne estis neŭtrala kaj pro tio aldonis al la tutmonda Esperanto-movado gravan komponenton, pruvante, ke la esperantistoj ne estas izoliĝemaj sektemuloj sed aktive rilatas al la politika vivo en la mondo.

3.6. Oni ne devas riproĉi al la aŭtoro, ke la postmilita evoluo de Esperanto en la socialismaj landoj ne nepre ĉiam trovas adekvatan prezenton. Eĉ en la unuopaj landoj mem ĝis nun apenaŭ troviĝas sufiĉaj priskriboj pri la evoluo, kvankam tiaj priskriboj estus ege necesaj. Ili necesas, por prezenti tion, kio vere okazis, kaj por preventi misprezentojn. Kaj krome, la aŭtoro ja ne vivas en socialisma lando. Tamen, fojfoje oni dezirintus pli da prudenta interpreto kaj ne nur fidon al la Esperanto-gazetaro.

En GDR, ekzemple, la situacio devis esti alia ol en Ĉeĥoslovakio, Pollando aŭ Bulgario. "En GDR, la Esperanto-movado dum multaj jaroj eĉ pli multe postrestis, ol tiu en Ĉeĥoslovakio" (p. 488), skribas la aŭtoro. Eble li pravas. Sed li ne donas klarigon. Necesas konstati almenaŭ la simplan fakton, ke la dua germana ŝtato, FRG, siatempe faris ĉion eblan, por malebligi la internacian akceptiĝon de GDR. La granda diplomatia izoliteco (rilate al la nesocialisma mondo), en kiu troviĝis GDR, neniel favoris internacian aktivadon aŭ kreon de asocio, kiu propagandus kaj aplikus internacian lingvon. Nur komence de la 70-aj jaroj la internacia pozicio de GDR estis tiom forta kaj politika klimato tiom ŝanĝita, ke iom post iom la diplomatia bojkotado disfalis. GDR starigis diplomatiajn ligojn kun preskaŭ ĉiuj landoj.

Krom tio saĝaj esperantistoj eĉ dum la 50-aj jaroj havis eblecon agadi por kaj per Esperanto, kion bone montras la aktivado de Ludwig Schödl, kiu fine de la 50-aj jaroj eĉ fariĝis membro de la Germania Packonsilantaro pro sia esperantista agado. (Pri tio aperis artikolo en la GDR-eldono de "Paco" 1989). Kaj en 1959 unuan fojon GDR-esperantistoj en la kadro de oficiala delegitaro de la Germana Packonsilantaro partoprenis la 44-an Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio. En 1960 aperis numero de "Paco".

La partopreno de sociaj organizaĵoj aŭ ŝtataj organoj en la reorganizado de la esperantista movado en la socialismaj landoj por la aŭtoro ĝenerale estas suspektinda (Tio ja ĝenerale ne okazas en okcidentaj landoj). Ni legas ekz. "En GDR, komisiita gvidi la esperantistojn estis persono, kiu eĉ tute ne sciis la lingvon" (p. 492). Tipe esperantista rezonado: Nur tiu povas bone agi por Esperanto, kiu konas la lingvon. Fakto, almenaŭ rilate al GDR, estas, ke en 1965 fondiĝis 11-kapa honorofica gvidinstanco en Kulturligo, nomita "Centra Laborrondo de Esperanto-Amikoj", kiu vere gvidis. Tiun Centran Laborrondon prezidis Rudi Graetz, kiun la aŭtoro tre bone konis, sed tute ne mencias. Graetz estis tre aktiva kaj kapabla esperantisto, por kies politika evoluo - cetere - la ligoj al sovetiaj esperantistoj dum la dudekaj jaroj estis tre gravaj. Li estis diplomato kaj post reveno el eksterlando, kune kun aliaj kapabluloj, tre impete kaj saĝe agis por la rekonstruado de la Esperanto-movado en GDR. La aludita persono, kiu "tute ne sciis la lingvon", estis la sekretario de Centra Laborrondo, Eugen Menger, funkciulo de Kulturligo. Li, kvankam ne sciante Esperanton, sed plene simpatia al ĝi kaj bonege konata Kulturligon, havis grandegan meriton doninte la bazon por la tuta posta pozitiva evoluo. Kaj tiun pozitivan evoluon, cetere, la aŭtoro ja agnoskas, evoluon, kiun oni povas konstati por la plej multaj eŭropaj socialismaj landoj. Tamen la aŭtoro ne prezentas la kaŭzojn. Ĉu tia evoluo estas simptomo de "totalecaj" reĝimoj? La aŭtoro tre strange argumentas pri la ŝtata subteno (p. 493): "Ili (la reĝimo de la socialismaj landoj - D.B.) tion apenaŭ faris pro tio, ke ili malkovris la utilon de la lingvo por propagandi eksterlande siajn socialismajn atingaĵojn (kvankam tia uzo ja okazas), sed ĉar ili komprenis, ke permesi kaj legalizi la Esperanto-movadon estas pli prudente, ol subpremi ĝin kaj per tio nutri potencialon de malkontento".

Kial la aŭtoro ne pretas simple akcepti kiel pozitivajn motivojn flanke de la sociaj kaj ŝtataj instancoj,
- ke aktivaj esperantistaj ligoj eksterlanden ja estas grava faktoro por reciproke plilarĝigi la spiritan horizonton de la lingvouzantoj,
- ke internaciaj ligoj helpas malkonstrui klišajn konceptojn pri la landoj servante al la alformiĝo de sentoj de internaciismo kaj popola amikeco,
- ke entute sencohava kaj interesa pasigo de la libera tempo estas grava kultura ago, kaj
- ke la humanismaj konceptoj de Zamenhof, eĉ se parte utopiaj, ja renkontas simpation ĉe kleraj socialismaj funkciuloj.

Almenaŭ en GDR tiuj motivoj ludis la decidan rolon por la reorganizado de Esperanto kaj tute ne necesas imputi al la socialisma ŝtato ĉiam nur negativajn motivojn (kontroli, eviti, eluzi, k.s.). Kaj plue. Kial la malsame motivita manko de emo de iuj esperantistoj de GDR aliĝi al Kulturligo aperas, "ĉar agadon en ties kadro ili ne konsideris plenumo de la espero pri memstara organizaĵo de la esperantistoj" (p. 494), ne estas klare. Abstrakte skribi pri "memstareco" aŭ "sendependeco" ne alportas utilon. Ke oni varbis kaj varbas por la aliĝo tiujn, kiuj ankoraŭ ne aliĝis sed ja tre volonte profitas el la bona evoluo de la Esperantomovado, ŝuldata al la forta subteno de Kulturligo, tio estas tamen tute normala afero. Neniu skandalas en GDR, ĉar certa parto de la esperantistoj restas ekster Kulturligo. Ili tamen havas eblecon kunagadi.

Entute la analizo de la pasinta situacio en la socialismaj landoj estas ne tre kontentiga parto en la libro. Oni bedaŭrinde rimarkas fojfoje sarkasman komponenton ĉe la aŭtora interpreto, kiu devus manki en scienca verko. Tro krudaj ĝeneraligoj kaj ofte nepruveblaj asertoj foje ĝenas. La interpretoj estas ofte tro kuraĝaj. Ekz. ni ne scias, ĉu vere "la ideaj aspektoj de Esperanto ofte kaŭzas kapdolorojn al la oficialaj

reprezentantoj de la movado en orienta Eŭropo" (p. 497). La kritika traktado de diversaj humanismaj, sed utopiaj, aspektoj de la spirita heredaĵo en la verko de Zamenhof, ekz. la "interna ideo", ne okazas pro "kapdoloroj", sed pro la fakto, ke tiaj ideoj - almenaŭ laŭ nia vidpunkto - povas bari, kaj tre ofte evidente baras - la komprenon de la vera grandeco de la verko de Zamenhof. Finfine temas pri (tro malfortaj) provoj levi la argumentkapablon de la esperantistoj al pli alta nivelo. Kaj, kompreneble, marksisto havas alian aliron al tio ol alipensa interpretanto. Asertante, ke tiuj studoj "grandparte (estas) destinitaj asekuri la movadon kontraŭ malfavoro de la aŭtoritatoj" (p. 498), la aŭtoro ŝajne volas supozigi, ke la marksistaj esperantologoj tute ne povas aŭ volas memstare kontribui al teoriaj demandoj, sed nur manipulas por plaĉi al la aŭtoritatoj. Eble ekzistas ankaŭ tiaj homoj, sed la ĝeneraliga tendenco ĉe la aŭtoro ĉi-rilate estas bedaŭrinda kaj ne deca.

3.7. Se ni do tamen kun granda admiro - se ankaŭ kun kelkaj kritikaj demandoj kaj notoj - aprezas la unuajn 3 ĉapitrojn kaj la grandan parton de la kvara, la lasta parto de la libro, kiu traktas la proksiman pasintecon, estas laŭ ni ne tute kontentiga. La aŭtoro ne utiligis la facile ekzistantajn eblecojn konsulti kompetentulojn de la landaj asocioj por iom pli objektive kaj zorgeme priskribi kaj interpreti. Kompreneble, ni kapablas juĝi nur la evoluon en GDR. Kolegoj el la aliaj socialismaj landoj devus doni siajn rimarkojn. Tio estas tre grava i.a. pro tio, ĉar ĉiam denove ekzistas provoj nebuligi unu klaran fakton, nome, ke - malgraŭ ĉiuj persekutoj - en la plej multaj nuntempaj socialismaj landoj, eŭropaj kaj ekstereŭropaj, la Esperanto-movado atingis kvanton kaj kvaliton, kiu ĝis nun neniam estis atingita en nesocialismaj ŝtatoj.

4. Jen, kelkaj kritikaj notoj kaj vidpunktoj. Ŝajnas al ni, ke la aŭtoro ne povis atendi senkomentan akcepton de ĉio. Restas la fakto, ke ni havas je nia dispono gravegan verkon de kompetenta kaj serioza konanto de la pasinta kaj nuntempa Esperanto-movadoj. Jes, restas certe kelkaj demandoj, ĉiukaze i.a. tiu, kiel kontribui al la forigo de kelkaj mankoj. Sendube ni urĝe bezonas sobre verkitan historion de SEU (ĝis 1937), kiu ekvilibre prezentu la atingojn kaj la mankojn. Verŝajne ni devas veni ankaŭ al pli senantaŭjuĝa kritika retaksado de SAT, kiu prezentas - aparte sub la nuntempaj aspektoj - pli da pozitivaj elementoj ol foje vidite. Mankas, krome, ampleksaj kaj fundaj studoj pri la historio de la laborista Esperanto-movado. Jam estas malfacilege trovi dokumentojn pri la 20-aj kaj 30-aj jaroj, ankoraŭ vivas nur malmultaj veteranoj. Savado de dokumentoj, skriba, sonbenda aŭ vidbenda registro de rememoroj de la veteranoj necesas. La libro de Lins devigas al pli singardaj interpretoj de multaj eventoj kaj aktivecon.

Kaj finfine fariĝis tempo, ke la landaj asocioj de la pleje koncernitaj socialismaj landoj skribu la historion ankaŭ de la malfacila periodo post 1945.

Ĉion ĉi la libro de Ulrich Lins tre stimulas. Kaj ĉion ĉi la aŭtoro supozeble bonvenigus por iam prilaborota nova eldono.

Ke la libro ĝuste nun povas aperi en Soveta Unio, estas simptomo por nova fundamente grava etapo en la vivo de la socialismo. Ni ne dubas, ke tiu etapo donos fortajn impulsojn al la plua evoluo de la Esperanto-movado en kaj ekster la socialismaj landoj. Ni deziras al la libro la meritita disvastiĝon kaj kritikan asimilon.

Detlev Blanke

... kaj ankaŭ la aŭtoro estas danĝera. Ulrich Lins estas ĝuste tiu persono, kiu kulpas pri la fakto, ke la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) neniam aliĝis al UEA.

Malmultaj konas tiun historion, kiu tamen bone kongruas kun la historia esploro de Lins. En 1984, dum la belepoko de nia landa "stagnado" (pri la perestrojko venonta sekvajare oni tiam eĉ ne imagis), ĉio jam estis preta por la longe atendita paŝo - la aniĝo de ASE al la tutmonda organizaĵo de esperantistoj. La graveco de tiu paŝo, ne nur simbola, konsistis en tio, ke fakte la unio de sovetiaj esperantistoj neniam organize apartenis al la monda esperantistaro: dum la Stalina tempo al tio malhelpis la batalo de la tiama SEU (Sovetrespublikara Esperantista Unio, 1921-1938) kontraŭ la neŭtralisma UEA; dum la Ĥruŝĉeva tempo SEU jam ne ekzistis, kaj ASE ankoraŭ ne kreiĝis (ĝi estis fondita en 1979); dum la Breĵneva tempo obstaklis la "patronoj" de ASE, kiuj suspekteme subokulis ties agadon.

En 1984, tamen, la obstakloj ŝajnis pereintaj, kaj oni aspiris baldaŭan aliĝon al UEA. Oni jam planis komunajn servojn, kongrespartoprenojn, abonperojn kaj kion ankoraŭ oni ne povas plani en plansocio! Sed... venis Lins kaj ĉion detruis. Li permesis al si recenzi en la revuo "Esperanto" (1984, n-ro 4, p. 73) la libron de iama kunlaboranto de la Komunista Internacio, poste arestito kaj kondamnito K.Ŝtajner "7000 tagoj en Siberio". Tiu recenzo, laŭ ASE-funkciuloj, certe estis provoka, kontraŭsovetia elpaŝo; kaj la redakcio de "Esperanto" eĉ pliakrigis la provokon, presinte la recenzon de Lins flank-al-flanke ĉe alia recenzo, tute pri alia temo, sed verkita de sovetiano.

Tiuj fiagoj certe ne povis resti neresponditaj. ASE indigne protestis, reprenis sian promeson aliĝi al UEA

kaj punis eĉ la Universalajn Kongresojn, al kiuj ĝi dum tri jaroj rifuzis sendi oficialajn delegitojn. Kaj la tutan perturbon kaŭzis tiu pekulo Lins kun sia 32-linia recenzo...

Kiu kuraĝus tiam prognozi, ke venos la jaro 1989, kiam ASE likvidiĝos kaj denove restariĝos SEU, kiu praktike tuj, dum la Brajtona Universala Kongreso, aliĝos al UEA. Kaj samjare la eldonejo "Progreso" deklaros sian deziron republikigi la 546-paĝan libron de la iam danĝera aŭtoro... Tiu libro, sekvo de la perestrojko, nun kuŝas antaŭ la leganto.

* * *

Pri kio temas en tiu antaŭe danĝera libro pri danĝera lingvo? "Pri la persekutoj kontraŭ Esperanto", tekstas la subtitolo. Kie? En Germanio, Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Tajvano, en Soveta Unio, kiel ni ekscias el la enhavpriskribo. Sed la ĉapitro pri Germanio enhavas 66 paĝojn, la ĉapitro pri Orienta Azio - 32 paĝojn, la ĉapitro pri Sovetunio - 337 paĝojn, du trionojn de la libro. La situacio en Sovetunio estas do la kerno de la libro.

Kial? Ĉu pro precipe granda amplekso de persekutoj ĝuste en Sovetunio, pro ties nekomparebla akreco kaj kruelo?

Ne, la kialo estas alia: la libro de Lins priskribas multe pli larĝan terenon ol la persekutoj mem. Ĝi estas fakte studo pri la lingvopolitiko, kiu jes ja povis konduki al persekutoj, sed ne nepre devis havi tiajn sekvojn. En la ĉapitro pri Sovetunio Lins dediĉas longajn analizajn paĝojn al la frusocialismaj revoj pri universala lingvo, al la teorioj de Marx, Engels, Gramsci, Stalin, Marr, al la riĉa rikolto de rezonadoj de SEU-teoriuloj. La "teoria" bazo de persekutoj kontraŭ Esperanto en la nazia Germanio estis, mi diru, tre ordinara kaj primitiva, ĉar la koncepto mem de la internacia lingvo kontraŭas al la troigita kaj perversita

nacia sento de la nazioj. La situacio en Sovetunio estis tute alia: Esperanto dekomence ŝajnis tre kongrua ĝuste al la internacia sinteno de marksismo kaj necesis la interna transformiĝo de la socialisma socio kaj de la socialisma teorio por ke inter Esperanto kaj la reganta ideologio aperu nevenkebla konflikto.

La studo de Lins rilatas do ne nur al persekutoj kontraŭ Esperanto; ĝi estas same studo pri la socio, en kiu Esperanto naskiĝis kaj kun kiu ĝi evoluis. La fakto, ke Esperanto transformiĝis el "nedanĝera sensencaĵo" (kiel asertis la patro de Zamenhof por akiri cenzurpermeson por la verko de sia filo, vidu p. 22) al "danĝera lingvo", karakterizas ne nur la lingvon mem, sed la socion, aŭ socian ordon, kiu sentis sin minacata de la lingvo.

Aperas do la grava demando: al kiu socio Esperanto estas "danĝera"? La libro de Lins ne lasas tiun demandon nerespondita: Esperanto estas stampata kiel "danĝera" flanke de totalismaj reĝimoj, kaj tiom longe, kiom ekzistas la koncerna reĝimo. La sinteno al Esperanto estas kvazaŭ la "lakmusa testo", kiu montras la mezuron de la totalismo: la Esperanto-movado devis perei en Germanio, kiam al la potenco venis la faŝistoj, kaj ĝi same pereis en Sovetunio, kiam inter ĉiuj politikaj tendencoj venkis nur unusola - la stalinisma. Inverse, la reapero de la Esperanto-movado estas preskaŭ ĉiam la signo de redemokratiigo de la socia kaj lingva ordoj en la koncerna lando.

La nomo "danĝera lingvo" atribuata al Esperanto havas ankoraŭ unu dimension, kiun verŝajne ne celis la aŭtoro de la libro, sed pri kiu ĝi fakte pensigas la leganton. La "danĝero" por la ŝtato, eĉ por totalisma ŝtato, neniam vere estis efektiva; la reĝimo enorme troigis la danĝeron por rajtigi la persekutojn. Tial Esperanto vere fariĝis danĝera - ne al la ŝtato, kiu ĝin persekutis, sed al la esperantistoj mem, por kiuj okupiĝo pri Esperanto randis kun la mortpuno. La

adeptoj de la lingvo certe konsciis la danĝeron, sed la allogeco de Esperanto estis al ili pli forta ol la danĝero. Pro tio oni povas atesti la rapidan renaskiĝon de la Esperanto-movado ĉe ĉiu relativa mildiĝo de la reĝimo: en Sovetunio, ekzemple, la movado, sufokita en 1937 - 1938, komencis regeneriĝi tuj post la morto de Stalin (1953), do eĉ antaŭ la 20-a Kongreso de la Komunista Partio, kiu signis la finon de la periodo de stalinismo (1956). Tio kontribuas al la kompreno de la "fenomeno Esperanto": la persekutoj kontraŭ Esperanto elmontris ties vivkapablon pli konvinke ol tion povus fari ajnaj propagandaĝoj. La persistemo de la Esperanto-movado prezentas sin precipe forta en la krizaj kaj danĝeraj kondiĉoj.

* * *

La nuna publikigo de la verko de Ulrich Lins ŝuldiĝas, kiel dirite, al la perestrojko. Sed la libro mem estis skribita en la antaŭ-perestrojka tempo, kaj tion nepre sentas la leganto, precipe sovetiano. La tuta diskuto pri la nunaj kondiĉoj en la socialisma mondo jam grave malaktualiĝis pro la tieaj rapidaj politikaj kaj movadaj ŝanĝoj. Sian lastan subĉapitron Lins nomas "Soveta Unio: inter esperoj kaj duboj" (p. 503). La duboj ankoraŭ ne malaperis, ili eĉ kreskis, ĉar la tuta lando staras antaŭ la elekto de la nova vojo; sed samtempe tre serioze plifortiĝis la esperoj.

La atmosfero, en kiu agas la sovetiaj esperantistoj, plene ŝanĝiĝis, precipe pro la nova lingva situacio en la lando. En multaj sovetuniaj respublikoj estis akceptitaj novaj prilingvaj leĝoj, kiuj proklamas ŝtata la ĉefan respublikan lingvon kaj samtempe akcelas la instruadon kaj diskonigadon de la minoritataj lingvoj. Oni oficiale kondamnis kaj deklaris kiel krimajn la reprezaliojn de la Stalina reĝimo kontraŭ diversaj gentoj de

Sovetunio - la krimeaj tataroj, balkaroj, ingušoj, germanoj, grekoj ktp.

La persekutoj kontraŭ Esperanto kaj esperantistoj, kvankam ankoraŭ oficiale ne kondamnitaj, apartenas al la sama kategorio de reprezalioj, kiujn oni nun pritaksas kiel kontraŭleĝaj. Tio kreas en la lando perspektivojn de reala nacia samrajteco kaj lingva plurismo, de kiuj povas multe profiti ankaŭ la Esperanto-parolantoj. Kaj fakte dum la pasintaj jaroj oni vere vidas vigliĝon de la esperantistaj kluboj, respublikaj asocioj, tutsovetiaj unuiĝoj (ne ĉiam bone sciantaj, tamen, disdividi inter si la agadkampojn) kaj aktiviĝon de la eldona laboro: jam aperis en Esperanto libroj en la eldonejo "Progreso" (kaj multaj novaj estas atendataj ankoraŭ), venis novaj eldonaĵoj el la baltiaj respublikoj, estas publikigataj diversaj Esperanto-periodaĵoj (surfone de la eksploda kresko de nacilingva gazetaro).

Jam en la antaŭa periodo Esperanto servis por la portantoj de la lingvo kiel neŭtrala komunikilo en la regionoj kun naciaj tensioj. Kaj nun, en la tempo kiam interetnaj konfliktoj en Sovetunio malkaŝis sian profundan akrecon, la sperto de neŭtrala komunikado per Esperanto havas konsiderindan valoron por la eltrovo de ĝenerala solvo de tia problemo. Kelkaj "flamaj kapoj" eĉ proponis Esperanton por la rolo de la interetna lingvo interne de la lando (revenante fakte al la origina penso de Zamenhof). Tiaspecaj revoj certe ne havas perspektivon realiĝi, ĉar por tio necesus trudi Esperanton al ĉiuj popoloj de la lando uzante multe pli rigoran politikon ol tiu, per kiu Stalin volis trudi la rusan kiel "zonlingvon" de la socialisma mondo (v. p. 449 kaj sekvajn). Esperanto povus ludi rolon en la ellaboro de la lingva politiko de Sovetunio ĝuste en la inversa direkto - ne trudante sin al la popoloj, sed servante kiel modelo de "milda" solvo de lingvaj problemoj, precipe internaciskale. Tia nerekta influo al la lingvopolitikaj tendencoj en Sovetunio estus promesa kaj por la naciaj

lingvoj, kaj por Esperanto, ĉar la lingvo akirus pli altan prestiĝon en la socia konscio. Kaj la republikigo de la libro de Ulrich Lins certe kontribuos al la diskutoj en tiu teoria kampo.

Mi esperas vidi ankaŭ alian efikon de tiu republikigo. La libro de Lins estas historia studo, kaj ĝi venas al la sovetia publiko ĝuste en la tempo kiam la historio de la lando okupis tiom grandan lokon en la sociaj debatoj. La perestrojko alportis "konceptaran renverson": oni kritike rekonsideras la kutimajn nociojn kaj postulas plenan veron pri la pasinteco, rezignante pri la tradiciaj mitoj, por povi elekti la ĝustan vojon estonten. Esperantistoj estas engaĝitaj en tiu "konceptara renverso" ne malpli ol ĉiuj aliaj sovetiaj civitanoj kaj krome ili ankaŭ havas la taskon rekonsideri la pasintan historion de Esperanto en Sovetunio. Kaj la libro de Lins liveras por tiu rekonsidero abundan materialon.

Tre riĉe dokumentita, kun precizaj fontindikoj, kun klara stilo kaj objektiva prezento de la faktoj, la libro apartenas samtempe al la faka literaturo, kiu meritas la seriozan atenton de la profesia historiisto, kaj al la komuna literaturo, kiu altiras vastan legantaron pro sia ĝenerala intereso. Nur Esperanto-parolantoj povas dume profiti de la materialo, kolektita de la aŭtoro, ĉar la paralela germanlingva eldono de la libro (sub la titolo "Die gefährliche Sprache") suferis de la amputo de ĝuste tiuj partoj kiuj faras ĝin taŭga por profesiulo (perdiĝis interalie multaj bibliografiaj indikoj). La republikigo de la libro estas kvazaŭ invito al daŭra diskuto de la pritušitaj temoj.

Mi dezirus atentigi ĉi-rilate pri kelkaj problemoj kaj pri kelkaj trajtoj de la libro, konsiderante precipe sovetiajn legantojn kaj tiujn, kiuj speciale interesiĝas pri la historio de Esperanto en Sovetunio.

Unue. Estas esenca diferenco en la dokumentado pri Germanio kaj Sovetunio. La parto pri Germanio estas skribita (kaj tio estas tute nature) el la vidpunkto

interna: la aŭtoro uzas plejparte enlandajn (germanajn) fontojn, interalie arkivajn. La parto pri Sovetunio cedas al pli ekstera pritrakto: la aŭtoro penis zorge kolekti ĉiujn akireblajn fontojn, tamen ĉi tie dominas la fontoj okcidentaj kaj praktike malestas donitaĵoj el sovetiaj arkivoj. Tio estas afero komprenebla, ĉar la libro estis skribita en la epoko, kiam la sovetiaj arkivoj apenaŭ estis konsulteblaj pri la "tiklaj" historiaj epizodoj. Nun la arkivoj komencas malfermiĝi, kaj estas nepra bezono esplori ilin por plilarĝigi en novaj publikigaĵoj la dokumentadon de Lins. Tiuj vortoj estu komprenataj kiel alvoko al sovetiaj esperantistoj fari sian parton de la esplorlaboro por detale analizi la historion de Esperanto en Sovetunio.

Due. La temo pri la persekutoj kontraŭ Esperanto bezonus plian pritrakton de la motivoj de la persekutintoj. Lins (p. 365 kaj sekvaj) prave atentigas pri la ŝanĝoj en la politiko de Stalin rilate al la nerusaj minoritatoj: post 1930 - 1931 la politiko inklinas pli kaj pli al subpremo de minoritatoj favore al la rusaj naciaj simboloj kaj la rusa lingvo. Tio certe havis ankaŭ influon al la oficiala rilato al Esperanto. Tamen estus laŭ mi eraro kredi, ke tiam formiĝis la rusiga politiko, motivita per la rusa naciismo (aŭ ŝovinismo). Stalin, vere, revivigis la rusigan politikon, kiu iam karakterizis la carismon, tamen tiu revivigo ne estis kaŭzita per naciismaj motivoj: la kartveloj Stalin kaj Berija, la rusoj Molotov kaj Ĵdanov, la hebreoj Kaganoviĉ kaj Jagoda, la armeno Mikojan ne estis rusaj naciistoj: la ideologio de stalinistoj estis ne naciisma, sed ŝtatisma, la ideologio de la ŝtato, kaj la rusa lingvo estis elektita nur kiel la lingvo de la plimulto, por plifortigi la unuecon de la ŝtato. Menciindas ĉi-rilate, ke en 1925, ĉe la 15-a Kongreso, la Rusia Komunista Partio oficiale ŝanĝis sian nomon al Tutsovetia Komunista Partio, dum la respublikaj branĉoj de la Partio konservis siajn naciajn nomojn. Tiel komencis estabiliĝi la sistemo, kiam la

tutsovetiaj organoj forviŝis la rusiajn: naciaj brancoj de la Partio aŭ de junkomunistaj organizoj (Komsomolo) ekzistas ĝis nun en ĉiuj respublikoj de Sovetunio, krom Rusio; en ĉiuj respublikoj estas naciaj Akademioj, naciaj unioj de verkistoj ktp, kun la escepto de Rusio. Same estis konstruita ankaŭ la esperantista organizaĵo: ASE, ekzemple, havis naciajn (respublikajn) filiojn en Estonio, Latvio, Litovio, Armenio, Kartvelio, Ukrainio, sed ne en Rusio! Por karakterizi tiun ŝtatan politikon ne sufiĉas nomi ĝin rusiga, ĉar samtempe kun la rusigo de naciaj minoritatoj okazis "sennaciigo" (kvazaŭ laŭ SAT!) de la rusa popolo. La ideologio de ŝtatismo estis same fremda al la minoritataj lingvoj kaj nacioj, kiel al la lingvo kaj la nacio de la plejmulto.

Trie. Oni konsideru denove ne nur la persekutintojn, sed ankaŭ la persekutitojn. La ŝlosilvorto de Lins - "persekutoj" - estas tre forta: ni ricevas la imagon de la malprava, krima persekutanta potenco, kaj la prava persekutata viktimo - la lingvo Esperanto kaj la esperantistoj. Niaj simpatioj certe estas ĉe la viktimoj - kaj juste. Sed ne plene juste, ĉar la historio estis en la realeco multe pli komplika. Estas vero, ke la esperantistoj, tragike pereintaj en 1937 - 1938, en la antaŭaj jaroj kontribuis siaflanke al la establiĝo de la reprezalia reĝimo, kiu tiam estis ankoraŭ direktita kontraŭ aliaj malamikoj: la "Prompartio" ("Industria partio"), la opoziciuloj en la Komunista Partio, la (pseŭdo)naciistoj ktp. Post 1930 - 1931 la esperantistaj revuoj, eldonitaj en Sovetunio, pleniĝis per histeriaj politikaj atakoj kaj akuzoj: "manifesto de kalumnio", "sovaĝa slogano", "perfiduloj", "social-faŝistoj", "ideologio de Lanti kaj kontraŭrevolucio", "lingvoj de la kontraŭrevolucio", "klasmalamikoj", "internaciaj friponoj" - jen malgranda eltiraĵo el la artikoloj de la epoko. Polemiko kun SAT ankaŭ apartenas al la sama tempo - kaj meritus nian plenan rekonsideron nun, en la lumo de la nuntempe haveblaj faktoj. La demando de E.Lanti "Ĉu socialismo

konstruiĝas en Sovetio?" - starigita en 1935 kaj emfaze respondita negative (v. p. 418) - sonas al ni kvazaŭ anticipaĵo de la aktuala diskuto en Sovetunio pri la temo - "Kian socialismon ni fakte konstruis?" Oni devas agnoski verecon de multaj tiutempaj asertoj kaj duboj de la kreinto de SAT, kvankam, laŭ mi, daŭre restas neakceptebla la sennaciiga ideologio de SATismo, kiu nutriĝis de la samaj fontaj ideoj kiel la naci-malamika politiko de Stalin.

La perestrojko venigis kun si la retaksadon de la pasinteco - kaj tiu sama retaksado devas okazi ankaŭ en la historio de Esperanto. Ni salutu la republikigon de la libro de Ulrich Lins, kiu donas al ni necesan stimulon tiurilate.

Sergej Kuznecov

I

KRONOLOGIO

1859	
15 decembro	Naskiĝo de Lazaro Zamenhof en Bjalistoko
1878	
17 decembro	Projekto de „lingwe uniwersala" pretigita
1881	
13 marto	Caro Aleksandro II murdita; sekvas kontraŭjudaj pogromoj en Ruslando
1887	
26 julio	En Varsovio aperas la „Unua Libro"
1889	
septembro	Unua numero de *La Esperantisto* (Nürnberg)
1892	
aprilo	Oficialigo de la Klubo „Espero" en Peterburgo
1895	
aprilo	La rusa cenzuro malpermesas la eniron de la gazeto *Esperantisto*
decembro	En Uppsala komencas aperi *Lingvo Internacia*
1898	
januaro	Louis de Beaufront fondas Societon por la Propagando de Esperanto
13 januaro	Letero de Emile Zola pri la Afero Dreyfus
1901	
februaro	Ruslingva broŝuro de Zamenhof pri hilelismo
1905	Burĝ-demokrata revolucio en Ruslando
aprilo	*Ruslanda Esperantisto* komencas aperi
5/13 aŭgusto	Unua Universala Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer
1906	
19 majo	Fondo de Germana Esperantista Societo
12 junio	Fondo de Japana Esperantista Asocio
21 junio	Kontraŭjuda pogromo en Bjalistoko
12 julio	Dreyfus rehonorita
28 aŭg./5 sept.	Dua Universala Kongreso en Ĝenevo
1907	
junio	Ĉinaj anarkiistoj en Parizo ekeldonas la semajnan gazeton *La Novaj Tempoj*
24 oktobro	Komitato de „Delegitaro por alpreno de lingvo helpa internacia" decidas „alpreni principe Esperanton . . . sub kondiĉo de iaj modifoj"

1908	
18 januaro	Zamenhof rompas la rilatojn kun la „Delegacia Komitato" (Ido-skismo)
28 aprilo	Fondo de Universala Esperanto-Asocio
1911	
10 oktobro	Revolucio en Ĉinio
1914/1918	Unua Mondmilito
1917	
14 aprilo	Morto de Zamenhof
6/7 novembro	„Oktobra Revolucio" en Ruslando
15 novembro	„Deklaro pri la rajtoj de la popoloj de Ruslando"
1919	
marto	Fondo de la Tria (Komunista) Internacio
1920	
januaro	Fondo de Ligo de Nacioj
1921	
junio	Fondo de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo
aŭgusto	Fondo de Sennacieca Asocio Tutmonda
1922	
aprilo	Stalin iĝas ĝenerala sekretario
3 junio	Cirkulero de ministro Léon Bérard kontraŭ la instruado de Esperanto en francaj lernejoj
28 junio	Raporto de la sekretariejo de Ligo de Nacioj pri „Esperanto kiel internacia helpa lingvo"
30 oktobro	Benito Mussolini iĝas ĉefministro de Italio
1924	
21 januaro	Morto de Lenin
17 junio/8 julio	Kvina Kongreso de Komintern; alvoko al internacia laborista korespondado
1926	
5/10 aŭgusto	Sesa Kongreso de SAT en Leningrado
1927	
2/19 decembro	15a Kongreso de KPSU; eksigo de Trockij
1928	Unua Kvinjarplano en Soveta Unio
1929	
oktobro	Tutmonda ekonomia krizo akriĝas
1930	
aprilo	Skismo en la germana laborista Esperanto-movado
majo	Sovetaj aŭtoritatoj ĉesigas la transsendon de kotiza mono al SAT

30 majo	Parolado de Mykola Skrypnyk kontraŭ sennaciismo
13 julio/14 aŭg.	16a Kongreso de KPSU; Stalin parolas pri estonta universala lingvo
1931	
januaro	Fondo de Japana Prolet-Esperantista Unio
aŭgusto	Komunistaj opoziciuloj en SAT fondas Internacian Unuigan Komitaton por reorganizo de la proleta Esperanto-movado
1932	
aŭgusto	Fondo de Internacio de Proleta Esperantistaro
decembro	En Ŝanhajo ekaperas *La Mondo*
1933	
30 januaro	Adolf Hitler iĝas kanceliero de Germanio
29 julio/5 aŭg.	25a Universala Kongreso en Köln
1935	
17 majo	Instruado de Esperanto en germanaj lernejoj malpermesita
25 julio/21 aŭg.	Sepa Kongreso de Komintern; alvoko al kontraŭfaŝisma popolfronto
15 septembro	Kontraŭjudaj „rasaj leĝoj" de Nürnberg
1936	
18 februaro	Dekreto de Martin Bormann
20 junio	Dekreto de Heinrich Himmler; dissolviĝo de Germana Esperanto-Asocio
18 julio	Eksplodo de civila milito en Hispanio
aŭgusto	Skismo en la neŭtrala Esperanto-movado
septembro	Esperanto-societoj en Portugalio fermitaj
decembro	Japana polico komencas subpremi la proletan Esperanto-movadon
5 decembro	Nova konstitucio en Soveta Unio
1937	
marto	Komenciĝas „Granda Purigo" en Soveta Unio; likvido de la soveta movado
7 julio	Komenciĝo de japana milito kontraŭ Ĉinio
1938	
12/13 marto	Germanio aneksas Aŭstrion
13 marto	La rusa lingvo iĝas deviga fako en ĉiuj sovetaj lernejoj
20 aprilo	Fermo de Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno
1939/1945	Dua Mondmilito
1939	
28 septembro	Germanaj trupoj okupas Varsovion; anoj de familio Zamenhof arestitaj

1940	
8 junio	Interna raporto de Heydrich pri Esperanto
aŭgusto	Japana Esperanto-Instituto eksiĝas el Internacia Esperanto-Ligo
1941	
13/14 junio	Amas-deportado el la baltaj landoj
22 junio	Germana invado en Sovetan Union
1942	
30 januaro	Sekreta konferenco en Berlino pri „fina solvo de la juda demando"
1947	
17 januaro	Lanti sinmortigas en Meksikio
28 aprilo	Reunuiĝo de la neŭtrala Esperanto-movado
1948	
14 majo	Ŝtato Israelo proklamita
23 juno	Blokado de okcidenta Berlino
28 junio	Eksigo de Jugoslavio el Kominform
10 decembro	„Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj"
1949	
12 januaro	Malpermeso de Esperanto-grupoj en la soveta zono de Germanio
2 oktobro	Radio Budapeŝto ĉesas elsendi en Esperanto
15 oktobro	Ekzekuto de la hungara ministro László Rajk
1950	
6 aprilo	Dissolviĝo de Hungarlanda Esperanto-Societo
20 junio	Artikolo de Stalin en *Pravda*: „Pri la marksismo en la lingvoscienco"
1951	
marto	Fondo de Ĉina Esperanto-Ligo
1952	
6 septembro	Dissolviĝo de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko
3 decembro	Ekzekuto de Rudolf Slánský
1953	
5 marto	Morto de Stalin
27 julio	Armistico en Koreio
septembro	Fondo de Mondpaca Esperantista Movado
1954	
10 decembro	Unesko rezolucias en Montevideo favore al Esperanto
1955	Revigliĝo de la Esperanto-movado en Pollando, Bulgario, Ĉeĥoslovakio kaj Hungario; reviviĝo en Soveta Unio

1956	
14/25 februaro	20a Kongreso de KPSU; Ĥruŝĉev malkovras la krimojn de Stalin
okt./nov.	Ribelo en Hungario
1959	
1/8 aŭgusto	44a Universala Kongreso en Varsovio
1962	Fondo de „Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj"
1965	
31 marto	Fondo de „Centra Laborrondo de la amikoj de Esperanto" en GDR
1969	
29 marto	Fondo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
1972	
15 marto	Refondo de Portugala Esperanto-Asocio
1979	
14 marto	Fondo de Asocio de Sovetiaj Esperantistoj
1987	Esperanto centjara; 72a Universala Kongreso en Varsovio

INDEKSO DE PERSONOJ

Abašidze, I.V. 508
Adam, Eugène vd. Lanti
Adamson, Einar 228 (n.3)
Adenauer, Konrad 103
Adler, Max 319
Adler, Victor 328
Akita Uzyaku 173, 228 (n.3)
Albanov, Dmitrij 283 (n.2)
Aldworth, Thomas 301, 302 (n.1), 428, 430
Aleksandro II (caro) 16, 17
Aleksiev, Nikola 502, 517
Amouroux, Jean 388 (n.2)
Andreev, A.P. 377
Andropov, Ju.V. 524
Arbergs, Teodors 398 (n.4)
Arnhold, Georg 32
Asahiga Noboru 172
Asnes, A.I. 30
Avrorin, V.A. 514
Azorín, Francisco 139 (n.6)

Baghy, Julio 77, 482
Baĵenov, Vladimir 283 (n.2)
Bakin 162
Bakunin, M.A. 323, 324 (n.2)
Balague, Anton 474
Balkányi, Pál 458 (n.2), 475, 476, 479, 480
Baranyai, Imre 469 (n.4)
Barbusse, Henri 84, 204, 205, 402
Barthelmess, Norbert 6, 207, 223, 241 (n.3), 255, 256, 269 (n.1), 310 (n.3)
Bässler, Otto 263 (n.3), 267 (n.4), 291
Bastien, Louis 387, 388 (n.2), 402
Batta, József 271 (n.3), 272 (n.1), 383 (n.2), 390, 413 (n.1)
Baudouin de Courtenay, Jan 44 (n.1), 346 (n.2), 351 (n.1)
Bauer, Hermann 97
Bauer, Otto 324, 335
Beaufront, Louis de 30, 32-34, 41
Bebel, August 55 (n.3), 329
Becker, August 322 (n.6)
Behrendt, Arnold 99, 102, 107, 109, 110, 113
Bein, Kazimierz 35
Belmont, Leo 31, 35 (n.4), 128 (n.6)
Beneš, Edvard 62 (n.2), 71
Bennewitz, Willy 220 (n.5)
Bérard, Léon 65, 68, 69, 82, 83 86 (n.1)
Berëza, Anatolij 517, 520, 523 (n.2)
Berg, A.I. 510
Bergiers, Léon 421 (n.1)
Bergson, Henri 67
Berija, L.P. 384 (n.6)
Berlo, A. 305 (n.1 kaj 3)
Berthelot, Paul 172 (n.3)
Blanke, Detlev 313 (n.4), 492, 497, 518 (n.1)
Bleier, Vilmos 278 (n.3)
Blinov, E.V. 300, 385, 427
Blum, Léon 309, 310
Bočačer 373 (n.1)
Bogdanov, A.A. 196-198, 344, 512
Boguslavskij, M.S. 216
Boirac, Emile 30, 34 (n.3), 44
Bókarev, E.A. 350-352, 479, 480 484, 485, 504, 505, 507, 511, 513, 516, 520
Bonesper, Ralph 289 (n.1), 431
Bormann, Martin 119
Borovečki, Ivo 482
Borovko, N.A. 15
Borsboom, Eduard 7, 392 (n.4)
Bosch, Guillermo 278 (n.2)
Boubou, Marcel 294, 305 (n.3), 316
Bouda, Anna 220 (n.4)
Bourguignon, Honoré 316
Bourlet, Carlo 30, 34 (n.1 kaj 3)
Brandt, R.F. 191 (n.3)
Brežnev, L.I. 509, 524
Brooke, Gerald 519

Bufiarin, N.I. 240, 340, 351, 389, 394 (n.2), 400 (n.4), 407
Bujwid, Odo 106 (n.1)
Bulganin, N.A. 481
Burda, Rudolf 442, 443, 446-448, 465, 471-476, 480, 486, 487, 493
Burljagov, G. 371 (n.2)
Buttmann, Rudolf 98, 114 (n.5)

Cabet, Etienne 318, 331 (n.3)
Cai Yuanpei 160
Campanella, Tommaso 317
Carminová, E. 464
Cart, Théophile 30, 34 (n.3), 386 (n.6)
Cecil, Lord Robert 66
Chavenon, F.A. 422, 423
Chavet, Gabriel 34 (n.3)
Chen Duxiu 161
Christaller, Paul 103
Comenius, J.A. 317
Comte, Auguste 39
Connor, G.A. 482 (n.4)
Couturat, Louis 41
Cseh, Andreo 76, 106 (n.1), 133
Cvetkova, N. 480 (n.2)
Czubryński, Antoni 469 (n.7)

Čiang Kajšek 161, 163
Čikobava, A.S. 457, 458

Dambrauskas, Aleksandras 29 (n.2)
Danilov, G.K. 362
Danovskij, N.F. 510 (n.2)
Demidjuk, G.P. 208, 211, 213, 234, 235, 236 (n.2), 238, 246 (n.5), 265, 269, 278, 279 (n.1), 281, 299, 389, 390 (n.3), 394
Descartes, René 317
Deševiev, Ju.D. 510 (n.2), 514 (n.5)
Deškin, G.F. 384
Didrikil', E. 339
Dimitrov, Georgi 304, 312, 434 (n.2), 440, 461
Djatlov, Viktor 416, 420 (n.4)
Djunusov, M.S. 511

Dollfuss, Engelbert 130, 276
Dreher, Leopold 128 (n.6)
Dresen, Helmi 398
Dreyfus, Alfred 33, 34, 38, 44
Drezen, É.K. 25, 194, 201, 208, 210-218, 220, 222, 223, 226, 227 (n.4), 236 (n.2), 238, 239, 242-247, 257, 263 (n.4), 264, 265, 267-269, 271, 272, 274, 279-281, 283, 296, 297, 298 (n.1), 299, 302, 308, 339, 341, 342, 347, 349, 352, 359, 362, 363, 365, 366, 373, 375, 376, 381, 384-390, 392, 399, 400, 402, 403, 408, 409, 415, 420, 433, 520
Dubček, Alexander 488
Duc Goninaz, Michel 6
Dybowski, Benedykt 31

Ebert, Friedrich 91
Ehrlich, Paul 149
Ejdel'man, B.L. 261, 262
Ejov, N.I. 396, 399, 403, 404, 409
Ekström, Erik 384
Ellersiek, Friedrich 110, 113, 118
Eltunko vd. Xu Shouzhen
Engels, Friedrich 319-324, 327, 335, 351, 354
Érenburg, I.G. 217
Erošenko, V.Ja. 172
Esipov, V. 478
Evans, E.A. 431
Evstifeev, N.P. 31 (n.5), 191 (n.3)

Faure, Sébastien 202
Fenyvesi, Ervin 463 (n.1), 468 (n.4)
Feoktistov, E.M. 23
Fersman, A.E. 222 (n.4)
Fourier, Charles 215 (n.2), 318, 331 (n.3)
Franco, Francisco 138-140, 312, 483
Frick, Wilhelm 148
Fried, Alfred Hermann 45
Fruictier, Paul 34 (n.3)
Fründt, Willi 122
Fučík, Julius 446

Futerfas, Natan 210, 211, 213, 215, 341

Gafurov, B.G. 506, 507, 511, 513
Gandhi, Mahatma 71
Gavrilov, Petr 390, 393, 394
Gejspic, E. 24
Gernet, V.A. 26
Giedra, Balys 398
Giesswein, Sándor 81
Gilbert, William 432 (n.1), 472, 502
Gitzinger, Arthur 126 (n.7)
Goebbels, Joseph 116
Goethe, Johann Wolfgang von 45, 94
Gogeliani, B. 52 (n.7)
Gold, David L. 6
Gol'dfeder, Š. 283 (n.2)
Gomułka, Władysław 438, 483
Gor'kij, Maksim 191, 193, 427
Gorov, Hristo 144
Gottwald, Klement 472
Gramsci, Antonio 331-333
Graur, Alexandru 490
Grave, Jean 202
Grigor'ev, V.P. 510 (n.2), 511, 518
Grigorov, Asen 434, 437
Grosjean-Maupin, Emile 34 (n.3)
Guihéneuf, Robert 213 (n.4), 221, 418 (n.8)
Guillaume, James 324
Guo Moruo 162
Gurov, Evgenij 390, 394
Gusev, K.M. 510 (n.2)
Guzevičius 397

Gumakov 440 (n.1)

Hajdovskij, Sergej 210, 214
Halbedl, Adolf 487 (n.5)
Hamann, Jürgen 79 (n.2)
Hanotaux, Gabriel 63, 70
Hasegawa Teru 164, 175 (n.2)
Haupt, Herbert 122
Hayasi Tadasu 166
Herriot, Edouard 68
Herrmann, Willi 122
Herzl, Theodor 20 (n.2), 33
Hess, Rudolf 116, 127
Heydrich, Reinhard 115, 116, 119, 120, 123-125, 127, 130, 132
Himmler, Heinrich 115, 120, 124, 125
Hirt, Ferdinand 91
Hitler, Adolf 70 (n.2), 98, 100, 102, 106, 108, 127, 130, 134 (n.1), 147, 148, 190, 293, 312, 316, 483, 527
Hochhäuser, Ch.F. 214 (n.7)
Hodler, Hector 42, 43, 51, 59-62, 71, 89, 202, 204, 530
Hoegner, Wilhelm 97 (n.5)
Hong Hengwi 187
Horthy, Miklós 81, 142
Hu Shi 161
Hu Yuzhi (Hujucz) 228 (n.3), 446, 447
Humbert-Droz, Jules 194-195 (n.5)
Humboldt, Alexander von 319 (n.2)
Hutabatei Simei 166
Huzisawa Tikao 180 (n.3)

Ĥanazarov, K.Ĥ. 507, 511-513
Ĥolopov, A. 455, 470
Ĥrušĉev, N.S. 481, 506-510
Ĥvorostin, S.K. 22-24

Incertov, N.Ja. 390, 399, 400 (n.2), 403
Indra, Talivaldis 399 (n.6)
Inoue Masuzô 181
Iodko, A.R. 236 (n.2)
Isaev, M.I. 189, 505, 510 (n.2), 511, 515, 516, 518, 520, 522
Isbrücker, J.R.G. 106 (n.1)
Itô Kanzi 6
Itschner, Hans 195
Ivanov 373 (n.1)
Izgur, I. 283 (n.2)

Jablonovskij, Aleksandr 51
Jahnke, Richard 94
Jakovlev, N.T. 453
Jarceva, V.N. 480 (n.3), 510 (n.2)
Jaurès, Jean 55
Javal, Emile 34 (n.1 kaj 3), 38, 39, 44
Jeanneret, Henri 421
Jespersen, Otto 351 (n.1)
Jevsejeva, Ludmila 399 (n.6)
Jiao Feng (Tikos) 162
Jonas, Franz 130, 215 (n.1), 263, 275 (n.3), 276
Jung, Teo 7, 77, 118
Jušmanov, Vladimir 283 (n.2)

Ždanov, A.A. 460
Žirkov, L.I. 370 (n.1), 405 (n.6), 480 (n.3)

Kalinin, M.I. 212
Kaltaĥĉjan, S.T. 514 (n.5)
Kamenev, L.B. 212, 235, 240
Kammari, M.D. 507, 510, 511, 513 (n.4)
Kampfrad, Walter 101, 272 (n.1), 291, 292
Kang Youwei 157, 158
Kaplan 253 (n.1)
Kapper, Rein 398
Katayama Sen 216
Kautsky, Karl 259, 325-327, 330 (n.1), 331, 332, 334 (n.4), 338, 339, 343, 344, 351, 355, 356, 452, 455, 508, 512, 514
Keable, Gladys 312-314
Keable, William 189, 293, 309, 501 (n.4)
Kerĵencev, V. 197
Kilian, Theodor 488
Kim Ŏk 183, 184
Kirjušin, P.M. 230
Kirov, S.M. 300, 403
Kita Ikki 165 (n.2)
Kiyomi Rokurô 171
Klatil, Adalbert 275 (n.1)
Kliemke, Ernst 94
Klimovskij, Abram 431
Kodama Sirô 183
Koenen, Wilhelm 195
Kofman, A.S. 37
Kohlbach 113
Köhncke, Friedrich 390
Kökény, Lajos 452
Kokuškin, Jakob 470 (n.3)
Kolĉinskij, Viktor 295, 296, 302, 392
Koo, Wellington 62 (n.2)
Kóos, Antal 492 (n.1)
Kopelev, Lev 225, 226, 260, 403
Kossa, István 441 (n.1)
Kostadinov, Stojan 144
Kôtoku Syûsui 166
Kozlevčar, Jože 155
Krasin, L.B. 216
Kreuz, Robert 386 (n.6)
Krjukov, Maksim 281, 282, 283 (n.2), 384
Kropotkin, P.A. 166, 202, 203
Krupskaja, N.K. 341, 366-367 (n.5), 400 (n.4)
Kuličenko, M.I. 514
Kun, Béla 196 (n.7), 340 (n.2)
Kurisu Kei 5, 6, 175, 399, 403, 418, 419 (n.1), 421, 431, 464, 471
Kuroita Katumi 166
Kuzmyĉ, V.S. 392

Lafargue, Paul 351
Lafontaine, Henri 62
Lakov, Atanas 453
Lanti, E. 7, 122, 123, 181 (n.1), 195, 196 (n.7), 198, 199 (n.3), 202-206, 208, 213-216, 221, 223, 224 (n.1), 233, 234, 241-246, 257-263, 266-268, 270, 272, 274, 277, 278 (n.2 kaj 3), 279, 280, 282, 283, 296, 304 (n.2), 384, 385, 389, 390 (n.1), 392, 408 (n.2), 416-421, 423
Lapenna, Ivo 151, 152, 155, 384, 436 (n.6), 437 (n.1), 440, 470 (n.1), 482 (n.4), 530
Lapovenko, Aleksandr 420 (n.4)
Larin, Jurij 250

Laurat, Lucien 221, 242 (n.2), 259, 266-268, 340 (n.2), 432
Laval, Raymond 422 (n.2), 426
Lebedev-Poljanskij, V.I. 198 (n.3)
Leibniz, Gottfried Wilhelm 317
Lejzerowicz, Izrael 128 (n.6)
Leneveux 323
Lenin, V.I. 198, 199, 204 (n.5), 208, 211 (n.2), 212, 241, 251, 259, 261, 281 (n.7), 330 (n.1), 333-344, 348, 354-357, 359, 366, 368, 369, 371, 385, 395 (n.2), 407, 409, 465, 466, 473, 506, 512, 523
Levandovskij, A. 214, 215, 242
Levinskas, Eduard 398 (n.6)
Lian Wenqing 184, 186, 187
Lidin, I.G. 238, 281
Lincoln, Abraham 166
Lindhagen, Carl 338
Lisičnik, Ida 255
Litvin 294 (n.3)
Litvinov, M.M. 290
Liu Shifu (Sifo) 56, 160
Ljubovič, A.M. 224 (n.4)
Lobačev, A. 371 (n.2)
Logvin, A.P. 395
Loja, Jānis 362
Lomtev, T.P. 362, 452, 453
Lopatin 190 (n.3)
Lorenc, F.V. 31
Lozovskij, A. 401
Lu Xun 162
Luchaire, Julien 67, 69
Lunačarskij, A.V. 192, 198, 199, 212, 222, 346
Luxemburg, Rosa 166, 204 (n.5), 261, 272 (n.2), 334, 335 (n.1)
Luyken, H.A. 52

MacBride, Sean 531
Macek, Alfred 486 (n.3)
Majtinskaja, K.E. 480 (n.3)
Makowski, Albin 155
Malatesta, Errico 56
Malfère, Pierre 305 (n.3), 306 (n.7)
Malík, Adolf 442-446, 464 (n.1), 487, 488, 491
Malmgren, E. 436 (n.6), 469 (n.7)
Mangada Rosenörn, Julio 139
Manuil'skij, D.Z. 401
Mao Dun 162
Mao Zedong 162, 164
Marr, N.Ja. 344-351, 359-361, 363, 364, 374-377, 381, 382, 389 (n.1), 449-458, 466, 470 (n.1), 471, 475, 483, 512, 513
Márton, Lajos 482
Marx, Karl 166, 259, 319-324, 327, 335, 342, 354
Masiliunas, Jonas 398
Medvedev, R.A. 399
Meillet, Antoine 351 (n.1)
Meščaninov, I.I. 475
Metzger, Max Josef 131 (n.4)
Meyer, Gustav 485
Michalicska, István 221
Michaux, A. 15, 19, 20, 34 (n.3)
Mihalik, József 142
Mifajlov, C.C. 510 (n.2)
Mifal'skij, E.O. 298 (n.2), 383
Milojević, Simo 6
Mironov, J. 393
Miyake Sihei 178 (n.4), 181, 478
Moch, Gaston 32, 34
More, Thomas 317
Morgari, Oddino 331 (n.2)
Moscheles, Felix 32
Mosse, Rudolf 91
Müller, Max 351 (n.1)
Münzenberg, Willi 194-195 (n.5)
Muravkin, Herbert 272 (n.1 kaj 5), 299 (n.1), 310 (n.2), 383 (n.2), 392, 402 (n.2)
Muribo, Martin 243 (n.1)
Murray, Gilbert 66
Mussolini, Benito 140

Nagy, Imre 440
Nakatuka Kitizi 175, 177
Naumann, Albrecht 109, 110, 115 (n.1)
Nekrasov, N.V. 208, 210 (n.3), 211, 213, 236 (n.2), 242 (n.2),

259, 261, 262, 278, 299, 308, 392
Neli, Karl 154 (n.5)
Nieuwenhuis, Domela 329 (n.4)
Nikol'skij, Roman 236 (n.1 kaj 2), 237, 238, 268 (n.2), 281, 289, 290, 369 (n.1), 390, 393
Nissen, Kurt 122 (n.4)
Nitobe Inazô 64, 66, 68, 157
Nobes, Arthur 314 (n.8)

Obbes, Gesine kaj Ali 155
Ockey, Edward 312 (n.1), 430 (n.3)
Ofitovič vd. Sunnam, Ort
Orzeszko, Eliza 171 (n.3)
Osaka Kenzi 168, 170, 172
Ostwald, Wilhelm 46, 47
Ôsugi Sakae 56, 166, 171 (n.1), 172

Paščenko, M. 371 (n.2)
Pašukanis, E.B. 353
Pavlov, Todor 143
Persson, Pelle 428 (n.1)
Pestaña, Angel 194
Petőfi, Sándor 85
Petit, Pierre 306
Peus, Heinrich 329 (n.2)
Pietsch, Willibald 110, 111, 115 (n.1), 119
Piño, Andrés 140 (n.1))
Pinsker, Leon 18
Plehanov, G.V. 351
Pleve, V.K. 23
Poceluevskij, A.P. 405 (n.5)
Podkaminer, S.N. 196 (n.1), 371 (n.2), 392, 480 (n.2), 500, 525
Pogány, József 195
Poincaré, Raymond 72
Polivanov, E.D. 389 (n.1)
Porjezinskij, V.K. 191 (n.3)
Postnikov, Aleksandr 53
Polka, Antanas 399 (n.6)
Prent, Ethel 312 (n.1), 314 (n.8)
Primo de Rivera, Miguel 137
Privat, Edmond 62-64, 67, 68 (n.4), 70, 71, 106 (n.1)
Protčenko, I.F. 514 (n.5)
Proudhon, Pierre-Joseph 318, 320, 322
Pruski, Czesław 128 (n.7)
Pujulà i Vallès, Frederic 137 (n.3)
Puškin, A.S. 454

Qian Xuantong 161
Qu Qiubai 162

Radić, Stjepan 81
Rajk, László 441
Rajski, Andrzej 483
Rákosi, Mátyás 195, 216, 440
Ravesteyn, Willem van 56
Reclus, Elisée 202
Reformatskij, A.A. 514
Reizmann 468 (n.1)
Rejtman, Moisej 299 (n.4)
Remarque, Erich Maria 117
Renn, Ludwig 138, 298 (n.2)
Renner, Karl 330, 335
Respe, Alberto 307, 402 (n.1)
Restrepo, Carlos 62 (n.2)
Revo vd. Laurat
Reynald, Georges 66
Reynold, Gonzague de 67, 70
Richter, F.C. 267 (n.4), 272 (n.1)
Richter, Georg 272 (n.1)
Riesen, Günter 106
Rio Branco, Raul de 66, 67, 70
Robicsek, Ferenc 390, 393
Robicsek, Pál 221, 390 (n.4)
Róbin, Wilhelm 128 (n.6)
Rolland, Romain 71, 192, 206
Rollet de l'Isle, Maurice 63
Rosenberg, Alfred 116, 134 (n.1)
Rousseau, Jean-Jacques 166
Rust, Bernhard 112, 113
Ruus, Neeme 398
Rykov, A.I. 212, 389, 407
Ryner, Han 202
Ryt'kov, Nikolaj 385, 390, 392-395, 399, 427

Sadoul, Jacques 333
Saharov, Andrej 225 (n.5)
Saitô Hidekatu 175-178, 183

Sakagami Muturô 178 (n.1)
Sakai Toshiko 166
Sakowicz, Roman 268 (n.2)
Salan, Georges 228 (n.3), 316 (n.2), 498 (n.1)
Salazar, Antonio de Oliveira 135
Sapir, Edward 351 (n.1)
Saryčev, S.V. 485 (n.3)
Sasaki Takamaru 168, 172 (n.6)
Satô Tokirô 178 (n.1)
Saussure, Ferdinand de 351
Schödl, Ludwig 101 (n.2), 294 (n.3), 468 (n.5), 490, 494
Schubert 122
Schuchardt, Hugo 44 (n.1), 351 (n.1)
Schwenk, August vd. Respe
Schwier, Werner 133
Sebert, Hippolyte 30, 34 (n.1 kaj 3), 39, 72
Seppik, Henrik 399 (n.6)
Serebrennikov, B.A. 480 (n.3)
Serov, I.A. 397
Setälä, Vilho 106 (n.1)
Sevak, Gurgen 405 (n.4)
Sidorov, Andrej 235 (n.2), 428 . (n.1)
Sifo vd. Liu Shifu
Simon, Otto 107
Singer, Paul 55
Sinickij, S.P. 367-369
Skrypnyk, M.O. 269-271, 357-360, 366, 375, 379, 380, 407, 408
Slánský, Rudolf 444, 445 (n.1)
Sluckij, A.G. 371
Snejko, D.S. 286, 287
Soljenicyn, A.I. 395 (n.2), 396
Solzbacher, William 470 (n.1)
Sosjura, Volodymyr 367-370
Sosnovskij, L.S. 220
Souvarine, Boris 194-195 (n.5)
Spiridovič, E.F. 179, 347, 348, 350-352, 360-362, 366, 370, 372, 374-376, 379 (n.1), 381 (n.2), 392, 407, 408
Spirkin, A.G. 510 (n.2)
Springer, George P. 366
Sproeck, Adolf 101 (n.3)
Srna, Vojtěch 499
Stafianov, A.G. 426
Stalin, I.V. 212, 239-241, 257, 259, 287, 300 (n.1), 308, 316, 336, 337, 342-346, 354-361, 363-367, 369-374, 378-381, 384 (n.6), 389, 393, 396, 399, 404, 407-411, 417, 423, 425, 449-451, 453-459, 464, 466, 467, 469-473, 475, 481-483, 501, 506, 507, 512, 513
Stay, Howard 207 (n.2)
Steche, Albert 72-75, 84, 92-94, 114
Steche, Theodor 94
Steiner, Hugo 130
Stettler, Eduard 104, 106
Stirner, Max 322
Stöterau, Theodor 122
Stoffers, Robert 122 (n.3)
Stolpe, Erwin 126 (n.6)
Strasser, Josef 330
Streicher, Julius 97
Streicher, Oskar 94
Su, Armand 501 (n.3)
Su Bihui 184, 186
Sunnam, Ort (Ofitovič) 194 (n.3), 340 (n.4)
Sutkovoj, V.G. 383
Svadost, È.P. 512-514
Szapiro, Jakób 128 (n.6)
Szatmári, Sándor 221, 390
Szerémi-Tóth, Borbála 468, 469, 482 (n.2)

Šackin, Lazar 252, 253
Šćegolev, N.G. 416 (n.2)
Škarvan, Albert 31
Šul'gin, V. N. 353
Šumilov, Pavel 395
Šustr, Jaroslav 487 (n.3)
Šváček, Miloslav 499

Takaragi Yutaka 178 (n.1)
Takeuti Tôkiti 181
Takeuti Zirô 177, 178
Thieme, Fritz 119, 120, 125

Thierfelder, Franz 95, 96, 140
Thomas, L.L. 364
Thorsen, Poul 278 (n.1), 437
Tihu Tosio 169, 170, 181
Tito, Josip Broz 460
Titov, German 395
Titov, L.T. 191 (n.3)
Titov, Stepan 395
Tolstoj, L.N. 25, 26, 28, 55, 166, 328 (n.3), 398 (n.6), 526
Trauden, Matthias 115 (n.2)
Travníček, František 467
Trockij, L.D. 212, 235, 239, 290, 357 (n.1), 394 (n.2)
Tuĥačevskij, M.N. 389

Ul'janova, M.I. 251, 340, 400 (n.4)
Umesao Tadao 188
Unger, Hans 127
Usmanov, Šamil' 299 (n.4)
Uspenskij, B.A. 510 (n.2)
Ušakov, D.N. 191 (n.3)

Vaillant, Edouard 55
Valentinov, M.S. 193 (n.1)
Varankin, V.V. 236 (n.2), 392, 402 (n.2)
Vares-Barbarus, J.J. 398
Vasil'ev, V. A. 510 (n.2)
Veiras d'Alais, Denis 317
Vildebrand, Willi 266, 272 (n.1)
Vinogradov, V.V. 457 (n.1), 480 (n.3)
Visser, F. 299 (n.1)
Vogt, Anton 148 (n.4)
Voltaire 317
Vossler, Karl 82

Walther, Kurt 110-114, 118, 119
Waringhien, Gaston 6
Weber, Gustav 131
Weber, Karl 235, 236 (n.1)
Weder, Theodor 214 (n.4)
Weissberg, Alex 396, 397, 399
Weitling, Wilhelm 318-320, 322
Whitham, Arthur 220 (n.3)
Wiesenfeld, Edward 128 (n.6)
Wilson, Woodrow 60
Wolff, F. 272 (n.1)
Wu Zhihui 163
Wüster, Eugen 93, 385, 386, 388, 389

Xoxe, Koçi 438
Xu Shouzhen (Eltunko) 164, 165

Yamaga Taizi 172
Yamaguti Kosizu 185
Yamakawa Hitosi 186 (n.4)
Yamakawa Kikue 185 (n.4)
Ye Laishi 162, 176
Yonemura Ken 175 (n.2)

Zamenhof, Adam 128
Zamenhof, L.L. 5, 15-26, 31, 32, 34, 36-42, 44, 45, 48, 49, 54, 57-59, 75, 83, 97, 108, 111, 113, 119, 124, 128, 139, 141, 148, 150, 155, 166, 168, 170, 178, 179, 181, 191, 201, 202, 281, 325, 327, 328, 346, 349, 361, 374, 394 (n.2), 449, 485, 497, 503, 512, 526, 530
Zamenhof, Lidja 128, 148
Zamenhof, Marko 16, 21-23
Zamenhof, Wanda 128 (n.5)
Zamenhof, Zofia 128
Zápotocký, Antonín 465
Zil'berfarb, I.I. 210, 213, 215
Zimmermann, Albert 48, 49, 72, 97
Zimmermann, Ida 128
Zinov'ev, G.E. 212, 235, 240, 333, 340, 341 (n.1)
Zola, Emile 34
Zolotarev 510 (n.2)
Zusmen, N.V. 23
Zyrjanov, Benjamin 235

NOTO PRI LA AŬTORO

Ulrich Lins, la aŭtoro de tiu ĉi libro, estas germano kaj naskiĝis en 1943 en Bonn. En la Universitatoj de Köln kaj Bonn li studis historion, politikan sciencon kaj japanologion. En 1971/72 li restadis kiel gast-esploranto en la Ekonomia Fakultato de la Universitato de Tokio. Li doktoriĝis per tezo pri la historio de Oomoto (kun aparta atento al ĝia pozicio rilate al la japana naciismo). La disertacio, kiu estis premiita de la Filozofia Fakultato de la Universitato de Köln, aperis libroforme en 1976.*

Profesie U. Lins okupiĝas pri la interŝanĝo de universitatanoj inter FR Germanio kaj aziaj landoj, tiucele loĝinte de 1978 ĝis 1983 en Japanio.

Esperanton li eklernis en 1958. Li havis diversajn funkciojn en la movado: 1964-69 estrarano de TEJO, 1967-69 reprezentanto de TEJO ĉe la estraro de UEA, 1970-74 kunredaktoro de *Kontakto* kaj dum kelkaj periodoj (laste ekde 1986) komitatano de UEA. Lins estas ankaŭ ofta preleganto, i.a. en la Internacia Kongresa Universitato.

Li kunredaktis la verkon *Esperanto en perspektivo* (1974), germanlingvan libron pri german-japanaj rilatoj (1977) kaj dekduvoluman japanlingvan verkon pri la historio kaj nuntempo de Germanio (1981-1986). Li verkis, krome, plurajn artikolojn en Esperanto, precipe pri historiaj temoj, kaj en la germana, lastatempe ĉefe pri problemoj de universitata edukado kaj kultura interŝanĝo. Jam de kelkaj jaroj UEA komisiis al d-ro Lins (kiel ĉefredaktoro) la pretigon de nova *Enciklopedio de Esperanto.*

Vojaĝe U. Lins konatiĝis kun pluraj orienteŭropaj ŝtatoj kaj

---

* *Oomoto-Bewegung und der radikale Nationalismus in Japan, Die* (1976), Ulrich Lins. München: R. Oldenbourg Verlag GmbH, 1976. 300p. 24cm. Bind. ISBN 3 486 44451 4. Mendebla ĉe UEA; prezo: 21,00 gld.

kun la plej multaj landoj de Azio, inkluzive de Soveta Unio, Ĉinio kaj Vjetnamio.

Li nun vivas en Köln kun siaj edzino kaj du infanoj.

Samtempe kun tiu ĉi Esperanta eldono aperis, en la sama eldonejo, koncizigita versio de *La dangera lingvo* en la germana: *Die gefährliche Sprache.*

ЛИНЦ У.
ОПАСНЫЙ ЯЗЫК
На языке эсперанто

Редактор *А. Б. Шевченко*
Художественный редактор *Г. Г. Губанов*
Технический редактор *Е. В. Антонова*
ИБ № 18730

Фотоофсет. Подписано в печать 01.02.90. Формат 84x108 1/32.
Бумага офсетная № 1. Печать офсетная. Условн. печ. л. 29,82.
Усл. кр.-отт. 30,13. Уч.-изд. л. 35,62. Тираж 6595 экз. Заказ №01203.
Цена 6 р. 80 к. Изд. № 47427.

Ордена Трудового Красного Знамени издательство "Прогресс"
Государственного комитета СССР по печати.
119847, ГСП, Москва, Г-21, Зубовский бульвар, 17.

Ордена Трудового Красного Знамени Московская типография № 7
"Искра революции" В/О "Совэкспорткнига" Государственного комитета СССР по делам издательств, полиграфии и книжной торговли.
103001, Москва, Трехпрудный пер., 9.